EBBE VILBORG

ETIMOLOGIA VORTARO DE ESPERANTO

VOLUMO 5: S – Z

ELDONA

EBBE VILBORG

ETIMOLOGIA VORTARO DE ESPERANTO

VOLUMO 5: S – Z

ELDONA SOCIETO ESPERANTO
STOCKHOLM 2001

Ebbe Vilborg:
ETIMOLOGIA VORTARO DE ESPERANTO
Volumo 5: S – Z

Eldono: Eldona Societo Esperanto
Stockholm 2001
Kompostado: Omnibus Typografi, Tyresö
Kovrilo kaj grafika aranĝo: Franko Luin
Preso: Kristianstads Boktryckeri 2001

ISBN 91-85288-23-3

ETIMOLOGIA VORTARO DE ESPERANTO

Klarigo de signoj

*	ĉe pralingva radiko aŭ vortformo indikas neatestitan, nur supozatan formon
*	ĉe Interlingua-formo indikas vorton ne troveblan en Interlingua-English Dictionary
†	arkaikiĝinta aŭ malofte uzata vorto/formo
>	evoluis al
<	evoluis el
=	post la sigloj Io (Ido), Ie (Interlingue), Ia (Interlingua) indikas, ke la responda vorto en la resp. lingvo havas formon identan kun la Esperanta
[]	Interkrampe estas metataj proksimumaj prononcindikoj, bazitaj sur la Esperanta alfabeto; rimarku la jenajn signojn:
ó	(ktp) indikas lokon de la akcento
ô	(ktp) indikas nazalan vokalon
o:	(ktp) indikas longan vokalon
ä	indikas vastan antaŭan nerondan vokalon (A *a* en *hat*)
ö	indikas mezvastan antaŭan rondan vokalon (F *eu* en *neuf*)
y	indikas malvastan antaŭan rondan vokalon (F *u* en *lune*, G *ü*)
e'	indikas mezvastan centran nerondan vokalon (A *a* en *about*)
a'	indikas mezvastan malantaŭan nerondan vokalon (A *u* en *butter*)
c	indikas la palatal-alveolaran frikativon signitan per *ch* en G *ich*
dh	indikas voĉan dentalan frikativon (A *th* en *the*)
th	indikas nevoĉan dentalan frikativon (A *th* en *thing*)
k'	(ktp) indikas aspiracion de la koncerna plozivo
l'	indikas moligitan l-sonon kiel en I *figlio*
n'	indikas moligitan n-sonon kiel en F *baigner*

n indikas voĉan nazalan velaron (A *ng* en *ring*)

1-8 indikas la numeron de tiu Oficiala Aldono (OA), en kiu la koncerna radiko estas oficialigita.

Rimarko. Ĝenerale sen komento restas en la vortaro la jenaj Eaj redonoj de fontlingvaj skriboj: Eo *i* < *y*; *f* < *ph*; *k* < *c* (antaŭ *a,o,u*); *k* < *ck* ; *ks* < *x*; *kv* < *qu*; *t* < *th* [t]; *v* < GPo *w*; plue unu konsonanto en Eo el duoblaj en la fontlingvoj. Estas ankaŭ normale, ke Ea kategorivokalo (*-o, -a, -e-, -i*) anstataŭas la finvokalon de la fontlingva etimo.

Sigloj de vortaroj kaj aliaj fontoj

AdA	Aktoj de la Akademio
Ald	Aldono al la Dua Libro (1888)
Be	de Beaufront, Dictionnaire Espéranto-Francais (1902)
BEsp	British Esperantist (periodaĵo)
BRO	Baza Radikaro Oficiala (AdA 1968-1974)
BgE	Bulgara Esperantisto (periodaĵo)
Dipl	Zamenhof, Alvoko al la diplomatoj (eld. Paolet 1922)
Du	Dua Libro de l'Lingvo Inernacia (1888)
EdE	Enciklopedio de Esperanto (1933)
EG	Meza Vortaro Internacia-Germana (1889)
E-isto	(La) Esperantisto (periodaĵo 1889-1895)
Ekz	Ekzercaro (en Fundamento de Esperanto)
El	Eliro (Biblio)
Eologio	Esperantologio (periodaĵo)
ER	Plena Vortaro Esperanta-Rusa (1909)
Fab I	Fabeloj de Andersen, unua parto (1923)
Fab III	Fabeloj de Andersen, tria parto (1932)
FK	Fundamenta Krestomatio (1903)
FrE	Franca Esperantisto (periodaĵo)
Fund	Fundamento de Esperanto (9-a eld. 1963)
GD	Waringhien, Grand Dictionnaire Espéranto-Francais (1957)
GE	Zamenhof-Jürgensen, Wörterbuch Deutsch-Esperanto (1904)
IED	Interlingua-English Dictionary. New York 1951.
HdE	Heroldo de Esperanto (periodaĵo)
Jü	Jürgensen, Wörterbuch Esperanto-Deutsch (3-a eld. 1909)

Jü 1	sama verko, 1-a eld. (1904)
Ka	Kabe, Vortaro de Esperanto (1910)
LaE	La Espero (periodaĵo)
LEsp	L'Espérantiste (periodaĵo)
LiF	Literatura Foiro (periodaĵo)
LInt	Lingvo Internacia (periodaĵo)
LR	Lingvaj Respondoj (3-a eld. 1936)
LV	Waringhien, Lingvo kaj Vivo (1959)
LZ	Leteroj de Zamenhof, eldonis G.Waringhien (1948)
Mat	Mateo (Biblio)
Mon	Monato (periodaĵo)
MT	Malnova Testamento (Biblio)
NBg	Nuntempa Bulgario (periodaĵo)
NT	Nova Testamento (Biblio)
MuT	Butler & Merrick, Muzika Terminaro (1944)
OA	Oficiala Aldono (1-8)
OVE	Grenkamp, Oficiala Vortaro de Esperanto (1937)
PAG	Plena Analiza Gramatiko de Esperanto (1980)
Par	Kongresaj Paroladoj de Zamenhof (I-VIII)
PF	de Beaufront, Manuel complet de...Esperanto (1892)
Pgr	Progreso (periodaĵo)
PIV	Plena Ilustrita Vortaro (1970)
PL	Planlingvistiko (periodaĵo)
PR	Poŝa Lernolibro por Rusoj (1890)
Ps	La Psalmaro (Biblio)
PV	Plena Vortaro (1934)
PVZ	Plena Verkaro de Zamenhof, vd. Bibliografiaj indikoj
Rabi	La rabistoj (trad. Zamenhof, 1908)
RE	Plena Vortaro Rusa-Internacia (1889)
Rom	Letero al la Romanoj (Biblio)
ScR	Scienca Revuo
Un	Unua Libro (1887); *Un R* = rusa eldono; *Un Po* = pola eldono; *Un F* = franca eldono; *Un G* = germana eldono
UV	Universala Vortaro (1894)
Ve	Verax, Enciklopedia Vortareto Esperanta (1910)
Vulg	Vulgato
Wü	Wüster, Enciklopedia Vortaro Esperanta-Germana (I-IV, 1923-1929; postaj partoj laŭ mikroslipa eldono 1996)
ZR	Zamenhofa Radikaro. Leipzig 1927.

Kelkaj publikigaĵoj de la unuaj jaroj estas markitaj per la respektiva numero donita de Zamenhof; en tiu ĉi volumo:

N-ro 14 1888	Puŝkin, La neĝa blovado (trad. Grabowski). Varsovio.
N-ro 15 1888	Einstein, La lingvo Internacia als beste Lösung des internationalen Weltspracheproblems. Nürnberg.
N-ro 24 1889	Internationelt språk. (Unua libro, trad. por svedoj.) Varsovio.
N-ro 30 1889	Lermontov, Princino Mary (trad. E. de Wahl). Varsovio.
N-ro 52 1892	Geoghegan, The Universal Language Esperanto. Nürnberg.

La diversaj variantoj de Zamenhofa Esperanto estas indikitaj per la respektiva jaro: 1878 (PVZ 5, 101 s.,109; LV p. 23, 38-40); 1881-2 (PVZ 5, 103-106, 110-127, 130-153; LV p. 23-37, 41-48; Cash 1992); 1894 (PVZ 3, 162-164, 169-175); 1906a (PVZ 7, 236-251); 1906b (PVZ 7, 387-405); 1907 (PVZ 8, 166-181).

Mallongigoj de lingvoj

A	angla
Ar	araba
Av	avesta
Bg	bulgara
Ĉ	ĉina
Ĉe	ĉeĥa
Da	dana
Eo	Esperanto
eo	Esperanto (neoficiala)
Et	etruska
F	franca
Fi	finna
Fk	franka
G	germana
Gr	greka (= helena)
Gt	gota
Gv	gvarania
H	hispana
HE	hindeŭropa pralingvo
(H)E	hindeŭropa radiko atestita nur sur eŭropa teritorio
He	hebrea
Hi	hindia
Ht	hetita
Hu	hungara
I	itala
Ia	Interlingua
Ie	Interlingue (Occidental)
Io	Ido
Ir	irlanda
Is	islanda
Ji	jida
Ki	kimra
Kt	kataluna
L	latina
Li	litova
Lt	latva
Nd	nederlanda
Nl	Novial
No	norvega
Oc	okcitana
P	portugala
Pe	persa
pEo	pra-Esperanto
pĜ	praĝermana
Po	pola
pSl	praslava
R	rusa
Rm	rumana
Sa	sanskrita
SK	serbokroata
Sk	skandinava
Sv	sveda
Tu	turka
Us	usona angla
Vp	Volapük

La koncerna nomo de lingvo estas ofte kompletigata per aldono signanta epokon aŭ nivelon, ekz. por la latina: L mez., L vulg. ktp. Tiuj aldonoj estas klarigataj en la listo de ceteraj mallongigoj.

Transskriboj

Transskribo de la helena alfabeto:

a, b, g, d, e, z, ê, th, i, k, l, m, n, x, o, p, r, s, t, y, ph, kh, ps, ô. Vortkomenca vokalo aspiraciita estas signata per h (*hypó);* tiu litero ankaŭ sekvas vortkomencan r- *(rhódon).*

Transskribo de la rusa alfabeto:

a, b, v, g, d, e, ë, ĵ, z, i, k, l, m, n, o, p, r, s, t, u, f, ĥ, c, ĉ, ŝ, ŝĉ, -, y, ', e, ju, ja.

En polaj vortoj, la diakritaj literoj estas redonataj tiel:

c', l', n', ó, s', z'. Nazalaj a kaj e ne estas speciale markataj.

La sonoj de la sanskrita lingvo estas redonataj jene:

Vokaloj: *a, â, i, î, u, û, r, l*
Diftongoj: *e, ai, o, au*
Guturaloj: *k, kh, g, gh, n*
Palataloj: *ĉ, ch, ĵ, jh, n'*
Cerebraloj: *t', t'h, d', d'h, n'*
Dentaloj: *t, th, d, dh, n*
Labialoj: *p, ph, b, bh, m*
Duonvokaloj: *y, r, l, v*
Siblaj sonoj: *c, ŝ, s*
Laringalo: *h*

Ceteraj mallongigoj

abstr.	abstrakta
abl.	ablativo
adj.	adjektivo
adv.	adverbo
Akad.	Akademio
akuz.	akuzativo
alt.	alternativa vortformo
anat.	anatomia termino
ank.	ankaŭ
anst.	anstataŭ
ant.	antikv(epok)a
aor.	aoristo
arĥ.	arĥaika
Arist.	Aristotelo
ark.	arkitektura termino
art.	artikolo
astr.	astronomia termino
aŭgm.	aŭgmentativo
biz.	bizanca
bot.	botanika termino
C	konsonanto
cet.	cetera(j)
ĉ.	ĉirkaŭ
dat.	dativo
dem.	demonstrativa
dep.	deponento (= aktiva verbo kun pasiva formo)
der.	deriv/aĵo, -ita
dial.	dialekta formo
dif.	difin(it)a
dim.	diminutivo
div.	diversaj
dmd.	demanda
dukat.	dukategoria
Ea/ea	Esperanta/esperanta
ekl.	eklezia
ekz.	ekzempl/e, -o(j)
eld.	eldono
espismo	esperantismo (= imito de Ea formo)
etim.	etimologi/a, -o
ev.	eventual/a, -e
f	Fundamenta radiko
f'	radiko trovebla en la Fundamento ekster Universala Vortaro
fam.	famili/o, -ara
farm.	farmakologia termino
fem.	femala, ingenra
ferv.	fervoja termino
fig.	figura senco
fil.	filozofia termino
filol.	filologia termino
fiz.	fizika termino

fut.ekz.	futuro ekzakta (tempoformo)
geogr.	geografia termino
geom.	geometria termino
gram.	gramatika termino
ĝen.	ĝeneral/a, -e
ĝerm.	ĝermana
Hom.	Homero
Hor.	Horacio
imp.	imperativo
impf.	imperfekto
inf.	infinitivo
int.	internacia
jc	jarcento
jur.	jura termino
k	kaj
k.a.	kaj aliaj
kem.	kemia termino
kjg.	konjugacio
klas.	klasika
k.m.a.	kaj multaj aliaj
kom.	komerca termino
kond.	kondicionalo
konj.	konjunkcio
kor.	korekto
kp	komparu
kron.	keonologia termino
k.s.	kaj simil/aj, -e
ktp	kaj tiel plu
kunm.	kunmet(aĵ)o
l.c.	loko citita
let.	letero (de Zamenhof)
L.I.	lingvo internacia
lit.	literatura termino
LK	Lingva Komitato
lok.	lokativo
mask.	maskla, virgenra
mat.	matematika termino
med.	medicina termino
med.-pas.	mediala-pasiva (voĉo)
mez.	mezepoka
mil.	militista termino
min.	mineralogia termino
mit.	mitologia termino
mll.	mallongigo
mod.	modern(epok)a
muz.	muzika termino
nom.	nominativo
ntr.	neŭtra
obj.	objekto
orig.	origin/e, -a
o.s.	oneself (A = sin)
p.	paĝo
par.	parenca
pas.	pasiv/a, -o
pEa	praEsperanta
perf.	perfekt/a, -o
perm.	permes/o, -ita
pers.	person/o, -a
plur.	pluralo
pluskv.	pluskvamperfekto
pos.	posesiv/a, -o
postkl.	postklasika
pp	parolante pri
prapar.	praparenca
pref.	prefikso
prep.	prepozicio
pret.	preterito
prez.	prezenc/a, -o
proks.	proksimum/a, -e
pron.	pronomo
prop.	propon/o, -is
propr.	propradire
ps-pf	pseŭdoprefikso
ps-sf	pseŭdosufikso
ptc	participo
rad.	radik(al)o
red.	redakt/is, -oro

refl.	refleksiva
reg.	regiona vorto
resp.	respektiv/a, -e
ril.	rilativa
rim.	rimark/u, -igo
rom.	romana
s.	kaj sekva(j)
sc.	scienca
sekv.	la sekva(n)
sem.	semantika
sim.	simil/aj, -aĵo, -e
sin.	sinonimo
sing.	singularo
s.j.	sen jaro
sk.	subkomprenu
s.l.	sen loko
spec.	speciale
s.s.	sama senco
s.t.v.	sub tiu vorto
subst.	substantivo
suf.	sufikso
sup.	supin/a, -o
supl.	suplemento
s.v.	sub la vorto
t.e.	tio estas
tekn.	teknika termino
tip.	tipografia termino
t.n.	tiel nomata
trig.	trigonometria termino
V	vokalo
var.	varianto
vb	verbo
v.c.	verko citita
vd.	vidu
Vpa	Volapüka
vet.	veterinara termino
vulg.	vulgara
Z	Zamenhof
Z-a	Zamenhofa
zool.	zoologia termino

Bibliografiaj indikoj

Adresaro	Adresaro de Esperantistoj; eld. de Zamenhof, unuafoje 1899.
Ahlberg 1905	Esperanto-svensk ordbok. Stockholm.
Albault 1959	Pri la fontoj de Esperanto. NBg 9.
Albault 1961	Etimologio, pra-Esperanto kaj Mistrala lingvo. Eologio II:2, 87-92.
Albault 1991a	Vojaĝo tra la landoj. Saarbrücken.
Albault 1991b	Multlingva glosaro pri landnomoj. Saarbrücken.
Atanasov	La elementoj de Esperanto – ĉu arbitre elpensitaj? En: Li k Ni (vd. tiun), 133-139.
Back 1980	Pri planlingva etimologio. En: Szerdahelyi 1980, 266-276.
Backman 1919	Esperanto-svensk ordbok. Stockholm.
Backman 1921	Svensk-esperantisk ordbok. Stockholm.
Bastien	Naŭlingva etimologia leksikono. 2-a eld. London 1950.
Bausani	Geheim- und Universalsprachen. Stuttgart-Berlin-Köln-Mainz 1970.
de Beaufront 1898	Formation de l'Esperanto. L'Espérantiste 6, 65-69.
de Beaufront 1925	Kompleta gramatiko detaloza di Ido. Esch-Alzette.
Bennemann	Handwörterbuch Esperanto-Deutsch & Deutsch-Esperanto. Leipzig 1923.
Berger 1947	Li lingue international justificat. Chapelle.

Bianchini Cursus completus Esperanti. San Vito al Tagliamento 1934.

Biblia Vortaro Parusel & Wojtakowski (direkcio): Biblia Vortaro. Ravenna 1975.

Boulton Zamenhof, aŭtoro de Esperanto. La Laguna 1962.

Breinstrup Interlingua-Dansk Ordbog. 1989.

Bricard Matematika terminaro. Paris 1905.

Briquet Esperanta teknika medicina vortaro. Bruxelles 1932.

Broadribb 1970 Esperanto and the ideology of constructed language. International Language Reporter 56, 1-9.

Brozoviĉ 1959 Zamenhof kaj la litova lingvo. NBg 1, 10-11.

Butin & Sommer Wörterbuch Esperanto-Deutsch. Limburg/ Lahn s.j.

Butler 1967 Esperanto-English Dictionary. London.

Cash Praesperanto: Lingvo universala. La Kancerklinikoteko 1992.

Castellina Interlingua lingua internazionale. 1991 s.l. (Union Interlingua de Helvetia).

Cherpillod 1990 La Zamenhofa radikfarado. Memeldono.

Cherpillod 1992 Mil ekzotaj vortoj. Memeldono.

Christaller 1923 Deutsch-Esperanto Wörterbuch. [Stojan Bibl., n-ro 2434.]

Cleij Woordenboek Interlingua-Nederlands. 4-a eld. Bilthoven 1996.

Collinson 1950 The Internationality of some Esperanto Affixes. Eologio I:2, 81-88.

Collinson 1959 Germanic Elements in the Vocabulary of Esperanto. Eologio II:1, 1-12.

Collinson 1961 Pri kelkaj kulturvortoj. Eologio II:2, 93-99.

Couturat & Leau Histoire de la langue universelle. Hildesheim-New York 1979.

Drezen Historio de la mondolingvo. 3-a eld. Oosaka 1967.

Duc Goninaz 1974 Les influences slaves en Esperanto. Cahiers de linguistique, d'orientalisme et de slavistique 3-4, 31-53.

Duc Goninaz 1978 Pri la influo de la slavaj lingvoj al Esperanto el leksikologia vidpunkto. Filologo 11, 1-5.

Duliĉenko Meĵdunarodnye vspomogatel'nye jazyki. Tallinn 1990.

EdE Enciklopedio de Esperanto. Budapest 1933.

Feder Grosses Wörterbuch Deutsch-Ido. Lisslingen 1919.

Foote 1956 Perditaj fontoj de la Esperanta liriko. Nica literatura revuo , p. 85-88.

Fulcher & Long English-Esperanto Dictionary. 1921.

Fund Zamenhof, Findamento de Esperanto. 9-a eld. Marmande 1963.

Gerdman 1947 Pri la deveno de la sufiksoj. LaE 8, 85.

Gerdman 1957-8 Pri la deveno kaj la parenceco de la afiksoj en Esperanto. LaE 8-9, 10, 11-12/1957; 2, 6-7-8, 11-12/1958.

Gode & Blair 1951 Interlingua, a grammar of the international language. New York.

Gold 1980 Towards a Study of possible Yiddish and Hebrew influence on Esperanto. En: Szerdahelyi 1980, 300-367.

Golden 1979 La etimologio de la sufikso -il en Eo. Filologo 13, 5-7.

Golden 1983 Ĉu estas germanaj vortoj en Esperanto? der esperantist 6, 128 s.

Golden 1985 Influo de Volapuko sur la ĝermanan komponanton de Esperanto. En: Li k Ni, p. 401-413.

Golden 1993 Kio estas la deveno de la mistera vorto "tuj"? Dia Regno 7, p. 6 s.

Goldschmidt 1923 Bildotabuloj por la instruado de Esperanto. 3-a eld. Leipzig.

Gopsill 1990 International Languages – a matter for Interlingua. S.l. (British Interlingua Society).

Gregor 1958 La fontoj de Esperanto. Scienca revuo 34-35 (vol.IX, n-roj 2-3), p. 92-110.

Gregor 1982 La fontoj de Esperanto. 2-a eld. Glasgow.

Grosjean-Maupin 1910a Dictionnaire complet Espéranto-Francais. Paris.

Grosjean-Maupin 1910b	Notes pédagogiques (40). Franca Esperantisto, 187 s.
Günkel 1996	Adiaŭ, naŭ ĵaŭdaj fraŭlinoj! LiF 162, 185-190.
Haas 1956	Grammatica de Interlingue en Interlingue. Winterthur.
Holzhaus	Doktoro kaj lingvo Esperanto. Helsinki 1969.
Inglada & Villanueva	Manual ... de la lengua internacional Esperanto. Barcelona 1905
Jacob	Esperanto-Ido, vortaro. Berlin 1934.
Janton	L'espéranto. Paris 1973.
Jespersen 1928	An International Language. London.
Karmanov 1926	Karmanov i Spiridoviĉ, Russko-Esp. Slovar'. Kazan. [Stojan Bibl., n-ro 3044.]
Kiselman	Kial ni hejtas la hejmon sed ŝajnas fajfi pri la fajlado? LiF 138/1992, 213-216.
Kolker	Kontribuo de la rusa lingvo al la verba sistemo de Esperanto. En: Serta gratulatoria in honorem J. Régulo, vol. II, 315-325. La Laguna 1987.
Laskin	La vortformado en la lingvo Esperanto. LInt 10-11/1896, 201-203.
Léger & Albault 1961	Dictionnaire Francais-Espéranto. Marmande.
Li k Ni	Li kaj Ni: Festlibro por...G. Waringhien. Antverpeno-La Laguna 1985.
LR	vd. Zamenhof.
Matejka 1945	Wörterbuch Occidental-Deutsch und Deutsch-Occidental. Chapelle.
Mattos 1987	La deveno de Esperanto. Chapecó.
Meazzini 1922	Novo Vocabolario Esperanto-Italiano. San Vito al Tagliamento.
Modrijan	Elementoj latinaj en Esperanto. Ljubljana s.j.
Mondmapo	(red. T. Sekelj) Beogrado 1968.
Monnerot-Dumaine	Précis d'interlinguistique générale et spéciale. Paris 1960.
Murgin 1992a	La sufikso -il- estas slavdevena. BgE 7/1992, 15-17.
Murgin 1992b	Pri la genezo de tabelvortoj. BgE 8/1992, 22-23.
Murgin 1992c	Pri la genezo de sufiksoj -el,-es en korelativa tabelo. BgE 11/1992, 11-12.

Nomura	Zamenhofa ekzemplaro. Nagoya 1989.
Nordin	Svensk-Interlingua ordbok. Stockholm 1965.
Nylén 1954	Esperantisk-svensk ordbok. 2-a eld. Stockholm.
Pabst 1997	Ĉu mistero de nia lingvo? LiF 166, p. 108 s.
Polczynski 1912	Apologio di la "Pitagorala" tabelo di Esperanto. Pgr 47, 665.
Poŝka 1971	Povus esti, ke Zamenhof konis iom el la litova. Esperanto 6/1971, 105.
Poŝka 1981	Litovaĵoj en Esperanto-gramatiko. Filologo 18, 6.
Privat VZ	Vivo de Zamenhof. 2-a eld. Rickmansworth 1937.
PVZ	vd. Zamenhof.
Ruhrig	Wörterbuch Deutsch-Interlingua. Freiburg (Breisgau) 1991.
Schleyer 1885	Wörterbuch der Universalsprache Volapük. 3-a eld. Konstanz.
Scott	The Structure of Esperanto. The Esperanto Monthly 1919, 111 s.
Setälä	Plena Vortaro Finna-Esp. Helsinki 1923.
Silfer	Hipotezoj pri kriptaj aspektoj de Esperanto. Planlingvistiko 7/1983, 4-8.
SO	Berggren & Blomé & Sköld, Svensk Occidental-ordbok. Stockholm 1946.
Spíritu	Spíritu de Occidental. Li ovre de E. de Wahl. Chapelle 1938.
Stenström	Interlingua-svensk ordbok. Lund 1995.
Stojan Bibl.	Bibliografio de internacia lingvo. Genève 1929.
Stojan 1953	Deveno & vivo de la lingvo Esperanto. Brugge.
Szerdahelyi 1980	(red.) Miscellanea Interlinguistica. Budapest.
Szerdahelyi 1987	Principoj de Esperanta etimologio. En: Duc Goninaz (red.), Studoj pri la internacia lingvo (Gent), p. 109-137.
Taschenwörterbuch 1907	Zamenhof, Taschenwörterbuch Deutsch-Esp. & Esp.-Deutsch. Berlin.
Trunte 1971	Ĉu la litova lingvo influis Esperanton? Esperanto 6, 104 s.
Varankin	Teorio de Esperanto. Moskvo 1929. [Represo Saarbrücken 1977.]

Vilborg 1947	Sufiksa etimologio. LaE 4, 49.
VZ	vd. Privat.
Wajsblum 1951	Noto pri: Internacieco de kelkaj Esperantaj afiksoj. Eologio I:3, 205 s.
Waringhien LV	Lingvo kaj vivo. La Laguna 1959.
Waringhien 1967	ABC d'Espéranto à l'usage de ceux qui aiment les lettres. 2-a eld. Paris.
Webster	Webster' s Third New International Dictionary. Springfield 1968.
Wiener 1950	Ĝemelaj radikoj. Eologio I:2, 98-106.
Wüster Esp. princ.	Esperantologiaj principoj. En: Enciklopedia Vortaro Esperanta-Germana, vol. II-III (1925 resp. 1926). Leipzig.
Yamasaki	Etimologia vortareto pragmata de Esperanto. Tokio 1991.
Yamasaki supl.	sama verko, Suplemento, 5-a eld. Tokio 1995.
Zamenhof LR	Lingvaj Respondoj. 3-a eld. Paris 1936.
Zamenhof PVZ	Plena verkaro de L.L. Zamenhof. Kajeroj I: 1-10, II: 1-6. Kioto 1973-1988 (kun postaj aldonoj).

S

SABAT/O (f; Un) 1) antaŭdimanĉa tago de la (kristana) semajno (Un) 2) juda ripoztago (Jü): A *sabbath* (2), F *sabbat* (2), G *Sabbath* (2), I *sabato* (1, 2), Po *sobota* (1), *sabat* (2), R *subbota* (1, 2), (H *sábado* 1, 2); L *sabbatum* (2). Kp la vortkomencon de A *Saturday,* F *samedi,* G *Samstag* (ĉiuj 1). La sola nomo de semaj**ETIMOLOGIA VORTARO DE ESPERANTO**notago, kiu ne estas ĉerpita el F (kp *dimanĉo, lundo* ktp). La kaŭzo de tio estas sendube la ekzisto de internacia vorto por tiu ĉi tago, ĉefe por signifi la judan ripoztagon sed ankaŭ (ekz. en la fontlingvoj IPoR) la analogan tagon en la kristana kalendaro. Estis do eble por Z kombini tiujn du signifojn. Li prenis la radikon en ĝia plej internacia formo (AFGIL ĉiuj rezultigus *sabat-* en Eo). Ĉe Gregor (1982, 28) listigita kiel italdevena; tamen Gold (1980, 339) esence pravas, kiam li konstatas: 'Mi opinius ke sabat ne estas el la itala aŭ la hebrea sed kompromisa formo bazita sur la vorto por "sabato" en tiel multaj lingoj kiel Zamenhof sciis.' ¶ Io *saturdio* (1), *sabato* (2); Ie *saturdí* (1), *sábbat* (2); Ia *sabbato* (1, 2).

Pere de Gr *sábbaton* el He *ŝabbât* s.s., propr. "ripozo", de *ŝâbat* "ĉesi agi, ripozi." (El Gr biz. var. *sámbaton* devenas la cititaj FG nomoj de la semajna tago [F *-di,* G *-tag* "tago"]; A *Saturday* signifas "tago de Saturno", kp L *Saturni dies*). – Cherpillod 1992, 92.

SABL/O (f; Un): F *sable,* I *sabbia.* Kp L *sabulum* "gruzo, dikgrajna sablo" kaj la komencsilabon de A *sand,* G *Sand* "sablo". Bazita sur F. ¶ Io =, Ie *sand,* Ia *sablo.*

FI el L *sabulum,* kiu povas deveni de **psaflom;* tiuokaze par. al Gr *psámmos* "sablo" (HE **bhsamdho-;* la radiko aperas ankaŭ en Sa *bábhasti* "dismaĉas, dismordas"). Oni provis rekonduki la ĝerm. formojn al la sama origino (HE var. **samdho-;* kp Gr *ámathos* "sablo").

SABR/O (1; Jü): AF *sabre,* G *Säbel,* I *sciabola,* Po *szabla,* R *sablja,* (H *sable*). Formo laŭ AF; al la ebla alternativa formo *sabl-* Z jam estis doninta alian signifon. ¶ Io =, Ie *sabre,* Ia *sabla.*

Pere de la slavaj lingvoj el Hu *száblya* s.s. (eble ligita kun *szabni* " tajli"). – Cherpillod 1992, 92.

SACERDOT/O (4; Wü, PV): L ekl. *sacer/dos -dotis;* I(H) *sacerdote.* Kp AF *sacerdotal* "-a". Pli strikta signifo en Eo ol en la fontlingvoj ("pastro" ĝenerale). La vorto aperas en PV samtempe kun *pastor/o,* probable por servi kiel katolika respondaĵo al tiu protestanta termino. ¶ Pri IoIaIe, vd. sub *pastro.*

En L klas. "pastro" (ĝenerale); propr. "oferanto": la unua elemento estas L *sacer* "sankta" (kp *sacra* "oferaĵoj"; vd. *sakramento*), la dua apartenas al HE rad. **dhê-* "meti,

fari" (vd. sub *fari*).

SAFIR/O (f; RE): A *sapphire,* F *saphir,* G *Saphir,* I *zaffiro,* Po *szafir,* R *sapfir,* (H *záfiro*); L *sapphirus.* Bazita sur FG kun normala simpligo *ph* [f] > *f.* ¶ Io =, Ie *safire,* Ia *sapphiro.*

El Gr *sáppheiros* s.s., pruntita el semida lingvo, kp He *sappîr.* – Cherpillod 1992, 93.

SAFRAN/O (f; RE): A *saffron,* F *safran,* G *Safran,* I *zafferano,* Po *szafran,* R *ŝafran,* (H *azafrán*). Formo laŭ FG. ¶ Io =, Ia *safran,* Ie *-e.*

El Ar *za'farân* s.s. de nekonata origino. – Cherpillod 1992, 93.

SAG/O (f; RE): L *sagitta;* I *saetta,* (H *saeta*). Kp A *sagittate* "sagoforma". La L radiko estas konata en unu nomo de zodiaka signo (L *Sagittarius* "Pafarkisto" > eo *Sagitari/o* PIV; kp F *Sagittaire,* H *sagitario* s.s.). La Ea formo estas mallongigo de la latina (Waringhien LV 76; vd. tie analogajn ekzemplojn). Radikfino *-it* probable estis konsiderata neoportuna pro la participa sufikso (kp *kukurbo, limo*). ¶ 1894 *sagit-.* ¶ Io *flecho* (< F *flèche,* H *flecha,* I *freccia*), Ie *fleche,* Ia *sagitta, flecha.*

Nekonata etimologio.

SAGAC/A (f; RE): A *sag/acious,* FI *-ace,* (H *-az*); L *sag/ax -acis.* Szerdahelyi (1987, 120) metas ekkrian signon pro la formo (oni povus atendi **sagak-* kiel en *limak/o* < L *lim/ax -acis*). Evidente la ortografio de AFIL superpezis; kp la pli postajn *aŭdac-* OA 8, *tenac-* PIV. – Ps-sf *-ac.* ¶ Io =, Ie *sag/aci,* Ia *-ace.*

Orig. ĉasista termino: "kun bona flarsento (pp hundoj)", der. de L *sagire* "elflari", par. al A *seek,* G *suchen* "serĉi", Ir *saigim* "serĉas", Gr *hêgeísthai* "konduki" (vd. *hegemonio*): HE rad. **sag-* "elflari?".

SAGU/O (2; Jü): APo *sago,* F *sagou* [sagú], G *Sago,* I *sagù,* R *cago,* (H *sagú*). La fontlingvoj prezentas du tipojn: *sago* kun akcento sur *a* kaj *sagu* kun akcento sur *u.* Ĉar Z jam rezervis *sag/o* por alia signifo, estis nature elekti la duan. ¶ Io *saguto* (*-t-* el F *sagoutier* "saguarbo"), IeIa *sago.*

Pere de P el Malaja *sâgû* "palma medolo". – Cherpillod 1992, 93.

SAĜ/A (f; Un): AF *sage* [A -ĝ, F -ĵ], I *saggio* [-ĝ-], (H *sabio*). Por A *g* [ĝ]/F *g* [ĵ] > Eo *ĝ,* vd. sub *aĝo;* tie ĉi kun forta apogo de la I prononco (kp I *paggio* > Eo *paĝio*). Szerdahelyi 1987, 120 neĝuste enlistigas la radikon inter la "senperaj pruntaĵoj el la F". ¶ 1881 *sadz'-.* – 1894 *sapient-* (kp L sube). ¶ Io *saja,* Ie *sagi,* Ia *sage, sapiente.*

Pere de L vulg. **sapius* el L *sapi/ens -entis* "saĝa", orig. ptc. prez. de *sapere* "esti saĝa" (> F *savoir,* H *saber,* I *sapere* "scii"), orig. "gusti; havi guston (> sagacan prijuĝon)", kp *sapor* "gusto"; par. al G *Saft* "suko" (HE rad. **sap-/sab-*).

SAK/O (f; Un): A *sack,* F *sac,* G *Sack,* I *sacco,* (H *saco*); L *saccus.* Escepta okazo de plena kongruo inter la plimulto de fontlingvoj (vd. Waringhien 1967, 44). ¶ Io =, Ie *sac,* Ia *sacco.*

El Gr *sákkos* s.s., pruntita el semida lingvo, kp He *saq,* Akada *ŝaqqu* s.s. – Cherpillod 1989, 55; 1992, 93.

SAKR/O (f; RE): L *sacrum;* AF *sacrum,* I *osso* ("osto") *sacro,* (H *sacro*). Anatomia termino bazita sur L. – Kolizias kun eo *sakr/i "blasfemi"* PV el F *sacrer.* ¶ Io *sakrumo,* Ia *sacrum** Ruhrig; ne trovita en Ie.

Orig. L *os sacrum* (kp I supre) "osto sankta", tiel nomata ĉar ĝi estis prezentata al la dioj ĉe oferado; pri L *sac/er -ra -rum* "sankta", vd. sekv.

SAKRAMENT/O (1; Jü): A *sacra/ment,* I(H) *-mento,* F *sacrement,* G *Sakrament,* Po *sakrament;* L ekl. *sacramentum.* Ps-sf *-ment.*

En L orig. jura termino, spec. "garantia monsumo de la partioj ĉe civila proceso" k "ĵuro pri fideleco (de soldato)", propr. "ilo por sankte devoligi [iun]", der. de *sacrare* "sanktigi, konsekri" de *sac/er* (fem.: *sacra;* ntr.: *sacrum)* "sankta, sanktigita" (sed ankaŭ "konsekrita al infera dio, malbeni-

ta", kio klarigas la signifon de F *sacrer*, vd. sub *sakro*), samradika kun *sancire* "sanktigi" (vd. *sankta, sankcio*). Samfamiliaj vortoj en Eo: *konsekri, sacerdoto, sakro, sakristio.*

SAKRISTI/O (2; Jü): A *sacrist/y* [-i], F *-ie*, (H *-ía*), G *Sakristei*, I *sagrestia*, Po *zakrystia*. ¶ Io *sakrist-io*, Iela *sacristia*.

El L mez. *sacristia* "sakristi/o, -aneco", der. de *sacrista* "sakristiano", propr. "kiu okupiĝas pri sanktaĵoj", de L *sacra* "sanktaĵoj", formo (ntr. plur.) de *sacer* "sankta" (vd. *sakramento*).

SAL/O (f; Un): A *salt*, F *sel* (kp *saler* "-i"), G *Salz*, I *sale*, Po *sól*, R *sol'*, (H *sal*); L *sal*. Ŝajnas bazita sur la L formo, kiu videblas ankaŭ en la internacia derivaĵo AF *saline*, G *Saline* ktp "salfarejo". ¶ Io =, Ia *sal*, Ie *-e*.

Komuna eŭropa vorto, el HE **sal* s.s., kp Sa *salilám* "maro", Gr *hals* "salo; maro", Ir *salann* "salo"; kp ank. Fi *suola* "salo". Samfamiliaj vortoj en Eo: *salajro, salato, salpetro, saŭco.*

SALAJR/O (f; RE): A *sal/ary*, F *-aire* [-ér], I(H) *-ario*, G (reg.) *Salär*, L *salarium*. Verŝajne formita el F kun konsonantigo de *i* (kiel en *semajno* el F *semaine*; kun *ai* > *aj* kp *oi* > *oj* en *fojo* ktp). Kp Waringhien LV 79: "la fonetikaj formoj **saler* kaj **seman* fariĝis, per uzo de franca ortografio, *salajro*...kaj *semajno*". La L originvorto efektive enhavas sufiksformon *-arium*, kiu normale en Eo fariĝas *-ari/o* (en RE *komentari/o, rozari/o;* poste *akvari/o, honorari/o;* alie en *kalendar/o* RE). Pri la motivo por *-ajr/o* oni povas nur diveni; se temis pri deziro konservi la akcenton de FIL, tio estus atingebla per formo **salar-*, kiu tamen probable ŝajnis neoportuna pro eventuala *sal/-ar/-*. Speciale frapa estas la kontrasto kun la kvazaŭsinonimo *honorari/o* Jü. Kp ank. la ps-sf *-ari*. ¶ IoIa *sal/ario*, Ie *-arie*.

En L orig. "porcio de salo donita al oficiro aŭ soldato" (poste anstataŭita per mona kompenso), der. de L *sal* "salo" (vd. tiun). Vd. Carlevaro, PL 7/1983, 14.

SALAMANDR/O (f; RE): A *salamand/-er*, F *-re*, IPoR(H) *-ra*.

El Gr *salamándra* s.s., de nekonata deveno.

SALAT/O (f; RE): A *sal/ad*, F *-ade*, R *-at*, G *Salat*, I *insalata*, Po *sal'ata*, (H *ensalada*). Ambaŭ radikfinoj (*-ad* kaj *-at*) povas kaŭzi misanalizojn pro la homonimaj sufiksoj; eble Z sekvis la plimulton (GIPoR). ¶ Io *sal/ado*, Ie *-ade*, Ia *-ata*.

Latinida vorto; la *d*-formoj el Oc *salada*, la *t*-formoj el I ant. *salata*, ambaŭ "peklitaĵo, salitaĵo", subst.-igita ptc. perf. de *salar(e)* "sali", der. de *sal(e)* "salo", vd. tiun.

SALD/O (1; *-i* Jü): F *solde*, G *Saldo*, IPo (H) *saldo*. ¶ IoIeIa =.

Itala komerca termino, der. de *saldare* "saldi, elpagi, likvidi, ĉesigi [konton]", propr. "firmigi" (de adj. *saldo* "firma, solida, stabila", probable el L *solidus* "firma" (vd. *solida*). [Rilate la semantikan evoluon oni por *saldare* devas kalkuli kun la serio "firmigi" > "solidigi" > "tutigi, kompletigi" > "fini, likvidi".]

SALIK/O (f; N-ro 14 1888, RE): L *sal/ix -icis;* A *sallow*, F *saule*, I *salice*, (H *sauce*); kp G *Salweide* s.s. Botanika termino prenita el L (normala traktado de L *-ix*, vd. sub *lariko*) kun bazsilaba apogo de AF GI. ¶ Io =, IeIa *salice*.

Okcidenteŭropa vorto (kp ank. Ir *sail*, Sv *sälg* s.s.), de (H)E bazo **sal(i)k-*, ev. de HE rad. **sal-* "malpura, griza" (vd. sub *salivo*); tiuokaze la arbo povas esti nomita laŭ siaj folioj grize verdaj. .

SALIV/O (1; Jü): AI(H) *saliv/a*, F *-e*, L *saliva*. Eble par. al F *sale* "malpura" (el G ant. *salo* "malklara, malpura"), R *solovyj* "flavece griza", Ir *sal* "malpuraĵo" de HE rad. **sal-*.

Kp ev. *saliko.*

SALM/O (f; RE): L *salmo -onis*; A *salmon*, F *saumon*, G *Salm*, I *salmone*, (H *salmón*). Zoologia termino prenita el L (adoptita en nominativa formo finiĝanta per *-o*: vd. analogajn ekzemplojn sub *homo*) kun solida apogo de moder-

naj fontlingvoj. ¶ IeIa *salmon*, Io *-o*.

Latin(id)a vorto (kp L *salar* "truto") disvastigita sur ĝerm. teritorio (G ant. *salmo!*) de necerta origino; per popola etimologio rilatigita al L *saltare* "salti".

SALON/O (f; RE): A *sal/oon*, FPo *-on*, I *-one*, (H *-ón*), G *Salon*. ¶ 1882 *zal-* (< G *Saal* [z-]).

I aŭgmentativo de *sala* "ĉambr(eg)o" (= F *salle*, G *Saal*, HPo *sala*, R *zal*), de ĝerm. origino (pĜ **sali-*, kp Gt *saljan* "restadi"), kredeble par. al R *selo*, Li *salà* "vilaĝo", de (H)E bazo **sel-* "loĝejo".

SALPETR/O (f; RE): A *saltpetre*, F *salpêtre*, G *Salpeter*; kp I *salnitro*, Po *saletra*, (H *salitre*) s.s. Formo laŭ F, kiu kongruas kun la L originvorto (vd. sube). ¶ Io =, Ie *salpetr/e*, Ia *-a*.

El L mez. *salpetra*, propr. "roka salo" (ĉar salpetro aperas kiel surroka krustaĵo): L *sal* "salo" (vd. tiun) k *petra* "roko" (vd. *petrolo*). (La HIPo formoj el L *sal* kombinita kun L *nitrum*; por la dua parto, kp la elementnomon *nitrogenium*, propr. "salpetron generanta".)

SALT/I (f; Un): L *saltare*, F *sauter*, I *salt/are*, (H *-ar*); kp I(H) *salto* "-o", ank. A *salt/ation* "-ado", *-atory* "-anta", G *Salto* "transkapiĝa salto". Bazita sur LI (la I subst. kun esperanteca formo estas forta apogo). ¶ IoIeIa *saltar*.

Orig. intensa verbo de L *salire* s.s., radikidenta kun Gr *hállesthai* s.s. – Samfamiliaj vortoj en Eo: *insulti*, *rezulti*.

SALUT/I (f; Un): L *salutare*, A *salut/e*, I *-are*, (H *-ar*), F *saluer* (kp *salut* "-o"). Kp G *salut/ieren*, Po *-owac'*, R *saljutovac'* "salutpafi". ¶ IoIeIa *salutar*.

Der. de L *sal/us -utis* "-o", propr. "sano" ("deziri [al iu] sanon" > "saluti [iun]"), sambaza kun L *saluber* "saniga" k *salvus* "sana, savita, nedifektita" (vd. *savi*, kp spec. sekv.).

SALV/O (2; Jü): A *salv/o*, F *-e*, I(H) *-a*, G *Salve*, Po *salwa*, R *zalp*. ¶ Io *salveo* (kp *salvo* "savo"); IeIa *salva*.

Orig. nur pri salutpafado; el L *salve* "estu salutata! fartu bone!", imperativo de *salvere* "esti sana" de *salvus* "sana, bonfarta" (vd. *savi*). Kp sekv.

SALVI/O (f; RE): L *salvia*; A *sage*, F *sauge*, G *Salbei*, I(H) *salvia*, Po *szal'wia*, R *ŝalfej*. Botanika termino prenita el L (kun apogo de I). Kp spec. *silvio* (zool.) el L *Sylvia*. ¶ Io =, IeIa *salvia*.

Propr. "saniga (planto)", adj. der. de L *salvus* "sana" (vd. *savi*).

SAM/A (f; Un): A *(the) same*, Po *(ten) sam* (fem. *ta sama*, ntr. *to samo*), R *(tot ĵe) samyj*. Kp Sv *samma*, Fi *sama* s.s. Aperas bazita sur APoR (Gregor 1982, 29). Vorto de granda sed neordinara disvastigiteco (ĝermana, slava, finno-ugra), akceptita ankaŭ de Io (*sam/a*), Ie (*sam*; komentita de de Wahl en Spíritu, 39) kaj Novial (*sam[i]*). La L ekvivalento *idem /eadem* estas malfacile asimilebla kaj nur lasis *ident-* kiel spuron en la modernaj lingvoj; el la romanaj formoj, unu estis adoptita de Z kun alia senco (vd. *mem*). Efektive la du nocioj "sama" kaj "mem" estas esprimata per la sama radiko en pluraj fontlingvoj (FGPoR, ank. Gr). ¶ IoIe supre; Ia *mesme*.

El HE **somo-s* "sama", kp Sa *samá-* "egala, sama"; Gr *homós* "sama, simila; komuna" (kp *homonimo*) kun der. *homalós* "egala" (kp *anomalio*); Bg ant. *samŭ* "mem", R *sam* "mem" (kp *samovaro*); pĜ **sama-*, ekz. Gt *sama* "sama", G ant. *samo* "sama"; Ir *samu* "mem". De HE rad. **sem-* "unu" (> "unu kaj sama" > "sama"), vd. sub *simpla*.

SAMBUK/O (f; RE): L *sambucus*; I *sambuco*, (H *sauco*). Kp P *sabugueiro*. Botanika termino prenita el L. ¶ Io =, Ie *sambuc*, Ia *-o*.

L vorto kun kromformo *sabucus*, formita per la sama sufikso kiel en *caducus* "kaduka", *lactuca* "laktuko"; la deveno de la bazo estas nekonata.

SAMOVAR/O (2; RE): AFIR(H) *samo/var*, Po *-war*, G *Samovar*.

Rusa vorto, propr. "memkuirilo", el *sam* "mem" (vd. sub *sama*) k *varit'* "kuiri", der. de *var* "bolanta akvo".

SAN/A (f; Un): L *sanus;* F *sain* (kp *santé* "-eco"), I(H) *sano.* Kp A *sane* "mense sana". Internacie konata per derivaĵoj, ekz. A *sanitarium* "sanigejo"; A *sanit/ary,* G *-är,* Po *-arny,* R *-arnyj* "koncernanta la publikan sanon" (> eo *sanitar/a* Wü, PV). La konsonantismo kongruas kun A *sound,* G *gesund* "sana". ¶ 1882 *salv-* (< L *salvus,* vd. *saluti* k plue sub *savi*). ¶ Io =, IeIa *san.*

De nekonata deveno; neparenca al la AG vortoj cititaj supre (pĜ **suntha-*).

SANDAL/O (1; RE): A *sandal,* F *-e,* I *-o,* R *-ija,* (H *-ia*), G *Sandale,* Po *sandal';* L *sandalium.* ¶ Io =, Ie *sandal/e,* Ia *-ia.*

El Gr *sándalon* s.s., kredeble de azia origino; kp Pe *sandal* "ŝuo".

SANDVIĈ/O (8; Wü, PVS; ne ĉe Z): A *sandwich* [-ŭiĉ], FGI(H) *sandwich* [kun angleca prononco], Po *sandwicz,* R *sandviĉ.* Transskribo de la A vorto laŭ slava modelo (Po *w* = [v], *cz* = [ĉ]). Cetere A *w* aperas kiel Eo *v* en *svingi* < A *swing;* kp ank. *vipi* < A *whip* (Szerdahelyi 1987, 124). ¶ Io *"sandwich",* IeIa *sandwich.*

Orig. angla manĝaĵo, nomita laŭ unu el la grafoj de *Sandwich* (J. Montagu, 18-a jc.), kiu inventis ĝin por eviti manĝopaŭzojn dum sia kartludado.

SANG/O (f; Un): F *sang,* I *sangue,* (H *sangre*); L *sangu/is -inis.* Kp A *sanguinary* "sangavida". Z trovis en F konvene mallongan formon. Certe radikfino *-in* (laŭ L stemo *sanguin-*) estus neoportuna pro la femala sufikso. Teorie, **sangv/o* estus ebla (kp. *lingv/o;* sed apud ĝi ekzistas ankaŭ *lang/o!*). ¶ Io =, Ie *sangue,* Ia *sanguine.*

Nekonata etimologio.

SANKCI/O (f', 1, 7): AF *sanction,* G *Sanktion,* I *sanzione,* Po *sank/cja,* R *-cija,* (H *sanción*). Ps-sf *-cio.*

El L *sanct/io -ionis* "difino de leĝa puno; klaŭzo en traktato", subst. de *sancire* "leĝe fiksi; je puno malpermesi; konfirmi, validigi", orig. "konsekri, sanktigi", nazaligo de la radiko en *sacer* "sankta" (vd. *sakramento*). Kp spec. sekv.

SANKT/A (f; Un): L *sanctus;* F *saint* (kp *sanctifier* "-igi"), I(H) *santo.* Kp A *Saint,* G *Sankt* "Sankta (ĉe nomo de sanktulo)", A *saint* "-ulo", *sanctify* "-igi". Eklezia termino prenita el L. ¶ 1882 *sankt-.* ¶ Io *santa,* Ie *sant,* Ia *sancte.*

Propr. "konsekrita, sanktigita", ptc. perf. de L *sancire* "konsekri, sanktigi" (vd. *sankcio*).

SANTAL/O (1; Jü): L bot. *Santalum;* A *sandal(-tree* "-arbo"), F *santal,* G *Sandel(baum* "-arbo"), I *(albero del* "arbo de") *sandalo;* Po *sandal'owiec,* R *sandalovoe derevo* ("-a arbo"), (H *sándalo*). La vorto en kelkaj fontlingvoj signifas la arbon, en aliaj la lignon. En Eo ĝi estas botanika termino, kio faras latinan formon natura. Cetere, la **sandal-* prezentata de AIPoR estis neebla pro alia jama sgnifo. ¶ Io = (ligno), Ie *santal* (arbo), Ia *sandalo** (arbo).

Pere de Gr el Ar *s'andal* (ligno) el Sa *ĉandana-* (arbo k ligno) de dravida i*igino: kp Tamila *cântu* (arbo). – Cherpillod 1992, 94.

SAP/O (f; Un): L *sap/o -onis;* A *soap* (kp *saponify* "-igi"), F *savon* (kp *saponifier* "-igi"), G *Seife,* I *sapone,* (H *jabón*). Adoptita L nominativformo oportune finiĝanta per *-o* (vd. analogajn ekzemplojn sub *homo*). ¶ IeIa *sapon,* Io *-o.*

Latin(id)a vorto de ĝerm. origino (pĜ **saipôn;* kp ank. Fi *saippua*), par. al L *sebum* "sebo" (vd. tiun).

SARDEL/O (f; EG): A *sard/elle,* I *-ella,* Po *-ela,* R *-el',* G *Sardelle.* Laŭ Gregor 1982, 29 (forme) bazita sur AGPoR; aldonu I. Kiom koncernas la signifon, Z verŝajne volis sekvi G: *sardel/o* do signifu peklitan engraŭlon, dum eo *sardin/o* Jü, kp *sarden/o* Wü (< AF *sard/ine,* I[H] *-ina,* Po *-ynka,* R *-inka,* G *Sardine*) devas signifi pilĉardon (tiel en Jü: *sardelo* = Sardelle, *sardino* = Sardine). Tamen "regas granda konfuzo _& la diversaj lingvoj por la nocioj: sardelo, sardino, anĉovo"

(Albault en Fund., 9-a eld. 1963, 336). En la aliaj L.I. mankas la nocio "sardelo"; kp Io *sardin/o,* Ie *-e,* Ia *-a* "sardino".

Latinida dim. de L *sarda* "sardino" (de kiu ank. L *sardina* s.s.), propr. "(fiŝo) de Sardinio".

SARK/I (f; RE): F *sarcler,* I *sarchiare* [-k-], (H *sachar*); L *sarculare.* Formo prijuĝebla diversmaniere: (a) bazita sur F kun simpligo de la konsonantgrupo *rkl* (esprimite pli draste: amputo de *l*); (b) bazita sur la radikparto komuna al F, I (kaj L); (c) bazita sur L (aŭ la apartenanta L subst. *sarculum* "-ilo": tiel Yamasaki s.v.) kun apokopo de *ul* (vd. la tipon *artik-* sub *artikolo*). Por (a) oni povas kompari *buk/o* el F *boucle* (sed tiu formo reprezentas necesan diferencigon disde *bukl/o*). La formo de 1894 *sarkl-* montras al F; ĝi do povas esti rigardata kiel restituo de la antaŭa franca formo mallongigita. Argumento por (b) estas, ke Z ofte konsideris italajn formon ĉe la vortokreado. La apokopo laŭ (c) estas malpli probabla; oni atendus **sarkuli* (kp *cirkuli* < L *circulari*). ¶ 1894 *sarkl-*. ¶ Io *sarklar,* Ie *sarclar,* Ia *sarcular.*

FHI < L, der. de la il-substantivo *sarculum,* der. de *sarire* "sarki", kredeble par. al Sa *srnî´* "falĉilo".

SARKASM/O (1; Be): A *sarc/asm,* F *-asme,* I(H) *-asmo,* G *Sarkasmus,* PoR *sarkazm;* L *sarcasmus.* Ps-sf *-asm.*

El Gr *sarkasmós* s.s., der. de *sarkázein* "moki, diri akrajn vortojn", propr. "dismordi la karnon (de iu)" de *sarx sarkós* "karno" (kun necerta etimologio). Kp sekv.

SARKOFAG/O (2; Jü): A *sarcophag/us,* F *-e,* G *Sarkophag,* I *sarc/ofago,* (H *-ófago*), PoR *sarkofag;* L *sarcophagus.*

El Gr *sarkophágos* "ĉerko", orig. pri tia farita el rokspeco nomata *sarkophágos líthos* "karnomanĝanta ŝtono", ĉar oni kredis, ke ĝi konsumis la kadavrojn entenatajn per ĝi; kunm. de *sarx sarkós* "karno" (vd. *sarkasmo*) k *-phagos* "manĝanto" de *phageín* "manĝi" (vd. *ezofago*).

SAT/A (f; Un): G *satt;* L *satur,* I *sazio* [-ts-]. Kp A *satiated* "-igita", *satiety* "trosateco"; F *satiété* "-eco" (*rassasié* "sata"); (H *saciar* "-igi"); por la konsonantismo ank. Po *syty,* R *sytyj* "sata". Probable bazita sur G (Collinson 1959, 8) sed kun sufiĉa apogo de A, L kaj latinidaj lingvoj (*sat-* povas esti rigardata ankaŭ kiel la bazo de la L adjektivo). Kp la aliajn L.I., kiuj, adoptante la plenan L stemon, malvastigas la fontlingvan apogon: Io *satur-ita* (propr. "satigita"), Ie *satur,* Ia *sature, satiate.*

Ĝerm. resp. latin(id)a vorto: kp Nd *zat,* Gt *saths* "sata", A *sad* "majĝoja" (< "trosata"), (pĜ **sadha-*); apud L *satur* "sata; plena, abunda" ank. *satiare* "satigi" (de kiu la latinidaj formoj), kp *satis* "ĝissate, sufiĉe". La ĝerm. k latina adj. devenas – same kiel la cititaj slavaj formoj, kp Bg ant. *sytŭ* – de HE verba adj. **se'to-s,* de rad. **sa-* "satigi", kp plue Li *sotùs* "sata", Gr *hadên* "sufiĉe". Samfamiliaj vortoj en Eo: *satiro, saturi.*

SATAN/O (1; N-ro 15 1888, RE): AFG *Satan,* IR *Satana,* Po *szatan,* (H *Satanás*); L *Satan(as).* ¶ 1882 *saton-* (vokalŝanĝo por ne kolizii kun suf. *-an*?).

Pere de Gr *Satán/Satanás* el He *ŝat'an* kun orig. signifo "kontraŭulo, antagonisto". – Cherpillod 1992, 95.

SATEN/O (8; Wü, GD; ne ĉe Z; antaŭe *atlas/o*): F *satin* [-ê], AIR *satin* [I = F], G *Satin* [= F], Po *satyna,* (H *satén*). Enkondukita pro internacieco; eble kontribuis la deziro unusencigi *atlas/o.* Tradicia ŝanĝo *in* > *en* por eviti kolizion kun la virina sufikso (vd. liston sub *abomeni*), tie ĉi kun certa apogo de F(> GI) prononco (kiel en *arlekeno, baldakeno, baseno, ĉagreno* k.m.a.). ¶ IoIeIa, vd. sub *atlaso.*

Pere de H ant. *aceituní* el Ar *az-zaitûnî* s.s., propr. "la (ŝtofo) el *Zaitun*", araba nomo de la ĉina urbo *Zi-tong,* kie la ŝtofo estis unue fabrikata. – Cherpillod 1992, 95.

SATIR/O (1; RE): AF *satir/e,* IR *-a,* G *Satire,* Po *satyra,* (H *sátira*); L *satira/satu-*

ra. L vorto, uzita kiel literatura termino unue de Lucilio (2-a jc. a.K.) pri poeziaĵoj de miksita enhavo; orig. *lanx satura* "plado plena (de diversaj fruktoj), oferata al la dioj": *satur* "plena, abunda" (vd. *sata*). – Antaŭe, pro la karaktero de multaj 'satiraj' versoj, ofte rigardata kiel der. de

L *Satyrus* "unu el mitologiaj helen-romaj figuroj, duone homo, duone kapro" > eo *satirus/o* Jü.

SATRAP/O (1; RE): AR *satrap,* F *-e,* I *-o,* Po *-a,* G *Satrap,* (H *sátrapa*); L *satrapes.*

Pere de Gr *satrápês* s.s. el Pe *ĥŝathrapâvan,* propr. "protektanto de la regno"; la unua elemento estas par. al Sa *kŝâtrám* "potenco", la dua al Sa *pâ'ti* "protektas". – Cherpillod 1992, 95.

SATUR/I (f; RE): A *satur/ate,* F *-er,* I *-are,* (H *-ar*); L sc. *saturare.* Propr. "satigi" (kp G *sättigen* "saturi", propr. "satigi"), der. de L *satur* "sata; plena" (vd. *sata*).

SAŬC/O (f; RE; kp *soz-* N-ro 15 1888)): A *sauce* [so:s], F *sauce* [sos], G *Sauce, Soss,* I(H) *salsa,* Po *sos,* R *sous.* Formo laŭ F(AG) ortografio, kio donas *aŭ* (normale F *au* [o] > Eo *o,* kp *epoleto, eŝafodo, sovaĝa:* vd. Cherpillod 1990, 15, Szerdahelyi 1987, 121). – Pritraktita de Carlevaro en PL 14/1985, 9. ¶ 1894 *sauc-.* ¶ Io *sauc/o,* IeIa *-e.*

Franca gastronomia termino (F > AGPoR), el L vulg. *salsa* (kp HI supre) s.s., propr. "salhava" ("ĉar la romiaj saŭcoj estis ĉiuj salhavaj", Carlevaro l.c.), orig. ina formo de L adj. *salsus* "salhava", ptc.perf. de *sallere* "sali" de *sal* "salo" (vd. tiun).

SAV/I (f; Un): A *save,* F *sauver,* I *salv/are,* (H *-ar*); L *salvare.* Z akceptis la A formon (laŭ ortografio, kiel ofte; kp ev. *lam/a* < A *lame*), rifuzante **salv-* laŭ IL. La motivo por tiu elekto ne estas klara; certe *salv/o* (2; Jü) ne estis tiel grava, ke ĝi malhelpus **salv-* "sav-". Ĉu Z vidis en *sav-* ian kompromison inter A kaj F? ¶ 1894 *salv-.* ¶ IoIeIa *salvar.*

Der. de L *salvus* "savita, nedifektita, sana", kiu estas identa kun Gr *hólos* "tuta, kompleta" (kp *katolika*) k Sa *sárva-* "tuta, nedifektita" (HE **solŭo-s*) k plue par. al L *sollus* "tuta, ĉiu" (kp sub *lerta*), *solidus* "tuta". Kp spec. *saluti, salvo, salvio*; vd. plue sub *solida.*

SCEN/O (f, 1, 7; Du, RE): A *scen/e,* IPo R *-a* [R sts-], F *scène,* G *Szene* [sts-], (H *escena*) (ĉiuj krom A ank. "-ejo"). Formo laŭ la ortografio de la plimulto de fontlingvoj. ¶ Io *ceno;* Ie *scen,* Ia *-a* (ank. "-ejo").

Pere de L *sc(a)ena* "scenejo" el Gr *skênê* s.s., orig. "stando, tendo" (kie la aktoroj tenis la rekviziton), probable par. al Gr *skiá* "ombro" (vd. *sciuro*).

SCEPTR/O (f; Un): AF *sceptre,* G *Szepter* [sts-], I *scettro,* R *skipetr,* (H *cetro*); L *sceptrum.* Eo *sc-* reprezentas ortografie AFIL kaj fonetike G. ¶ 1881 *skepr-.* – 1894 *szeptr-.* ¶ Io *ceptro,* Ie *sceptr/e,* Ia *-o.*

El Gr *skê'ptron* s.s., propr. "apogilo", instrumenta der. de *skêptesthai* "apogi sin", par. al Sa *skabhnâ'ti* "apogas", L *scapus* "tigo; tenilo", A *shaft* "stango; ŝafto" (> eo *ŝaft/o* Jü), G *Schaft* "tenilo" (pĜ **skafta-;* HE rad. **skep-*).

SCI/I (f; Un): L *scire.* Kp ellatinajn pruntvortojn kiel A *omniscient* "ĉioscia", F *insciemment* "nesciante". La akcepton de *sci-* (malgraŭ ĝia fonetika neoportuneco en Eo) probable inspiris *scienc/o,* kies kunligo kun *sci/i* estas evidenta. Eventualaj **sav-* (F *savoir*) kaj **sap-* (I *sapere*) rezerviĝis por aliaj signifoj. (Tamen oni povus atendi **scir/i* por eviti hiaton, analoge al *ir/i, star/i.*). ¶ 1881 *sci-.* – 1894 *szi-.* ¶ Io *sav/ar,* Ie *-er,* Ia *saper.*

Se la orig. signifo estis "decidi" < "detranĉi" (kp semantike sub *decidi*), L *scire* povas esti par. al Ir *scían* "tranĉilo", Sa *chyáti* "detranĉas" (vd. sub *skismo*). – Samfamiliaj vortoj en Eo: *konsci/i, -enco, scienco.*

SCIENC/O (f; RE): AF *sci/ence,* I *-enza,* (H *ciencia*). Bazita sur AF (kun norma-

la traktado de la ps-sf *-enc*). Kp ank. la L fontvorton sube. ¶ 1894 *szienz-*. ¶ Io *cienco,* Ie *scient/ie,* Ia *-ia.*

El L *scientia* "scio" (ank. "fakaj scioj, erudicio", vd. Collinson 1961, 94), subst. de *scire* "scii" (vd. tiun; kp semantike G *wissen* "scii", *Wissenschaft* "scienco"). Kp spec. *konscienco.*

SCIUR/O (f; RE): L *sciurus;* F *écureuil,* A *squirrel.* Zoologia termino prenita el L. ¶ Io *skurelo,* Ie *scurel,* Ia *scuriolo, sciuro.*

Latin(id)a vorto (A < F ant. < L vulg. **scuriolus,* dim. de **scurius,* metatezo de la L formo), el Gr *skíouros* s.s., propr. "ombrovosto": *skiá* "ombro" (par. al Sa *châyâ* "ombro, rebrilo" k G *scheinen* "brili", vd. *ŝajni*), *ourá* "vosto" (samradika kun Gr *órros* "postaĵo" el HE **orso-s* "postaĵo", kp A *arse,* G *Arsch* s.s.); kp *siluro, urogalo.*

SE (f; Un): I *se;* FL(H) *si.* Kp P *se.* Sola subjunkcio kun nur-itala formo (Waringhien LV 62); la FL *si* estis neebla pro la pronomo *si,* kies vokalon difinis la unuformigita serio *mi, ci, li* ktp. ¶ 1882 *ej* (< Gr *ei*). ¶ Io =, IeIa *si.*

Radikidenta kun L *sic* "tiel" kaj origine portanta tiun signifon (por la semantika evoluo, kp ekz. "Silentu: tiel vi estas saĝa" : "Silentu, se vi estas saĝa"); kp plue AG *so,* Gt *swa,* Gr *hôs* "tiel" (HE bazo **s(ŭ)o-,* orig. identa kun la refleksiva pronomo, vd. *si*).

SEB/O (f; RE): L *sebum;* F *suif* (kp *sébacé* "-eca"), I *sevo,* (H *sebo*). Kp A *seb/aceous,* I *-aceo* "-eca"; ank. A *sebum*/F *sébum* "seb/um/o (anat.)". Bazita sur L. ¶ Io =, Ie *seb/e,* Ia *-o**.

Par. al L *sapo* "sapo" (vd. tiun).

SED (f; Un): L *sed.* Konjunkcio prenita el L (same kiel *aŭ, nek*). Ofte kritikita pro mallarĝa fontlingva bazo kaj neoportuna fonetika strukturo (vortfina *-d* tendencas esti prononcata [t] de – inter aliaj – germanoj kaj rusoj). Eblan motivon por la elekto de *sed* donas Günkel (1996, 190): "*sed*...estas pli klara kaj elstaripova ene de frazo ol **ma* [vd. sube], kiu kun la artikolo *(*ma la)* tro similas al *mala* kaj aliaj vortoj je *mal-*". ¶ 1881 *sej* (*-j* ne malofta finsono de partikuloj en 1881-2, kp *bej* "post", *pej* "po", *prej* "tro"). ¶ Io *sed* > *ma* (F *mais,* H *mas,* I *ma;* kp Nd *maar,* Sv *men*); Ie *ma;* Ia *sed, mais, [ma]* (vd. traktaĵon en Currero international, aug.-sept.-okt. 1960, de R. Berger).

Identa kun L pref. *se-* "sen-, el-, for-" (vd. *sekrecio*), el HE **s(ŭ)ed* "je si mem" (> "izole" > "flanke, krome, sed"), abl. de la refleksiva bazo (vd. *si*). Kp spec. *sen* k ev. *sola.*

SEG/I (f; RE): G *sägen,* I *segare.* Eble alprenita ĝuste pro tiu ĝermana-latinida koincido (kp Collinson 1959, 8). ¶ IoIe *segar,* Ia *serrar* (< L *serrare*).

La G k I formoj estas praparencaj: G reprezentas vorton komune ĝermanan, der. de la responda il-vorto (kp A *saw,* G *Säge,* Nd *zaag,* Sv *såg* "-ilo"; kp ank. Fi *saha* s.s.); I (same kiel F *scier* s.s.) el L *secare* "tranĉi" (vd. *sekci*) – ambaŭkaze de HE rad. **sek-* "detranĉi".

SEGMENT/O (2; Jü): AFPoR *segment,* I(H) *-o,* G *Segment.* Ps-sf *-ment.*

El L *segmentum* "detranĉita peco", der. de *secare* "tranĉi" (vd. *sekci*).

SEĜ/O (f; Un): F *siège* [-ĵ] ("sid/ejo, -ilo"), I *sedia, seggiola* [séĝ-] (kp *seggio* [séĝo] "seĝo por eminentulo"). Kp ank. L *sella.* Estas probable, ke *seĝ-* respegulas I *seggi-* (aŭ *sedi-*); oni povas ev. kompari *leĝ-* : I *legge.*. Nur la monoftongo diferencigas tiun ĉi radikon disde *sieĝ-,* bazita (interalie) sur F *(as)siéger.* Modrijan (40 s.) atentigas pri formoj neeblaj pro aliaj signifoj: *sed, seg-, sel-.* ¶ 1881 *sell-* (< L). – 1894 *sedi-* (< I). ¶ Io *stulo,* Ie *stul* (< G *Stuhl,* R *stul*); Ia *chaise* (= F), *sedia** (kp *sede* "sidejo").

F k I *seggio* (de kiu *seggiola* estas dim.) el L vulg. **sedicum,* der. de L *sedere* "sidi" (vd. tiun). Kp spec. *selo* k la etimologie identan *sieĝi.*

SEK/A (f; Un): F *sec,* I *secco,* (H *seco*); L *siccus.* Kp A *desiccate* "-igi". Bazita sur FI.

¶ 1881 *ses´-* (< F *sèche,* fem. de *sec*). ¶ Io *sika,* Ie *sicc,* Ia *sic.*

Kredeble par. al Sa *sin´cáti* "verŝas", Gr *iskhnós* "seka, magra", Ir *sesc* "seka" (HE rad. **seik-*).

SEKAL/O (f; RE): L *secale*; F *seigle,* I *segala.* Botanika termino prenita el L. ¶ Io =, IeIa *secale.*

Supozata pruntvorto; origino nekonata.

SEKC/I (f; RE): A *dissect,* F *disséquer* (kp *dissection* "-o"), G *sezieren* [sets-], I *dissecare* (kp *dissezione* "-o"), *sezionare,* (H *disecar,* kp *disección* "-o"). Kp Po *sekcja* "-o". Verŝajne retrograda formaĵo el Po, inspirita de G (kies formo, skribita *seciren* en la tempo de Z, donus Eo **sec-*). La normala Ea formo de la fontlingva substantivo *(dis)sekcio* evidente rezerviĝis por alia, pli ĝenerala signifo (kp sekv.). Z ellasis la prefikson (laŭ modelo de GPo), kredeble por evitigi konfuzon kun pref. *dis-*. ¶ 1894 *sekz-*. ¶ Io *dis-sekar,* Ie *-secter,* Ia *-secar.*

El L *dissecare* "distranĉi": *dis-* "dis-" (vd. tiun), *secare* "tranĉi" (> I *segare,* F *scier* "segi", vd. tiun; kp ank. L *securis* "hakilo") de HE rad. **sek-* "detranĉi", ank. en ekz. G *Sichel* "serpo", R *seĉ'* "haki, pecigi". – Samfamiliaj vortoj en Eo: *insekto, segi, segmento, sekcio, sektoro;* kp ank. *sekso, signo.*

SEKCI/O (1; Jü): AF *sect/ion,* G *Sektion,* I *sezione,* Po *sekc/ja,* R *-ija,* (H *sección*). Ps-sf *-cio.*

Propr. "tranĉaĵo" (= 'detranĉita parto'); de L *sect/io -onis* "(dis)tranĉo", subst. de L *secare* "tranĉi" (vd. *sekci*).

SEKRECI/O (1; Ka): A *secre/tion,* I *-zione,* (H *-ción*), F *sécrétion,* G *Sekretion,* Po *sekre/cja,* R *-cija.* Ps-pf *se-*; ps-sf *-cio.*

El L *secret/io -ionis* "apartigo" (> "eligitaĵo, sekrecio"), subst. de *secernere* "apartigi" (vd. *sekreta*).

SEKRET/O (F; Du, RE): AF *secret,* (H *-o*), I *segreto,* PoR *sekret*; L *secretum.* Kp la adj. AF *secret,* (H *-o*), I *segreto,* Po *sekret/ny,* R *-nyj*; L *secretus* "-a". Ps-pf *se-*. ¶ Io (adj.) *sekret-a,* (subst.) *-ajo*; Ie (adj.) *secret,* (subst.) *-e*; Ia (adj.) *secret/e,* (subst.) *-o.*

L *secretum* propr. "sekretaĵo", subst.-igita neŭtra formo de adj. *secretus,* orig. "apartigita" (> "kaŝita" > "sekreta"), ptc. perf. de *secernere* "apartigi", kunm. de pref. *se-* "dis-, el-" (vd. tiun ps-pf) k *cernere* "distingi", orig. "kribri" (vd. tiun). Kp spec. sekv. k *sekrecio.*

SEKRETARI/O (f; RE): A *secret/ary,* F *-aire,* (H *-ario*), G *Sekretär* (kp *Sekretariat* "-ejo"), I *segretario,* Po *sekret/arz,* R *-ar'*. Kp ank. la L originvorton sube. Ps-pf *se-*; ps-sf *-ar(i).*

El L mez. *secretarius* "konfidenca skribisto, konfidenculo", der. de L *secretum* "konfidenco, sekreto" (vd. la antaŭan).

SEKS/O (f; RE): A *sex,* F *-e,* (H *-o*), I *sesso;* L *sexus.* Kp G *Sex* "-aj aferoj", *sexuell* "-a", Po *seksu/alny,* R *-al'nyj* "-a". ¶ Io *sex/uo,* Ie *-u,* Ia *-o.*

Se la orig. signifo estis 'sekcio de la homaro', la vorto povas esti ligita kun L *secare* "tranĉi" (vd. *sekci*).

SEKT/O (2; RE): A *sect,* F *-e,* (H *-a*), G *Sekte,* I *setta,* PoR *sekta.* ¶ Io =, IeIa *secta.*

Samradika kun L *sequi* "sekvi", kp L *sectari* "akompani"; orig. signifo do "akompanantaro, sekvantaro".

SEKTOR/O (2; Jü): A(H) *sect/or,* F *-eur,* G *Sektor,* I *settore,* PoR *sektor.* Ps-sf *-or* 1.

El L *sector* "tranĉanto" (> "linio kiu distranĉas/dividas rondon" > "parto de rondo inter du tiaj linioj"), agantnomo de *secare* "tranĉi" (vd. *sekci*).

SEKUND/O (f; RE): A *second,* F *-e,* I *-o,* G *Sekunde,* PoR *sekunda,* (H *segundo*). La vokalo *u* eble laŭ la L originvorto, vd. sube. ¶ Io =, Ie *seconde,* Ia *secunda.*

El L mez. *secunda minuta (pars)* "la dua malgranda (parto)" (sk. de horo), la unua estante la minuto (kiun vidu): L *secundus* "dua", orig. "sekvanta", der. de *sequi* "sekvi" (vd. tiun). Kp spec. sekv.

SEKUNDANT/O (1; Jü): A *second,* I *-o,* G *Sekundant,* PoR *sekundant.* La germanslava formo evitigis radikon tro similan

al *sekund-*. ¶ Io *sekond-anto* (de *sekondar* "asisti"), Ie *secundant,* Ia *secundo.*

Orig. "asistanto, helpanto", ptc.prez. de L *secundare* "favori" (> F *seconder* "asisti, helpi"), der. de *secundus* "favora", orig. "sekvanta, dua" (el 'kunsekvanta vento' evoluis la senco 'favora vento'); vd. *sekundo.*

SEKUR/A (4; Wü, PV; ne ĉe Z; kp *sen/danĝer/a, sen/risk/a, ŝirm/at/a)*: L *securus*; A *secure,* F *sûr* (kp *sécurité* "-eco"), G *sicher,* I *sicuro,* (H *seguro*). Bazita sur la stemo de la L originvorto, konservita en A kaj en la F substantivo. Ps-pf *se-*. ¶ Io =, IeIa *secur.*

Propr. "senzorga", kunm. de L *se-* "dis-, el-, sen-" (vd. ps-pf *se-*) k *cura* "zorgo" (vd. *kuraci*; kp spec. *asekuri*).

SEKV/I (f; RE): L *sequi*; F *suivre* (kp *conséquence* "-o", *subséquent* "-a"), I *seguire,* (H *seguir*). Kp A *sequel* "-aĵo", *sequence* "-o". Adopto de la L infinitivo, kies stemo aperas en modernlingvaj pruntvortoj. ¶ Io *sequ/ar,* IeIa *-er.*

Etimologie identa kun Gr *hépesthai* "sekvi", Sa *sácate* "akompanas", Li *sekti* "sekvi" (HE rad. **sekŭ-*). Samfamiliaj vortoj en Eo: *konsekvenco, sekto, sekund/o, -anto, socio.*

SEL/O (f; RE): F *selle,* I *sella,* (H *silla*). Kp P *sela*; ank. A *saddle,* G *Sattel,* Po *siodl'o,* R *sedlo.* Z adoptis la latinidan formon; pri la rilato de *sel/o* al L *sella* "seĝo", vd. Modrijan 41. ¶ Io =, Ie *sedle,* Ia *sella.*

El L *sella* "seĝo" (rimarku, ke la romianoj ne uzis selojn dum rajdado), pli frue **sedla,* der. per instrumentsufikso de la radiko en L *sedere*"sidi" de HE rad. **sed-* "sidi" (vd. tiun). Simila derivaĵo de la sama radiko rezultigis la ĝermanajn kaj slavajn formojn (kp Gt *sitls* "seĝo"; Bg ant. *sedlo* "selo"; ank. Fi *satula* "selo"). Kp sub *seĝo.*

SELAKT/O (f; RE): L *serum (lactis)*; I *siero di latte,* (H *suero de leche*), ĉiuj laŭvorte "sero de lakto". Efektive la Ea formo ne retroviĝas en iu fontlingvo sed evidente estas mallongigo, kies unua parto *se-* estas prenita el L *serum,* dum la dua identas kun *lakto* laŭ modelo de la I esprimo. Oni ne povas ekskludi influon de Po *serwatka* "selakto", kiu, kvankam neparenca, eble inspiris Z al la teleskopa formo. ¶ 1894 *serlakt-*. ¶ Io = (espismo); Ie *lacte-sérum*; Ia *sero.*

L *serum,* signifanta "selakto" kaj poste, en la medicina terminologio, "sero" (eo *ser/o* Ve, Wü, PV laŭ L k A *serum,* F *sérum,* G *Serum,* kp I *siero,* H *suero*), estas par. al Gr *orós* "selakto" k Sa *sará-* "flua" (HE **sero-m* "likvaĵo"). Por la dua parto de la radiko, vd. *lakto.*

SEM/I (f; Un; *-i* Un, UV, Be, Jü, PV, PIV; *-o* EG, Ka, Wü, OA8): F *semer,* I *seminare,* (H *sembrar,* P *semear*); L *seminare* (kp A *disseminate* "dissemi (fig.)"). Subst.: L *sem/en -inis*; F *semence,* G *Samen,* I *seme,* R *semja,* (H *semilla*) "-o". Radikformo prijuĝebla diversmaniere: ĝi povas esti (a) bazita sur FI, kie kaj la verbo kaj la substantivo komenciĝas per la silabo *sem-*; (b) mallongigo de la L subst. *semen* analoge al *nomo* el *nomen* (tiel Wüster Esp. princ. 57); (c) komuna denominatoro de ĉiaj formoj (verboj k substantivoj) troveblaj en FIRL (la substantivo estas citita aparte en UV kun la verbo kiel kapvorto). ¶ IoIe *semar,* Ia *seminar.*

La FIL verbo de L *semen* (kp G ant. *samo* > G *Samen,* Bg ant. *seme* > R *semja*) el HE **semen,* formita per instrumentsufikso el HE rad. **se-* "semi": L *serere;* pĜ **sejan* > Gt *saian,* G *säen,* A *sow;* Bg ant. *sejati,* R *sejat',* Po *siac';* Li *sëti*; (eble) Gr *hiénai* "ĵeti"; div. subst.: A *seed*/G *Saat*/Nd *zaat* "semado" (kp *kolzo*); Sa *sî̂ram* "plugilo"; Ir *sîl* "semo". Samfamiliaj vortoj en Eo: *seminario, sezono.* – Rimarku la etimologion de la nomo *Zamenhof* (orig. *S-*): kunm. de G *Samen* [z-] "semo" k *Hof* "korto" (vd. ekz. Boulton Zamenhof 17).

SEMAFOR/O (2; Jü): A *sema/phore,* I *-foro,* PoR *-for,* F *sémaphore,* G *Semaphor,* (H *semáforo*).

Farita (komence de la 19a jc.) el Gr *sêma* "signo" (kun necerta etimologio) k *-phoros* "portanto", agantnomo de *phérein* "porti"

(vd. *oferi*). Kp spec. *fosforo.*

SEMAJN/O (f; Un): F *semaine,* I *settimana,* (H *semana*); L postkl. *septimana.* Formo respegulanta la F ortografion (Waringhien LV 79; por envorta F *ai* > Eo *aj* kp *salajro, trajto*; analoge F *oi* > Eo *oj* en *fojno*), kredeble por eviti radikfinon kun sufikseca *-an.* ¶ 1882 *sim-.* – 1894 *setiman-.* ¶ Io *seman/o,* Ie *-e,* Ia *septimana.*

L *septimana* estas subst.-igo de adj. *septimanus* "rilata al sep", der. de *septimus* "sepa" de *septem* "sep" (vd. tiun).

SEMINARI/O (1; RE): A *semin/ary,* I(H) *-ario,* Po *-arium,* R *-arija,* F *séminaire,* G *Seminar.* Ps-sf *-ari.*

Figura uzo de L *seminarium* "arbokulturejo", propr. "sem/aro, -ujo", der. de L *sem/en -inis* "semo" (vd. *semi*).

SEN (f; Un): L *sine*; F *sans,* I *senza,* (H *sin,* P *sem*). Probable unusilabigo de L *sine* kun vokalŝanĝo laŭ I por eviti kolizion kun la akuzativo de *si* (Waringhien LV 63 ; analogan kazon prezentas *se* el L *si*/I *se*). ¶ 1881 *ple* (laŭ Mattos 1987, 43 el L *privare* "senigi"; neverŝajne). – 1894 *sinu.* ¶ Io *sen* (espismo), Iela *sin.*

FHP (kp F ant. *sens*) el L *sine,* par. al Sa *sanutár* "for", Gr *áter* (< **snter*) "sen", A *asunder* "dis-", G *sondern* "sed"; la radiko estas (same kiel en L *sed*) tiu de la HE refleksiva pronomo **s(ŭ)e-* (vd. *si*). – I *senza* orig. "(en) foresto (de)" el L *absentia,* subst. de *abse/ns -ntis* "forestanta": *ab-* "de, for" k ptc.prez. de *esse* "esti". – Kp ev. *sola.*

SENAT/O (1; Du, RE): L *senatus*; PoR *senat,* A *-e,* I *-o,* F *sénat,* G *Senat,* (H *senado*).

Propr. "(konsilantaro el) maljunularo", der. de L *sen/ex -is* "maljun/a, -ulo" (kp *senior* "pli maljuna" sub *sinjoro*), par. al Sa *sána-*, Ir *sen,* Li *señas* maljuna" (HE **seno-s*).

SENC/O (f; Un): FPo *sens,* A *-e,* I *-o,* (H *sentido*). Kp G *Sinn* kaj la internacian antonimon FPo *nonsens,* A *-e,* I *-o,* G *Nonsens* "sensencaĵo". Leviĝas la demando, kial Z ŝanĝis *s* al *c* (aliaj okazoj de la sama ŝanĝo estas motivitaj por eviti koliziojn: ĉe *lac/a* pro *las/i,* ĉe *rekompenc/i* pro *re/kompens/i*). Ne estas kredeble, ke Z enmetis *t*-sonon por aludi etimologian rilaton al *sent/i.* La radiko *sens/o* estas ne-Za (vd. tiun). Rimarku, ke Z en 1894 proponis *sens-* por *senc-,* kio indikas, ke li rigardis la formon de 1887 iel anomalia. ¶ Io = (espismo), Ie *sens/e,* Ia *-o.*

El L *sensus* "senco, inteligento, opinio, senso, percepto, sento", subst. de *sentire* "senti ktp" (vd. tiun, ank. pri G *Sinn*). Ĝemela radiko: *senso.*

SEND/I (f; Un): A *send,* G *-en;* kp Nd *zenden,* Sv *sända* [send-]. Z preferis la ĝermanan radikon, 'ĉar la derivaĵoj de in viam [L = "sur la vojon"] kiel I inviare, H enviar, F envoyer povus kaŭzi konfuzon kun la radiko envi-' (Collinson 1959, 10). Laŭ Golden (1985, 406) Z estis influita de Vp *sedön.* ¶ 1882 *mitt-* (< L *mittere*). – 1894 *invi-.* ¶ Io *sendar;* Iela *inviar.* Kp Gt *sandjan.* El pĜ **sandian* "irigi, vojaĝigi", kaŭzativo de **senthan* "iri, vojaĝi", par. al Ir *set* "vojo", Li *siûsti* "sendi".

SENS/O (8; Setälä 1923; ne ĉe Z; antaŭe *sent/o* Jü, Wü, *sent/um/o* PV): F *sens,* A *-e,* I *-o,* (H *sentido*); L *sensus.* Kp G *Sinn.* La radiko identas kun la etimo de *senc/o;* la fontlingvoj sin helpas per aldono de "la kvin..." (vd. OA 8, p. 24). Simile Z donis tiun specialan sencon al alia radiko, nome *sent-,* skribante *sento de aŭdado* ktp.; oni poste provis diferencigon laŭ du manieroj (en PV kunekzistas *sent/um/o* kaj *sens/o,* la lasta markita kiel filozofia termino). ¶ Iola *sens/o,* Ie *-u.*

AFI el L *sensus,* orig. "sento" (> "percepto" > "senso"), vd. *senco* k *senti.* – G *Sinn* estas kredeble praparenca (vd. sub *senti*). – Ĝemela vorto: *senco.* Kp spec. sekv.

SENSACI/O (2; Ald, Be): AF *sens/ation,* I *-azione,* Po *-acja,* R *-acija,* (H *-ación),* G *Sensation.* Ps-sf *-cio.*

El L mez. *sensatio -onis* kun orig. signifo "impresego al la sensoj" (kp PV 2), der. de L *sensus* "senso" (vd. tiun).

SENT/I (f; Un): L *sentire*; F(H) *sent/ir,* I *-ire.* Kp A *sentiment* "-o". Internacie ko-

nata pere de la der. *sentimental/a* "romanece sentema", kp tiun. ¶ 1882 *sant-* (laŭ F prononco [sât-]). ¶ Io *sent/ar,* IeIa *-ir.*

L *sentire* signifas "senti, percepti, rimarki; opinii" (kun subst. *sensus,* vd. *senco* k *senso*), probable par. al G *Sinn* "senco, senso" k Li *sintéti* "konsiliĝi, decidiĝi" (HE rad. **sent-* "rimarki"). – Samfamiliaj vortoj en Eo: *konsenti, senco, senso, sensacio, sentenco, sentimentala.*

SENTENC/O (f; RE): L *sententia;* F *sent/ence,* I *-enza,* Po *-encja,* R *-encija,* (H *-encia*), G *Sentenz.* Kp A *sententious* "-a". Ps-sf *-enc.* ¶ 1894 *sentenz-.* L *sententia* orig. "opinio" (> "opiniesprimo" > "sentenco"), subst. de *sentire* "opinii ktp" (vd. *senti*).

SENTIMENTAL/A (2; Be): AFG(H) *sentiment/al,* I *-ale,* R *-al'nyj,* Po *sentymentalny.*

Ps-sf *(-ment), -al.* Latinida vorto, propr. proks. "sentema", der. de AF *senti/ment,* H *-miento,* I *-mento* "sento" (> eo *sentiment/o* ER, se tiu radiko ne estas retrograde derivita de *sentimental-),* subst. de F *sentir* ktp, vd. *senti.*

SEP (f; Un): L *septem;* F *sept,* I *sette,* (H *siete,* kp *séptimo* "-a"). Kp A *septuagenarian* "sepdekjar/a, -ulo". Bazita, kiel la plej multaj numeraloj, sur L kun unusilabigo (kp F!) kaj apokopo de *-t* (kp *ok*). ¶ 1881 *sep.* ¶ Io =, Ie *sett,* Ia *septe.*

El HE **septm* s.s., kp A *seven,* G *sieben* (pĜ **sebun*); R *sem',* Po *siedem;* Sa *saptá,* Gr *heptá,* Ir *secht,* Li *septynì.* Samfamiliaj vortoj en Eo: *semajno, septembro, septeto.*

SEPI/O (f; RE) 1) zool. 2) koloraĵo (Ve Wü kun var. *sepi/kolor/o,* PV): L *sepia* (1); A *sepia* (2), F *seiche* (1), *sépia* (2), G *Sepia* (1, 2), I *seppia* (1, 2), Po *sepia* (1, 2), R *sepija* (1, 2). Formo por senco 1 (la sola Fundamenta) laŭ L (zoologia termino); por senco 2, la modernaj fontlingvoj akordas. ¶ Io *sepi/o* (1), *-ajo* (2); Ie *sepia* (1, 2); Ia **sepia* (1, 2).

La koloraĵo estis orig. ekstraktata el la ' inko' de la molusko kaj ricevis ties nomon. L *sepia* el Gr *sêpía* s.s. (zool.) kun necerta etimologio (ofte rilatigita al *sê'pein* "putrigi" – ĉar ĝi per la elŝprucigata fluidaĵo malpurigas la akvon?).

SEPTEMBR/O (f; Du, RE): L *(mensis) September;* AG *September,* F *septembre,* I *settembre,* R *sentjabr,* (H *septiembre*).

Bazita sur L same kiel ĉiuj aliaj monatnomoj. Pri la radikfino, vd. sub *novembro.* Propr. "la sepa (monato)" (de la origina jarkomenco en la romia kalendaro, la 1-a de marto), adj. der. de *septem* "sep", vd. tiun.

SEPTET/O (2; Jü; en Ve kun var. *septed/o*); A *sept/et(te),* F *-uor,* Po *-et,* (H *-eto*), G *Septett,* I *settetto.*

Termino formita (19a jc) surbaze de L *septem* "sep", en AGHI per la latinida suf. *-et(t)* (vd. ps-sf *-et*), en F laŭ analogio de *quatuor* "kvarteto".

SERAF/O (2; Be): A *seraph* (plur. *-im*), F *séraphin,* G *Seraph,* I *seraf/ino,* Po *-in,* R *-im,* (H *-ín*); L ekl. *Seraphim.* Mallonga radikformo laŭ AG, evidente ĉar *-in* sugestus virinan formon (analoge ĉe *kerubo*). ¶ Io =, Ie *seraf,* Ia **seraphin.*

El He *serâfîm,* plur. de *sârâf,* kredeble de *sâraf* "bruligi" ("brulaj, ardaj": vd. Biblia Vortaro 755). – Cherpillod 1992, 96.

SERAJL/O (2; Jü): A *seraglio* [-á:lj-], F *sérail* [-áj], G *Serail* [-áj], I *serraglio* [-ál'-], Po *seraj,* R *seral',* (H *serrallo* [-ál'-]). Latinida [l'] reprezentiĝas per *-jl-;* pri analogaj okazoj vd. *ajlo.* ¶ Io *serayo,* Ie *serái,* Ia *seralio.*

Pere de Pe *serâj* "palaco, kortego" el Tu *saray* "palaco". – Cherpillod 1992, 96.

SERĈ/I (f; Un): A *search* [sö:ĉ], F *chercher* [ŝerŝé], I *cercare* [ĉ-]. Bazita sur A. La respondaĵo A *ea* [ö:] : Eo *e* cetere verŝajne nur en *learn : lerni* (kiu tamen pli respegulas G *lernen*); kp ank. A *ea* [e] : Eo *e* en *pleasure : plezuro, weather : vetero* (vd. Cherpillod 1990, 24). ¶ 1894 *cerk-* (< I). ¶ IoIe *serchar,* Ia *cercar.*

El L vulg. *circare,* propr. "ĉirkaŭiri (por trovi ion)" de L *circa* "ĉirkaŭ" (vd. tiun). **SE-**

RENA (2; Jü): A *seren/e,* I(H) *-o,* F *serein* (kp *sérénité* "-eco"); L *serenus.* ¶ Io =, Iela *seren.* Kredeble par. al Gr *xêrós* "seka" (kp *eliksiro*), Sa *kŝârá-* "bruliga, akra". Kp la sekvan.

SERENAD/O (2; LInt 1/1900, Jü): A *seren/ade,* I(H) *-ata,* PoR *-ada,* F *sérénade,* G *Serenade.* ¶ Io =, Ie *seren/ade,* Ia *-ada.*

Itala vorto, jen klarigita kiel der. de I *sereno* "serena" (tiuokaze unue "bela serena nokto", poste "nokta kanto"), jen kiel der. de I *sera* "vespero" (el L *serus* "malfrua", probable radikpar. al G *seit* "depost"). Se la unua etimologio estas ĝusta, oni devas kalkuli kun senca influo de I *sera;* se la dua, kun forma influo de I *sereno.*

SERĜENT/O (f; RE): A *serg/eant* [-ĝe'nt], F *-ent* [-ĵâ´], I *-ente* [-ĝént-], G *Sergeant* [-ĵánt], Po *sierz'ant* [-ĵant], R *serĵant,* (H *sargento* [-ĥ-]). Pri A *g* [ĝ]/F *g* [ĵ] > Eo *ĝ,* vd. *aĝo;* en tiu ĉi radiko *ĝ* reprezentas ankaŭ la molan sonon de PoR (vd. Szerdahelyi 1987, 118). Radikfino *-ent* laŭ F ortografio, ne (kiel en GPoR) aludante la F prononcon. ¶ 1894 *sergent-.* ¶ Io *serjento,* Iela *sergente.*

F vorto, pli frue "servisto", el L *servi/ens -entis* "servanto, deĵoranto", ptc.prez. de *servire* "servi" (vd. tiun).

SERI/O (f; N-ro 15 1888 "vico", UV): A *ser/ies,* I(H) *-ie,* Po *-ia,* R *-ija,* F *série,* G *Serie.* Povas esti bazita sur la modernlingvaj formoj aŭ sur la L originvorto (vd. sube; samtipaj estas *glaci/o, rabi/o).* Io =, Iela *serie.*

El L *series* "vico", propr. "kunplektiĝo", subst. de *serere* "kunplekti, vicigi, ordigi", eble par. al *sors* "sorto" (kp tiun) k plue al Gr *seirá* "ŝnuro". Samfamiliaj vortoj en Eo: *aserti, dezerto.*

SERIOZ/A (f; RE): A *serious,* F *sérieux,* I(H) *serio,* R *ser'ëznyj;* L *serius.* Kp Po *na serio* "serioze". Formo respegulanta AFI(R); la mallonga formo estis neebla pro *seri/o.* Ps-sf *-oz.* ¶ 1894 *serios-.* ¶ Io =, Ie *seriosi,* Ia *serie, seriose.*

La pli longa formo el L vulg. *seriosus,* der. de L *serius,* orig. "peza", par. al G *schwer* "peza", Li *svarùs* s.s.

SERPENT/O (f; Un): L *serp/ens -entis;* AF *serp/ent,* I *-ente,* (H *-iente*). ¶ Io =, Ie Ia *serpente.*

Propr. "ramp/ulo, -anto", subst.-igita ptc. prez. de L *serpere* "rampi", par. al Gr *hérpein* "rampi" (kun *herpetón* "rampulo") k Sa *sárpati* "rampas" (kun *sarpá-* "serpento" de HE rad. **serp-* "rampi".

SERUR/O (f; Un): F *serrure,* I *serratura,* (H *cerradura*); kp L *sera* s.s. Formo kopianta F. ¶ Io =, Ie *serrure,* Ia *serratura.*

Der. de F *serrer,* antaŭe "fermi" (nun "kunpremi, stringi"), kp I *serrare* "fermi", H *cerrar* "fermi, ŝlosi", el L *serare* "fermi", der. de *sera* "seruro, riglilo" (kun necerta etimologio).

SERV/I (f; Un): L *servire;* A *serv/e,* F(H) *-ir,* I *-ire.* ¶ Io *serv/ar,* Iela *-ir.*

Latin(id)a vorto, en L orig. "sklavi", der. de *servus* "sklavo" kun necerta etimologio. Samfamiliaj vortoj en Eo: *serĝento, servico, servuto.*

SERVIC/O (f; RE): AF *serv/ice,* I *-izio,* R *-iz,* (H *-icio*), G *Service,* Po *serwis.* Forme bazita sur AFG; semantike pli malvasta ol en AFGI, kie la vorto ankaŭ signifas "(pri)servado". ¶ Io = (forme kaj sence); Ie *serv/ice* "servico", *-icie* "servado"; Ia *servicio* "servico; servado".

F *service* unue "servado" (> "tabloservado" > "surtablaĵo"), el L *servitium* "servado kiel sklavo", der. de *servire* "servi, sklavi" (vd. *servi*).

SERVUT/O (f; RE; *-i* Wü): A *serv/itude,* F *-age, -itude,* I *-itù (della gleba,* propr. "de terpeco"), (H *-idumbre*). Ĉe siaj unuaj aperoj (RE, UV)), la vorto signifis laboron ŝuldatan al mastro-sinjoro; poste (ekz. en Jü, Ka) ĝi signifis la kondiĉon de servutuloj (tiel la cititaj fontlingvaj vortoj, foje sinonimoj de "sklaveco"). Ĉiuokaze, Z bazis la radikon sur L *servi/tus -tutis* "sklaveco", tamen kun unika sinkopo de *-it-* (vd. Szerdahelyi 1987, 135; Waringhien LV 76). Indas konstati, ke la silabo *it* estis neakcentata en la L vorto

(kp *vánitas* > Eo *vant/o*). En 1894, Z proponis la plenan L radikon: *servitut-*. ¶ Io *korveo* (< F *corvée*); Ie *serv/age,* Ia *-itude.*

L *servitus* same kiel la sinonimaj *servitudo* (kp AF supre) k *servitium* (vd. sub *servico*) estas der. de L *servus* "sklavo" (vd. sub *servi*).

SES (f; Un): L *sex* [seks]; AF *six* [F sis], G *sechs* [zeks], I *sei* (kp *sesto* "-a"), Po *szes´c´,* R *ŝest',* (H *seis*). Kp Ji *zeks.* Bazita (kiel la plej multaj numeraloj) sur L kun simpligo de la fina konsonantparo, kp *sep* el L *sept(em), ok* el L *oct(o).* Origine (1881) Z mallongigis al *sek,* poste al *ses* (eble inspirita de la F prononco kaj la I orda numeralo). Tio donis lokon en Un al la adjektiva radiko *sek-,* kiu en 1881 estis *ses´-.* – Laŭ Günkel (1996, 186) la modeloj de Z estis GJi kun apogo al la konsonantismo de AFGr (vd. sube).¶ Io *sis,* Ie *six,* Ia *sex.*

El HE **s(ŭ)eks* "6", kp ank. Sa *ŝaŝ,* Gr *hex* (vd. *heksametro*), Ir *sé,* Gt *saíhs,* Bg ant. *ŝest'* (> RPo).

SEVER/A (f; Un): L *severus;* A *sever/e,* I-(H) *-o.* F *sévère.* ¶ Io =, Ia *sever,* Ie *-i.*

La unua elemento de la vorto ŝajnas esti la L pref. *se-* "sen. el-" (vd. la ps-pf *se-* kaj *sed*); la parenceco de la dua estas pridisputata.

SEVRUG/O (2; RE): Po *siewruga,* R *sevrjuga.* La Ea formo estas la slava sen palatalizoj. La motivo por elekto de slava radiko anstataŭ latina verŝajne estas la graveco de la fiŝo sur slava teritorio (produktado de kaviaro).¶ Mankas speciala termino en IoIeIa.

El Tatara *söïrök* s.s.

SEZON/O (f; RE) 1) jarkvarono 2) ĝusta tempo: A *season* [-z-] (1, 2), F *saison* [sezô'] (1, 2), G *Saison* [=F] (2), PoR *sezon* (2); kp I *stagione* (1, 2), (H *estación* [*del año* "de la jaro"] 1). PoR prezentas konvenan por Eo fonetikan transskribon de la F formo, diferencan de *ses/on/o.* ¶ 1894 *seson-.* ¶ Io = (1, 2), Ie *seson* (1, 2), Ia *station del anno* (1), *saison* (2).

AGPoR < F, el L *sat/io -ionis* "semado" (> "sezono por semado" > "sezono"), subst. de *serere* "semi" (vd. tiun). – La HI formoj el L *stat/io -ionis* "staro" (do orig. "haltpunkto de la jaro"), vd. *stacio.*

SFER/O (1; Du, RE): A *sphere,* F *sphère,* G *Sphäre,* IPoR *sfera,* (H *esfera*). ¶ Io =, Ie *sfere,* Ia *sphera.*

El Gr *sphaíra* "globo, pilko, sfero" (kun nekonata etimologio). – Samfamilia vorto en Eo: *atmosfero.*

SFINKS/O (2; Be): AF *sphinx,* G *Sphinx,* I *sfinge,* PoR *sfinks,* (H *esfinge);* L *Sphinx* (gen.: *Sphingis*). Eo akceptis la L(Gr) nominativformon, vivantan en la plimulto de fontlingvoj. Same okazis en *feniks/o,* alia ekzemplo de antikvepoka mitologia vorto; malsama traktado en *strig/o.* – La L zoologia termino *Sphinx* (kun identa fleksio) fariĝis en Eo unue *sfinks/o* (Ve), poste *sfing/o* (Wüster Esp. princ. 58, PIV). ¶ Io *sfinxo,* Ie *sfinxe,* Ia *sphinge.*

El Gr *Sphinx* (gen.: *Sphingós*) "Sfinkso", propr. "strangolanto" ("ĉar Sfinkso strangolis tiujn, kiuj ne povis solvi ŝian enigmon", Yamasaki supl., 5a eld., 16), samradika kun Gr *sphíngein* "strangoli, kunpremi" (vd. sekv.).

SFINKTER/O (2; Be): L *sphincter;* AF *sphincter,* I *sfintere,* (H *esfínter*). Bazita sur L (medicina termino). ¶ Io *sfintero,* Ie *sfinctere,* Ia**sphincter*).

El Gr *sphinktê'r* s.s., propr. "kunpremanto", agantnomo de *sphíngein* "kunpremi; strangoli" kun nekonata etimologio. – Samfamilia vorto en Eo: *sfinkso.*

SI (f; Un): F *se, soi,* G *sich,* I *si, se,* Po *sie,* R *sebja* (kp *-sja* "sin" en refleksivaj verboj), (H *sí, se*); L *se* (kp *sibi* "al si"). Kp P *si.* Konsistas evidente el *s-,* pri kiu akordas ĉiuj fontlingvoj, kaj *-i,* fino komuna al ĉiuj pronomoj personaj (kp *mi*). Sed *-i* havas tiel fortan apogon en la fontlingvoj, ke ĝi povas esti rigardata kiel nepriora elemento. – La posesivaj formoj konfirmas *s-* sed ne plue apogas *-i*: F *son/sa,* G *sein,* I *suo/sua,* Po *swój,* R *svoj,* (H *su, suyo/suya*); L *suus/sua.* (Rimarku tamen, ke nur la LPoR vortoj estas ekzak-

taj ekvivalentoj de Eo *sia*; la ceteraj signifas ankaŭ "lia, ŝia, ĝia".) ¶ 1878, 1881 *so.* – 1894 *su.* – Posesiva formo 1881 *sa,* 1894 *sue.* ¶ Io *su* (pos. *sua*); Iela *se* (pos. *su,* kiu ankaŭ signifas "lia, ŝia, ĝia").

El HE refleksiva pronombazo **s(ŭ)e-,* kp ank. Sa *sva-* "sia, propra"; Gr *he(autón)* "sin", *heós* "sia"; Sk *sig* "sin", Gt *sik* (pĜ **se-k*); Bg ant. *se* "sin"; Li *sâvas* "sia". Samfamiliaj vortoj en Eo: *se, sed, sen,* ev. la dua elemento en *jes.* Kp ank. *sola, svati, sveda.* El tiu bazo formiĝis multaj vortoj signifantaj ion apartan, propran, privatan; vd. sub *etiko, etnograf(i)o, kutimo,* ev. *idi/omo, -oto.*

SIBL/I (f; EG): L *sibilare*; F *siffler,* I *sibilare,* (H *silbar*). Kp A *sibilant* "sibla (sono)". Bazita sur L kun sinkopo de *-i-,* eble inspirita de F. La kaŭzo povas esti strebado eviti sufiksidentan radikfinon (kp *vigl-* el L *vigil*). ¶ Io *siflar;* Ie *siflar,* (pri serpentoj k.s.) *sibilar;* Ia *sibilar.*

Onomatopea vorto, kp Gr *sízein* s.s.

SID/I (f; Un): A *sit,* F *être assis* (propr. "esti sida"; kp *siège* "-ejo", *s'asseoir* [refl.] "-iĝi", *sédentaire* "-ema"), G *sitzen,* I *sedere,* Po *siedziec'* (kp *siadac'* "-iĝi"), R *sidet'* (kp *sadit'sja* "-iĝi"), (H *estar sentado,* propr. "esti sida", kp *sentarse* [refl.] "-iĝi"); L *sedére* (kp la kunmetan formon *-sidére,* ekz. en *assidére* "apudsidi", *praesidére* "antaŭsidi", ank. *sídere* "-iĝi"). – F (kaj H) malhavas apartan verbon por tiu ĉi nocio. El inter la aliaj, LI sugestas **sed-,* neebla pro kolizio kun *sed* (Yamasaki s.v.). Z anstataŭe elektis *sid-,* vaste reprezentata en la fontlingvoj: AG bazo *sit-,* R bazo *sid-* kaj L kunmeta formo *-sidere* (elektita "por paraleligo kun *-sid/i*", Yamasaki supl. 11; nu, Eo certe havas *insid/i* sed ankaŭ *prezid/i*). ¶ 1881 *sid-.* ¶ Io *sidar,* Iela *seder.*

Komuna eŭropa vorto, el HE rad. **sed-* "sidi", kp ank. Sa *sádas-* "sidejo", *sátsi* "sidas"; Gr *hézesthai* "sid(iĝ)i", *hédra* "seĝo" (kp *katedro*); Gt *sitan,* Sv *sitta* "sidi"; Li *sêsti* "sidi". Kp ank. *nesto.* – Samfamiliaj vortoj en Eo: *asesoro, insidi, posedi, prezidi, seĝo, selo, sieĝi.*

SIEĜ/I (f; RE): A *besiege* [bisí:ĝ] (kp *siege* "-o"), F *assiéger* [asieĵé] (kp *siège* "-o"), I *assediare,* (H *sitiar, asediar*); L *obsidere.* Laŭ Szerdahelyi (1987, 135) formita per aferezo el F; eĉ pli probabla fonto estas la komuna substantivo de AF, kvankam la radiko estas prezentita kiel verba (por A *g* [ĝ]/F *g* [ĵ] > Eo *ĝ,* vd. *aĝo*). ¶ 1894 *obsid-.* ¶ Io *siejar,* Iela *asediar.*

Propr. "preni sidejon ĉe (iu loko)" de (F *à,* A *by* "ĉe" k) F *siège* "sidejo" (poste ank. "seĝo") el L vulg. **sedicum* "sidejo", der. de L *sedere* "sidi", kies radikon oni rekonas ank. en la cititaj HI formoj; kp L *obsidere* "sidi kontraŭ (iu loko)". Vd. *sidi*; kp spec. la etimologie identan *seĝo.*

SIFILIS/O (2; Be): L med. *syphil/is -idis*; AF *syphilis,* G *Syphilis,* I *sifil/ide,* R *-is,* Po *syfilis,* (H *sífilis*). Formo laŭ la plimulto de fontlingvoj, egala al L nominativo (kp sub *lapiso*). ¶ Io =, Ie *sifilise,* Ia *syphilis.*

Vorto tirita el la verko *Syphilis* (1530) de Fracastoro el Verono, kiu prezentas legendon pri la ekesto de tiu malsano; *Syphilis* signifas "la poemo pri Syphilus" (kp *Aeneis* "la poemo pri Eneo [*Aeneas*]"). La nomo de tiu heroo estas kreita laŭ Sipylos, en la antikvepoka mitologio filo de Nioba, naskita apud la monto Sipylos en Lidio.

SIFON/O (2; Be): AF *siphon,* G *Siphon,* I *sif/one,* R *-on,* (H *-ón*), Po *syfon*; L *siph/o -onis.* ¶ Io =, Ie *sifon,* Ia *siphon.*

El Gr *síph/ôn -ônos* "sifono, tubo", eble onomatopea.

SIGEL/O (f; Un): L *sigillum*; A *seal* [si:l], F *sceau* (kp *sceller* "-i", *sigillaire* "-a"), G *Siegel* [zí:g-], I *sigillo,* (H *sigilo*). Z evitis la LI formon, kiu donus **sigil-,* supozeble pro la sufiksidenta radikfino; *-el* laŭ G (kp *cirkel/o, grifel/o*) aŭ kiel rezulto de la ne malofta sonŝanĝo *il > el* (kp *fringelo, mirtelo*). ¶ 1894 *sigl-.* ¶ Io *siglo,* Ie *sigill/e,* Ia *-o.*

En L orig. "malgranda figuro/bildo", dim. de *signum* "signo, figuro" (vd. *signo*). Kp ev. *skarlato.*

SIGN/O (f; Un): L *signum*; A *sign*, F *-e* [-n'], (H *-o*), I *segno* [-n'-]. Krome internacie konata pro la derivaĵo *signal/o* ("interkonsentita signo", PIV), kp tiun. Konservo de la (L) ortografio (pri analogaĵoj vd. *digna*). ¶ IoIa =, Ie *signe*.

Orig. kredeble "enĉizaĵo, ĉizita marko" aŭ sim.; tiuokaze samradika kun L *secare* "tranĉi" (vd. *sekci*). Samfamiliaj vortoj en Eo: *asigni, desegni, insigno, sigelo, signalo, signifi.*

SIGNAL/O (f; RE): AFR *signal* [F -n'-], G *Signal*, I *segnale* [-n'-], Po *sygnał* [sig-], (H *señal*). La formo, bazita sur la ortografio de AFG(R), konformiĝas al *signo*.

Ps-sf *-al*. Subst-igo de L *signalis* "signa", adj. der. de *signum* "signo" (vd. tiun).

SIGNIF/I (f; Un): A *signi/fy* (kp *-fication* "-o"), F *-fier*, I *-ficare*, (H *-ficar*); L *significare*. Pri Eo *-if-* kaj *-ifik-*, vd. *edifi*. ¶ Io *signi/fikar*, IeIa *-ficar*.

En L orig. "doni signon (pri io)" (poste "aludi, simboli, signifi"), kunm. de *signum* "signo" (vd. tiun) k *-ficare*, kunmeta formo de *facere* "fari" (vd. tiun).

SILAB/O (f; RE): A *syllab/le*, F *-e*, G *Silbe*, I *sillaba*, Po *sylaba*; L *syllaba*. Ps-pf *sin-*, var. *si-*. ¶ Io =, Ie *síllabe*, Ia *syllaba*.

El Gr *syllabê* s.s., propr. "kuntenaĵo" (t.e. 'kuntenitaj/interligitaj literoj'), subst. de *syllabeín* "kunteni", kunm. de *syn-* "kun-" (vd. ps-pf *sin-*) k *labeín* (inf.aor.)/*lambánein* (inf.prez.) "preni", kp *dilemo, epilepsio.*

SILENT/o (f; Un): L *silentium* (kp *silere* "-i"); A *sil/ence* (ank. verbo = "-igi"; kp *be silent* "-i", propr. "esti -a"), F *-ence*, I *-enzio*, (H *-encio*). Konata kiel fremdvorto en G (*Silentium*).Verba radiko, etimologie tamen bazita sur la L substantivo kun ellaso de la neakcentita *-i-*. Tiu tipo donas en Eo normale *-c/o* (kp *komerc/o, negoc/o, spac/o*); la konservo de *-t-* eble ŝuldiĝas al la A adjektivo *silent*. ¶ Io *silenc/o* (kp *-ar* "-i"), Ie *silenti/e*, Ia *-o* (kp IeIa *tacer* "-i" el L I *tacere*, F *(se) taire*).

L *silentium* estas subst. de *silere* "-i" (ptc. prez. *sil/ens -entis* > A *silent*), eble radikidenta kun Gr *sigán* "silenti", G *schweigen* s.s. (HE **si-/sŭi-*).

SILIK/O (f; RE): L *sil/ex -icis*; F *silex*, I *selce*, (H *sílice*). Kp A *silic/eous, -ious* "-a". Radiko internacie konata per sciencaj derivaĵoj, ekz. AF *silic/ate*, HI *-ato*, G *Silikat*, Po *sylikat*, R *silikat* (> eo *silikat/o* Ve). Bazita sur la L stemo laŭ ties antikvepoka prononco (pri analogaĵoj vd. *lariko*). ¶ Io *silexo*, Ie *sílice*, Ia *silice*.

Kredeble par. al L *calx* (gen.: *calcis*) "(kalk)-ŝtono" (vd. *kalko*, sub kiu *siliko* estas aldonenda kiel ev. parenca vorto), kp ank. Ir *scelec* "roko".

SILK/O (f; RE): A *silk*, R *ŝëlk*. Kp Sv *silke*. Bazita sur A kun certa apogo de R. ¶ 1894 *set-* (< I *seta*, kp H *seda*). ¶ Io =, Ie *silk*; Ia *seta*.

Ĝerm.-slava vorto (kp ank. Sl ant. *ŝelkŭ*, Li *ŝilkai* s.s.), paralela al L *sericum* "silko" el Gr *sêrikón* s.s., subst.-igita adj. der. de *Sêres* "ĉinoj", bazita sur Ĉ *se* "silko". La formo kun *-l-* evidente pasis tra lingvo kie oni intermiksas *r* k *l*.

SILOGISM/O (2; RE): A *syllogism*, F *-e*, G *Syllogismus*, I *sillog/ismo*, R *-izm*, Po *sylogizm*, (H *silogismo*); L *syllogismus*. Ps-pf *sin-*, var. *si-*; ps-sf *-ism*.

El Gr *syllogismós* "silogismo (Arist.); rezonado; kalkulado", subst. de *syllogízesthai* "konkludi; kunkalkuli", kunm. de *syn-* "kun-" (vd. ps-pf *sin-*) k *logízestahi* "konsideri, kalkuli", der. de *lógos* "kalkulado, rezonado ktp" (vd. sub *logiko*).

SILUET/O (2; Jü): AF *silhouette* [siluét], G *Silhouette* [=AF], R *siluet*, I *-ta*, Po *silweta*, (H *silueta*). La kombino *-lh-* estante fonetike tre maloportuna, oni povas diri ke Eo sekvas IR kun simpla *-l-*. ¶ Io =, Ie *siluette*, Ia *silhouette*.

El la nomo de Étienne de Silhouette, malpopulara franca ministro, dum kies epoko (1750-aj jaroj) la arto fari siluetojn ekfloris; la esprimo *à la silhouette* "laŭ la maniero de S." estis unue uzata pri objektoj malbone faritaj aŭ nepretaj, poste speciale pri 'nekompletaj' portretoj montrantaj nur la

konturojn.

SILUR/O (f; RE): L *silurus;* F *silur/e,* I (H) *-o.* ¶ Io =, Ie *silur/e,* Ia *-o.*

El Gr *sílouros* s.s. (?), kies dua elemento kredeble estas *ourá* "vosto" (kp *sciuro*).

SILVI/O (f; RE): L zool. *Sylvia;* I *silvia.* Zoologia termino prenita el L (kun *y* > *i* kiel ordinare; teorie ebla estas kompreneble itala deveno, vd. Gregor 1982, 28). ¶ Io =; Ia *silvia** Ruhrig; ne trovita en Ie.

Propr. "arbara (birdo)", adj. de L *sylva/silva* "arbaro" kun nekonata etimologio. Samfamilia vorto en Eo: *sovaĝa.*

SIMBOL/O (1; RE): APo *symbol,* F *-e,* G *Symbol,* R *simbol,* I *-o,* (H *símbolo*). Ps-pf *sin-,* var. *sim-.*

Pere de L *symbolum* "marko, rekonilo" el Gr *sy´mbolon* "rekonilo, identigilo, signo", subst. de *symbállein* "kompari", propr. "meti kune", kunm. de *syn-* "kun" (vd. ps-pf *sin-*) k *bállein* "meti, ĵeti" (vd. *balistiko,* kp spec. *parabolo*). Gr *sy'mbolon* estas origine "kunmetendaĵo": duigitaj objektoj (ekz. ringoj, amuletoj) servis kiel rekoniloj ĉe rekunmeto.

SIMETRI/O (1; RE): A *symmetry,* F *symétrie,* G *Symmetrie,* I *simmetr/ia,* R *-ija,* Po *symetria,* (H *simetría*); L *symmetria.* Ps-pf *sin-,* var. *si-;* ps-sf *-i* 1.

El Gr *symmetría* "simetrio, ĝustaj proporcioj", subst. de *symmetreín* "mezuri per komparo (apudmetado)", kunm. de *syn-* "kun-, apud-" (vd. ps-pf *sin-*) k *metreín* "mezuri", der. de *métron* "mezurilo" (vd. *metro*).

SIMFONI/O (1; RE): A *symphon/y,* F *-ie,* G *Symphonie,* I *sinfon/ia,* (H *-ía*), Po *symfonia,* R *simfonija.* Ps-pf *sin-,* var. *sim-;* ps-sf *-i* 1.

Pere de L *symphonia* "muziko, koncerto" el Gr *symphōnía* "harmonio, akordo", subst. de *symphōneín* "harmonii", propr. "soni kune", kunm. de *syn-* "kun" (vd. ps-pf *sin-*) k *phōnḗ'* "sono" (vd. *fonetiko*).

SIMI/O (f; RE): L *simi/us, , -a;* F *singe,* I *scimmia,* (H *simio*). Kp A *simian,* F *simien* "-a", F *simiesque* "-eska". Bazita sur L (zoologia termino). ¶ Io =, Ie *simi/e,* Ia *-a.*

Der. de L *simus* "platnaza" el Gr *simós* s.s. kun necerta etimologio.

SIMIL/A (f; Un): L *similis;* A(H) *simil/ar,* I *-e,* F *semblable* (kp *similitude* "-eco"). Stemformo identa en LAI. ¶ Io =, Ie *simil,* Ia *-e.*

Latin(id)a vorto par. al Gr *homalós* "ebena", Ir *samail* "simileco" de HE bazo **sem-* "unu" (vd. sub *simpla*). Samfamilia vorto en Eo: *asimili.*

SIMPATI/O (1; RE): A *sympath/y,* F *-ie,* G *Sympathie,* I *simpat/ia,* R *-ija,* (H *-ía*), Po *sympatia.* Ps-pf *sin-,* var. *sim-;* ps-sf *-i* 1.

El Gr *sympátheia* "kunsento, kompato", subst. de *sympathê's* "kunsentanta, kompatanta", kunm. de *syn-* "kun-" (vd. ps-pf *sin-*) k *páthos* "sento, pasio, sufero" (vd. *patoso;* kp spec. *antipatio*).

SIMPL/A (f; Un): AF(H) *simple,* I *semplice;* L *simpl/ex -icis,* ank. *simplus* (fem.: *simpla*). Laŭ la komuna bazo de AFL. ¶ Io =, Ie *simplic,* Ia *simple, simplice.*

Propr. "unu/obla". La unua elemento estas identa kun la bazo de L *semel* "unu fojon", *simul* "samtempe", *similis* "simila" (kp tiun), *singulus* "unuopa" (vd. *singularo*) de HE bazo **sem-* "unu" (kp Sa *sa-* "unu-", *samá-* "iu ajn", *sahá* "kune"; Gr *heis* (< **sems*), gen. *henós* "unu" (kp sub *hektogramo*), *haploús* "simpla"; Gt *sums* "iu ajn", G *(zu)sammen* "kune"; kp plue la vortojn cititajn sub *sama.* – La dua elemento formas multiplikajn adjektivojn en L (kp *dupl/ex -icis* "duobla"; *-plic-* estas la radiko de L *plicare* "faldi", vd. sub tiu kaj la suf. *-obl-*).

SIMPTOM/O (2; RE): APo *sym/ptom,* F *-ptôme,* G *Symptom,* I *sintom/o,* (H *-a*), R *simptom;* L med. *sympto/ma -matos.* Ps-pf *sin-,* var. *sim-;* ps-sf *-m(at).*

El Gr *sy'mptō/ma -atos* s.s., orig. "koincido, okazaĵo, akcidento" (sem. evoluo: > "koincido kun malsano" > "konformeco al malsano" > "signo de malsano"), subst. de *sympíptein* "koincidi, okazi", propr. "kun-fali" (pri semantikaj paralelaĵoj vd. sub *okazo*),

kunm. de *syn-* "kun-" (vd. ps-pf *sin-*) k *píptein* "fali" de HE rad. **pet-*, vd. *peti.*

SIN/O (8; El, Wü, PV; antaŭe *brust/o, ĉirkaŭ/brak/o*): L *sinus*; F *sein,* I(H) *seno.* Bazita sur L; vokalismo **sen-* estis neebla pro la prepozicio *sen.* Identa kun eo *sinus/o,* termino trigonometria (Jü) kaj anatomia (Briquet) kun formo konservanta la L nominativfinaĵon. ¶ Io = (kp *sinuso* trig., anat.); Ie *sinu* (kp *sínus* trig. anat.); Ia *sino* (ank. trig., anat.).

L *sinus* orig. "kurb/aĵo, -iĝo" (poste pri la kurbiĝo formata de la homa brusto kaj la femuroj ĉe sidado); necerta etimologio.

SINAGOG/O (2; RE): AF *synagog/ue* [-g], Po *-a,* G *Synagoge,* IR(H) *sinagoga.* Ps-pf *sin-.* ¶ 1882 *seng-* (verŝajne mll. de la du unuaj silaboj).

El Gr *synagogê* "sinagogo, kunvenejo", propr. "kunvenigo", subst. de *synágein* "kunigi, kunpeli", kunm. de *syn-* "kun-" (vd. ps-pf *sin-*) k *ágein* "peli" (vd. sub *agi*). La radiko aperas kun ripeto kaj apofonio (*ag-og*) same kiel en *demagog(i)o, pedagog(i)o.*

SINAP/O (2; Jü): L *sinapi(s)* (L bot. *Sinapis*); F *sénevé,* G *Senf,* I *senape.* Kp A *sinapism,* F *-e,* (H *-o*) "sinapa kataplasmo". Bazita sur L (botanika termino). ¶ Io =, Ie *sinap,* Ia *-is**.

El Gr *sínap/i, -y* s.s. (pli frua kromformo *nápy,* kp *napo*), fremdvorto de nekonata origino; la interrilato de la du formoj ne estas klarigita.

SINCER/A (f; RE): A *sincer/e,* I(H) *-o,* F *sincère*; L *sincerus.* ¶ Io =, Ia *sincer,* Ie *-i.*

Orig. signifo en L "nemiksita, pura"; etimologio pridisputata.

SINDIKAT/O (2; Be): F *syndicat,* A *-e,* G *Syndikat,* I *sin/dacato,* R *-dikat,* (H *-dicato*), Po *syndykat.* – Ps-pf *sin-,* ps-sf *-at* 2. ¶ Io =, Ie *sindicatu,* Ia *syndicato.*

El L mez. *syndicatus* "posteno kiel *syndicus*" (= 'reprezentanto de komunumo/korporacio antaŭ tribunalo'; > AF *syndic,* G *Syndikus,* I *sindaco,* Po *syndyk,* R *sindik,* [H *síndico*] > eo *sindik/o* Jü) el Gr *sy'ndikos* "jura reprezentanto, asistanto antaŭ tribunalo" el *syn* "kun" (vd. ps-pf *sin-*) k *díkê* "proceso; justeco", identa kun Sa *díćâ* "direkto, mondflanko" (de HE rad. **deik-* "montri", vd. sub *diri*).

SINEDRI/O (2; RE): A *sanhedr/im, -in,* Po *-yn,* (H *-ín*), F *sanhédrin,* G *Synedrium,* I *sinedri/o,* R *-on.* Formo ŝajne laŭ (G)IR, sed certe influis la Gr originvorto (vd. sube). Ĉiuokaze estis grave eviti la fonetike maloportunan *-nh-* de AF Po. Ps-pf *sin-.* ¶ Ia *Sanhedrin/Synedrio*; ne trovita en IoIe.

Pere de He *sanhedrîn* s.s. el Gr *synédrion* "sinedrio; asembleo", propr. "kunsido", der. de *sy'nedros* "kunsidanta" el *syn-* "kun-" (vd. ps-pf *sin-*) k *hédra* "sidilo, seĝo" (vd. sub *sidi*; kp spec. *katedro*). – Cherpillod 1992, 97.

SINGULAR/O (8; Wü, PV; ne ĉe Z; antaŭe *unu/nombr/o;* kp *singular/a* VeWü 'aparta, speciala'): L *(numerus) singularis*; A(H) *singul/ar,* F *-ier,* G *Singular,* I *singolare.* Bazita sur L (gramatika termino). La termino estas kredeble altrudita pro internacieco, sed influo de Io ne estas ekskludita. Ps-sf *-ar,* var. de *-al.* ¶ Io =, Ia *singular,* Ie *-e.*

L *singularis* "unuopa" estas adj. der. de *singulus* "po unu" (> A *single* "unuopa, unuobla"), radikidenta kun *simplus* "unuopa" (vd. *simpla*).

SINGULT/o (f; RE; *-o* Ka, *-i* cet.): L med. *singultus* (en L klas. ank. "plorĝemo"); I *singhiozzo/singulto* (ank. "plorĝemo"). Kp F *sanglot* "plorĝemo". Kredeble transpreno de la L medicina termino unusenca; por la alia L senco Z utiligis kunmeton (*plor/ĝem/-*). La semantika rimarkigo de Waringhien LV 81 (L "singulto" kontrastas kun FI "plorĝemo") estas trosimpligo. ¶ Io *hipar* "-i" (< H); Ie *hiccar* "-i" (< A *hiccup,* kp Sv *hicka*); Ia *singultar* "-i" (ank. "plorĝemi").

Kp IoIe *singlutar* "plorĝemi". Nekonata origino. La romanaj formoj estis parte influataj de L *gluttire* "gluti".

SINJOR/O (f; Un) 1) 'mastro' 2) titolo

de ĝentileco: A *sir* (2), F *seigneur* [sen'-] (1), I *signore* [-n'-] (1, 2), (H *señor* [-n'-] 1, 2). Bazita sur I (Gregor 1982, 28); latinida [-n'-] reprezentita per *nj* kiel en *kastanjeto, konjako.* ¶ Io *sioro* (el A *sir,* F *[mon]sieur;* kp *sinioro* "moŝto"), IeIa *senior* (kp L sube).

El L *senior* "pli aĝa" (en L mez. uzita kiel honora titolo), komparativo de *sen/ex -is* "maljuna" (vd. *senato*).

SINKOP/O (1; Jü) 1) muz. (Ve) 2) med. (Ka) 3) gram. (Wü, PIV): AF *syncope* (1, 2, 3), G *Synkope* (1, 3), I *sincope* (1, 2, 3), Po *synkopa* (1, 3), R *sinkopa* (1, 3), (H *síncop/a* 1, 3, *-e* 2); L *syncop/a, -e* (2, 3). Ps-pf *sin-.* ¶ Io = (1, 2, 3), Ie *sincop* (1, 2), Ia *syncope* (1, 2, 3).

El Gr *synkopê's.s.* (2, 3), propr. "dis-, de/hako", subst. de *synkóptein* "dehaki (tiel, ke io fariĝas malpli longa)", kunm. de *syn-* "kun-" (vd. ps-pf *sin-*; kp semantike "kunpremi" k.a.) k *kóptein* "haki" (vd. *komo*).

SINOD/O (1; RE): APo *synod,* F *-e,* G *Synode,* R *sinod,* I(H) *-o;* L ekl. *synodus.* Ps-pf *sin-.*

El Gr *sy'nodos* "kunveno", kunm. de *syn-* "kun-" (vd. ps-pf *sin-*) k *hodós* "vojo, irado" (vd. *metodo*).

SINONIM/O (1; Ald; *-a* Jü, *-o* Ka ktp): A *synonym,* F *-e,* G *Synonym,* R *sinonim,* I *-o,* Po *synonim,* (H *sinónimo*); L postkl. *synonym/on, -um.* Ps-pf *sin-.*

El Gr *synô'nymon* s.s., subst.-igita neŭtra formo de *synô'nymos* "samnoma" el *syn-* "kun-, sam-" (vd. ps-pf *sin-*) k *ónyma/ónoma* "nomo" (vd. tiun k spec. *anonima*).

SINOPTIK/A (2; Jü): A *synopt/ical,* F *-ique,* G *-isch,* I *sinottico,* Po *synoptyczny,* R *sinoptiĉeskij;* L ekl. *synopticus.* Ps-pf *sin-;* ps-sf *-ik.*

El Gr *synoptikós* "superrigarda, vidanta la tuton", adj. de *sy'nopsis* "ĝenerala vido, superrigardo", kunm. de *syn-* "kun(e)" (vd. ps-pf *sin-*) k *ópsis* "vido", subst. de la radiko trovebla en *ópsomai* "mi vidos" (vd. sub *optiko* k *okulo*).

SINTAKS/O (1; RE): A *syntax,* F *-e,* G *Syntax,* I *sintassi,* PoR *sintaksis,* (H *sintaxis*); L *syntaxis.* Ps-pf *sin-.*

El Gr *sy'ntaxis* s.s., propr. "kunmetado, kunordigado", subst. de *syntáttein* "kunordigi", kunm. de *syn-* "kun-" (vd. ps-pf *sin-*) k *táttein* "ordigi" (vd. *taktiko*).

SINTEZ/O (2; Jü): A *syn/thesis,* F *-thèse,* G *Synthese,* I *sin/tesi,* R *-tez,* Po *synteza,* (H *síntesis*); L *synthesis.* Ps-pf *sin-;* ps-sf *-z.*

El Gr *sy'nthesis* "kunmeto", subst. de *syntithénai* "kunmeti", kunm. de *syn-* "kun-" (vd. ps-pf *sin-*) k *tithénai* "meti" (vd. *tezo*).

SIREN/O (1; RE): A *siren,* IR(H) *-a,* F *sirène,* G *Sirene,* Po *syrena;* L *Sir/en -enis.* Forme kaj etimologie identa kun eo *siren/o:* tekn. (PV; el A *siren,* F *sirène,* G *Sirene* ktp) kaj zool. (GD, kp Wü *sireni/o/j;* el L zool. *Sirenia* [plur.], A *siren(ian),* F *siréniens* [plur.], G *Sirene* ktp. ¶ Io = (ank. tekn.), Ie *siren/a* (kp *-e* tekn.), Ia *sirena* (ank. tekn.; kp *sirenios* [plur.] zool.).

El Gr *Seir/ê'n -ê'nos* s.s. de pridisputata origino. – La teknika senco (19a jc) aludas pri la kantado de la mitologiaj sirenoj, la zoologia pri la enmara vivado de la koncernaj bestoj.

SIRI/O (8; Ps; kp *Siri/uj/o* Jü; *Sir/i/o* Wü de *sir/o* "siriano"): APo *Syr/ia,* F *-ie,* G *-ien,* I(H) *Sir/ia,* R *-ija;* L *Syria.* Ps-sf *-i* 3.

El Gr *Syría* s.s., eble mallongigo de Gr *Assyría* "Asirio". – Samfamilia vorto en Eo: *sorgo.* – Albault 1991b, 81.

SIRING/O (f; RE): L bot. *Syringa;* I *siringa,* R *siren'.* Botanika termino prenita el L. ¶ Io *lilaco,* Ie *lila,* Ia *lilac* (< A *lilac,* F *lilas,* H *lila,* I *lilla*); Ia ank. *syringa.*

Var. de L *syr/inx -ingis* "ŝalmo" (kavaj tigoj de la planto povis servi por fari tiajn) el Gr *sy'r/inx -ingos* "ŝalmo, tubo" (de nekonata origino).

SIROP/O (f; RE): A *syrup,* FR *sirop,* G *Sirup,* I *sciroppo,* Po *syrop.* Aŭ transpreno de la FR(Po) formo aŭ kombinita vokalismo laŭ plimultoj: *-i-* AFGIPoR, *-o-* FI PoR. ¶ Io =, IeIa *sirop.*

Pere de L mez. *sirupus/syrupus* el Ar *ŝarâb* "trinkaĵo" (> H *jarabe* "siropo") de *ŝariba* "trinki". – Cherpillod 1992, 98.

SISTEM/O (f', 1, 7; Du, RE): APo *system,* F *système,* G *System,* IR(H) *sistema.* Ps-pf *si-,* var. de *sin-;* ps-sf *-m(at)-.*

El Gr *sy'stê/ma -matos* "kunmetaĵo" (> "kunordigita tutaĵo" > "sistemo"), subst. de *synistánai* "kunmeti", kunm. de *syn-* "kun-" (vd. ps-pf *sin-*) k *histánai* "starigi, meti" (rad. *sta-,* vd. sub *stari*).

SITEL/O (f; RE): L *situla;* F *seau.* Verŝajne bazita sur L kun vokalŝanĝo *i* > *e* por eviti sufikssimilan radikfinon.

Oni povas iel kompari *fabel/o* el L *fabula;* same kiel tiu povas esti influita de la paralela L *fabella,* tie ĉi ekzistas L *sitella* "loturno" kiel eventuala inspirilo. Kp ank. *cirkel/o, tabel/o.* F *seau* el L *situlus,* kromformo de *situla;* eble par. al Li *sìlis* "kripo".

SITU/O (8; PV; kp *-i* Wü; ne ĉe Z; antaŭe *situaci/o*): AF *site, situation,* I *sito, situazione,* (H *sitio, situación*); L *situs.* Radiko prijuĝebla diversmaniere: (a) alpreno de L subst. *situs;* (b) mallongigo de *situaci/o;* (c) la verbo *situ/i* povas esti tirita el la adj. L *situs,* A *situ/ated,* F *-é,* H *-ado,* I *-ato* "situanta" (la plej fruaj ekzemploj montras verban radikkarakteron). – Ev. formo *sit-* ŝajnis supozeble neutiligebla pro zoologia termino *sit/o* (Ve, Wü, GD, PIV); tamen Ve allasis ankaŭ tiun: *sit/o* 'parto de pejzaĝo, kiu elvokas spiritan senton'. ¶ Io *situ-eso* (kp *situ-ita* "situanta"), Ie *situation* (kp *situat* "situanta"), Ia *sito, situation* (kp *site, situate* "situanta").

L subst, *situs* kaj L adj. *situs* estas ambaŭ bazitaj sur la verbo *sinere* "(al)lasi" (< "lasi fali, [de]meti"), kp la kunm. **po-sinere* > *ponere* "meti" (vd. *pozitiva*), par. al Gr *eán* (< **seŭa-*) "(al)lasi" k G *(ver)säumen* "neglekti" (HE rad. **se-* "lasi"). Kp spec. sekv.

SITUACI/O (f; RE): AF *situ/ation,* I *-azione,* R *-acija,* (H *-ación*), Po *sytuacja.* Pssf *-cio.* ¶ 1894 *situazi-.*

Subst. de L mez. *situare* "loki, meti (en certan situacion)", der. de L *situs* "situ(aci)o", vd. la antaŭan.

SKABI/O (f; RE): L *scabies;* A *scab,* I *scabbia.* Kp F *scabieux* "-eca", ank. Sv *skabb* "-o". Medicina termino prenita el L. Samtipaj (el L vidpunkto) estas *rabi/o, seri/o.* ¶ Io =, Iela *scabie.*

Propr. "juko", der. de L *scabere* "grati, juki, skrapi", par. al A *shave* "razi", G *schaben* "skrapi", Gr *skáptein* "fosi", Li *skabëti* "haki, tranĉi" (HE rad. **skab-*). Kp ev. *skapolo.*

SKADR/O (f; RE, UV, Be; *eskadron-* Jü; kp *skadron/o* Kabe): A *squadr/on,* I *-one,* F *escadron,* G *Schwadron,* Po *szwadron,* R *eskadron,* (H *escuadrón*). Kiel Silfer konstatis (PL 9/1984, 21), necesis diferencigi tiun ĉi radikon disde *eskadr-* (ambaŭ vortoj aperis en 1889). Laŭ internacia vidpunkto la diferenco estas ke la ĉi-tiea vorto havas la sufikson *-on,* kiu mankas en la alia (escepte de A); vd. la sinoptikon en Szerdahelyi 1987, 134. Strange, Z (origine) ne utiligis tiun deferencigilon sed kontentiĝis per aferezo de la *e-* en *eskadr-.* La formo *skadr-* povas esti difinita kiel la kerno de la FR formoj (do minus protezo kaj sufikso). Oni devas ankaŭ rememorigi pri aliaj okazoj, ke Z rezignis pri la vortfino *-on* kaj anstataŭe faris la *o* signo de Ea substantivo: *cinamo, drako, embrio, falko, gudro, piŝto, sturgo.* – Z poste en la propono de 1894 ŝanĝis al *eskadron-* (plena FR formo) kaj eĉ enmetigis tiun en Jü. Per sia apero en UV *skadr-* tamen intertempe fariĝis fundamenta radiko. PV resendas de *skadr-* al *eskadron-,* PIV male. ¶ Io *eskadrono,* Ie *escadron,* Ia *esquadron.*

La romanaj formoj kun *-on* (el kiuj la ĝerm. k slavaj) estas aŭgmentativaj derivaĵoj de resp. F *escadre,* H *escuadra,* I *squadra* (vd. plue *eskadro*).

SKAL/O (1; RE): A *scal/e,* I *-a,* F *échelle,* G *Skala,* Po *skala,* R *ŝkala,* (H *escala*). ¶ Io =, Ie *scal/e,* Ia *-a.*

Itala muzika termino, orig. "ŝtuparo" , el L *scalae* (plur.) "ŝtup(et)aro" < **scandsla,*

der. de *scandere* "supreniri", par. al Sa *skándati* "rapidas, saltas", Ir *scendim* "saltas" (H E rad. **skend-*). Kp *skandalo.*

SKALP/O (2; Jü): A *scalp,* F *-e,* I *-o,* G *Skalp,* Po *skalp,* R *skal'p,* [H *escalpo*]. ¶ Io *skalp-ajo,* Ia *scalp,* Ie *-e.*

A vorto, kredeble de skandinava origino, kp Is *skalpr* "glavingo; silikvo", Da *skulpe* "silikvo" (HE **skelb-* "fendi, (de)tranĉi", plivastigo de rad. **skel-,* vd. *ŝelo;* kp var. **skelp-* sub *skulpti*).

SKANDAL/O (2; Be): A *scandal,* F *-e,* I *-o,* G *Skandal,* PoR *skandal,* (H *escándalo*).

Pere de L ekl. *scandalum* "falpuŝiĝo" el Gr *skándalon* s.s. (vd. ekz. NT Rom. 9.33), orig. "kaptilo", propr. "io kio saltekstaras", par. al la vortoj cititaj sub *skalo.*

SKAPOL/O (f; RE): L med. *scapula* (kp L *scapulae* [plur.] "skapoloj, ŝultroj"); A *scap/ula,* I *-ola,* (H *escápula*). Kp F *scapulaire* "-a". Medicina termino prenita el L. Vokalŝanĝo *u* > *o* (laŭ I) por eviti sufiksidentan radikfinon (Waringhien 1967, 47), vd. sub *artikolo.* ¶ 1894 *skapl-.* ¶ Io *skapulo,* Ie *scapul,* Ia *-a.*

Oni kunligis la L vorton kun Gr *skáptein* "fosi" (vd. sub *skabio*); tio supozigas, ke *scapula* orig. signifis "fosilo, ŝpato" (pro simileco aŭ uzado?).

SKARAB/O (f; N-ro 15 1888, RE): A *scarab,* , F *-ée,* I *-eo,* (H *escarabajo*); L *scarabaeus.* Z apokopis la radikfinan *-e* prezentatan de FI(L), videble laŭ modelo de A. Kp similan apokopon en *ostro, petrolo, puto* (kie tamen la ellasita vokalo estas senakcenta). – Aldona sencospecialigo (> "skarabo de la genro *Scarabaeus*") ekde PV. La scienca termino por la tuta ordo (L zool. *Coleoptera* > eo *koleopteroj*) aperas en Wü. ¶ Io *skarabeo,* Ie *scarab/é,* Ia *-eo.*

Modifo de Gr *kárabos* "(cervo-, sterko-)skarabo; langusto" de nekonata origino.

SKARLAT/O (f; EG): A *scarlet,* F *écarlate,* G *Scharlach,* I *scarlatto,* Po *szkarl'at,* (H *escarlata*). Ŝajnas bazita sur I; eble kuninfluis la L mez. originformo *scarlatum.* ¶ 1894 *skarlatin-* (kial? kp sekv.). ¶ Io =, Ie *scarlat,* Ia *-o.*

L mez. *scarlat um* "skarlata ŝtofo" el Pe *saqirlât* el Ar *siqillât'* s.s., orig. "ŝtofo ornamita per sigelsimilaj desegnaĵoj", pere de Gr mez. el L *sigillatus* "sigelhava" de *sigillum* "sigelo" (vd. tiun). – Laŭ Cherpillod 1992, 98 "nura hipotezo". – Samfamilia vorto en Eo: *skarlatino.*

SKARLATIN/O (1; Jü): L med. *(febris) scarlatina;* A *scarlatin/a,* F *-e,* G *Scharlach (fieber),* I *scarlattina,* Po *szkarlatyna,* R *skarlatina,* (H *escarlatina*). La medicina L termino fidele respeguliĝas en la plimulto de la fontlingvoj. Ps-sf *-in* 1. ¶ Io =, Ie *scarlatin/e,* Ia *-a, febre scarlatin.*

Propr. "skarlata (febro)" (pro la koloro de la ekzantemo), adj. der. de L mez, *scarlatum* (vd. *skarlato*).

SKARP/O (f; RE): A *scarf* [ska:f], F *écharpe* [eŝárp], G *Schärpe* [ŝér-], I *sciarpa* [ŝár-], Po *szarfa* [ŝár-], R *ŝarf,* (H *echarpe*). Karakterizita de Szerdahelyi (1987, 125) kiel angla-franca kompromisformo (*sk-* laŭ A, *-p* laŭ F); ĝi ial evitas la *ŝ*-sonon prezentatan de la plimulto de la fontlingvoj. – La semantiko de la Ea vorto verŝajne baziĝas sur F ('skarpo de virino, de urbestro, de vundito' GD). ¶ Io *sharpo,* Ie *charp/e,* Ia *-a.*

Orig. signifo en F "sako de pilgrimanto portata ŝultrozone"; estas pridisputate, ĉu la vorto origine estas ĝermana aŭ latinida (oni komparas ekz. Nd mez. *scharpe* "saketo" k L mez. *scrippum* "sako de pilgrimanto").

SKATOL/O (f; RE): G *Schachtel,* I *scatola,* Po *szkatul'(k)a,* R *ŝkatulka.* Bazita sur I (Gregor 1982, 28). ¶ 1894 *skatl-.* ¶ Io Ia *buxo* (< A *box*), Ie *buxe, scatulle* (< G *Schatulle* "kesteto").

Kredeble per metatezo el L mez. *castul/um, -a** "rezervujo" de nekonata origino.

SKELET/O (1; RE): A *skeleton,* F *squelette* [skelét], G *Skelett,* I *scheletro* [skél-], Po *szkielet,* R *skelet,* (H *esqueleto* [eskel-]; L med. *sceletum.* ¶ Io =, Ie *squelette,* Ia *ske-*

leto.

El Gr *skeletós* "skeleto; mumio", propr. "sekigita (korpo)", adj. de *skéllein* "sekigi", kp *sklêrós* "seka", par. al G *schal* "sengusta, malfreŝa".

SKEM/O (4; Jü; kp *sĥem-* LInt 12/1896): A *scheme* [sk-], F *schéma, schème* [ŝ-], G *Schema* [ŝ-], I *schema* [sk-], Po *schemat* [sĥ-], R *sĥemat,* (H *esquema* [esk-]). Eo *sk-* povas esti influita de Gr (vd. sube; Gr *skh* > Eo *sk* ankaŭ en *pasko, skismo, skolo)* aŭ esti adoptita laŭ AI pro pli facila prononcebleco. Ps-sf *-m(at).* ¶ Io =, IeIa *schema.*

El Gr *skhê/ma -matos* "formo, figuro", propr. "havaĵo, tenaĵo (de iu/io)" (> "karakteriza eco, aspekto" ktp), subst. de *ékhein/ skhein* "havi, teni" de HE rad. **segh-* "firme teni, superforti", kp Sa *sáhas-* "forto, venko", G *Sieg* "venko". Parencaj vortoj en Eo: *epoko, skizo, skol/o, -astiko.*

SKEPTIK/A (1; Ald, Be): A *scept/ical* [sk-], F *-ique,* Po *-yczny* (kp *-yk* "-ulo"), G *skept/isch,* R *-iĉeskij* (kp *-ik* "-ulo"), I *scettico,* (H *escéptico*). Ortografie la plimulto de la fontlingvoj prezentas *sc-*; prononce troviĝas la alternativo *sk-* (AGR kaj Gr, vd. sube) kiun Z preferis, kredeble por pli flua pononcebleco. – Ps-sf *-ik.* ¶ Io =, IeIa *sceptic.*

El Gr *skeptikós* "pripensema", adj. de *sképsis* "konsidero, ekzamenado", subst. de *sképtesthai* "esplorrigardi; (mense) ekzameni, konsideri"; vd. sub *spektaklo.*

SKERC/O (1; Be): I *scherzo* [skérco]; A FPo(H) *scherzo* [ofte kun proksimuma I prononco], G *Scherzo* [= I], R *skerco.* Fonetisma transskribo de la internacia termino. ¶ Io =, IeIa *scherzo.*

Itala vorto, propr. "ŝerco" (vd. *ŝerci,* etim. identan).

SKERM/I (f; RE): I *schermire* [sk-], (H *esgrimir*); kp F *escrime* "-o". Bazita sur I. ¶ Io *skermar,* Ie *escrimar,* Ia *schermir.*

El pĜ **skirmjan* "protekti, ŝirmi" (etim. identa kun *ŝirmi,* vd. tiun).

SKI/O (8; Ve [kiel var. de *ŝki/o*], Backman 1919, Wü [var. *ŝkio*], PV): AF *ski,* G *Ski/Schi* [ŝi], I *sci* [ŝi], (H *esquí* [eskí], *skí*). La venkinta formo reprezentas la ortografion de AFG (kaj la prononcon de AF). ¶ Io =, IeIa *ski.*

El No *ski* [ŝi], kp Is *skidhi* s.s., orig. "fendita lignopeco", identa kun G *Scheit* "ŝtipo", kp Ir *scîath* "ŝildo", de HE **skei-d-*, plivastigo de rad. **skei-*, vd. plue sub *skismo.*

SKISM/O (1; Jü): A *schism* [s-], F *-e* [ŝ-], G *Schisma* [ŝ-], I *scisma* [ŝ-], Po *schisma* [sĥ-], (H *cisma* [th-]); L ekl. *schisma* [sk-]. El la fontlingvoj nur L prononcas [sk-], sed estas necese konsideri ankaŭ la Gr fontvorton (vd. sube); kp sub *skemo.* – Ps-sf *-m(at)-*. ¶ Io =, IeIa *schisma.*

El Gr *skhís/ma -matos* "fendo", subst. de *skhízein* "fendi", par. al L *scindere* "fendi", Sa *chinátti* "fendas", G *scheiden* "disigi, apartigi", Li *skíesti* "disigi", ĉiuj el HE **skei-d- (*kp *skio, ŝindo*), plivastigo de rad.**skei-* "apartigi, de- tranĉi", kp Sa *chyáti* "detranĉas", L *scire* "scii" (< "decidi" < "detranĉi"). Kp ank. *ŝipo.* **SKIZ/O** (f; RE): A *sketch,* F *esquisse* [esk-], G *Skizze,* I *schizzo* [sk-], Po *szkic,* R *eskiz.* Formo laŭ G ortografio kaj I prononco. – [Identa kun eo *skeĉ/o* PV (el la A formo, kiu disvastiĝis internacie: FHI *sketch,* G *Sketsch,* Po *szkec,* R *sketĉ*)]. ¶ Io *skis-uro,* Ie *esquisse,* Ia *schizzo.* Itala vorto el L *schedium* "improvizaĵo" el Gr adj. *skhédios* "improvizita, farita sen preparo", propr. "prenita el proksimo, je dispono", der. de *skhedón* "proksime", propr. "alteniĝe", samradika kun *skhein* "teni, havi" (vd. *skemo*).

SKLAV/O (f; RE): A *slave,* F *esclav/e,* (H *-o*), I *schiavo* [sk-]. Oni povas heziti inter *s-* (A, kp Sv *slav*) kaj *sk-* (FI), sed la lasta lasas libera formon por gentonomo (A *Slav,* F *slav/e,* I *-o,* G *Slawe,* [H *eslavo*] > eo *slav/o* Jü). ¶ Io =, IeIa *sclavo*; kp Io *Slavo,* Ie *slav/e,* Ia *-o* "slavo".

El L mez. *sclavus/slavus* "sklavo; slavo" el Gr mez. *Sklabós* [-v-] "slavo" (do orig. nomo de gento; la nova signifo ekestis, kiam dum la ĝermana ekspansio orienten slavaj kap-

titoj estis vendataj kiel sklavoj), mll. de *Sklabênós* [-v-] "slava" el Bg ant. *sloveninŭ* "slavo" (kp R *slavjanin,* Po *sl'owianin* s.s.), vorto kies etimologio malgraŭ multaj hipotezoj ne estas klarigita.

SKOL/O (3, Backman 1919, Wü, PV): A *school* [sk-], F *école,* G *Schule,* I *scuola* [sk-], Po *szkol'a,* R *ŝkola;* L *schola* [sk-]. Kp Sv *skola.* La L kaj la greka originformo (vd. sube) sufiĉas por klarigi la Ean radikformon. ¶ Io =, Ie *scol,* Ia *schola,* ĉiuj "lernejo; skolo".

Orig. signifo en la modernaj fontlingvoj estas "lernejo" (> "disĉiplaro" > "skolo"). El Gr *skholê'* "tempo libera (de laboro, de oficaj devoj); (tempo por) studado; studejo". Oni supozas prasignifon "paŭzo, haltigo/reteno (de la laboro)" k kalkulas la vorton inter la derivaĵoj de la radiko en *skhein* "teni, havi" (vd. *skemo*). Samfamilia vorto en Eo: *skolastiko.*

SKOLASTIK/O (2; Be; kp *sĥ-* E-isto 9/1894): A *scholast/icism* [sk-] (kp *-ic* "-a"), Po *-yka,* F *scolastique,* G *Scholastik,* I *scolastica,* R *sĥolastika,* (H *escolástica*). Ps-sf *-ik.*

Ekuzita (adjektive) en la 17-a jc kiel termino karakterizanta la mezepokan filozofion; prenita el L adj. *scholasticus* "lerneja", (subst.) "instruitulo" el Gr *skholastikós* "senokupa; okupiĝanta pri la sciencoj", (subst.) "instruitulo", der. de *skholázein* "havi liberan tempon; studadi; instrui" de *skholê'* "libera tempo; studejo" (vd. *skolo*).

SKOLOP/O (f; RE): L *scolop/ax, -acis.* Zoologia termino prenita el L. La apokopo de *-ax* povas esti komparata kun *atripl/o* < *atriplex, cim/o* < *cimex, koturn/o* < *coturnix, kul/o* < *culex*; ĝi kontrastas kun *limak/o* < *limax* (Wüster Esp.princ. 58). ¶ Io *bekaso,* Ie *becass/e,* Ia *-a** (el F *bécasse,* R *bekas*).

El Gr *skolóp/ax -akos* s.s. de *skólops* "paliso" (kredeble pro la longa beko).

SKORBUT/O (f; RE): L med. *scorbutus;* A *scurvy* (kp *scorbutic* "-a"), F *scorbut,* I *-o,* G *Skorbut,* Po *szkorbut,* R *skorbut,* (H *escorbuto*).

El L mez. *scorbutus* kun necerta historio; kiel etimon oni proponis G *Schorf* "favo"/A *scurf* "(har)skvamoj" aŭ R *skrobot* "gratado".

SKORPI/O (f; RE): L *scorp/io -ionis,* ank. *scorpius;* AF *scorpion,* I *-e,* PoR *skorpion,* (H *escorpión*). Bazita sur la L nominativo kiel multaj tiutipaj bestonomoj (kp ekz. *bufo, falko, krabro*). ¶ Io *skorpiono,* IeIa *scorpion.*

El Gr *skorpíos* s.s., eble pruntvorto el iu mediteranea lingvo.

SKORZONER/O (2; Jü): L bot. *Scorzonera;* F *scorsonère,* I *scorzonera,* (H *escorzonera*). Transskribo de la L formo (botantika termino). ¶ Io =, IeIa* *scorzonera.*

El Kt *escurconera* s.s., der. de *escurcó* "vipuro" (la planto estis uzata kiel rimedo kontraŭ vipuraj mordoj), probable pere de L vulg. **excurtio* el L *curt/io -ionis* "vipuro".

SKRAP/I (f; RE): A *scrape.* Kp Po *skrobac'* s.s., R *skrebok* "-ilo"; ank. Nd *schrapen,* Sv *skrapa* s.s. Bazita sur A ekskluzive laŭ Szerdahelyi 1987, 124; tamen la vortkomenco de PoR estas atentinda.. ¶ Io *skrapar,* Ie *scrapar;* Ia *rader* (< L *radere*).

Ĝerm. vorto (pĜ **skrapôn*), prapar. al la cititaj PoR formoj, de HE **(s)kerb-/(s)kreb-* (kp Latva *skrabt* "grati, skrapi", A *sharp* "akra"), plivastigo de HE rad. **(s)ker-* "tranĉi" (vd. sub *korko*). Kp la sekvan; vd. ank. sub *skorbuto.*

SKRIB/I (f; Un): L *scribere* (sup.rad.: *script-*); F *écrire* (kp *scribe* "-isto", *inscrire* "enskribi", *inscription* "enskribo"), G *schreiben,* I *scrivere,* (H *escribir*). La supinradiko estas konata en aliaj fontlingvoj pere de pruntvortoj (ekz. A *inscription* "enskribo", PoR *post/scriptum* resp. *-skriptum* "postskribo"). Bazita sur L. ¶ Io *skribar,* Ie *scrir,* Ia *scriber.*

Latin(id)a vorto (L > ĝerm., kp G ant. *scrîban*), orig. "enĉizi", de HE **skeribh-* s.s. (kp Gr *skáriphos* "enĉizilo, skribilo"), plivastigo de HE rad. **(s)ker-* "tranĉi" citita sub *skra-*

pi. – Samfamiliaj vortoj en Eo: *manuskripto, preskribi.*

SKROFOL/O (f; RE): A *scrof/ula,* F *-ule,* I *-ola,* G *Skrofel,* Po *skroful'y* (plur.); L *scrofulae* (plur.). Vokalŝanĝo *u* > *o* laŭ I por eviti sufiksidentan radikfinon (vd. sub *artikolo*). ¶ 1894 *skroful-.* ¶ Io *skrofulo,* Ie *scroful,* Ia *-a.*

Kredeble dim. de L *scrofa* "porkino" (la semantika evoluo ne estas klara, sed oni komparas Gr *khoíros* "porko" : *khoirás* "skrofolo") kun necerta etimologio. Kp *ŝraŭbo.*

SKRUPUL/O (2; Jü): A *scrup/le* (kp *-ulous* "-a"), F *-ule,* I *-olo,* G *Skrupel,* Po *skrupul'*; L *scrupulus.* Kp R *skrupulëznyj* "-a". Pri Eo *-ul/o* el L *-ulus,* vd. *angulo.* ¶ Io =, Ie *scrupul,* Ia *-o.*

En L orig. "pinta ŝtoneto" (poste, figursence, "pika sento de maltrankvilo"), dim. de *scrupus* "pinta ŝtono", probable de HE rad. **skreu-* "(dis)tranĉi" (kp A *shred* "disŝiri", G *schroten* "pisti", Li *skraudùs* "rompiĝema"), lastvice plivastigo de HE rad. **(s)ker-* "tranĉi" (vd. *korko,* kp *skrapi*).

SKU/I (f; Un): F *secouer* [s(e')kŭé], I *scuotere,* (H *sacudir*). Bazita sur F kun neglekto de la unua (neakcentata) vokalo (Szerdahelyi 1987, 121) aŭ sur la I vortkomenco (kp 1894 *skuot-,* evidente italdevena). ¶ Io *sukusar* (kp F *secousse* "skuo"), Ie *sucusser,* Ia *succuter.*

El L *succutere* "suprensvingi", kunm. de *sub-* "de malsupre supren" (kp ps-pf *sub-*) k *quatere* "skui", eble par. al la vortoj cititaj sub *ŝuti.* – Samfamiliaj vortoj en Eo: *diskuti, kask/o -edo.*

SKULPT/I (f; RE): A *sculpture,* F *sculpter,* I *scolpire,* (H *esculpir*); L *sculpere* (sup.rad.: *sculpt-*). Kp la subst. AF *sculpture,* G *Skulptur,* I *scultura,* R *skul'ptura,* (H *escultura*) "-aĵo, -arto". Bazita sur la F verbo aŭ formita el la internacia substantivo kun apokopo de la sufikso (kp la procedon ĉe *redakt/i*). ¶ Io *skultar,* Ie *sculpter,* Ia *sculper.*

En L ank. "eltranĉi, ĉizi, gravuri", kp la paralelan *scalpere* s.s., par. al A *shelf* "breto", de HE **skelp-* "(de)tranĉi", plivastigo de rad. **skel-,* vd. *ŝelo* (kp la var. **skelb-* sub *skalpo*).

SKURĜ/O (f; RE): A *scourge* [skö:ĝ]. Bazita ekskluzive sur A. La redono de A *ou* [e':] per *u* estas unika. Ĉar *-ou-* estis neebla, ĝi povas esti konsiderata kiel simpligo de la ortografia formo (kp radikojn angladevenajn kiel *gurd/o, murd/i, sturg/o* kun la sama A vokalo en la bazo). Por A radikfina *g* [ĝ] > Eo *ĝ,* kp *gorĝ/o, kaĝ/o, paĝ/o* (kontrastas *strang/a, sturg/o*). Kp Cherpillod 1990, 24; Szerdahelyi 1987, 124 (kun malĝusta angla prononc-indiko). ¶ 1894 *flagel-* (< L *flagellum*). ¶ Io *flog-ilo* (el A *flog* "-i"); Ie *flagell/e,* Ia *-o.*

El F ant. *escorge* el L *corrigia* "(ŝu)rimeno" (> F *courroie,* H *correa,* I *correggia* "rimeno"), par. al Ir *cuimrech* "ligilo, kateno".

SKVAM/O (f; RE): L *squama*; I *squama,* (H *escama*). Kp F *squame* (nur bot., med.). ¶ Ie *squam,* Io *-o,* Ia *-a.*

Kredeble samradika kun L *squalus* "malpura, malglata, krusteca".

SLED/O (8; PV; ne ĉe Z; antaŭe *glit/vetur/il/o*): A *sled(ge), sleigh,* G *Schlitten,* I *slitta.* Kp Sv *släde* [slé:-]. Bazita sur A. ¶ Io *glit-veturo*; Ie *slitte*; Ia *slitta, traha* (= L).

El pĜ **slidhan-,* agonomo de **slîdhan* "gliti" (kp A *slide* "glit/i, -igi"), par. al Li *slidùs* "glata" k Gr *olistheín* "gliti" (kun proteza *o-*; *-listh-* < **lidht*): HE rad. **sl(e)idh-.*

SLIP/O (5; Ve, Wü): A *slip.* Transpreno de la A vorto. ¶ Io *kart-eto, papera foli-eto*; Ie *fiche* (= F); Ia *schedula* (= L).

E *slip* orig. "stikaĵo" (> "mallarĝa strio" > "slipo"), kredeble el Nd mez. *slippe* "tranĉaĵo, strio".

SMERALD/O (f; RE): A *emerald,* F *émeraude,* G *Smaragd,* I *smeraldo,* Po *szmaragd,* (H *esmeralda*); L *smaragdus.* Bazita sur I kun apogo de AF; la alternativo **smaragd-* (GPoL) forĵetita, eble pro la malfacile prononcebla kombino *gd.* ¶ Io =, Ie *smeralde*; Ia *smaragdo.*

El Gr *(s)máragdos,* vorto de orientlanda ori-

gino (kp Sa *marakát´am,* He *bâreqet* s.s., Ar *baraqa* "brili"). – Cherpillod 1992, 98.

SOBR/A (f; Un): A *sober,* F *sobre,* I(H) *sobrio*; L *sobrius.* Formo laŭ F; analoge ĉe *propr/a.* ¶ Io =, Ie *sobri,* Ia *sobrie.*

Propr. mal-vorto de L *ebrius* "ebria" (vd. tiun); *so-* estas var. de *se-* "sen-" (vd. ps-pf *se-* k *sed*).

SOCI/O (3; Jü, Ka): A *soci/ety,* F *-été,* I *-età,* (H *-edad*). La radiko reprezentas sencan diferencigon disde *societ/o,* komence uzata ankaŭ kun tiu ĉi senco (ekzemple en Ahlberg 1905; tamen, ĉar la fontlingvoj ĝenerale havas la saman vorton por "socio" kaj "societo", estas malfacile je tiu punkto prijuĝi la fruajn vortarojn). La mallonga formo povas esti klarigata diversmaniere: (a) apokopo de la finsilabo en *societ-* (Yamasaki s.v.); (b) retrograda formaĵo el *social/a,* kiu ja signifas "socia"; (c) memstarigo de la unua elemento en *sociolog(i)o,* kiu signifas "scienco pri la socio". Aperas, ke Z multe pli uzis la adjektivon *soci/a* ol la substantivon *soci/o* (vd. la ekzemplojn ĉe Nomura 1989 s.v.). ¶ Io = (espismo); Ie *societé,* Ia *societate* (ambaŭ ank. "societo").

Etimologie identa kun *societo,* vd. tiun.

SOCIAL/A (2; Eisto 5/1890 [de Wahl], Jü; kun Be *socialism/o, socialist/o* kp Jü *social/ism/o, social/ist/o*): AF(H) *soci/al,* I *-ale,* R *-al'nyj,* G *sozial,* Po *socjalny.* Ps-sf *-al.* ¶ Io *soci-ala,* IeIa *social.*

El L *socialis* "societa", funkcianta kiel adj. de L *societas* "societo" sed derivita de ties fontvorto *socius* "kolego, kunulo, kamarado", samradika kun *sequi* "akompani, sekvi" (vd. tiun). Samfamiliaj vortoj en Eo: *asocio, socio, societo, sociolog(i)o.*

SOCIET/O (f; Un): A *soci/ety,* F *-été,* I *-età,* (H *-edad*) (ĉiuj ank. "socio"); L *socie/tas -tatis.* Kp sub *soci/o.* Ps-sf *-t(at).* ¶ Io *soci-eto*; Ie *soci/eté,* Ia *-etate* (ambaŭ ank. "socio").

En L orig. "kunuleco, kamaradeco", der. de *socius* "kamarado, kolego" (vd. *sociala*).

SOCIOLOG/O (3; Jü): R *sociolog,* A *-ist,* I *-o,* F *sociologue* [-g], G *Soziologe,* Po *socjolog,* (H *sociólogo*). – Sciencnomo:

SOCIOLOGI/O (1; Jü): A *sociolog/y,* F *-ie,* I *-ia,* (H *-ía*), R *-ija,* G *Soziologie,* Po *socjologia.*

Scienconomo farita (en F de A. Comte, 1830) el la radiko de *société* "socio" (vd. *societo, sociala*) k *-logie,* grekdevena vortelemento signifanta sciencon (vd. sub *logiko*). La sciencistnomo estas formita analogie, kp *arkeologo.*

SOD/O (1; RE): AIPoR *soda,* F *soude,* G *Soda,* (H *sosa, soda*). ¶ Io =, IeIa *soda.*

El L mez. *soda* el Ar *suwwâd* "nomo de planto kies cindro donas sodon" (Cherpillod 1992, 98).

SOF/O (f; RE): AFPo *sofa,* G *Sofa,* I *sofà,* (H *sofá*). ¶ Io *sofao,* IeIa *sofa.*

Orig. "ripozbenko tegita per kusenoj k tapiŝoj (de orientlandaj princoj)" el Ar *s'uffa* "ŝtona elstaraĵo" (rad. *s'affa* "envicigi"). – (Cherpillod 1992, 98.)

SOFISM/O (f', 1, 7; Eisto 2/1889, Du): A *soph/ism,* F *-isme,* G *Sophis/mus, -ma,* I(H) *sof/isma,* Po *-izmat,* R *-izm*; L *sophis/ma -matis.* Ps-sf *-ism* (historie, tamen, la vortfino apartenas al la kategorio kun sufikso *-m[at]*; kp la duoblajn G formojn). – Personsubstantivo: **SOFIST/O** (1; Ka): A *soph/ist,* F *-iste,* G *Sophist,* R *sofist,* IPo (H) *-a*; L *soph/istes, soph/ista.* Ps-sf *-ist.*

El Gr *sóphis/ma -matos* "artifiko, lerta rezonado" resp. *sophistê's* "sofisto; eksperto, fakulo", ambaŭ der. de *sophízein* "saĝigi, instrui", (med.-pas.) "lerte elpensi; ruze agi", der. de *sophós* "saĝa, lerta" (vd. *filozofo*).

SOIF/o (f; Un): F *soif.* Bazita ekskluzive sur la F subst. (ne troviĝas apartenanta verbo "soifi") sed havanta verban karakteron. F *oi* > Eo *oi* kiel en *foiro* (vd. s.t.v.). Nur la komenca *s-* estas komuna kun la aliaj latin(id)aj formoj (I *sete,* L *sitis,* [H *sed*]). ¶ Io *dursto* (A *thirst,* G *Durst*); Ie *sitie*†, *sete,* Ia *sete.*

F *soif* (kun *-f* pro falsa analogio, neniam

prononcita) pere de F ant. *soi* el L *sitis,* eble par. al Gr *phthísis* "forvelko, konsumiĝo".

SOJL/O (f; RE): F *seuil* [söj], I *soglia* [só-l'a]. Vokalismo laŭ I; *-jl* ŝajnas respeguli la F ortografion *-il* sed estas ankaŭ unu el la metodoj redoni latinidan [l'] (vd. *ajlo*). La konsonantismo *s-l* estas rekonebla ankaŭ en A *sill* "fenestrosojlo"; kp G *Schwelle* "sojlo". ¶ 1894 *soli-*. ¶ Io *solio,* Ie *sill;* Ia *limine* (< L *limen*).

I *soglia* el L *solea* "sandal(a plandum)o; (speco de) planko", ank. "soleo" (kp tiun), der. de *solum* "grundo, fundo; speco de planko; plandumo" (el kiu ank. F *seuil* pere de L vulg. **solium*) de HE rad. **s(ŭ)ol-/sul-* (ank. ekz. en G *Sohle* "plandumo", Li *súolas* "benko"), kp **s(ŭ)el-* en A *sill,* G *Schwelle* k Gr *sélma* "trabo". Ev. par. estas Gr *xy'lon* "ligno" (kp *ksilofono*). – Sametimologia vorto en Eo: *soleo;* kp spec. *ekzilo.*

SOKL/O (2; Jü): AF *socle,* G *Sockel,* I *zoccolo,* Po *sokól',* R *cokol',* (H *zócalo*). Formo laŭ AF. ¶ Io =, Ie *socle,* Ia *socculo.*

Metafora uzo de L *socculus* "ŝueto", dim. de *soccus* "malpeza ŝuo (uzata de komediaj aktoroj)" (> A *sock,* G *Socke* "ŝtrumpeto") el variantformo de Gr *sykkhís* "speco de ŝuo", pruntvorto el Oriento.

SOL/A (f; Un): L *solus;* A *sole,* F *seul* (kp *solitude* "-eco"), I(H) *solo.* Krome konata per la muzika termino AFHIPoR *solo,* G *Solo* (orig. subst.-igita adj.: "[ludo de] solulo"), transprenita en Eo kiel *sol/o* Z (Fab III), Wü (kp ank. *solo/o* PIV); vd. ank. *solisto.* La adverba formo (L *solum*) inspiris al Eo *sol/e* "nur" (vd. s.t.v.). – La radiko kolizias kun L *sol* "suno", vd. s.t.v. ¶ 1881 *sol-*. ¶ Io =, IeIa *sol.*

Eble orig. "aparta, sen aliaj"; tiuokaze par. al L *sine* "sen", *sed* "sed".

SOLD/O (2; PV) 1) franca monero (Z) 2) soldatsalajro (Kabe): A *sou* (1), F *sou* (1), *solde* (2), G *Sou* (1), *Sold* (2), I *soldo* (1, 2), Po *sold* (1), *z'ol'd* (2), R *su* (1), *sol'd* (2), (H *sueldo* 1, *soldada* 2). La oficialigita formo estas internacia en la senco 2; por la monero, Z evidente trovis la IPo formon pli oportuna ol la F (okaze aperanta kiel pruntvorto en AGR). – Kolizias kun la teknika termino eo *sold/i* VeWü "veldi". ¶ Io *"sou",* Ie *soldo* (1), *solde* (2), Ia *soldo* (1, 2).

La sencoplivastigo ('monero' > 'pago') okazis en I dum la mezepoko. La monernomo el L *solidus* "speco de ora monero", subst.-igo de adj. *solidus* "solida, masiva" (sk. monero). Vd. plue *solida;* kp spec. sekv.

SOLDAT/O (f; RE): A *sold/ier,* FR *-at,* I *-ato,* (H *-ado*), G *Soldat,* Po *z'ol'nierz.* Formo egala al FGIR. Ps-sf *-at.* ¶ IoIa =, Ie *soldate.*

Propr. "sold/ulo" (t.e. salajrata militisto), subst.-igita ptc.perf. de I *soldare* "salajri", der. de *soldo* "(soldat)salajro" (vd. *soldo*). – La APo formoj montras aliajn sufiksojn sed havas la saman orig. signifon.

SOLE/O (1; Jü): L *solea;* AF *sole,* I *sogliola.* AF akordas kun la L zoologia termino. ¶ Io =, Ie *solea marin* (kp *solea* "plandumo"), Ia *solea* (ank. "plandumo").

Propr. "plandumo" (pro la plata formo); pri L *solea* vd. *sojlo.*

SOLECISM/O (2; Jü): A *solec/ism,* F *-isme,* I(H) *-ismo,* Po *-yzm,* R *-izm,* G *Solözismus;* L *soloecismus.* Ps-sf *-ism.*

El Gr *soloikismós* s.s., subst. de *soloikízein* "fari solecismojn", der. de *sóloikos* "parolanta nekorekte", kredeble el la nomo de *Sóloi,* atena kolonio en Malgrandazio, kie oni koruptis la atikan dialekton.

SOLEN/A (f; RE): A *solemn,* (H *-e*), G *solenn,* F *-el,* I *-e;* L *sollennis, -mn-*. Fontlingva ŝanceliĝo inter *-nn-* kaj *-mn-*; la formo elektita de Z estas pli simpla kaj etimologie korekta. ¶ Io =, Ie *solemni,* Ia *sollemne.*

En L orig. "ĉiujar(e festat)a (pp ceremonio, festo)" (> "festata" > "festa, solena"), kunm. de *sollus* "ĉiu" (vd. sub *savi*) k *annus* "jaro" (kp Gt *athn* s.s.); la ortografio *-mn-* povas esti influita de *omnis* "ĉiu". Kp sekv.

SOLID/A (2; Jü): AG *solid,* F *-e,* I *-o,* (H *sólido*). Ps-sf *-id.*

El L *solidus* "firma", orig. "tuteca, bloka", par. al L *sollus* "tuta; ĉiu" (vd. sub *savi*; kp *solena*). Samfamiliaj vortoj en Eo: *saldo, soldo, solidara.*

SOLIDAR/A (2; Be): F *solid/aire,* G *-arisch,* I(H) *-ario,* Po *-arny,* R *-arnyj.* Kp A *solidarity* "-eco". Ps-sf *-ar(i).*

Latinida der. de la L jura esprimo *in solidum* "solidare", propr. "por la tuto": *solidum* "solidaĵo, tutaĵo", subst.-igo de *solidus* "firma, tuteca" (vd. *solida*).

SOLIST/O (1; Jü; kp *sol/ist/o* Wü var.): A *sol/oist,* F *-iste,* IPo(H) *-ista,* R *-ist,* G *Solist.* Ps-sf *-ist.*

I der. de *solo* "sol(o)o", subst.-igo de *solo* "sola" (vd. tiun).

SOLV/I (f; RE): L *solvere;* A *(re-, dis-)solve,* F *résoudre, dissoudre* (kp *solution* "-o", *soluble* "-ebla"), I *risolvere* (kp *soluzione* "-o", *solubile* "-ebla"), (H *resolver, disolver*). Bazita sur la simpla L verbo; la sama radikformo aperas ankaŭ en A kaj en I kunmetoj. ¶ Io *solv/ar,* Ia *-er,* Ie *soluer.*

L *solvere (*sup.rad.: *solut-)* "(dis)solvi, malligi, liberigi; pagi" el **se-luere,* kunm. de *se-* "dis-, el-" (vd. ps-pf *se-*) k *luere,* en L klas. "(el-, re-)pagi" sed orig. "malligi, liberigi" (kp semantike *solventa*), de HE rad. **lu-* "malligi, liberigi, lasi", ekz. en Sa *lunâ´ti* "fortranĉas"; Gr *ly'ein* "solvi, malligi" (kp *analizo*); G *lösen* "solvi, malligi", *los* "libera". – Samfamiliaj vortoj en Eo: *absoluta, solventa.*

SOLVENT/A (4; Jü; antaŭe *pag/o/kapabl/a*):AG *solvent,* I(H) *-e,* F *solvable.* Ps-sf *-ent.*

El L *solv/ens -entis* "paganta", ptc.prez. de *solvere* " pagi", orig. "liberigi" (per pago oni liberigas sin de ŝuldoj aŭ liberigas ion por sia propra uzo); vd. *solvi.*

SOMER/O (f; Un): A *summer,* G *Sommer.* Kp Nd *zomer,* Da *sommer.* Bazita sur G kun esenca apogo de A. Laŭ Collinson 1959, 7, la ĝermana radiko estas elektita 'pro la malfacileco adapti [L] aestas (It. estate, Fr. été kaj la devian Sp. [=H] verano)'. Por G *-er* konservita en radikfino, kp *cifero, kelnero, talero, telero.* – Ankaŭ *vintr/o* estas ĝermandevena. ¶ 1894 *estat-.* ¶ Io =, Ie *estive* (el L *aestivus* "somera"), Ia *estate.*

Ĝerm. vorto, par. al Sa *sámâ* "(duon)jaro, sezono", Ir *sam* "somero" (HE bazo **sem-*).

SOMNAMBUL/O (1; Jü): L med. *somnambulus;* A *somnambul/ist,* F *-e,* I *-o,* Po *-ik,* R *-a,* G *Somnambule,* (H *somnámbulo*). Med. termino farita (laŭ modelo de L mez. *noctambulus* "nokta iranto") el L *somnus* "dormo" (el HE **sŭepno-s* s.s.: Sa *svápna-* "dormo", Gr *hy'pnos* "dormo" [kp *hipnota*], R *son* "dormo, sonĝo", Po *sen* "dormo, sonĝo", Li *sâpnas* "songo"; samfamilia vorto en Eo: *sonĝo*) k *ambulare* "promeni" (vd. *ambulanco*).

SON/I (f; Un): L *sonare;* A *sound,* F *sonner,* I *s(u)onare,* (H *sonar*). Kp la subst. "sono": L *sonus;* A *sound* (kp *supersonic* "supersona"), F(H) *son,* I *suono.* Bazita sur la komuna verba-substantiva bazo en LF. ¶ 1882 *fuk-* (sen etimologio: PVZ 5, 136). ¶ Io IeIa *sonar (*subst. Ie *son,* Io Ia *-o*).

De HE rad. **sŭen-* "soni", kp Sa *svaná-* "bruo, sono", Ir *son* "sono"; A *swan*/G *Schwan* "cigno" (kantbirdo). – Samfamiliaj vortoj en Eo: *asonanco, konsonanto, sonato, soneto, sonora.*

SONAT/O (1; Be): AIPoR(H) *sonat/a,* F *-e,* G *Sonate.*

Subst.-igita ptc.perf. de I *sonare* "ludi muzikinstrumenton" (kontraste kun *cantata* "kant/ado, -aĵo"), propr. "soni" (vd. tiun).

SOND/I (3; Be): A *sound,* F *sond/er,* G *-ieren,* I *-are,* Po *-owac´,* (H *-ar*), R *zondirovat'.*

Latinida vorto, orig. "plumbaĵo, subakvigilo", probable el L vulg. *subundare* "subakvigi" el *sub* "sub" (vd. tiun) k *unda* "ondo, akvo" (vd. *ondo*).

SONET/O (1; Jü): AF *sonnet,* G *Sonett,* I *son/etto,* PoR *-et,* (H *-eto*). Ps-sf *-et.* ¶ Io =, IeIa *sonetto.*

El Oc *sonet,* dim. de *son* "poemo; kanto", orig. "sono" (vd. *soni*).

SONĜ/O (f; *-i* Un, UV; *-o* Be, Jü, Ka, PV ktp): F *songe* [sôĵ], I *sogno,* R *son,* (H *sueño*); L *somnium.* Kp la verbon I *sognare,* (H *soñar*); L *somniare* "-i". Transskribo de la F formo; kp spec. *plonĝ/i* (vd. plue s.t.v.). ¶ 1881 *sont-.* – 1894 *song-.* ¶ Io *sonjo,* Ie *somnie,* Ia *sonio.*

La L verbo el la subst. *somnium,* propr. "(en)dormaĵo", der. de *somnus* "dormo" (vd. *somnambulo*). – R *son* (k Po *sen*) estas praparencaj, vd. samloke.

SONOR/a (f; *-i* Un, UV ktp; *-o* Ka): A *sonor/ous,* F *-e,* I(H) *-o;* L *sonorus.* Prezentita kiel verbo, sed etimologie bazita sur la latin(id)a adjektivo (kiu malhavas apartenantan verbon; kp F *(ré)sonner,* I *s(u)onare,* [H *sonar*] "-i"). Evidente Z serĉis verbon por la sono de sonorilo (kp Po *dzwon* "-ilo", *dzwonić* "-[ig]i"); manke de tia specifaĵo en la latinidaj fontlingvoj, li adaptis la respondan adjektivon, kies asonanco kun *soni* estis oportuna. ¶ Io =, Ia *sonor,* Ie *-i* (ĉiuj sen apartenanta verbo).

Adj. der. de L *sonor* "son(ad)o" de *sonare* "soni" (vd. tiun).

SOPIR/I (f; RE) 1 (bedaŭre)(re)deziri ion 2) vespiri, ekĝemi (Ka, PV): F *soupirer* [sup-] (1, 2), I *sospirare* (1, 2), (H *suspirar* 1, 2); L *suspirare* (1, 2). Kompromisa radikkomenco laŭ F (manko de *-s-*) kaj I (vokalo *-o-*). La senco 2 aperas en Ka kaj ŝajnas ne-Zamenhofa (kp Nomura s.v.); antaŭe oni uzis *ek/ĝem/i* (Be sub tiu ĉi vorto), post PV oni enkondukis eo *suspiri* PVS, GD, PIV (laŭ L). Menciinda estas ankaŭ *sopir/ĝem/i* GD. ¶ IoIe *sospirar* (2), Ia *suspirar* (2).

Por la senco 1, oni uzas *dezir-egar* (Io), *desirar vivmen* (Ie), *desirar ardentemente* (Ia) k.s. Orig. "profunde spiri", kunm. de L *sub-* "sub-" (vd. tiun ps-pf) k *spirare* "spiri".

SOPRAN/O (f; RE): AFIR(H) *soprano,* G *Sopran,* Po *sopran.* Ps-sf *-an.*

Subst.-igo de arkaiĝinta I adj. *soprano* "sup(e)ra" el L vulg. **supranus,* der. de L *supra* "supre" (vd. *supra*).

SORB/I (f; RE): L *sorbere;* A *absorb,* . F *absorber,* I *(as)sorbire,* (H *sorber*). Z donis konkretan sencon al la simpla verbo (= L), dum al la kunmetaĵo *absorb/i* (kp tiun) estis atribuita figura senco. ¶ Io *absorbar,* Ie *absorpter,* Ia *(ab)sorber* (ĉiuj kun ambaŭ sencoj).

De (H)E rad. **srebh-,* kp Gr *rhophein* (< **srobh-*) "sorbi", Li *surbti* "suĉi, sorbi", G *schlürfen* "ŝmace sorbi". Samfamilia vorto en Eo: *absorbi.*

SORĈ/I (f; RE): F *ensorceler* (kp *sorcier* "-isto"); kp A *sorcery* "-arto, -aĵoj", *sorcerer* "-isto". Waringhien (LV 76) envicigas tiun ĉi radikon inter arbitrajn mallongigojn kiel *boji* (F *aboyer*), *lerta* (F *alerte*). Se oni deiras de la F verbo kiel fonto (kp 1894), temas pri senprefiksigo laŭ modelo de la agantnomo; oni do pli ĝuste komparu okazojn kiel *kroĉi, mendi, penti, prunti.* Tamen mi preferas kredi, ke Z kreis la radikon el la komuna bazo *sorc-* de la AF derivaĵoj. Mi ne trovis klarigon pri *ĉ* anstataŭ atendata *c,* sed analogaj kazoj ne mankas (kp *ĉerk-, fianĉ-*). ¶ 1894 *sorcel-.* ¶ Io *sorc/ar,* Ie *-iar,* Ia *incantar* (< A *enchant,* I *incantare*).

F *(en)sorc(eler)* k *sorc(ier)* estas bazitaj sur la F ant. *sorts,* plur. de *sort* "sorto" ("sorĉisto pretendas influi aŭ diveni la sorton", Bastien), vd. tiun.

SORG/O (8; PV): A *sorghum,* F *sorgho,* I(H) *sorgo;* L bot. *Sorghum vulgare, Andropogon sorghum.* ¶ Io *sorgumo,* Ie *sorgo,* Ia **sorghum.*

El L *Syricum (granum)* "siria (greno)", adj. de *Syria* "Sirio" (vd. tiun). – Cherpillod 1992, 99.

SORIK/O (f; RE): L *sor/ex -icis* (L zool. *Sorex,* kp *Soricidae* "-edoj"). Zoologia termino prenita el L. Normala traktado de la L tipo *-ex/-icis* (Wüster Esp.princ. 58; kp spec. *pumik/o, silik/o*). ¶ Ie *musaren,* Io *-o,* Ia *musaranea* (< F *mus/araigne,* H

-araña, I *-aragno*).

L *sorex* estas paralela al Gr *hy'rax* s.s. La vorto povas esti onomatopea (la besto nomata laŭ sia pepado), kp L *(su)surr(us)* sub *susuri.*

SORP/O (f; RE): A *sorb* (arbo), F *sorb/e,* (frukto) I *-a* (frukto), *-o* (arbo), (H *serba*[frukto]); L *sorb/um* (frukto), *-us* (arbo), L bot. *Sorbus.* Konsonantŝanĝo *b* > *p* por eviti kolizion kun *sorb/i* (Wüster Esp. princ. 53; Szerdahelyi 1987, 131; Yamasaki s.v.); la ŝanĝo estas unika en sia speco, sed kp *v* > *f* sub *lafo* (konsonanto voĉa > nevoĉa). Pri la problemo, ĉu la radiko signifas frukton aŭ arbon, vd. Albault en Franca Esperantisto 227/1964, 57: la germana traduko en UV (*Ebereschenbeere)* decidas favore al la frukto. ¶ 1894 *sorbu-.* ¶ Io *sorb/o,* Ie *-e,* Ia *-a**.

Eble par. al Li *sartas* "rufa" (pro la koloro de la fruktoj).

SORT/O (f; Un): L *sors* (gen.: *sortis*); F *sort,* I *-e,* (H *suerte*). ¶ 1882 *sort-.* ¶ Io *fato* (< L *fatum*), *destino* (< F *destin,* A *-y*), kp *sorto* "speco"; Ie *sorte* (ank. "speco"); Ia *sorte* (kp *sorta* "speco").

L *sors* orig, "(stangeto por) lotado" (> "[ies] lotaĵo" > "[ies] sorto"), poste ank. "ofico, socia stato, klaso (vd. *sortimento*), sekso"; apartenanta verbo: *sortiri* "loti". Probable samradika kun L *serere* "envicigi, ordigi, aranĝi" (vd. *serio*). Samfamiliaj vortoj en Eo: *risorto, sorĉi, sortimento.*

SORTIMENT/O (2; Jü): A *assort/ment,* FR *-iment,* I *-imento,* G *Sortiment,* Po *(a)sortyment,* (H *surtido*). Mallonga formo laŭ G(Po) (ellaso de sence nenecesa prefikso). Ps-sf *-ment.* ¶ Io *sort-aro,* Ie *assortiment,* Ia *-o.*

Subst. de resp. A *assort,* F *-ir,* I *-ire* "-i, ordigi laŭ specoj" el F *à*/I *a* "al" k A *sort,* F *-e,* I *-a* , ank. G *Sorte* , H *suerte* "speco" el L *sors* (gen.: *sortis*) "lotaĵo, sorto" (sem. evoluo: > "socia klaso" > "kategorio, speco"); vd. *sorto.*

SOVAĜ/A (f; Un): A *savage* [-ĝ], F *sauvage* {sovâĵ}, I *selvaggio* [-ĝ-], (H *salvaje*). "Transskribo de la prononco de la franca vorto" (Gerdman, LaE 2-3/1957, 25). F *au* > Eo *o* ekz. en *epoleto, ŝovinismo* (Cherpillod 1990, 15); la radikfino akordas forme kun la ps-sf *-aĝ* (vd. tiun). ¶ 1894 *sovag-.* ¶ Io *sovaja,* Ie *savagi,* Ia *salvage.*

El L vulg. *salvaticus,* modifo de L *silvaticus* "arbara" (> "necivilizita" > "kruda, sovaĝa"), der. de *silva* "arbaro" (vd. *silvio*).

SPAC/O (f; RE): A *space,* F *espace,* I *spazio* [-ts-], (H *espacio*); L *spatium.* Formo laŭ A(F). La *-i-* (LIH) estas neakcentata. Pri la rezulto de L *-ium* en Eo, vd. *komerco.* ¶ 1894 *spaz-.* ¶ Io =, Ie *spacie,* Ia *spatio.*

L *spatium* ank. "distanco; peco de vojo; tempodaŭro", kredeble de HE rad. **sp(h)e-* / *sp(h)a-* "etendiĝi, avanci, prosperi", en ekz. Sa *sphâ'yate* "dikiĝas, kreskas", *sphîtí-* "prospero", R *uspeĥ* "sukceso", A *speed* "rapido; †prospero", ev. L *sperare* "esperi" (kp tiun k *prosperi;* aliaj ev. parencaj vortoj sub *ŝpari*).

SPAD/O (1; Jü): F *épée,* I *spada,* (H *espada*). Bazita sur I. ¶ Io *espad/o,* Ie *-e,* Ia *spada.*

El L *spatha* "larĝa glavo" el Gr *spáthê* , nomo de pluraj larĝaj k plataj objektoj, i.a. "larĝa glavo; truleto". Vd. la ĝemelan *ŝpato;* parencaj estas ank. *epoleto, spaliro.*

SPALIR/O (f; RE): AF *espalier,* G *Spalier* [-í:r], I *spalliera,* Po *szpaler,* R *ŝpalera,* (H *espaldera*). Radikfino laŭ G prononco (*-er* evitita pro identeco kun sufikso?). Kp spec. *turnir/o;* G *-ier* [-í:r] respondas al Eo *-ir* ankaŭ en pluraj personsubstantivoj: *barbir/o, kavalir/o, oficir/o, pionir/o.* ¶ Io *espalero,* Ia *spalier,* Ie *-e.*

Der. de I *spall/a* "ŝultro" (*-iera* unue "ŝultrapogilo", poste "branĉapogilo") el L *spat(h)ula* "skapolo; truleto", dim. de *spatha* "larĝa glavo; truleto" (vd. *spado*).

SPASM/O (2; Be): A *spasm,* F *-e,* G *Spasmus,* I *spasimo* (kp *spasmodico* "-a"), PoR *spazm;* L *spasmus.* Ps-sf *-asm.*

El Gr *spasmós* "spasmo, krampfo", propr. "(kun)tiriĝo", subst. de *span* "(el)tiri", par.

al G *spannen* "streĉi".

SPAT/O (f; RE) 1) min. 2) vet. (UV, PV): A *spar* (1), F *spath* (1), G *Spat* (1, 2), I *spato* (1), Po *szpat* (1, 2), R *ŝpat* (1, 2), (H *espato* 1). Dusignifa (laŭ modelo de GPoR) en UV. Por la senco 2 estis poste enkondukita eo *spaven/o* Wü, *spavin/o* GD, PIV (el A *spavin,* F *éparvin,* I *spavenio,* ank. H *esparaván*). ¶ Senco 1: Io *spato,* Ie *spate,* Ia **spatho* Ruhrig; senco 2: Ie *sparvin* SO; neniu termino trovita en IoIa (perifrazo ĉe Ruhrig).

Senco 1: RPo < G *Spat* el pĜ **spetha-,* par. al G *Span*"splito" (la mineralo facile dissplitiĝas): vd. *ŝpato;* kp ank. Sa *sphat'ika-* "kristalo". – Senco 2; G *Spat* egalas al Nd ant. *spat* "krampfo", par. al Gr *spadô'n* "krampfo", Sa *spandate* "ekspasmas, piedbatas" (HE rad. **sp(h)e(n)d-*).

SPEC/O (f; Un): L *species;* F *espèce,* I *specie,* (H *especie*). Kontraste kun ekz. *rabi/o, seri/o* Z tie ĉi ne adoptis la L stemon sed preferis la pli mallongan formon en F. Tio ebligis la post-Zan ekuzon de la plena stemformo kiel scienca termino: eo *speci/o* (kp ank. A *species*) PVS. – [Etimologie identa estas (laŭ Holzhaus 1969, 412) la nomo de la fiktiva monunuo *spes/o* (de Saussure, 1907), bazita sur F *espèces* (plur.) "(metala) mono" (orig. "monspecoj") kaj/aŭ A *specie* "monero".] ¶ 1881 *specc-.* ¶ Io =, IeIa *specie* (ĉiuj "speco; specio").

L *species* "spec(i)o, kategorio, nocio", orig. "formo, bildo, aspekto", subst. de *specere* "vidi, rigardi" (vd. *spektaklo*). Etimologie identa estas *spico.* Kp spec. sekv.

SPECIAL/A (f', 1, 7; RE): A *speci/al,* I *-ale,* R *-al'nyj,* G *spezi/al, -ell,* Po *specjalny,* (H *especial*). Ps-sf *-al.* ¶ Io *spec-ala,* IeIa *special.*

Orig. "karakteriza por iu speco/kategorio", adj. de L *species* "speco" (vd. tiun).

SPECIMEN/O (1; Jü): A *specimen,* F *spécimen,* (H *espécimen*); L *speci/men -minis.* Reprezentas la saman L formtipon kiel *ekzameno,* kp tiun; la Ea radiko baziĝas sur la nominativo. ¶ Io =, IeIa *specimen.*

L *specimen* "specimeno, (videbla) pruvo, modelo", orig. "rekonilo, signo, bildo", estas instrumenta subst. de *specere* "rigardi" (vd. *spektaklo*).

SPEGUL/O (f; Un): G *Spiegel* [ŝpí:-], I *specchio* [spékjo], (H *espejo*); L *speculum.* Waringhien (1967, 48; kp LV 80) klarigas tiun ĉi radikon kiel kompromison inter G (*-g-*) kaj L (*-ul*). La formo **spekul-* estis eble evitata kiel tro proksima al la radiko de *spekulaci-* (RE). Pri L *-ulum* rezultiganta Eo *-ul/o,* vd. *angulo.* ¶ 1894 *spekl-.* ¶ Io =, Ie *spegul* (espismoj), Ia *speculo.*

Propr. "vidilo", der. de L *specere* "vidi, rigardi" (vd. *spektaklo*).

SPEKTAKL/O (1; N-ro 15 1888, Jü): A F *spectacle,* I *spettacolo,* Po *spekt/akl,* R *-akl',* (H *espectáculo*); L *spectaculum.* Formo laŭ modernaj fontlingvoj (AFPoR) surbaze de L fontvorto finiĝanta per *-ulum* (kp ekz. *mirakl/o, obstakl/o,* vd. sub *artikolo*). – La neologismo eo *spekt/i* PV povas esti (a) retroderivaĵo el *spektakl/o;* (b) retroderivaĵo el eo *spektator/o* "rigardanto" Kabe, PVS; (c) transpreno de la L verbbazo, vd. sube. ¶ Io =, Ie *spectacul,* Ia *-o.*

Propr. "vidaĵo", subst. de L *spectare* "rigardi", verbo intensa de *specere* (sup.rad.: *spect-*) s.s. de HE rad. **spek-* "vidi, rigardi", kp Sa *spat'* "esplorrigardanto", Gr (kun konsonantmetatezo) *sképtesthai* "observi, (ĉirkaŭ) rigardi" (kp *skeptika*), *skopeín* "observi" (kp *epi-, horo-, kalejdo-, mikro-, tele/skopo*), G *spähen* "esplorrigardi". – Samfamiliaj vortoj en Eo: *aspekto, inspekt/i, -oro, respekt/o, -iva, speco, speciala, specimeno, spegulo, spektro, spekula/cio, -tiva, spico, spite, suspekti.*

SPEKTR/O (2; Jü) 1) fiz. [2) 'fantomo' PV, GD]: A *spectr/um* (1), *-e* (2), F *spectre* (1, 2), G *Spektrum* (1), I *spettro* (1, 2), R *spektr* (1), Po *-um* (1), (H *espectro* 1, 2). Nur senco 1 estas oficiala; pri la du signifoj vd. Setälä, Fortoj de l' vivo, 161. ¶ Io = (1), Ie *spectr/e* (1), Ia *-o* (1, 2).

El L *spectrum* "imagobildo" (poste "vidaĵo" > "fantomo"; la fiz. senco estis enkondukata de Newton), der. de *specere* "rigardi" (vd. *spektaklo*).

SPEKULACI/O (3; RE; -*i* Wü): A *specul/ation,* I -*azione,* F *spéculation,* G *Spekulation,* Po *spekul/acja,* R -*jacija.* Ps-sf -*cio.* – Retrograda formaĵo: eo *spekul/i* Ka, PV (anst. *spekulaci/i*; kp *konversaci/i : konvers/i* PIV) respondanta al A *specul/ate,* I -*are,* F *spéculer,* G *spekul/ieren,* Po -*owac',* R -*irovat'.*

El L *speculat/io -ionis* "esplorrigardado, spionado; kontemplado", subst. de *speculari* "observi, gvati, spioni" (> la AFGIPoR verboj cititaj supre), der. de *specula* "observejo", de *specere* "rigardi" (vd. *spektaklo*). (La modernlingvaj verboj alprenis la sencon "sin dediĉi al teoria rezonado [fil.]" en 15-a jc; financa senco en 17-a jc). – Kp spec. sekv.

SPEKULATIV/A (3:Be): A *speculat/ive,* I -*ivo,* F *spéculatif,* G *spekulat/iv,* Po -*ywny,* (H *especulativo*); L postkl. *speculativus.* Ps-sf -*iv.*

Orig. "bazita sur kontemplado", adj. de L *speculari* "kontempli", orig. "observi" (vd. *spekulacio*).

SPERM/O (2; Jü): A *sperm,* F -*e,* IPo -*a,* G *Sperma,* (H *esperma*); L *sper/ma -matis.* Ps-sf -*m(at).* ¶ Io =, IeIa *sperma.*

El Gr *spér/ma -matos* s.s., propr. "semaĵo", subst. de *speírein* "semi, disŝuti", par. al G *sprühen* "ŝprucigi" (kp *ŝpruci*).

SPERT/A (f; RE): L *expertus;* I *esperto,* (H *experto*). Kp A *experienced,* F *expérimenté.* Ĉar la radiko estas adjektivkategoria, ŝajnas probable ke Z deiris de la L vorto, kiu aperas en la modernaj fontlingvoj kiel substantivo kun la signifo "fakspertulo": A *expert,* F *expert* (ank. adj. "faksperta"), G *Experte,* I *esperto,* PoR *ekspert,* (H *experto*). Z parte senprefiksigis la radikon, ellasante *ek-* (aŭ *e-,* se oni deiras de la I varianto), kredeble por doni eblecon formi komencan verbon *ek/spert/-i* (kp la rimarkigon ĉe *eksperto* en PIV). (Iom analogaj aferezoj estas ekz. *haladz-* el F *exhalaison, kluz-* el F *écluse,* vd. Szerdahelyi 1987, 135.) Z mem ne uzis la radikformon *ekspert-* (sed jes *ekspertiz-* Be laŭ F *expertiser*), sed la internacieco altrudis la formon (Ka, Wü ktp). ¶ 1894 *ekspert-.* ¶ Io *experta, experienc-oza,* Ie *expert,* Ia *experte, experimentate.*

L *expertus* propr. "spertinta, provinta", ptc. perf. de *experiri* "sperti, provi" (kp *eksperimento*), kunm. de pref. *ex-* "el-" (vd. la ps-pf *e(k)s-*) k radiko devenanta de HE rad. **per-* "provi, suferi", orig. "trairi" (vd. sub *porti*). Kp spec. Gr *peíra* "sperto" (vd. *empirio*).

SPEZ/O (f; RE; --*o* RE, UV ktp, -*i* OA8): Forme la radiko baziĝas sur G *Spesen* "el-oj" [-z-], I *spesa* "el-o" (Eo *z* estas normala en intervokala pozicio). La derivaĵo *el/spez/i* ŝajnas farita laŭ A *expense* "el-o", L *expensum* "el-o" (kp H *expensas* "el-oj") kaj la analogaj F *dépense(s)* "el-oj"/ *dépenser* "el-i"; ties malo *en/spez/i* povas esti inspirita de A *income* "en-o" (ev. ankaŭ de *en/kas/ig/i*). Semantika analizo de tiuj derivaĵoj donis al la radiko *spez-* la signifon "montransigo". – [Pri la nomo de la fiktiva internacia monunuo *speso,* vd. sub *speco.*] ¶ 1894 *spes-.* ¶ Kp Io *spenso* "el-o", *revenuo* "en-o" (< F *revenu*); Ie *expense* "el-o", *revenú* "en-o"; Ia *expensa/dispensa* "el-o", *recepta* "en-o" (< A *receipts,* F *recette*).

G *Spese* el I *spesa* el L *expens/a, -um* "elspezo", subst.-igita ptc.perf. de *expendere* "elpagi" (sup.rad.: *expens-*), orig. "pesi [metalon] por pago" (la esprimo estas el la tempoj kiam oni pagis per metalkvanto anst. per moneroj), kunm. de *ex-* "el-" k *pendere* "pesi" (vd. tiujn k *pendi;* kp spec. *stipendio*).

SPIC/O (f; RE): A *spice,* F *épice,* I *spezia* [-ts-], (H *especia*). Kp G *Spezereien* (plur.) "(transmaraj) spicoj". La formo laŭ A donis diferencigon disde *spec/o.* ¶ Io =, Ie *spice,* Ia *specie.*

Orig. farmacia termino: L *species* (plur.) "spicoj, medikamentoj", orig. "(specoj de)

varoj" el L *species* (sing.) "speco, kategorio" (vd. *speco,* etimologie identan).

SPIK/O (f; RE): L *spica;* A *spike,* F *épi,* I *spiga,* (H *espiga*). Kredeble bazita sur L (botanika termino). ¶ Io =, Iela *spica.*

Par. al L *spina* "dorno", vd. sekv.

SPIN/O (f; RE): L *spina;* A *spine,* F *épine dorsale* ["dorsa"] (kp adj. *spinal* "spina"), I *spina dorsale* ("dorsa"), (H *espinazo*). Kp G *spinal* "-a". Bazita sur L (anatomia termino). – La sekundara signifo ("elstara montlinio inter du deklivoj" Albault en Fund., 338) estiĝis pro la duobla signifo de la slavaj tradukoj en UV (Po *grzbiet,* R *ĥrebet*); tamen oni povas pridubi ĝian pravecon, ĉar Z en RE distingas la sencojn de ĤREBET: *spin'; ĉen'* (t.e. "montoĉeno"). – [Kolizias kun eo *spin/o* (fiz.) PVS (AF IPoR *spin,* G *Spin*).] ¶ Io =, Ie *spine,* Ia *spina (dorsal).*

L *spina* "dorno, pikilo, spino" (por la semantiko kp Umbra *spina* "kolono") kun dim. *spinula* (vd. *pinglo*) havas la saman bazon kiel *spica* "spiko"; probable par. al Sa *sphya-* "ligna glavo", Gr *spílos* "roko, rifo", A *spit* "rostostango", G *spitz* "pinta" ktp (H E bazo **spei-* "pinto").

SPINAC/O (f; RE): A *spinach* [-iĝ] (kp *spinaceous* "-a"), F *épinard,* G *Spinat,* I *spinace* [-ĉe], Po *szpinak,* R *ŝpinat,* (H *espinaca*); L bot. *Spinacia.* Gregor (1982, 29) kaj Wüster (Esp. princ. 54) donas AGPoR kiel fontlingvojn. Ni devas escepti PoR pro komenca [ŝ-], A pro fina *ch* [-ĝ], G pro fina *-t.* La F formo tre diverĝas. Restas kiel eblaj fontlingvoj I kaj L: ambaŭ skribformoj montras *spinac-* (la finsono de I estis neebla pro eventuala konfuzo kun *spin/aĉ/o;* L *-i-* povas esti ellasita por atingi 'naturan' akcentn). Kp la plurrilate similan *pistak-*. ¶ 1894 *spinak-* (laŭ Po?). ¶ Io *spinato,* Ie *spinac/e,* Ia *-ia.*

Pere de L mez. *spinachium* (per popola etimologio ligita kun L *spina* "dorno" pro la dornaj 'spinac-semoj', kp la specion *S. spinosa*) el Ar *isfinâĝ* s.s. el Pe *espenâĥ* (en ambaŭ lingvoj kun granda formvario). -Cherpillod 1992, 99.

SPION/O (f; RE): A *spy* (kp *espionage* "-ado"), F *espion,* G *Spion,* I *spia, spione,* Po *szpieg,* R *ŝpion,* (H *espía,* kp *espionaje* "-ado"). El inter la du alternativoj **spi-* (A I, ank. H) kaj *spion-* (FGIPoR), Z elektis la pli longan, ĉu pro pli granda internacieco, ĉu konsiderante la verbformadon (*spion/i* anst. **spi/i*). ¶ Io *spion-ero,* Iela *spion.*

La formo kun *-on* estas der. de I *spia* s.s., pruntita el ĝerm. lingvo (kp G *spähen* "esplorrigardi", par. al L *specere* "rigardi", vd. *spektaklo*).

SPIR/I (f; Un): L *spirare;* A *respir/e,* F *-er,* I *-are,* (H *-ar*). Internacia estas la teknika termino por "spiraparato": APoR *respirat/or,* F *-eur,* I *-ore,* G *Respirator.* La simpla verbradiko estas ĉerpita el L; *re-* estis neebla pro sia prefiksa statuso en Eo, kaj la mallonga formo oportune permesis kunmetojn kiel *el-, en/spiri.* ¶ 1906a *ŝpir.* ¶ Io *respirar* (kun specialaj verboj *aspirar* "en-i", *expirar* "el-i"); Ie *spirar;* Ia *(re) spirar.*

Eble de onomatopea origino; oni komparis (tamen sen *s-*) Sa *phuphusam* "pulmo", Gr *phy´sa* "balgo", R *pyĥtet'* "spiregi". – Samfamiliaj vortoj en Eo: *a-, in-, kon/spiri, spirit/o, -isto, -ualismo, -ualisto, sprito.*

SPIRAL/O (1; Jü; *-a* LInt 9/1898): A *spir/al,* FI *-ale,* Po *-ala,* R *-al',* G *Spirale,* (H *espiral*). Ps-sf *-al.*

Pere de L mez. *spiralis,* adj. de L *spira* s.s. el Gr *speíra* "spiralo, volvaĵo", kp *spárton* "ŝnurego", par. al Li ant. *spartas* "ligilo".

SPIRIT/O (f; RE): A *spirit,* I *-o,* F *esprit,* (H *espíritu*); L *spiritus.* Krome internacie konata per la terminoj *spirit/ismo, -isto.* Nur F diverĝas; ĝia formo donis bazon por la ĝemela radiko *sprit-.* ¶ Io = ('senkorpa estaĵo'), *anmo, mento;* Ie *spirite* ('senkorpa estaĵo'), *spíritu* (ceteraj sencoj); Ia *spirito.*

L *spiritus* "spirito, animo" (kp semantiketies etimologion!), "menso", orig. "spir-

blovo", der. de *spirare* "spiri" (vd. tiun); kp la ĝemelan *sprita* k spec. la sekvajn.

SPIRITIST/O (1; Be; kp *spirit/ist/o* Jü): A *spirit(ual)ist,* F *spirite,* G *Spiritist,* I *spiritista,* Po *spirytysta,* R *spirit,* (H *espiritista*). Ps-sf *-ist.*

Kp eo *spiritism/o* Be, *spirit/ism/o* Jü (< A *spirit[ual]ism,* F *spirit/isme,* I *-ismo,* R *-izm,* G *Spiritismus,* Po *spirytyzm*). Formitaj (19a jc) el L *spiritus* (vd. *spirito*) en la senco "senkorpa estaĵo" k la suf. *-ist* resp. *-ism* (vd. tiujn). (La FR formoj estas mallongigoj de la A esprimo *spirit- rapper,* propr. "spirito kiu frapas".)

SPIRITUALISM/O (2; Be): A *spiritual/ism,* F *-isme,* I *-ismo,* R *-izm,* G *Spiritualismus,* Po *spyritualizm* , (H *espiritualismo*). Ps-sf *(-al), -ism.* – Nomo de ano: **SPIRITUALIST/O** (2; Be): AR *spiritual/ist,* F *-iste,* I *-ista,* G *Spiritualist,* Po *spirytualist,* (H *espiritualista*). Ps-sf (*-al*), *-ist.*

Formitaj (18a jc) el L *spiritualis* "spirita", adj. de *spiritus* "spirito" (vd. tiun) k la suf. *-ism, -ist* (vd. tiujn).

SPIT/E (f:RE): A *in spite of, despite* "-e al" (ank. verbe *spite* "-i"), F *en dépit de* "-e al", I *a dispetto di* "-e al", (H *a despecho de* "-e al"). Bazita sur A (Gregor 1982, 11). Pro la tradukoj de la vorto en UV estas probable, ke Z deiris de la A prepozicieca esprimo, ĉe kio A *-e* povis ludi rolon de Ea adverba finaĵo (kp la prepoziciajn adverbojn *koncerne, rilate* ktp); la procedo estas analoga al la uzado de fontlingva *o* kiel Ea substantivfinaĵo (vd. sub *homo*). ¶ Ia *in despecto de* "-e al"; responda esprimo mankas en IoIe, kiuj kontentiĝas per *malgre* resp. *malgré.*

A *spite* "malbonvolo, malico" per aferezo el F ant. *despit* (> F *dépit;* la A prep. *despite* montras la plenan formon) el L *despectus* (kp HIIa supre) "malrespekto", subst. de *despicere* (sup.rad.: *despect-*) "malrespekti", propr. "malsuprenrigardi [al iu]", kunm. de *de-* "malsupren" (vd. ps-pf *de-*) k *specere* "rigardi" (vd. *spektaklo*); kp la semantikan kontraston *respekto.*

SPLEN/O (4; Jü): AF(I) *spleen,* G *Spleen,* PoR *splin,* (H *esplín*). A vorto internaciiĝinta, jen laŭ ortografio (FG), jen laŭ prononco (PoR). Z sekvis la ortografion, eble kun rigardo al la L-Gr fontvorto (vd. sube). ¶ Io *splino,* Ie *splin,* Ia *spleen**.

Propr. "lien(malsan)o" (la lieno estis de la hipokrata skolo konsiderata sidejo de la nigra galo, kp *melankolio*), pere de L *splen* el Gr *splên* "lieno" (vd. tiun).

SPLIT/O (3; Jü): A *splinter* (kp *split* "-i"), G *Splitter.* Kp DaNd *splinter* "-o", Da *splitte* "-i", Sv *splittra* "-i". Substantivkategoria radiko, kredeble bazita sur G kun apokopo de *-er* (kp *glim/o, kel/o, klaft/o, led/o*), kaj kun influo de la A verbo. ¶ Io =, Ie *splittre;* , Ia *morsello de ligno* 'peceto el ligno'.

Ĝerm. radiko: pĜ subst. **splitra-* (ank. kun nazala formo, vd. supre) kun verbo**splîtan;* kp G *spleissen* "spliti", Nd *splijten* "fendi".

SPONDE/O (2; Jü): A *spond/ee,* F *-ée,* I *-eo,* PoR *-ej,* G *Spondeus,* (H *espondeo*); L *spondeus.* ¶ IoIa =, Ie *spondé.*

El Gr *spondeíos* ss.s., propr. "oferverŝa (versero)" (la nomo aludas la malrapidan ritmon de la muziko/danco ĉe tiaj oferoj), adj. de *spondê'* "oferverŝo", subst. de *spéndein* "fari oferverŝon" (religia-jura termino), par. al L *spondere* "solene promesi, devontigi sin, garantii". Kp *(ko)respondi.*

SPONG/O (f; RE): A *sponge,* F *éponge,* I *spugna,* (H *sponja*); L *spongia.* Bazita sur AL (ellaso de L *-i-* kiel en *spinac/o,* vd. Wüster Esp. princ. 54). ¶ Io *sponjo,* Ie *spongi/e,* Ia *-a.*

El Gr *spongiá/spóngos* s.s., fremdvorto identa kun L *fungus* (vd. *fungo*).

SPONTANE/A (3; Jü; kp *spont/a* Ve, *-ana* var. PV): A *spontan/eous,* F *-é,* I *-eo,* Po *-iczny,* G *spontan* (kp *Spontaneität* "-eco"), (H *espontaneo*). El la variantoj, *spontan-* havas sufiksidentan radikfinon; *spont-* neglektas la internacian formon de la vorto. ¶ Ie *spontan,* Io *-a,* Ia *-ee.*

El L *spontaneus* "libervola", der. de *sponte* "laŭ [ies] volo" (*sponte sua* "laŭ propra im-

pulso, libervole, propraforte"), abl. de **spons* (nom. neuzata) "libera volo" de necerta origino.

SPORT/O (1; LInt 2/1896, Jü): AFIPo R *sport*, G *Sport*, (H *deporte*, kp *sportman* "-isto"). ¶ Io =, IeIa *sport*.

A vorto, orig. "amuzo, agrabla tempopasigilo", subst. de *sport* "amuziĝi, distri sin", per aferezo el *disport o.s.* (refl.) "distri sin" el F ant. *se de(s)porter* (refl.) s.s. el L **disportare*, propr. "dis-porti" (sem. evoluo: > "porti [sin] for de la laboro" > "distri [sin]"; kp la etim. signifon de *distri*), vd. pref. *dis-* k *porti*.

SPRIT/o (f; Un): F *esprit*, Po *spryt*. Adjektivkategoria vorto, kies fonto tamen estas la F substantivo (tiel Waringhien LV 76 kaj Janton 60, kiuj ne mencias la Po apogon). Kp la adjektivojn F *spirit/uel*, G *-uell*, I *-oso*, Po *sprytny* (apenaŭ, malgraŭ Bastien, A *sprightly* "vigla"). La aferezo povas esti inspirita de Po aŭ farita por alproksimigi la radikon al la fontlingvaj adjektivformoj. Lastvice temas pri diferencigo disde la ĝemela *spirit-*. ¶ 1894 *esprit-*. ¶ Io *esprit/o*, Ie *-e*, Ia *spirituositate* (adj.: Io *esprit-oza*, Ie *espritosi*, Ia *spirituose*).

Etimologie identa kun *spirito* (kp la difinon de *sprito* en PV/PIV: 'spirita vigleco').

SPRON/O (f; RE): F *éperon*, G *Sporn*, I *sprone*. Kp ank. A *spur*, R *ŝpora*. La fontlingvoj prezentas la modelojn *spron-* (I, esence F) aŭ **spor(n)-* (AGR). Z elektis la unuan en I vesto, eble ĉar **spor-* estis bezonata kiel botanika termino: eo *spor/o* Ve, Ka ktp. ¶ Io *sporn/o*, Ie *-e*, Ia *sporon*.

El pĜ **spuran* (kp G ant. *sporo*, Sv *sporre*), samradika kun A *spurn* "repuŝi", par. al L *spernere* "repuŝi", Li *spìrti* "piedbati", Sa *sphuráti* "forpuŝas" (HE rad. **sp(h)er-* "perpiede puŝi. piedpremi"). Kp spec. sekv.

SPUR/O (8; PVS, GD; ne ĉe Z, antaŭe *post/sign/o*): A *spoor* (ĉastermino), G *Spur*. Kp Da *spor*, Nd *spoor*. Bazita sur G. ¶ Io *trac/o*, Ie *-ie*, Ia *-ia* (< AF *trace*, I *traccia*).

El pĜ **spura-* , apartenanta al la sama radiko kiel la vortoj cititaj sub *sprono*.

SPUT/I (f; RE): L *sputare*; A *spit (up)*, G *speien*, I *sputare*, (H *esputar*). Kredeble bazita sur L (kp L med. *sputum* "sputaĵo" [ank. en AG]). ¶ IoIeIa *sputar*. La latin(id)aj k la ĝermanaj vortoj (kp ank. A *spout* "elŝpruci", Gt *speiwan* "sputi, kraĉi") estas praparencaj.

L *sputare* estas intensa verbo de *spuere* "kraĉi, sputi" (sup.rad.: *sput-*). Kp Sa *ŝt'hîvati* "kraĉas, sputas", Li *spiáuti* "sputi" k (sen *s-*) Gr *pty'ein* "kraĉi, sputi", R *plevat'* "kraĉi", Po *pluc'* "kraĉi, sputi" (la forma variado ne surprizas en tiu ĉi vorto onomatopea kaj signifanta agon de magia reputacio): HE rad. **spju-?*

STAB/O (f; RE): A *staff* [st-], G *Stab* [ŝt-], Po *sztab* [ŝt-], R *ŝtab*. Kp Sv *stab* [st-]. Bazita sur G ortografio (GPoR laŭ Gregor 1982, 29). ¶ Io =, Ie *stab*; Ia *stato major* (< F *état-major*, I *stato maggiore*, H *Estado Mayor*).

AG ank. "bastono", kiu estas la orig. senco (poste "bastono kiel insigno de komandanto" > "oficiroj helpantaj la komandanton"); pĜ **staba-*, kp ank. Sv *stav* "bastono" k plue Li *stêbas* "bastono", Sa *stabhnâ'ti* "apogas" (HE rad. **steb(h)-*). Kp *ŝtupo*.

STABL/O (f; RE): F *établi*, R *stanok*. Kp G *Staffelei* "(pentrista) stablo". Laŭ Szerdahelyi (1987, 136) el L *stabula*, vorto neekzistanta. Laŭ Waringhien LV 80 kompromisa formo inter F kaj R (R *sta-*, F *-bl*), unika en sia speco. Restas la ebleco rigardi la radikon kiel formon en kiu la F proteza *e-* estas anstataŭita per pli ordinara *st-* el G. Oni tamen ankaŭ povas konsideri aŭtonoman Ean formaĵon teleskopan el *star-* kaj *tabl-*. – En 1894 Z transmetis la radikformon *stabl-* al la loko de *stal-*. ¶ 1894 *tret-* (< F *tréteau*, kp A *trestle*). ¶ Io *tresto*, Ie *trestale*; Ia *cavalletto* (< I).

F *établi* propr. "(io) starigita" de *établir* "starigi, establi" (vd. tiun). – R *stanok* der. de *stan* "ilo". – G *Staffelei* der. de *Staffel* "ŝtupe-

to" (vd. *ŝtupo*].

STACI/O (f; RE): AF *station,* G *Station,* I *stazione,* Po *stacja,* R *stancija,* (H *estación*). Ps-sf *-cio.*

El L *stat/io -ionis* "star/ado, -ejo", subst. de *stare* "stari" (vd. tiun).

STADI/O (1; Be) 1) evolufazo 2) greka mezurunuo (Ve, Wü) [3) sportejo, vd. sekv.]: A *stage* (1), *stadium* (2), F *stade* (1, 2), G *Stadium* (1), *Stadion* (2), I *stadio* (1, 2), Po *stadium* (1), *stadion* (2), R *stadija* (1), *stadion* (2), (H *estadio* 1, 2); L *stadium* (2). Bazita sur la L formo kun konservita *-i-* kiel en *akvario, evangelio, gimnazio* ktp. Oni provis uzi la plenan L formon por senco 3: *stadium/o* (PV var.); vd. plue sekv. ¶ Io *fazo* (1), *stadio* (2); Ie *stadie* (1), *stádion* (2); Ia *stadio* (1, 2).

El Gr *stádion* ("mezuro de 192 m [Olimpio]" > "kurejo 192 m longa" > "stadiono"; la senco 1 ekestis en modernaj lingvoj, ĉar oni komparis la evolufazojn kun trakurataj vojpecoj), kp dial. *spádion* s.s., eble el *span* "(el)tiri" (vd. *spasmo*). Etimologie identa kun la sekva.

STADION/O (8; PV var.; kp *stadi/o* Backman 1919, [Wü], PV var.): A *stad/ium,* F *-e,* I *-io,* PoR *-ion,* G *Stadion,* (H *estadio*); L *stadium* 'kurejo'. Diferencigo disde *stadi/o,* bazita sur la Gr originformo *stádion.* ¶ IoIa *stadio,* Ie *stádion.*

El Gr *stádion,* vd. la etimologie identan *stadio.*

STAL/O (f; Un PoG, kp *stal-* "ŝtalo" Un R): A *stable,* F *étable,* G *Stall,* I *stalla,* (H *establo*); L *stabulum.* Kp R *stojlo* "stalĉelo", ank. Po *stajnia* "stalo". Radikformo laŭ GI (ĝermaneca); en 1894 Z ŝanĝis al radikformo de latin(id)a tipo. ¶ 1894 *stabl-.* ¶ Io *stablo,* Ie *stalle,* Ia *stabulo.*

I *stalla* (kun paralela formo *stallo* "†stare-jo; ĥorejseĝo", vd. *instali, piedestalo*) el G *Stall* (G ant. *stalo*) el pĜ **stalla-,* kp A *stall* "stalfako", Sv *stall* "ĉevalstalo", der. de HE rad. **sta-* "stari" aŭ ties plivastigo **stel-* "starigi". Ankaŭ la latin(id)aj kaj slavaj vortoj supre cititaj lastvice estas ligitaj kun la sama HE radiko. Vd. *stari.*

STALAGMIT/O (2; Be): AFI *stalagm/ite,* PoR *-it,* G *Stalagmit,* (H *estalagmita*); L mod. *stalagmites.* Ps-sf *-it* 3.

STALAKTIT/O (2; Jü): AF *stalactite,* G *Stalaktit,* I *stalattite,* Po *stalakt/yt,* R *-it*; L mod. *stalactites.* Ps-sf *-it* 3.

Terminoj kreitaj (en L mod. de O. Worms, 18a jc) el Gr *stalagmós* "gutado" resp. *stalaktós* "guta", subst. k adj. de *staláttein* "guti" (kp semantike G *Tropfstein* "stalagmito", propr. "gutŝtono"), eble par. al A *stale* "(ĉevala) urino".

STAMEN/O (4; Ve, Fab I): L *sta/men -minis*; A *stamen,* F *étamine,* I *stame,* (H *estambre*). Botanika termino prenita el L; radikformo identa kun la L nominativo (laŭ Wüster Esp.princ. 57 por eviti kolizion kun eo *stamin/o* 'vualŝtofo' Jü, sed kp *ekzamen/o, specimen/o*). ¶ Io *stamin/o,* Ia *-e,* Ie *stámine.*

Specialigita senco (ĉe Plinio) de L *stamen* "varp/o, -fadeno", propr. "staraĵo" (la varpo estis staranta en la antikvepokaj teksiloj, kp Gr *stê'môn* "varpo" de *histánai* "starigi"), der. de *stare* "stari", vd. tiun.

STAMP/I (f; RE): A *stamp,* F *estamp(ill)er,* G *stempeln,* I *stamp(igli)are* (kp *stampo* "-o"), Po *stemplowac',* R *ŝtampovat',* (H *estampar*). Trovebla ĉe Collinson 1959, 9 inter komune ĝermanaj radikoj, sed fakte de internacia disvastigiteco. Radikvokalo laŭ AFIR; la *-l-* troviĝanta en GPo(FI) estis neoportuna en Eo, kiu havas instrumentsufikson *-il.* ¶ IoIeIa *stampar.*

Ĝerm. vorto (pĜ formoj **stampôn/*stampjan,* kp G *stampfen* "pisti, piedbati"); la formoj kun *-l-* devenas de la instrument-subst., ekz. G *Stempel* "-ilo" (< pĜ **stampila-*). Kredeble par. al Gr *stémbein* "surtreti, malbontrakti" (kp *ŝtupo*).

STAN/O (f; RE): L *stannum*; F *étain,* I *stagno,* (H *estaño*). Latina nomo de kemia elemento. ¶ Io =. IeIa *stanno.*

L *stannum/stagnum* orig. "alojo de arĝento k plumbo", termino eble de kelta origino

(kp Ir *stân* "stano").

STANDARD/O (f; RE; kp *standart-* N-ro 14 1888): A *standard,* F *étendard,* G *Standarte,* I *stendardo,* Po *sztandar,* R *ŝtandart,* (H *estandarte*). Formo laŭ A. ¶ IoIa =, Ie *standarte.*

F vorto, probable de ĝerm. origino: F ant. *estandart* el Fk **standhard*: la unua elemento de pĜ **standan* "stari" (kp A *stand* s.s.); en la dua oni supozas pĜ **hardhu-* "firma, malmola"; do orig. "io firme staranta" (pri la flago firme enŝovita en la grundon, orientiga punkto por batalanta armeo). Vd. *stari* resp. *hardi.*

STANG/O (f; RE): G *Stange,* I *stanga,* R *ŝtanga.* Kp Sv *stång.* Citita inter komunaj ĝerman-slavaj vortoj ĉe Collinson 1959, 7; fakte reprezentata en ĉiuj tri grandaj eŭropaj lingvofamilioj. ¶ Io =, Ie *fuste* (< L *fustis*), Ia *pertica* (< LI).

El pĜ **stangô-,* probable orig. "pikilo", kp" A *sting* "piki" (HE **stengh-,* nazaligita formo de la rad. citita sub *instigi*).

STAR/I (f; Un): L *stare (*sup.rad.: *stat-*); I *stare (in piedi* "sur la piedoj"). Kp A *stand,* G *stehen* (impf.: *stand*), Po *stac',* R *stojat'* [sta-], (H *estar de pie,* propr. "stari/esti sur la piedoj"). Bazita sur L kun enkorpigo de la infinitiva finaĵo *-r-* (por analogaj kazoj, vd. *diri*), tie ĉi por eŭfonio: la baza silabo *sta- (*kun apogo en AGIPo(R)L) ne estis esperantigebla sen maloportuna hiato (**sta/i*; kp tamen *sci/i*!). ¶ Io *starar* (vd. Pgr 48/1912, 716) > *stacar;* IeIa *star.*

De HE rad. **st(h)a-* "stari", kp ank. Sa *tíŝt'hati* "staras", *sthâna-* "starejo", Gr *stásis* "staro, halto", *statós* "staranta", *staurós* "paliso", *histánai* [< **si-sta-*] "starigi" (kp *ekstazo, hidrostatiko, restoracio, sistemo*), Gt *standan* "stari", G *Stuhl* "seĝo" (kp sub *fotelo*), Li *stóti* "treti". Speciale la familio de L *stare* estas multnombre reprezentata en Eo: (a) radikformo *sta-: aresti, cirkonstanco, distanco, establi, konstanta, konstati, kontrasto, kosti, obstaklo, resti, stablo, stameno, substantivo;* (b) radikformo *stat-: stacio, stato, statistiko, staturo;* (c) radikformo *statu-* (*statuere* "starigi"): *institucio, instituto, konstitucio, prostitui;* (d) radikformo *sist- (sistere* "ekstari, stariĝi"): *asisti, ekzisti, insisti, konsisti, konsistorio, persisti, rezisti;* (e) radiko plivastigita per *-n: destini, obstina.* Kp plue *etaĝo, fosto, superstiĉo,* ev. *preta.*

START/I (8; LInt 4-5/1900, PV; ne ĉe Z): A *start,* G *starten,* Po *-owac',* R *-ovat'.* Kopio de la A vorto (> GPoR). ¶ IoIe *startar,* Ia *partir* (< F), kp *starter* "-igisto".

A vorto, orig. "eksalti", par. al G *stürzen* "falegi".

STAT/O (f; RE): L *status;* A *stat/e,* I *-o,* F *état,* G *Stand,* Po *stan,* (H *estado*). Radikformo respondanta al LAI; la F formo estas adoptita en Eo kun alia senco: *etat/o.* Kp ank. *ŝtat/o.* ¶ Io *stando,* Ie *stat/u,* Ia *-o.*

L *status* orig. "star(ad)o" (> "starado de la aferoj"), subst. de *stare* "stari" (vd. tiun). Etimologie identa kun *etato* k *ŝtato.* – La G k Po formoj estas praparencaj al L (orig. "staro").

STATISTIK/O (1; Du, RE): A *statist/ics,* F *-ique,* I *-ica,* R *-ika,* G *Statistik,* Po *statystyka,* (H *estatística*). Ps-sf *(-ist), -ik.*

G *Statistik* (18a jc kun nuna senco) baziĝas sur L mod. *statistica* "politika scienco", der. (pere de *statista* "ŝtatisto") de L mod. *status* "ŝtato" (vd. tiun). Vd. Collinson en Eologio II:2 (1961), p. 93.

STATU/O (1; Eisto 3/1889, Be): AF *statu/e,* IPo *-a,* R *-ja,* G *Statue,* (H *estátua*); L *statua.* ¶ Io =, Ie *statu/e,* Ia *-a.*

Propr. "io starigita", kp L *statuere* "starigi", der. de *status* "staranta, starigita", ptc.perf. de *sistere* "star/igi, -iĝi" (vd. *stari*). Kp sekv.

STATUR/O (1; Jü): AF *stat/ure,* I *-ura,* G *Statur,* (H *estatura*); L *statura.* Ps-sf *-ur.*

Propr. "star/ado, -maniero", der. de L *status* "staranta, starigita" (vd. la antaŭan).

STEARIN/O (1; Jü): A *stear/ine,* I *-ina,* Po *-yna,* R *-in,* F *stéarine,* (H *estearina*). Ps-sf *-in* 2.

Konstruita (19a jc) el Gr *stéar* "sebo", orig. "rigidaĵo", par. al la vortoj cititaj sub *ŝtono.*

STEB/I (f; RE): G *steppen,* Po *stebnowac'.* Ĝenerale rigardata kiel germandevena radiko kun konsonantŝanĝo *p > b* por eviti kolizion kun la samtempe aperanta *step/o* (Yamasaki s.v., vd. ank. Bianchini 162, Szerdahelyi 1987, 131). Sed oni pretervidis la Po formon troveblan en Akademiaj Korektoj de UV (vd. Fund., p. 282). La radiko do estas poldevena kun G apogo. Tio signifas, ke la (cetere unika) konsonantŝanĝo malaperas. La motivo por elekto de ĝermana (fakte: ĝermana-slava)vorto estas, laŭ Collinson 1959, 9, diferencaj vortoj en la romanaj lingvoj (kp F *piquer,* I *impuntire,* [H *pespuntar*]). ¶ 1894 *trapunt-* (kp I *impuntire* de *punto* "stebero, kudrero"). ¶ Io *stebar* (espismo); Ie *trapuntar,* Ia *punger* Ruhrig (propr. "piki").

Orig. "piki per pinta instrumento", par. al A *stipple,* Nd *stippelen* "punkti", prapar. al L *stipes* "fosteto" (vd. *ŝtipo*).

STEL/O (f; Un): L *stella:* A *star* (kp *stellar* "-a"), F *étoile* (kp *stellaire* "-a"), G *Stern,* I *stella,* (H *estrella*). Kp ank. AF *constellation,* G *Konstellation* "stelaro" (> eo *konstelaci/o* Jü). Bazita sur L. ¶ Io =, Ie *stell/e,* Ia *-a.*

L *stella* el **sterla,* kp kun sama senco Sa *star-,* Gr *astê'r* (vd. *astro*), Gt *stairnô* k AG supre (HE bazo **ster-*).

STENOGRAF/I (3; Wü, PV; kp *stenografi/i* Jü, Ka; *stenograf/o* "-iisto" Backman 1919, Wü): F *sténographier,* G *stenographieren,* I *stenograf/are,* Po *-owac',* R *-irovat',* (H *estenografiar*). La Ea termino ŝajnas farita laŭ analogio de *telegraf/i* kaj estas sendependa de la nomo de la arto:

STENOGRAFI/O (3; LInt 6-7/1896, Be): A *stenography,* F *sténographie,* G *Stenographie,* IPo *stenograf/ia,* R *-ija,* (H *estenografía*). Ps-sf *-i* 1. ¶ Io *stenograf/ar* resp. *-io;* Ie *stenograf/ar, -ie;* Ia *stenograph/iar, -ia.*

La verbo estas farita (19a jc) el la artonomo (ekz. F) aŭ analogie al aliaj verboj kun la sama finelemento (ekz. G *telegraphieren*). La nomon de la arto (unue en A, 17a jc) kreis la sisteminventinto W illins el Gr *stenós* "densa, malvasta, konciza" (sen etimologio) k *gráphein* "skribi" (vd. *telegrafo*); la senpera modelo eble estis A *orthography.*

STEP/O (f; RE): AF *stepp/e,* I *-a,* G *Steppe,* Po *step,* R *step',* (H *estepa*).

R vorto de necerta origino.

STERK/O (f; RE): L *sterc/us -oris;* I *sterco,* (H *estiércol*); kp F *stercoraire* "-eca". Kiel ĉe *korp/o, temp/o,* I montris la vojon al oportuna mallongigo de la L stemo. ¶ Io =, Ie *sterco,* Ia *stercore.*

Eble par. al G *Dreck* "malpuraĵo, koto".

STERLED/O (f; RE): AFPo *sterlet,* I(H) *-o,* G *Sterlet,* R *sterljad'.* Konsonantŝanĝo *t > d* por eviti sufiksidentan radikfinon (vd. *aldo*). ¶ Ia *sterlet*,* Io *-o,* Ie *-e.*

R vorto el G *Störling* "sturgeto" (vd. *sturgo*).

STERN/I (f; RE): L *sternere* (sup.rad.: *strat-*). Bazita sur L sen evidenta apogo de la modernaj fontlingvoj (tamen la radiko estas trovebla en F *se prosterner*/I *prosternarsi* [refl.] "adorsterniĝi"). ¶ Io Ie *sternar,* mankas en Ia, kiu kontentiĝas per *extender* "etendi", *displicar* "malvolvi" k.s.

L *sternere* "sterni (surtere), tegi , pavimi" de HE rad. **ster-* "etendi" , kp Sa *strnâ'ti* "sternas, dissemas", Gr *strônny'nai* "etendi", *stratós* "tendaro; armeo" (vd. *stratego*), A *strew*/G *streuen* "disŝuti", R *strana* "lando" (kp sub *stranga*). Samfamiliaj vortoj en Eo: *estrado, konsterni, strato.*

STERTOR/o (f; EG): L mod. *stertor,* (H *estertor*). Kp A *stertor/ous,* F *-eux* "-a". Verbkategoria radiko (kp tamen *-o* Ka, Ve) forme bazita sur moderna L substantivo (medicina termino). ¶ IoIa* *stertorar,* Ie *ralar* (< F *râler*).

Der. de L *stertere* "ronki", par. al Ir *srennim* "stertoras" (onomatopea vorto, kp *terni*).

STIL/O (f; RE): AF *style,* G *Stil,* I *stilo,* Po *styl,* R *stil',* (H *estilo*); L *stilus.* ¶ IoIa =, Ie *styl > stil.*

L *stilus* orig. "skribilo, grifelo" (> "skribado, verkado" > "verkmaniero") k "pinta objek-

to" ĝenerale, par. al *stimulus* "pikilo" (vd. *instigi*, kp sekv.). – La ortografio kun *y* dependas de malĝusta asociiĝo kun Gr *sty'los* "kolono" (vd. *peristilo*).

STIMUL/I (2; Be): A *stimul/ate,* F *-er,* G *-ieren,* R *-irovat',* I *stimolare,* Po *stymulowac',* (H *estimular*).

El L *stimulare* "sproni, instigi", der. de *stimulus* "pikilo" (vd. *instigi*).

STIP/O (f; RE): L bot. *Stipa;* (H *esteba,* kp P *estipa*). Botanika termino prenita el L. Pro F *stipe* "tigo", la vorto estis ekuzata en Eo ankaŭ kun tiu senco (Wü, PV; kp Albault en Fund., p. 22). ¶ Io = (Feder, kun asterisko); Ia **stipa;* ne trovita en Ie.

Eble tiel nomata ĉar la aristoj de la koncernaj herboj similas al stupo (L *stup(p)a, stipa,* Gr *sty'ppê*), vd. tiun.

STIPENDI/O (4; Eisto 5-6/1894, Jü): G *Stipendium,* Po *stypendium,* R *stipendija.* Kvankam la vorto ekzistas ankaŭ en la aliaj fontlingvoj (A *stipend ,* I *-io* "salajro", F *stipendier* "dungopagi"), la Ea semantiko sekvas la uzadon de G kaj la slavaj lingvoj. La formo kun *-i-* estas konforma al la L fontvorto, vd. sube. ¶ Io =, Ie *stipendio;* Ia *bursa* (< F *bourse,* I *borsa,* A *bursary*).

El L *stipendium* "soldatsalajro", kunm. de *stips* (gen.: *stipis*) "mondonaco, salajro, gajno" (de necerta origino) k *pendere* "pagi" (vd. *spezo* k *pendi*).

STOF/O (f; RE): Po *sztof* [ŝt-], R *ŝtof.* Kp Sv *stop.* Cetere nuraj transskriboj. La slavaj formoj normale rezultigus **ŝtof-,* sed tiu formo estis okupita de alia signifo. ¶ Mankas en la aliaj L.

I. R el G (dial.) *Stauf* "pokalo", kp ank. A *stoup* s.s.

STOIK/A (2; Be): A *sto/ic,* F *-ïque,* G *-isch,* I *-ico,* Po *-icki,* R *-iĉeskij,* (H *estóico*); L *Stoicus.* Ps-sf *-ik.*

El Gr *stôïkós* "apartenanta al la stoika skolo", propr. "portika", adj. de *stoá* "portiko" (la skolo estis tiel nomata ĉar ĝia fondinto Zenono instruadis en apudplaca portiko en Ateno), par. al Gr *sty'los* "kolono" (vd. *peristilo*).

STOMAK/O (f; Un): A *stomach* [-k], F *estomac* (kp *stomacal* "-a"), I *stomaco,* (H *estómago*); L *stomachus* [-k-]. ¶ Io =, Ie *stomac,* Ia *stomacho.*

El Gr *stómakhos* s.s., orig. "kardio (enira aperturo de la stomako)", der. de *stóma* "buŝo, aperturo".

STOPL/O (3; Ve, Wü, PV): A *stubble,* G *Stoppel,* I *stoppia.* Kp Nd *stoppel,* Sv *stubb.* Bazita sur G (kun ellaso de neakcentata *e* kiel en *kegl/o, kugl/o, nadl/o,* tiurilate apogata de A). ¶ Io *estublo* (kun *e-* el F *étuble*), Ie *stopple,* Ia *stupula* (vd. sube).

Pere de L postkl. *stupula* el L *stipula* "stoplo, pajlero", kp R *stebel'* "tigo" (vd. plue *ŝtipo*).

STRAB/I (f; RE): L med. *strabismus* "-ismo", kp L *strabo* "-ulo"; A *strab/ismus,* F *-isme,* I *-ismo,* (H *estrabismo*), ĉiuj "-ismo". Radiko verbkategoria sed ne montranta verbajn manifestiĝojn en la fontlingvoj (por trovi verbon de tiu ĉi radiko, oni devas iri al Gr *strabízein*). Sendube ĝi estas ekstraktita el la L medicina termino. ¶ Io *strab-esar,* Ie *strabar;* kp Ia *strabe* "-a".

El Gr *strabós* "-a" (kun der. *strabismós* "-ismo"), probable orig. "tordita", par. al *stréphein* "turni, tordi" (vd. *strofo*).

STRANG/A (f; RE): A *strange,* F *étrange,* I *strano,* (H *extraño*); R *strannyj.* Bazita sur A(F) ortografio kun esenca apogo de IR. La reprezentiĝo de A *g* [ĝ] kaj F *g* [ĵ] per *g* estas escepta (kp *aĝo*); Cherpillod 1990, 24 konas nur ankoraŭ unu ekzemplon, nome *sturg/o.* ¶ Io *stranja,* Ie *strangi,* Ia *estranie.*

AFHI el L *extraneus* "fremda, eksterlanda" (la sinonimikon de *fremda* k *stranga* aludas Collinson 1959, 8), der. de *extra* "ekster" (vd. *ekstra*). – La R formo nur hazarde similas al la latinida: kp R *strannik* "migranto, pilgrimanto" (< "fremd/ulo, -landano"): bazvorto *straná* "lando", par. al la vortoj cititaj sub *sterni.*

STRAT/O (f; Un): A *street,* G *Strasse,* I

strada. Kp Nd *straat,* ank. H *estrada* "vojo". Waringhien (1967, 48) rigardas la radikon kiel miksformon de G vokalo kaj A konsonantoj ('la germanaj konsonantoj estis forte modifitaj per la dua konsonantŝanĝo'). Sendube la L fontvorto *(via) strata* ankaŭ estis konsiderata. ¶ Io *strado,* Ie *strade,* Ia *strata.*

El L *via strata* "pavimita vojo": *strata* ptc.-perf. de *sternere* "sterni; tegi, pavimi" (vd. *sterni*).

STRATEGI/O (2; Jü): A *strateg/y,* IPo *-ia,* R *-ija,* F *stratégie,* G *Strategie,* (H *estrategia*). Ps-sf *-i* 1.

El Gr *stratêgía* "komando, ofico de generalo", der. de *stratêgós* "generalo, armeestro", kunm. de *stratós* "armeo" (orig. "tendaro", par. al *strônny'nai* "sterni", vd. tiun) k *-agos,* agantnomo de *ágein* "konduki" (vd. *agi*).

STREB/I (6; Fab III, PV): A *strive,* G *streben.* Kp Ji *shtrebn,* Nd *streven,* Da *stræbe.* Bazita sur G kun vortkomenca apogo de A. ¶ Ekzakta paralalelo mankas en la aliaj L.I.; vd. sinonimojn kiel *peni, klopodi, aspiri.*

El G mez. *streven* "esti rigida; streĉiĝi (al), etendi sin (al)" el pĜ **stribôn,* der. de adj. **striba-* "rigida", par. al Gr *striphnós* "firma, malmola" (kp sekv.).

STREĈ/I (f; RE): A *stretch* [-ĉ], G *strecken.* Kp Nd *strekken,* Sv *sträcka.* Bazita sur A (A *tch* [ĉ] > Eo *ĉ* ankaŭ en *buĉi;* pri A *ch* [ĉ] > Eo *ĉ,* vd. *pinĉi*). Kiel Collinson konstatas (1959, 9), Z akceptis káj la latinidan káj la ĝermanan radikon por la sama nocio (*etend-* resp. *streĉ-*), 'diferencigitaj per la grado de klopodo'. ¶ 1894 *string-* (< L *stringere* "streĉe ligi". ¶ Io *tensar* (< A *tense*), *strenar* (< A *strain*); IeIa *tender* (< L *tendere*).

El pĜ **strakjan,* der. de **strak(k)a-* "rekta, rigida", kp G *starr* "rigida", par. al Gr *stereós* "solida" (HE rad. **ster-/stre-* "esti rigida; etendi"); kp la vortojn sub *strebi.*

STREK/O (f; RE; *-i* kun *-o* menciita aparte en UV; *-i* Be, Jü, PV, GD; *-o* RE, Ka, PIV, BRO): A *stroke* (kp *strike off* "forstreki", *streak* "strii"), G *Strich* (kp *unter/streichen* "substreki"), R *ŝtriĥ.* Kp Sv *streck* (*under/stryka* "substreki"). Konsonantismo laŭ A. La vokalismo ne estas senpere klarigebla el la fontlingvaj formoj; ĉe la prijuĝo oni devas havi en memoro la radikon *strik/o,* samtempe aperantan. Szerdahelyi (1987, 124) listigas A *ea* [i] > Eo *e* (*strek-* estas la unusola ekzemplo); Cherpillod (1990, 24) citas ankaŭ *aperi* kaj *knedi.* Kvankam A *streak* precipe signifas "strii", ĝi devas esti rigardata kiel fontvorto de tiu ĉi radiko (vd. UV). Eble la vokalo *e* estas ekstraktita el la du digrafoj A *ea* kaj G *ei,* tiel kreante diferencigon disde *strik-*. ¶ Io =, Ie *streca* (espismoj); Ia *linea, tracto* (< F *trait,* H *trazo,* I *tratto*).

El pĜ **strika-,* subst. de **strikan:* G *streichen* "glitigi la manon (sur io), streki", A *strike* "frapi" (kp *striko*) de HE **streig-* (vd. *strigli*). Kp sekv.

STRI/O (f; RE): A *strip(e),* F *strie,* G *Streifen,* I *striscia, stria,* (H *estría*). Bazita sur F(I) kun vortkomenca apogo de A(G). Alprenante la oportunan mallongan formon, Z iom tordis la semantikon, kiel konstatas Waringhien (LV 81): "*strio...*ne havas la sencon de la latina *stria,* franca *strie,* itala *stria,* kiuj signifas 'longan neprofundan sulketon', sed ja tiun de D [=G] *Streifen,* t.e. F *bande,* I *striscia".* ¶ Io =, Ie *stri/e,* Ia *-a*.*

La romanaj formoj el L *stria* "sulketo", prapar. al la supraj AG vortoj k al G *Strieme(n)* "sanga strio", *Strahl* "radio" (HE bazo **stre-* kun diversaj sufiksoj, kp la plivastigon **streig-* sub *streko* k *strigli*).

STRIG/O (f; RE): L *strix* (gen.: *strigis*). Zoologia termino prenita el L, kp Wüster Esp.princ. 58 (analoge *greg/o* < L *grex, gregis*). ¶ Io =, Ia *strige;* Ie *ul* (< A *owl,* G *Eule*).

Identa kun (aŭ pruntvorto de) Gr *stri(n)x* s.s. La vorto estas onomatopea, kp L *stridere* "sibli, knari, grinci, muĝi".

STRIGL/I (1; Jü): F *étriller,* G *striegeln* (kp *Striegel* "-ilo"), I *strigliare*; kp L *strigilis* "-ilo". Supozeble bazita sur G same kiel *rigl/i* el G *riegeln,* kp tiun. La I apogo estas esenca. ¶ Io *strigl/o* "-ilo", *-agar* "-i"; Ie *strigul* "-ilo", *-ar* "-i"; Ia **strili/a* "-ilo", *-ar* "-i" (Ruhrig). La verbo estas formita el la instrumentnomo (F *étrille,* I *striglia*). L *strigilis* de la rad. en *stringere* "tuŝeti, glitigi la manon (sur); strikte ligi" de (H)E rad. **streig-/streng-* "strikta", kp L *strictus* "streĉita, strikta", *strangulare* "strangoli", G *streng* "severa, strikta". Kp sub *streko* k *strio.* – Parencaj vortoj en Eo: *distrikto, streko, strio, striko.*

STRIK/O (f; RE): A *strike,* G *Streik,* Po *strajk.* Kp Sv *strejk.* Eo kopias la A ortografion (kiel en *spit/e*), dum GPo transskribas la A prononcon (en G tamen ofte *Strike* en la 19a jc). Pri eventuala influo de *strik-* sur la formon de *strek/o,* vd. tiun. ¶ Io =; Ie *bastament* (konstruita de de Wahl el R *zabastovka* "striko", vd. Berger 1947, 2); Ia *exopero* (< I *sciopero*).

A subst. de la verbo *strike* "-i", orig. "frapi" (vd. *streko*). La semantika evoluo ne estas tre klara; ĉu orig. *strike tools* "disbati (la) laborilojn"?

STRIKNIN/O (2; Be): AF *strychn/ine* [-k-], Po *-ina,* G *Strychnin,* I *stricnina* [-k-], R *striĥnin,* (H *estricnina*). Ps-sf *-in* 2.

Termino farita (en F 1818 de la eltrovintoj Pelletier k Caventou) el Gr *strykhnós* "strikno" (kies beroj, 'vomiga nukso', enhavas tiun venenon), eble par. al G *Strauch* "arbusto".

STROF/O (1; RE): AF *strophe,* G *Strophe,* IPoR *strofa,* (H *estrofa*); L *stropha.*

El Gr *strophê'* "strofo, kanto kantata de la drama ĥoro", propr. "turniĝo" (la nomo aludas la dancadon de la ĥoro sur la orkestro), subst. de *stréphein* "turni" de nekonata origino. Kp spec. *apo-, kata/strofo*; parenca estas verŝajne ank. *strabi.*

STRUKTUR/O (1; Jü): AF *structure,* G *Struktur,* I *struttura,* PoR *struktura,* (H *estructura*); L *structura.* Ps-sf *-ur.*

Propr. "konstruo", subst. de L *struere* "konstrui" (vd. tiun k *sterni*).

STRUT/O (f; RE): L *struth/io -ionis*; A *ostrich,* F *autruche,* G *Strauss,* I *struzzo* [-ts-], Po *strus',* R *straus,* (H *avestruz*). Bazita sur L (zoologia termino) kun sinkopo de *-i-* (Modrijan 12 komparas *fulg/o* el L *fuligo*; probable estas pli ĝuste diri, ke *i* estas ellasita por atingi formon egale mallongan kiel GIPoR kun akcento sur la ĉefa radiksilabo). ¶ Io *strucho,* Ie *struce,* Ia *(ave)struthio.*

Latin(id)a vorto (la AFH formoj el L *avis struthio* "birdo struto") el Gr *strouthíôn/strouthós (megálê)* s.s., propr. "(granda) birdo": *strouthós* "bird(et)o, pasero", eble par. al Li *strâzdas* "turdo" (vd. tiun).

STUD/I (1,Jü; kp *studi/o* Eisto 2/1889, *studi/i* Eisto 7/1894, *studi/ant/o* LInt 3/1898): A *study* [-i], F *étudier,* G *studieren,* I *studiare,* Po *studiowac',* (H *estudiar*); L *studere.* Bazita sur L, probable kun konsidero al la fundamenta *student/o.* La arkaikaj formoj kun *-i* baziĝas sur la L subst. *studium* "studado" kaj la verbaj formoj en FIPo. Kp la aliajn L.I. ¶ IoIeIa *studiar* (Ia ank. *studer*).

L *studere* orig. "fervore okupiĝi pri (io), strebi al (io)" (subst.: *studium* "fervoro, strebado; studado") kun necerta etimologio. Samfamilia vorto en Eo: *studento.*

STUDENT/O (f; Du, RE): APoR *student,* I *-e,* F *étudiant,* G *Student,* (H *estudiante*). ¶ Io =, Ie *studiante,* Ia *studente.*

El L *stud/ens -entis* "studanto", ptc.prez. de *studere* "studi" (vd. tiun).

STUK/O (f; RE; *-i* Jü; kp *ŝtuk-* Be): AI *stucco,* F *stuc,* G *Stuck* [ŝ-], (H *estuco*); kp Po *sztukateria* [ŝ-] "-aĵo", R *ŝtukaturka* "-aĵo". Formo laŭ la ortografio de AFG I. ¶ Io =, Ie *stucc/a,* Ia *-o.*

I vorto de ĝerm. (probable lombarda) orig.; la ĝerm. vorto estas reprezentata de G ant. *stucchi* "krusto; peco", identa kun G *Stück* "peco".

STULT/A (2; Jü): L *stultus;* I *stolto.* Kp A

stultify "-igi". Bazita sur L. ¶ Io =, Ie *stult,* Ia **stulte.*

Samradika kun L *stolidus* s.s.; necerta etimologio.

STUMP/O (3; Jü): A *stump,* G *Stumpf.* Kp Sv *stump.* La radikformo, identa kun la angla, aludas ankaŭ la germanan (kp *ŝtrump/o* el G *Strumpf*). ¶ Io =, Ie *stumpe;* Ia *fragmento, pecietta* 'peceto', *residuo truncate* 'stumpigita restaĵo'.

Ĝerm. radiko, kredeble par. al Li *stimbras* "stumpo". Etimologie identa estas *ŝtrumpo.*

STUP/O (f; RE): L *stupa;* F *étoupe,* I *stoppa,* (H *estopa*). Bazita sur L ([-u-] ankaŭ en F). Kp *ŝtup/o,* kies radikformo kredeble ricevis sian cirkumflekson por diferenciĝi disde tiu ĉi. ¶ 1894 *etup-.* ¶ Io =, Ie *stuppe,* Ia *stoppa.*

El Gr *sty'ppê* s.s., par. al Sa *stupá-* "hartufo". Etimologie identa estas *ŝtopi,* kp ank. *ŝtofo.*

STURG/O (f; RE): A *sturgeon* [-ĝe'n], F *esturgeon* [-ĵô´], G *Stör,* I *storione,* (H *esturión*); L *stur/io -ionis* (L zool. *Acipenser sturio*). Mallongigo de la A(F) formo, eble inspirita de la scienca L. Por *g* kiel reprezentanto de A *g* [ĝ]/F *g* [ĵ], vd. *stranga.* Ĉe Szerdahelyi 1987, 125 listigita kiel kompromisa formo LAF; la L nominativo povis esti utiligata por fari malpli longan formon kun *o* kiel Ea substantivsigno (kp sub *homo*). ¶ Io = (espismo), Ie *stur,* Ia *sturion.*

Vorto de ĝerm. origino (kp G ant. *sturio*) kun necerta etimologio. – Samfamilia vorto en Eo: *sterledo.*

STURN/O (f; RE): L *sturnus;* F *étourneau* [-ur-], I *storno,* (H *estornino*). Por la konsonantismo kp ank. A *star,* G *Starling* s.s. Bazita sur L (zoologia termino). ¶ IoIa =, Ie *sturne.*

La latin(id)a vorto estas prapar. al la ĝerm. formoj cititaj supre k eble al Gr *psar* s.s.

SUB (f; Un): L *sub;* F *sous* [su], I *sotto,* (H *so*). Kp P *sob.* Prenita el L kiel la plej multaj prepozicioj. La L formo funkcias prefikse en pluraj fontlingvoj, kp ekz. A *submarine* "submara", *submit* "submeti", *subway* "subfervojo"; F *subconscient* "subkonscia", *subdivision* "subdividaĵo", *submerger* "submergi, subakvigi"; I *subacqueo* "subakva", *subordinare* "subordigi"; (H *subscribir* "subskribi", *subyugar* "subjugigi"); kp G fremdvortojn kiel *Subkontinent, subtropisch.* ¶ 1881 *su.* ¶ IoIeIa *sub.*

L *sub* estas prep. k pref. (por variantoj, vd. la ps-pf *sub-*), sendube par. al Gr *hypó* s.s. (vd. ps-pf *hipo-*), Sa *úpara-* "malsupra"; kun la senco "de sube supren": Gt *uf,* A *up,* G *auf.* – HE bazo **upo* (komenca *s-* troviĝas nur en italikaj lingvoj; kp la analogan okazon ĉe *super*). Kp *sutano.*

SUBIT/A (f; Un): F *subit,* I *-aneo,* (H *súbito*); L *subitus.* Kp A *sudden,* F *soudain.* Ps-pf *sub -.* ¶ Io =, Ie *subit,* Ia *-e.*

La AI formoj k F *soudain* el L *subitaneus,* der. de L *subitus,* propr. "kiu venas kaŝe", de L *subire* "ŝteliri", kunm. de *sub* "sub" (vd. la ps-pf *sub-;* kp la semantikan nuancon en Eo *subaŭskulti* ktp) k *ire* "iri" (vd. tiun).

SUBJEKT/O (f; RE) 1) gram. 2) fil. (PV): A *subject,* F *sujet,* (H *-o*), G *Subjekt,* I *soggetto* (ĉiuj 1, 2); Po *subiekt,* R *sub'ekt* (2). Videble bazita sur AG; por la formo gravas ankaŭ la L fontvorto (vd. sube). Ps-pf *sub -.* ¶ Io =, Ie *subject/e,* Ia *-e* (1, 2).

El L *subiectum* s.s., propr. "(io) submetita" (> "bazo" > "ĉefa objekto aŭ persono" en gramatiko, "aktiva elemento" en filozofio), ptc.perf. de *subicere* "submeti", kunm. de *sub-* "sub-" (vd. tiun ps-pf) k *iacere* "ĵeti, meti" (vd. *ĵeti*). Kp spec. la sekvan kaj, por la dua elemento, *ob-, pro/jekto.*

SUBJEKTIV/A (2; LInt 1/1899, Jü): A *subject/ive,* F *-if,* G *subjektiv,* R *-nyj,* I *soggettivo,* Po *subiektywny,* (H *subjetivo*). Ps-pf *sub -;* ps-sf *-iv.* ¶ Io *subjekt-ala,* Ie *subjectiv,* Ia *-e.*

El L mez. *subiectivus* "apartenanta al la subjekto", der. de *subiectum* "subjekto" (vd. tiun).

SUBJUNKTIV/O (2; Jü): L *subiunctivus (modus);* A *subjunctive,* F *subjonctif, (G Subjunktiv),* I *soggiuntivo,* (H *subjuntivo*). Gra-

matika termino bazita sur L. Ps-pf *sub* -; ps-sf *-iv*. ¶ Io *subjuntivo,* Ie *subjunctiv/e,* Ia *-o.*

Propr. "kunliga (modo)", adj. de L *subiungere* "aneksi, kunligi", kunm. de *sub* – "sub; tuj post" (vd. tiun ps-pf) k *iungere* "kun(l)igi" (vd. *jungi*).

SUBLIMAT/O (f; RE): A *sublim/ate,* F *-é,* I *-ato,* Po *-at,* (H *-ado*), G *Sublimat,* R *sulema.* Ps-pf *sub* -; ps-sf *-at.*

Propr. "(io) sublimita", subst.-igita ptc.perf. de L *sublimare* "levi" (en L mod. kiel kemia termino "purigi, rafini, vaporigi" [adoptita kiel eo *sublim/i* Ve]), faktitiva verbo de L *sublimis* "alt(igit)a, nobla, enaera" (adoptita kiel eo *sublim/a* PV), kredeble adj.-igo de *sub limen* "supren for de la sojlo" (vd. *sub* k ps-pf *sub-*; *limen* "sojlo" estas kunligenda kun *limus* "transversa" [sk. trabo], vd. *oblikva*).

SUBSTANC/O (2; Be; kp *substanci-* L Int 6-7/1898): AF *subst/ance,* Po *-ancja,* G *Substanz,* I *sostanza,* (H *sustancia*). Ps-pf *sub* -; ps-sf *--anc.*

El L *substantia* "ekzisto, esenco, fundamento", subst. de *subst/ans -antis* "ekzistanta", ptc.prez. de *substare* "esti bazo (de io), subesti", kunm. de *sub-* "sub-" (vd. tiun ps-pf) k *stare* "stari, ekzisti". Kp spec. *distanco, substantivo.*

SUBSTANTIV/O (f; RE): L *substantivum (nomen)*; A *substant/ive,* F *-if,* G *Substantiv,* I *sostantivo,* (H *sustantivo*). Ps-pf *sub* -; ps-sf *-iv.*

Propr. "memstara, fundamenta, esenca (nomo)", adj. de L *substantia* "esenco, fundamento" (vd. la antaŭan).

SUBTIL/A (1; Jü): L *subtilis*; A *subtle, subtile,* FG *subtil,* I *sottile,* Po *subtelny,* (H *sutil*). Bazita sur L, kun kiu akordas FG. (Ps-pf *sub* -). ¶ Io =, IeIa *subtil.*

Orig. teksista termino: "fajna" (pp fadeno) el L *sub* "sub" (vd. ps-pf *sub-*) k *tela* "teksaĵo" (< **texla,* kp *texere* "teksi", vd. tiun), kp *subtemen* "vefto".

SUBTRAH/I (8; Jü): A *subtract,* F *soustraire,* G *subtrahieren,* I *sottrarre,* (H *substra* krom tiu ĉi nur *mirh/o* kaj *ŝah/o* en la oficiala radikaro; kp eo *kontrah/i* [med.] PIV). Ps-pf *sub* -. ¶ Io *sustracionar* (el la responda subst., kp F *soustraction* "-o"); Ie *sub/traer,* Ia *-traher.*

El L *subtrahere* "fortiri, retiri" (mat. senco ekde 6a jc), kunm. de *sub-* "sub-; for (de sube)" (vd. ps-pf *sub-*) k *trahere* (sup.rad.: *tract-*) "tiri" (vd. *trakti*).

SUBVENCI/O (4; Jü): AF *subvention,* G *Subvention,* I *sovvenzione,* Po *subwencja,* (H *subvención*). Ps.pf *sub* -; ps-sf *-cio.*

El L *subvent/io -ionis* "helpo, asisto", subst. de *subvenire* "helpi, asisti", propr. "veni sube" (> "veni apoge" > "helpi"), kunm. de *sub-* "sub-" (vd. tiun ps-pf) k *venire* "veni" (vd. tiun).

SUĈ/I (f; Un): A *suck,* F *sucer,* G *saugen,* I *succiare* [-ĉ-], R *sosat',* Po *ssać*; L *sugere* (sup.rad.: *suct-*). Kp H *succión* "-ado". La konsonantismo laŭ I prononco; kp *c* ankaŭ en AFPo. ¶ 1894 *suc-*. ¶ Io *sugar,* Ie *sucar,* Ia *suger* (kp *suction* "-ado").

Komuna eŭropa vorto (pĜ **sugan,* pSl **sŭsati*) de HE rad. **suk-/sug-,* kp A *soak* "trempi", L *sucus* "suko", Sa *sûrâ* "brando". Samfamilia vorto en Eo: *suko*; kp ank. *supo.*

SUD/O (f; RE): A *south,* FI(H) *sud,* G *Süden.* Ŝajnas bazita sur la romana formo; tamen ankaŭ G povus rezultigi la saman formon (kp G *ü* > Eo *u* en *frua, ŝuti*). Ĉiuokaze, *nord-* kaj *sud-* formas ĝermandevenan paron (Collinson 1959, 4) kontraste kun *okcidento* kaj *oriento.* ¶ Io =, IeIa *sud.*

El pĜ **suntha-* (*-n-* en ekz. G ant *sundan* "-o", Da *sønder* "-a"), eble (se la orig. signifo estis "suna flanko") par. al la ĝerm. vortoj cititaj sub *suno.*

SUDAN/O (8; Mondmapo): AGIPoR (H) *Sudan,* F *Soudan* [-u-]. ¶ IoIeIa *Sudan.*

El Ar *bilâd-as-sûdân* "la lando de la nigruloj": *sûdân* plur. de *aswad* "nigr/a, -ulo" (rad. *aswadda* "esti nigra"). – Albault 1991, 84.

SUFER/I (f; Un): A *suffer,* F *souffrir,* I *soffrire,* (H *sufrir*); L *sufferre.* La formo

indikas L kaj A kiel fontlingvojn; kp la analogan *ofer/i*. Ps-pf *sub -*, var. *su-*. ¶ 1894 *sufr-*. ¶ Io *sufrar,* IeIa *suffrer.*

Propr. "(sub)porti" (> "toleri" > "suferi"), kunm. de L *sub-* "sub-" (vd. tiun ps-pf) k *ferre* "porti" (vd. *oferi*).

SUFIĈ/A (f; Un): A *sufficient* [-ŝ-], F *suffisant,* I *sufficiente* [-ĉ-], (H *suficiente);* L *suffici/ens -entis.* Adjektiva radiko kun apokopo de la participeca sufikso troviĝanta en la fontlingvoj (origine la vorto estas ptc.prez. de L *sufficere* resp. A *suffice,* F *suffire* "-i"). Radikfina konsonanto laŭ I. – Ps-pf *sub -*, var. *su-*. ¶ (1882 adv. *satt/e* "-e" [< L *satis*].) 1894 *sufic-*. ¶ Io *suficar* "-i", *sat* "-e"; Ie *suficer* "-i", *sat* "-e"; Ia *sufficer* "-i", *satis* "-e". Por "-a" oni uzas la ptc.prez. de la verbo.

L *sufficere* (>FA) signifas origine "anstataŭi, esti metata sub (ion) por anstataŭi (ĝin)", kunm. de *sub-* "sub-" (vd. tiun ps-pf) k *facere* "fari" (en kunmetoj ank. "meti", kio estas la orig. signifo), vd. tiun.

SUFIKS/O (f, 7; Du, Jü): A *suffix,* F *-e,* G *Suffix,* I *suffisso,* Po *sufiks,* R *suffiks,* (H *sufijo*). Ps-pf *sub -*, var. *su-*.

El L *suffixum* "(io) postmetita", subst.-igita ptc.perf. de *suffigere* "postmeti, postfiksi", kunm. de *sub-* "tuj post" (vd. ps-pf *sub-*) k *figere* "fiksi" (vd. tiun, kp spec. *a-, pre/fikso*).

SUFLOR/O (1; Jü): F *souffleur* [suf-], G *Souffleur* [suf-], Po *sufler,* R *suflër.* Franca vorto, kies malfacile asimilebla agantsufikso *-eur* [-ö´r] alprenis la formon *-or* same kiel en *ŝofor/o, tajlor/o.* Ps-pf *sub -*, var. *su-*; ps-sf *-or.* ¶ Io *sufl-ero, -isto*; Ie *suffl-ero*; Ia *sufflator* (la responda verbo Io *suflar,* IeIa *sufflar* signifas kaj "blovi" kaj "suflori").

Propr. "subdiranto", agantnomo de F *souffler* "blovi", ank. "subdiri, flustri", el L *sufflare* "plenblovi", kunm. de *sub-* "sub-; (de malsupre) supren" (vd. tiun ps-pf) k *flare* "blovi" (vd. s.t.v.).

SUFOK/I (f; RE): A *suffocate,* F *suffoquer* [-k-], I *soffocare,* (H *sufocar*); L *suffocare.* Ps-pf *sub -*, var. *su-*.

L *suffocare* propr. "meti siajn manojn sub la gorĝon (de iu)" el *sub-* "sub-" (vd. tiun ps-pf) k *fauces* "gorĝo, faŭko" (vd. tiun).

SUGESTI/O (3; Jü; kp *--i* Wü) (1) med.: AF *suggest/ion,* I *--ione,* G *Suggestion,* Po *sugestia,* (H *sugestión*). Ps-pf *sub -*, var. *su-*; ps-sf *-tio,* var. de *-cio.* (2) Z uzis *sugesti-* (ankaŭ) en la senco "subinspiro, subpropono, subkonsilo" (vd. PV, PIV s.v. 2) laŭ la cititaj subst. AFI, kp ank. la verbojn A *suggest,* Po *sugerowac´*; por tiu senco enuziĝis (verba) radiko eo *sugest/i* Kabe, Wü, PV. ¶ Io *sugesto,* IeIa *suggestion*; verbo: Io *sugestar,* Ie, Ia *suggerer* (ĉiuj en ambaŭ sencoj).

El L postkl. *suggest/io -ionis* "sugesto", subst. de *suggerere* (sup.rad.: *suggest-*) "sugesti, konsili", orig. "submeti, subkonduki", kunm. de *sub-* "sub-" (vd. tiun ps-pf) k *gerere* "porti, konduki" (vd. *gesto*).

SUK/O (f; Un): L *suc(c)us*; F *suc,* I *succo,* PoR *sok,* (H *jugo,* kp P *suco*). Kp A *succulent* "-a". Bazita sur LFI. ¶ Io =, Ie *succ,* Ia *-o.*

L *sucus* (>FHIP) estas samradika kun *sugere* "suĉi", vd. tiun. RPo *sok* akordas kun Gr *opós* "plantsuko" (vd. *opio*); ilia rilato al la L vorto estas neklara.

SUKCEN/O (f; RE): F *succin* [-ê], I(H) *-o*; L *suc(c)inum.* Pri *-kc-* kiel redono de fontlingva *-cc-*, vd. *akceli.* Vokalŝanĝo *i* > *e* (kun apogo de F prononco) por eviti sufiksidentan radikfinon, vd. *abomeni.* ¶ 1894 *sukcin-*. ¶ Io *sucino,* Ia *succino*; Ie *ambre* (< A *amber*).

L *sucinum* estas sendube pruntvorto de norda Eŭropo, kp Li *sâkas* "rezino"; la komencon kredeble influis L *sucus* "suko".

SUKCES/o (f; RE): A *success,* I *-o,* F *succès,* Po *sukces,* (H *suceso*). Prezentita kiel verbo en UV, sed etimologie bazita sur substantivo (nur A havas respondan verbon: *succeed*). Pri Eo *-kc-*, vd. *akceli*; tie ĉi kun apogo de Po. Eo *-s* nevoĉa el fontlingva *-ss-*. Ps-pf *sub -*, var. *suk-*. ¶ Io *suces/o* (*-ar* "-i"), Ie *success/e* (*-ar* "-i"), Ia

successo (*succeder* "-i").

El L *successus* "(prospera) okazado", orig. "sinsekvo de okazaĵoj", subst. de *succedere* "postsekvi", kunm. de *sub-* "sub-; post-" (vd. tiun ps-pf) k *cedere* "iri, procedi" (vd. *cedi*; kp spec. *abs-, eks-, pro/ceso*).

SUKER/O (f; Un; kp *sukr-* N-ro 15 1888, *zukr-* Eisto 4/1890): A *sugar,* F *sucre,* G *Zucker,* I *zucchero* [-k-], Po *cukier,* R *sahar,* (H *azúcar*); L *saccharum* [-k-]. Radikformo ne facile prijuĝebla: ĉu bazita sur G (kp *cifer/o, kelner/o, somer/o, teler/o*) plus I kun modifo *z* > *s* laŭ la plimulto? ¶ 1894, 1906ab *sukr-*. ¶ Io *sukro,* Ie *sucre,* Ia *sucro, saccharo.*

Pere de Ar *sukkar* s.s., Pe *ŝakar* s.s. el Sa *cárkarâ* s.s., orig. "gruzo". La LR formoj el Gr *sákkharon* "sukero" el la sama fonto. – Cherpillod 1992, 99.

SULFUR/O (f; RE; var. *sulf/o* Ve): L *sulfur, sulp(h)ur;* A *sulphur,* F *soufre* (kp *sulphurique* "-a"), I *zolfo* (kp *sulfureo* "-a"), (H *azufre,* kp *sulfúrico* "-a"). Konata ankaŭ en la aliaj fontlingvoj per kemiaj terminoj kiel G *Sulfat*/R *sul'fat,* kp eo *sulfat/o* Ve. – Kemia termino prenita el L, apogata de A kaj apartenantaj adjektivoj en FI. ¶ Io *sulfo,* Ie *súlfur,* Ia *sulfure.*

Necerta etimologio; kunligo kun Gt *swibls,* G *Schwefel* s.s. estas duba.

SULK/O (f; RE): L *sulcus;* I *solco,* (H *surco*). Kp P *sulco.* Bazita sur L. ¶ Io =, Ie *sulc/a,* Ia *-o.*

Par. al Gr *hólkos* "tiro" (do orig. "spuro, kiun la plugilo tirata postlasas"), kp *hélkein* "tiri" (HE rad. **selk-*).

SULTAN/O (1; RE): AFR(H) *sultan,* I *-o,* G *Sultan,* Po *sul'tan.*

Pere de Tu *sultan* el Ar *sult'ân* "reganto", orig. "regado", de Aramea rad. *salat'* "regi". – Cherpillod 1992, 99.

SUM/O (f; RE): L *summa;* A *sum,* F *somme,* G *Summe,* I *somma,* Po(H) *suma,* R *summa.* Vokalismo laŭ la plimulto. ¶ Io =, IeIa *summa.*

Orig. **sup-mos,* propr. "la plej alta [sk. kalkulo]", superlativo de L *superus* "supra" (vd. tiun).

SUN/O (f; Un): A *sun* [sa'n], G *Sonne.* Waringhien (1967, 48) rigardas, sen sufiĉa motivo, *sun-* kiel miksformon inter A kaj G; pli ĝuste estus diri ke ĝi estas bazita sur A ortografio (Szerdahelyi 1987, 124) kun konsonanta apogo de G (kp *-n-* ankaŭ en Po *sl'on'ce,* R *solnce*). Kp *funelo, rusto* kun la sama prononco de la A vokalo. La kaŭzo por alpreno de la ĝermana radiko estas la plursignifeco de la L radikformo *sol* (*sol* "suno", *solus* "sola", *solum* "grundo"). ¶ 1881 *s'emm-* (< He *ŝemeŝ*). – 1894 *solel-* (< F *soleil*). ¶ Io =, Ia *sol,* Ie *-e.*

Ĝerm. vorto (kp Nd *zon,* Gt *sunnô* : pĜ * *sunnôn*). Por HE oni supozas duoblan bazon **sŭel-/sŭen-*, kp Sa *sû'ra-*, Gr *hê'lios* (kp *heliotropo*), L *sol* (> F *soleil,* H *sol,* I *sole*), Li *sáule,* Sk *sol;* la RPo formoj el pSl **sŭln'ce.* – Samfamilia vorto en Eo: *sudo.*

SUP/O (f; Un): A *soup* [-u-], F *soupe* [-u-], G *Suppe,* I *zuppa,* Po *zupa,* R *sup,* (H *sopa*). Laŭ prononco, la Ea radikformo akordas kun AFR. ¶ Io =, Ie *sup,* Ia *suppa.*

Ĝerm. vorto, ligita kun G *saufen* "drinki", A *sip* "trinketi" (pĜ **sûpan*), kp Sa *sû'pa-* "supo": de HE **seup-,* kredeble paralela al la radiko citita sub *suĉi.*

SUPER (f; Un): L *super;* F *sur* (ank. "sur"), I *sopra* (ank. "sur"), (H *sobre,* ank. "sur"). Kp L *super/ior* "-a, supra", A *-ior* "-a", I *-iore* "-a, supra", (H *-ior* "-a, supra"), F *supérieur* "-a, supra"; ank. I *super/are* (H *-ar*) "-i". Konata kiel prefikso (plej ofte kun figura senco) en la plimulto de fontlingvoj, ekz. A *super/fluous,* F *-flu,* I *-fluo* "-flua"; A *super/sonic,* F *-sonique,* I *-sonico* "-sona"; A *superman* "-homo"; F *superposer* "-meti"; G *superfein* "-fajna, delikatega". – Kiel la plej multaj prepozicioj (vd. Gregor 1982, 11) prenita el L. ¶ 1881 *pra* (Mattos 1987, 42: el la finsilabo de L *supra* "supre de"; "ĝia unua silabo estis jam okupita por la

prepozicio *su*"). Kp 1881 *sobr/é* "super/ as" (laŭ PVZ 5, 146 el I *sopraffare* "venki, superi"; kp Albault 1961, 90). ¶ IoIa =, Ie *súper.*

L *super* prep. k pref. (kp tiun ps-pf) estas identa kun Gr *hypér* "super" (kp *hipertrofio*), kp Sa *upári* "super"; Gt *ufar,* A *over,* G *über* "super". HE bazo **upér (s-* nur en italikaj lingvoj; kp la paralelan *sub*). – Etimologie identa kun *sur.* Ceteraj samfamiliaj vortoj en Eo: *soprano, sumo, superlativo, supre.*

SUPERLATIV/O (1; Jü): A *superlat/ive,* F *-if,* I(H) *-ivo,* Po *-yw,* G *Superlativ;* L *superlativus (gradus).* Ps-pf *super-;* ps-sf *-iv.*

Propr. "(grado) levita super (la ceterajn)", kvazaŭa der. de L *superferre* (sup. rad.: *superlat-*) "super/levi, -meti, -porti": pri *super-,* vd. la antaŭan; pri la elemento *-lat-,* vd. sub *oferi.* Kp spec. *relativa.*

SUPERSTIĈ/O (f; RE): AF *supersti/tion,* I *-zione,* (H *-ción*); L *superstit/io -ionis.* La latin(id)a sufikso *-(t)ion* tie ĉi alprenis la formon *ĉ* pro nekonata kialo. Eble *kondiĉ/o* estis la modelo, sed ĉe tiu vorto troviĝis almenaŭ skribo *condicio* en L. Tie ĉi la procedo estas duobla: sufiksmallongigo kaj cirkumfleksigo. Neniu el la fontlingvoj prezentas la Ean prononcon: A [-ŝ-], F [-sj-], I [-tsi-], L [-ti- aŭ -tsi-]. Validas tamen tie ĉi kio estas dirita sub *kondiĉo,* nome ke (ankaŭ) tiu ĉi substantivo ne estas agonomo kiel la plimulto de vortoj formitaj per la koncerna sufikso. Kp la formojn de IoIe. Ps-pf *super-;* ps-sf *-cio,* var. *-ĉ.* ¶ 1894 *superstizi-.* ¶ Io *super/stico,* Ie *-stitie,* Ia *-stition.*

Subst. de L *superstare* (sup.rad.: *superstit-*) "stari super/sur" (vd. *super* resp. *stari*). La semantika evoluo estas neklara.

SUPLEMENT/O (8; Backman 1919, Bennemann, PV): A *supplement,* I *-o,* F *supplément,* G *Supplement,* (H *suplemento*). Ps-pf *sub -,* var. *su-;* ps-sf *-ment.*

El L *supplementum* "kompletigaĵo, anstataŭaĵo", subst. de *supplere* "kompletigi, replenigi", kunm. de *sub-* "anstataŭe" (vd. ps-pf *sub-*) k *-plere* (nur en kunm.) "plenigi" (vd. *plena;* kp spec. *komplemento*).

SUPOZ/I (f; RE): A *sup/pose* [-z], F *-poser* [-z-], I *-porre* (kp *supposizione* [-z-] "-o"), (H *suponer,* kp *suposición* "-o"). Formo laŭ la prononco de AF (verboj) kaj I (substantivo); *poz-* akordas kun *pozici-* kaj ties kunmetoj (vd. tiun). La L originformo de la radiko (vd. sube) ne ludas grandan rolon ĉi tie, ĉar la de Eo adoptita signifo troviĝas nur en la modernaj fontlingvoj. – Ps-pf *sub -,* var. *su-.* ¶ Io *supozar,* Ie *suposir,* Ia *supponer.*

El L *supponere* "submeti" (> "meti [ion] kiel bazon de hipotezo" > "hipotezi" > "supozi"). Kp semantike *hipotezo.*

SUPR/E (f; Un): L *supra;* I *sopra.* La apartenanta adj. *supr/a* (loka signifo) povas esti identa kun la L fontvorto (*-a* fariĝanta Ea adjektivsigno); krome ĝi altgrade similas al sia L respondaĵo *super/us, -a* (neakcentata *e*!). Por la metafora signifo Z uzis *super/a,* kiu kompreneble deriviĝas de *super* sed samtempe memorigas pri L *superior* (akcentata *e*!) "sup(e)ra" kaj ties latinidaj formoj; vd. sub *super.* ¶ (1906a *sor* "supren", kredeble el A *sore* "supreniri".) ¶ Io =; IeIa *supra* "-e", Ia *super/ior,* Ie *-iori* "-a".

L *superior* estas komparativo de *superus* "supra" (de kiu L *supra* "supre; super, supre de" estas kazformo), der. de *super* "super" (vd. tiun).

SUR (f; Un): F *sur,* I *su;* (L *super*). Prenita el F; la formo kontrastas kun sed tamen aludas pri *super (sur* 'supre de, kun kontakto'; *super* 'supre de, sen kontakto'). ¶ 1881 *ba* (sen etimologio: PVZ 5, 132). ¶ IoIe =, Ia *super, sur.*

El L *super* (vd. *super,* etimologie identan).

SURD/A (f; Un): L *surdus;* F *sourd* [-u-] (kp *surdité* "-eco"), I(H) *sordo.* Kp P *surdo.* ¶ Io =, Ie *surd,* Ia *-e.*

L vorto kun necerta etimologio. Samfamilia vorto en Eo: *absurda.*

SURFAC/O (8; Kabe, PV; antaŭe *supr/*

aĵ/o UV): AF *surface,* I(H) *superficie;* L *superficies.* Transpreno de la AF formo, pli mallonga (kp tamen A *superfici/al,* F *-el* "-a"). Ps-pf *super-,* var. *sur-.* ¶ Io =, Iela *superficie.*

F kunmeto de *sur* "sur" k *face* "vizaĝo, (antaŭ)flanko" laŭ modelo de L *superficies,* kunm. de *super* "sur" k *facies* "vizaĝo, ekstero" (orig. signifo do "sureksteraĵo"). Vd. *super* k *faco.*

SURPRIZ/o (f; RE): AF *surprise* [-z], I (H) *sorpresa,* Po †*siurpriza* (UV), R *sjurpriz.* Verbo: A *surprise,* F *surprendre,* I *sorprend/ere,* (H *-er*). Bazita sur la F substantiva radiko, kiu respeguliĝas en AR. Eo *z* estas normala en intervokala pozicio, tie ĉi krome apogata de AFR. Ps-pf *super-,* var. *sur-.* ¶ 1894 *surpris-.* ¶ Io =, Ie *surpris/e,* Ia *-a.* Verbo: Io *sur/prizar,* Ie *-prisar,* Ia *-prender.*

Subst.-igita ptc.perf. de F *surprendre* "-i" el L mez. *superprehendere,* propr. "surprize kapti", kunm. de *super* "super" (kp la semantikan nuancon en L *supervenire* "veni surprize" k G *überraschen* "surprizi" [*über* "super"]) k *prehendere* "preni" (vd. *super* resp. *preni*).

SURTUT/O (f; Un): F *surtout* [syrtú], Po *surdut,* R *sjur/tuk* (ank. *-tut,* vd. Szerdahelyi 1987, 118), (H *sobretodo*). Ĉefe bazita sur F ortografio, tamen kun la kutima redono de *ou* kiel *u* (kp PoR). Historia vorto, kiu ekzistis kiel pruntvorto el F ankaŭ en AG. Ps-pf *super-,* var. *sur-.* ¶ Io =, Ie *surtute,* Ia *surtout.*

Propr. "su(pe)r ĉio" ("komprenebla kiel: io sur la tuto, vesto super la aliaj", Albault en Fund., p.339): F *sur* "su(pe)r" (vd. *sur*) k *tout* "ĉio" (vd. *tuta*).

SUSPEKT/I (f; RE): A *suspect,* F *-er,* I *sospettare,* (H *sospechar*); L *suspectare.* Radikformo komuna al AFL. Ps-pf *sub -,* var. *su-.* ¶ Io *suspektar,* Ie *suspect/er,* Ia *-ar.*

Intensa verbo de L *suspicere* (sup.rad.: *suspect-*) "suspekti", propr. "oblikve (de malsupre) rigardi [iun]", kunm. de *sub-* "de malsupre supren" (vd. la ps-pf *sub-*) k *specere* "rigardi" (vd. *spektaklo*).

SUSUR/I (6; ER): L *susurrare;* (H *susurrar*). Kp F *susurrer,* I *sussurrare* "flustri". ¶ Io *susurar,* Iela *susurrar.*

L *susurrare* "susuri, zumi, sibli, flustri" estas duobligita formo de onomatopea origino (HE **sŭer-,* kp Sa *svárati* "sonas", G *surren* "zumi"). Kp ev. *soriko, svarmi.*

SUTAN/O (1; Jü): F *soutane* [su-], G *Sutane,* I *sottana,* Po *sutanna,* R *sutana.* Ps-sf *-an.* ¶ Io =, Ie *sutane,* Ia *sottana.*

Orig. "subvesto", der. de I *sotto* "sub" el L *subtus* "sube" de *sub* "sub", vd. tiun.

SVARM/I (1; Jü): A *swarm,* G *schwärmen;* kp Sv *svärma.* Subst.: A *swarm,* G *Schwarm;* kp Sv *svärm.* A *sw-* [sŭ-] respondas al G *schw-* [ŝv-] ankaŭ en *sved/o, sving/i.* Tiu ĉi tipo estas rigardebla kiel miksaĵo de AG (A *s-,* G *-v-,* komuna vokalo kaj radikfino); kp *ŝvel/i, ŝvit/i.* ¶ Io *formik-umar* "-i", *esamo* "(abel)svarmo" (< F *essaim,* I *sciame,* L *examen*); Ie *turbul* "-o", *-ar* "-i" (< L *turbula* "areto"); Ia *formic/ar* (< L *-are*), *pullul/ar* (< A *-ate,* F *-er*) "-i", *essame* "(abel)svarmo".

Ĝerm. vorto, el pĜ **svarma-* "abelsvarmo", orig. onomatopea, kredeble par. al la vortoj cititaj sub *susuri.*

SVAT/I (f; RE): Po *swatac'* [sv-], R *svatat'.* Formo identa kun la prononco de la PoR radiko. Pri la diversaj sencoj ('proponi iun/sin kiel edz[in]on al iu') kaj frazkonstruoj de la Ea verbo, vd. Butin en Eo-Post 2/1954, p. 26. ¶ 1882 *s'ann/o* "svatiĝo" (sen etimologio: PVZ 5, 147). – 1894 *sposopropon-* (kp *spos-* 'edz-'). ¶ La ceteraj L.I. malhavas specialan vorton por tiu nocio; kp Io *propozar mariajo* 'proponi geedziĝon', Ie *demandar quam sposo/sposa* 'peti [iun] kiel edz(in)on', Ia *peter/demandar in maritage* 'peti [iun] por geedziĝo'.

Verbo der. de R *svat*/Po *swat* "svatisto; boparenco" kun orig. signifo "familiano" de HE bazo **sŭe-* "sia" (vd. tiun). – Alia etimologio ĉe Butin: el He *ŝadâĥ* "persvadi",

kp G *Schadchen* "juda svatisto".

SVED/O (8; N-ro 24 1889, Be): A *Swede* [sŭ-], F *Suédois* [sŭ-], G *Schwede* [ŝv-], I *svedese* [zv-], Po *Szwed* [ŝv-], R *ŝved,* (H *Sueco* [sŭ-]). Kredeble bazita sur la komuna radiko AFI. ¶ IeIa =, Io *Suedo.*

La bazo de la stemo *sved-* devenas de pranorda gentonomo *Sveoj* (kp Albault 1991b, 85): Sv *svear,* L (Tacito) *Suiones;* kp *Sverige* "Svedio" < *Svea rike,* propr. "la regno de la sveoj". La dentalo dependas de malĝusta divido de la Norena nomo de la lando: *Svi/thjod,* propr. "sve-popolo". Ĝenerale la radiko estas rilatigata al la HE refleksiva pronombazo **sŭe-* "sia" (vd. tiun; la orig. signifo do estus "la siaj, la propraj").

SVEN/I (f; RE): I *svenire.* Kp A *swoon* s.s. Bazita sur I; ni ne scias, ĉu Z konsideris la similan konsonantismon de la A vorto kiel gravan apogon, nek ĉu li atentis F *s' evanouir* (refl.) s.s. – I estas donita kiel la sola fonto en Gregor (1982, 28), dum Yamasaki citas IAF kaj Bastien krome L *evanescere* "malaperi, forvaporiĝi", HP *desvanecerse* (refl.) s.s. ¶ Io *esvanar* (vd. sube); Ie *evanescer,* Ia *perder conscientia.*

I *svenire* propr. "el-, for/veni": pref. *s-* el L *ex* "el" (vd. tiun); *venire* el L *venire* "veni" (vd. tiun). [A de necerta orig.; F *évanouir* el F ant. *esvanir* (kp Io!), modifo de L *evanescere;* la bazvorto estas L *vanus,* vd. *vana.*]

SVING/I (f; RE): A *swing* [sŭ-], G *schwingen* [ŝv-]. Kp Sv *svinga* [sv-]. Bazita sur AG (pri la komenca *sv-,* vd. sub *svarmi*). ¶ 1894 *brand-* (< A *brand/ish,* F *-ir*). ¶ Io *brand/isar,* Ie *-isser,* Ia *-ir.*

Ĝerm. vorto (pĜ **swengan,* kp G *schwenken* "svingi").

Ŝ

ŜAF/O (f; RE): A *sheep* [ŝi:p], G *Schaf* [ŝ-]. Kp Nd *schaap*. Bazita sur G kun vortkomenca apogo de A. ¶ 1894 *breb-* (< F *brebis* "-ino"). ¶ Io *mutono* (< F *mouton*); Ie *agne* (< L *agnus* "-ido"); Ia *ove* (< L *ovis*).

Okcidentĝerm. vorto kun nekonata etimologio.

ŜAH/O (2; Jü): A *shah* [ŝ-], F *schah* [ŝ-], G *Schah* [ŝ-], I *scià* [ŝa], Po *szach* [ŝaĥ], R *ŝaĥ*, (H *sha*). Radikfino *-h* estas tre malofta (vd. *subtrah/i*); tie ĉi laŭ la ortografio de AFG (neprononcata). ¶ Io *"sha"*, IeIa* *shah*.

El Pe *ŝâh* s.s. , mallongigo de Pe ant. *ĥŝây-athiya* "reĝo", kies unua elemento estas par. al Sa *kŝatrám* "regado", *kŝáyati* "regas, ordonas" (HE rad. **kthe-*, kp G *ktásthai* "akiri"). Etimologie identa kun *ĉeko* k *ŝako*. – Cherpillod 1992, 101.

ŜAJN/I (f; Un): G *scheinen* [ŝáj-]. Kp Nd *schijnen* [sĥéj-], Ji *shaynen*. Kp spec. G *Schein* [ŝajn] "-o", *wahrscheinlich* "ver-a". Unuavide bazita sur G prononco. – Kiselman (1992) pritraktis la frapan vokalisman diferencon inter *hejm-/hejt-* unuflanke kaj *fajf-/fajl-/ŝajn-* aliflanke. Ĉe komparado de la respektivaj vortformoj en aliaj ĝermanaj lingvoj (Is, Ji, Nd, Sv; A ant., pĜ) montriĝas, ke la Ji vokalismo (en ties nordorienta formo) akordas kun la Ea: *heym, heytsn : fayfn, fayln, shaynen*. Resume Kiselman eliminas G kiel fontlingvon de tiuj radikoj kaj rigardas jidan fontecon "la plej simpla kaj verŝajna klarigo", kvankam absoluta certeco ne eblas. Antaŭe regis ĝenerala samopinio pri tio, ke Ji ne estas unu ela la fontlingvoj de Eo (kp ekz. Gold 1980, 314: 'Maksimume Ji donas apogon por la Esperantaj vortoj'). Mi kredis esti trovinta alian klarigon de la diferenco, nome la deziron de Z plivastigi la fontlingvan bazon de tiuj vortoj de G al GA. Lia normala procedo en tiaj okazoj estis (vd. Waringhien 1967, 48) kombini G konsonantismon kun A vokalismo (tie ĉi markita per [ ]): *dr[a]ŝ-*, *ŝl[i]m-* (A grafismo), *ŝt[o]n-*. Tio akordas kun la diskutataj vortoj: *f[aj]f-* (el A *pipe* [paip] "fajfi"), *f[aj]l-* (el A *file* [fail]), *ŝ[aj]n-* (kp A *shine* [ŝain] "brili"). La situacio estas alia ĉe *hejm-* (la sama procedo donus **h[o]m-*, evidente neebla formo pro *hom/o)* kaj *hejt-* (mankas responda A verbo). Vera ŝiboleto de la afero devus esti *mejl/o (*G *Meile* [ai], A *mile* [ai]), sed ĝi malkonfirmas ambaŭ klarigojn: Ji montras *mayle* kaj do ne povas esti la fonto de la Ea vorto; kombino AG donus ankaŭ **m[aj]l-*. Tie do laŭeco al la G grafismo ŝajnas esti la sole ebla klarigo. – La kialo por elekto de ĝermana radiko estis laŭ Golden (1985, 407) inspiro de Vp *jinön* [ŝ-] s.s. ¶ 1881 *prej-* (< F *paraître:* PVZ 5, 144; Mattos 1987, 29; kp *aperi*).

– 1894 *sembl-* (< F *sembler*). ¶ IoIeIa *semblar.*

Ĝerm. vorto kun orig. signifo "brili, lumi" (tiel ank. G *scheinen,* kp *schimmern* "brileti", vd. *ŝimi;* semantika evoluo en G: > "aspekti" > "ŝajni"), kp A *shine,* Sv *skina,* Gt *skeinan* "brili", plue Gt *skeirs* "klara" (vd. *ŝiri*), de HE rad. **ski-* "obtuze brileti", kp Sa *châyâ'* "rebrilo, ombro", Gr *skiá* "ombro" (kp *sciuro*), R *sen'* "ombro".

ŜAK/O (f; RE; *-o* Jü, Wü, PV, GD, *-oj* Be, Ka, var. en [Wü]PIV): A *chess* (kp *check!* "ŝak!"), F *échecs* [eŝék], G *Schach* [ŝaĥ], I *scacchi* [skáki], Po *szachy* [ŝáĥ-], R *ŝaĥmaty,* (H *jaque* [ĥáke]) [plur. en FIPoR, orig. signifanta la ŝakfigurojn; kp Waringhien LV 88 pri pluralo en Eo]. Kp Sv *schack* [ŝak]. Ne estas eble montri unu lingvon kiel modelon de la Ea radiko (GRPo laŭ Gregor 1982, 29): *ŝ-* troviĝas en FGPoR, *-a-* en GIPoR, *-k* en FI. Eble estus saĝe rigardi la Ean formon kiel miksaĵon de G kaj I (kp 1894 *skak-*). ¶ Io *shak-ludo* (kp *shako* "-figuro"); Ie *chac;* Ia *chacos* (plur.).

La ludo ricevis sian nomon de la Pe frazo *ŝâh mât* (kp R supre) "la reĝo (ĉefa figuro de la ludo) estas morta", kiu finas la ludpartion. Pri *ŝâh,* vd. *ŝaho,* etimologie identan. – Cherpillod 1992, 101.

ŜAKAL/O (f; EG): A *jackal,* F *chacal* [ŝ-], G *Schakal* [ŝ-], I *sciacallo* [ŝa-], Po *szakal* [ŝ-], R *ŝakal,* (H *chacal*). Eo *ŝ-* laŭ la prononco de la plimulto de fontlingvoj. ¶ 1894 *cakal-*. ¶ Io *shakalo,* Ia *chacal,* Ie *-e.*

Pere de Tu *cakal* el Pe *ŝagâl* el Sa *crgâlá-* s.s. de nekonata origino. – Cherpillod 1992, 101.

ŜAL/O (f; N-ro 14 1888, RE): A *shawl,* F *châle,* G *Schal,* I *sciallo,* Po *szal,* R *ŝal'* (ĉiuj [ŝ-]); (H *chal*). ¶ 1894 *savl-* (< A). ¶ Io *shalo,* Ia *chal,* Ie *-e.*

El Pe *ŝâl* s.s., Hi *ŝâl* s.s., laŭdire (Ibn Battuta) el *Ŝâliât,* nomo de hinda urbo kun teksejoj. – Cherpillod 1992, 101.

ŜALM/O (f; RE): A *shawn* [ŝo:n], F *chalumeau* [ŝalymó], G *Schalmei* [ŝ-], Po *szal'amaja* [ŝ-]. Kp R *solominka.* Bazita sur G kun grava apogo de F (la apokopo – probable farita laŭ la principo de sufiĉo – forigas la problemon de malsamaj sufiksoj en G kaj F). ¶ 1894 *calm-*. ¶ Io *shalmo* (espismo), Ie *chalumel,* Ia *calamello* (vd. sube).

Po < G < F el L *calamellus* "kaneto", dim. de *calamus* "kano" el Gr *kálamos* s.s., kp Sa *kaláma-* "skribkano"; par. al G *Halm* "pajlo", R *soloma* "pajlero" (kp R supre).

ŜALUP/O (2; Jü): A *shallop* [ŝ-], *sloop,* F *chalupe,* G *Schaluppe,* I *scialuppa,* Po *szalupa,* R *ŝljupka* (ĉiuj [ŝ-]); (H *chalupa*). Radikformo respegulanta la prononcon de GIPo. ¶ Io *shalupo,* Ie *chalup,* Ia *-a.*

El Nd *sloep* [slup] s.s., ligita kun Nd *sluipen* "gliti" (pĜ **sleupan,* kp Gt *sliupan* "ŝteliri", A *slip* "gliti"; samradika kun G *schlüpfrig* "glata"); de HE rad. **(s)leub-* "gliti", kp L *lubricus* "glata".

ŜAM/O (f; RE): A *shammy* [ŝä'mi], Po *zamsz,* R *zamŝa,* (H *gamuza*). Kp F *peau de chamois* [ŝamŭá] ('felo de ĉamo'), I *pelle di camoscio* (same); G *sämisches Leder* ('ĉama ledo'); kp la difinon en PV/PIV: 'ledo de ĉamo'. La ideo diferencigi per apartaj vortoj la nociojn *ĉam/o* kaj *ŝam/o* estas inspirita de A kaj la slavaj fontlingvoj. Evidente ambaŭ radikoj estas kreitaj paralele. La diferenco kuŝas en la komenca sono, kp A *ch-* resp. *sh-*. ¶ 1894 *camosk-* (laŭ I). ¶ Io *chamo-felo,* Ie *cute* ('haŭto') *de chamuse,* Ia *pelle de camoce.*

A *shammy* < F *chamois;* vd. plue la etimologie identan *ĉamo.*

ŜANC/O (1; Jü; kp *ĉanc/o* Eisto 3/1889): AF *chance* [A ĉ-, F ŝ-], G *Chance* [ŝ-], Po *szanca* [ŝ-], R *ŝans.* Franca vorto de internacia disvastigiteco; pri F *ch* en tiaj vortoj, vd. Cherpillod 1990, 16 (normale > Eo *ŝ,* speciale kiam R kaj Po prononcas [ŝ]). La radikparto *-anc* laŭ AF GPo (konsiderebla kiel ps-sf, vd. sube). ¶ Io *chanc/o,* IeIa* *-e.*

El L (vulg.) *cadentia* "hazarda rezulto", orig. "(el)falo", subst. de L *cadere* "fali" (vd. *kadenco,* etimologie identan; kp semantike *akcidento*).

ŜANCEL/I (f; Un); F *chanceler* "-iĝi". Bazita ekskluzive sur F kun konsidero parte pri prononco (*ŝ*), parte pri skribo (*c*). Z ŝanĝis la sencon de netransitiva al transitiva, probable laŭ ekzemploj kiel *ruli : ruliĝi, ŝanĝi : ŝanĝiĝi* ktp. ¶ 1894 *cansel-*. ¶ Io *shancelar* "-iĝi", Ie *chancelar* "-iĝi"; Ia *vacillar* "-iĝi" (< L *vacillare*).

El L *cancellare* "provizi per latiso", der. de *cancelli* "latiso, krado, bariero" (vd. *kancelario* k *karcero*). La semantika evoluo estas hipoteza: > "zigzagi" (imitante la krucformon de latiso) > "sanceliĝi tien k reen".

ŜANĜ/I (f; Un): A *change* [ĉeinĝ], F *changer* [ŝâĵé]. Kp I *cambiare,* (H *cambiar*). La radiko aperas kiel miksformo de F (*ŝ*-)kaj A (*-ĝ*); kp la analogan *ŝarĝi.* ¶ 1894 *ali/ig/-.* ¶ Io *chanjar,* Ie *changear,* Ia *cambiar.*

Pere de L vulg. *cambiare* el L postkl. *cambire* "interŝanĝi", komerca termino de gaŭla origino.

ŜANKR/O (1; Jü): AF *chancre* [ŝ-], G *Schanker* [ŝ-], Po *szankier* [ŝ-], R *ŝanker,* (H *chancro*). Formo laŭ AF prononco; rim. ankaŭ la senakcentan *-e-* en GR. ¶ Io *chankro,* Ie *chancre,* Ia **cancere* Ruhrig.

El L *cancer* "ulcero; kancero" (vd. *kankro,* etimologie identan).

ŜARAD/O (1; Jü): AF *char/ade* [ŝ-], (H *-ada*), G *Scharade* [ŝ-], I *sciarada* [ŝa-], Po *szarada* [ŝ-], R *ŝarada.* Ps-sf *-ad.* ¶ Io *sharado,* IeIa *charade.*

El Oc *charrado* "babilado", der. de *charrà* "babili", vorto de onomatopea origino.

ŜARG/I (f; RE): A *charge,* F *charger,* I *carricare,* (H *cargar*). Sendube kreita el *ŝarĝ/i* per sencirkumfleksigo (vd. Wiener 1950, 104). La du nocioj estas en AFI(H) esprimataj per la sama vorto, en GPoR per malsamaj. Z faris kompromison, kreante du minimume malsimilajn radikojn. (Analoga diferenco en *general- : ĝeneral-*.) Laŭ Szerdahelyi (1987, 126), F estas la fonto de ambaŭ (vd. tamen sekv.). Diferencigo okazas ankaŭ en IoIe. ¶ Io *charjar,* Ie *chargear,* Ia *cargar.*

Propr. "ŝarĝi", vd. sekv.

ŜARĜ/I (f; RE): A *charge* [ĉa:ĝ], F *charger* [ŝarĵé], I *caricare,* (H *cargar*). Kp A *cargo* "(ŝip)ŝarĝo" (> eo *karg/o* Wü). La radikformo ŝajnas analoga al *ŝanĝ/i (ŝ-* laŭ F, *-ĝ* laŭ A). La verboj cititaj signifas ankaŭ "ŝargi"; pri la diferencigo en Eo vd. la antaŭan. ¶ 1894 *carg-* "ŝarg-, ŝarĝ-". ¶ Io *kargar,* IeIa *cargar.*

El L vulg. *carricare*, propr. "ŝarĝi veturilon", der. de *carrus* "ĉaro" (vd. tiun).

ŜARK/O (f; EG): A *shark* [ŝ-]. Bazita ekskluzive sur A. ¶ 1894 *rekin-* (< F *requin*). ¶ Io *sharko*; Ie *squal/e,* Ia *-o* (< L zool. *Squalus*).

De nekonata origino.

ŜAT/I (f; RE): G *schätzen* [ŝétse'n]. Kp Ji *shatzn.* Z eliminis la G metafonion (unika ekzemplo de *ä* > *a,* sed kp *ü* > *u* en *flustri, frua, ŝuti*) kaj reduktis *-tz-* al *-t*; la unua el tiuj modifoj estas apogata de Ji (vd. Gold 1980, 315). Pri la sencoj de *ŝati* kaj ĝia rilato al *ami,* vd. Waringhien LV 88. ¶ 1894 *alt/e ten/a.* ¶ Io *prizar* (< A *prize*); Ie *apreciar* (< A *appreciate*); Ia *preciar* (en IeIa ank. *amar*).

G *schätzen* orig. "alte taksi", der. de *Schatz* "trezoro", kp Sv *skatt* s.s., Gt *skatts* "mono" el pĜ **skatta-,* par. al R *skot* "brutaro" (kp semantike L *pecus* "brutaro" : *pecunia* "mono"),

ŜAŬM/O (f; Un): G *Schaum* [ŝ-]. Kp A *scum, spume,* F *écume,* I *schiuma* [skj-], *spuma,* (H *espuma,* P *escuma*). Hezitante inter formoj kun *sk-* kaj *sp-,* Z elektis neniun sed alprenis pure G formon (kiel neŭtralan?). Pri altgermana *au* en Eaj radikoj, vd. Collinson 1959, 4. ¶ 1894 *skum-.* ¶ Io *spumo,* Ie *scum,* Ia *spuma.*

La formoj kun *sk-* (G *Schaum* el G ant. *scûm*) estas orig. ĝermanaj (pĜ **skuma-*), kredeble (se la orig. signifo estis "tegaĵo")

de HE rad. *(s)kû- "kovri, tegi" (vd. *haŭto*). – La formoj kun *sp-* el L *spuma,* samradika kun *pumex* "pumiko", vd. tiun.

ŜEL/O (f; Un): A *shell* [ŝ-], G *Schale,* R *ŝeluŝa.* Kp Ji *sheyln* "senŝeligi". Bazita sur A, ev. kun apogo de R vortkomenco kaj G konsonantismo. Origina signifo (Un) "ŝelo de frukto" k.s., ekde UV ank. "ŝelo de arbo" (inter la fontlingvoj, nur I kaj L ŝajnas kombini tiujn sencojn en unu vorto: I *corteccia,* L *cort/ex -icis;* ili do probable inspiris Z rilate la semantikon). ¶ 1894 *ekorc-* (< F *écorce*). ¶ Io *shelo,* Ie *cruste* (vd. *krusto*), Ia *scalia* (< F *écaille,* I *scaglia* "skvamo"; kp F *écale* "[nukso]ŝelo"). Speciala vorto por "ŝelo de arbo": Io *kortico,* IeIa *cortice.*

Ĝerm. vorto (pĜ **skala-/skalo-,* kp A *scale* "skvamo") de HE rad. **skel-* "(de)tranĉi" (kp Li *skélti* "fendi") kun diversaj plivastigoj: **skel-b* (vd. *skulpti*), **skel-p* (vd. *skalpo*), **skel-tu* (vd. *ŝildo*). Kp ank. *ŝultro..* – (Kun R kp Gr *kélyphos* "ŝelo".)

ŜELK/O (f; RE): Po *szelki* [ŝ-] (plur.). Radikelekto eventuale inspirita de Ji *shelke.* ¶ 1894 *bretel-* (< F *bretelle*). ¶ Io *bretelo;* Ie *porta-pantalon;* Ila *suspensores* (de *suspender* "(al)pendigi").

Po *szelki* plur. de *szelka,* dim. (kp *bulko*) de *szla* "jungorimeno" el G *Siele* s.s., kp G *Seil* "ŝnuro", de HE rad. **s(e)i-* "ligi", ekz. en Sa *syáti* "ligas".

ŜERC/I (f; Un): G *scherzen* [ŝérts-], I *scherzare* [skerts-]. Bazita sur G kun esenca apogo de I. (La I subst. *scherzo* estas internacie konata kiel muzika termino: "muzika verko, kiun karakterizas ŝercemo" [OVE].) ¶ 1881 *bad-* (< F *badiner* "gajeme ŝerci", kp PVZ 5, 132). – 1894 *skerz-* (< I). ¶ Io *jokar,* IeIa *jocar* (< A *joke,* L *iocare*).

Ĝerm. vorto (I el Langobarda **skerzan*) kun orig. signifo "salt(et)i", kp G mez. *scherzen* "ĝoje salti", par. al Gr *skaírein* "salti, danci", R *skoryj* "rapida" k eble al Sa *kûrdati* "saltas" (HE rad. **(s)ker-*).

ŜI (f; Un): A *she* [ŝi:], G *sie* [zi]. Kp Nd *zij.* (Li *ji,* vd. sub *ĝi.*) Konsistas el *-i* (deviga vokalo en personaj pronomoj, vd. *mi*) kaj karakteriza konsonanto el A (vd. Waringhien 1967, 21; Gregor 1982, 11), kio donis formon prononce identan kun tiu de la fontlingvo (kp Eo *ili* : L *illi*). La sama konsonanto troviĝis jam en pEo (*s'o*). [Alie ĉe Mattos 1987, 32: deirpunkto estis G *sie* (kp G *er* > pEo *ro*), sed *s* estis cirkumfleksigita por evito de homonimeco kun la refleksivo.] ¶ 1881 *s'o.* – 1894 *elu* (< F *elle*). ¶ Io *el(u),* Ie *ella,* Ia *illa* (< L *illa*).

Ĝerm. vorto (kp Gt *si,* G ant. *sî* "ŝi") el HE **sî* "tiu ĉi (fem.)" (kp Ir *sî* "ŝi") kun paralela formo *sâ* (Sa *sâ* "tiu ĉi [fem.]", Gr *hê* dif. art. fem.).

ŜILD/O (f; RE): A *shield* [ŝi:ld], G *Schild* [ŝ-]. Kp Nd *schild.* Formo respegulanta la prononcon de AG. ¶ 1894 *skut-* (< L *scutum,* kp F *écu,* I *scudo,* [H *escudo*]). ¶ Io *shildo;* Ie *scude,* Ia *scuto.*

Ĝerm. vorto (kp Sv *sköld,* Gt *skildus.* pĜ **skeldhu-*) kun orig. signifo "detranĉita (ligno)-peco" (unue pri ŝildoj el lignaĵoj kuntenataj per metalaj ringoj), kp Li *skìltis* "tranĉaĵo", plivastigo de HE rad. **skel-* "(de)tranĉi" (vd. *ŝelo*). Kp sekv.

ŜILING/O (1; PL): AF *shilling* [ŝ-], G *Schilling* [ŝ-], I *scellino* [ŝ-], Po *szyling* [ŝ-], R *ŝilling.* Bazita sur (R transskribo de) AG. ¶ Io *shilling-o* Jacob, IeIa *shilling.*

Ĝerm. vorto (kp Gt *skilliggs*) ne certe klarigita; eble el **skildulinga-* "ŝildsimila", traduko de L *clipeolum* "ŝildeto, medaliono"?, kp semantike monernomojn kiel F *écu,* P *escudo* el L *scutum* "ŝildo". – La nomo estis modelo por G *Pfennig,* vd. *pfenigo.*

ŜIM/I (f; RE): G *schimmeln* [ŝ-]. Kp Nd *schimmelen;* Ji *shiml* "-o". Bazita sur G kun eventuala inspiro de Ji. La verbo estas derivita el G subst. *Schimmel* "-o"; la Ea formo montras apokopon de senakcenta *-el* kiel en *kringo, ŝindo.* Laŭ Collinson (1959, 10) la ĝermana vorto estis pli facile adaptebla ol I *muffire,* H adj. *mohoso* kaj F *moisir.* ¶ Io *moldar* (< A *mould*),

Ie *mofar,* Ia *mucer* (< L *mucere*).

G *Schimmel* estis en G mez. ank. adj. "blankeca", par. al G *schimmern* "brileti" k *scheinen* "brili" (vd. *ŝajni*).

ŜIND/O (f; EG): A *shingle* [ŝ-], G *Schindel* [ŝ-], I *scandola.* Kp Ji *shindl.* G estas la ĉefa fonto (apokopo de senakcenta *-el,* vd. *ŝimi*). La formo preskaŭ plene koincidas kun Ji kaj estas diversmaniere apogata de A kaj I. ¶ 1894 *ecandol-* (< F *échandole*). ¶ Io *shindolo,* Ia **scindula;* Ie *latte* (Matejka 1945 s.v. *Schindel;* dube, ĉar *latte* = "lato").

GA el L *scindula,* var. de *scandula* "ŝindo", kp Gr *skhindalmós* s.s. (HE rad. **skei-,* vd. *skismo*).

ŜINK/O (f; RE): G *Schinken* [ŝ-], Po *szynka* [ŝ-]. Kp Sv *skinka* [ŝ-]. Radiko laŭ G kun apokopo de senakcenta *-en* (kiel en *fost/o, groŝ/o*), tie ĉi eventuale inspirita de Po. ¶ 1894 *jambon-* (< F). ¶ Io *shinko;* Ie *jambon,* Ia *gambon.*

Ĝerm. vorto kun orig. signifo "femuro" (kp G *Schenkel* "femuro"; A *shank* "tibio"), apofonia formo de adj. signifanta "oblikva"; de HE rad. **(s)keng-* "lami; oblikva", kp Gr *skázein* "lami", Sa *khán'jati* "lamas".

ŜIP/O (f; Un): A *ship* [ŝ-], G *Schiff* [ŝ-], Kp Nd *schip,* Sv *skepp* [ŝ-]. Bazita sur A kun vortkomenca apogo de G. Collinson (1959, 6)pravas, klasifante la radikon inter pluraj ĝermandevenaj en la marista sfero (kp *balast-, boat-, ferdek-, kil-, mast-, rod-*), sed lia motivigo por ĝuste tiu ĉi estas iom serĉata: 'konata al multaj ne-ĝermanaj popoloj per la diversaj vaporŝipaj kompanioj'. La L ekvivalento *navis* estas akceptita kun alia senco (vd. *navo*). ¶ 1894 *nav-.* ¶ Io *navo,* IeIa *nave.*

Ĝerm. vorto (kp Gt *skip;* pĜ **skipa-*), orig. uzita pri kavigitaj arbotrunkoj, de HE **skei-b* (ekz. en Li *skiêbti* "distranĉi"), plivastigo de rad. **skei-* "(de)tranĉi", vd. *skismo.*

ŜIR/I (f; Un): F *déchirer* [-ŝ-]. Senprefiksigo, evidente por allasi kunmetojn kiel *de/ŝiri, dis/ŝiri;* la aferezo estas nomita "motivita" de Szerdahely (1987, 135). ¶ 1894 *straci-* (< I *stracciare*). ¶ Io *arachar* (< F *arracher*); Ie *raffar* (< G *raffen*); Ia *aveller* (< L *avellere*); por "disŝiri": IoIeIa *lacerar* (< F *lacérer,* IL *lacerare*).

F *-chirer* el Fk **skîran* "forskrapi", orig. "purigi", Kp Gt *skeirs* "klara", G *schier*/A *sheer* "pura", samradika (*ski-*) kun la v ortoj cititaj sub *ŝajni.* – A *shear*/ G *scheren* "tondi" (Yamasaki; Bastien) ne estas parencaj.

ŜIRM/I (f; RE): G *schirmen* [ŝ-], I *schermare.* Kp I *schermo,* R *ŝirma,* ank. Ji *shirem* "-ilo". La radiko fidele redonas la G stemon fonetike sed havas plurlingvan apogon. ¶ 1894 *proteg-* (< L *protegere*). ¶ Io *shirmar* (espismo); Ie *protecter, gardar,* Ia *proteger, guardar.*

G *schirmen* der. de *Schirm* "-ilo" (> RPoJi supre) el pĜ **skerma-* "felo (teganta ŝildon)", par. al Sa *cárma(n)-* "felo", L *corium* "ledo", R *skora* "felo" (HE rad. **(s)ker-* "tranĉi", vd. plue *korko*). Etimologie identa estas *skermi.*

ŜLIM/O (f; RE): A *slime,* G *Schlamm* [ŝ-], Po *szlam* [ŝ-]. Rigardata kiel kompromisa formo kun G konsonantismo kaj A vokalo (Waringhien 1967, 48; kp la ekzemplojn sub *ŝajni*). Tamen tie ĉi la afero estas iom pli komplika, ĉar *ŝ-* ricevas apogon de Po kaj *-lim-* povas aludi la romanan ekvivalenton I *lim/o,* F *-on.* ¶ Io *slamo,* Ie *slamm* (alia kompromisa formo! kp tamen Sv *slam*); Ia *fango* (= I).

G *Schlamm* (> Po) reprezentas eble nazaligitan formon de la radiko videbla en G *schlaff* "malstreĉita" (HE **(s)leb-*); tiuokaze prapar. al Gr *lémphos* "nazmuko". – A *slime* estas identa kun G *Schleim* "muko", par. al L *limus* "ŝlimo" (vd. FI supre) k Gr *límnê* "marĉo" (HE rad. **(s)lei-,* kp *limako*).

ŜLOS/I (f; Un): G *schliessen* [ŝ-] (impf. *schloss,* ptc.perf. *geschlossen*). Kp G *Schloss* "seruro". Laŭ Collinson (1959, 9) la radiko estas prenita el la G subst., 'ĉar ekzistas neniu facile manipulebla formo en la romanaj lingvoj (It. serratura, Sp.[=H] cerradura, F. serrure), kp *rigl*

el G. riegeln'. (Sed Z ja akceptis la cititan vorton sub la formo *serur-* jam en Un!) Pli probable la verba radiko *ŝlos-* estas prenita el la G verbo, kiu prezentas preteritan formon kun *-o-* (iom analoga kazo estas *flugi,* kies vokalo eble baziĝas sur G impf. *flug*). Kp ankaŭ la derivaĵon *Schlüssel* = Eo *ŝlosilo,* kiu povas esti unu el la modelvortoj por la Ea instrumentsufikso. ¶ 1894 *klaud-* (< L *claudere*). ¶ La aliaj L.I. havas specialan vortojn por "ŝlosilo": Io *klefo,* IeIa *clave* (< L *clavis,* F *clef,* H *llave,* I *chiave*). Verbo "ŝlosi": Io *klef-agar;* IeIa *serrar* (vd. sub *seruro*).

Ĝerm. vorto, kp Nd *sluiten* "fermi, ŝlosi", Sv *(till)sluta* "fermi" ; la ĝerm. radiko **sleut-* povas (se oni abstraktas la komencan *s-*) esti identa kun HE **klaud-/klud-,* plivastigo de la rad. **klau-* "fermi" (vd. *konkludi*).

ŜMAC/I (f; RE): A *smack,* G *schmatzen,* Po *cmokac',* R *ĉmokat'.* La sonserio [ŝmats] indikas G originon; la radiko en APoR kontraŭe finiĝas per [k]. Eble Z trovis [ts] pli elvokiva en vorto kiu imitas "bruon de suĉado" (PIV). ¶ 1894 *baci/eg-* (propr. "kis/eg-"). ¶ Io *kis-eg-ar, labio-klakar* ('lip-klaki'); Ie *smaccar;* Ia *basiar/mangiar ruitosemente* Ruhrig ('kisi/manĝi brue').

La ĝerm. verbo signifis orig. "manĝi kun aŭdebla kontento": G *schmatzen* el G mez. *schmackezen* "manĝi kun bruo", verbo intensa de *schmecken* "gustumi" ; eble orig. onomatopea samkiel la slavaj verboj.

ŜMIR/I (f; Un): A *smear* [smíe'], G *schmieren* [ŝmí:r-], Po *smarowac'.* Kp Ji *shmirn.* Bazita sur G prononco kun konsonantisma apogo de A kaj Po; ebla influo de Ji. Collinson (1959, 9) konstatas, ke mankas ekzakta ekvivalento en la romanaj lingvoj.¶ 1894 *unt-* (< I *unto* "ŝmiraĵo"). ¶ Io *indutar* (< F *induire*), Ia *unguer* (< L *unguere*); cetere der. de resp. subst.: Io *uncionar* (kp A *unction*/F *onction* "[sankt]-oleado"); IoIe *unguentar,* kp Io *gras-izar,* Ie *grassar,* Ia *ingrassar* ktp.

Ĝerm. vorto (PoJi < G), kp Nd *smeren,* Da *smøre* s.s., el pĜ **smerwian,* der. de **smerwa-* "ŝmiraĵo, butero" (kp Da *smør* "butero") el HE bazo **(s)mer-* "graso", kp Gr *my'ron* "ungvento", Ir *smi(u)r* "medolo".

ŜNUR/O (f; Un): G *Schnur* [ŝ-], Po *sznur* [ŝ-], R *ŝnur.* Kp Ji *shnur.* G kaj la slavaj fontlingvoj (plus Ji) koincidas prononce. Golden (1983, 129) atentigas pri tio, ke en UV nek la G, nek la R formo troviĝas kiel traduko de la Ea radiko (G *Strick,* R *verevka*); tio ebligas konsideri, ĉu Z rigardis Po kiel precipan fonton. – Laŭ Collinson (1959, 6) Z adoptis *ŝnur-* (kaj *faden-*) por eviti eblan konfuzon de radikoj devenantaj de L *filum* ("fadeno"); pli ĝuste estus diri: por eviti konfuzon kun *kord-* (vd. sube). ¶ 1881 *s'nur-*. – 1894 *fun-* (< L *funis*). ¶ Io *kordo,* Ie *cord/e,* Ia *-a* (> A *cord,* F *-e,* I *-a,* H *cuerda*).

Ĝerm. vorto (PoRJi < G), kp Nd *snoer* s.s., Sv *snöre* "-eto", el pĜ **snôrô-,* probable de HE rad. **(s)nê-* "ŝpini, kudri", vd. *nadlo.*

ŜOFOR/O (8; Goldschmidt 1923, PV; ne ĉe Z; antaŭe *konduk/ist/o [de aŭtomobilo]*): F *chauffeur* [ŝofö´r]; A *chauffeur* [ŝoŭ´fe'], G *Chauffeur* [=F], Po *szofer* [ŝ-], R *ŝofër* [-jór], (H *chófer*). Franca vorto internacie disvastiĝinta. Radikkomenco laŭ F prononco (pri F *ch* > Eo *ŝ* vd. Cherpillod 1990, 16 kaj kp sub *ŝanco*); la F agantsufikso *-eur* ricevis la formon *-or* laŭ *sufloro, tajloro.* Ps-sf *-or* 1. ¶ Io *automobil-dukt-isto, motor-isto,* Ie *chofero,* Ia *chauffeur.*

F *chauffeur* orig. "hejtisto de kaldronego de lokomotivoj" (Yamasaki), agantnomo de *chauffer* "hejti, varmigi" el L *calefacere* "varmigi", kunm. de *calere* "esti varma" k *facere* "fari, igi" (vd. *kaldrono* resp. *fari*).

ŜOSE/O (3; LInt 4/1899, Ve): F *chaussée* [ŝosé], G *Chaussee* [=F), Po *szosa* [ŝ-], R *ŝosse.* Kp Ji *shose.* Franca vorto internacie disvastiĝinta. Bazita plene sur F prononco (pri F *ch* > Eo *ŝ* kp sub *ŝoforo;* por la radikfino el F *-ée,* kp *arme/o, kupe/o,*

livre/o). ¶ Io *choseo,* Ie *chossé;* mankas en Ia.

El L vulg. **calciata (via)* kun supozata signifo jen "ŝtontegita (vojo)" (el L *calx* "kalk-[ŝton]o", vd. *kalko*), jen "tretita (vojo)" (el L *calx* "kalkano", vd. tiun).

ŜOV/I (f; RE): A *shove* [ŝ-], G *schieben* [ŝ-] (impf. *schob,* ptc.perf. *geschoben*), Po *suwac',* R *sovat'* ("[en]ŝovi"). La radiko ŝajnas kopii A (kun vokalisma apogo de R kaj G preteritaj formoj). – Neniu ekzakta ekvivalento en la romanaj lingvoj. ¶ 1894 *sov-* (< R). ¶ Io *shovar;* kp Ie *pussar,* Ia *pulsar* ("puŝi"), Ia *facer glissar* ("glitigi").

Ĝerm. vorto, kp Nd *schuiven,* Gt *-skiuban* s.s. (pĜ **sk(e)uban*). Samfamilia vorto en Eo: *ŝoveli.* – PoR estas de diferenca orig., par. al Li *ŝáuti* "enŝovi".

ŜOVEL/I (f; RE): A *shovel* [ŝ-], G *schaufeln* [ŝ-], Po *szuflowac'* [ŝ-]. Kp Sv *skovel* "-ilo". La radiko kopias A kaj sendube estas kreita kune kun la A-devena *ŝov/i.* ¶ 1894 *palu-* (< F *pelle,* IHL *pala* "-ilo"). ¶ La aliaj L.I. deiras de la instrumento "-ilo": Io *shovelo* (vb *shovel-agar*); Ie *pall/a* (vb *-ar*), Ia *pala* (vb mankas).

Verbo der. de la il-subst. : A *shovel,* G *Schaufel,* Po *szufla* (< G), propr. "ŝov-ilo", der. de la ĝerm. verbo citita sub *ŝovi.*

ŜOVINISM/O (1; Jü): A *chauvinism* [ŝoŭ-], F *-e* [ŝo-], G *Chauvinismus* [ŝo-], I *sciovinismo* [ŝo-], Po *szowinizm* [ŝov-], R *ŝovinizm* , (H *chauvinismo*). Ps-sf *-ism.* – Nomo de adepto: **ŜOVINIST/O** (1; Backman 1919, Wü, PV): F *chauvin,* A *-iste,* (H *-ista),* G *Chauvinist,* I *sciovinista,* Po *szowinista,* R *ŝovinist* [prononco paralela al tiu de *-ismo*]. Deirpunkto estas la F prononco (kp sub *ŝoseo*). Ps-sf *-ist.* ¶ Io *shovin/ismo, -isto;* Ie *chovin/isme, -ist;* Ia *chauvin/ismo, -ista.*

Der. de F *chauvin* "-isto", el la nomo *Chauvin,* tropatriotisma soldato en la armeo de Napoleono I, prezentita en litografaĵoj de Charlet k teatraĵo de gefratoj Cogniard (1831).

ŜPAR/I (f; Un): A *spare* (precipe "domaĝi", vd. PIV *ŝpar/i* 2; kp *sparing* "ŝparema"), F *épargner,* G *sparen* [ŝ-], I *risparmiare.* Bazita sur G prononco (G *sp-* normale > Eo *ŝp-* samkiel G *st-* > Eo *ŝt-,* vd. Cherpillod 1990, 23 kaj Szerdahelyi 1987, 123); la A formo certe estis konsiderata kiel apogo, kvankam ĝia sencnuanco estas iom alia. ¶ 1894 *ekonomi-.* ¶ Io *sparar,* IeIa *sparniar, economisar.*

Ĝerm. vorto, kp Nd *spar/en,* Sv *-a* (FI el ĝerm. **sparanjan*); la verbo estas der. de adj. (ekz. G ant.) *spar* "ŝparema, malabunda", par. al Ĉe *sporivý* "ŝparema" sed ankaŭ al *sporý* "riĉa, abunda" (HE **spa-ro-*); la orig. signifo povus esti "kiu daŭras/etendiĝas longe": HE rad. **sp(h)a-* "etendiĝi" (vd. *spaco*).

ŜPAT/O (4; Wü, PV; ne ĉe Z; antaŭe *fos/il/o*): A *spade,* G *Spaten* [ŝ-], Po *szpadel* [ŝ-]. Bazita sur G prononco (apokopo de *-en,* kp *fost/o, groŝ/o, ŝink/o*) kun radikkomenca apogo de Po. Konstruita por diferenciĝi káj de *spad/o* káj de *spat/o.* ¶ Io *spad/o,* Ie *-e;* Ia *pala* (ank. "ŝovelilo", vd. sub *ŝoveli*).

Ĝerm. vorto, kp NdSv *spade* (pĜ **spadhan-*), par. al Gr *spáthê* "larĝa k plata objekto" (vd. *spado,* etimologie identan).

ŜPIN/I (f; RE): A *spin,* G *spinnen* [ŝ-]. Kp Ji *shpinen.* Bazita sur G prononco kun apogo de A kaj eventuala inspiro de Ji. La komencsono estis cetere necesa por diferencigi la radikon disde *spin-*. La romana ekvivalento (F *fil/er,* I *-are,* H *hilar*) estis neebla en Eo pro *fil/o.* ¶ 1894 *fila.* ¶ Io *fil-ifar,* IeIa *filar.*

Ĝerm, vorto, kp Nd *spinn/en,* Sv *-a,* Gt *-an,* par. al G *spannen* "streĉi, etendi", de HE rad. **(s)pen-* "streĉi; ŝpini", kp Li *pìnti* "plekti", L *pannus* "tuko" (vd. *paneo*). Kp ev. *pendi.*

ŜPRUC/I (f; Un): A *spurt* "-i, -igi", G *spritzen* [ŝ-] "-i, -igi" (kp *sprühen* s.s.), I *spruzzare* "-igi", kp *sprizzare* "el-i". Kp Sv *spruta* "-i, -igi". Laŭ Warighien (LV 80) kompromisa formo inter G kaj I ([ŝ-] el G,

[u] el I, [pr, ts] komuna). La vokalo *u* povas ankaŭ esti inspirita de A aŭ la G variantformo kun *ü* (kp sub *flustri*). ¶ 1894 *sperg-* (< F *asperg/er*, I *-ere* "surŝprucigi". ¶ Io *spricar,* Ie *spruzzar;* Ia *sparger aqua* ' ŝprucigi akvon' (ktp; el L *spargere* "disŝuti, surŝprucigi").

Ĝerm. vorto (I < G); G *spritzen* (el G mez. *sprützen*) estas intensa formo de *spriessen* "elkreski, ĝermi", A *spurt* estas kaŭza verbo de *sprout* "elkreski, ĝermi" (pĜ **spr(e)utan*) de HE rad. **sper-* "semi, disŝuti", kp Gr *speírein* "semi" (vd. *spermo*), A *spread* "etendi".

ŜRANK/O (f; Un): G *Schrank* [ŝ-]. Bazita ekskluzive sur G prononco; la radikkomenco *ŝr-* estas germandevena ank. en *ŝraŭbo, ŝrumpi*. La L ekvivalento *armarium* estis, laŭ Modrijan 37, neebla en Eo (**armar/o* kolizius kun *arm-* kaj *-ar*). Pri la "minimuma internacieco" de *ŝrank-* vd. Golden Li k Ni 411. ¶ 1882 *jerk-* (< He *jarkatim*: PVZ 5, 138). – 1894 *armari-*. ¶ Io *armoro* (kp F *armoir*), Ia *armario;* Ie *scaf* (< R *ŝkaf*).

El G mez. *schrank* "latiso (= 'stangetoj oblikve krucigitaj' PIV) , enfermejo, ŝranko", kp G *Schranke* "bariero", par. al G *schräg* "oblikva" (HE **skreng-*, plivastigo de rad. **(s)ker-* "tordi, fleksi", citita sub *kurba*).

ŜRAPNEL/O (2; Jü): AF *shrapnel* [ŝ-], G *Schrapnell* [ŝ-], Po *szrapnel* [ŝ-], R *ŝrapnel'*. Farita surbaze de A. ¶ Io *shrapnelo,* IeIa *shrapnel.*

A vorto laŭ la nomo de la inventinto, generalo H. *Shrapnel* (1761-1842).

ŜRAŬB/O (f; RE; kun la senco "helico" LInt 3/1896): A *screw* [skru:], G *Schraube* [ŝraŭbe'], Po *s'ruba..* Prenita el G kun plena konservo de la prononco (pri altgermana *au* en Eaj radikoj, vd. Collinson 1959, 4; pri *ŝr-*, kp *ŝranko*). ¶ 1894 *vis-* (< F *vis*). ¶ Io *skrubo* (kompromisa formo AG), Ie *scruve* (kp Sv *skruv*); Ia *vite* (< I).

Ĝerm. vorto, kp ank. Nd *schroef* (kaj F *écrou* "ŝraŭbingo" < G): pĜ **skrûbô-*, eble pruntita el L *scrofa* "porkino" (kp *skrofolo*), en L mez. ank. "vulvo; ŝraŭbingo", ev. influita (per popola etimologio?) de L mez. *scrobis* "truo; vulvo". Orig. sendube seksa aludo, kp semantike F supre k A *screw* "fiki"; vd. ank. Yamasaki Supl. 5-a eld., 17).

ŜRUMP/I (6; Fab I, PV; antaŭe *mal/ŝvel/i, mal/kresk/i, kun/tir/iĝ/i*): G *schrumpfen* [ŝ-]. Kp A *shrink* [ŝ-], ank. Da *skrumpe* s.s. Bazita sur G kun radikfina plisimpligo *pf* > *p* (kiel en *ŝtopi, ŝtrumpo*; vd. ank. sub *fajfi*); pri *ŝr-*, kp *ŝranko*. La vorto ŝuldas sendube sian popularecon al sia kvazaŭonomatopea karaktero. ¶ Io *kontrakt-esar* 'kuntiriĝi'; Ie *con/traer se,* Ia *-traher se* 'kuntiri sin'.

Ĝerm. vorto, kp Sv *skrumpna* "-i", G *rümpfen* "sulkigi (la nazon)", par. al Gr *krámbos* "-inta, velkinta", Ir *cromm* "kurba", de HE **(s)kremb(h)-*, nazaligita formo de **(s)k(e)reb(h)-*, plivastigo de rad. **(s)ker-* "tordi, fleksi", citita sub *harpo, kurba*.

ŜTAL/O (f; Un PoG, kp var. *stal-* Un R): A *steel,* G *Stahl* [ŝta:l], Po *stal,* R *stal'*. La radiko troviĝas sub du formoj en Un R; *stal-* aperas kiel eraro, korektita jam en Un Po (kaj en la 2a eldono de Un R fine de 1887), kie *stal-* ricevis sian normalan signifon 'loĝejo por brutoj'. Vd. PVZ 1b, 19. – Formo baziĝanta sur G prononco; la radikelekton Collinson (1959, 5) komentas jene: 'pli facile formebla ol radiko reprezentanta It. acciaio, Sp.[=H] acero kaj Fr. acier kaj konforma al la graveco de la ŝtalindustrio en Germanio, Grand-Britio kaj Usono'. Sed alpreno de radiko german-slava ne estas tre malofta procedo de Z; Gregor (1982, 29) listigas 31 tiajn. ¶ 1894 *acier-*. ¶ Ie *stal,* Io *-o*; Ia *aciero.*

Ĝerm. vorto (RPo < G), kp Nd *staal,* Sv *stål*: pĜ **stahla-*, par. al Av *stax̌ta-* "forta, firma", Sa *stákati* "rezistas" de HE **stak-*, probable plivastigo de rad. **sta-* "stari" (vd. tiun; orig. do subst.-igo de adj. signifanta "starema, forte staranta").

ŜTAT/O (f; N-ro 52 1892, UV): A *stat/*

-*e,* I -*o,* F *état,* G *Staat* [ŝta:t], R *ŝtat,* (H *estado*). Kp Po *stan.* Radikkomenco laŭ GR por diferencigi disde *stat-,* etimologie identan. Wiener (1950, 104) mencias sole G kiel fonton de *ŝtat-*; probable R ludis egale gravan rolon. Rimarku, ke el la fontlingvoj nur GR diferencigas la du nociojn. ¶ 1894 *stad-.* ¶ IoIa *stat/o,* Ie -*e.*

Orig. "stato" (el L *status*). Kredeble el la senco "ĝenerala stato, stato de la ŝtato (L *status rei publicae*) evoluis en modernaj lingvoj la senco "ŝtato" (Wiener l.c.) Vd. la ĝemelan *stato*; kp spec. *statistiko.*

ŜTEL/I (f; Un): A *steal,* G *stehlen* [ŝté:l-]. Bazita sur G prononco kun apogo de A konsonantismo. La ĝermana radiko 'evitigas la uzon de F. voler , kiam *vol-* jam estas okupita' (Collinson 1959, 9). ¶ 1894 *fur-* (< L *fur* "-isto"). ¶ Io *furt/ar,* Ie -*er,* Ia *furar* (L *furt/um,* I -*o* "ŝtelo"; H *hurtar* "-i"), *robar* (< A *rob,* I *rubare*).

Ĝerm. vorto, kp Nd *stelen,* Sv *stjäla* [ŝé:-], Gt *stilan* (pĜ **stelan*) sen certaj koneksoj en aliaj lingvofamilioj.

ŜTIP/O (f; RE): L *stip/es -itis* "ŝtipo, klabo, paliso, trunko; stultulo". Kompare kun tiu, la ceteraj etimoj cititaj de Bastien devas esti konsiderataj sekundaraj: A *stub* "stumpo", I *stipite* "fosto, tigo", R *stebel'* "trunketo, tigo" (AR pro la formo, ĉiuj tri pro semantikaj kialoj). Cirkumfleksigo en Eo (sen fontlingva apogo), verŝajne por eviti kolizion kun *stip/o,* samtempe aperanta. ¶ 1894 *blok-.* ¶ Io *lenio* (< I *legno* "ligno"); Ie *bloc, trunc*; Ia *bloco de ligno.*

Samradika kun L *stipula* "stoplo, pajlero" k *stipare* "(plen)ŝtopi, kunpremi, densigi"; par. al G *Stift* ¨ (> eo *stift/o* PV) k A *stiff*/G *steif* "rigida" de HE rad. **stip-/stib-* "(esti) rigida", kp ank. Li *stiprùs* "fort(ik)a", R *stebel'* "tigo" (vd. supre), Sa *stíbhi-* "fasko". Samfamiliaj vortoj en Eo: *stebi, stoplo.*

ŜTOF/O (f; Un) 1) 'teksaĵo' (Un F, UV) 2) 'materi(al)o' (Un RPo, UV; nun arkaikiĝinta): A *stuff* (1, 2), F *étoffe* (1), G *Stoff* [ŝ-] (1, 2), I *stoffa* (1), (H *estofa* 1, 2). Bazita sur G prononco kun konsiderinda apogo de AFI. La orig. signifo aperas esti 2; per F kaj la dusenceco de G enkondukiĝas la senco 1, kiun poste konfirmas UV (por detaloj pri la sencoj de la radiko en Un, vd. PVZ 1b, p. 19, 34, 46, 58). – Collinson (1959, 5) komparas aliajn ĝermandevenajn substancnomojn kiel *led-* kaj *ŝtal-.* ¶ 1894 *etof-.* ¶ Io *stofo* (1), Ie *stoff(e)* (1), Ia *stoffa* (1, 2).

La ĝerm. formoj (I < G) el F ant. *estofe* (kp F mod. supre), der. de *estofer* "ekipi; plenŝtopi, remburi", kredeble el G ant. *stopfôn* "ŝtopi" (vd. tiun).

ŜTON/O (f; Un): A *stone,* G *Stein* [ŝ-]. Kp Nd *steen,* Sv *sten.* Laŭ Waringhien (1967, 48; LV 80) kompromisa formo konsistanta el G konsonantoj (*ŝ-* laŭ G prononco) kaj A vokalo, kp *draŝ/i, ŝlim/o, sun/o* (vd. ankaŭ sub *ŝajni*). La enmeto de la radiko ĉe Szerdahelyi (1987, 124) kiel "senpera prunto el la A" estas misa; korekta la enmeto p. 125! ¶ 1894 *pietr-* (< I *pietra,* F *pierre,* ank. H *piedra*; kp LGr sub *petrolo*). ¶ Io *stono*; Ie *lápid,* Ia *lapide* (< L *lap/is -idis*), Ia ank. *petra.*

Ĝerm. vorto, kp Gt *stains* s.s.: pĜ **staina-*, par. al R *stena* "muro", Gr *stía* "ŝtoneto" de HE rad. **stai-/sti-* "densigi, kunpremi; ŝtopiĝi", kp Sa *styâ'yate* "rigidiĝas", Gr *stéar* "sebo" (vd. *stearino*), L *stiria* "glaciigita guto" (vd. *distili*).

ŜTOP/I (f; Un): A *stop (up),* G *stopfen* [ŝ-], I *stoppare* (kp *stoppaccio* "-aĵo"). Kp Ji *shtopn,* Nd *stopp/en,* Sv -*a,* ank. R *ŝtopat'* "fliki". Komencsono laŭ G (kaj Ji?) prononco (kp la antaŭajn kaj la sekvajn radikojn), sed radikfine la karakteriza G konsonantkombino *pf* ne estas akceptita (kiel en *ŝrump/i, ŝtrump/o*; kp sub *fajfi*). La rolo de R estas malfacile difinebla: la bazformo ekzakte koincidas sed la signifo diferencas. ¶ 1894 *stop-.* ¶ Io *stopar,* Ie *tamponar* (de *tampon* "ŝtopbulo" el F *tampon*), Ia *tappar* (de *tappo* "ŝtopaĵo" < I), *obtur/ar* (< L -*are*).

Ĝerm. vorto: pĜ **stuppôn,* eble identa kun la verbo citita sub *ŝtofo;* ĉiuokaze influita de L mez. *stuppare* "ŝtopi per stupoj" de L *stuppa* "stupo" (vd. tiun).

ŜTRUMP/O (f; Un): G *Strumpf* [ŝ-]. Kp Ji *shtrimp,* Sv *strumpa.* La komencsono laŭ G (plus Ji) prononco ne surprizas; kp la antaŭajn radikojn kaj *ŝtupo.* La radikfina konsonantkombino estas simpligita (vd. sub *ŝtopi*). ¶ 1894 *kalz-* (< I *calza*). ¶ Io *kalzo;* Ie *strumpe* (espismo); Ia *calcea* (kp I kaj F *chaussette* "-eto", H *calcetín* s.s.).

Orig. mallongigo de G *Hosenstrumpf* "stumpo de la gambvestaĵo *(Hose)*" (dum la mezepoko oni portis kombinitan gamb- k kalsonveston, kiu poste evoluis ĝis du apartaj vestaĵoj): G *Strumpf* "†stumpo" (vd. tiun, etimologie identan).

ŜTUP/O (f; Un): A *step,* G *Stufe* [ŝ-], Po *stopień,* R *stupen'.* De Waringhien (1967, 48) rigardata kiel miksformo inter A kaj G. Sed la R formo ne estas neglektebla (Gregor 1982, 28 donas GR kiel fontojn). La komenca *ŝ-* estas klarigebla nur per G prononco, sed R apogas la vokalon kaj (kune kun A) la finkonsonanton. Vd. Szerdahelyi 1987, 126. Mallonga formo (laŭ AG) estis preferebla, speciale konsiderante ke la derivaĵo *ŝtup/ar-* estas multe pli ofta ol la sola radiko. ¶ 1894 *stup-.* ¶ Io *grado* (< L *gradus*), kp *eskalero* "-aro"; Ie *scalun* (de *scale* "ŝtupetaro"; kp *scaliere* "-aro"); Ia *scalon* (de *scala* "ŝtuparo") [etimologio trovebla sub *skalo*].

Ĝerm. vorto, kp Nd *stoep* "perono". Orig. signifo supozeble "surtretaĵo": pĜ **stôbô,* kp G *Stapfe* "spuro", *stampfen* "pisti, piedbati", plue al R *stupit'* "(ek)paŝi" (de kiu R supre), Gr *stémbein* "surtreti, malbontrakti" (vd. *stampi*).

ŜU/O (f; Un): A *shoe* [ŝu:], G *Schuh* [ŝu:]. Formo respegulanta la komunan AG prononcon. ¶ 1894 *sulier-* (< F *soulier*). ¶ Io *shuo;* Ie *sapate* (< H *zapato*); Ia *scarpa* (< I).

Ĝerm. vorto, kp Nd *schoen,* Sv *sko,* Gt *skohs,* probable kun orig. signifo "tegilo" de HE rad. **(s)ku-* "tegi, kovri" (vd. *haŭto*).

ŜULD/I (f; Un): G *schulden* [ŝ-] (kp *Schuld* [ŝ-] "-o"). Bazita ekskluzive sur G. Eble Z trovis la romanan ekvivalenton (**deb-*, Collinson 1959, 9) tro simila al *dev-* kaj malfacile diferencigebla de ĝi (rimarku, ke L *debere,* F *devoir,* I *dovere,* [H *deber*] signifas káj "devi" káj "ŝuldi"); li tamen estis ŝanĝinta opinion en 1894. ¶ 1881 *dest-* (< F *dette* "-o": PVZ 5, 134). – 1894 *deb-.* ¶ Io *deb/ar,* Ie *-ir,* Ia *-er.*

Ĝerm. vorto, kp Nd *schuld*/Sv *skuld* "-o" (pĜ subst. **skuldi-*), samradika kun A *shall/should* "dev/as, -is" (orig. "ŝuld/as , -is"), G *sollen* "devi" (orig. "ŝuldi"); kp semantike la romanajn formojn supre. Kredeble par. al Li *skelù* "(mi) ŝuldas".

ŜULTR/O (f; RE): A *shoulder* [ŝóŭlde'], G *Schulter* [ŝ-]. Bazita sur G prononco (Golden 1983, 129)kun sinkopo de senakcenta *-e-* (kiel en *fingr/o;* kp la verbojn *(be)daŭr/i, flustr/i, kaŭr/i*); A apogas la komenckonsonanton kaj la internan dentalon. – Unu el kelkaj ĝermandevenaj nomoj de korpopartoj, vd. Collinson 1959, 5. ¶ 1894 *epol-* (< F *épaule,* kp *epoleto*). ¶ Io *shultro;* Ie *epol;* Ia *spatula* (= L, kp I *spalla*), *humero* (< L *humerus*).

Ĝerm. vorto, kp Nd *schouder,* Sv *skuldra* s.s. Se oni konsideras, ke skapoloj (ŝultraj ostoj) de bestoj estis uzataj kiel fosiloj, estas eble devenigi tiun ĉi vorton de HE **skldhra,* instrumentsufiksa formaĵo de rad. **skel-* "tranĉi" (vd. *ŝelo*); kp Gr *skalís* "ŝovelilo".

ŜUT/I (f; Un): A *shoot* [ŝu:t], G *schütten* [ŝy´t-]. Kp Ji *shitn.* Rigardebla kiel nur G-devena (Szerdahelyi 1987, 124, Bianchini 163; por G *ü* > Eo *u,* vd. *flustri*), kiel nur A-devena (laŭprononce) aŭ kiel kompromisa formo inter A kaj G (A vokalismo, komuna konsonantismo). (Oni tamen ne troigu la influon de A *shoot,* kiu ne aperas kiel traduko de *ŝut-* en UV.) Influo de Vp *jütön* [ŝyt-] ne estas ekskludita. – Laŭ Collinson (1959, 9) la

radiko 'prezentas utilan distingon disde *verŝ-* "elglitigi likvaĵon"'. ¶ 1894 *spand-* (< I *spandere*). ¶ IoIeIa ne faras la distingon "ŝuti" : "verŝi", vd. tiun lastan.

Ĝerm. vorto kun orig. signifo "skui", par. al G *schütteln* "skui", A *shudder* "tremi ('skuiĝi')", de HE rad. **skeud-* "ekmovi rapide", kp Sa *ĉódati* "instigas".

ŜVEB/I (3; Ve): G *schweben* [ŝv-]. Kp Ji *shvebn.* Bazita sur G (plus Ji) prononco. La romana alternativo (F *plan/er,* I *-are,* [H *-ear*]) estis okupita per alia signifo (kp *plan/o*). ¶ Ie *plan/ear,* Ia *-ar,* mankas en Io (*pendar, glit-flugar*).

Ĝerm. vorto, kp Nd *zweven,* Sv *sväva*: pĜ **swibên,* samradika kun G *schweifen* "vagi", A *swoop* "falflugi" (HE rad. **sŭei-* "svingi", vd. tiun).

ŜVEL/I (f; Un): A *swell* [sŭ-], G *schwellen* [ŝv-]. Bazita sur G (prononco) kun esenca apogo de A. Sama rezulto de A *sw-*/G *schw-* en *ŝvit/i* (alie en *svarm/o, sving/i*). Ĝermana radiko preferita, laŭ Collinson (1959, 10), pro pli facila adaptebleco ol F *gonfler, enfler,* I *gonfiare,* H *incharse, inflarse.* ¶ 1894 *turgesk-* (< L *turgescere*). ¶ Io *intumecar* (< L *intumescere*), *inflesar* (L *inflare* "ŝveligi"); Ie *tumer* (< L *tumere*), *inflar se* (refl.); Ia *tum(esc)ere.*

Ĝerm. vorto, kp Nd *zwellen,* Sv *svälla,* kp Gt *uf-swalleins* "ŝvelinteco, malhumileco": pĜ rad. **swell-* sen eksterĝermanaj koneksoj.

ŜVIT/I (f; Un): A *sweat* [sŭet], G *schwitzen* [ŝv-]. Kp Ji *shvitsn.* Bazita sur G (plus Ji) prononco; la apogo de A estas nerekta (komenca sibla sono, *t*); tamen la A formo eventuale povis inspiri al la radikfina apokopo (G *tz* [ts] > Eo *-t*; kontrastas *ŝmac/i, ŝpruc/i*). Pri radikkomenca *ŝv-,* kp *ŝveli.* – La latin(id)a ekvivalento F *suer,* IL *sudare,* H *sudar* prezentas radikon bezonatan por alia signifo: kp *sud/o* (Collinson 1959, 10). ¶ 1894 *sudor-* (< L *sudor* "-o"). ¶ Io *sudor-ifar,* IeIa *sudar.*

Ĝerm, vorto, kp Nd *zweten,* Sv *svettas*: pĜ **swaitian,* der. de **swaita(n)-* "-o" (A *sweat,* G *Schweiss*) de HE rad. **sŭeid-,* kp Sa *svídyate* "-as", Gr *hidrô's* "-o" k la supre cititajn latin(id)ajn vortojn.

T

TABAK/O (f; Du, RE): A *tobacco,* F *tabac,* (H *-o*), G *Tabak,* I *tabacco,* R *tabak.* Kp Po *tabaka* "flartabako", ank. L bot. *Nicotiana tabacum* "nikotiano". ¶ Io =, Ie *tabac,* Ia *-o.*

H vorto de kariba origino: Aravaka (Haitio) *tabaku* "fumtubo". – Cherpillod 1992, 104.

TABAN/O (f; EG): L *tabanus;* F *taon,* I *tafano,* (H *tábano*). Zoologia termino bazita sur L. ¶ Io =, Ie *taban/e,* Ia **-o.*

L *tabanus* estas eble de etruska origino.

TABEL/O (f; RE) 1) 'metoda aranĝo de nom(br)oj' 2) hist.: 'gravurita plato; skribtabuleto' (El 24:12; GD, PIV): A *tabl/e* (1, 2), *-et* (2), F *tableau* (1), *tabl(ett)e* (2), G *Tabelle* (1), *Tafel* (2), I *tabella, tavola* (1, 2), Po *tabela* (1), *tabl/ica* (1, 2), *-iczka* (2), R *tabel', tab.lica* (1); L *tabula/ tabella* (2). La radiko *tabel-* estas unu el grupo de 'kvarnaskitaj' radikoj (uzante la terminon de Wiener 1950, 104, 106) kun la sama L etimo, vd. sub *tabulo.* La senco 1 baziĝas sur kvar fontlingvoj: GI PoR. La fonto de senco 2 estas pli malfacile difinebla; ĝi ŝajnas deveni de L *tabella,* kiu i.a. signifas "skribtabuleto". Ĝi ne enestas en la fruaj vortaroj. ¶ Io *tabelo* (1, 2), Ie *tabelle* (1), *tabul* (2), Ia *tabula* (1, 2).

La formoj kun fino *-ella* (I), *-elle* (G), *ela* (Po), *-el'* (R) el L *tabella* "tabuleto", dim. de *tabula* "tabulo", vd. tiun.

TABL/O (f; Un): AF *table* [A teibl, F tabl], I *tavola.* Bazita sur la (ortografia) akordo AF; la F prononco koincidas kun la Ea. Unu el kvar radikoj havantaj L *tabula* kiel originan fonton, vd. sub *tabulo.* ¶ Io =, Ie *table,* Ia *tabula.*

Latinida vorto el L *tabula,* orig. "tabulo"; en L vulg. de Gaŭlio k Italio evoluiĝis la senco "tablo" (vd. *tabulo*).

TABUL/O (f; Un) 1) 'peco el ligno' 2) 'plato': L *tabula* (1, 2); F *tableau* (2), G *Tafel* (2), I *tavola* (1, 2), Po *tablica* (2), (H *tabla* 1, 2). Kp A *tablet* "-eto" (2). Inter la vortoj apartenantaj al la familio de L *tabula,* Z alprenis (a) *tabul/o* laŭ la L fontvorto, (b) *tabel-* laŭ GIPoR, (c) *tabl-* laŭ AF, (d) *tavol-* laŭ I (vd. Wiener 1950, 106 kaj la sinoptikon ĉe Szerdahelyi 1987, 129, kie aperas ankaŭ kvina vorto ne-Za, nome eo *tablojd/o* PVS laŭ I *tabloide*). ¶ Io *planko* (1; < F *planche*), *panelo* (2; < A *panel*), *plako* (2; < F *plaque*); Ie *planc* (1), *tabul* (2); Ia *planca* (1), *tabula* (2).

L *tabula* havas necertan etimologion (Akada etimo en Cherpillod 1992, 104). – Samfamiliaj vortoj en Eo: *tabelo, tablo, tavolo.*

TABURET/O (2; LInt 5/1896, Jü): F *tabouret* [-u-], Po *taboret,* R *taburet(ka),* (H *taburete*). Bazita sur la akordo de R kaj F prononco. Ps-sf *-et.* ¶ Io =, Ie *taburette,* Ia *taburet.*

Propr. "tambureto" (pro la formo), dim. de F †*tabour* "tamburo", vd. tiun.

TAĈMENT/O (f; RE): A *detachment* [-ĉ-], F *détachement,* I *distaccamento,* (H *destacamento).* Bazita sur AF (por *ch* [A ĉ, F ŝ] > Eo *ĉ,* kp *ĉasi, ĉeno, riĉa, torĉo* kaj vd. Cherpillod 1990, 16). A ellasas la centran vokalon (kiu estas neprononcata en F). Senprefiksigo (Waringhien LV 78) por eviti aspekton de kunmeto kun Eo *de*; kp *kroĉi.* Ps-sf *-ment.* ¶ 1894 *detacment-.* ¶ Io *detachmento,* Ia *distaccamento*; ne trovita en Ie.

Propr. "apartigaĵo", der. de F *détacher* (I *distaccare,* H *destacar*) "malligi, disigi, apartigi" (> "apartigi k elsendi trupon kun speciala tasko, taĉmenti"), formita kiel antonimo de *attacher* "alligi, fiksi" (kp *ataki*) el pref. *dé-* "dis-" k *-tacher* el Fk **stakôn* "fiksi" de ĝerm. radiko *stak-* "esti rigida/firma" (kp A *stake* "stango") – Parenca vorto en Eo: *ataki..*

TAFT/O (f; RE): A *taff/eta,* F *-etas,* I *-età,* G *Taft,* PoR *tafta,* (H *tafetán*). Formo laŭ G(PoR); radikfino *et* evitita pro la homonima sufikso (cetere *e* estas senakcenta en AFI). ¶ Io =, Ie *tafte,* Ia *taffeta.*

Pere de Tu el Pe *tâfta* "ŝtofo", propr. "teksita(ĵo)", subst.-igita ptc. perf. de *tâftan* "teksi, ŝpini" (kp ev. *tapiŝo*). – Cherpillod 1992, 104.

TAG/O (f; Un): G *Tag.* Kp A *day,* NdSv *dag.* Verŝajne bazita nur sur G (la apogo de A estas pli etimologia ol praktika). Laŭ Collinson (1959, 6) la ĝermana radiko estis elektita 'eble ĉar L. *dies* – kiu troviĝas kaŝe en *lundo* ktp – donus formon tro similan al *Di,* kaj *diurn* povis esti bezonata por la 24-hora periodo'. La unua estas sendube vera (vd. ank. Modrijan 38), la dua duba: ni havas neniun indicon ke Z volis enkonduki vorton por '24 horoj', disponante pri *tag-* kaj *nokt-* (efektive li uzis *plen/tag/o*); kp Privat VZ 44: "*Diurno* tre malbele sonis en kunmetitaj vortoj kiel *ĉiudiurne* aŭ *diurnmeze,* kaj ankaŭ estis internacia fakte nur por malgranda nombro da homoj kleraj, kiuj konas latinan lingvon aŭ tiajn formojn francajn kiel *diurne,* neniam uzatajn de l' popolo". (Kp eo *diurn/a* 'taga' Wü, *-o* 'tagnokto' PVS el L *diurnus,* adj. de *dies.*) La latinidaj ekvivalentoj apenaŭ estis malfacile adapteblaj: F *jour* [ĵur] (kp *ĵurnalo*), I *giorno* [ĝo-]; kp Io. ¶ 1881 *di-*. -1894 *di-*. ¶ Io *jorno,* Ie *die,* Ia *jorno, die*; kp Nl *jorne* "tago", *die* "tagnokto".

Ĝerm. vorto, kp Gt *dags*: pĜ **dhaga-* kun probabla signifo "varma (tempo)", par. al Sa *dáhati* "brulas", Gr *téphra* "cindro", L *fovere* "varmigi" (ev. *febris* "febro", kp tiun), Ir *daig* "fajro", Li *dègit* "bruli" (H E rad. **degŭh-* "bruli").

TAJL/I (8; PV; ne ĉe Z): F *tailler* [tajé], I *tagliare* [-l'-]. Kp P *talhar* [-l'-]. Retrograde formita el la agantnomo *tajlor/o,* vd. tiun. ¶ IoIa *taliar,* Ie *talliar.*

El L vulg. *taliare* "tranĉi, pritondi", der. de L *talea* "markoto; paliseto" (orig. "detranĉita peco"?) kun necerta etimologio. Samfamiliaj vortoj en Eo: *detalo, tajloro, talio, telero.* Kp spec. sekv.

TAJLOR/O (f; Un): A *tailor,* F *tailleur* [tajö´r]. Romana [l'] reprezentata en Eo per *jl* (vd. *ajlo*); tie ĉi tiu kombino bone respegulas la ortografion de AF. – El tiu ĉi radiko estas retrograde formita la verbo *tajl/i,* kp tiun. – Ps-sf *-or* 1. ¶ 1894 *sartor-* (< L *sartor*). ¶ Io *talioro,* Ie *talliero*; Ia *sartor.*

Agantnomo de F *tailler* "tajli" (vd. tiun).

TAJP/I (8; PVS; ne ĉe Z; antaŭe *maŝin/skrib/i*): A *type* [taip]. Kp F *taper (à la machine* "per maŝino"), G *tippen.* Bazita ekskluzive sur A (la FG formoj povas esti rigardataj kiel mnemonika apogo). A *y* [ai] > Eo *aj* ankaŭ en *fraj/o;* kp *i* [ai] > Eo *aj* sub *fajro.* ¶ Io *mashin-skribar,* Ie *tippar, machin-scrir,* Ia *dactylographar* (< F *dactylographier,* I *dattilografare*).

A mall. de *typewrite,* propr. "skribi (liter)tipe"; la unua elemento estas la subst. *type* "litertipo" (vd. *tipo,* etimologie identan).

TAKS/I (f; RE): F *taxer,* G *taxieren,* I *tassare,* Po *taksować,* R *taksirovat',* (H *tasar*) (ĉiuj kun precipa senco 'taksi impostocele', kp A *tax* "imposti"); L *taxare* ('difini la valoron [de io], aprezi'). Kp la subst. ('depago, tarifo'; laŭ BRO p. 47 tiu estas homonimo, ne derivaĵo de *-i*) F *taxe,* G *Taxe,* I *tassa,* PoR *taksa,* (H *tasa*). Aperas, ke Z plivastigis la sencon de la internacia verbo, eventuale inspirita de L, kies senco estas pli ĝenerala. ¶ Io *evaluar* (< A *evaluate,* F *évaluer*), kp *taxar* "imposti"; IeIa *taxar,* ank. Ie *evalu/ar,* Ia *-tar.* Kp ank. la vortojn sub *estimi.*

Orig. intensa verbo de L *tangere* "tuŝi" (do propr. "per palpado esplori ion kaj per tio difini ĝian valoron"), vd. *tangento;* kp ank. *tasko.*

TAKSUS/O (1; Jü): L *taxus;* I *tasso,* (H *tejo*). Botanika termino prenita el L; plena nominativa formo kiel en *fokus/o* (vd. liston tie) pro la evidenta kaŭzo ke la jama *taks-* havis alian signifon. ¶ Io *taxuso,* Ie *taxuo,* Ia *taxo.*

Eble par. al Gr *tóxon* "pafarko" (la taksuso estis konsiderata venena).

TAKT/O (1; RE) 1) muz. 2) 'arto konvene agi' (Jü): AF *tact* (2), G *Takt* (1, 2), I *tatto* (2), PoR *takt* (1, 2), (H *tacto*). Ea semantiko laŭ G kaj la slavaj lingvoj. ¶ Io *takto* (2), *mezuro* (1); Ie *tact/e,* Ia *-o* (2), IeIa *mesura* (1).

El L *tactus* "tuŝo" (en modernaj lingvoj > "regula/ritma frapo"), poste ank. "palposento" (en modernaj lingvoj > "impresebleco, sentemo" > "sentokapablo pri konveneco"), subst. de *tangere* "tuŝi" (vd. *tangento*).

TAKTIK/O (1; RE): A *tact/ics,* F *-ique* [-ík], G *Taktik,* I *tattica,* Po *takt/yka,* R *-ika,* (H *táctica*). Ps-sf *-ik.*

Pere de L mez. *tactica* el Gr *taktikê' (tékhnê)* "aranĝa/ordiga (arto)" (kiel mil. termino "la arto aranĝi trupojn"), adj. de *táttein* "aranĝi. ordigi, envicigi" kun nekonata etimologio. Samfamilia vorto en Eo: *sintakso.*

TALENT/O (f; Du, RE) 1) 'spirita kapablo' 2) antikva pezmezuro/monunuo (Wü, PV): AFPo *talent,* I(H) *-o,* G *Talent,* R *talant* (ĉiuj 1, 2). Por la senco 2 oni enkondukis la diferencigitan formon eo *talant/o* (NT, PVS), kredeble laŭ la F prononco [-â] kaj/aŭ la Gr originformo (vd. sube). ¶ Io = (1), Ia = (1, 2), Ie *talent* (1); la senco 2 ne trovita en IoIe.

Pere de L *talentum* (senco 2) el Gr *tálanton* (senco 2; la senco 1 evoluis el la uzo de la vorto en la biblia parabolo Mat. 25:14-30), orig. "pesilo" de *tál/as -antos* "portanta", samradika kun *tlênai* "porti" (vd. *toleri,* kp spec. *atlaso*).

TALER/O (1; RE): AF *thaler,* G *Taler,* I *tallero,* Po *talar,* R *taler,* (H *tálero*). Probable prenita el G (germana termino); por vortfina germandevena *-er* (senakcenta) > radikfina *-er* en Eo, kp *kelner/o, somer/o, teler/o.* ¶ Ie *táler,* Ia **taler* Ruhrig; ne trovita en Io.

Germana mall. de *Joachimstaler* "(monero) el Joachimstal" (kun lokdevena suf. *-er*), minejo en Bohemio, kie oni en 1519 komencis fari arĝentajn monerojn; la loknomo konsistas el gen. de nomo propra *Joachim* k *Tal* "valo" (kp Gt *dals* s.s.; pĜ **dala-*), par. al R *dol* "valo", Gr *thólos* "kupolo". De G mez. formo *daler* devenas A *dollar* > eo *dolar/o* PR.

TALI/O (f; RE): F *taille* [taj], G *Taille* [tálje], Po *talia,* R *talija,* (H *talle* [-l'-]). Eo *-li-* (laŭ la slavaj formoj) kredeble estas intenca diferencigo disde *-jl-* en la parenca *tajlor/o.*¶ Io *tayo,* Ie *tallie;* Ia *cinctura* (< F *ceinture,* kp L *cinctura* "zono").

Orig. "tranĉo" (> "formtranĉo, tajlo" > "formo, figuro, staturo" > "korpa parto formanta la figuron"), subst. de F *tailler* "tranĉi, tajli" (vd. *tajli*).

TALISMAN/O (2; LInt 6/1899, Jü): AF R *talisman,* I *-o,* G *Talisman,* Po *talizman,* (H *talismán*). ¶ Io =, Ia *talisman,* Ie *-e.*

El Ar *t'ilasmân,* duala formo de *t'ilasm* "talismano; sorĉformulo" el Gr *télesma* "magia ceremonio, religia rito, mistero", subst. de *teleín* "plenumi, finfari [oficon];

inici en misteron", der. de *télos* "celo, fino; (plur.) misteraj ritoj" (par. al ps-pf *tele-*, kp sub *telegrafo*). – Cherpillod 1992, 104.

TALK/O (2; Jü): A *talcum*, F *talc*, I(H) *-o*, G *Talk*, PoR *talk*; L med. *talcum*. ¶ Io =, Ie *talc*, Ia *-o*.

El Ar *t'alq* s.s. el Pe *talk* s.s. – Cherpillod 1992, 104.

TALMUD/O (2; RE): AG *Talmud*, FIPo R(H) *talmud*. ¶ IeIa *talmud*; ne registrita kiel radiko en Io.

El He *talmûd* s.s., propr. "lernado, studo", der. de *lâmad* "lerni". – Cherpillod 1992, 104.

TALP/O (f; RE): L *talpa*; F *taupe*, I *talpa*, (H *topo*). Zoologia termino prenita el L. ¶ Io =, Ie *talp/e*, Ia *-a*.

Necerta etimologio.

TAMBUR/O (f; RE): F *tambour* [-búr], I *tamburo*, (H *tambor*). Kp G *Tambour* [-bu:r] "-isto". Bazita sur F prononco kaj I. Kp ank. la sekvan radikon, plene internacian, signifantan 'malgrandan tamburon'. ¶ Io =, IeIa *tambur*.

El Ar *t'anbur* s.s., probable modifo (sub influo de *t'unbur* "gitaro") de Pe *tabîr* "tamburo" – Cherpillod 1992, 105 – Samfamiliaj vortoj en Eo: *tabureto, tamburino.*.

TAMBURIN/O (2; Jü): A *tambour/ine*, F *-in* [-ur-], G *Tamburin*, I *tamburello*, Po *tambur/yn*, R *-in*, (H *tamboril*). Radikfino *-in* laŭ la plimulto de la fontlingvoj. ¶ Ia =, Ie *tamburine*, Io *mi-tamburo* ('duontamburo').

Propr. "tambureto", dim. de I *tamburo.*

TAMEN (f; Un): L *tamen*. Nurlatina vorto (Waringhien LV 62; Gregor 1982, 10). Kp inter la kon- kaj subjunkcioj *sed, dum, kvankam.*. La modernaj fontlingvoj diferencas inter si. ¶ IoIa =, Ie *támen*; Ia ank. *totevia* (< I *tuttavia*).

Orig. identa al L *tam* "tiel" (la koncesiva senco unue aperis en kombinoj kiel *sed tamen* "sed je tiuj kondiĉoj"; kp semantike F *pourtant* "tamen", laŭvorte "por tiom"), orig. kazformo de la HE pronoma radiko **to-* (vd. *tio*). Kp spec. *tandem.*

TAMTAM/O (2; Jü): A *tom-tom*, FIPo *tam-tam*, G *Tamtam*, R *tamtam*. ¶ Io =, Ie *tamtam*, Ia **tamtam* Cleij.

Kreola vorto de onomatopea origino. (La A formo el analoga Hi onomatopeo.)

TAN/I (f; RE): A *tan*, F *tanner*. Kp H *tenería* "-ejo". La internacia faktermino *tanin/o* (vd. tiun) apenaŭ influis la originan radikelekton. ¶ Io *tan-agar*, IeIa *tannar.*

F vorto (kp L mez. *tannare* s.s.) der. de *tan* "-ilo", probable el Gaŭla **tann-* "kverko (kp Bretona *tann* s.s.); oni utiligis pulverigitan kverkoŝelon por tanado. Samfamilia vorto en Eo: *tanino.*

TANDEM/O (2; Jü): AFIPoR *tandem*, G *Tandem*, (H *tándem*). ¶ Io *tandem/-biciklo, -veturo;* IeIa* *tandem.*

El L *tandem* "fine"; la moderna signifo ekestis kiel studenta vortludo en A, kie la esprimo *at length* signifis (a) "fine", (b) †"laŭlonge, envice". – L *tandem* estis orig. uzata kiel emfaza vorto ĉe imperativoj k.s.: *veni tandem* "venu do" (> "venu do finfine"). ĝi konsistas el partikulo *-dem* (kiel en *idem* "sama", vd. *identa*) k *tam*, identa kun *tam* "tiel" (vd. *tamen*).

TANGENT/O (2; Jü) (trig.): A *tangent*, FI(H) *-e*, G *Tangens*, PoR *tangens*. Ps-sf *-ent*. – Diferencigon disde tiu radiko reprezentas eo *tanĝ/i* (geom.) Bricard 1905, Ve, Wü, PVS kun der. *tanĝ/ant/o* = A *tangent*, FI(H) *-e*. G *Tangente* (eo *-ĝ-* laŭ la prononco de AF [ĝ resp. ĵ] aŭ – pli probable – kiel rezulto de cirkumfleksigo). ¶ Io *tangent/o* (geom.), IeIa *-e* (geom., trig.).

El L *(linea) tangens* "(linio) tuŝanta", ptc.-prez. de *tangere* (sup.rad.: *tact-*) "tuŝi" kun necerta etimologio; la proponita parenceco al Gt *tekan* "tuŝi", A *take* "preni" restas problema (ĝerm. *t* ne respondas al L *t*). Samfamiliaj vortoj en Eo: *ataki, atingi, kontakto, taksi, takto.*

TANIN/O (1; Be): A *tann/in*, I *-ino*, FR *tan/in*, Po *-ina*, (H *-ino*), G *Tannin*. Ps-

sf *-in* 2.

Der. de F *tan* "tanilo" (vd. *tani*).

TAPET/O (f; RE): G *Tapete,* I *tappezzeria,* Po *tapeta.* Kp A *tapestry,* F *tapisserie,* (H *tapiz*) "(teksita) tapeto", ank. F *tapisser* "-i", Sv *tapet* "-o". La radiko ŝajnas baziĝi sur GPo (Gregor 1982, 28); oni notu, ke formo kun *s* estus tro simila al *tapiŝ-*. ¶ Io =, IeIa *tapete.*

La GPoSv formoj el I *tappeto* "tapiŝo, tuko" el L *tapetum* s.s. – La AFI formoj estas sufiksaj der. de paralela vorto (ekz. F *tapis* "tapiŝo") devenanta de L **tapitium* (vd. *tapiŝo,* etimologie identan).

TAPIOK/O (1; Ve): AFI(H) *tapioca,* G *Tapioka,* PoR *tapioka.* ¶ Io *tapiokao,* IeIa *tapioca.*

Pere de P el Tupia (Brazilo) *tipioka* "suko de manioko", kunm. de *tipi* "feĉo" k *ok* "(el)premi". – Cherpillod 1992, 105.

TAPIŜ/O (f; Un): F *tapis,* G *Teppich* [-c], I *tappeto;* L *tapete.* Bazita sur F kun alproksimiĝo al G prononco per cirkumfleksigo de *-s.* La formo *tapet-* estis kredeble jam rezervita por alia senco. ¶ 1894 *tapis-.* ¶ Io *tapiso,* Ie *tapisse,* Ia *tapete, tapis.*

L *tapete* (kun paralelformoj *tapetum* k *tap/es -etis*) el Gr *táp/ês -êtos* "tapiŝo, kovrotuko (el lano)", eble de persa origino (kp Pe *tâftan* "ŝpini"). – F *tapis* devenas de L vulg. **tapitium* el Gr *tapê'tion,* dim. de *tápês.*

TARANTEL/O (2; Jü): AI *tarant/ella,* F *-elle,* PoR(H) *-ela,* G *Tarantella.* ¶ Io =, IeIa* *tarantella.*

I dial. formo de *tarantola* "tarantulo" (vd. tiun); la dancantoj kondutis kvazaŭ morditaj de tia.

TARANTUL/O (2; Jü): APoR *tarant/ula,* I *-ola,* F *tarentule,* G *Tarantel,* (H *tarántula*); L zool. *Tarantula.* Radikfino *-ul* laŭ la plimulto de la fontlingvoj kaj la scienca termino. ¶ Io =, Ie *tarant/ul,* Ia* *-ula.*

I der. de la urbonomo *Taranto* (en kies regiono tiu araneo oftas), antikvepoke L *Tarentum,* Gr *Tár/as -antos.* Etimologie identa vorto en Eo: *tarantelo.*

TARIF/O (1; Be): A *tariff,* FR *tarif,* (H *-a*), G *Tarif,* I *tariffa,* Po *taryfa.* ¶ Io =, Ie *tarif,* Ia *-a.*

Pere de I el Ar *ta'rif* "tarifo", propr. "sciigo", de rad. *'arafa* "scii, koni". – Cherpillod 1992, 106.

TAROK/O (2; Jü): A *taroc, tarot,* F(H) *tarot,* G *Tarock,* I *tarocchi* [-óki] (plur.), PoR *tarok.* ¶ Io =, Ie *taroc;* Ia **taroc(co).*

I vorto de nekonata origino.

TAS/O (f; RE): F *tasse,* G *Tasse,* I *tazza* [-ts-], (H *taza,* kp P *taca* [tása]). Bazita sur la akordo FG. ¶ Io =, Ie *tass/e,* Ia *-a.*

El Ar *t'ass(a)* "pelveto", siavice el Pe *täŝt* "pelvo". – Cherpillod 1992, 106.

TASK/O (1; Be): A *task,* F *tâche.* Videble bazita sur A sed kun esenca apogo de F. ¶ Io = , Ie *tache,* Ia *carga* (kp A *charge* "komisio").

El L mez. *taxa* "kamparana labortasko (anstataŭanta imposton)", subst. de L mez. *taxare* "(impost)taksi" (vd. *taksi*).

TATU/I (1; Jü): A *tattoo* [-ú:], F *tatouer* [-u-], G *tätowieren,* †*tat(a)uieren,* I *tatu/are,* Po *-owac',* R *-irovat',* (H *-ar*). ¶ IoIeIa *tatuar.*

Pere de A el Tahitia *tatau* "(tatuita) signo, pentraĵo". – Cherpillod 1992, 106.

TAŬG/I (f; Un): G *taugen.* Kp Nd *deugen.* Bazita ekskluzive sur G; laŭ Collinson (1959, 10) 'utila verbo...sen vera ekvivalento en la romanaj lingvoj'. Pri altgermana *au* en Eo, vd. Collinson l.c. 4. ¶ 1894 *est/a bon/e.* ¶ Perifrazoj en la aliaj L.I., ekz. Io *esar bona/apta* ('konvena')*/kapabla,* Ie *esser apt* 'esti konvena', Ia *esser satis bon* 'esti sufiĉe bona'.

Ĝerm. vorto, kp ank. Sv *duga* "-i", Gt *daug* "-as"; samradika kun G *tüchtig* "kapabla, lerta", *Tugend* "virto". Oni komparas Li *daûg* "multe", R *dul̂ij* "fortika", Ir *dúal* "taŭga" (HE rad. **dhugh-,* de kiu ank. Gr *ty'khê* "bonŝanco").

TAVOL/O (f; RE): I *tavola.* Nur forme pruntita el I, ĉar la signifo estas alia (I *tavola* = "tablo, tabelo, tabulo, plato";

"tavolo" = I *strato*); oni povas kompari la analogan kazon *da*. La radiko devas esti prijuĝata kunlige kun *tabl-, tabul-, tabel-*, ĉiuj devenantaj de L *tabula* (vd. *tabulo* kaj Wiener 1950, 106). La evidenta vorto por tiu ĉi nocio, L *stratum*, ja estis okupita de alia signifo (Eo *strat/o*). Eble la L *tabulatum* "etaĝo" donis al Z la ideon preni radikon el la familio de L *tabula* "tabulo"; ĉar aliaj formoj jam estis rezervitaj, la elekto trafis I *tavola*. – Estas notinde, ke eo *stratum/o* aperis kiel geologia termino (GD, PIV). ¶ IoIa *strat/o*, Ie *-e*.

I *tavola* el L *tabula* "tabulo" (vd. tiun).

TE/O (f; Un): A *tea*, F *thé*, G *Tee*, I *tè*, H *té*; kp L bot. *Thea* "tearbedo". ¶ Io =, Ie *té*, Ia *the*.

El Ĉ *te*, dialekta prononco (Amojo) de Ĉ *chá* "teo" (> R *ĉaj*, P *chá* "teo").

TEATR/O (f', 1, 7; Du, RE): A *theatre*, F *théâtre*, G *Theater*, PoR *teatr*, I(H) *-o*; L *theatrum*.

El Gr *théatron* s.s., propr. "spektejo", der. de *theásthai* "spekti" de *théa* "vidaĵo", samradika kun *thaúma* "miraklo"; ekstergrekaj parencaj vortoj ne estas konataj. Parencaj vortoj en Eo: *teoremo, teorio*.

TED/I (f; RE): L *taedere*; I *tediare*. Kp A *tedious* "-a", (H *tedio* "-o"). Ĉefe bazita sur L, kies verba stemo sen *-i-* bone adaptiĝas al Ea vortformado. ¶ IoIe *tedar*; kp Ia subst. *tedio* "-o" (verbo mankas).

Necerta etimologio.

TEG/I (f; RE): Bazita sur L *tegere* (sup.-rad.: *tect-*) "kovri (kaŝi, ŝirmi, tegi)" sed kun sencoprecizigo ('kovri... tiamaniere ke la kovraĵo formas tuton kun la kovritaĵo', PV). Prijuĝenda kune kun *tegment/o*, kie Z ankaŭ faris sencmodifon; tiuj du radikoj apogas sin reciproke. ¶ Io *tegar*, kp Ia *teger* sin. de *coperir* "kovri"; Ie havas nur *covrir* "kovri".

De HE rad. **(s)teg-* "kovri", kp Sa *sthagáyati* "kovras, kaŝas", Gr *stégein* "kovri"; G *decken* "kovri", A *thatch* "(pajl)tegmenti", G *Dach* "tegmento", Sv *täcka* [ték-] "kovri". – Samfamiliaj vortoj en Eo: *protekti, tegmento, tegolo, togo*; par. estas ank. *ferdeko*.

TEGMENT/O (f; Un): L *tegmentum*. La elekto estas surpriza, ĉar tiu ĉi ne estas la kutima L vorto por "tegmento" (: *tectum*, kp F *toit*, I *tetto*), kvankam okaze tiel uzata (*tegmentum turris* "tegmento de turo"); normale ĝi signifas "kovraĵo, tegaĵo (ekz. vesto, haŭto)", kp A *(in)tegument*, F *tégument*, I(H) *tegumento* "tegaĵo, teganta haŭto" > eo *tegument/o* GD, PVS. Ŝajnas, ke Z prenis *tegment-* kvazaŭ pli precizan esprimon por "tegaĵo (de domo)". – Ps-sf *-ment*. ¶ Io *tekto*, Ie *tegment* (espismo), Ia *tecto*.

L *tegmentum* (kun paralelformoj *tegi-, tegu/mentum*) estas instrumenta subst. de *tegere* "kovri, tegi" (vd. *tegi*).

TEGOL/O (3; Jü): L *tegula*; A *tile* (kp *tegular* "-a"), F *tuile*, G *Ziegel*, I *tegola*, (H *teja*). Formo laŭ I, evidente ĉar **tegul-* povus esti misanalizata *teg/ul-* (kp sub *artikolo*). ¶ Ie *tegul*, Io *-o*, Ia *-a*.

Propr. "(io) teganta", der. de L *tegere* "kovri, tegi" (vd. *tegi*).

TEISM/O (2; Jü): A *theism*, F *théisme*, G *Theismus*, I *te/ismo*, PoR *-izm*, (H *-ísmo*). Ps-sf *-ism*. – Nomo de adepto: **TEIST/O** (2; Jü): A *theist*, F *théiste*, G *Theist*, IPo *te/ista*, R *-ist*. (H *-ísta*). Ps-sf *-ist*.

Kreitaj (en A, 17a jc) el Gr *theós* "dio" (vd. *teologo*) k la grekdevenaj sufiksoj *-ism, -ist* (vd. tiujn en la listo de ps-sf; kp spec. *ate/ismo, -isto*).

TEKNIK/O (3; Be) /**TEĤNIK/O** (3; *-a* let. 1887-11-27, Eisto 3/1889): A *techn/ique, -ics* [-k-], F *technique* [-k-], G *Technik* [-c-], I *tecnica*, Po *technika* [-ĥ-], R *teĥnika*, (H *técnica*). Ambaŭ formoj (*-k-, -ĥ-*) estas samrange oficialigitaj en OA3. Ekzistas fruaj ekzemploj de *-ĥ-*, sed en la fruaj vortaroj (Be, Jü, Ka) superregas *-k-*; post la oficialigo reaperas *-ĥ-*, sed nur kiel varianto (PV, GD, PIV). – Ps-sf *-ik*. ¶ Io *tekniko*, Ie *tecnica*, Ia *technica*.

Orig. subst.-igo de la responda adj.; el Gr *tekhnikós* "arta, artlerta, faksperta", adj. de

tékhnê "arto, metio, fako, scienco", samradika kun *téktôn* "ĉarpentisto, konstruisto" (kp *arkitekto*), de HE rad. **tekth-* (vd. sekv.).

TEKS/I (f; RE): L *texere* (sup.rad.: *text-*); F *tisser,* I *tessere,* (H *tejer,* P *tecer*). Krom la L verbo ankaŭ la apartenanta internacia adjektivo certe servis kiel apogo ĉe la radikelekto: L *textilis* "-ita", AF *textile* "-a, -aĵo", G *Textilien* "-aĵoj", R *tekstil'nyj* "-(aĵ)a". Kp ank. AF *texture* "teks(aranĝ)o". ¶ Io *texar,* Ie *texter,* Ia *texer.*

Orig. "plekti (kabanon), ĉarpenti", de HE rad. **tekth-* "konstrui, ĉarpenti", kp Sa *tákŝati* "fabrikas, ĉarpentas", *tákŝan-* "ĉarpentisto", Gr *téktôn* "ĉarpentisto" (kp *arkitekto*), *tékhnê* "arto, metio" (vd. *tekniko*), R *tesat'* "haki". Samfamiliaj vortoj en Eo: *preteksto, subtila, teksto, tolo.*

TEKST/O (f', 1; Du, PF, Jü): A *text,* F *-e,* (H *-o*), G *Text,* I *testo,* PoR *tekst;* L *textus.* ¶ IoIa *text/o,* Ie *-u.*

Propr. "teksaĵo (el literoj)", subst. de L *texere* "teksi" (vd. tiun).

TELEFON/O (1; E-isto 4/1890, Jü): A *tele/phone,* I *-fono,* PoR *-fon,* F *téléphone,* G *Tele/phon, -fon,* (H *teléfono*). Ps-pf *tele-*.

Farita (en F, ĉ. 1834) el Gr *tê'le* "malproksime" (vd. ps-pf *tele-*; kp *paleografo*) k *phônê'* "sono" (vd. *fonetiko*). Kp la sekvajn.

TELEGRAF/O (f', 1, 7; Du, Be): A *tele/graph,* I *-grafo,* PoR *-graf,* F *télégraphe,* G *Tele/graph, -graf,* (H *telégrafo*). Ps-pf *tele-*.

Farita (en F de Miot, 1792) el Gr *tê'le* "malproksime" (vd. ps-pf *tele-*) k *-graphos* "skribanto", agantnomo de *gráphein* "skribi", orig. "enĉizi", par. al G *kerben* "fari entranĉon" (HE rad. **gerbh-*). Por ambaŭ elementoj, kp. *paleograf(i)o;* la dua ankaŭ en *aŭto-, epi-, fono-, para/grafo, litografi, bio-, foto-, geo-, karto-, kosmo-, steno-, tipo-, topo/graf(i)o, aŭtobio-, ideo-, oro/grafio;* kp ank. la vortojn sub *telegramo.* Vd. ank. *grifelo, krabo.* Kp spec. sekv.

TELEGRAM/O (1; RE): APo *tele/gram,* IR *-gramma,* (H *-grama*), F *télégramme,* G *Telegramm.* Ps-pf *tele-;* ps-sf *-m(at).*

Farita (en A de E.P.Smith, 1852) el Gr *tê'le* "malproksime" (vd. ps-pf *tele-*) k *grám/ma -matos* "skribaĵo", subst. de *gráphein* "skribi" (vd. *telegrafo;* kp spec. *gramo*). Ankaŭ en *ana-, epi-, mono-, paralelo-, pro/gramo.*

TELER/O (f; Un): G *Teller.* Kp Ji *teler* (Szerdahelyi 1987, 123); ank. Da *tallerken.* Bazita sur G (por radikfina *-er,* vd. *talero*) kun eventuala inspiro de Ji. La evidenta romana ekvivalento (A *plate,* I *piatto,* [H *plato*] "telero"; F *plat* "plado") en sia origina formo kolizias kun *plat-,* bezonata por alia signifo; Z tamen utiligis F por formi *plad/o.* ¶ 1894 *asiet-* (< F *assiette*). ¶ Io *plado,* Ie *platil,* Ia *platto;* kp sub *plado.*

Ĝerm. vorto de romana origino: kp F *tailloir,* I *tagliere* "tranĉ/plato, -tabulo", der. de F *tailler* resp. I *tagliare* "tranĉi" (vd. *tajli*).

TELESKOP/O (2; RE): A *tele/scope,* I(H) *-scopio,* PoR *-skop,* F *téléscope,* G *Teleskop.* Ps-pf *tele-*. ¶ Io =, Ie *tele/scop,* Ia *-scopio.*

El L mod. *telescopium* (Galilei), formita el Gr *tê'le* "malproksime" (vd. ps-pf *tele-*) k *skopeín* "rigardi" (vd. *spektaklo*).

TELEVID/I (8; ne ĉe Z; Butin & Sommer; kp *tele/vid/i* PIV; *televid/i* Nylén 1954 kun alia senco ('esti klarvida'): Kiel estas videble el la tradukoj en OA8, la radiko *televid-* ne havas simplan ekvivalenton en la fontlingvoj (A *to watch television,* F *voir à la télévision,* G *das Fernsehen schauen* ktp); en Eo ŝajnas temi pri retrograda derivaĵo de la kunmeto *tele/vid/il/o* GD kaj/aŭ *tele/vid/ad/o* PVS, GD (orig. kun alternativa formo eo *televizi/o* Nylén, Léger & Albault 1961, poste kun specialigita senco 'tekniko k ĝenerala organizo de la televidado' PIV). – Ps-pf *tele-*. ¶ Io *spektar televiziono,* Ia **televider.*

Vd. ps-pf *tele-* resp. *vidi.*

TEM/O (f; RE): A *theme,* F *thème,* G *Thema,* IR(H) *tema,* Po *temat.* Ps-sf *-m(at).*

El Gr *thé/ma -matos,* propr. "io starigita/elmetita" (poste "elmetita tezo", en modernaj lingvoj "diskutata/priparolata ideo"), subst. de *tithénai* "meti, starigi" (kp la sam-

radikan *tezo*).

TEMP/O (f; Un) 1) kronol. 2) muz. 3) gram.: Senco 1 en L *temp/us -oris* (ank. 3), F *temps* (ank. 2, 3), I *tempo* (ank. 2, 3), (H *tiempo,* ank. 2, 3); senco 2 krome en APo *tempo,* G *Tempo,* R *temp*; senco 3 krome en G *Tempus.* Kp ank. A *tempor/ary,* G *-är* "kelktempa". [Kiel mnemonika apogo taŭgas ank. A *time* "tempo (1)"]. – Formo laŭ I (aŭ eble kiel mallongigo de la L stemo *tempor-,* utiligante la *-o-* kiel Ean substantivsignon); kp la analogajn *korpo, sterko* (vd. ank. *arbo*). ¶ 1878 *temp'.* ¶ Io = (1, 2, 3); Ie *témpor* (1, 3), *tempo* (2); Ia *tempore* (1, 3), *tempo* (2).

Se L *tempus* "tempo; ĝusta tempo, oportuna okazo; portempaj cirkonstancoj/kondiĉoj" (der.: *temporalis* "tempa", kp supre; *tempestas* "tempo. vetero, tempesto", vd. tiun lastan) orig. signifis "etendiĝo, daŭro", ĝi povas aparteni al HE rad. **ten-* "etendi, streĉi" (vd. *etendi*). Samfamiliaj vortoj en Eo: *tempio* (probable etimologie identa); *printempo, temperamento, temperaturo, templo.* (A *time* ne estas samradika; se la orig. signifo estis "[tempo]/-mezuro, -divido", ĝi povas esti par. al Gr *daíesthai* "dividi", vd. *geodezio.*)

TEMPERAMENT/O (1, Jü): APoR *temperament,* I(H) *-o,* F *tempérament,* G *Temperament.* Ps-sf *-ment.*

El L *temperamentum,* "(ĝusta) miksaĵo, ĝusta mezuro" (oni kredis, ke la proporcioj de la kvar korpaj likvaĵoj – sango, muko, flava k nigra galoj – konsistigis la humoron), subst. de *temperare* "miksi je ĝustaj proporcioj, ĝustigi, moderigi", samfamilia kun *tempus* "tempo" (kp ties signifon "kondiĉoj"). Vd. *tempo, trempi;* kp spec. sekv.

TEMPERATUR/O (1; Jü): A *temperat/ure,* IPoR(H) *-ura,* F *température,* G *Temperatur.* Ps-sf *-ur.* El L *temperatura* "(ĝusta) miksaĵo (de aeroj malvarma k varma)", subst. de *temperare* (vd. *temperamento*).

TEMPEST/O (8; Grabowski, PV; ne ĉe Z; antaŭe *vent/eg/o*): A *tempest,* I *-a,* (H *-ad*), F *tempête*; L *tempest/as -atis.* Formo probable laŭ la modernaj fontlingvoj A kaj I (sed ankaŭ L stemo finiĝanta per *-tat-* povas doni *-t* en Eo: kp *kvalito, majesto, societo, volupto*). Lanĉita – same kiel eo *ŝtorm/o* Rollet de l' Isle, Wü, PV (el A *storm,* G *Storm*) – kiel anstataŭaĵo de la tro nepreciza *ventego.* ¶ Io =, (kun fulmotondro) *sturmo*; Ie *tempest, storm*; Ia *tempesta.*

L *tempestas* "vetero", spec. "tempesto, malbona vetero", ank. "tempo" (kp semantike F *temps,* I *tempo* "tempo; vetero") estas der. de *tempus* "tempo" (vd. tiun).

TEMPI/O (f; RE): A *temple,* F *tempe,* I *tempia*; L *temp/us -oris.* Kp P *têmpora* "-o", , H *temporal* "-a". La fontlingvoj donas eblecon al diversaj radikformoj: **templ-, *temp-, tempi-, *tempus-, *tempor-.* La du unuaj el tiuj eblecoj estis jam utiligitaj por aliaj signifoj. Anstataŭ adopti unu el la L stemoj, Z elektis I kiel fonton (analoge *paĝi-* laŭ I por eviti kolizion kun *paĝ-*); kredeble li volis evitigi misan asociiĝon al "tempo", kian la L formoj riskis kaŭzi. ¶ Io *temporo,* Ie *tempie* (espismo), Ia *tempora.*

Homonimo de L *tempus* "tempo" k probable identa kun tiu; la orig. signifo estus "streĉitaĵo, streĉita haŭto" (HE rad. **ten-* "streĉi, etendi", vd. *etendi* k kp *tempo*).

TEMPL/O (1; Jü): AF *temple,* G *Tempel,* I *tempio,* (H *templo*); L *templum.*

L *templum* orig. "spaco" (> "enfermejo por aŭgurado" > "konsekrita loko" > "konsekrita konstruaĵo"), eble ligita kun L *tempus* (vd. *tempo*), se ties orig. signifo estis "etendiĝo, spaco".

TEN/I (f; Un): L *tenere*; F *ten/ir,* I *-ere,* (H *-er*). Kp A *-tain* [tein] en kunmetoj: *abstain* "sindeteni", *retain* "reteni" (kun subst. *abs-, re/tention*) ktp. ¶ Io *ten/ar,* Ie Ia *-er.*

L *tenere* (kun sup.rad. *tent-*) estas radikidenta kun L *tendere* "streĉi" (vd. *etendi, tendenco* k kp la sekvajn); *teni* orig. "teni [ion] streĉita". Samfamiliaj vortoj en Eo: *abstini, aparteni, impertinenta, kontenta, kontinento,*

kontinua, leŭtenanto, tenoro.

TEND/O (f; RE): A *tent,* F *-e,* I *tenda,* (H *tienda*); L *tentorium.* Por eviti kolizion kun *tent-,* Z adoptis la I formon (ne temas tie ĉi pri konsonantŝanĝo, kiel implicas Szerdahelyi 1987, 131). ¶ Io =, Ie *tenda,* Ia *tenta.*

Propr. "(ŝtofo) etendita", subst.-igo (en L mez.) de la ptc.perf. *tentus* de L *tendere* "etendi" (vd. sub *tendenco*); de la sama ptc. estas derivita L *tentorium.*

TENDEN/O (f; RE): AF *tendon,* I *tendine,* (H *tendón*); L med. *tend/o -inis.* Evidente bazita sur L(I) (anatomia termino) kun posta vokalŝanĝo *i* > *e* por eviti aspekton de vorto finiĝanta per la virina sufikso (vd. sub *abomeni*). ¶ Io *tendino,* Ie *tendon,* Ia *tendine, tendon.*

Tardepoka der. de L *tendere* "streĉi, stringi" (vd. sekv.; kp semantike Gr *ténôn* "tendeno" de *teínein* "streĉi").

TENDENC/O (1; Jü): A *tend/ency,* F *-ance,* I *-enza,* Po *-encja,* R *-encija,* (H *-encia*). Ps-sf *-enc.*

Romana der. de L *tendere* en la senco "celi al [io], direkti sin [al io], strebi [al io]", orig. "streĉ(iĝ)i, etend(iĝ)i"; L *tend-* reprezentas plivastigon de HE rad. **ten-* "streĉi" (vd. *etendi;* por parencaj vortoj en Eo, vd. s.t.v. k *teni,* ev. ank. *tempo*). Kp spec. *tenti.*

TENER/A (8; PG, PVS; ne ĉe Z; antaŭe *kares/em/a, (kor)/mol/a, mild/e am/em/a* k.s.): L *tener,* A *tender,* F *tendre,* I *tenero,* (H *tierno*). Probable ĉerpita el L. ¶ Io =, Ie *tendri,* Ia *tenere.*

Latin(id)a adj. sen certa etimologio; oni komparis unuflanke L *tenuis* "maldika" (identa kun Sa *tanú-,* A *thin,* G *dünn* s.s.), aliflanke Sa *táruna-* "juna, freŝa, tenera".

TENI/O (1; Jü): L *taenia;* F *ténia,* I(H) *tenia.* Zoologia termino prenita el L (por L *ae* > Eo *e,* kp *precipe, preter, ve*). ¶ Io =, IeIa *tenia.*

El Gr *tainía* s.s., orig. "rubando, bendo", samradika kun *teínein* "streĉi" (vd. sub *etendi*).

TENOR/O (1; Be): APoR(H) *tenor,* I *-e,* F *ténor,* G *Tenor.*

I muzika termino, propr. pri la voĉo kiu sekvas la ĉefmelodion, el L *ten/or -oris* "seninterrompa moviĝo, daŭrado" de *tenere* "teni" (kp semantike L *continuus* "kontinua" de la sama radiko), vd. tiun.

TENT/I (f; Un): A *tempt,* F *tent/er,* I *-are,* (H *-ar*); L *tentare, temptare.* ¶ IoIeIa *tentar.*

L *tentare* estas intensa verbo de *tendere* "streĉi, etendi" (semantika evoluo: "sin streĉi (por atingi ion)" > "atinginte pripalpi, esplori [ion]" > "provi [ion, iun]" > "tenti"); vd. *tendenco* k plue *etendi.* Kp spec. *atenci.* – La var. *tempt-* (LA) povas havi alian devenon, sed ĝiaj koneksoj estas tiuokaze necertaj.

TEOKRAT/O (7; PIV): A *theocrat,* I *teocrate* (kun ebleco al analogaj formaĵoj en la aliaj fontlingvoj; kp la formojn sub *demokrat/o*). – Nomo de reĝimo: **TEOKRATI/O** (2; Jü): A *theocracy,* F *théocratie,* G *Theokratie,* I *teo/crazia,* Po *-kracja,* R *-kratija,* (H *-cracía*). Ps-sf *-i* 1.

El Gr *theokratía* "regado de dio" el *theós* "dio" (vd. *teologo*) k *krateín* "regi" (vd. *demokratio*). La individua nomo estas farita analogie, kp *aristo-, demo/krato.*

TEOLOG/O (1; Ka; antaŭe *teologi/ist/o* Be): A *theologist,* F *théologien,* G *Theologe,* I *teo/logo,* PoR *-log,* (H *teólogo*); L *theologus.* – Nomo de scienco: **TEOLOGI/O** (1; RE): A *theology,* F *théologie,* G *Theologie,* IPo *teo/logia,* R *-logija;* L *theologia.* Ps-sf *-i* 1.

La sciencnomo el Gr *theología* "scienco pri diaj aferoj", propr. "diskutado pri la dioj", subst. de *theologeín* "diskuti pri la dioj", der. de *theológos* "(iu) kiu parolas pri la dioj", kunm. de *theós* "dio" (kun pridisputata etimologio, ĉiuokaze ne par. al L *deus* "dio") k *-logos,* agantnomo de *légein* "paroli" (vd. *logiko*). Al la familio de la unua elemento apartenas *apoteozo, ate/ismo, -isto, te/ismo, -isto, teokrat/o, -io.*

TEOREM/O (2; Be): A *theorem,* F *théorème,* G *Theorem,* IR(H) *teor/ema,* Po *-emat;* L *theore/ma -matis.* Ps-sf *-m(at).*

El Gr *theô'rê/ma -matos* "teoremo, teorio, spekulativo", subst. de *theôreín* "spekti, observi, spekulativi, teorii" (vd. *teorio*). **TEORI/O** (f', 1, 7; Du, RE): A *theory,* F *théorie,* G *Theorie,* IPo *teor/ia,* R *-ija,* (H *-ía*). Ps-sf *-i* 1.

El Gr *theôría* "teorio, spekulativo, kontemplado", orig. "spektado, observado" (kp *theôreín* "observi, spekulativi", vd. *teoremo*), der. de *theôrós* "spektanto, observanto" de *théa* "vidaĵo, spektaklo" (vd. *teatro*) k *-oros,* agantnomo de *horán* "vidi" (vd. *panoramo* k plue *gardi*).

TER/O (f; Un): L *terra;* F *terr/e,* I *-a,* (H *tierra,* kp *terrestre* "-a"). Kp A *terrestrial* "-a". Pluraj notindaj internaciaj derivaĵoj, vd. *teraso, tereno, teritorio.* ¶ Io =, Ie Ia *terra.*

Par. al Ir *tir* "lando", probable orig. "sekaĵo" (> "sek-tero" > "tero"), kp L *torrere* "sekigi", G *dörr* "seka" (HE rad. **ters-*). Samfamiliaj vortoj en Eo: *partero, teraso, tereno, teritorio.*

TERAPI/O (1; LInt 4/1896, Jü): A *therap/y, -eutics,* F *thérapeutique,* G *Therapie,* IPo *terap/ia,* R *-ija,* (H *terapéutica*). La pli longa formo propradire signifas la sciencon pri kuracrimedoj (eo *terapeŭtik/o* Jü). (Ps-sf *-i* 1.) ¶ Io =, Ie *terapie,* Ia *therap/ia, -eutica.*

El Gr *therapeía* "flegado", orig. "servado", subst. de *therapeúein* "servi", der. de *théraps* "servisto" (pli ofte *therápôn,* ank. *therapeutê's*), eble de pregreka origino.

TERAS/O (f; RE): A *terr/ace* [-s], F *-asse,* I *-azza* [-ts-], R *-asa,* (H *-aza,* kp P *-aco* [-s-]), G *Terrasse,* Po *taras.* Eo *-s* reprezentas la prononcon de AFGPoR. ¶ Io =, Ie *terrass/e,* Ia *-a.*

El Oc ant. *terrassa* s.s., der. de *terra* "tero" el L *terra* s.s. (vd. tiun).

TERCET/O (1; Jü) 1) muz. 2) metr.: A *tercet* (2), F *terzetto* (1), *tercet* (2), G *Terzett* [-ts-] (1), I *terz/etto* (1), *-ina* (2), Po *tercet* (1), R *terc/et* (1), *-ina* (2), (H *terceto* 1, 2). Verŝajne bazita sur la I muzika termino, kvankam pro ortografiaj reguloj la Ea formo pli similas al Po. La muzika signifo estas la origina kaj la sola oficiala; poste, kredeble pro la koincido kun AF, la radiko estis registrita ankaŭ kiel metrika termino (GD, PIV). Kp la neologismon *tercin/o* (metr.), vd. Mon 4/1994, 22 (Kamaĉo). ¶ Io = (1, 2), Ie *ters/ette* (1), *-ine* (2), Ia **terzetto* Cleij (1), **terza rima* Cleij (2; < I).

Propr. "trio", der. de I *terzo* "tria" el L *tertius* s.s. (vd. sub *tri*).

TEREBINT/O (f; RE): L farm. *terebinthina;* A *turpentine,* F *thérébenthine,* G *Terpentin,* I(H) *trementina* (kp IH *terebinto* "-arbo"), Po *terpent/yna,* R *-in.* La fontlingvoj prezentas formojn kiuj ŝajne finiĝas per la kemia sufikso *-in* (vd. ps-sf *-in* 2) [envere temas pri adjektivsufikso, vd. sube]. En tiu ĉi frua radiko Z apokopis ĝin, certe por preventi sufiksidentan radikfinon; eble kontribuis la principo ('de sufiĉo') eviti tro longajn radikojn. Kp tamen 1894. – La radikformo kopias L (ĉar farmakologia termino?). ¶ 1894 *terebintin-.* ¶ Io *terpentino* (kp *terebinto* "-arbo"), Ie *terebintine,* Ia *terebinthina* (kp *terebintho* "-arbo").

Propr. "terebintarba (rezino)", adj. devenanta de Gr *terebínthinos* s.s., der. de *terébinthos / términthos* "-arbo", pregreka vorto de nekonata origino.

TEREN/O (8; Backman 1921, Wü, PV; ne ĉe Z): AF *terrain* [A -ein, F -ê´], G *Terrain* [=F], I(H) *terreno,* Po *teren.* Bazita sur la IPo(H) formo pro pli facila asimileblo. ¶ Io =, Ie *terren,* Ia *-o.*

El L *terrenum,* subst.-igo de adj. *terrenus* "tera" (vd. *tero*).

TERITORI/O (2; LInt 1/1898, Jü): L *territorium;* A *territ/ory,* F *-oire* (kp *territorial* "-a"), I(H) *-orio,* G *Territorium,* Po *terytorium.*

Formo laŭ L(I), koincida kun la ps-sf *-ori.* L der. (kun obskura sufiksformaĵo) de *terra* "tero" (vd. tiun).

TERMIN/O (f; EG): L mez. *terminus;* A *term,* F *-e,* I *-ine,* PoR *-in,* G *Terminus,* (H

término). Pluraj el la fontlingvoj montras radikfinan *-in* same kiel Eo; tamen, la decidiga kialo por la elekto de tiu formo probable estis la tute internacia derivaĵo A *termino/logy,* F *-logie,* I *-logia,* R *-logija,* (H *-logía*), G *Terminologie* (kp eo *termino/logio* GD, PIV). – Ankaŭ la mallonga formo AF *term(e)* estis utiligata kiel eo *term/o* (mat.) Jü – diferencigo ne aplikata de la fontlingvoj. ¶ Io =, Ie *término,* Ia *termino.*

El L *terminus,* orig. "lim(ŝton)o, fino" (> "difinilo"; kp *determini,* propr. "fiksi la limojn [de io]", semantike ank. *difini*), kp Gr *térmôn* "limo (de HE rad. **ter-* "transiri", vd. sub *trans*). Samfamilia estas ank. *ekstermi.*

TERMIT/O (1; RE): PoR *termit,* AFI *-e,* G *Termit,* (H *térmite*); L zool. *Term/es -itis* (fam. *Termitidae*).

Moderna uzo (Lineo) de L postkl. *term/es -itis* "lignovermo", ligita kun L *terere* "froti, skrapi"; kp Gr *terêdô´n* "borvermo", *teírein* "froti" (HE rad. **ter-,* vd. *draŝi*).

TERMOMETR/O (1; RE): A *thermo/meter,* F *-mètre,* G *Thermometer,* I *termo/metro,* PoR *-metr,* (H *termómetro*).

Farita (en F, 17a jc) el Gr *thermós* "varma" (vd. tiun) k *métron* "mezur(il)o" (vd. *metro*).

TERN/I (f; RE): F *éternuer,* I *sternut/are, -ire,* (H *estornudar*); L *sternuere.* Bazita sur F kun aferezo de *e-* (Waringhien LV 76), kp spec. F *éclairé* > Eo *klera,* F *écluse* > Eo *kluzo* (la aferezoj trafas plej multe vokalojn, vd. Waringhien l.c., Szerdahelyi 1987, 135). La motivo evidente estas, ke *stern-* estis (samtempe) akceptata kun alia signifo; ev. **sternu-* estis eble evitata pro neoportunaj hiatoj. ¶ 1894 *sternut-* (L sup.rad.). ¶ IoIeIa *sternutar.*

L *sternere* (sup.rad. *sternut-,* de kiu la intensa verbo *sternutare* > HI) estas par. al Gr *ptárnysthai* s.s. (HE rad. **pster-*, de onomatopea origino).

TERUR/O (f; Un): L *terr/or -oris;* A(H) *terr/or,* F *-eur,* I *-ore.* Kp G *Terror,* PoR *terror* 'politika terurado' (> eo *teror/o* Dipl, Wü [kun var. *terur/ism/o*]). Nek la kialo nek la inspirfonto de la Ea vokalismo *-u-* estas klara. Estas neprobable, ke Z elektis tiun vokalon por lasi libera *teror-* al la politika senco, bone esprimebla per kunmetaĵo. Eventuala kolizio kun *ter-* kaj *or-* (Yamasaki s.v.) ŝajnas neglektebla. La vokalo mem povas esti simpligita ortografio de F (kp ev. *-our* [ur] en iuj samkategoriaj vortoj, ekz. *amour* "amo"), aŭ esti elektita kiel fonetika najbaro de [o]. Ps-sf *-or* 2, var. *-ur.* ¶ 1882 *strap-* (< R *straŝnyj* "-a", PVZ 5, 147). – 1894 *teror-.* ¶ Io *teroro,* Ie *terr/ore,* Ia *-or.*

Subst. de L *terrere* "timigi, terurigi" de HE rad. **ter(s)-* "tremi", kp Sa *trásati* "tremas", Gr *trein* "tremi", R *trjastis'* "tremi".

TESTAMENT/O (f; RE): AFPo *testament,* I(H) *-o,* G *Testament;* L *testamentum.* Ps-sf *-ment.*

Der. de L *testari* "preni kiel atestanton; atesti, aserti, fari testamenton" de *testis* "atestanto" (vd. *atesti;* kp spec. sekv.).

TESTIK/O (f; RE): A *testi/cle,* F *-cule,* I *-colo,* G *Testikel,* (H *testículo*); L *testiculus.* Apokopo de *-ul;* pri analogaj okazoj, vd. sub *artikolo.* ¶ 1894 *testikl-.* ¶ Io *testikulo,* Ie *testicul,* Ia *-o.*

Dim. de L *testis* "testiko", propr. "atestanto (pri vireco)", vd. *testamento* k plue *atesti.*

TESTUD/O (f; RE): L *testud/o -inis;* I *testuggine.* Kp P *testudo.* Bazita sur L (kiel zoologia termino) kun utiligo de la fina *-o* kiel Ea substantivsigno (vd. sub *homo*). ¶ Io *tortugo,* Ie *tortuga,* Ia *testudine, tortuca* (kp A *turtle, turtoise,* F *tortue,* I *tartaruga,* H *tortuga*).

Der. de L *testu,* var. de *testa* "argila vazo, ŝelo, tegaĵo" (evidente aludanta pri la kiraso de la besto).

TETAN/O (f; RE): L *tetanus;* A *tetan/us,* I *-o,* F *tétanos,* G *Tetanus,* (H *tétano*). Sencospecialigo ("pro evoluo de scienco", Albault en Fund., p. 350) kaŭzis enkon-

dukon de du diferencigitaj radikoj: eo *tetani/o* GD (< F *tétanie*) kaj *tetanos/o* PIV (kp F supre kaj Gr sube). ¶ IoIa =, Ie *tétano.*

El Gr *tétanos* s.s., propr. "streĉiĝo", subst. (kun duobligo) respondanta al la verbo *teínein* "streĉi" (kp *tono,* vd. plue sub *etendi*).

TETR/O (f; RE): L zool. †*Tetrao/Lyrurus tetrix.* La radiko devas esti prijuĝata kune kun la sekva ĝemelo, samtempe aperanta. Unuavide ŝajnas prudente rigardi ambaŭ kiel devenantajn de la (tie ĉi nun ne aktuala) L genra nomo *Tetrao,* ĉi-kaze kun apokopo de *a* (kiel sugestas Ka kaj Bastien). Tamen estas pli probable rigardi la formon kiel reprezentanton de la specia nomo *tetr-ix* (tiel Yamasaki s.v., Wüster Esp.princ. 58; kp *cikatr/o* < *cicatrix, koturno* < *coturnix*). Gravas ankaŭ kiel apogantoj F *(petit) tétras,* R *teterev* s.s.; oni eĉ povas konsideri *tetr-* kiel la komunan parton de la LFR vortoj. ¶ Io *tetraso,* Ie *tetrix,* Ia (Nordin)**gallo silvestre* 'arbara koko', **tetrice.*

El Gr *tétrix, tétrax* s.s.(?), kp Sa *tittirá-* "perdriko" (la nomoj estas de onomatopea origino). Kp sekv.

TETRA/O (f; RE): L zool. *Tetrastes bonasia.* Oni povas rigardi la Ean formon kiel mallongigon de la genra nomo (tiel Yamasaki s.v.), kvankam ŝajnas al mi pli probable ke Z adoptis la plenan genran nomon *Tetra/o* (gen.: *-onis;* nominativa *-o* rolanta kiel Ea substantivsigno, vd. *homo*), utiligebla ĉar la aktuala specio apartenas al la familio *Tetraonidae* (el kies ea nomo *tetraonedoj* oni ekstraktis la nomon eo *tetraon/o* GD, PIV). [Kelkaj vortaroj (ekz. Ka, GD) eĉ prezentas *tetra/o* kiel ekvivalenton de la genra nomo *Tetrao,* sed kp UV.] ¶ Mankas speciala termino en Io; Ie *tetraste, gelinotte* (< F *gélinotte*), Ia **tetraste* Ruhrig.

L *tetra/o -onis* estis nomo de kelkaj birdoj ("numido, tetrao, urogalo") same kiel ĝia fonto Gr *tetrá/ôn -ônos* (de onomatopea origino same kiel la vortoj cititaj sub *tetro*).

TEZ/O (f; RE): A *thesis,* F *thèse* [-z], G *These* [-z-], I *tesi* [-z-], Po *teza,* R *tezis,* (H *tesis*). Ps-sf -z.

El Gr *thésis* "starigo, elmet/o, -ita aserto" (kp semantike *proponi* el L *ponere* "starigi, meti"), subst. de *tithénai* (bazo *thê-*) "meti, starigi" de HE rad. **dhê-* "meti" (vd. sub *fari*). Kunmetoj: *anti-, hipo-, paren-, sin/tezo;* kp plue *epiteto, temo* k *apo-, biblio-, hipo/teko.*

TIA (f:Un): Vd. la sekcion pri korelativaj vortoj. ¶ 1882 *fa.* – 1894 *tale* (< L *talis,* I *tale,* F *tel,* H *tal*). ¶ Io *tala,* IeIa *tal.*

TIAL (f; Un): Vd. la sekcion pri korelativaj vortoj. ¶ 1881 *fej.* – 1894 *por ho* ('pro tio'). ¶ IoIe *pro to,* Ia *igitur* (< L), *a causa de isto.*

TIAM (f; *tian* Un; *tiam* Ald, RE): Vd. la sekcion pri korelativaj vortoj. ¶ 1881 *fan.* – 1894 *tum* (< L). ¶ Io *lore* (< F *alors,* I *allora*); Ie *tande* (korelativo de *quande* "kiam?"); Ia *alora, tunc* (< L).

TIAR/O (2; Jü): AIPoR(H) *tiara,* F *tiare,* G *Tiara.* ¶ Io =, IeIa *tiara.*

Pere de L *tiara* "orientlanda kapvesto, 'turbano', 'tiaro'" el Gr *tiára* s.s., kredeble de persa origino (laŭ Cherpillod 1992, 107 el vorto responda al Irana *târak* "verto").

TIBI/O (f; RE): LAFI(H) *tibia.* ¶ Io =, IeIa *tibia.*

L *tibia* ank. "fluto"; ĉu origine "stango"? Necerta deveno. Kp *tigo,* etimologie identan.

TIE (f; Un): Vd. la sekcion pri korelativaj vortoj. ¶ 1881 *fi.* – 1894 *ibu* (< L *ibi*). ¶ Io *ibe;* Ie *ta* (*t-* analoge al *to* "tio"; *-a* eble el F *là*); Ia *ibi, illac* (< L).

TIEL (f; Un): Vd. la sekcion pri korelativaj vortoj. ¶ 1881 *fe.* – 1894, 1906b *sik* (< L *sic*). ¶ Io *tal(manier)e* (kp *tala* "tia"); Ie *talmen* ('tiamaniere'); Ia *tam* (< L), *(as)si* (< H *así,* F *ainsi, aussi, si;* kp I *così*).

TIES (f', 7; PR): Vd. la sekcion pri la korelativaj vortoj. ¶ Mankas en la aliaj L.I. (Io *di ita,* Ia *de ti,* Ia *de iste/ille*).

TIF/O (f; Jü): L mod. *typhus;* AF *typhus,*

G *Typhus,* I(H) *tifo,* Po *tyfus,* R *tif.* ¶ Io =, Ie *tif,* Ia *typho.*

El Gr *ty'phos* "speco de febro kun letargio" (Hipokrato), propr. pri 'nebuligita kapo', ĉar orig. "nebulo, fumo, vaporo" (responda verbo *ty'phesthai* "fumi"), de HE rad. **dheu-* (vd. *fumo*).

TIG/O (8; Ve, PV; antaŭe *trunk/et/o* Waringhien LV 89): F *tige* [tiĵ]. Enkondukita (laŭ F ortografio) de Vérax, kiu ĉerpis ĝin el la franca botanika vortareto de Gillet & Magne. ¶ Io *stipo,* Ie *stip* (< L *stipes*); Ia *pedunculo* (< L *-us*).

El L *tibia* "tibio; fluto", evidente pro forma simileco. Etimologie identa: *tibio.*

TIGR/O (f; RE): A *tiger,* FI(H) *tigre,* G *Tiger,* Po *tygrys,* R *tigr;* L *tigris.* Formo sen *e* laŭ la plimulto de la fontlingvoj.

Pere de Gr *tigris* s.s. de persa deveno (kp ev. Av *tigri-* "sago"). – Cherpillod 1992, 107.

TIKL/I (f; RE): A *tickle* [tikl]. Forme bazita ekskluzive sur A, la radiko tamen povas aludi pri G *kitzeln* kaj la romana ekvivalento F *titill/er,* I *-are,* (H *titilar*), kies formo eble estis konsiderata neoportuna pro la sufikssimila *-il.* ¶ Io *titil/ar,* IeIa *-lar.*

A *tickle* estiĝis per metatezo el *kittle* s.s. (kp Sv *kittla*). De onomatopea origino.

TILI/O (f; RE): L *tilia;* F *tilleul* [-j-], I *tiglio* [-l'-], (H *tilo,* kp P *tília*). Bazita sur la L formo (botanika termino), kie *-li-* respondas al la latinida [l'] (pri analogaj kazoj en Eo, vd. *bataliono*). ¶ 1881 *dill-* (sama etimo). ¶ Io =, Ie *tili/e,* Ia *-a.*

L *tilia* (F el ties dim. **tiliolus*) estas eble ligita kun Gr *pteléa* "ulmo".

TIM/I (f; Un): L *timere* (kun *tim/or -oris* "-o"); I *tem/ere,* (H *-er*). Kp A *tim/id, -orous,* F *-ide,* I *-ido* "-ema". ¶ 1881 *tim-,* ¶ Io *tim/ar,* IeIa *-er.*

Necerta etimologio.

TIMIAN/O (f; RE): F *thym,* A *-e,* G *Thymian,* I *timo,* Po *tymianek,* R *timiam,* (H *tomillo*); L *thymus.* Kp Sv *timjan.* Formo laŭ G(PoR) por eviti kolizion kun *tim-,* kiun formon sugestas la aliaj fontlingvoj. ¶ Io =, Ie *tim,* Ia *thymo.*

GPoR el Gr *thymíama* "incensaĵo" de *thymián* "incensi", der. de *thymós* en ties orig. senco "fumo" (> "spiro" > Gr klas. "animo"), vd. s.t.v. – La mallonga formo devenas de la samradika Gr *thy'm/on, -os* "timiano", der. de *thy'ein* "incensi, oferi". La planto estis utiligata ĉe incensoferoj pro sia bonodoro.

TIMON/O (f; RE): F *tim/on,* I *-one,* (H *-ón*); L *tem/o -onis.* Bazita sur FI. ¶ Io =, IeIa *timon.*

La latin(id)a vorto estas eble radikidenta kun la ĝermana ekvivalento (G *Deichsel*): HE bazo **tenk-?*

TINDR/O (2; Jü): A *tinder,* G *Zunder,* Bazita sur A; rilate la ellason de (senakcenta) *e* kp *fingro, mastro, vintro* (Cherpillod 1990, 24). ¶ Io =, Ie *tindre;* Ia *fomite* (< L *fom/es -itis*).

Ĝerm. vorto (pĜ **tundro-*), propr. "ekbruligilo", kp G *zünden,* Sv *tända,* Gt *tandjan* "ekbruligi".

TINE/O (f; RE): L *tinea;* F *teigne,* I *tignola,* (H *tiña*). Bazita sur L kiel zoologia termino. ¶ Io =, IeIa *tinea.* (I reprezentas L dim. **tineola*).

Necerta etimologio.

TINK/O (2; Jü): L *tinca;* A *tench,* F *tanche,* I *tinca,* (H *tenca*). Zoologia termino prenita el L. ¶ Io *tencho,* Ia **tinca;* ne trovita en Ie.

La vorto estas kredeble de gaŭla origino.

TINKTUR/O (2; Jü) 1) kolorigaĵo 2) farm. (Ka): A *tincture* (2), F *teinture* (1, 2), G *Tinktur* (2), I(H) *tintura* (1, 2), Po *tynktura* (2), R *tinktura* (2); L *tinctura* (1 ["kolorigado"], 2). Por la senco 2, Butler 1967 enkondukis la diferencigon *tintur/o.* -Ps-sf *-ur.* ¶ Io *tint-uro* (1), *dissolv-uro* (2); Ie *tintura* (1), *tinctura* (2); Ia *tinctura* (1, 2).

Propr. "kolorig/ado" (> "-aĵo"), subst. de L *tingere* "kolorigi" (> F *teindre,* H *teñir,* I *tingere* s.s.), identa kun Gr *téngein* "malsekigi", G *tunken* "trempi" ([H]E **teng-*).

TINT/I (f; RE): F *tinter,* I *tintinnare,* (H

tintinear); L *tinnire, tintinn/are, -ire*. Bazita sur F. ¶ 1882 *tint-*. ¶ Io *tinklar* (< A *tinkle*); Ie *tin/tinar*, Ia *-tinnar*. F *tinter* el L *tinnitare*, intensa formo de *tinnire*. Onomatopea.

TIO (f; Un): Vd. la sekcion pri la korelativaj vortoj. La komenca *t-* kaj la fina *-o* povas esti inspiritaj de Po *to* "tio ĉi", R *to* "tio", Gr *to* (orig. "tio", en Gr klas.:) "la". ¶ 1881 *fo*. – 1894 *id* (< L). ¶ Io *(i)to*, Ie *to*; Ia *illo* (< L *illud*).

La cititaj pronomoj PoRGr el HE **tod* "tio". Kp *tamen*.

TIOM (f; Un): Vd. la sekcion pri korelativaj vortoj. ¶ 1894 *tantu* (< L *tantum*). ¶ Ie *tant*, Io *-e*, Ia *-o*.

TIP/O (1; N-ro 52 1892, Jü) 1) modelo karakteriza 2) tip. (Z, Wü, PV): AF *type* (1, 2), G *Typ(us)* (1), *Type* (2), I(H) *tipo* (1, 2), Po *typ* (1), R *tip* (1). ¶ Io = (1, 2); Ie *tip* (1; en senco 2 normale *líttere*); Ia *typo* (1, 2).

Pere de L *typus* "bildo, figuro" el Gr *ty´pos* "bato", poste pri la rezulto de bato/frapo: " premsigno, marko, stampo, skribsigno, reliefo, matrico, modelo, bildo, figuro, ĝenerala karaktero, tipo", subst. de *ty´ptein* "bati", par. al Sa *tupáti* "vundas", R *topot* "piedfrapo", L *stupere* "esti paralizita", de HE rad. **(s)teu(p)-* "bati" (kp alian plivastigon **(s)teu(d)-* sub *kontuzi*). – Etimologie identa estas *tajpi*, samfamiliaj *prototipo* k la sekvaj.

TIPOGRAF/O (7; Wü, GD; antaŭe *tipografi/ist/o*, kp *tipografisto* LInt 11/1898): A *typo/grapher*, F *-graphe*, Po *-graf*, G *Typograph*, I *tipo/grafo*, R *-graf*, (H *tipógrafo*). – Nomo de arto: **TIPOGRAFI/O** (1; Ald, PF, PV): A *typo/graphy*, F *-graphie*, Po *-grafia*, G *Typographie*, I *tipo/grafia*, R *-grafija*, (H *-grafía*). Ps-sf *-i* 1.

La artnomo el L mod. *typographia* (15a jc), farita el Gr *ty´pos* en la senco "skribsigno" (vd. *tipo*) k *gráphein* "skribi"; la personnomo analoge al aliaj doktaj vortoj faritaj per *-graphos* "skribanto" (vd. *telegrafo*).

TIR/I (f; Un): F *tir/er*, I *-are*, (H *-ar*). Internacia kunmeto: A *retire*, F *se retirer* (refl.), G *retirieren*, I *ritirarsi* (refl.), R *retirovat'sja*, (H *retirarse* [refl.]) "retiriĝi". ¶ Io IeIa *tirar*; Ie ank. *traer*, Ia *traher* (< L *trahere*).

Romana vorto, kiu postulas L vulg. **tirare*, kies origino estas obskura; el multaj nepruveblaj hipotezoj ŝajnas plej kredebla tiu, kiu sugestas prunton de ĝerm. **teran* (A *tear* "ŝiri", Gt *gataíran* "disŝiri").

TIRAN/O (1; RE): FPo *tyran*, A *-t*, G *Tyrann*, R *tiran*, I *-no*, (H *-o*); L *tyrannus*. ¶ 1881 *tirann-*. ¶ Io =, Ie *tirann*, Ia *tyranno*.

El Gr *ty´rannos* "aŭtokrato, despoto, mastro", sendube de ekstergreka deveno.

TITAN/O (1; Jü): A *Titan*, FR *titan*, I *-o*, G *Titan*, Po *tytan*, (H *titán*); L *Tit/an -anis, Titanus*; Gr *Titan* (plej ofte plur.: *Titánes*). ¶ Io =, Ie *titane*, Ia *Titan*.

Greka vorto sen etimologio.

TITOL/O (f; RE) 1) surskribo 2) ofica distinga nomo: A *tit/le*, F *-re* (kp *intituler* "-i"), I *-olo*, G *Titel*, Po *tytul'*, (H *título*) (ĉiuj 1, 2), R *titul* (1); L *titulus* (1, 2). Latina vorto traktita laŭ itala maniero (vd. *artikolo* por similaj ekzemploj) por eviti radikfinon koincidan kun la sufikso *-ul*. ¶ Ie *titul*, IoIa *-o*.

L *titulus* ank. (eble orig.) "afiŝtabulo". Necerta etimologio.

TIU (f; Un). Vd. la sekcion pri korelativaj vortoj; kp la komentojn pri *tio*. ¶ 1881 *fu*. – 1894 *is* (< L). ¶ Io *(i)ta*, Ie *ti* (por ambaŭ kp sub *tio*); Ia *ille* (< L).

TOG/O (2; Jü). LAIPoR(H) *toga*, F *toge*, G *Toga*. ¶ Io =, IeIa *toga*. Propr. "tegaĵo", radikidenta kun L *tegere* "tegi" (vd. tiun).

TOL/O (f; Un): F *toile* [tŭal], I *tela*, (H *tela de lino* 'ŝtofo el lino'). Bazita sur F kun monoftongigo *oi* > *o* (kiel en *kroz/i*). Formo **tual-* estis neoportuna pro *tualet/o*. ¶ 1894 *tel-*. ¶ Io *telo*, Ie *toale*, Ia (*panno* 'ŝtofo' *de) lino*.

El L *tela* "teksaĵo" (< **texla* de la radiko de *texere* "teksi", vd. tiun). Samfamilia vorto: *tualeto*.

TOLER/I (f; RE): A *toler/ate*, G *-ieren*, Po *-owac'*, (H *-ar*), F *tolérer*, I *tollerare*; L

tolerare.

Propr. "porti" (> "povi porti" > "elteni, toleri"), samradika kun L *tollere* "levi" k *tuli* "mi portis" (kp ank. **tlat-* sub *oferi*), de HE rad. **tel-* "porti", kp Sa *tulâ'* "pesilo", Gr *tlê´nai* "porti" (kp *Atlantiko, atlaso, talento*), G *dulden* "toleri".

TOMAT/O (1; Jü): A *tomat/o,* F(H) *-e,* G *Tomate.* ¶ Io =, Iela *tomate.*

Pere de H el Azteka *tomatl* s.s. – Cherpillod 1992, 108.

TOMB/O (f; Un): A *tomb,* F *-e, -eau,* I *-a,* (H *tumba*); L postkl. *tumba.* Latinida *-o-* anst. L *-u-,* vd. *mondo.* – En la vortaro de Un R la radiko *tomb-* aperas kun traduko *padat'* "fali" (evidente laŭ F *tomber*): eraro korektita jam en la vortaro de Un Po (vd. sub *fali*). ¶ 1881 *tomb-*. ¶ Io =, Ie *tombe,* Ia *tumba.*

El Gr *ty´mbê/ty'mbos* s.s., orig. "teraltaĵo", eble par. al Ir mez. *tomm* "altaĵeto". Kp *katakombo.*

TOMBAK/O (f; RE): AF *tombac,* I *-co,* G *Tombak,* PoR *tombak,* (H *tumbaga*). ¶ Io =, Iela* *tombac.*

El Indonezia *tombak* "kupro", el Sa *tâmraka-* "kuprokolora" de *tâmram* "kupro", kp adj. *tâmrá-* "obskure ruĝa". – Cherpillod 1992, 108.

TON/O (f; RE): FPoR *ton,* A *-e,* I(H) *-o,* G *Ton;* L *tonus.* ¶ Iola =, Ie *ton.*

L *tonus* "streĉo; tono" el Gr *tónos* "tono", orig. "streĉ(iĝ)o (de kordo)", subst. de *teínein* "streĉi" (vd. sub *etendi;* kp spec. *monotona, peritoneo*).

TOND/I (f; Un): L *tondere;* F *tondre.* Kp I *tondare, tosare* "tondi [ŝafojn k.s.]". ¶ Io *tond/ar,* Iela *-er.*

L *tondere* estas par. al Gr *téndein* "mordeti", de HE **tend-*, plivastigo de la rad. **tem-* "tranĉi" (vd. *atomo*). Samfamilia: *tonsuro.*

TONDR/I (f; Un): A *thunder,* F *tonner,* G *donnern,* I *tuonare,* (H *tronar*): L *tonare* (kp *tonitrus* "-o"). Kp Nd *donderen.* Kompromisa formo, tamen ne de la ordinara tipo kun vokalismo de unu lingvo kaj konsonantismo de alia; tie ĉi temas pri du sinsekvaj elementoj, el kiuj la unua baziĝas sur latin(id)aj formoj (LF: *ton-*), dum la dua respegulas A (senakcenta *-der* > Eo *-dr,* kp A *tinder* > Eo *tindr-*). Kp Szerdahelyi 1987, 125 (kun skemo ne facile komprenebla; G *donnern* apenaŭ lasis spuron en la Ea formo). Rimarku, ke **ton-* laŭ LF estis neebla pro alia signifo kaj **toner-* laŭ F subst. *tonnerre* neoportuna pro sufiksidenta fino. ¶ 1894 *tonitr-*. ¶ Io *tondrar* (espismo), Ie *tonnerar,* Ia *tonar* (kp *tonitro* "-o").

La ĝerm. formoj (pĜ **thunra;* *-d-* estas parazita) k la romanaj estas praparencaj: HE rad. **(s)ten-* "soni", kp Sa *tányati* "bruas, tondras", Pe *tandar* "tondro", Gr *sténein* "ĝemi", G *stöhnen* "ĝemegi".

TONEL/O (8; PV; ne ĉe Z; kp *registr/a ton/o* Ve, *registr/o/tun/o* Wü): A *(register) ton,* F *tonneau,* G *(Register)tonne,* I *tonnellata (di stazza),* Po *tona (rejestrowa),* R *(registrovaja) tonna,* (H *tonelada [de registro]*). La nocioj "tonelo" kaj "tuno" estas esprimataj samvorte en la fontlingvoj; por "tonelo" oni aldonas komplementon, plej ofte kun la signifo "registra" (AGPoR; I *stazza* signifas "tonelaro"). La escepto estas F (*tonneau* "tonelo" – *tonne* "tuno"). Por trovi diferencigon en Eo, oni tamen ne utiligis la F formon (probable pro malfacilo de asimilo) sed adoptis ĝian IH respondaĵon (kun apokopo de sufikso). Komparu, ke F *niveau* estas esperantigita kiel *nivel-*. ¶ Io *registro-tuno,* Ie *tonnel,* Ia *tonna.*

El F ant. *tonel* "bareleto", dim. de *tonne* "barelo" el L mez. *tunna* s.s. (vd. *tuno,* etimologie identan).

TONSUR/O (1; Jü): AF *tons/ure,* IPo (H) *-ura,* G *Tonsur,* R *tonzura;* L mez. *tonsura.* Ps-sf *-ur.*

Propr. "tondaĵo", rezulta subst. de L *tondere* "tondi" (vd. tiun).

TOPAZ/O (f; RE): APoR *topaz,* F *-e,* G *Topas,* I *topazio,* (H *topacio*); L *topazius.* Eo *-z* respegulas la ortografion de AFIPoRL, la prononcon de AFPoR. ¶ Io =,

Ie *topaz/e,* Ia *-o.*

El Gr *tópazos/topázion* s.s., se kredi Plinion laŭ samnoma insulo en Ruĝa maro.

TOPOGRAF/O (7; GD; antaŭe *topografi/ist/o*): A *topograph/er,* F *-e,* G *Topograph,* R *topograf,* I *-o,* (H *topógrafo*). – Nomo de scienco: **TOPOGRAFI/O** (2; RE): A *topograph/y,* F *-ie,* G *Topographie,* IPo *topograf/ia,* R *-ija,* (H *-ía*); L *topographia.* Ps-sf *-i* 1.

El Gr *topográphos* "priskribanto de loko" resp. *topographía* "priskribado de loko(j)" el *tópos* "loko" (kun necerta etimologio; kp *utopio*) k *gráphein*" (pri)skribi" (vd. *telegrafo*).

TORĈ/O (F; RE): A *torch* [-ĉ], F *-e,* I *torcia* [-ĉ-], (H *antorcha* [-ĉ-], kp P *tocha*). Bazita sur I kun apogo de A. – La etimologio kaj historio de la Ea vorto *torĉo* (kaj ĝia sinonimo eo *fakel/o* Kabe [el G *Fackel,* R *fakel,* I *fiaccola*]) estas detale pritraktita de Golden en Akademiaj Studoj 1988-1990, p. 110-114. ¶ Io *torch/o,* Ie *-e,* Ia *-a.*

El L vulg. **torca,* propr. "io tordita" ("Kelkaj specoj de torĉoj estis faritaj el torditaj aroj da pajlo aŭ stupo", Golden l.c.), de L *torquere* "tordi" (vd. tiun).

TORD/I (f; RE): F *tordre,* I *torc/ere,* (H *-er*); L *torquere* (sup.rad.: *tort-*). Kp A *distort* "dis-i". Bazita sur F. ¶ Io *tord/ar,* Ie *-er,* Ia *torquer.*

FHI el L vulg. **torcere* el L *torquere*, par. al Sa *tarkú-* "ŝpinilo", Gr *á-traktos* s.s. (HE **terek-*). – Samfamilia vorto en Eo: *turmenti.*

TOREADOR/O (2; Jü): APoR *toreador,* I *-e,* F *toréador,* G *Toreador.* Kp H *torero.* Vd. pri tiu ĉi vorto Régulo Pérez en Eologio I, 68-70 (kiu, cetere, pledas por la sinonimo *taŭr[lud]isto* de eo *taŭr/o* PV "virbovo"). ¶ Io =, Ie *toreador/taureator,* Ia *toreador.*

El H †*toreador* s.s., der. de *torear* "taŭrludi" de *toro* "virbovo, taŭro" el L *taurus* s.s., identa kun Gr *taûros* s.s., Sv *tjur* s.s., Li *taũras* "uro" (HE **te'uro-s*).

TORENT/O (1; PF, Be): AF *torrent,* I (H) *-e;* L *torr/ens -entis.* Ps-sf *-ent.* ¶ Io =, IeIa *torrente.*

L *torrens* (ank. kiel adj.: "arda") orig. "sekiĝanta" (pp monta rivereto somere seka; poste pri ties rapidega akvofluo printempe), ptc.prez. de *torrere* "sekigi", identa kun Sa *tarŝáyati* "soifigas", kp Gr *térsesthai* "sekiĝi", G *dürr* "seka", Ir *tart* "soifo" (HE rad, **ters-*). Samfamilia: *tosto.*

TORF/O (f; RE): A *turf,* F *tourbe* [-ú-], G *Torf,* I *torba,* PoR *torf,* (H *turba*). Bazita sur G kaj la slavaj lingvoj. ¶ Io =, Ie *torfe,* Ia *turfa.*

Ĝerm. vorto (kp ank. Nd *turf,* Sv *torv*), kiu penetris en la romanajn k slavajn lingvojn: pĜ **turba-*, ev. par. al Sa *darbhá-* "herbotufo".

TORN/I (f; RE): A *turn,* F *tourner,* I *torn/ire,* (H *-ear*); L *tornare.* Formo diferencigita disde *turn/i* laŭ la vokalismo de LI. ¶ IoIeIa *tornar.*

AFI < L *tornare,* der. de *tornus* "-ilo" el Gr *tórnos* s.s. (vd. *turni,* etimologie identan).

TORNISTR/O (f; RE): G *Tornister,* Po *tornister.* Bazita sur GPo (kp Gregor 1992, 28); ellaso de senakcenta finsilaba *e* kiel en *fingr/o, hamstr/o, vintr/o* (Szerdahelyi 1987, 135). ¶ 1894 *havresak-* (< F *havresac,* A *haversac,* G *Habersack*, propr. 'avensako').

El Ĉe *tanystra* "poŝo, sako", ebla kunfandiĝo de L mez. *canistrum* "korbo" k Gr biz. *tágistron* "avensako" ; la unua der. de *canna* "kano" (vd. tiun), la dua der. de Gr biz. *tagízein* "manĝigi" de Gr *táttein* "disponi, aranĝi" (vd. *taktiko*).

TORPED/O (1; Jü) 1) mil. (Jü, Ka) 2) zool. (Ve): A (H) *torpedo* (1, 2), F *torpille* (1, 2), G *Torpedo* (1), I *torpedine* (2), Po R *torpeda* (1); L *torped/o -inis* (2). La senco 1 laŭ (modernlingva) internacieco, senco 2 (malofte registrita en modernaj vortaroj) kredeble ĉerpita el L kiel zoologia termino (genro *Torpedo*). ¶ IoIe =, Ia *torpedine* (ĉiuj 1, 2).

La armilo ricevis sian nomon (19a jc) laŭ la elektra fiŝo, kiu paralizas atakantojn. L *torpedo* orig. "sensentiĝo", der. de *torpere*

"esti rigida", par. al Li *tirpti* "sensentiĝi, rigidiĝi": (H)E rad. **(s)ter-* "rigida", kp (kun komenca *s-*) Gr *stereós* "solida", G *starr* "rigida".

TORS/O (2; Be): PoR *tors,* AI(H) *-o,* F *-e,* G *Torso.* Itala vorto akceptita en plena formo kun fina *-o* utiligata kiel Ea substantivfinaĵo, kp *pian/o.* I *torso* orig. "trunko, stumpo", laŭdire el L *thyrsus* "bastono, trunketo, tigo", el Gr *thy´rsos* "bastono de Bakĥo".

TORT/O (f; N-ro 15 1888, EG): A *tart,* F *-e, tourte* [-u-], G *Torte,* PoR *tort,* I(H) *-a.* Eo *-o-* laŭ la plimulto de la fontlingvoj. ¶ Io *tarto,* Ie *tort/e,* Ia *-a.*

El L (Vulg.) *torta* "bulo da pano" de necerta origino (la klarigo "tordita bakaĵo" el L *tortus,* ptc.perf. de *torquere* "tordi", estas duba).

TOST/O (3; Jü, Ka; kp *toast-* N-ro 15 1888, Be, Jü 1, en PIV kun averto 'evitinda'): AFPo *toast,* G *Toast,* R *tost.* Butler 1967, p.414: 'En la rusaj kaj germanaj vortaroj de Z kaj en siaj propraj tekstoj Z uzis *toast-i.* Sed en represaĵo, pro evidenta preseraro, la *a* elfalis.' Laŭ ZR, *toast-* enestas en Jü 1 (Wörterbuch Deutsch-Eo de Z-Jürgensen, 1904) kaj Plena Vortaro Ea-Rusa (1909). En la 3a eldono de Jü (1909), kiu estas je mia dispono, aperas *tost-o,* sed en malĝusta alfabeta pozicio (inter *tiu* kaj *togo*); do ŝajnas klare, ke tie devus stari *toast-o.* La sama eraro ripetiĝas (kun la sama mislokado!) en Ka. – Z do origine elektis la formon kun *-oa-* – ne surprize, ĉar laŭ la plimulto de la fontlingvoj. Kiam *tost-* estis oficialigita (1921), tio malfermis la vojon al nova radiko eo *toast-* GD, PIV 'rostita pantranĉo' (< A *toast*). ¶ Io *tosto,* IeIa *toast.*

A vorto, identa al A *toast* "rostita pantranĉo" (ĉar en antikvaj tempoj tia estis trempata en vino ĉe tostado) el F mez. *tostée* "rostita pano" de *toster* "rosti" el L vulg. *tostare* s.s., der. de *tostus* "bruligita", ptc.perf. de *torrere* "sekigi, ardigi" (vd. *torento*).

TRA (f; Un): F *à travers,* I *attraverso* (kp H *a través de*) certe povis inspiri kaj apogi la elekton de tiu ĉi prepozicio, sed esence *tra* sendube estas identa kun tiusenca prefikso en latinaj kaj italaj verboj (kp Bianchini 71: "praefixum latinum"), ekz. L *traicere* "trapiki", I *traforare* "trabori", *trafiggere* "trapiki". Z komprenedble konsciis, ke *tra-* estas nura varianto de *trans-* (aperanta antaŭ *i, j, d, l, m, n,* vd. Wiener 1950, 104); eble li konsideris la du sencojn tiel proksimaj, ke parta homonimeco estus avantaĝa. – Ne el I prep. *tra* (Waringhien LV 63), kiu havas alian signifon ("inter"). ¶ IoIe = (espismoj), Ia *per* (< LI), *a transverso de.*

L *tra-* estas varianto de *trans-,* vd. *trans.*

TRAB/O (f; RE): L *trabs* (gen.: *trabis*); I *trave,* (H *trabe*). Krome en la internacia termino AFI *archi/trave,* (H *arqui-*), G *Architrav* 'ĉeftrabo', kiun Z nekonsekvence transskribis eo *arĥitrav/o* Jü. – Bazita sur L. Pri la problemo *b/v,* kp *devi, havi, provi.* [Pri la konkurenco inter *trab/o* kaj la frutempa sinonimo eo *balk/o* (el A *balk,* G *Balken,* Po *belka,* R *balka;* kp sub *balkono*), vd. Golden, Akademiaj Studoj 1987, p. 118 s. kaj Filologo 36-37/1988, 19-23.] ¶ Io =, Ie *trave,* Ia *trabe.*

L *trabs* ank. "io farita el traboj; tegmento, domo"; oni komparas Li *trobà* "domo".

TRADICI/O (1; RE): AF *trad/ition,* I *-izione,* Po *-ycja,* R *-icija,* (H *-ición*), G *Tradition;* L *tradit/io -ionis.* Ps-pf *trans-,* var. *tra-*; ps-sf *-cio.*

Propr. "transdonado (de unu generacio al alia)", subst. de L *tradere* "transdoni", kunm. de *tra(ns)-* "trans-" (vd. tiun ps-pf) k *dare* "doni" (vd. tiun).

TRADUK/I (f; Un): F *tra/duire* (kp *-duction* "-o"), I *-durre,* (H *-ducir*). La formo kongruas kun *konduk/i* (kp tiun), certe influita de la L originformo (vd. sube). Ps-pf *trans-,* var. *tra-.* ¶ Io *tradukar,* Ie *traduc/ter,* Ia *-er.*

El L *traducere* "transmeti, transporti" (kp semantike G *übersetzen,* propr. "transmeti"), kunm. de *tra(ns)-* "trans-" (vd. tiun ps-pf) k *ducere* "konduki" (vd. tiun).

TRAF/I (f; RE): G *treffen* (pret.: *traf*), Po *trafic'*. Ĝenerale deklarata kiel germandevena (vd. ekz. Collinson 1959, 4, 10), ĉe kio restas klarigi la vokalŝanĝon. Kp Waringhien LV 77: "La D [=G] *treffen* estus doninta **trefi,* kiu kolizius kun (jam simpligita) *trefo* (el F *trèfle*): la analogio de *pafi* (kaj eble la preterito *traf*) deformis ĝin en *trafi.*" Sed ne estas konvinke sugesti ke la relative baza verbo *trafi* ŝanĝis formon pro la periferia *trefo.* Waringhien preteratentis la Po formon, kiu (kune kun la analogaj preteritecaj formoj *flug/i, varb/i* el G) sufiĉe klarigas la *a*-vokalon. – Pri la semantika flanko Collinson (l.c. 10) diras: 'pli specifa ol *ating-*'; jen do okazo kie ĝermandevena vorto kompletigas kaj precizigas pli ĝeneralan nocion, kp *baki, bindi.* ¶ Mankas en la aliaj L.

I.; kp sub *atingi, renkonti, trovi.* Ĝerm. vorto (Po < G), kp Da *træffe,* Nd *treffen* s.s.

TRAFIK/O (4; Backman 1921, PV): A *traffic,* I *-o,* F *trafic,* (H *tráfico*). ¶ Io =, Ie *trafica,* Ia *traffico.*

I vorto, orig. "komercado", subst. de *trafficare* "komercadi, ŝakri": la unua elemento ŝajnas esti pref. *tra-* "trans-", la dua restas problema.

TRAGEDI/O (f´, 1, 7; Un F, RE): A *traged/y,* IPo(H) *-ia,* R *-ija,* F *tragédie,* G *Tragödie*; L *tragoedia.* Ps-sf *-i* 1.

El Gr *tragô(i)día* s.s. el *trágos* "virkapro" (propr. "ronĝanto", agantnomo de *trageín* "ronĝi") k *ô(i)dê'* "kanto" (vd. *odo*); la kialo de tiu nomo estas daŭre obskura (ĉu pro virkapro kiel premio en la plej antikvaj dramkonkursoj? ĉu pro aktoroj orig. vestitaj kiel virkaprecaj satirusoj?). Kp *komedio* k la sekvajn.

TRAGIK/A (3; PV; antaŭe *tragedi/a* Be): A *trag/ic(al),* F *-ique,* G *-isch,* I *-ico,* Po *-iczny,* R *-iĉnyj*; L *tragicus.* Ps-sf *-ik.* ¶ Io *tragedi/ala, -atra*; Iela *tragic.*

El Gr *tragikós* "tragedia" de *trágos* "kapro", unua elemento de *tragô(i)día* "tragedio", vd. tiun.

TRAGIKOMEDI/O (1; Ka): A *tragicomed/y,* I(H) *-ia,* F *tragi-comédie,* G *Tragikomödie,* Po *tragikomed/ia,* R *-ija*; L *tragi(co)comoedia.* Ps-sf *-i* 1.

Formita per haplologio de la L formo, kunm. de *tragicus* k *comoedia* (vd. *tragika* k *komedio*).

TRAĤE/O (f; EG; *-ĥ-* UV, Be, Jü, Ka, Ve, PV, GD, PIV; *-k-* Ve [var.], PV, GD, PIV): AI *trachea* [-k-], F *trachée-artère* [-ŝ-], (H *tráquea* [-k-]), R *traĥeja;* L med. *trachea* [-k-]. Eo *-ĥ-* apenaŭ laŭ R sed kiel redono de Gr *kh* (vd. sube; kp sub *ĥaoso;* vd. ank. Szerdahelyi 1987, 115). ¶ 1894 *trake-*. ¶ Io *trakeo,* Ie *trach/é,* Ia *-ea.*

El Gr *trakheía (artêría)* "malglata (arterio)", femala formo de la adj. *trakhy´s* "malglata, malebena".

TRAJN/O (8) 1) 'sinsekvo de similaj veturiloj' (Ve ["aro da veturiloj"]) 2) ferv. :'vagonaro movata de lokomotivo' (Goldschmidt 1923, PV; antaŭe *vagon/ar/o* UV ktp) 3) 'veturilaro kiu transportas ĉion, kion la trupoj bezonas' (Jü 1, GE [laŭ ZR 63], Backman 1919, Wü, PV): AF *train* [A trein, F trê] (1, 2, 3), G †*Train* [=F] (3), I *treno* (1, 2), (H *tren* 1, 2, 3). Mi citas la diversajn Eajn kaj fontlingvajn sencojn laŭ OA 8, p. 26. Formo laŭ AF grafismo; por AF *ai* > Eo *aj,* kp *frajo, grajno, trajto.* ¶ Io *treno* (2), *traino* (3); Ie *tren* (2, 3); Ia *traino* (2, 3).

F vorto, orig. "trenado" (< "trenaĵo, io trenata"), agosubst. de *traîner* "treni", vd. tiun. Kp semantike G *Zug* "trajno", propr. "tiro" (el *ziehen* "tiri").

TRAJT/O (f; RE): AF *trait,* I *tratto,* (H *trazo*). Formo laŭ AF grafismo; pri *aj,* kp *trajno.* – Pritraktita de Wiener 1950, 104. ¶ 1894 *trat-*. ¶ Io *traito,* Ie *trate,* Ia *tracto.*

Romana vorto kun orig. signifo "tiro" (> "tiro/streko de plumo" > "karakteriza de-

talo [en desegnaĵo k.s.]" > "trajto"), el L *tractus* "tiro", subst. de *trahere* "tiri" (vd. *trakti,* etimologie identan). Kp semantike G *Zug* "trajto", propr. "tiro" (el *ziehen* "tiri").

TRAKT/I (1; RE): A *treat,* F *traiter* (kp *tractation* "-ado"), I *trattare,* Po *traktować,* (H *tractar*); L *tractare.* Forme bazita sur L kun apogo de Po. Eventuala laŭfranca formo *trajt-* estis okupata per alia signifo; *trat-* estis uzata de Z(Jü) kiel komerca termino (< I *tratta*). – La ĝemelajn radikojn *trakt-* kaj *trajt-* pritraktis Wiener 1950, 104. ¶ Io *traktar,* Iela *tractar.*

L *tractare* orig. "tiregi" (> "manipuli" > "uzi; okupiĝi pri [io, iu], trakti [ion, iun])", intensa verbo de L *trahere* (sup.rad.: *tract-*) "tiri" (> F *traire* s.s., vd. *portreto*), de HE rad. **tragh-;* de paralela HE rad. **dhragh-* devenas A *draw* "tiri", G *tragen* "porti". Etimologie identa estas *trajto;* samfamiliaj ank. *abstrakta, distri, eks-, kon/trakto, subtrahi, traktato, traktoro, trejni, treni.*

TRAKTAT/O (1; Eisto 1/1889, Be): 1) 'traktaĵo' 2) pol.: A *treat/ise* (1), *-y* (2), F *traité* (1, 2), G *Traktat* (1, 2), I *trattato* (1, 2), PoR *traktat* (1, 2), (H *tratado* 1, 2); L *tractatus* (1; en L mez. ank. 2). Bazita sur la originlingvo L, kies formo restas neŝanĝita en G kaj la slavaj lingvoj. Ps-sf *-at.* ¶ Io = (1), *kontrato* (2); Ie *tractate* (1), *contracte* (2); Ia *tractato* (1, 2).

L *tractatus* "traktado" estas subst. de *tractare* "trakti"; poste "pritraktado [de temo]" (senco 1) resp. "intertrakto" (senco 2). Vd. *trakti.*

TRAKTOR/O (8; PV): A(H) *tract/or,* F *-eur,* I *trattore,* PoR *traktor.* ¶ Io =, Iela *tractor.*

El L *tractor* "tiranto", agantnomo de *trahere* "tiri" (vd. *trakti*).

TRAM/O (2; Jü) 1) relo 2) veturilo: A *tram* (1, 2), *-way* (2; "-vojo"), F *tram* (2), *-way* (2; "-vojo") , I *tram, tranvai* (2; kp *tranvia* "-vojo"), Po *tramwaj* (2; "-vojo"), R *tramvaj* (2; "-vojo"), (H *tranvía* 2, "-vojo"). Kp G *Tram(bahn)* "-vojo". La mallonga formo do ekzistas en AFI(G). Komence ni trovas nuran transskribon de A(R?): *tramvaj/o* Eisto 8/1894. Poste la vorto nature estis analizata kiel *tram/voj/o;* el tiu analizo rezultis du signifoj de *tram-:* 1) 'relo' (Jü, Ve) kun la kunmeto *tram/vetur/il/o* (Ve); 2) 'veturilo' (Ka) kun la kunmeto *tram/rel/o* (Ka); ambaŭ signifoj estas registritaj en PV, GD, PIV. ¶ Io *tram/o* (1), *-veturo* (2), Iela *tram* (2).

A vorto, kunm. de *way* "vojo" k *tram* "relo" (orig. el ligno), (dial.) "akso, trabo, stango", kredeble el G basa *trame* "stango, ŝtupeto" de nekonata origino.

TRANĈ/I (f; Un): F *trancher* [-ŝ-]. Kp G *tranchieren* [-ŝ-] "distranĉi [viandon]", I *trinciare* [-ĉ-] "dis/tranĉi, -haki", (H *trinchar* [-ĉ-] "distranĉi [viandon]"), ank. A *trenchant* [-ĉ-] "tranĉa, morda (fig.)".

El la cititaj vortoj, nur la franca havas la ĝeneralan signifon "tranĉi"; sendube la radiko estas bazita (ĉefe aŭ ekskluzive) sur F. Por F *ch* > Eo *ĉ* vd. *aĉeti* (tiel normale en "vorto vere franca" laŭ Cherpillod 1990, 16). ¶ Io *tranchar, sekar* (< L *secare*); Ie *tranchar,* Ia *secar,* (dis-) *trenchar.* El L *truncare* "dehaki, kripligi", propr. "trunkigi", de *truncus* "trunko", vd. tiun.

TRANKVIL/A (f; Un): A *tranquil,* F *-le,* I *-lo,* (H *-o*); L *tranquillus.* Pri Eo *kv,* vd. *akvo.* ¶ 1881 *kvil-* (sama etimo). ¶ Ie *tranquil,* Io *-a,* Ia *-le.*

L *tranquillus* kredeble kunm. de *trans* (tie ĉi kiel intensiga prefikso, kp *tre*) k derivaĵo de *qui/es -etis* "kvieto" (vd. *kvieta*).

TRANS (f; Un): L *trans* (Waringhien LV 63, Gregor 1982, 11, kp Wiener 1950, 104). Ankaŭ konata kiel prefikso en L (*trans/alpinus, -ire, -ferre* "-meti") kaj en ĉiuj modernaj fontlingvoj (A *trans/atlantic, -form, -port;* F *trans/atlantique, -former, -port;* G *trans/atlantisch, -formieren, Transport;* Po *trans/atlantycki, -plantacja* "-plantado", *-portować*" "-porti"; R *trans/atlantiĉeskij, -formacija* "-formado", *-portirovat'* "-porti"; [H *trans/atlántico, -for-*

mar, -porte]); nur I iom diferencigas per varianto (*transalpino* sed *trasformare, trasportare*). ¶ IoIeIa =.

L *trans* (prep. k pref.) estas orig. ptc.prez. (kun proksimuma signifo "trairanta, pasanta") de verbo troviĝanta en L *in-trare* "eniri": HE rad. **ter-* "tra(ns)iri", kp Sa *tárati* "tra(ns)pasas", G *durch*/A *through* "tra", Ki *tra* "trans". Etimologie identaj estas *tra* k *tre*; kp. *termino* k ev. *trankvila*. Vd. ank. ps-pf *trans-*.

TRANSEPT/O (2; Jü): AFPoR *transept,* (H *-o*), I *transetto.* Ps-pf *trans-*.

El L mod. *transeptum,* kunm. de L *trans* "trans" (vd. tiun) k *saeptum* "ĉirkaŭbarejo" (do propr. "ĉirkaŭbarita ejo trans [la navo])", subst.-igita ptc.perf. de *saepire* "ĉirkaŭ/bari, -fermi", der. de *saepes* "barilo" kun necerta etimologio.

TRANSIT/O (1; Ve, PV; kp *tranzit/a* L Int 8/1899): AF *trans/it,* I(H) *-ito,* G *Transit,* Po *tranz/yt,* R *-it.* Ps-pf *trans-*.

I komerca termino el L *transitus* "tra/paso, -iro", subst. de *transire* "tra/pasi, -iri", kunm. de *trans-* "tra-" (vd. ps-pf *trans-*, kp *tra* k *trans*) k *ire* "iri" (vd. tiun). Kp spec. sekv.

TRANSITIV/A (2; Jü): A *transit/ive,* F *-if,* G *-iv,* I(H) *-ivo*; L *transitivus.* Ps-pf *trans-*; ps-sf *-iv.*

Propr. "transira" (pri verba agado kiu transiras al [=trafas je] la objekto), adj. de L *transire* "transiri" (vd. *transito*).

TRAPEZ/O (2; RE) 1) geom. 2) gimn. (Backman 1919, PV): A *trapezium* (1), *trapeze* (2); F *trapèze,* G *Trapez,* I *trapezio,* Po *trapez,* R *trapecija,* (ĉiuj krom A: 1, 2); L *trapezium* (1). Ellasita *-i* laŭ la principo de sufiĉo. ¶ Io =, Ie *trapez/e,* Ia *-io* (ĉiuj 1, 2).

El Gr *trapézion* (1), propr. "tableto", dim. de *trápeza* "tablo", propr. "kvarpiedaĵo": *tra-* por *tetra-* "kvar" (kp tiun), *-peza* el **pedja,* kie *ped-* estas apofonia formo de *pod-* "piedo" (vd. tiun). Oni komparis la geometrian figuron kun tabloplato; la gimnastika senco pro simileco al tia figuro.

TRE (f; Un): F *très* [tre]. Laŭ la F prononco same kiel *tro.* ¶ 1882 *tre.* ¶ IoIe =; Ia *multo.*

El L *trans* "trans" (> "trans la mezuro" > "tre"; la adverba senco evoluis en F), kp *tiun.*

TREF/O (f; RE): F *trèfle,* G *Treff,* Po *trefl,* R *trefy.* Waringhien (LV 77) konsideras *tref-* "simpligita" formo de F *trèfle,* sed fakte du el la kvar fontlingvoj, en kiuj la vorto aperas, havas formojn sen *l*; Z do preferis la pli simplan formon. ¶ 1894 *trefl-*. ¶ Io =, Ie *treffe,* Ia *trifolio.*

F vorto, propr. "trifolio" (laŭ la aspekto de la emblemo), el L *trifolium* s.s. (vd. *tri* resp. *folio*).

TREJN/I (8; PVS): A *train* [trein], F *entraîner* [-tren-], G *trainieren* [tren-], (H *entrenar,* kp P *treinar*). Bazita sur la A prononco: normale A *ai* [ei] aperas kiel *aj* en Eo (vd. *grajno*), sed *trajn-* jam estis okupita per alia signifo; la samo validis por *tren-*. ¶ Io *exerc/ar,* Ie *-ir* (*intrenar* SO), Ia *trainar.*

A *train* "ekzerci, eduki, instrui; dresi, disciplinigi, trejni" (unue pp ĉevaloj), pli frue "allogi, tiri post si, treni", el F *traîner* "treni" (vd. tiun, etimologie identan).

TREM/I (f; Un): L *tremere*; A *trembl/e,* F *-er,* I *tremare,* (H *temblar,* kp P *tremer*). Bazita sur L kun apogo de I. ¶ Io *trem/ar,* IeIa *-er.*

Latin(id)a vorto (kun parazita *-b-* en FA; la formoj kun *-l-* baziĝas sur L adj. *tremulus,* vd. sub *tremolo*), identa kun Gr *trémein* s.s. de HE rad. **ter(s)-* "tremi" (vd. *teruro*). Samfamilia vorto en Eo: *tremolo.*

TREMOL/O (f; RE): L *tremulus* (L bot. *Populus tremula*); F *tremble,* I *tremolo,* (H *temblón*). Kp A *trembling poplar* ('tremanta poplo'). Kredeble bazita sur la L formo (botanika termino), tamen kun vokalŝanĝo *u* > *o* laŭ I por eviti sufiksidentan radikfinon (kp analogajn formojn sub *poplo*; vd. plue *artikolo*). ¶ 1894 *trembl-*. ¶ Ie *tremul,* IoIa *-o.*

L *tremulus* estas orig. adj. ("tremanta") der. de *tremere* "tremi" (vd. tiun).

TREMP/I (f; RE): F *tremper.* Bazita ekskluzive sur F ortografio (por F *em* [â] > Eo *em,* vd. *remburi*). ¶ Io *trempar,* Ie *merser* (el L sup.rad. *mers-* de *mergere* "trempi"), *plongear,* Ia *immerger* (< L *immergere*).

Orig. "miksi likvaĵojn", kun metatezo de *r* el L *temperare* "miksi je ĝustaj proporcioj" (vd. *temperamento*).

TREN/I (f; Un): F *traîner* [tren-]. (Kp la asonancan A *trail* [treil] s.s.) Bazita ekskluzive sur F (F *ai* normale > Eo *e,* vd. Cherpillod 1990, 15: *afero, komplezo, sezono* ktp; por *aî* kp spec. *ĉen/o*). La radiko estas komparenda kun la ĝemela *trajn-* (Wiener 1950, 104); kp la paron *gren-*: *grajn-*. ¶ Io *tranar,* Ie *trenar,* Ia *trainar.*

F *traîner* el L vulg. **traginare,* der. de **tragere,* kromformo de L *trahere* "tiri" (vd. *trakti*). Etimologie identaj estas *trajno, trejni.*

TREZOR/O (f; RE): A *treasure,* F *trésor* [-z-], I(H) *tesoro* [I -z-]; L *thesaurus.* Bazita sur F; Eo *-z-* laŭ FI prononco kaj la ĝenerala tendenco voĉigi intervokalan s-sonon (vd. Szerdahelyi 1987, 115). ¶ Io =, Ie *tresor,* Ia *thesauro, tresor.*

El Gr *thêsaurós* "trezor(ej)o"; sen etimologio. – La unua *r* en AF aperas influita de la dua.

TRI (f; Un): A *three* [thri:] (kp *triple* "-obla"), F *trois* (kp *triple* "-obla"), G *drei,* I *tre* (kp *trio* "-o", *triplice* "-obla"), Po *trzy,* R *tri;* L *tres,* ntr. *tria* (kunmeta formo *tri-*, ekz. *tricolor* "-kolora"; kp *triginta* "-dek", *triplex* "-obla"). Kp ank. Gr *treis,* ntr. *tría* (kunmeta formo *tri-,* ekz. *trípous* "-piedo"; kp *trítos* "-a", *triákonta* "-dek", *tríplous* "-obla"). Laŭ mia opinio la kunmeta formo *tri-* ludis gravan rolon por la radikelekto: ĝi estas komuna al L kaj Gr kaj troviĝas en multaj derivaĵoj kaj internaciaj terminoj (ekz. *tri/angulo, -gonometrio, -koloro, -lobito);* krome ĝi koincidas kun la R formo kaj tre similas al la A prononco. [La sola vera alternativo estus *tre* (LI kaj A ortografio), sed káj en pEo káj en Eo ĝi kolizius kun la adverbo *tre.*] ¶ 1881 *tri.* ¶ IoIe *tri,* Ia *tres.*

El HE **trejes* (kunmeta formo **tri-*), kp Sa *tráyas* (mask., fem.), *tri* (ntr.), Gt *threis,* Li *trys,* Ir *tri.* La numeralo enestas en la Eaj vortoj *terceto, trefo, tribun/alo, -o, trigonometrio, triviala.*

TRIBUN/O (f; RE): AF *tribun/e,* IR(H) *-a,* G *Tribüne,* Po *trybuna.* ¶ Io =, Ie *tribun/e,* Ia *-a.*

El L mez. *tribuna* "katedro, pupitro", modifo de L *tribunal* "estrado por oficistoj" (vd. sekv.).

TRIBUNAL/O (1; Jü): LAFR(H) *tribunal,* I *-e,* G *Tribunal,* Po *trybunal'.* Ps-sf *-al.*

L *tribunal* "estrado por oficistoj/oratoroj/juĝistoj; juĝista sidejo; juĝejo", der. de *tribunus,* titolo de pluraj romiaj oficistoj, orig. "tribestro", der. de *tribus* "tribo, sekcio, dividaĵo", orig. "triono (de la roma popolo)", el *tri-* "tri" (vd. tiun) k elemento devenanta de la HE rad. **bhu-* "esti" (vd. sub *fiziko*). Samfamiliaj: *tribuno, tributo .*

TRIBUT/O (1; Jü): F *tribut,* A *-e,* I(H) *-o,* G *Tribut;* L *tributum.*

Orig. "(io) atribuita" (pp la pagodevo atribuita al ĉiu civitano), subst.- igita ptc.perf. de L *tribuere* "atribui, disdoni" (kp *a-, dis-, kon/tribui*), orig. probable "disdividi", der. de *tribus* "dividaĵo, sekcio" (vd. *tribunalo*).

TRIGONOMETRI/O (2; RE): A *trigonometr/y,* I *-ia,* R *-ija,* (H *-ía*), F *trigonométrie,* G *Trigonometrie,* Po *trygonometria;* L mod. *trigonometria.* Ps-sf *-i* 1.

Farita (en L mod. de Pitiscus, 1595) el Gr *trígônon* "triangulo" (*tri-* "tri-", vd. tiun; *gônía* "angulo", vd. *diagonalo*) k *métron* "mezuro" (vd. *metro*).

TRIK/I (f; RE): F *tricoter.* (La asonanco de G *stricken* estas notita de Bastien.) Citita de Waringhien (LV 76) inter ekzemploj pri mallogigo de francdevenaj radikoj. Eble estas pli verŝajne konsideri tiun ĉi radikon kiel retrogradan derivaĵon de *trikot/o* 'trikita ŝtofo', difinita kiel *'trik/aĵ/o'.* ¶ Io *trikotar,* IeIa *tricotar.*

Der. de F *tricot,* vd. sekv.

TRIKOT/O (f; RE): F(H) *tricot* [trikó], G *Trikot,* Po *trykot,* R *triko.* Bazita sur F kun konservo de la vortfina -*t,* ne prononcata (kp *kalikot/o, kamlot/o*). ¶ 1906 ab *trik/aĵ/o.* ¶ Io *trikot-uro* (propr. 'trikaĵo'), IeIa *tricot.*

Der. de F *tricoter* "triki, plekti punton" , en F mez. "danci, salteti", probable orig. "rapide movi" (sk. la piedojn > "danci", la trikilojn > "triki"?).

TRIL/O (f; RE): A *trill,* F -*e,* I -*o,* G *Triller,* Po *tryl, trel,* R *trel',* (H *trino,* kp P *trilo*). ¶ Io =, Ie *trill/e,* Ia -*o.*

Der. de I *trillare* "-i" de onomatopea origino.

TRINK/I (f; Un): A *drink,* G *trinken.* Kp Nd *drinken.* Bazita ekskluzive sur G; la proksima A formo donis *drink/i* kun specialigita senco (kp tiun; vd. Wiener 1950, 104). La respondaj romanaj formoj ankaŭ ne havas la ĝeneralan sencon "trinki": F *trinquer* "tintigi la glasojn", I *trincare* "drinki". Kial ĝermana radiko? La latin(id)aj ekvivalentoj (F *boire,* I *bere,* L *bibere, potare,* [H *beber*]) eble estis konsiderataj fonetike malpli karakterizaj; krome ili pli diferencas inter si. ¶ 1894 *bib-.* ¶ Io *drinkar,* Ie *trincar,* Ia *biber, potar.*

Ĝerm. vorto (kp ank. Sv *dricka,* Gt *drigkan*): pĜ rad. **drenk-* kun nekonata etimologio.

TRIP/O (f; RE): A *trip/e,* F -*es* (plur.), (H -*a*), I *trippa.* ¶ Io =, Ie *tripes* (plur.), Ia *tripa.*

Romana vorto, kredeble el Ar *tharb* "faldo en la peritoneo de bestoj". – Cherpilllod 1992, 109.

TRITIK/O (f; RE): L *triticum;* (H *trigo*). Botanika termino prenita el L. ¶ IoIa *frumento* (F *froment,* I *frumento*), Ie *frument;* Ia ank. *tritico.*

Propr. "draŝaĵo" el L *terere* (sup.rad.: *trit-*) "(dis)froti", par. al G *dreschen* "draŝi" (vd. tiun).

TRIUMF/O (1; RE): A *triumph,* F *triomphe,* G *Triumph,* I *trionfo,* PoR *triumf,* (H *triunfo*); L *triumphus.* Eo sekvas la plimulton de la fontlingvoj rilate -*u-* (AGPoRL) kaj -*m-* (ĉiuj krom I).

L *triumphus* (pli frue kun -*p-* anst. -*ph-*) "festa enirprocesio de venkinta militestro en Romon", kredeble el Gr *thríambos,* nomo de kanto kantata ĉe dionizaj festoj (probable negreka pruntvorto).

TRIVIAL/A (f; EG): AFG(H) *trivi/al,* I -*ale,* R -*al'nyj,* Po *triwialny;* L postkl. *trivialis.* Du sencoj: 1) 'maldelikata, tro vulgara' (Ka, PV, GD, PIV), 2) 'banala' (Wü; PV kun noto "evitinda"; GD). Kp Waringhien LV 87 s.: "*triviala* estis eĉ preskaŭ tute senutiligita de la enveno de *vulgara* (1a OA) kaj de *banala* (2a OA)"; Yamasaki Supl. 5a eld., 17 pri *triviala:* "ofta, senvalora (A kaj G senco, en F arĥaika); E-a senco estas franca". – Ps-sf -*al.*

Der. de L *trivium* "loko kie tri vojoj kuniras" (*trivialis* do "sur vojkruĉiĝo trovebla, t.e. ofta, senvalora" [Yamasaki l.c.]) el *tri-* "tri" k *via* "vojo" (vd. tiujn).

TRO (f; Un): F *trop* [tro], I *troppo.* Bazita sur la prononco de F (Waringhien LV 61); analoge ĉe *tre.* ¶ 1881 *prej:* sen etimologio en PVZ 5, 144; laŭ Mattos 1987, 42 el pEa pref. *pre-* "-eg" (ekz. *prekala* "varmega) "pro la simileco de signifo inter la multo kaj tromulto"; por -*j* kp plurajn aliajn pEajn adv. kaj prep., ekz. *bej* "post", *fej* "tial", *koj* "nur". ¶ IoIe =, Ia *troppo* (motivigo ĉe Berger, Currero International, marto 1961).

En F ant. "tre, multe"; el Fk **throp* "aro, amasiĝo" (> " multo"), kp L mez. *troppus* "grego". Etimologie identa kun *trupo,* vd. tiun.

TROFE/O (2; Jü): A *troph/y,* F -*ée,* G *Trophäe,* I(H) *trof/eo,* P -*eum,* R -*ej.* ¶ Io =, Ie *trofé,* Ia *tropheo.*

Pere de L *tropaeum* (la ortografio -*ph-,* kiu disvastiĝis en la modernaj lingvoj, estas hipergrekismo) "venkomonumento (konsistanta el prenitaj armiloj k.s.)" el Gr *trópaion* s.s., der. de *tropê´* "turno" (ĉar tiaj

monumentoj estis starigataj sur la lokoj kie oni forkurigis – "turnis" – la malamikojn), subst. de *trépein* "turni" (vd. *tropo*).

TROG/O (f; RE): A *trough,* G *Trog,* I *trogolo.* Kp Nd *trog,* Sv *tråg* [tro:g]. Bazita sur G. ¶ Io =, Ie *trog;* Ia *alveo* (< L *alveus*). Ĝerm. vorto (pĜ **truga-*), orig. "ujo el ligno" de HE bazo **dru-* "ligno", kp Sa *dâru* "ligno", Gr *dóry* "ligno; lanco", *drys* "kverko", A *tree* "arbo", R *derevo* "arbo".

TROMB/O (f; RE): F *tromb/e,* I *-a (d'aria, marina* 'aera, mara'), (H *-a*), Po *traba (morska* 'mara'). – Kolizias kun eo *tromb/o* (med.) Briquet, GD (< L med. *thrombus*), eble retrograda derivaĵo de *tromboz/o* (L med. *thrombosis*). ¶ Io =, Ie *tromb/e,* Ia *-a.*

Metafora uzo de I *tromba* "trumpeto" de onomatopea origino. Samfamiliaj vortoj en Eo: *trombono, trumpeto.*

TROMBON/O (2; Jü): AFI *tromb/one,* PoR *-on,* (H *-ón*).

Aŭgmentativo de I *tromba* "trumpeto" (vd. *trombo*).

TROMP/I (f; Un): F *tromper.* Bazita ekskluzive sur F. ¶ 1882 *trop-* (sama etimo). ¶ Io =; Ie *fraudar* (< L *fraudari,* kp A *fraud* "-o"), Ia *fraudar, deciper* (< L *decipere,* A *deceive,* F *décevoir*).

Nurfranca vorto de obskura origino.

TRON/O (f; Un teksto, RE): A *throne,* F *trône,* G *Thron,* PoR *tron,* I(H) *-o;* L *thronus.*

El Gr *thrónos* "trono, seĝo", orig. "apogilo, portanto", de HE rad. **dhar-* "teni, apogi", vd. *firma*

TROP/O (2; Jü): PoR *trop,* AF *-e,* I(H) *-o,* G *Trope;* L postkl. *tropus.*

El Gr *trópos* s.s., propr. "turno" (> "parolturno" > "tropo"), subst. de *trépein* "turni" kun necerta etimologio.. Samfamiliaj vortoj en Eo: *heliotropo, trofeo, tropiko.* Kp ank. *trovi,* etimologie identan..

TROPIK/O (f; RE): A *trop/ic,* F *-ique* [-ík], I *-ico,* R *-ik,* (H *trópico*); L postkl. *tropicus.* Kp G *trop/isch,* Po *-ikalny* "-a". Ps-sf *-ik.*

El Gr *tropikós (ky'klos)* "solstica (cirklo)", adj. de *tropê' (hêlíou)* "solstico, turniĝo (de la suno)", subst. de *trépein* "turni" (vd. *tropo*).

TROT/I (f; RE): A *trot,* (H *-ar*), F *trott/er,* G *-en,* I *-are.* ¶ Io *trotar,* IeIa *-tt-.*

Romana vorto de ĝerm. origino, rigardata kiel intensa verbo de A *tread*/G *treten* "treti", kp Gt *trudan* s.s. Samfamilia vorto en Eo: *trotuaro.*

TROTUAR/O (f; RE): F *trottoir* [-ŭár], G *Trottoir* [= F], PoR *trotuar.* Kp Sv *trottoar.* F *-oir* estas transskribita laŭ RPo maniero, proksimume redonanta la F prononcon (kp *buduaro, repertuaro,* vd. ank. sub *tualeto*). ¶ Io =, Ie *trott/uore,* Ia *-oir.*

Propr. "trotejo", der. de F *trotter* "troti" (vd. tiun).

TROV/I (f; Un): F *trouver* [-u-], I *trovare.* Eo *-o-* estas aŭ mallongigo de la F ortografio aŭ prenita el I (kp *kovi, kovri, povi*). ¶ 1881 *trov-.* Laŭ LZ I, 352 (= PVZ, kromkajero 3, 21) ekzistis en pEo la paralela radiko *trof-* "serĉi" (kp samloke la parojn *prov- : prof-, pruv- : pruf-*). ¶ IoIeIa *trovar.*

El L vulg. **tropare* "komponi (melodion)" (en F mez. > "inventi, eltrovi"), der. de L *tropus,* en L mez. "kanto, melodio", antaŭe "figuro retorika, tropo" (vd. tiun).

TRU/O (f; Un): F *trou* [tru]. Bazita ekskluzive sur F. Eo *u* estas la normala redono de F *ou,* kp en radikfino *lu-, sku-.* ¶ Io =; Ie *fore* (< I *foro*), Ia *foramine* (< L *foramen*).

Franca vorto, eble de gaŭla origino.

TRUD/I (f; RE): Kreita per senprefiksigo de A *obtrude* "trud(iĝ)i", kp *intrude* "entrudiĝi", AF *intrusion* "entrudiĝo", sendube konsiderante la ekziston de la senprefiksa verbo en L (vd. sube). Kp la aferezojn en *kroĉi, mendi, prunti.* ¶ Io *impozar* (< A *impos/e,* F *-er*), Ie *imposir,* Ia *imponer.*

El L *trudere* (sup.rad.: *trus-*) "(for)puŝi; devigi" (kp *ob-* "ekpuŝi"), par. al A *threaten*

"minaci", R *trudit'sja* "labori, peni" (HE **tr(e)ud-*).

TRUF/O (f; RE): A *truffle,* F *truffe,* G *Trüffel,* I *tartufo,* Po *trufla,* R *trufel',* (H *trufa*). La fontlingvaj formoj dividiĝas – se oni esceptas la apartan formon de I) en du grupojn: kun kaj sen *l.* Z preferis la malpli longan laŭ la principo de sufiĉo (analoge ĉe *tref/o*). ¶ Io *truflo,* Ie *truffle,* Ia *trufa.*

Kredeble per metatezo el L vulg. **tufer,* dial. formo de L *tuber* "tubero" (vd. tiun). [I el **terrae tufer* "tertubero".]

TRUL/O (f; RE): A *trowel,* F *truelle,* (H *trulla*). La H formo kredeble estante nekonata al Z, oni devas aldoni L *trulla* "ĉerpilo" por klarigi la Ean radikon. ¶ Io =, Ie *truelle,* Ia *trulla.*

L *trulla* estas dim. de *trua* "kulerego", eble de greka origino.

TRUMPET/O (f; RE): A *trumpet,* F *tromp/ette,* (H *-eta*), G *Trompete,* I *trombetta,* Po *trab(k)a,* Kp Sv *trumpet.* Eo *-u-* evidente laŭ A, eble por klare diferencigi disde *tromb/et/o.* Ps-sf *-et.* ¶ Io =, Ie *trumpete,* Ia *trompetta.*

Dim. de F *trombe/*I *tromba* "trombo" (vd. tiun).

TRUNK/O (f; RE) 1) bot. 2) anat.(Ve, Wü): L *truncus;* A *trunk,* F *tronc,* I(H) *-o.* Latina *-u-* preferita al romana *-o-* (tie ĉi ĉar botanika termino?) ¶ Io =, Ie *trunc,* Ia *-o.*

Necerta etimologio. Samfamilia vorto en Eo: *tranĉi.*

TRUP/O (1; Ka) 1) teat. 2) mil. (Wü, PV); antaŭe *an/ar/o* LV 89: A *troupe* [-u:-](1), *troop* [-u:-](2), F *troupe* [-u-](1, 2), G *Truppe* (1, 2) (kp *Trupp* "grupo, aro"), I *truppa* (2), Po *trupa* (1), R *truppa* (1), (H *tropa* 2). ¶ Io = (1, 2), Ie *trupp/a* (1), *-e* (2), Ia *truppa* (1, 2).

F vorto, orig. "grego" (identa kun F ant. *trop* "multe", kp *tro*), de ĝerm. origino: Fk **throp* "amasiĝo, aro", kredeble par. al G *Dorf* "vilaĝo" (< "amasiĝo de domoj"). Kp ank. *trabo.*

TRUST/O (2; Jü): AFIPo(H) *trust,* G *Trust,* R *trest.* Mll. de A *trust company* , propr. 'kompanio bazita sur konfidokontrakto'.

A *trust* "(kon)fido, kredito", par. al G *Trost* "konsolo"; sambazaj estas A *true* "vera", G *treu* "fidela".

TRUT/O (f; RE): A *trout* [-aŭ-], F *truite* [-ŭi-], I *trota,* (H *trucha,* kp P *truta*); L *tructa* (L zool. *Salmo trutta*). La Ea vokalo estas, ĉe la diverseco de la fontlingvoj, plej facile klarigata per la zoologia L formo. ¶ Io =, Ie *trute,* Ia *tructa.*

L *tructa* (de kiu *trutta* estas 'modernigita' formo) eble el la Gr fiŝnomo *trô'ktês* "ronĝulo", agantnomo de *trô'gein* "ronĝi".

TUALET/O (f; RE): A *toilet,* F *toilette* [-ŭa-], G *Toilette* [-ua-], I *toeletta,* Po *toalet,* R *tualet.* Eo *-ua-* redonas la prononcon de FGR laŭ rusa modelo (kp *eksplu-ati, vualo* kaj la vortojn sub *trotuaro;* vd. Cherpillod 1990, 18). Ps-sf *-et.* ¶ Io =, IeIa *toilette.*

F vorto, orig. "tuketo (el tolo)" (> "tuketo por kovri tualettablon" > "tualettablo kun objektoj kiuj servas por sin vesti/ornami" > "[eleganta] vestaĵo), dim. de *toile* "tolo" (vd. tiun).

TUB/O (f; RE): AF *tub/e,* I(H) *-o;* L *tubus.* ¶ IoIa =, Ie *tube.*

Samradika kun L *tuba* "trumpeto" kun necerta etimologio

TUBER/O (f; RE): L *tub/er -eris;* trovîĝanta kiel bazo en F *protubérance,* I *protuberanza,* (H *tuberosidad*) s.s. Kp ank. A *tuber* (bot., anat.), I *-o* (bot.). Science uzata termino prenita el L. Kp la samtipajn *anser/o, karcer/o; kadavr/o.* ¶ Io =, Ie *túbere,* Ia *tubere.*

Samradika kun L *tumor* "ŝvelaĵo", *tumere* "ŝveli", de HE rad. **tu-* s.s., kp Sa *túmra-* "dika", Gr *ty'los* "tubero", G *Daumen*/ A *thumb* "dikfingro". Samfamiliaj vortoj en Eo: *trufo, tuberkul/o, -ozo, tumulto.*

TUBERKUL/O (3; Jü; kp *tuberkl/o* Ve): A *tuber/cle,* F *-cule,* I *-colo,* G *Tuberkel,* (H *tubérculo*); L med. *tuberculum.* Radiko kun konservita L *-ul(um)* (vd. *angulo;* kp sub

artikolo), tie ĉi sendube konforme al la – samtempe oficialigita – nomo de la malsano: **TUBERKULOZ/O** (3; Jü; kp *tuberkloz/o* Ve): A(H) *tubercul/osis,* F *-ose,* G *Tuberkulose,* I *tubercolosi,* R *tuberkulëz;* L med. *tuberculosis.* Eo *-z* respondas al la prononco de FGIR; kp spec. *piroz/o.* En la medicina sufikso enestas la ps-sf *-z.*

La nomo de la malsano estas formita en la 19a jc per la medicina sufikso L *-osis* el L *tuberculum* "tubereto", dim. de *tuber* "tubero" (vd. tiun).

TUF/O (f; RE): A *tuft,* F *touffe* [tuf]. Kp P *tufo,* ank. I *ciuffo* [ĉúf-]. Bazita sur F prononco kun apogo de A ortografio. ¶ Io =, Ie *toffe;* Ia *flocco* (< L *floccus*).

A *tuft* kun parazita *t* el F *touffe,* probable de ĝerm. origino kun orig. signifo "ekstremaĵo de io" (Fk **top,* kp A *top* "supro, pinto", G *Zopf* "harplektaĵo").

TUJ (f; Un): Necerta etimologio. Multaj proponoj estas prezentitaj: (1) Mallongigo de la F esprimo *tout* [tu] *de suite* s.s. (Waringhien 1946, 23: 'deformo de F tout?', kp LV 61; Gregor 1958, 105; 1982, 22; vd. ank. PVZ 5, 148). Tiu hipotezo ne klarigas *-j,* kaj la mallongigo ŝajnas ekstreme aŭdaca. Tamen *tuj* estas heredaĵo de pEo, en kiu Z tre libere traktis siajn fontlingvajn modelojn kaj ne malofte uzis *-j* kiel adverbfinon (LV 61, noto; vd. sub *tro* pri pEo *prej*); la hipotezo do ne estas sen kredindeco. (2) El Li *tuõj* s.s. (Brozoviĉ 1959; Albault 1959, 15; Back 1980, 275). Laŭ Trunte 1971 la diferenco inter la dusono *uo* kaj pura [u] estas minimuma; en nordokcidenta dialekto ekzistas cetere prononcvarianto [tuj]. Ĉe tiu klarigo, la nescio de Z pri la litova lingvo kaŭzas problemon (vd. spec. Golden en Dia Regno 7/1996, 6-7). Estas certe kredeble, ke Z dum sia loĝado en Veisiejai lernis kelkajn vortojn de la litova lingvo; eble "venu tuj" estis frazo ofte aŭdata de praktikanta kuracisto. La hipotezo, kiu havas la meriton inkluzivi la finsonon, ŝajnus aprobebla krom pro la kronologio: Z loĝis en V. en 1885, sed *tuj* troviĝas jam en pEo 1882. (3) Oc *tuih* estis komparata kun Eo *tuj* de Foote 1956 – kredeble pura koincido, ĉar ne estas atestoj, ke Z konis tiun lingvon. (4) Restas la ebleco rigardi la vorton tute artefarita. Z mem ŝajnas implicite indiki tion en LZ I, 303, kiam li, kontrastante 'elpensitajn' vortojn kun 'naturaj', diras: "Sed por la personoj, kiuj jam ellernis kaj uzas la lingvon, estas ja tute egale, ĉu ili devas diri 'tuj' aŭ 'imediate' k.t.p.". Kp Berger 1947, 17: 'Espo tuj, inventita vorto, sed kiom elvokiva!' – [(5) Tute neverŝajna estas la volapükeca klarigo de Mattos (1987, 42): *tuj* estas prenita el la fino de I *presto* "baldaŭ", modifita ĉar *to* signifas en pEo "ci" (*pre-* jam estis okupita kiel aŭgmentativa prefikso). – (6) Bianchini 166 donas kiel fonton Ji *tuj,* kiun mi ne sukcesis retrovi aliloke.] – La klarigproponoj 1, 2, 3, 5 estas pritraktitaj kaj prijuĝitaj de Golden 1993; lia konkludo estas la jena: "'tuj' ĝis nun restas...sen certa patreco". ¶ 1882 *tuj.* – 1894 *statim* (< L). ¶ Io *quik* (< A *quickly* "rapide"), *nemediate* (kp IeIa); Ie *strax* (< Sv), *ínmediatmen* (< A *immediately,* F *immédiatement*); Ia *immediatemente, subinde* (< L "tuj post tio").

TUK/O (f; Un): G *Tuch* [-ĥ]. Kp Nd *doek* [duk], Sv *duk;* ank. Po *fartuch* [-ĥ], R *fartuk* "antaŭtuko". Bazita sur G; por G *ch* [ĥ] > Eo *k,* kp *fako.* En la romanaj lingvoj mankas vorto kun ekzakte la sama semantika enhavo. ¶ Io =; Ie *toale* ('tolaĵo'), *drap* (vd. *drapo*); Ia *pannello* ('ŝtofpeco').

Ĝerm. vorto (kp A *duck* "tiko") de nekonata origino.

TUL/O (f; RE): AFI *tulle,* G *Tüll,* Po *tiul,* R *tjul',* (H *tul*). Bazita sur FAI (*-e* neprononcata). ¶ Io =, Ie *tulle,* Ia **tulle* Ruhrig.

El F *point de Tulle* "punto el Tulle" (urbo en Corrèze, Francio, kie tiu teksaĵo unue estis fabrikata).

TULIP/O (f; RE): A *tulip,* F *-e,* I *-ano,* Po *-an,* (H *-án*), G *Tulpe,* R *tjul'pan;* L bot. *Tulipa* "-planto". AF(G) kaj la botanika termino prezentas malpli longan formon, kiu krome permesas eviti la sufiksidentan *-an.* ¶ Io =, Ie *tulip,* Ia *tulipan.*

El T *tülbent* "turbano" (nomo donita al la floro pro ĝia formo de Busbecq, kiu enkondukis ĝin en Eŭropon en la 16a jc), vd. tiun, etimologie identan. – Cherpillod 1992, 109.

TUMULT/O (f; RE): APo *tumult,* F *-e,* I(H) *-o,* G *Tumult;* L *tumultus.*

Probable ligita kun L *tumere* "esti ŝvelinta; esti ekscitita, boli" (vd. *tubero*).

TUN/O (8; PV; ne ĉe Z): A *(metric) ton,* F *tonne,* G *Tonne,* I *tonnellata,* (H *tonelada*), Po *tona,* R *tonna.* (Ĉiuj formoj cititaj krom F signifas ankaŭ "tonelo", kp tiun.) Estis necese ŝanĝi la nacilingvan radikon pro la ekzisto de *ton/o* (muz.). Aldono laŭ I ne taŭgis ĉar jam utiligita en *tonel/o.* La rezulto estis vokalŝanĝo *o* > *u* sen apogo en la fontlingvoj . Oni povas serĉi la u-vokalon en la L originvorto [vd. sube] aŭ en A *tun* "barelego, tino"), sed prefere oni komparu *frunt/o* (pro *front-*), *munt/i* (pro *mont-*). [Kp eo *tun/o* "tinuso" Backman 1919 , [Wü], PV kun rim. 'evitinda'.] ¶ Io =, Ie *tonn/e,* Ia *-a.*

El L mez. *tunna/tonna* "barelo" (poste, en modernaj lingvoj, la pezo de plena barelo), kredeble de gaŭla origino: kp Ir *tonn* "haŭto" (> "felsako" > "vinsako" > "vinbarelo"). Samfamiliaj vortoj en Eo: *tonelo, tunelo .*

TUNEL/O (1; PF, Jü): AFI *tunnel,* G *Tunnel,* Po *tunel,* R *tunnel',* (H *túnel*). ¶ Io =, IeIa *tunnel.*

A vorto, el F ant. *tonnel* "barelo; barelvolba koridoro", der. de F *tonne* "barel(eg)o". Vd. *tonelo,* etimologie identan, k *tuno.*

TUNIK/O (2; PF, Jü): L *tunica;* A *tun/ic,* F *-ique* [-ík], I *-ica,* PoR *-ika,* G *Tunika,* (H *túnica*).

L vorto pruntita el semida lingvo, kp He *ke'tonet* "tuniko", Ar *qut'un* "kotono" (vd. tiun; kp Gr *khitô´n* "tuniko").

TUNIZI/O (8; LInt 1904; kp *Tunis/uj/o* Eisto 5/1893, *Tunisi/o* LR n-ro 18B, PAG): A *Tunis/ia,* F *-ie,* I *-ia,* G *Tunesien,* Po *Tunezja,* R *Tunis,* , (H *Túnez*). Ĉe la fiksado de la radiko du problemoj estis solvendaj: *i* aŭ *e*? (el la plenaj fontlingvaj formoj, nur G kaj Po diverĝas per *e*); *s* aŭ *z*? (*z* havas fortan apogon pro la prononco en FGIPo/A/). Adoptante la formon *Tunizi-* oni tamen ne konformiĝas al la Za uzado. Tiu formo aŭtomate sekvigas *Tuniz/o* (PIV; kp *Tunis/o* FK, LR, Kabe). Kp Albault 1992b, 88. ¶ Io *Tunizia,* IeIa *Tunisia.*

La landnomo estas der. de la nomo de la ĉefurbo: Ar *tûnis/tûnus,* L *Tunes,* Gr *Ty´nês* kun necerta etimologio.

TUR/O (f; Un): L *turris;* A *tower,* F *tour* [tur], G *Turm,* I(H) *torre.* La Ea formo povas esti bazita sur L sole (kp *axis* > *aks/o, navis* > *nav/o, pelvis* > *pelv/o* k.a.) aŭ sur la komuna bazo *tur-* de tri fontlingvoj. ¶ Io *turmo,* IeIa *turre.*

L *turris* el Gr *ty´rsis* "(mur)turo, bastiono, urbo kun fortikaĵoj", probable vorto pruntita el iu mediteranea lingvo.

TURB/O (3; Jü): L *turb/o -inis.* Plena L nominativformo kun utiligo de fina *-o* kiel Ea substantivmarko (vd. *homo*). La L stemo estas deirpunkto por alia radiko *turbin-,* vd. tiun. Pluraj el la aliaj fontlingvoj havas ekvivalentojn komenciĝantajn per *t-* sed diferencajn inter si: A *top,* F *toupie,* I *trottola.* ¶ Io *tupio,* Ie *giron* (de *girar* "turniĝi"), Ia *turbine.*

Orig. "vortico, turniĝo, kirliĝo"; vd. plue sub *turbino.*

TURBAN/O (f; RE): AFPo *turban,* I(H) *-te,* G *Turban,* R *tjurban.* ¶ Io =, IeIa *turban.*

Pere de Tu *tülbend* "batisto; †turbano" el Pe *dulband* "turbano". Etimologie identa estas *tulipo.* – Cherpillod 1992, 109.

TURBIN/O (2; Jü): AF *turbin/e,* IPoR (H) *-a,* G *Turbine.*

Farita (19a jc) el L *turb/o -inis* "vortico, turniĝo, rondiro; turbo", samradika kun *turba* "agitiĝo, malordo, tumulto" de HE rad. **tŭer-* "turni, kirli" (vd. *kirli*). Etimologie identa estas *turbo.*

TURD/O (f; RE): L *turdus;* I(H) *tordo.* Adoptita en L formo kiel zoologia termino. ¶ IoIeIa =. Latin(id)a vorto, par. al A *thrush,* G *Drossel,* PoR *drozd* s.s. (HE bazo **trozdo-* aŭ sim.).

Ev. par. estas *struto,* kp tiun.

TURISM/O (2; Ka; kp *tur/ismo* Jü): A *tour/ism,* F *-isme* [tur-], G *Tourismus* [tur-], I(H) *tur/ismo,* R *-izm,* (Po *-ystyka*). Ps-sf *-ism.* – Nomo de praktikanto: **TURIST/O** (1; LInt 2/1899, Ka; kp *tur/isto* Jü): A *tour/ist,* F *-iste* [tur-], G *Tourist* [tur-], I(H) *tur/ista,* Po *-ysta,* R *-ist.* Ps-sf *-ist.*

A vortoj, der. de *tour* "rondveturo, ekskurso" el F *tour* s.s., subst. de *tourner* "rondiri; turni" (vd. *turni*).

TURK/O (8; Un s.v. *uj,* Eisto 2/1889, PR): A *Turk,* F *Turc,* G *Türke,* I(H) *turco,* Po *Turek,* R *turok.* Bazita sur AFI. ¶ Io *Turko,* Ie *Turc,* Ia *turco.*

El Tu *Türk.* La popolnomo estas de nekonata deveno. Samfamilia vorto en Eo: *turkiso.*

TURKIS/O (f; RE): AF *turquoise* [A -kŭoiz, -kŭa:z, F -kŭáz], G *Türkis,* I *turchese* [-k-], Po *turkus,* (H *turquesa* [-k-]). Analizo montras, ke *-u-* troviĝas en ĉiuj fontlingvoj krom G; *-k-* (skribe aŭ prononce) enGIPo*; -s* nevoĉa en GIPo. Entute la radiko ŝajnas bazita sur G (escepte de la vokalo, kiu povas esti ĉerpita el la plimulto; kp tamen G *ü* > Eo *u* en *flustri, frua, kajuto*).¶ Io *turkezo,* Ie *turkisa,* Ia *turchese.*

Propr. "turka (mineralo)", romana adj. de F *Turc,* HI *turco* "turko" (vd. tiun). La gemo estis unue trovata en Turkio. – Cherpillod 1992, 109.

TURMENT/I (f; Un; kp *torment-* Du): A *torment,* I *-are,* F *tourmenter* [-u-], (H *atormentar*). Eo *-u-* videble laŭ F prononco: **torment-* estus pli internacia. Ps-sf *-ment.* ¶ IoIeIa *tormentar.*

Der. de la responda romana subst.: F *tourment,* HI *tormento* el L *tormentum* "tortur(il)o", propr. " tordilo" de *torquere* "tordi" (vd. tiun).

TURN/I (f; Un): A *turn,* F *tourner* [-u-]. La radiko respegulas A ortografie kaj F prononce. La u-vokalo do estas egale natura tie ĉi kiel la o-vokalo en la ĝemela *torn/i.* ¶ Io *turnar,* IeIa *tornar, verter* (< L *vertere*).

El L *tornare* "torni" ('ĉirkaŭturni') de *tornus* "tornilo" el Gr *tórnos* s.s.. Oni rilatigas tiun vorton al rad. **ter-* "froti" (> "froti turnante" > "turni, tordi"), vd. *draŝi, tritiko.* Samfamiliaj vortoj en Eo: *konturo, tur/ismo, -isto, turniro.*

TURNIR/O (f; RE): A *tournament,* F *tournoi,* G *Turnier* [-í:r], I(H) *torneo,* Po *turniej,* R *turnir.* Bazita sur GR; por la radikfino, kp *spalir-* el G *Spalier.* Estas strange, ke Z je tiel frua stadio ne atentis la kolizion kun *turn-* kaj *ir-.* ¶ Io =, Ie *torney,* Ia *torneo.*

La G formo (kun dua *-r-* laŭ la responda verbo *turnieren*) el F ant. *tournei* "-o", pere de *tourneier* (mod. *tournoyer*) "-i" de *tourner* "turni" (sk. la ĉevalon), vd. tiun.

TURT/O (f; RE; kp *turtur/o* PF): L *turtur;* A *turtle-dove* (*dove* "kolombo"), F *tourterelle* [-u-], G *Turteltaube* (*Taube* "kolombo"), I *tortora,* (H *tórtola*). Probable klarigebla kiel L formo (zoologia termino) apokopita laŭ la principo de sufiĉo (kp *vesperto*); la rezulto estas radiko konsistanta el la komuna elemento de la LA FG formoj. Alie traktita estas la samtipa L *vultur* > Eo *vultur/o.* ¶ Io *turturo,* Ie *túrtur,* Ia **turture.*

L vorto de onomatopea origino (formita per duobligo samkiel *murmuri*); kp la vortojn sub *tetr(a)o.*

TUS/I (f; Un): L *tussire;* F *tousser* [tus-], I *tossire,* (H *toser*). Eo *s* intervokala el fontlingva *-ss-* kiel kutime. ¶ Io *tusar,* Ie *tuss/ar,* Ia *-ir.*

Der. de L *tussis* "-o", eble ligita kun *tundere*

(sup.rad.: *tus-*) "puŝi" ('tusado' = 'spasmaj puŝoj'?); kp tiuokaze *kontuzi.*

TUŜ/I (f; Un): A *touch* [-ĉ], F *toucher* [tuŝé], I *toccare,* (H *tocar*). Bazita sur F kun certa apogo de A. F *ch* > Eo *ŝ* laŭ la prononco, vd. *buŝ/o* kaj Cherpillod 1990, 16. ¶ Io *tushar,* Ie *tuchar,* Ia *toccar.*

Romana vorto, el L vulg. **toccare,* probable de onomatopea origino (la F interjekcio *toc* imitas brueton [> frapeton > tuŝeton]).

TUT/A (f; Un): F *tout(e)* [tu(t)], I *tutto,* (H *todo*); L *totus.* Kp A *tot/al* "-o, -a", F *-al* "-(aĵ)o; ĉioma", ank. G *-al,* I *-ale,* Po *-alny,* R *-al'nyj* "ĉioma" (> eo *total/a* PVS). Z hezitis inter *u* (FI) kaj *o* (L), kiel oni povas vidi el la pEaj formoj: ¶ 1878 *tot'.* – 1881 *tut-.* ¶ Ie *tot,* Io *-a,* Ia *-e.*

Necerta origino; ĉu par. al Oska *touto* "civito", Ir *túath,* Gt *thiuda* "popolo, nacio"? – Samfamilia vorto en Eo: *surtuto.*

U

UKAZ/O (2; Jü): AFI *ukase* [(A)FI -z], G *Ukas,* PoR *ukaz,* (H *ucase)*. ¶ Io =, Ie *ukase,* Ia *ukaz.*

R vorto, propr. "proklamo", subst. de *ukazat'* "dekreti, indiki" el pref. *u*- k -*kazat'* "montri" (kp Ĉe *kázati* "montri", Po *kazac'* "ordoni; prediki").

ULAN/O (2; N-ro 14 1888, Jü): AF *uhlan,* G *Ulan,* R *ulan,* I(H) -*o,* Po *ul'an.*

De tjurka (Tatara) origino; kp Tu *oglan* "knabo; soldato", kp *ogul* "filo".

ULCER/O (f; RE): L med. *ulc/us -eris;* A *ulcer,* I -*a,* F *ulcère,* G *Ulkus* (plur. *Ulzera*), (H *úlcera*). Povas esti rigardata kiel transpreno de la L stemo (medicina termino), sed la modernaj fontlingvoj konfirmas la saman formon. Analoga traktado de la sama L deklinacitipo nur ĉe *later/o*; kp ank. *leporo.* ¶ Io =, Ie *úlcere,* Ia *ulcere.*

L *ulcus* "vundo, ulcero" estas identa kun Gr *hélkos* s.s., Sa *árcas* "hemoroidoj".

ULM/O (f; RE): L *ulmus;* A *elm,* F *orme,* G *Ulme,* I(H) *olmo.* La L botanika termino estas apogata de G. ¶ IoIa =, Ie *ulme.*

La latin(id)a vorto estas prapar. al A *elm,* Ir *lem* s.s. (HE bazo **lmo-*).

ULN/O (f; RE): L *ulna;* A *ell,* F *aune,* G *Elle,* I *auna.* Bazita sur la L formo, kiu ankaŭ aperas en la homonima anatomia termino eo *uln/o* Ve, Wü (LAI *ulna*). ¶ Io = (kp anat. *kubito* <

L *cubitus* "kubuto"), Ie *uln/e* (kp anat. *cúbite*), Ia -*a* (ank. anat.). La latin(id)a vorto estas prapar. al la cititaj AG formoj (kp Gt *aleina* s.s.) k al Gr *ôlénê* "kubuto, brako", Ir *uilon* "kubuto" (HE **olena*).

ULTIMAT/O (2; Jü; kp *ultimatum/o* Be): AFIPoR *ultimat/um,* G *Ultimatum,* (H *ultimátum,* kp P *ultimato*). La latineca -*um* estas apokopita kiel normale en Eaj radikoj (tipa ekzemplo *centr/o* < L *centrum;* vd. Modrijan 18 s.). ¶ Io =, IeIa *ultimatum.*

Propr. "lasta kondiĉo/propono", formita en L mod. (laŭ modelo de L *imperatum* "ordono") el L *ultimus* "lasta, plej fora, ekstrema", superlativo de *uls* "trans" (kp *ultra* "trans[e]") de la pronoma radiko *ol-* "tiu" (L arĥ. *olle* "tiu"), vd. *ili.*

UMBILIK/O (f; RE): L *umbilicus;* F *ombilic,* I *ombelico,* (H *ombligo*). Kp A *umbilical* "-a". Bazita sur L kiel anatomia termino. ¶ Io =, IeIa *umbilico.*

Praparenca al A *navel,* G *Nabel* s.s., kp ank. Sa *nábhi,* Gr *omphalós* (proksimuma HE bazo **ombh-, nobh-*).

UNC/O (f; RE): A *ounce,* F *once,* G *Unze* [-ts-], I *oncia,* Po *uncja,* R *uncija,* (H *onza*); L *uncia.* Probable bazita sur L ortografio (*c* kun apogo de AFIPo) sed kun retuŝoj: mallonga formo laŭ AFG, la prononco [ts] laŭ GPoR. ¶ Io =, Ie *unci/e,* Ia -*a.*

Latin(id)a vorto , probable orig. "unuo, unito", der. de L *unus* "unu" (vd. tiun).

UNG/O (f; Un): L *unguis* [-gŭ-]; F *ongle,* I *unghia,* (H *uña*). Bazita sur L (kun simpligita finsono, kp *disting/i, esting/i;* pri L *gu* entute, vd. sub *lingvo*) kun apogo de I. ¶ Io *unglo,* Ie *ungul,* Ia *-a* (vd. sube).

Latin(id)a vorto (F el dim. *ungula*), prapar. al A *nail* (vd, *najlo*), G *Nagel,* R *nogot',* kp ank. Sa *ánghri-* "piedo", Gr *ónyx* "ungo" (vd. *onikso*), Ir *inga* "ungo", Li *nâgas* "ungo": HE bazo **onogh-* (**ongh-,* **nogh-*).

UNIFORM/O (f; RE): APo *uniform,* FI (H) *-e,* G *Uniform.* Propr. "unuforma (vesto)", el L adj. *uniformis* "unueca, unuforma", kunm. de numerala pref. *uni-* "unu-" k *forma* "formo", vd. tiujn.

UNIK/A (3; Jü): AF *un/ique* [-ik], I *-ico,* (H *único*); L *unicus.* Kp G *Unikum,* Po *unikat* "-aĵo". Ps-sf *-ik.*

Der. de L *unus* "unu" (> "unusola de sia speco"), vd. tiun; kp la analogajn formaĵojn G *einig* "unusola", R *inok* "monaĥo".

UNISON/O (1; Ve, PV): AR *unison,* IPo (H) *-o,* F *unisson,* G *Unisono.* Nevoĉa *s* en ĉiuj fontlingvoj. I vorto, propr. "unusona (akordo)", el L *unisonus,* adj. kunm. de numerala pref. *uni-* "unu-" k *sonus* "sono" (vd. tiujn).

UNIVERS/O (f:RE): F *univers,* A *-e,* I (H) *-o,* G *Universum;* L *universum.*

Propr. "ĉio(mo), tutaĵo" (kp semantike G *Weltall* s.s., propr. "mondtutaĵo"), subst.-igo de L *universus* "tuta, ĉi(om)a", orig. "turnita en unu (sama) direkto", kunm. de numerala pref. *uni-* "unu-" (vd. tiun) k *versus* "turnita", ptc.perf. de *vertere* "turni" (vd. *verso*). Kp spec la sekvajn .

UNIVERSAL/A (f; RE): AG(H) *univers/al,* F *-el,* I *-ale,* Po *uniwersalny;* L *universalis.* Ps-sf *-al.* ¶ 1878 *uniwersala.* – 1881 *universala.*

Propr. "ĝenerala, tuteca", der. de L *universum* "tutaĵo" (vd. la antaŭan).

UNIVERSITAT/O (f; N-ro 15 1888, RE): A *univers/ity,* F *-ité,* I *-ità,* R *-itet,* G *Universität,* Po *uniwersytet;* L mez., mod. *univers/itas -itatis.* Ps-sf *-t(at).*

Orig. "studentaro, tuto da studentoj", der. de L *universus* "tuta" (vd. *universo*).

UNU (f; Un): L *unus* (kiel numerala prefikso: *uni-*); F *un,* I(H) *uno,* Vaste konata en internaciaj pruntvortoj ankaŭ ekster la latinidaj lingvoj, ekz. A *unite* "unuigi", *unanimous* "unuanima"; G *Union,* Po *unia,* R *unija* "unuiĝo"; G *uni* "unukolora"; R *unitarnyj* "unueca"; vd. ankaŭ la vortojn cititajn sub *unika.* Kontraste kun ĉiuj aliaj bazaj numeraloj, tiu ĉi estas dusilaba; Z mem donis la motivon por tio (PVZ 3, 138): "'unu' ekzistis, por ke ni povu formi 'unuj'." [Alie Mattos 1987, 54: "La numeralo *un* (de pEo) akiris finan vokalon, eble por evito de ebla ambigueco pro la morfemo *on.*"] La bezonatan vokalon provizis la L formoj mask. kaj ntr.: *unus, unum.* ¶ 1878 *kon/un/ig/are* "kun/unu/ig/i". – 1881 *un.* – 1894 *un.* ¶ IoIeIa *un.*

Prapar. al A *one,* G *ein,* Gt *ains* (pĜ **ainaz*), kp ank. Gr *oínê* "unuo", Ir *oen* "unu" (HE **oinos*). Samfamiliaj vortoj en Eo: *unco, uniformo, unika, unisono, univers/o, -ala, -itato.* Kp ank. *nul.* Ev. identa estas *ajn.*

UR/O (f; RE): L *urus;* AF *aurochs,* , G *Auerochs (Ochs* "bovo"), *Ur,* I(H) *uro.* Bazita sur L (zoologia termino). ¶ Io *uroxo,* IeIa* *uro.*

Latin(id)a vorto de ĝerm. origino (G ant. *uro,* pĜ **uru-*), ev. orig. "fekundiganto" (< "akvumanto"), kp Sa *várŝati* "pluvas", *vr̥´ŝan-* "viro, masklo" (HE rad. **ŭer/ûr-,* vd. *urino*).

URAGAN/O (1; PF, Jü): A *hurricane,* F *ouragan* [uragâ], G *Orkan,* I *uragano,* Po *huragan, orkan,* R *uragan,* (H *huracán*). Bazita sur la akordo IR, apogata de F prononco (escepte de la nazala finvokalo). ¶ Io =, Ie *uragane,* Ia *huracan.*

Pere de H el Taino-lingva (Haitio) *huracan* s.s., ankaŭ nomo de malbona marspirito, kredeble el Maja *hunraken* "unukrurulo" (nomo de la stelaro Granda Urso, sub kies signo la aŭtunaj tempestoj furiozis).

URB/O (F; Un): L *urbs* (gen.: *urbis*). Kp A *urban* "-a", *suburb* "antaŭ-o"; F *interurbain* "inter-a"; I(H) *urbano* "-a"; ank. I *urbe* (poet.) "-o", (H *urbe* "metropolo"). Kp ank., en la 20-a jc., internaciajn terminojn kiel A *urban/ize*, F *-iser*, G *-isieren* ktp "-igi" k.s. La (preskaŭ)sinonimo L *civitas*, I *città*, (A *city*, F *cité*, H *ciudad*) fariĝis *civit/o*; cetere malsamaj vortoj estas uzataj en la modernaj fontlingvoj. ¶ 1882 *urb* -. ¶ Io =, Ie *cité*, Ia *urbe, citate*.

L *urbs* estas sendube pruntvorto (el nekonata fonto).

URĜ/I (1; de Lengyel LInt 6-7/1902, Jü): I *urg/ere*, (H *-ir*). Kp A *urge* [-ĝ] "urĝi, insisti" kaj precipe AF *urgent* [A -ĝ-, F -ĵ-], I(H) *urgente* [I -ĝ-, H -ĥ-] "-a". La verbo povas esti formita retrograde el la citita adjektivo (orig. ptc.prez.). ¶ Io *urjar*, Iela *urger*.

El L *urgere* "premi, trudi, insisti", eble par. al G *rächen* "venĝi sin" (HE **ŭreg-*).

URIN/O (f; RE): AF *urin/e*, R *-a*, G *Urin*, I *orina, urina*, Po *uryna*, (H *orina*, kp *urinario* "-ejo"); L *urina*. Verbo: A *urin/ate*, F *-er*, G *-ieren*, I *orinare, ur-*, (H *orinar*). ¶ 1906a *pis-*; kp eo *pis/i* PVS, GD (< A *piss*, F *-er*, G *-en*, I *pisciare*). ¶ Io =, Ie *urin/e*, Ia *-a*.

L *urina* estas par. al Gr *oúron* s.s., Sa *vâr* "akvo", *várŝati* "pluvas" (HE rad. **ŭer-/ûr-* "aspergi, akvumi, pluvi; akvo, pluvo, fluo"). Kp *uro*.

URN/O (f; RE): A *urn*, F *-e*, IPoR(H) *-a*, G *Urne*; L *urna*. ¶ Io =, Ie *urn/e*, Ia *-a*.

L *urna* estas probable samradika kun *urceus* "kruĉo", kp Gr *hy´rkha* "argila ujo".

UROGAL/O (f; RE): L zool. *Tetrao urogallus*; I(H) *urogallo*. Zoologia termino prenita el L. ¶ Io =, Iela* *urogallo*.

L termino, propr. "vostokoko", farita el Gr *ourá* "vosto" (vd. *sciuro*) k L *gallus* "koko" (kun necerta etimologio).

URS/O (f; Un): L *ursus*; F *ours* [urs], I *orso*, (H *oso*, P *urso*). Kp A *ursine* "-a". La L radiko (zoologia termino!) estas plene apogata de la F prononco. ¶ IoIeIa =.

El HE **rktho-s* "urso", kp Gr *árktos*, Sa *r̥kŝa-*, Ir *art* s.s.

URTIK/O (f; RE): L *urtica*; F *ortie* (kp *urtication* "-ado"), I *ortica*, (H *ortiga*). Botanika termino prenita el L. ¶ Io =, Iela *urtica*.

Kredeble der. de la radiko en L *urere* "bruligi" de HE rad. **eus-* s.s., kp Sa *oŝáti* "brulas", Gr *heúein* "bruletigi".

URUGVAJ/O (8; LEsp 8-9/1898): AFG I(H) *Uruguay*, Po *Urugwaj*, R *Urugvaj*. Formo paralela al *Paragvaj/o* kun slaveca *gv* respondanta al romana *gu* (kp spec. *Gvatemalo*; pri Eo *gv* ĝenerale vd. *lingvo*).

La lando estas nomita laŭ la samnoma rivero, diversmaniere interpretita Gvarania vorto. – Albault 1991b, 91.

UTER/O (f; RE): L *uterus*; F *utérus*, I *utero*, (H *útero*). Kp A *uterine* "-a". ¶ Io =, Ie *útere*, Ia *utero*.

Par. al Sa *udáram* "ventro".

UTIL/A (f; Un): L *utilis*; FI *utile*, (H *útil*). Kp A *utility* "-eco". Ps-sf *-il*. ¶ Io =, Ie *util*, Ia *-e*.

Propr. "uzebla", der. de L *uti* "uzi" (vd. tiun).

UTOPI/O (1; Eisto 1/1889, Be): AIPo *utop/ia*, F *-ie*, R *-ija*, (H *-ía*), G *Utopie*. Ps-sf *-i* 3. ¶ Io =, Ie *utop/ie*, Ia *-ia*.

Laŭ L *Utopia*, nomo de verko de Th. More (1516) priskribanta imagitan idealan ŝtaton; la nomo estas konstruita el Gr *ou* "ne" k *tópos* "loko" (vd. *topograf/o, -io*), do "Nenie-ujo".

UVERTUR/O (1; Jü): A *overture*, FI *ouverture* [u-], G *Ouvertüre* [u-], Po *uwertura*, R *uvertjura*, (H *obertura*). Radikkomenco laŭ F(GPo) prononco; la fino konformiĝas al la ps-sf *-ur*, kiu enestas. ¶ Io =, Iela *overtura*.

F vorto, propr. "malfermo" (> "komenco" > "komenca muzikaĵo"), subst. de *ouvrir* "malfermi" el L *aperire* s.s. (vd. *aperturo*, etimologie identan; la vokalŝanĝo *a* > *ou* eble laŭ modelo de *couvrir* "kovri").

UZ/I (f; Un): A *use* [-z], F *user* [-z-], I *usare* [-z-], Po *uz´ywac',* (H *usar*). Kp L *usus* "-o". Eo -*z* laŭ la prononco de ĉiuj kvar modernaj fontlingvoj. ¶ 1881 *ut-* (vd. sube). – 1894 *us-*. ¶ Io *uzar,* IeIa *usar.*

El L vulg. **usare* "uzi", der. de L *usus* "uzinta", ptc.perf. de *uti* "uzi" (sup.rad.: *us-*, de kiu la subst. *usus* "-o") kun necerta etimologio. Samfamiliaj vortoj en Eo: *utila, uzuro, uzurpi.*

UZUR/O (4; PV; ne ĉe Z; antaŭe *procent/eg/o* UV): A *us/ury,* F -*ure* [-z-], I(H) -*ura* [I -z-]. Eo -*z*- laŭ la prononco en FI kaj la tendenco voĉigi intervokalan *s* (kp Szerdahelyi 1987, 115). Influo de Io ne estas ekskludita. Ps-sf -*ur.* ¶ Io =, Ie *us-ur/e,* Ia -*a.*

El L *usura* "interezo", propr. "uzado, uzrajto" (> "pago por uzado" > "interezo"), subst. de *uti* (sup.rad.: *us-*) "uzi", vd. tiun.

UZURP/I (f; RE): A *usurp* [-z-], F -*er* [-z-], G -*ieren* [-z-], I -*are* [-z-], Po *uzurpowac';* L *usurpare.* Eo -*z*- laŭ la prononco en la modernaj fontlingvoj; la klara kunligiteco kun *uz-* eble influis. ¶ 1894 *usurp-*. ¶ Io *uzurpar,* IeIa *usurpar.*

L *usurpare* "ekuzi, uzadi, pretendi, uzurpi", propr. "preni (por si) la uzon (de io)", kunm. de *usus* "uzo" k *rapere* "tiri al si, rabi" (vd. *uzi* resp. *rabi*).

V

VAD/I (3; Jü): A *wade,* G *waten* [v-], (H *vadear*). Kp L *vadum,* I *guado* "-ejo"; ank. Sv *vada* "-i". Kredeble bazita sur la L subst., konsonantisme apogata de G ([v-]) kaj A (*d*). ¶ IoIeIa *vadar.*

AGSv el pĜ **wadhan,* par. al L *vadum,* samradika kun *vadere* "iri, marŝi". Samfamilia vorto en Eo: *invadi.*

VAFL/O (f; EG): A *waffle,* F *gaufre,* G *Waffel* [v-], Po *wafel* [v-], R *vaflja.* Vorto reprezentata en ĉiuj tri fontlingvaj familioj; por la radikfino *-fl* (AR; kp *-fel* en G Po, kp *pantofl/o.* Fontlingvoj por tiu ĉi radiko GPoR laŭ Gregor 1982, 29. ¶ Io =, Ie *vaffle,* Ia *wafla.*

Ĝerm. vorto (> F ant. *vaufre* > F *gaufre*; pri romana *g-* = ĝerm. *w-,* vd. *gardi*), orig. G basa *wafel,* ligita kun G *Wabe* "mielĉelaro" (pro simila aspekto), samradika kun G *weben* "teksi" (vd. *vespo*).

VAG/I (f; RE; kp *erar/i* Un RPo): L *vagari;* F *vaguer,* I *vag/are,* (H *-ar*). Grava por la radiko estas ankaŭ la internacia derivaĵo AF *vaga/bond,* I *-bondo,* (H *-bundo*), G *Vagabund,* Po *wagabunda* "vagisto" (> eo *vaga/bund/o* Wü, *-bond/o* PVS, GD). Kp sub *erari.* ¶ 1882 *vag-.* ¶ IoIeIa *vagar.*

Der. de L *vagus* "vaganta, nestabila", eble par. al G *wanken* "ŝanceliĝi". Kp ev. *revi.*

VAGON/O (f; RE): A *waggon,* FPo *wagon,* G *Waggon,* I *vag/one,* R *-on,* (H *-ón*). ¶ Io =, Ie *vagon,* Ia *wagon.*

A vorto, identa kun G *Wagen* "veturilo", Sv *vagn* s.s.: pĜ **vaĵna-,* de HE rad. **ŭegh-* "transporti", kp Sa *váhati* "transportas", Gr *ókhos* "veturilo", L *vehiculum* "veturilo", G *Weg* "vojo", *be-wegen* "movi", Li *vèž'ti* "veturi". Parencaj vortoj en Eo: *konveksa, vekto, vojo.*

VAK/I (1; Jü): L *vacare;* F *vaquer* [-k-], Po *wakować,* (H *vacar*). Kp AF *vac/ant,* I(H) *-ante,* G *vakant,* R *-nyj* "-anta"; ank. A *vacate* "vakigi". Eble formita retrograde el la internacia adjektivo. ¶ Io *vakar,* IeIa *vacar.*

L *vacare* "vaki" k *vacuus* "malplena" estas samradikaj kun L *vanus* "vana", vd. tiun.

VAKCIN/O (8; *-i* Ve, PV, *-o* Briquet, Wü, GD, PIV; kp *vakcin/ser/o* "-o" Ve): A *vacc/ine,* F *-in,* I *-ino,* G *Vakzin* [-kts-], Po *wakcyna,* R *vakcina,* (H *vacuna*); L med. *vaccinum.* Pri Eo *-kc-* el fontlingva *-cc-,* vd. *akceli.* – Ps-sf *-in* 1. ¶ Io *vacin-serum-o,* Ie *vaccin/e,* Ia *-o.*

Originas en A (Jenner 1798), unue kiel adj. (*vaccine matter* '-a materio'), prenita el la modernlatina medicina nomo de la bova pokso, *variolae vaccinae,* propr. 'bovina variolo': L *vaccinus* "bovina", adj. de *vacca* "bovino", identa kun Sa *vacâ*'s.s. (Kp ev. sekv.)

VAKCINI/O (f; RE): L bot. *Vaccinium.* Botanika termino prenita el L. Pri Eo *-kc-* el fontlingva *-cc-,* vd. *akceli.* – Signifis origine (RE, Be, Jü, Ka, GD) specion kun ruĝaj beroj (*Vaccinium vitis idaea*),

poste (Wü, [PV], PIV) ankaŭ la genron (vd. Fund., p. 342). ¶ Io *vacinio,* Ie *vaccinie, mirtille rubi,* Ia **vaccinio* Stenström.

L klas. *vaccinium* signifas "mirtelo"; kredeble pruntita (kun supozebla popola asociiĝo al *vacca* "bovino", vd. la antaŭan) el (dialekta formo de) Gr *hyákinthos,* nomo de pluraj plantoj, i.a. mirtelo. Kp *hiacinto.*

VAKS/O (f; Un): A *wax* [ŭäks], G *Wachs* [vaks], Po *wosk.* R *vosk.* Kp Sv *vax.* Bazita sur G, de kiu la A prononco nur malmulte diverĝas. Ĝermana radiko, 'ĉar *cir...* estis adoptita por poluri ŝuojn' (Collinson 1959, 5; kp *ciro*). (La radikformo *vaks-* estis prezentata en Un R kun la signifo "kreski" [< G *wachsen*], vd. tiun; ŝanĝita jam en la aliaj eldonoj de Un.) ¶ Io *vaxo;* Ie *cire,* Ia *cera.* Ĝerm. vorto, kp ank. Nd *was,* Da *voks:* pĜ **wahsa-,* kp la PoR formojn k Li *vâŝkas* s.s. (H)E bazo **ŭokso-,* eble (kun aludo al la mielĉelaro) de rad. **ŭeg-* "teksi", vd. sub *velo.*

VAL/O (f; RE): L *vallis;* A *valley/vale,* F *vallée/val,* I(H) *valle.* Bazita sur L aŭ (pli probable) sur la bazelemento komuna al LAFHI (kp *turo*). ¶ Io =, Ie *vall/ey,* Ia *-e.*

L *vallis* povas esti samradika kun *volvere* "ruli" (pro la kavigita formo de valo), vd. *volvi.*

VALID/A (4; Jü): A *val/id,* F *-ide,* I *-ido,* (H *válido*). Ps-sf *-id* 1. ¶ Io =, Ie *val-id* (kp *valer* "-i"), Ia *valide.*

El L *validus* "forta, sana, firma, potenca, efika", adj. de *valere* "esti forta/potenca, efiki" (vd. *valoro*).

VALIZ/O (f; RE): AF *valise* [A -z aŭ -s, F -z], I *valigia,* Po *wliz(k)a,* (H *valija*). Eo *-z* laŭ la prononco en (A)FPo. ¶ 1894 *valis-.* ¶ Io =, IeIa *valise.*

Romana vorto (kp L mez. *valisia*) de necerta origino (laŭ Cherpillod 1992, 112 eble el Ar *walîħa* "sako por tritiko").

VALOR/o (f', 1, 7; *-i* Be, Jü, Wü, PV ktp; *-o* Ka): A *value,* F *val/eur,* I *-ore,* (H *-or*), Po *walor.* La formo montras la substantivon kiel etimon, kvankam la radiko estas prezentita (ĉefe) verbe. Kp la verbon F *val/oir,* I *-ere,* (H *-er*). – Ps-sf *-or* 2. ¶ Io *valor/ar, -o;* Ie *val/er, -ore;* Ia *val/er, -or.*

El L **valor,* subst. de L *valere* "esti forta/sana/potenca/kapabla" de HE rad. **ŭal-* "esti potenca", kp G *walten* "regi" (kp *heroldo*), R *vlast'* "potenco", Li *valdy´ti* "regi". Samfamilia vorto en Eo: *valida.*

VALS/O (f; N-ro 14 1888, RE): A *waltz,* F *valse,* G *Walzer,* I *valzer,* Po *walc,* R(H) *vals.* Bazita sur FR kun prefero de simpla *s* antaŭ [ts]. ¶ Io =, Ie *valse,* Ia *walzer.*

G vorto, propr. "turniĝo", der. de *(sich) wälzen* "ruliĝi, sin turnadi" (kp *Walze* "rulo"), prapar. al L *volvere* "ruli" (vd. *volvi*).

VAMPIR/O (1; Jü): R *vampir,* AF *-e,* I(H) *-o,* G *Vampir,* Po *wampir.* El SK *vampir* s.s., identa kun R *upyr',* Po *upiór* "vampiro, fantomo".

Slava vorto kun necerta etimologio.

VAN/A (f; Un): L *vanus;* AF *vain,* I(H) *vano.* Bazita sur L kun apogo de I. Kp *vant/a,* kiu reprezentas diferencigon de tiu ĉi radiko. ¶ Io =, IeIa *van.*

L vorto kun orig. signifo "malplena" (> "senrezulta, senefika, nereala", samradika kun L *vacuus* "malplena", *vacare* "vaki"; par. al Sa *ûná-* "nesufiĉa, mankanta", A *want* "manki; bezoni" de HE rad. **ŭa-* "manki, esti malplena". Ĝemela vorto: *vanta;* par. estas ank. *vaki, vasta.*

VANEL/O (1; Jü): L zool. *Vanellus vanellus;* F *vanneau.* Zoologia termino prenita el L. ¶ Io =, Ie *vanell/e,* Ia* *-o.*

Der. de F *van* "ventumkorbo" (kredeble pro komparo de la bruo de tia kun tiu kiun faras la birdo per la flugiloj), el L *vannus* s.s., eble par. al *ventus* "vento" (kp tiun).

VANG/O (f; Un): G *Wange.* Kp Nd *wang.* Bazita ekskluzive sur G. Unu el grupo da ĝermandevenaj nomoj por korpopartoj, vd. Collinson 1959, 5. ¶ 1881 *z'u-* (< F *joue*). – 1894 *buk-* (< L *bucca*). ¶ Io =, Ie *guancie* (vd. sube), Ia *gena* (< L).

Ĝerm. vorto (> I *guancia* s.s.), orig. signifanta ion kurban/volban, de HE rad. **ŭa(n)k-* "kurbiĝi", kp Sa *váñĉati* "kurbiĝas, iras kurbigite", L *vacillare* "ŝanceliĝi". Parenca vorto en Eo: *konveksa.*

VANIL/O (f; RE): A *vanill/a,* F *-e* [-íj], G *Vanille,* I *vanigla* [-l'-], Po *wanilia,* R *vanil',* (H *vainilla* [-l'-]); L bot. *Vanilla.* Romana [l'] reprezentata per *l* laŭ la AFG ortografio (vd. *abelo*; kp spec. *bilardo, bileto, gilotino*). ¶ Io =, Ie *vanill/e,* Ia *-a.*

H vorto, propr. "silikveto" (do orig. pri la vanilfruktoj), dim. de *vaina* "silikvo, ingo" el L *vagina* "ingo" (ank. kiel anatomia termino > eo *vagin/o* ER) kun necerta etimologio.

VANT/A (f; RE): AF *vain,* I *vano*; L *vanus.* Kp la subst. A *van/ity,* F *-ité,* I *-ità,* (H *-idad*), L *-itas -itatis* "-eco" kun derivita adj. F *vanit/eux,* I *-oso,* (H *vanidoso*) "-a, -eca". Bazita sur la samaj fontlingvaj adjektivoj kiel *van/a*; tiu L radiko (kaj ĝiaj latinidaj idoj) reprezentas du sencojn, kiujn Z diferencigis (proksimume "senefika; frivola"). La diferenciga *t* devenas de la responda substantivo (Waringhien LV 76). Oni atendus *-it* (kp la samtipajn *civit/o, kvalit/o*), sed la *i* (senakcenta en ĉiuj fontlingvaj formoj) estas ellasita, evidente por oportunigi la formon kaj ne kolizii kun la participa *it* (tiel Szerdahelyi 1987, 126). (Yamasaki Supl., 5a eld. 18, citas ankoraŭ plurajn fontvortojn forme similajn sed semantike iom alisencajn, ekz. A *vaunt* "fanfaroni", I *vantare* s.s.; ili ne estas bezonataj por klarigi la etimologion de *vant/a*). ¶ 1894 *vanit-.* ¶ Io *vanitat-oza,* Ie *vanitosi,* Ia *vanitose, van.*

(Der. de) L *vanus,* orig. "malplena" (> "senvalora, negrava, frivola"); vd. *vana,* etimologie identan.

VAPOR/O (f; Un): A *vap/our,* F *-eur* (kp *vaporeux* "-eca"), I *-ore,* (H *-or*); L *vapor.* Ps-sf *-or* 2. ¶ Io =, IeIa *vapor.*

Eble par. al Li *kvâpas* "vaporaĵo".

VAR/O (4; PV; antaŭe *komerc/aĵ/o*; kp ank. eo *artikl/o* Wü): A *ware(s),* G *Ware.* Kp Nd *waar,* Sv *vara.* Bazita sur G kun ortografia apogo de A. ¶ Io =; IeIa *merce* (< L *merx,* gen. *mercis*).

Ĝerm. vorto (pĜ **waro*) kun pridisputata etimologio.

VARB/I (f; RE): G *werben* (pret.: *warb*), Po *werbowac',* R *verbovat'.* Kp Ji *verbirn.* La kialo de Eo *-a-* estas kompreneble la ekzisto de alia radiko *verb-* (Gold 1980, 314 s.; Szerdahelyi 1987, 131); la formo estas analoga al *traf-* (G pret. *traf*), ev. ankaŭ al *flug-* (G pret. *flug*). Ĝermana radiko elektita, laŭ Collinson 1959, 10, 'ĉar pli vastsignifa ol *rekrut-*'. ¶ 1894 *engag-* (< F *engager*). ¶ Io *rekrutar,* IeIa *recrutar* (kp Eo *rekruti,* adoptita en strikte militista senco).

Ĝerm. vorto (kp Da *hverve,* Nd *werven*) kun orig. signifo "esti aktiva, turniĝi, agitiĝi: pĜ **hwerban* de HE rad. **kŭerp-* "turniĝi", kp Gr *karpós* "manartiko".

VARI/I (3; *-o* Jü, *-i* Ka ktp): A *vary,* F *vari/er,* G *-ieren,* I *-are,* (H *-ar*); L *variare.* Kp R *variacija* "-ado". ¶ IoIeIa *variar.*

Der. de L *varius* "varia, bunta" kun nekonata etimologio. Samfamiliaj: *varianto. variolo.*

VARIANT/O (2; PV, PVS; kp *vari/ant/o* Jü, Wü, *-o, -ant/o* Ve): A *variant,* FI(H)*-e,* R *-a,* G *Variante,* Po *wariant.* Termino uzata en pluraj fakoj (filologio [oficiala senco], arkitekturo, botaniko, matematiko, ŝakludo), ĉie kun la baza signifo "io kio varias"; la analizo *vari/ant/o* do estas tute natura. Verax faris provon diferencigi laŭ la fakoj: *vari/o* bot., *-ant/o* mat.; GD prezentas *vari/o* bot., *-ant/o* ark., mat., filol. – BRO (AdA II, 50) avertas ke *vari/o* povas signifi nur "ago varii". ¶ Io *vari-anto,* IeIa *variante.*

El L *vari/ans -antis,* ptc.prez. de *variare* "varii", vd. tiun.

VARIOL/O (f; RE): L med. *variola*; F *variole,* I *vaiolo,* (H *viruela*). Medicina termino bazita sur L kun apogo de F. ¶ Io =, Ie *variol,* Ia *-a.*

Propr. "makuleta (malsano)", de L tardepoka adj. *variolus*, der. de *varius* "bunta, makulita, varia" (vd. *varii*).

VARM/A (f; Un): AG *warm*. Kp Nd *warm*, Sv *varm*. Kiel estas videble el la pEa formo, Z hezitis inter la ĝermana kaj la latin(id)a (L *calidus*, F *chaud*, I *caldo*, [H *caliente*]) alternativoj. La elekto de ĝermana formo estis, laŭ Collinson 1959, 7 s., pravigita de la fakto ke la latinida ekvivalento tro similas al ĝermana vorto kun ĝuste kontraŭa signifo (G *kalt*, A *cold*, Sv *kall* "malvarma"). Laŭ Golden (Li k Ni 406) la elekto estis influata de Vp *vamik*. ¶ 1881 *kal-* (kp Z en PVZ kromkajero 3, p. 22:"'kala' estas oportunigita formo de la latina 'calidus'). – 1894 *kalor-* (< L *calor* "-o"). ¶ Io =; Ie *calid*, Ia *cal(i)de*. Ĝerm. vorto (kp ank. Gt *warmjan* "varmigi"): pĜ **warma-* el HE **gŭhermo-* s.s., kp Gr *thermós* "varma" (kp *termometro*), Sa *gharmá-* "varmego", L *fornus* "forno" (kp tiun).

VART/I (f; RE): G *warten* (ank. "flegi, zorgi pri"). Bazita ekskluzive sur G. Oni notu, ke la partaj sinonimoj *flegi* kaj *zorgi* ankaŭ estas prenitaj el G (kp Collinson, vd. *flegi*). La sencospecialigo de *varti* ne respegulas la situacion en G; ĉu ĝi estas elpensaĵo de Z? ¶ 1894 *kuid-* (< H *cuidar*). ¶ Mankas en la aliaj L.I. (ekz. Io *gardar*, *flegar*).

Ĝerm. vorto (kp ank. Sv *vårda* [vó:-] "flegi, varti"), etmologie identa kun *gardi* (vd. tiun).

VASAL/O (f; RE): AFR *vassal*, I(H) *-lo*, G *Vasall*, Po *wasal*. Eo *-s-* el fontlingva *-ss-* [s]. ¶ Io *vasal(ul)o*, Ie *vassal/e*, Ia *-lo*.

El L mez. *vasallus* s.s. de kelta origino, kp Ki *gwasawl* "servanta" (de *gwas* "servisto").

VAST/A (f; Un): A *vast*, F *-e*, I(H) *-o*; L *vastus*. ¶ Io =, Ie *vast*, Ia *-e*.

L *vastus* orig. "malplena, dezerta" (poste, ĉar dezerto facile elvokas ideon de grandeco, "vasta, grandega"), samradika kun L *vanus* "malplena" (vd. *vana*) k par. al A *waste*, G *wüst* "dezerta" (HE **ŭasto-*, kp ank. Ir *fas* "malplena").

VAT/O (f; N-ro 14 1888, RE): F *ouate* [ŭat], G *Watte*, I *ovatta*, PoR *vata*, (H *guata*). Kp A *wadding* s.s. Videble bazita sur GPoR (Gregor 1982, 29; Szerdahelyi 1987, 113 emfazas la R etimon). ¶ Io =, Ie *vatte*, Ia *watta*.

El L mez. *wadda* s.s., eble el Ar *bat´âin*, plur. de *bit´âna* "subŝtofo", de *bat´n* "ventro, interno" (rad. *batana* "esti kaŝita") – Cherpillod 1992, 112.

VAZ/O (f; Un): AF *vase* [-z], G *Vase* [-z-], I *vaso* [-z-], PoR *vaza*, (H *vaso*, *vasija*); L *vas* (gen. *vasis*). Eo *-z* laŭ la prononco de ĉiuj modernaj fontlingvoj. ¶ Io =, Ie *vas/e*, Ia *-o*.

Latin(id)a vorto kun necerta etimologio.

VAZELIN/O (2; LInt 4/1899, Jü): AF *vasel/ine* [-z-], I(H) *-ina* [I -z-], G *Vaseline* [-z-], Po *wazelina*, R *vazelin*. Eo *-z-* laŭ la prononco de ĉiuj fontlingvoj. Ps-sf *-in* 2.

Farita kiel komerca marko (en A de Chesebrough, 1872) el G *Wasser* "akvo" (vd. *hidrofobio*) k Gr *élaion* "oleo" (vd. tiun) kun aldono de la kemia sufikso *-in* (vd. ps-sf *-in* 2).

VE (f; RE): L *vae*; A *woe*, G *wehe*, I *guai*, R *uvy*. Kp Nd *wee* [ve:], Sv *ve*. Ŝajnas bazita sur L (kun ties postklasika prononco [ve]); tiu formo estas apogata de G ([vé-]). ¶ IoIe =, Ia *guai*.

Ĝerm. k latin(id)a interjekcio (por la korespondo I *gu* : ĝerm. *v*, kp *gardi*) kun respondaj ekvivalentoj en pluraj lingvoj, kp Gt *wai*, Ir *fae*, Gr *ouaí*, Sa *uvé* – parte novformitaj, parte el HE **ŭai*.

VEGET/I (f; RE): A *veget/ate*, G *-ieren*, I *-are*, (H *-ar*), F *végéter*, Po *wegetowac´*. ¶ Io *vejet-(ad)ar*, IeIa *vegetar*.

El L *vegetare* "vigligi" (en L tardepoka "vivi, kreski, vegeti"), der. de *vegetus* "moviĝema, vigla, sana", kp *vegere* "esti vigla", samradika kun *vigil* "maldorma" (vd. *vigla*). Samfamiliaj: *vegetalo, vegetara*.

VEGETAL/O (8; Wü, PV; ne ĉe Z; antaŭe *veget/aĵ/o* Be): F *végétal*, I *veget/ale*, (HP *-al*). Ps-sf *-al*. ¶ Io *vejet-anto*, Ia **ve-*

getal Ruhrig.

El L mez. *vegetalis* "kreskaĵa" (kp L sc. *regnum vegetale* [Lineo] "-a regno"), adj. responda al la verbo *vegetare* "vegeti" (vd. tiun).

VEGETAR/A (2; Jü; kp *vegetarismo* Eisto 12/1894): A *vegetar/ian,* G *-isch,* I(H) *-iano,* R *-ianskij,* F *végétarien,* Po *vegetarian'ski.* Kp F *végétarisme,* I *vegetarismo* "-ismo". Verŝajne retrograde formita el *-ano (*notu Wü *vegetar/o = -an/o)* kaj *-ismo.* Ps-sf *-ar(i).*¶ Io *vejetara,* IeIa *vegetarian.*

La vorto *vegetarian* estis formata en A (ĉ. 1850) per sufiksŝanĝo kaj -aldono el A *vegetable* "legomo" (el L *vegetabilis,* adj. de *vegetare,* vd. *vegeti*).

VEJN/O (f; RE): A *vein* [vein], F *-e* [ven], I(H) *-a,* G *Vene;* L *vena.* Radikformo laŭ AF kun unika traktado de la diftongo: por A *ei* [ei] mankas aliaj atestoj (A *ai* [ei] fariĝas *aj* aŭ *e*); F *ei* [e] fariĝas *e* (vd. Cherpillod 1990, 16, 24). La konkludo estas, ke *vejn-* baziĝas sur A ortografio kun konsonantigo de *i* por krei Ean diftongon. – La formo *ven-,* prezentatan de LGI, estis kompreneble netaŭga pro *ven/i.* ¶ 1894 *vein-.* ¶ Io *veino,* Ie *ven,* Ia *-a.*

Necerta etimologio.

VEK/I (f; Un): A *wake* [ŭeik], G *wecken* [vék-]. Kp Nd *wekken,* Sv *väcka* [vék-]. Bazita sur G kun apogo de A. ¶ 1894 *evel-* (< F *éveiller*). ¶ Io *vekar,* Ie *avigilar* (kaŭzativo de *vigil* "maldorma"), Ia *eveliar.*

Ĝerm. vorto, kp ank. Gt *us-wakjan* s.s., orig. kaŭzativo de pĜ **wakan* "maldormi" (= Gt *wakan,* G *wachen* [ank. "gardi", vd. s.t.v.]) de HE bazo **ŭeg-* "vigla", kp L *vigil* "maldorma" (kp *vigla*), *vegere* "esti vigla" (kp *vegeti*), Sa *vâjáyati* "instigas". Samfamilia: *bivako.*

VEKT/O (f; RE): L *vectis* "levilo". Vd. Waringhien LV 81: "anstataŭ la senco de 'levilo', Zamenhof donis al ĝi la du sencojn de R *koromïslo,* t.e. 'transversa trabo de la akvoportisto kaj de la pesilo'." Waringhien komparas *vinkt/o,* kiu montras same arbitran sencoŝanĝon de L vorto. ¶ Io *vekto* (espismo); Ie *brasse* ("pesila vekto"); kp cetere *jugo.*

L *vectis* orig. "levo, ekmovo", agsubstantivo de L *vehere* "levi, movi, transporti", forme identa kun G *Ge-wicht* "pezilo", de HE rad. **ŭegh-* "transporti" (vd. *vagono*).

VEL/O (f; RE): L *velum;* F *voile* [vŭal], I(H) *vela.* Bazita sur L kun apogo de I. Ĝemela vorto estas *vual/o,* vd. tiun kaj Wiener 1950, 100. ¶ Io *seglo,* Ie *segle* (< G *Segel,* A *sail*); Ia *vela.* L *velum* signifas "vel/o, -tuko"; oni rilatigas ĝin jen al L *vehere* "transporti" (> "-ilo" > "velo"), jen al (H)E **ŭeg-* "teksi" ("teksaĵo" > "tuko"; kp ev. *vakso*). – Etimologie identa estas *vualo,* samfamiliaj ank. *revelacio, riveli.*

VELEN/O (f; RE): A *vellum,* F *vélin* [-ê], G *Velin,* I *velino,* Po *welin.* R *velen'.* Al **velin-* de la fontlingva plimulto Z preferis *velen-* laŭ R kun apogo de la F prononco, sendube por eviti sufiksidentan radikfinon (vd. sub *abomeni*). ¶ 1894 *velin-.* ¶ Io *velin/o,* Ie *-e;* ne trovita en Ia.

Propr. "bovida (felo/papero)", adj. der. de F ant. *veel* "bovido" (F mod. *veau*) el L *vit/ellus, -ulus* s.s., propr. "unujara (ido)" (vd. plue *veterano*).

VELK/I (f; Un): G *welken.* Kp Ji *velkn,* Nd *verwelken.* Bazita sur G kun eventuala inspiro de Ji. Laŭ Collinson 1959, 10 akceptita 'pro malsimilaj inter si romanaj formoj'. ¶ 1894 *fletr-* (kp F *se flétrir*). ¶ Io *velkar,* Ie *fenar* (kp F *se faner*), *marc/ir* (< L *-ere* "esti velkinta"); Ia *marcesc/er* (< L *-ere*).

Der. de G adj. *welk* "-inta", samfamilia kun *Wolke* "nubo" k par. al R *vlaĵnyj* "malsek(et)a" (la rimarkinda semantika evoluo "malseka" > "sensuka" restas neeksplikita). – Kp ev. *algo.*

VELOCIPED/O (1; LInt 2/1896, Jü): A *velociped,* I *-e,* F *vélocipède,* G *Veloziped* [-ts-], Po *welocyped,* R *velosiped,* (H *velocípedo*). Grandparte arkaikiĝis en la fontlingvoj same kiel en Eo (kp la kvazaŭsinonimon *biciklo* kaj *cikl/isto, -ismo* LInt

1/1896); restas tamen la elemento *velo-* en F *vélo* "biciklo" kaj A *velodrom/e,* I *-o,* F *vélodrome,* (H *velódromo*) "konkursejo por biciklantoj". ¶ Io =, Iela *velocipede* (Ie ank. *velo*).

Orig. pri prototipo de biciklo inventita komence de la 19a jc; farita el L *vel/ox -ocis* "rapida" (kp A *veloc/ity,* I *-ità,* H *-idad,* F *vélocité* "rapideco"), samradika kun L *vegere* "esti vigla" (vd. *vegeti*), k *pes* (gen.: *pedis*) "piedo" (vd. tiun), evidente por esprimi "rapida veturilo movata per piedoj".

VELUR/O (f; RE): A *velvet,* F *velours* [velúr], I *velluto,* Po *welur,* (H *veludo*). Bazita sur F prononco kun grava apogo de Po: la bazo *vel-* retroviĝas ankaŭ en la aliaj fontlingvoj. ¶ 1881 *viur-* (sama etimo). ¶ Io =, Ie *velur,* Ia *villuto.*

F vorto, aliigo de F ant. *velous,* pere de Oc ant. *velos* s.s. el L *villosus* "vila", vd. tiun. (La AHI formoj el L mez. *villutus,* alia der. de la sama bazo.)

VEN/I (f; Un): L *venire*; F(H) *ven/ir,* I *-ire.* Kelkaj kunmetaĵoj estas internacie konataj, ekz. A *convene* "kunveni", A *inter/vene,* G *-venieren,* Po *-weniowac'* "interveni". R *intervencija* "interveno". ¶ 1881 *vion-* (sama etimo; kp F *vient* "venas": PVZ 5, 149). ¶ Io *ven/ar,* Iela *-ir.*

De HE rad. **gŭem-* "veni, iri", kp Sa *gámati* "iras", Gr *baínein* "iri" (kp *akrobato, bazo*), A *come*/G *kommen* "veni". Samfamiliaj: *advento, aventuro, evento, konveni, subvencio, sveni.*

VEND/I (f; Un): L *vendere*; F *vend/re,* I *-ere,* (H *-er*). Kp A *vendor* "-anto", *vend* (jur.) "vendi, elmeti por vendo". Latin(id)a vorto kun identa radikformo en ĉiuj latindependaj fontlingvoj. ¶ Io *vend/ar,* Ie *-ir,* Ia *-er.*

Kuntiriĝo de la L esprimo *venum dare* "doni por vendo": *venum* (< **vesn-*) "vendo", par. al Gr *ônê´* (< **wosnâ*) "aĉeto", Sa *vasnám* "prezo, valoro" (HE bazo **ŭosno-*).

VENDRED/O (f; Un): F *vendredi,* I *venerdì,* (H *viernes*); L *Veneris dies.* Bazita, kiel la ceteraj nomoj de semajnaj tagoj (krom *sabato*), sur F. ¶ Iela *venerdi,* Io *-o.*

Propr. "tago de Venuso/Venero" (la *-d-* en F estas parazita): L *dies* "tago" (vd. *hodiaŭ*), *Veneris* gen. de *Venus* "(diino) Venuso", identa kun la subst. *venus* "amo, gracio, allogeco", par. al Sa *vánas-* "sopiro", *vâ´n´chati* "deziras", G *wünschen* "deziri" (HE rad. **ŭen-* " deziri"). Samfamilia: *veneno.*

VENEN/O (f; Un): L *venenum*; A *venom,* I *veleno,* (H *veneno*). Kp F *vénéneux* "-a". Bazita sur L. ¶ Iola =, Ie *venen.*

L *venenum* ank. "sorĉa (magia) trinkaĵo", orig. "enamiga trinkaĵo", der. de *venus* "amo" (vd. *vendredo*).

VENEZUEL/O (8; Wü)AFGI(H) *Venezuela,* Po *Wenezuela,* R *Venesuela.* ¶ IoIe-Ia *Venezuela.*

Propr. "eta Venecio", dim. de H *Venecia*/I *Venezia* "Venecio", "nomo donita de Amerigo Vespucci..., kiu, vidante surfostajn domojn en la lago Marakaibo, memoris la urbon Venecio" (Albault 1991b, 92).

VENĜ/I (f; Un): A *avenge, revenge* [-ĝ] (kp *vengeance* [-ĝ-] "-o"), F *venger* [-ĵ-], I *vendicare,* (H *vengar*). Bazita sur (senprefiksigita formo de) A kaj F. Pri A *g* [ĝ]/F *g* [ĵ] > Eo *ĝ,* vd. *aĝo.* ¶ 1894 *veng-.* ¶ IoIe *venjar,* Ia *vengiar, vindicar* (vd. sube).

El L *vindicare* (jura termino) "puni, venĝi; liberigi, protekti; laŭleĝe pretendi /aserti [ion]", der. de la personsubst. *vin/dex -dicis* kun respondaj sencoj ("venĝanto, liberiganto ktp"): la dua elemento estas identa kun la bazo en *dicare* "indiki" (vd. sub *diri*; kp. *indekso*); la unua estas pridisputata.

VENK/I (f; Un vortaro, kp *vink-* Un teksto): A *vanquish* [vä´n-], F *vaincre* [vêkr], I *vincere,* (H *vencer*); L *vincere* (sup.rad.: *vict-*). Eo *-e-* ŝajnas inspirita de la F prononco (kp F *peindre* [pêdr] > Eo *pentr/i*); ĉu Z timis konfuzon kun *konvink-*? ¶ Io *vinkar,* Ie *victer,* Ia *vincer.*

Latin(id)a vorto kun bazo *vic-* (la *n* estas

infikso), par. al G *weigern* "rifuzi", Ir *fichim* "batalas" (HE rad. **ŭik-*). Samfamilia: *konvinki.*

VENT/O (f; Un): F *vent*, I *-o*, (H *viento*); L *ventus*. Kp A *wind*, G *Wind* [-t] s.s. Bazita sur la komune romana radikformo kun parta konsonantapogo de la ĝermana. Kp ankaŭ la internacie disvastigitan L radikformon en la vortoj cititaj sub *ventoli.* ¶ IoIa =, Ie *vente.*

Orig. "blovanta", ptc.prez. (*-nt*!) de HE verbo signifanta "blovi": rad. **ŭe-*, kp Sa *vâti* "blovas", G *wehen* "blovi", R *veter*/Po *wiatr* "vento", (kun proteza *a-*) Gr *aênai* "blovi" (kp *aero*). Samfamilia: *ventoli*; par. estas ank. *vetero.*

VENTOL/I (f; RE): A *ventil/ate*, F *-er*, G *-ieren*, I *-are*, R *-irovat'*, (H *-ar*), Po *wentylowac'.* Vokalŝanĝo, evidente por eviti impreson de kunmetaĵo *vent/il-*; la ŝanĝo *i* > *o* estas unika, kaj oni ne scias, kio inspiris Z apliki ĝin. (Kompreneble *i* > *u* estis netaŭga pro *vent/ul-.*) Teorie estas penseble, ke Z sciis la etimon *ventulus* (vd. sube); tiuokaze la ŝanĝo estus paralela al la aliaj modifoj *ul* > *ol* (vd. sub *artikolo*). ¶ 1894 *ventil-.* ¶ IoIeIa *ventilar.*

El L *ventilare* "ventumi, aerumi", der. de *ventulus* "venteto", dim. de *ventus* "vento" (vd. tiun).

VENTR/O (f; Un): L *vent/er -ris*; FI *ventre*, (H *vientre*). Kp A *ventral* "-a", *ventriloquist* "-oparolisto". Anatomia termino, en kiu la L stemo estas apogata de FI. ¶ Io =, IeIa *ventre.*

Kredeble par. al L *ve(n)sica* "veziko" k al G *Wanst* "ventr/(eg)o, -aĉo); vd. *veziko.*

VER/A (f; Un): L *verus*; F *vrai* (kp *vérité* "-eco"), G *wahr* [va:r], I *vero*, (H *verdadero* de *verdad* "-eco"). Kp A *ver/acious* "-ema", *-ity* "-o". ¶ Io =, IeIa *ver.*

Latin(id)a vorto, prapar. al la G formo; kp R *verno* "certe, ĝuste, vere", Ir *fír* "vera" (HE bazo *ŭero-*). Samfamilia: *verdikto.*

VERAND/O (1; N-ro 14 1888, Jü): A *verand/a(h)*, IR *-a*, F *véranda*, G *Veranda*, Po *weranda.*

A vorto, el Hi *varandâ* "altano", siavice el P *varanda* "verando, balkono" (kun necerta etimologio). – Cherpillod 1992, 113.

VERB/O (f; Du, RE): A *verb*, F *-e*, I(H) *-o*, G *Verb(um)*; L *verbum.*

L *verbum* signifis orig. "vorto" ĝenerale (por "verbo" estis ankaŭ uzata la nekonfuzebla esprimo *verbum temporale* "tempa vorto") k estas etimologie identa kun *vorto*, vd. tiun. Samfamiliaj: *ad-*, *pro/verbo*, *vervo.*

VERBEN/O (1; Jü): L *verbena*; A *vervain*, F *verveine*, IR(H) *verbena*, Po *werbena*. Bazita sur L kiel botanika termino. ¶ Io =, IeIa* *verbena.*

L *verbena(e)* signifis orig. sanktan herbon, per kiu oni tuŝis (batis) interkonsentitan traktaton , poste ĉiajn sanktajn herbojn uzatajn ĉe oferado, precipe la verbenon. Ĝi estas adj. der. de *verbera* (plur.) "vip/o, -vergo, -obatoj", par. al Li *virbas* "vergo", kp ank. Gr *rhábdos* (<**wr-*) "vergo".

VERD/A (f; Un): F *vert*, I(H) *verde*; L *viridis*. Kp A *verdure* "-aĵo". Bazita sur I kun parta apogo de F kaj L. ¶ 1881 *verd-.* ¶ Io =, Ie *verd/i*, Ia *-e.*

Latin/id)a vorto, orig. signifanta la verdaĵon de vegetaĵoj, der. de *virere* "esti verda/forta" (kun necerta etimologio). Samfamilia: *verdigro.*

VERDIGR/O (f; RE): A *verdigris*, F *vert-de-gris*, I *verderame*, (H *verde gris*). A ŝajnas esti la deirpunkto por la Ea formo; la A esprimo ankaŭ estas unuvorta, dum F prezentas lozan kunmetaĵon. La lasta silabo estas apokopita, evidente por eviti impreson de kunmetaĵo de *verda* kaj *griza.* ¶ IeIa* *verdigris*, Io *-o.*

Aliigo (laŭ F *gris* "griza") de F ant. *vert-de-Grice*, laŭvorte "verdaĵo de Greklando" (la kialo de tiu termino estas nekonata). Vd. *verda* resp. *greko.* (La I vorto signifas "verda kupro".)

VERDIKT/O (1; Jü): AF *ver/dict*, I *-detto*, (H *-edicto*), Po *werdykt*, R *verdikt*. Bazita sur AF. ¶ Io =, Ie *verdict/e*, Ia *-o.*

El L mez. *veredictum,* propr. "verajo eldirita": *vere* "vere" (vd. *vera*); *dictum* "dirit(aĵ)o", ptc.perf. de *dicere* "diri" (vd. tiun). Kp spec. *edikto.*

VERG/O (f; RE): F *verg/e,* I *-a;* L *virga.* Formo laŭ FI; *virg-* estis okupita per alia signifo. ¶ Io =, Ie *verge,* Ia *virga.*

Kredeble el **vizga,* par. al A *whisk* "kirlilo" (vd. sub *viŝi*).

VERK/O (f; Un): A *work,* G *Werk.* Kp Nd *werk,* Sv *verk.* Bazita sur G kun ioma apogo de A. Tamen la ĝermana vorto havas multe pli vastan sencon: "labor(aĵ)o, faritaĵo" ĝenerale. La sencospecialigo estas farita de Z, eble ĉefe por havi apartan titolon *verk/ist/o,* distingitan de *skrib/ist/o* (pli malaltrangan) kaj *aŭtor/o* (pli ĝeneralan). ¶ 1894 *kompon-.* ¶ Io = (espismo); Ie *ovre* (ank. "laboro"; < F *œuvre*), Ia *obra* (ank. "laborado"; < H *obra*).

Ĝerm. vorto: pĜ **werka-,* identa kun Gr *érgon* (< **werg-*) "laboro" (kp *energio, organo*); HE **ŭergon.*

VERM/O (f; Un): L *vermis;* A *worm,* F *ver* (k *vermifuge* "-oforigilo"), G *Wurm,* I(H) *verme.* La L zoologia termino estas apogata káj de latinidaj formoj káj de ĝermanaj (la lastaj rilate la konsonantismon). ¶ Io =, IeIa *verme.*

La latin(id)a vorto estas prapar. al la ĝerm. formoj; kp Gt *waúrms* "vermo, serpento", Li *varmas* "kulo", bazitaj sur plivastigo de HE rad. **ŭer-* "tordi, turn(iĝ)i" ("ĉar vermo turniĝas sur tero", Yamasaki Supl., 5-a eld., 18); kp alian plivastigon sub *verso.* – Samfamilia: *vermiĉelo;* kp ank. *vermuto.*

VERMIĈEL/O (f; RE): AI *vermicell/i* [A -s-, I -ĉ-], F *-e* [-s-], Po *wermiszel* [-ŝ-], R *vermiŝel.* Ĉe varia pronoco de la sibla sono ([s, ŝ, ĉ]), Z sekvis la I originvorton. ¶ 1894 *vermicel-.* ¶ Io =, IeIa *vermicelli.*

Propr. "vermeto" (pro la formo), dim. de I *verme* "vermo" (vd. tiun).

VERMUT/O (2; Jü): A *vermouth,* F *vermout(h)* [-u-], G *Wermut,* IR(H) *vermut,* Po *wermut.* ¶ Io =, Ia *vermut,* Ie *-e.*

Orig. ĝerm. nomo de la absintplanto (kp A *wormwood* "absinto") de nekonata origino; la simileco al la vortoj por "vermo" dependas de la uzado de la planto kiel vermoforigilo.

VERS/O (f; RE): F *vers,* A *-e,* I(H) *-o,* G *Vers,* Po *wiersz;* L *versus.* Kp *verŝi* pri radikkolizio. ¶ IoIa =, Ie *verse.*

Propr. "turniĝo" (t.e. 'liniŝanĝo'; kp semantike *strofo*), subst. de L *vertere* (sup.rad.: *vers-*) "turni" de HE **ŭert-* s.s., kp Sa *vártate* "turniĝas", G *werden* "iĝi" (kp semantike A *turn* "iĝi"), R *vertet'* "turni" (vd. *versto*), Li *versti* "turni"; orig. plivastigo de rad. **ŭer-* "tordi, turni" (kp sub *vermo*). – Samfamiliaj vortoj en Eo: *averti, diversa, inversa, konversacio, konverti, prozo, renversi, univers/o, -ala, verŝi* (etimologie identa), *verto, vertebro, vertico, vertikala.*

VERST/O (f; N-ro 14 1888, RE): R *versta;* A *verst,* F *-e,* I(H) *--a,* G *Werst,* Po *wiorsta.* ¶ Mankas en Io; IeIa *versta.*

Pli frue "linio", orig. "turno", subst. de R *vertet'* "turni" (vd. sub *verso*).

VERŜ/I (f; Un): F *vers/er,* I *-are,* (H *verter*). Bazita sur FI. Cirkumfleksigo de *s* por eviti kolizion kun *vers/o* (Waringhien LV 77; vd. sinoptikon en Szderdahelyi 1987, 127), kp *piŝt-, veŝt-.* ¶ 1881 *vers´.* – 1894 *fud-* (< L *fudi,* perf. de *fundere* "verŝi": PVZ 5, 149). ¶ Io *varsar* (kun vokalŝanĝo *e* > *a*), Ie *versar;* Ia *effund/er* (< L *-ere*).

Propr. "klinigi [pokalon] (por verŝi)", el L *versare* "ruli, turni (tien k alien)", intensa verbo de *vertere* (sup.rad.: *vers-*) "turni" (vd. *verso*).

VERT/O (f; RE): L *vert/ex -icis;* (H *vértice*). Anatomia termino prenita el L. Apokopo antaŭ la sufikseca vortfino, kp. *atripl/o, cim/o, kul/o, pul/o.* Ĝemela vorto: *vertic/o.* ¶ 1894 *vertik-.* ¶ Io *vertic/o,* IeIa *-e.*

Propr. "(harar)turniĝo" (kp la alternativan formon L *vort/ex -icis* "akvo-, vento/turniĝo" > eo *vortic/o* PV), subst. de *vertere*

"turni" (vd. sub *verso*). Etimologie identa estas *vertico,* samfamilia ank. *vertikala.*

VERTEBR/O (f; RE): L *vertebra;* AI *vertebra,* F *vertèbre,* (H *vértebra*).

L anatomia termino transprenita de la latindependaj lingvoj. Propr. "turnilo" ('pivoto'), der. de L *vertere* "turni" (vd. sub *verso*).

VERTIC/O (8; Jü; kp *vertik/o* Ve): A *vertex* (plur. *vertices*), I *vertice,* (H *vértice*). Ĝemelo de *vert/o.* Tiu ĉi traktado de L *-ex/-icis* (vd. sube) estas unika (vd. Wüster Esp.princ. 57 s.: normale *-ik*); analoga estas *helic/o,* sed apud ĝi troviĝas ankaŭ *helik/o.*

El L *vert/ex -icis* "verto", ank. "supro, altaĵo, pinto" (vd. *verto*).

VERTIKAL/A (f; RE): AF(H) *vertic/al,* I *-ale,* R *vertikal'nyj.* Ps-sf *-al.*

El L postkl. *verticalis* s.s., adj. de *vert/ex -icis* "verto, supro, pinto" (do proksimume "subeniranta de la verto, dependa de stara pozicio"). Vd. *verto.*

VERUK/O (f:RE): L *verruca;* F *verrue* (kp *verruqueux* [-k-] "-a"), I *verruca,* (H *verruga*). Bazita sur L (medicina termino) kun apogo de I. Kp ank. A *wart,* G *Warze* s.s., kiuj parte apogas la konsonantismon. ¶ Io =, Ie *veruca,* Ia *verruca.*

L vorto (sufikso kiel en *kaduka, laktuko*) kun orig. signifo "altaĵ(et)o", kp Sa *várŝman-* "altaĵo, supro, pinto", Li *virŝùs* "supro, pinto" (HE **ŭers-;* la ĝerm. vormoj supre el paralela **ŭerd-*).

VERV/O (3; Jü): AF *verve,* G *Verve.* ¶ Io =, IeIa *verve.*

F vorto, orig. "inspira parolado" (kp la difinon en PIV), el L vulg. **verva,* responda al L *verba,* plur. de *verbum* "vorto" (vd, *verbo*).

VESP/O (f; RE): L *vespa;* A *wasp,* F *guêpe,* G *Wespe,* I *vespa,* (H *avispa*). Prenita el L (zoologia termino), kies esperantigita radikformo estas apogata de I (plene), G (plene, laŭ prononco) kaj A (radikfino). Gregor (1982, 28) donas LG kiel fontlingvojn. ¶ Io =, Ie *vesp/e,* Ia *-a.*

Komuna latin(id)a k ĝermana vorto (pĜ **wabis-,* kp ank. Da *hveps*) el HE bazo **ŭobhsa,* kp ank. Li *vapsà,* RPo *osa* s.s.: rad. **ŭebh-* "teksi" (la insekto estis nomata laŭ la teksaĵsimila nesto), kp A *weave,* G *weben,* Gr *hyph-aínein* "teksi". Kp *vaflo.*

VESPER/O (f; Un): L *vesper/ vespera.* Kp F *vespéral* "-a", I(H) *vespertino* "-a"; I *vespero* (poet.) "-o", (H *víspera* "antaŭvespero"). Kp ankaŭ la nomon de vespera diservo: A *vespers,* F *vêpres,* G *Vesper,* I *vespro* (> eo *vespro[j]* PV). ¶ 1881 *ser-* (< I *sera,* F *soir*). – 1894 *vespr-.* ¶ Io =, Ie *véspere,* Ia *vesper/a, -e.*

L *vesper* estas identa kun Gr *hésperos,* Ir *fescor* s.s. (HE **ŭespero-s*); kp R *veĉer,* Po *wieczor,* Li *vâkaras* s.s. (HE **ŭekero-s*). Samfamilia: *vesperto.*

VESPERT/O (f; RE): L *vespertil/io -ionis.* Zoologia termino bazita sur L . Apokopo post la unua distinga konsonanto laŭ la principo de sufiĉo (kp la mallongigojn en *framb/o, kukurb/o, leontod/o, turt/o* kaj Waringhien LV 76); kontribuis la strebado eviti sufiksidentajn radikfinojn (vd. Wüster Esp. princ. 53). ¶ 1894 *vespertil-.* ¶ Io *vespertil/io,* Ia *-ion;* Ie *mus-volant* ('fluganta muso').

La L vorto (> I *pipistrello* s.s.) estas ligita kun *vesper* " vespero" (eble pere de adj. *vespertilis* "vespera"). Nomo laŭ la noktaj kutimoj de la besto.

VEST/I (f; Un): L *vestire;* F *vêtir,* I *vest/ire,* (H *-ir*). ¶ Io *vest(iz)ar,* IeIa *vestir.* Kp L subst. *vestis* "-aĵo".

De HE rad. **ŭes-* "vesti", kp Sa *váste* "vestas sin", Gr *esthê´s (< *wes-)* "-aĵo", Gt *wasti* "-aĵo", A *wear* "porti [veston]". Ĝemela vorto: *veŝto.*

VESTIBL/O (f; RE): AF *vestib/ule,* I *-olo,* G *Vestibül,* (H *vestíbulo*); L *vestibulum.* La redono de L *-ul-* per *-l* (vd. sub *artikolo;* kp F ant. *vestible*) konservas la akcenton de LI kaj evitas sufiksidentan radikfinon. ¶ Ie *vestibul,* IoIa *-o.*

L *vestibulum* enhavas kredeble *stabulum* "starejo" (vd. *stalo*); la unua elemento es-

tas pridisputata.

VEŜT/O (f; RE): A *vest* (Us, kom.), G *Weste*. Kp Nd *vest*, Sv *väst* [vest]. Mnemonike apogas A *waistcoat* [ŭes-] "veŝto". Bazita sur G. Z cirkumfleksigis *s* por diferencigi la radikon disde *vest-* (Waringhien LV 77; vd. la sinoptikon en Szerdahelyi 1987, 127); kp sub *verŝi*. ¶ 1894 *gilet-* (< F). ¶ Io *jileto*, Ia *gilet*, Ie *-e*.

Ĝerm. vorto de latinida deveno: pere de F *veste* "jako" k I *veste* "vestaĵo" el L *vestis* "vestaĵo" (vd. *vesti*). [A *waistcoat* propr. 'tali-jako'.]

VET/I (f; RE): G *wetten* (ank. prefikse, ekz. *wettlaufen* "vetkuri"). Kp Ji *vetn zikh* (refl.). Bazita ekskluzive sur G, eble pro la facile adoptebla formo kaj la oportuna duobla uzado. ¶ 1894 *pari-* (< F *parier*). ¶ IoIe *pariar*, Ia *facer un sponsion* 'fari veton' (< L *sponsio*); la prefiksa *vet-* estas esprimata per Io *konkurse*, IeIa *in emulation* 'en konkurso' (< A *emulation*, F *ém-*).

Der. de G *Wette* "veto", orig. "garantiaĵo". Ĝerm. vorto, kp ank. Nd *wedden* "veti", Sv *vad* "veto", Gt *wadi* "garantiaĵo" (pĜ **wadhja-*), par. al L *vas* (gen.: *vadis*) "kaŭcio".

VETER/O (f; Un): A *weather* [ŭédh-], G *Wetter*. Kp Nd *weer*, Sv *väder* [vé:der]. Bazita sur AG; la formo kopias G, evidente ĉar la A vorto estas malpli facile adaptebla. La elekto de ĝermana radiko estas facile klarigebla, ĉar la romanaj ekvivalentoj (F *temps*, I *tempo*, [H *tiempo*]) signifas ankaŭ "tempo" kaj estis fakte adoptitaj en tiu senco (vd. Collinson 1959, 7: 'La specifa termino *veter-*...eliminas la ambiguecon de la romanaj vortoj'). ¶ 1894 *tiemp-*. ¶ Io =; Ie *tempe*, Ia *tempore*, **temper/ie* (< L *-ies*).

Ĝerm. vorto (pĜ **wedhra-*), par. al Bg ant. *vetrŭ* "aero", Li *ve´tra* "ŝtormo", der. de HE rad. **ŭe-* "blovi" (vd. *vento*).

VETERAN/O (f; Jü): AR *veter/an*, I(H) *-ano*, F *vétéran*, G *Veteran*, Po *weteran*; L *veteranus* . Ps-sf *-an*.

Der. de L *vet/us -eris* "maljuna, malnova, multjara", orig. "(unu)jara" (pp bestoj), kp Sa *vatsá-* "unujarulo, bovido", Gr *(w)étos* "jaro", G *Widder* "virŝafo" (HE **ŭetos* "jaro"). Samfamiliaj: *veleno*, ev. *veterinaro*.

VETERINAR/O (1; *-a* Be, Ve, *-o* Ka, Wü, PV ktp): A *veterin/arian*, I(H) *-ario*, F *vétérinaire*, G *Veterinär*, L *veterinarius*. Ps-sf *-ar(i)*. ¶ Io =, IeIa *veterinario*.

Der. de L *veterina(e)* (plur.) "ŝarĝobestoj", eble der. de *vet/us -eris* "maljuna" (ĉar la maljunaj bestoj, netaŭgaj por bataloj, estis uzataj en la armea trajno).

VETUR/I (f; Un): F *voiture* [vŭat-], I *vettura* "veturilo". Bazita sur I, pli facile asimilebla ol la F formo. El tiu substantivo Z faris verban radikon (sekvante sian principon, ke la instrumento estu esprimata per *-il*). Ps-sf *-ur*. ¶ Io *vehar* (< L *vehi*; kp Io *veturo* "-ilo"); Ie *vehicular* (de *vehicul* "veturilo"); Ia *ir in vehiculo* 'iri en veturilo'.

El L *vectura* "transporto", subst. de *vehere* "transporti" (vd. *vagono*).

VEZIK/O (f; RE): L *vesica*; F *vessie* (kp *vésicule* "-eto"), I *vescica*, (H *vejiga*). Kp A *vesicant* "-iga". Bazita sur L (anatomia termino); Eo *-z-*, ne apogata de la fontlingvoj, dependas nur de la tendenco voĉigi intervokalan *s*. ¶ 1894 *vesik-*. ¶ Io =, Ie *véssic*, Ia *vesica*.

L *vesica* (kun alternativa formo *vensica*) estas kreeble par. al Sa *vastí-* s.s.; kp ank. *ventro*.

VEZIR/O (f; RE; kp *vecir-* N-ro 15 1888): A *vizier* [-z-], F(H) *vizir* [F -z-], G *Wesir* [-z-], I *visir* [-z-], Po *wezyr*, R *vizir'*. Eo *-z-* havas neordinare grandan apogon ortografie kaj prononce [AFGIPo(R)]. Radikkomenco *ve-* videble laŭ GPo, eble por pli klare diferencigi la radikon disde *vizier-*. ¶ 1894 *visir-*. ¶ Io *viziro*, IeIa *vesir*.

Pere de Tu *vezir* s.s. el Ar *wazîr* "ministro" de *wazara* "preni sur sin, porti". – Cherpillod 1992, 113.

VI (f; Un): Konsistas el *-i*, komuna finelemento de ĉiuj personaj pronomoj

(vd. *mi*) kaj *v-*, prenita el la duapersona plurala pronomo de kelkaj fontlingvoj: F *vous,* I *voi* (obj.: *vi* ”al vi; vin”), (H *vos-* [*otros*]); L *vos*; Po *wy* [vi], R *vy*. Tiu konsonanto do estas sugestata de latin(id)aj kaj slavaj lingvoj komune; la rezulta Ea formo identas prononce kun Po (proksimume ankaŭ kun R) kaj skribe-prononce kun la I objekta formo. – Laŭ modelo de FR (kaj A *you*) Z utiligis tiun pronomon ankaŭ kiel (ĝentilan) formon por la dua persono singulara. ¶ 1882 *vo* (plur.). – 1894 (PVZ 3, 175) *vos* (plur.; kp *vu* kun pos. *vue* en la propono PVZ 3, 139). ¶ Io *vi* (plur.), *vu* (sing.); Ie *vu* (plur. kaj sing.; obj. formo: *vos*); Ia *vos* (plur. kaj sing.).

El HE **ŭes/ŭos* ”vi” (plur.), kp Sa *vah* ”vi”, L *vester* ”via”. – F *vous* [vu] enestas en Eo *rendevuo.*

VIADUKT/O (2; Jü): A *via/duct,* F *-duc,* I *-dotto,* R *-duk,* (H *-ducto*), G *Viadukt,* Po *wiadukt.* Eo *-dukt* laŭ AGR kaj la L modelvorto (vd. sube). ¶ Io =, Ie *viaduct/e,* Ia *-o.*

Farita (en A, 19-a jc), laŭ modelo de L *aquaeductus* ”akvedukto”, el L *via* ”vojo” (vd. tiun) k *ductus* ”konduko” (vd. *konduki*).

VIAND/O (f; Un): F *viande.* Kp P *vianda.* Bazita ekskluzive sur F. Tiu ĉi radiko signifis dekomence káj ’karno kiel nutraĵo’ káj ’karno ĝenerale’ (la lasta senco ekz. en Du [PVZ 1, 72]). En 1894 Z proponis *karn-* anstataŭ *viand-* (evidente en ambaŭ sencoj). Kp *karno.* ¶ Io *karno,* IeIa *carne* (ĉiuj en ambaŭ sencoj).

F *viande* orig. ”nutraĵo” (kp A *viands* ”nutraĵoj”, H *vianda* ”nutraĵo, manĝaĵo”) el L vulg. **vivanda* < *vivenda,* gerundivo de L *vivere* ”vivi” (do proksimume ”necesa por la vivado”, kp semantike G *Lebensmittel* ”nutraĵoj”, propr. ”vivrimedoj”), vd. tiun.

VIBR/I (1; Jü): A *vibr/ate,* F *-er,* G *-ieren,* I *-are,* (H *-ar*), Po *wibrować*; L *vibrare.*

Latin(id)a vorto par. al G *wippen* ”balanciĝi”, Li *wyburti* ”svingi”, Sa *vépate* ”tremas” (HE rad. **ŭeib-/ŭeip-*). Kp la parencan *vipo.*

VIBURN/O (f; RE): L *viburnum*; A *viburn/um,* I(H) *-o,* F *viorne.* Botanika termino prenita el L. ¶ IoIa =, Ie *viburne.*

Nekonata etimologio.

VIC/O (f; RE): L *vicis* (gen.; nom. mankas; plur.: *vices*) ”ŝanĝo, alterno; sinsekvo, sorto; [ies] loko, pozicio”. Kvankam la forma etimo estas tute klara, la semantika utiligo de ĝi estas parte arbitra. (1) Internacia fariĝis la L ablativo en la esprimo *vice alicuius* ”en ies loko (funkcio), alterne kun iu” > Eo *vic-,* kp AFIR(H) *vice-,* G *Vize* [-ts-], Po *wice-.* (2) La L baza signifo ”ŝanĝo, alterno” evoluis al ”ŝanĝo de la sorto, sinsekvaj okazaĵoj” (tiu estas la signifo de AF *vicissitude;* kp I *le vicende della fortuna* ”la ŝanĝoj de la sorto”). Tiu nocio de ”sinsekvo” Z vastigis al ”sinsekvo/serio da personoj aŭ objektoj, aranĝitaj en linio” (ne en la fontlingvoj). (3) Eble la L esprimoj *in vicem* ”laŭorde, laŭvice”, *suam vicem* ”siavice” estis la deirpunkto por la Ea senco troviĝanta en frazoj kiel ”atendi sian vicon; estas mia vico”. ¶ (1) IoIeIa *vice-.* (2) Io *rango* (< F *rang*), *serio*; Ie *range, file* (< F *fil,* I *-a*), *serie*; Ia *rango, fila, serie.* (3) ”estas mia vico”: Io *esas mea foyo,* Ia *es mi torno*; Ie?

L *vic-* (> H *vez,* F *fois* ”fojo”) estas par. al G *wechseln* ”alterni, ŝanĝ(iĝ)i”, Gt *wikô* ”ordo”, Gr *eíkein* ”cedi” (HE rad. **ŭei-*). Etimologie identa estas *fojo.* Samfamilia: *vikario.*

VID/I (f; Un): L *videre*; F *voir,* I *vedere,* (H *ver*); Po *widzieć*, R *videt'.* Kp AF(H) *vis/ible,* I *-ibile* ”-ebla”. La L radikformo estas apogata de la slavaj lingvoj. ¶ 1881 *vid-;* kp ank. *vitt-* (PVZ 5, 150), *vit-* (LZ I, 352) ”rigardi”. ¶ Io *vid/ar,* IeIa *-er.*

L *videre* (sup.rad.: *vis-*) samkiel la cititaj slavaj vortoj de HE rad. **ŭid-* ”vidi”, kp Gr *ideín* (< *wid-*) ”vidi” (kp *ideo, idilio*), *eídos* ”aspekto, formo” (kp *jodo*), Sa *véda* ”mi scias” (kp semantike A *I see* ”mi vidas; mi

komprenas"), G *wissen*/Gt *witan* "scii", A *wit* "sprito". Samfamiliaj vortoj en Eo: *avizo, providenco, proviz/i, -ora, vizo, vizaĝo, vizio, viziero, viziti;* ank. *intervjuo, revuo* (pere de A *view,* F *vue* "vidaĵo", subst. de F *voir*).

VIDV/O (f; RE): A *widower,* F *veuf* (kp *veuve* "-ino"), G *Witwer,* I *vedovo,* Po *wdowiec,* R *vdovec,* (H *viudo*); L *viduus* [-dŭus]. Bazita sur L; la traktado de *-du-* povas esti komparata kun tiu de *-gu-* en *lingua* > Eo *lingvo,* vd. tiun. La unuopaj sonoj trovas apogon en diversaj fontlingvoj (*v-* en AGIPoR, *-i-* en AG, *-d-* en AIPoR); Gregor (1982, 28) donas LAGR Po kiel fontojn.. ¶ Io *vidv-ulo,* IeIa *viduo.*

Komuna eŭropa vorto, plej ofte formita retrograde el la responda virina formo (A *widow,* F *veuve,* G *Witwe,* H *viuda,* I *vedova,* R *vdova;* L *vidua*) el HE **ŭidheŭa* "-ino", kp Sa *vidhava* s.s. (orig. signifo "apartigita [de sia edzo]", vd. *dividi*).

VIGL/A (f; RE): L *vigil* "maldorma, atenta, gardema"; I *vigile* "atenta"; AF *vigilant,* I(H) *-e* "vigle atenta, observema". Z modifis la semantikan sferon de la fontvortoj en la direkto de G *munter* ('gaja, plena de viveco') kaj R *bodryj* ('freŝa'). – Forme estas notinda la ellaso de *-i-* por mallongigi la radikon (Waringhien LV 76; notu, ke I *sveglio* "vekita, vigla" reprezentas pli mallongan formon de la sama etimo) kaj eviti sufiksidentan radikfinon (Janton 60). Kp spec. *sibl/i* el L *sibilare.* ¶ Io *briska* (< A *brisk*), *vigilema, -anta;* Ie *vigil* "maldorma", *-ant* "gardema", *vivaci* "viveca"; Ia *vigile* "maldorma", *alerte* "gardema" (< F), *vivace* "viveca".

L *vigil* estas samradika kun *vegere* "esti vigla" k par. al G *wecken* "veki" (vd. tiun).

VIKARI/O (f; RE): L ekl. *vicarius;* A *vic/ar,* F *-aire,* I(H) *-ario,* G *Vikar,* Po *wikary,* R *vikarij.* Ps-sf *-ar(i).*

Propr. "anstataŭanto", der. de L *vice* "anstataŭ, alterne kun" (vd. *vico*).

VIKTIM/O (3; Backman 1919, Wü, PV; antaŭe *ofer/aĵ/o*): L *victima;* A *victim,* F *-e,* I *vittima,* (H *víctima*). ¶ Io =, Ie *victim/e,* Ia *-a.*

Orig. "besto oferita, *besto konsekrita", par. al Gt *weihs* "sankta", G *weihen* "konsekri".

VIL/O (f; RE; *-o* Be, Jü, Ka, GD, PIV; *-a* PV): L *villus* (kiel anatomia termino ank. en A); F *villosité,* I *villosità* (*villo* anat.). Kp la adj. A *villous,* , F *velu,* I *velloso,* (H *velludo*); L *villosus.* Teorie, la radiko povas esti bazita rekte sur la L substantivo aŭ formita per sensufiksigo de la LAI adjektivo; la unua ŝajnas pli verŝajna pro la substantiva prezento de la radiko en UV. ¶ Io =, Ie *velle,* Ia *villo.*

Paralela formo de L *vellus* "lanfelo"; vd. *lano.* Samfamilia: *veluro.*

VILAĜ/O (f; Un): AF *vill/age* [A -ĝ, F -ĵ], I *-aggio* [-áĝo]. Kp P *villagem.* Ps-sf *-aĝ.* ¶ Io *vilajo,* IeIa *village.*

Der. de F *ville* (en F mod. "urbo", antaŭe "periferia urba kvartalo" < "vilaĝo"; *village* estis formata kiam *ville* ŝanĝis signifon), el L *villa* "kampodomo" (> AFIR *villa,* G *Villa,* Po *willa* > eo *vill/o* Jü 1, *vila/o* Wü, PV), der. de *vicus* "(loĝ)domaro, vilaĝo", identa kun Gr *(w)oíkos* "domo" (kp *ekonomio*), Sa *véca-* "domo", R *ves'* "vilaĝo" (HE **ŭoiko-s*).

VIN/O (f; Un): A *wine,* F *vin,* G *Wein,* IR(H) *vino,* Po *wino;* L *vinum.* Radikformo respegulanta ortografie LFI(R), prononce LIPoR. ¶ IoIa =, Ie *vine.*

Latin(id)a vorto, probable pruntita el la sama (nekonata) fonto (malgrandazia?) kiel Gr *(ŭ)oínos* s.s. k la semidaj nomoj de la vino, ekz. Ar *wain,* He *jajin.* Vd. Carlevaro en PL 14/1985, 10, k Cherpillod 1992, 113. – Samfamiliaj: *vinagro, vinjeto.*

VINAGR/O (f; RE): A *vinegar,* F *vinaigre,* (H *vinagre*). Verŝajne bazita sur F (kiel gastronomia termino?); por F *ai* > Eo *a,* vd. ekzemplojn sub *flari.* Estas ankaŭ eble, ke la egalaĵo F *aigre* = I *agro* ("acida") influis. Kp la sinonimon eo *acet/o*

Wü (kem.) el L *acet/um,* I *-o.*¶ Io =, IeIa *vinagre* (Ie ank. *acet/e,* Ia *-o*).

Propr. "vino acida": F *vin* "vino" (vd. tiun), *aigre* "acida" (el L *acer* "akra, acida", vd. *akra*).

VIND/I (f; RE): A *wind,* G *winden,* (H *vendar*). Ĝermana radiko elektita ĉar la romanaj lingvoj malhavas ekzakte respondan vorton simplan. ¶ 1894 *maliot-* (< F *emmailloter*). ¶ Mankas en la ceteraj L.I.; kp Io *(en)volvar, envelopar* (< F *envelopper*), Ie *involuer, invelopar,* Ia *involver, inveloppar, bandar* (< F *bander*).

Ĝerm. vorto, kp Gt *windan* s.s. (= pĜ), samradika kun G *wenden* "turni", eble par. al L *vimen* "vergo" (vd. sub *viŝi*). (H *vendar* de *venda* "bendo" el G *Binde* "ligaĵo, bendo", vd. *bindi.*)

VINJET/O (1; Jü): AF *vign/ette* [-n'-], I *-etta* [-n'-], G *Vignette* [-n'-], Po *winieta,* R *vin'etka,* (H *viñeta*). Latinida [n'] redonita per *nj* en proksimuma konformeco al la prononco de la fontlingvoj (vd. *kastanjeto*). Ps-sf *-et.* ¶ Io *vinyeto,* Ie *viniette,* Ia *vignette.*

F vorto, unue signifanta ornaman desegnaĵon en formo de vinberbranĉo, der. de *vigne* "vitejo" el L *vinea* s.s., der. de *vinum* "vino" (vd. tiun).

VINK/O (1; Un): L bot. *Vinca* (en L ant. plej ofte *pervinca*); A *periwinkle,* F *pervenche,* I(H) *pervinca,* Po *barwinek,* R *barvinka.* Bazita sur L kiel botanika termino; ties bazo estas trovebla kiel dua elemento en la respondaj vortoj de la modernaj fontlingvoj (malpli oportunaj pro la prefikssimila *per-*). ¶ Io *pervinko,* Ie *pervinca,* Ia **pervinca* Castellina.

Propr. "ĉirkaŭvolviĝanta (planto)", der. de L *pervincire* "ĉirkaŭvolvi", intensa verbo de *vincire* "(ĉirkaŭ)ligi, volvi" (vd. *vinkto*).

VINKT/O (6; *-i* Jü, *-o* Ka, Wü, PVS): Z probable kreis tiun radikon el L *vinctum* "ligita" (vd. Waringhien LV 81), procedo kies sola analogaĵo ŝajnas esti la kazo de *vekto* (vd. tiun). La fontlingvoj malakordas inter si; la F formo, akceptita de la aliaj L.I., estis neoportuna pro sufiksidenta *-et.* ¶ Io *rivet/o,* IeIa *-e* (< F *rivet*).

Ptc.perf. ntr. de L *vincire* "(ĉirkaŭ)ligi, volvi" kun necerta etimologio. Samfamilia: *vinko.*

VINTR/O (f; Un): A *winter,* G *Winter.* Kp Nd *winter,* Sv *vinter.* Bazita sur (A)G. La sinkopo de *e* verŝajne ne por konservi la akcenton (*-í-* en ĉiuj cititaj formoj) sed por eviti konfuzon kun *vin-* kaj *ter-* (kp *somer/o* kaj *veter/o,* devenantajn de analogaj ĝermanaj formoj). Motivon por elekti ĝermanan radikon donas Collinson 1959, 7: 'ĉar L hiems ne transvivis kaj la formoj el hibernus [L adj. "vintra"], nome It. inverno, Sp. [=H] invierno kaj F hiver estas iom heterogenaj'. Certe kontribuis la antonimo *somer/o.* ¶ 1894 *hiver-.* ¶ Io =; Ie *hiverne,* Ia *hiberno.*

Ĝerm. vorto , kp Gt *wintrus* (pĜ **wintru-*), kun necerta etimologio.

VIOL/O (f; RE): L *viola;* A *viol/et,* F *-ette,* I *-(ett)a,* (H *-eta*), G *Veilchen* (*-chen* "-eto"), Po *fiol'ek,* R *fialka* (kp *fioletovyj* "-kolora"). Bazita sur L (botanika termino); la neceso povi formi Ean diminutivon malpermesis akcepton de AF (I) *-et.* ¶ Io =, Ie *viol/ette,* Ia *-(ett)a.*

Latin(id)a vorto (la FHA[I] formoj estas diminutivoj), kredeble pruntita el la sama (mediteranea?) fonto kiel Gr *(ŭ)íon* s.s. Parencaj vortoj en Eo: *jodo, levkojo.*

VIOLON/O (f; Un): A *viol/in,* F *-on,* I *-ino,* (H *-ín*), G *Violine.* F prezentis oportune formon kun *-on,* tiel ke kolizio kun la sufikso *-in* povis esti evitata. Ps-sf *-on.* ¶ IoIa *violin/o,* Ie *-e.*

Dim. de I *viola* (> eo *vjol/o* MT, GD) el Oc ant. *viola* s.s. de necerta origino (ĉiuokaze samorigina kun A *fiddle,* G *Fiedel* "violono"). Samfamilia: *violonĉelo.*

VIOLONĈEL/O (f; RE): AI *violon/cello* [I -ĉ-], F *-celle,* R *-ĉel',* (H *-celo*), G *Violoncell(o)* [-ĉ-], Po *wiolonczela* [-ĉ-]. Verŝajne bazita sur I (muzika termino); la prononco [-ĉ-] estas apogata de GPoR. ¶

1894 *violoncel-*. ¶ Io *violon/celo,* Iela *-cello.*

Dim. de I †*violone* "kontrabaso", kiu siavice estas aŭgmentativo de *viola* "vjolo" (vd. *violono*).

VIP/O (f; RE): A *whip* [ŭip]. Bazita ekskluzive sur A kun normala transskribo: A *wh* [ŭ-] > Eo *v* ankaŭ en *viskio, visto;* evidente la mallonga A vorto ŝajnis al Z oportuna kaj elvokiva. ¶ 1894 *fuet-* (< F *fouet*). ¶ Io *flog-ilo* (< A *flog*); Ie *knut* (< R); Ia *flagello* (< L *flagellum* "skurĝo").

A vorto, par. al la vortoj cititaj sub *vibri.*

VIPUR/O (f; UV 2-5 eld., Fund, Ka, Backman 1919, PV, GD, PIV); paralela formo: **VIPER/O** (RE, EG, UV 1-a eld., Be, Jü, Ve, Wü, GD alt., PIV alt., rekonita kiel paralela formo OA8, p.12): L *vipera;* A *viper,* F *vipère,* G *Viper,* I *vipera,* (H *vibora*). Zoologia termino, verŝajne bazita sur L sed kun unuanima apogo de latinidaj kaj ĝermanaj fontlingvoj. – Objekto de diskutado dum pluraj jardekoj, tiu ĉi duobla radiko metas du problemojn: (a) kiu formo estas uzenda: *vipur-,* kiu estas fundamenta, aŭ *viper-,* kiu estas origina kaj konforma al la fontlingvoj? (b) Kiel estiĝis la formo *vipur-:* ĉu ĝi estas preseraro aŭ intenca modifo? La plej detalan superrigardon de la problemoj prezentis Albault, La fundamenta serpento (ScR vol.18, n-ro 3, 1967, p. 81-88). Vd. ank. Fund., 9-a eld., p. 14, 343; Ciliga en ScR vol.12, n-ro 1-2, p. 40 s.; Haupenthal kaj Berger en Germana Eo-Revuo 6/1964, p. 70; AdA II, p. 47.

Uzado: La vorto aperas unuafoje en RE (*viper-*); same en EG kaj en la 1-a eldono de UV (1894). Tamen en ties 2-a eldono (1898) troviĝas unuafoje *vipur-*; same en UV 3-a, 4-a kaj 5-a eldonoj (1900-1904). La unuaj vortaroj de la 20-a jc (Be, Jü, Taschenwörterbuch) daŭrigas la tradicion de *viper-,* same la Fundamenta Krestomatio (FK, 1903). La Fundamento de Eo estis eldonata en 1905: ĝi enhavas i.a. la Universalan Vortaron en ties eldono de 1904 kun *vipur-*. Ekde 1907 Z komencis uzi tiun fundamentan formon kaj ŝanĝis ekzemple en la 5-a eldono de FK, eĉ se la formo *viper-* estas okaze trovebla ankaŭ poste (vd. por detaloj Albault l.c. 82 s.). Ka (1910) estis la unua vortaro registranta nur *vipur-*; aliaj samepokaj enhavas ambaŭ formojn. Inter la du mondmilitoj la statistiko de Albault (l.c. 84) montras 6 vortarojn kun *viper-,* 6 kun *vipur-* kaj 5 kun ambaŭ. Post la dua mondmilito la tendenco estis registrado de ambaŭ formoj.

Atestoj de Z: La sinteno de Z estas ambigua. En tri lokoj li komentis la problemon: (1) Lingvaj Respondoj n-ro 45 (1908): "La historion de la vorto 'vipuro' mi nun jam ne bone memoras. Sed ĉar en la lastaj eldonoj de la universala vortaro troviĝis ne 'vip*e*ro' sed 'vip*u*ro', tial mi tiun formon akceptis en la 'Fundamenton'. " Z konstatas, ke en kelkaj vortaroj de la 'Kolekto Aprobita' la vorto, "eble pro simpla preseraro", havis du formojn. Li rekomendas uzi la formon konforman al la Fundamento. (2) Laŭ Lobut (Her 8/1965, p.3) Z per poŝtkarto 1910-10-08 deklaris al M. Butin, ke *vipur-* estas preseraro (informo ĉerpita el "La vendreda klubo", Leipzig 1921, p. 50 subplume de W. Lippmann; Wüster, Oficiala Radikaro [1923], p. 68). Kaj li komentis, ke alie li estus kreinta i.a. **kuluro* anst. *kulero (kul-ero!).* (3) En poŝtkarto 1913-06-27 al C. Grazzini : "La formoj 'krat*a*go' kaj 'vip*u*ro' **ne** estas preseraroj". (Publikigita en l'esperanto mar-apr 1965 kaj Her 5/1965, p.4.)

Konkludo: La problemon (a) la Akademio provis solvi, deklarante *viper-* paralele uzeblan formon (OA 8); per tio ĝi lasis al la lingvuzantoj elekti la preferatan formon. – La problemo (b) estas malfacile solvebla: Z dufoje deklaris, ke

vipur- estas preseraro, unufoje ke ĝi ne estas. En la poŝtkarto (3) li diris, ke li ĉe persona renkontiĝo kun s-ro Grazzini klarigos "la kaŭzon, pro kiu mi ŝanĝis la originalan formon". Waringhien (LV 79) citas *vipuro* inter la vortoj, en kiuj "la ĝena vokalo estis anstataŭita de la neŭtrala vokalo *u*" [kp *dungi, faruno, kubuto*]; ja estas imageble, ke Z timis konfuzon kun la alisignifa radiko *vip-* plus la sufikso *-er*. Kontraŭ tio pledas lia konsekvenca uzado de *viper-* dum la unuaj du jardekoj, lia forta eldiro en 1910 (vd. supre) kaj lia eksplicita principo "por ĉiuj naturscienca nomoj...ĉiam preni la nomojn **latinajn** en Esperanta transskribo" (letero al Verax 1911-04-11). Tial aperas pli konsekvenca la serio: origina radiko kun *-er* > preseraro *-ur* > akcepto de la erara formo pro ĝia fundamenteco. ¶ 1894 *viper-*.¶ Io *viper/o*, Ia *-e*, Ie *vípere.*

L *vipera* probable el **vivi-para* "naskanta vivajn idojn" (laŭ la superstiĉa kredo ke la vipuro ne produktas ovojn), kunm. de L *vivus* "viva" (vd. *vivi*) k *parere* "naski" (vd. *parenco*).

VIR/O (f; Un): L *vir.* Kp FG(H) *viril,* AI *-e* "vir(ec)a". La adjektivo donas al la L radiko grandan internaciecon. Malpli grava estas FR *triumvirat,* A *-e,* I(H) *-o,* G *Triumvirat,* Po *triumwirat* "koalicio de tri viroj". ¶ Io =, Ie *mann* (< G *Mann,* A *man*), Ia *viro, homine.*

El HE **ŭiro-s* s.s., kp Sa *vîrá-* "viro, heroo"; Li *vy´ras,* Ir *fer,* Gt *weir* "viro", ank. en G *Wer-wolf* 'vir-lupo'. Samfamiliaj: *virto, virtuozo.*

VIRG/A (f; RE): Bazita sur la nominativo de L *virg/o -inis* "-ulino", kp A *virgin,* F *vierge,* I *vergine,* (H *virgen*) s.s. La fontlingvaj adjektivoj estas formitaj el tiu subst. (ekz. F *virginal,* I *verginale,* L *virgin/alis, -eus*). La stemo *virgin-* (LA) povis sugesti Ean in-formon **virg/in/o,* sed ties retrograda formaĵo **virg/o* 'virga viro' evidente ŝajnis al Z absurda pro la identeco kun L *virgo* "-ulino". Li tial preferis fari la radikon adjektiva, ebligante la derivaĵojn *virg/ul-, virg/ul/in-.* ¶ 1894 *virgin-* "-ulino". ¶ Io = (*virg-ino* "-ulino"); Ie *vírgin/a* "-ulino", *-al* "-a"; Ia *virgin/e* "-ulino, -a", adj. ank. *-al.*

Pridisputata etimologio.

VIRT/O (f; RE; kp *virtu-* N-ro 15 1888): A *vir/tue,* I *-tù,* (H *-tud*), F *vertu;* L *vir/tus -tutis.* Z elektis maksimuman mallongecon; kun la fina *-t* el L *-tus* oni povas kompari *-t* el L *-tas,* ekz. en *civit/o, kvalit/o.* Iom analoga estas *servut/o* el L *servi/tus -tutis.* ¶ Io *vertuo,* Ie *vertú,* Ia *virtute.*

L *virtus* "vireco, taŭgeco, efikeco, braveco", der. de *vir* "viro", vd. tiun. – Pri la vortoj por "virto" kp Collinson en Espologio II, 99.

VIRTUOZ/O (f; RE): AI(H) *virtu/oso,* F *-ose* [-z], R *-oz,* G *Virtuose* [-z-], Po *wirtuoz.* Ps-sf *-oz.*

I vorto, orig. "lertulo", der. de *virtù* "virto, (bona) kvalito" (vd. *virto*).

VISK/O (1; Jü): L *viscum;* I *vischio* [-k-], (H *visco*). ¶ Io *mistelo* (< G *Mistel,* A *mistletoe*); IeIa *visco.*

L *viscum* (> F *gui* "visko") signifas ank. "gluo el visko" (same kiel la cititaj HI vortoj; kp la der. A *visc/ous,* I *-oso,* F *visqueux* > eo *viskoz/a* 'glueca') kaj estas ligita kun Gr *ixós* "visko; viska gluo" k R *viŝnja* "ĉerizo" (ankaŭ uzita por fabriki gluon); malnova kulturvorto el nekonata fonto.

VISKI/O (2; Jü): AFPo(H) *whisky* [ŭíski], G *Whisky* [=A], R *viski.* Pri A *wh-* [ŭ-] > Eo *v-,* kp *vipo.* ¶ Io *wiskio,* Ie *wisky,* Ia *whisky.*

A vorto, el Gaela *uisgebeatha,* propr. "akvo de vivo": *uisge* "akvo" (= Ir), vd. sub *hidrofobio.*

VIST/O (1; N-ro 30 1889, Jü): AF(H) *whist* [ŭ-], G *Whist,* Po *wist,* R *vist.* Pri A *wh-* [ŭ-] > Eo *v-,* kp *vipo.* ¶ Io *wisto,* IeIa *whist.*

A vorto, laŭdire el la interjekcio *whist!* "ŝŝ!" (pro la silento observenda dum la

ludo) de onomatopea origino.

VIŜ/I (f; Un): G *wischen* [víŝ-]. Kp Ji *vishn.* Bazita ekskluzive sur G; ĝermana radiko elektita 'pro malsameco en la romanaj lingvoj' (Collinson 1959, 9), kp F *essuyer,* I *asciugare,* (H *enjugar*). ¶ Io *vishar,* Ie *essuyar,* Ia *essugar.* Der. de G *Wisch* "pajlfasko" (uzita kiel balailo), identa kun A *whisk* "kirlilo" (pĜ **wisk/a, -ô*), par. al Sa *veŝká-* "maŝo",

L *virga* "vergo" (kp tiun): HE **ŭ(e)is-* "tordi", plivastigo de rad. **ŭei-* "tordi, plekti" (vd. sekv.).

VIT/O (8; PV; ne ĉe Z; antaŭe *vin/ber/uj/o, vin/plant/o*): L *vitis* (L bot. *Vitis vinifera* 'vinoporta'); I *vite,* (H *vid*). Kp A *vine,* F *vigne;* cetere kunmetoj kun "vino": G *Weinstock,* Po *vinoros'l,* R *vinograd.* Bazita sur L (botanika termino). – Kolizias kun la nomo propra *(malsano de sankta) Vit/o* Z Rabi. ¶ Io =, IeIa *vite.*

L *vitis* estas der. de *viere* " plekti" (do orig. "interplektiĝa planto"), kp *vimen* "saliko; plektaĵo", de HE rad. **ŭei-* "tordi, plekti", kp Sa *váyati* "plektas", G *Weide* "saliko". Kp *viŝi,* ev. ank. *vindi.* – (La AF formoj estas ligitaj kun la vorto por "vino".)

VITR/O (f; Un): L *vitrum;* I *vetro* (kp *vitreo* "-[ec]a"), (H *vidrio*). Kp F *vitre* "-aĵo", A *vitrify* "-igi". Internacie konata per la derivaĵo AF *vitr/ine,* R(H) *-ina,* I *vetrina,* Po *witryna* "-oŝranko". Bazita sur L kun apogo de latindependaj derivaĵoj. Por la trinkvazo el vitro Z utiligis la ĝermanan radikon (vd. *glaso*). ¶ IoIa =, Ie *vitre.*

La etimologio de L *vitrum* (> F *verre* "glaso") estas pridisputata. Samfamilia: *vitriolo.*

VITRIOL/O (f; RE): AF *vitriol,* (H *-o*), G *Vitriol,* I *vetriolo,* Po *witriol.*

El L mez. *vitriolum,* dim. de L *vitrum* "vitro" ('vitraspekta acido', Bastien), vd. tiun.

VIV/I (f; Un): L *vivere* (kp *vivus* "-a"); F *viv/re,* I *-ere* (kp *vivo* "-a"), (H *-ir*). Kp A *revive* "re-igi", *vivacious* "-eca", ank. G *Vivat* "-uo", Po *wiwatować'* "-ui".

Bazita sur la komuna radiko de la latin(id)aj lingvoj. ¶ 1881 *viv-.* ¶ Io *viv/ar,* IeIa *-er.* De HE rad. **gŭiŭ-* "vivi", kp Sa *jī'vati* "vivas", Gr *bíos* "vivo" (kp *biologio*), *zô'on* "vivanta estaĵo" (kp *zoologio*), R *ĵivoj* "viva", A *quick* "rapida". Samfamiliaj: *viando, vivisekcio.*

VIVISEKCI/O (6; GE, Ve, PV): AF *vivisec/tion,* (H *-ción*), G *Vivisektion,* I *vivisezione,* Po *wiwisekcja,* R *vivisekcija.* Ps-sf *-cio.*

Formita (ĉ. 1830) el L *vivus* "viva" k *sect/io -ionis* "sekcado" laŭ modelo de AF *dissection* "dissekcado". Vd. *vivi* resp. *sekci.*

VIZ/O (4; *-i* Jü, *-o* Ka ktp): AF *visa* [-z-], G *Visum* [-z-], I(H) *visto,* Po *wiza,* R *viza.* Kredeble bazita sur la komuna elemento de la formoj AFGPoR; [z] havas la apogon de tiuj lingvoj. ¶ Io *visto,* IeIa *visa.*

Modernlingva uzado (ekde 17a jc) de L *visa* (*visum*) "vidita (= ekzamenita) (aĵo)", nom. plur. (ntr.) resp. nom. sing. (ntr.) de *visus,* ptc.perf. de *videre* "vidi" (vd. tiun). – (Ankaŭ IH *visto* signifas "vidita".)

VIZAĜ/O (f; Un; kp *visaĝ-* N-ro 15 1888): A *visage* [-z-] (lit.), F *visage* [-z-]. Kp I *viso* [-z-] s.s. Bazita sur F. Preferita de Z al la ekvivalento AF *face,* I *faccia,* L *facies,* kredeble pro tio, ke *facet-* estis internacia kun alia signifo. Ps-sf *-aĝ.* ¶ 1881 *vidz'* (sama etimo). – 1894 *visag-.* ¶ Io *vizajo,* IeIa *facie, visage.*

Der. de F ant. *vis* "vizaĝo" el L *visus* "aspekto, vido", subst. de *videre* "vidi" (vd. tiun).

VIZI/O (6; Jü): AF *vis/ion,* I *-ione,* (H *-ión*), G *Vision,* Po *wizja.* Formo kiel en *revizi/o* (OA 3). Ps-sf *-zio,* var. de *-cio.*

El L *vis/io -ionis* "vid(aĵ)o", subst. de L *videre* (sup.rad.: *vis-*) "vidi" (vd. tiun).

VIZIER/O (f; RE) A *visor* [-z-], F *visière* [-z-], G *Visier* [-z-], I *visiera* [-z-], Po *wizjer,* (H *visera*). La skribo *-ier* baziĝas sur FGI; la Po prononco [vizjer]estas tre proksima al la Ea. La radiko estas klare

diferencigita de *vezir-*. ¶ 1894 *visier-*. ¶ Io =, Ie *vis-iere,* Ia *visiera.*

Propr. "vizaĝa (aĵo)", der. de F ant. *vis,* I *viso* "vizaĝo" (vd. tiun).

VIZIT/I (f; RE): A *visit* [-z-], F *-er* [-z-], I *-are* [-z-], (H *-ar*), Po *wizytowac'*. Kp G *Visite* [-z-], R *vizit* "-o". Eo *-z-* laŭ la prononco de ĉiuj modernaj fontlingvoj. ¶ 1894 *visit-*. ¶ Io *vizitar,* IeIa *visitar.*

El L *visitare* "ofte viziti", intensa verbo de *visere* "viziti", siavice intensa verbo de *videre* (sup.rad.: *vis-*) "vidi", vd. tiun.

VOĈ/O (f; Un): L *vox* (gen.: *vocis*); A *voice,* F *voix,* (kp *vocal* "-a"), I *voce* [-ĉ-], (H *voz*). La unusilabaj L substantivoj finiĝantaj per *-x* estas tre diversmaniere traktitaj de Z, vd. Silfer en PL 10/1984, 19. Ĉi-okaze **vok-* estis neebla ĉar bezonata por la verbo *vok/i.* Formo **voc-* (laŭ LAI skribo) estus uzebla, sed Z ĉapeligis la *c,* sekvante la I prononcon (kp spec. L *faex* > Eo *feĉ/o,* L *pix* > Eo *peĉ/o*). Motivo ĉi tie povis esti la relativa konateco de la I formo en muzikaj terminoj (ekz. *mezza voce* "mezvoĉe"). ¶ 1894 *voc-*. ¶ Io *voco,* IeIa *voce.*

Latin(id)a vorto, identa kun Sa *vak-* "voĉo, parolo", de HE rad. **ŭokŭ-* "paroli", kp ank. Gr *épos* "vorto" (kp *epopeo*). Kp spec. *vokalo;* vd. plue sub *voki.*

VOJ/O (f; Un): A *way,* F *voie,* G *Weg,* I (H) *via;* L *via.* Bazita sur F (por F *oi* > Eo *oj,* vd. sub *foiro*). La pli disvastigita latin(id)a formo *vi-* estis kompreneble neuzebla pro la pronomo *vi.* ¶ 1894 *vi-*. ¶ Io *voyo,* IeIa *via.*

La latin(id)aj k la ĝermanaj vortoj (kp Gt *wigs* s.s.; pĜ **weĵa-*) estas praparencaj, apartenantaj al la HE rad. **ŭegh-* "transporti" (vd. *vagono*). Samfamilia: *vojaĝo.* Kp ank. *norvego.*

VOJAĜ/O (f; RE): AF *voyage* [A -iĝ, F -âĵ], I *viaggio* [-âĝo]. Eo *-oj-* laŭ A prononco kaj AF ortografio (eble la jam fiksita formo *voj-,* sence parenca, influis). La radikfino estas identa kun la ps-sf *-aĝ.* ¶ 1894 *vojag-*. ¶ Io *voyajo,* IeIa *viage.*

El L *viaticum* "provianto por vojaĝo", der. de *via* "vojo", vd. tiun.

VOK/I (f; Un): L *vocare;* en la modernaj fontlingvoj nur kunmetoj, ekz. A *con-, in/voke,* F *con-, in/voquer* [-k-], I *con-, in/vocare,* (H *con- in/vocar*), ĉiuj "kun-, al/voki". ¶ 1882 *vosk-* (< R *voskliknut'* "ekkrii": PVZ 5, 150). ¶ Io *vokar,* IeIa *vocar.*

Samradika kun L *vox* "voĉo" (vd. tiun; kp ladifinon en PIV: *voki* = 'laŭtigi la voĉon') de HE rad- **ŭokŭ-* "paroli", kp Sa *vákti* "parolas, diras". Samfamiliaj vortoj en Eo: *advokato, provoki, voĉo, vokalo, vokativo;* par. estas ank. *epopeo.*

VOKAL/O (f; RE): L *vocalis;* A *vowel,* F *voyelle,* G *Vokal,* I *voc/ale,* (H *-al*).

Bazita sur L (gramatika termino) kun apogo de GI. Orig. *vocalis (littera)* "voĉa (litero)", adj. de L *vox* "voĉo" (vd. tiun).

VOKATIV/O (2; RE): L *(casus) vocativus;* A *vocat/ive (case),* F *-if,* I(H) *-ivo,* G *Vokativ.*

Gramatika termino prenita el L. Ps-sf *-iv.* Propr. "voka (kazo)", t.e. 'kazo por alvokoj', adj. der. de L *vocare* "voki" (vd. tiun).

VOL/I (f; Un): A *will,* F *vouloir* [vul-], G *wollen,* I *volere;* L *volo* "mi volas" (inf.: *velle*). Kp F *volonté,* (H *voluntad*) "-o", AF *volition* "-ado", Po *wola* "-o", R *volja* "-o". Radiko troviĝanta en ĉiuj tri fontlingvaj lingvofamilioj kun sama konsonantismo; vokalo laŭ LGR. ¶ 1881 *vol-*. – 1894 *vul-*. ¶ Io *vol/ar,* IeIa *-er.*

Komuna eŭropa vorto (pĜ **wiljan,* kp Gt *wiljan;* pSl *voliti*) de HE rad. **ŭel-* "voli, preferi", kp Sa *vrn'â'ti* "elektas", Gr *elpís* "espero", Li *viltìs* "espero", G *wählen* "elekti". Samfamiliaj: *volonte, volupto.*

VOLONT/E (f; RE): F *volontiers,* I *volentieri.* Bazita sur F kun apokopo de la sufikseca vortfino. La aludo pri *vol-* estas kredeble intenca. Iom surprize Z preferis neglekti ke *volont-* kolizias kun la futura participo de tiu radiko. ¶ 1906ab *volunt-*. ¶ Io *volunte,* Ie *voluntari/men,* Ia *-mente.*

FI el L *volunt/arie* "laŭvole" de *-arius* "laŭ-

mem/vola", der. de *voluntas* "volo" (vd. *voli*).

VOLUM/O (f; RE): AFI *volum/e*, (H *-en*), G *Volumen*; L *volu/men -minis*. Mallonga formo en la plimulto de la fontlingvoj. Kp la ĝemelan *volumen/o*. ¶ Io *tomo*, Ie *tom* (< L *tomus*; Po *tom*, AF *-e*, I[H] *-o*); Ia *volumine, tomo*.

Propr. "rulaĵo" (orig. pri la antikvepokaj skribrulaĵoj, kiuj antaŭis la kodeksojn), der. de L *volvere* "volvi, ruli" (vd. *volvi*). Kp spec. sekv., etimologie identan.

VOLUMEN/O (4; Jü): AFI *volum/e*, (H *-en*), G *Volumen* (ĉiuj ank. "volumo". Radiko diferencigita disde *volum-*, bazita sur G aŭ la L originformo (vd. s.t.v.). Pri la radikfino, vd. *ekzameno*. ¶ Io *volumin/o*, Ia *-e*, Ie *volúmine*.

Identa kun la antaŭa vorto; en F ant. okazis la sencevoluo "libro" > "amplekso de libro" > "spaco okupata de io". Vd. *volumo*.

VOLUPT/O (f; RE): F *volupté*, I *voluttà*, (H *voluptuosidad*); L *volup/tas -tatis*. Kp A *voluptuous* "-a". Ps-sf *-t(at)*. ¶ Io =, Ie *volup/tá*, Ia *-tate*.

Der. de L *volup* "agrable, kontentige" de rad. *vol-* en *volo* "mi volas" (vd. *voli*).

VOLV/I (f; RE): L *volvere*. En la modernaj fontlingvoj nur kunmetoj, ekz. I *avvolgere* "en-i", (H *envolver* "en-i"); kp kun najbaraj signifoj A *involve* "impliki", *revolve* "turn(iĝ)i, rivolui" k.a. Sendube bazita sur L. ¶ 1882 *visk-* (< G *wickeln*: PVZ 5, 149). ¶ Io *(en)volvar*, Ie *(in)voluer*, Ia *volver*.

L *volvere* (sup.rad.: *volut-*) "ruli, volvi, rivolui" devenas de HE rad. **ŭel-* "turni, volvi", kp Sa *valati* "turniĝas", Gr *eily'ein* "ĉirkaŭvolvi", *hélix* "spiralo" (kp *heli/co, -ko*), G *wälzen* "ruli" (kp *valso*). Samfamiliaj vortoj en Eo: *evolui, konvolvulo, revolucio, revolvero, rivoluo, volumo, volumeno*. Kp ank. *valo*.

VOM/I (f; RE): L *vomere*; A *vom/it*, F *-ir*, G *-ieren*, I *-itare*, (H *-itar*).

Bazita sur LF; *-it* laŭ AI kompreneble estus neoportuna pro la homonima participsufikso. ¶ Io *vom/ar*, Ie *-ir*, Ia *-er, -itar*. L *vomere* (sup.rad.: *vomit-*, el kiu la intensa formo *vomitare*> IHA) estas identa kun Gr *emeín* "vomi", Sa *vámiti* "vomas", Li *vémti* "vomi" (HE rad. **ŭem-*).

VORT/O (f; Un): A *word*, G *Wort*. Kp Nd *woord*. Bazita sur G. (Influo de Vp *vöd* laŭ Golden Li k Ni 406.) Kelkaj el la latin(id)aj ekvivalentoj estis neeblaj pro aliaj signifoj: L *verbum* (pro *verbo*), F *parole*/I *parola* (pro *paroli*). Komune latin(id)a estas L *voca/bulum*, I *-bolo* (H *-blo*; kp A *vocabul/ary*, F *-aire* "-aro"); ĝi eble estis konsiderata tro longa. ¶ 1881 *verb-*. – 1894 *vokabl-*. ¶ Io =; Ie *vocabul, parol;* Ia *verbo, parola, vocabulo*.

Ĝerm. vorto, kp Gt *waúrd*: pĜ **wurdha-*, identa kun L *verbum* s.s., Li *vardas* "nomo" el HE **ŭerdho-* "vorto" de rad. **ŭer-/ŭrē-* "diri", kp Gr *rhê'tôr* "oratoro" (kp *retoro*). R *vrat'* "mensogi".

VOST/O (f; Un): R *hvost*. Bazita ekskluzive sur R (kun aferezo de la komenca konsonanto, sendube por plifaciligi la prononcon). La motivo por tiu elekto estas neklara; la ĝermanaj lingvoj malsamas (A *tail*, G *Schwanz*), sed sur la latin(id)aj estus eble bazi radikon kun plurlingva apogo, kiel montras la propono 1894: *kod-* (L *cauda*, F *queue*, I *coda*, [H *cola*]). ¶ Io *kaudo*, Ie *caud/e*, Ia *-a*.

Slava vorto, kredeble par. al G *Quast* "kvasto" (kp tiun).

VUAL/O (f; RE): A *veil*, F *voile* [vŭál], I(H) *velo*, Po *woal*, R *vual'*; L *velum*. Bazita sur F prononco, transskribita laŭ R maniero (kp *buduaro, ekspluati, trotuaro, tualeto*); Gregor (1982, 28) donas FPoR kiel fontojn. Ev. formo **vel-* (LI[A]) estis okupita per alia senco; vd. Wiener 1950, 100. ¶ IoIa *vel/o*, Ie *-e*.

Etimologie identa kun *velo*, vd. tiun.

VULGAR/A (1; Be) 1) ĝenerala (Be, Jü ktp) 2) maldelikata, triviala, plebaĉa (Kabe, PV ktp): A(H) *vulg/ar* (1, 2), F *-aire* (1, 2), G *-är* (2), I *volgare* (1, 2), Po

wulgarny (2), R *vul'garnyj* (2); L *vulgaris* (1). Pri la semantiko, kp Waringhien LV 87: "*triviala* estis eĉ preskaŭ tute senutiligita de la enveno de *vulgara* (la OA)...". – Ps-sf *-ar,* var. de *-al.*

Baza signifo "pleba" (de kiu unuflanke "ordinara, ĝenerala", aliflanke "banala, triviala"), der. de L *vulgus* "plebo, ordinaruloj", identa kun Sa *várga-* "sekcio, grupo".

VULKAN/O (f; RE): F *volcan,* A *-o,* G *Vulkan,* I *vulcano,* Po *wulkan,* R *vulkan,* (H *volcán*). Eo *-u-* laŭ la plimulto de la fontlingvoj (kp ank. la L originvorton sube). ¶ Io *volkano,* Ie *vulcan,* Ia *-o.*

El L mod. *vulcanus (mons)* "monto de Vulkano", unue nomo de vulkano apud Sicilio, en kiu regiono *Vulcanus* (alt. *Volc-*), la dio de fajro, laŭdire havis sian forĝejon; la dinomo estas eble de etruska origino.

VULP/O (f; RE): L *vulpes;* I *volpe.* Prenita el L kiel zoologia termino. Pri la kontrasto L *u* : rom. *o,* vd. *mondo.* ¶ Io *foxo,* Ie *fox* (< A *fox*); Ia *vulpe.*

L *vulpes* ŝajnas par. al Li *vilpiŝys* "sovaĝa kato".

VULTUR/O (f:RE): L *vult/ur -uris;* A *vulture,* F *vautour* [-túr]. Kp I *avvoltoio.* La L zoologia termino estas apogata de A kaj iomgrade de F. ¶ Io =, Ie *vultur,* Ia *-e.*

Eble de L *vellere* "ŝiri" (birdo kiu disŝiras sian predon); kp L *vellus* "lanfloko" ('disŝiritaĵo') sub *lano.*

VUND/I (f; Un): A *wound* [ŭund] "-i, -o"; G *ver/wunden* "-i", *Wunde* "-o". (Influo de Vp *vun* "-o" laŭ Golden en Li k Ni 407.) Bazita precipe sur la G substantivo. Laŭ Collinson (1959, 10 s.) '*vund...* forigas la konfuzon de F *blesser* ["vundi"] kun E [=A] *bless* ["beni"]' (evidente Collinson pensis pri la formo en pEo 1881). La reala motivo por elekti la ĝermanan radikon povas esti la neoportuna sufiksidenta fino de la responda L radiko *vulner-* (L *vuln/us -eris* "-o", kp A-[H] *vulner/able,* I *-abile,* F *vulnérable* "-ebla"). Z apokopis ĝin en la propono de 1894. ¶ 1881 *bless-.* – 1894 *vuln-.* ¶ Io *vundar,* IeIa *vulnerar.*

Orig. der. de la ĝerm. adj. A ant./G *wund,* Gt *wunds* "vundita, lezita": pĜ **wunda-;* eksterĝermanaj koneksoj necertaj.

Z

ZEBR/O (f; RE): AIPoR *zebra,* F *zèbre,* G *Zebra,* (H *cebra,* P *zêbra*); L zool. *Equus zebra.* ¶ Io =, Ie *zebr/e,* Ia *-a.*

Afereza formo de H ant. *ezebr/a, -o* "sovaĝa azeno" (poste aplikita al la afrika besto de portugalaj marveturantoj en la 17a jc) el L vulg. **eciferus,* L postkl. *equiferus* "sovaĝa ĉevalo", kunm. de *equus* "ĉevalo" (kp L zool. supre) k *ferus* "sovaĝa" (vd. *fiera*).

ZEFIR/O (4; RE): A *zephyr,* F *zéphyr,* G *Zephir,* I *zeffiro,* PoR *zefir,* (H *céfiro*); L *zephyrus.*

El Gr *zéphyros* "okcidenta vento", probable ligita kun *zóphos* "mallumo, okcidento ('malluma flanko')", kp *dnóphos* s.s.; cetere nekonata etimologio.

ZENIT/O (f; RE): A *zenith,* F *zénith,* G *Zenit,* IPoR *zenit,* (H *cenit*).

Aliigo (pro mislego, vd. Cherpillod 1992, 114) de Ar *samt* "vojo" (vulgara prononco [semt]) en la esprimo *samt ar-ra's* "vojo de (:super) la kapo".

ZIBEL/O (f; RE): L zool. *Martes zibellina;* A *sable,* F *zibeline,* G *Zobel,* I *zibellino,* Po *soból,* R *sobol',* (H *cebellina*). Deirpunkto estas evidente la L zoologia termino, apogata de FI; la apokopo de *-in* estis necesa por ebleco formi Ean inan formon. ¶ Io *zibelino,* Ie *zóbol,* Ia **zibellina.*

La FI formoj (k la zoologia termino) baziĝas sur der. de L mez. *sabellum* s.s., de slava origino (kp RPo supre); la vorto estas kredeble prapar. al Sa *cabála-* "mikskolora, bunta".

ZIGZAG/O (1; Eisto 3/1889, Jü): AFIR (H) *zigzag,* G *Zickzack,* Po *zygzak.*

Sonsimbola formaĵo de la sama tipo kiel G *Ticktack,* F *tic-tac* (> eo *tiktak/o* Kabe, PV 'sono de horloĝo'); se orig. germana, ĝi povas aludi pri G *Zacke* "pinto".

ZINGIBR/O (f; RE): L *zingib/er -eris;* A *ginger,* F *gingembre,* G *Ingwer,* I *zenzero,* P *imbir,* R *imbir',* (H *jengibre*). Bazita sur L (botanika termino); ellaso de *-e-* evitigas longan radikformon kaj kolizion kun la sufikso *-er-:* kp *kadavr/o, pipr/o* el samtipaj L substantivoj. Kp Wüster Esp. princ. 57 ("laŭ F kaj prononco AGR": obskura ekspliko!). La spicnomo *pipro* estas analoga ankaŭ rilate la diverĝon de la modernlingvaj formoj, kiu malebligas starigon de komuna radikformo. ¶ Io *jinjero,* Ie *zingibre,* Ia *gingibre.*

El Gr *zingíberi* s.s., pere de Palia *singivera-* s.s., laŭdire el Sa *crngaveram* s.s, , el *crnga-* "korno" (vd. tiun) k *vera-*, kiu respondas al dravida vorto por "radiko" (la nomo do pro la kornoformaj radikoj de la planto). Kp Cherpillod 1992, 114 s., kie ankaŭ troviĝas multaj formoj el aliaj lingvoj.

ZINK/O (f; RE): AF *zinc,* I(H) *-o,* G *Zink,* Po *cynk,* R *cink;* L sc. *zincum.* ¶ Io =, IeIa *zinc.*

G vorto, probable identa kun *Zinke(n)* "pinto, dorno" (pro la pintformaj formaĵoj de

la metalo en la fandforno), en G ant. *zinko,* paralela al *Zinne* "murdento, krenelo".

ZIZEL/O (f; RE): A *s(o)uslik,* G *Zieselmaus* [-z-] [*Maus* muso"], I *citello,* Po *susel',* R *suslik;* L zool. *Citellus.* Kp Sv *sisel.* La nomo estas malbone normigita en la okcidenteŭropaj lingvoj. Ea formo laŭ G (unua *z* laŭ skribo, dua laŭ prononco)kun (nevoĉa!) apogo de Po. La formoj AF *zizel* en UV estas dubaj: F estas korektita (Fund., p. 249); A estas netrovebla en Webster. ¶ Ne trovita en la aliaj L.I.

Slava vorto (kp Ĉe *sysel*), kredeble ligita kun Bg ant. *sysati* "sibli, pepi" de onomatopea origino.

ZODIAK/O (1; RE): A *zodiac,* I *-o,* F *zodiaque* [-ák], G *Zodiakus,* PoR *zodiak,* (H *zodíaco*); L *zodiacus.*

El Gr *zôdiakós (ky'klos)* "bestfigura (cirklo)", adj. de *zôdion* "bestfiguro", dim. de *zôon* "besto" (vd. *zoolog(i)o*).

ZON/O (f; RE) 1) ĉirkaŭtalia strio 2) geogr., geom.: AF *zon/e,* IPoR(H) *-a* (ĉiuj 2); L *zona* (1). La senco 1 (laŭ modelo de L kaj Gr)estas la origina kaj la sola en UV; la senco 2 troviĝas en Jü per la traduko G *Zone* kaj estas klare esprimita kiel geometria termino en Ka kaj Ve. Ĝi estas trudita de la internacieco. (Laŭ Golden en Li k Ni 408 Eo *zon/o* estas influita de Vp *zön* [semantike?]; tamen Schleyer 1885 distingas *zon* [2] disde *zön* [1].) ¶ 1881 *gart-* (< F *jarretière* "krurzono": PVZ 5, 136; pli bone A *garter* s.s.). ¶ Io = (1, 2); Ie *zon,* Ia *-a* (2), kp por senco 1 Ie *cintura,* Ia *cinctura* (< F *ceinture,* I *cintura,* L *cinctura*).

El Gr *zô'nê* (1, 2; la senco 1 estas origina, 2 metafora), samradika kun *zônny'nai* "zoni" de HE rad. **jôs-* "zoni", kp Li *júosti* "zoni", R *pojas* "zono (1, 2)".

ZOOLOG/O (7; Christaller 1923, Wü; antaŭe *zoologi/ist/o* Jü): PoR *zoolog,* A *-ist,* I *-o,* F *zoologue* [-g], G *Zoologe,* (H *zoólogo*). – Nomo de scienco: **ZOOLOGI/O** (f', 1, 7; Eisto 3/1889, Jü): A *zoolog/y,* F *-ie,* IPo *-ia,* R *-ija,* (H *-ía*), G *Zoologie;* L mod. *zoologia.* Ps-sf *-i* 1.

Farita (18a jc) el Gr *zô'on* "viva estaĵo, animalo, besto", subst.-igita neŭtra formo de adj. *zô'os* "viva", kp *zôê'* "vivo", *zên* "vivi" k – kun alia rezulto de la HE komenca konsonanto – *bíos* "vivo" (vd. *biograf/o, -io, biolog/o, -io*): HE rad. **gŭiŭ-* "vivi" (vd. tiun). Samfamiliaj estas ankaŭ *azoto, zodiako.*

ZORG/I (f; Un): G *sorgen* [z-]. Kp Nd *zorgen.* Bazita ekskluzive sur G (*z-* laŭ la prononco kiel en *zum-*). Apartenas al la sama semantika kampo kiel *fleg-* kaj *vart-* (kp Collinson 1959, 9 sub *flegi*). Krome unu latina preskaŭsinonimo (*curare*) jam estis utiligita en alia senco (*kurac/i;* ev. formo **kur-* kolizius kun *kur/i*). ¶ 1882 *sutt-* (< L *sollicitudo* "zorgo" PVZ 5, 147; laŭ Mattos 1987, 29 el L *tutari* "protekti" [konsonantŝanĝo pro *tut-* "tuta"]). – 1894 *kuid-* (< H *cuidar*). ¶ Io *sorgar;* Ie *cuidar;* Ia *coler* (< L *colere*), *haber cura de* 'havi zorgon pri'.

Der. de la subst. *Sorge* "zorgo; aflikto, ĉagreno", ĝerm. vorto (kp Nd *zorg,* A *sorrow,* Sv *sorg,* Gt *saúrga:* pĜ **surgô-*), par. al Sa *sû'rkŝati* "zorgas", Li *sirgti* "esti malsana" (HE rad. **sŭergh-*).

ZUAV/O (1; Jü): AF *zouave* [zu-], G *Zuave,* R *zuav,* I(H) *-o,* Po *z'uaw.* F vorto, el Ar (berbera) *zwawa,* nomo de kabila tribo.

ZUM/I (f; RE): G *summen* [z-], (H *zumb/ar,* kp P *-ir*). Probable bazita sur G sole (kun *z-* laŭ la prononco kiel en *zorg-*); kp ank. Po *szum* "murmuro, susuro". La apogo de HP estis supozeble nekonata al Z. ¶ 1894 *bordon-* (< F *bourdonner,* propr. "zumi kiel burdo"). ¶ Io *zumar,* Ie *burdonear,* Ia *susurrar* (kp *susuri*).

Vorto de onomatopea origino.

Morfologiaj elementoj

Rim.: Por eviti troajn ripetojn de jardatoj, la citoj kaj resendoj en tiu ĉi sekcio normale estas donataj nur per aŭtornomo kaj paĝindiko; por pliaj detaloj, bv. vidi la Bibliografion.

KATEGORIAJ REKONILOJ

La principon distingi la ĉefajn vortkategoriojn per apartaj vokaloj Z aplikis – almenaŭ parte – jam en 1878 kaj preskaŭ komplete en 1881-2. Do estas grave en tiu ĉi konekso atenti ankaŭ la praesperantajn formojn. Pri tiaspeca distingo de ´vortoklasoj´ diras Mattos (p. 23): "ni...devas atribui ĝin al la inventiveco de la kreinto aŭ al rekta inspiro de alia planlingvo, se nur li ilin konis". Lia konkludo estas (p. 25): "lia lingvo ne rivelas ian influon, kiun povus klarigi elementoj kaj modeloj de tiuj lingvoj". Kp sube *-o* (4). (La demando pri influo de antaŭaj planlingvoj revenas ĉe la konjugacio, vd. ties sekcion 1.)

-O (substantivo).

Historio. La unua elekto (1878) estis *-e (lingwe, malamikete* "-eco", *homoze* "-aro", *familje)*, laŭ mia opinio bazita sur la ablativo de la plej disbranĉigita L deklinacio, la 3-a: L *carne, flore, gente, patre, pede* "piedo", *rege* "reĝo" (kp Mattos p. 21), tipo kiu retroviĝas en I *(carne, fiore, gente, padre, piede)*; kp ank. la F femalajn subst., ekz. *famille, langue* "lingvo", *table, terre* "tero". Günkel (perletere) pensas pri la G femala subst.-finaĵo *-e* (*Nase, Summe, Jacke, Karte, Lampe)* kaj rememorigas pri tio, ke ankaŭ la artikolo *la* havas femalan originon. – En 1881-2, kiam la adverboj ricevis la karakterizilon *-e* (ni ne estas informitaj pri la aspekto de la adverboj en 1878), la substantivfinaĵo estis ŝanĝita al *-o (*ekz. *anno* "jaro", *homo, lingvo, padro, sero* "vespero", *brul/ig/ad/o*), kiu kiel konate restis en la definitiva lingvoformo de 1887 (neŝanĝita ankaŭ en la reformpropono de 1884).

Deveno. (**1**) Oni ne povas ekskludi la eblecon, ke *-o* tutsimple originas en la personaj pronomoj de 1878 (*so* "sin") aŭ 1881-2 *(mo, to, ro* "mi, ci, li" ktp); pronomoj ja estas reprezentantoj de substantivoj (kp LV 44; pri la eventuala deveno de tiu *-o* de L *ego* "mi", *nos* "ni", *vos* "vi", vd. Mattos p. 21. (**2**) La koincido de *-o* kun la fino de frekventa latin(id)a substantivtipo (L,H,I,P) igas la plej multajn esperantologojn rigardi tiun kiel fonton (LV 55 s., Gregor 9, Atanasov Li k Ni 195, Yamasaki s.v. *-o*). Tio akordas kun la celo de Z doni al sia

lingvo latinecan karakteron (LV 56, piednoto). Frapas, ke granda nombro da esperantaj substantivoj ekzakte respondas al formoj (dat., abl.) de la L 2-a deklinacio: *disco, dono, dorso, loco, lupo, oculo, oleo, ovo, naso, plumbo, urso, vino, vitro* k.m.a. La formoj estas apogataj de pluraj nominativoj de la 3-a deklinacio: *homo, opinio, ordo, pulmo, sapo, testudo* ktp. Aldoniĝas amaso da I substantivoj finiĝantaj per *-o* (kiujn Waringhien rigardas kiel la rektan fonton de Eo *-o*, vd. LV 55), parte identaj kun la cititaj latinaj, parte alitipaj: *anno* "jaro", *capo, corno, corpo, fungo, mano, tempo, uomo* "homo, viro" k.m.a. (En H troviĝas analoga tipo, kp ekz. *año* "jaro", *cuerpo* "korpo",*huevo* "ovo", *ojo* "okulo", *oso* "urso", *vidrio* "vitro".) En L la *o*-substantivoj havas masklan aŭ neŭtran genron, en I(H) masklan; sed, kiel konstatas Waringhien LV 56, "ĉar genro ne ekzistas en E[o], Z opiniis, ke tio ne tre ĝenos". – La – praktike ne pridisputata – devenigo de Eo *-a* de la responda femala finaĵo ŝajnas konfirmi tiun ĉi etimologion: tiel la substantiva kaj adjektiva finaĵoj radikas en la sama latin(id)a deklinacia sistemo, konsistanta el la 1-a kaj 2-a deklinacioj en L. Kelkaj tiaj vortoj internaciiĝis kaj aperas en aliaj fontlingvoj, ekz. F *agio, piano, radio,* G *Risiko, Saldo, Salto.* Waringhien pravas dirante (samloke) ke la *o*-vortoj enpenetrintaj en F kaj G ne elvokas ideon pri seksrilata genro. [Komence tamen Z ne ŝajnis indiferenta rilate la sekson de substantivoj. Troviĝas en 1881-2 speciala ina finaĵo *-aŭ (filaŭ, princaŭ, puettaŭs* "knabetinoj"), kies etimologio estas pridisputata (vd. sub la sufikso *-in* sube). Mi emas kredi – kun Mattos – ke la unua elemento de tiu *-aŭ* estas ĝuste la menciita femala finaĵo. Kiam tiu speciala ina sufikso estis anstataŭigata per *-in* en 1887, *-o* povis konsistigi la finon ankaŭ de inaj substantivoj (en Un: *amik/in/o, fil/in/o, princ/in/o*; la du lastajn Z eksperimente provis jam en unu teksto de 1881.]- (**3**). La alternativa etimo de Waringhien (1967, 17), nome ke *o* troviĝas en pluraj internaciaj substantivsufiksoj (*-ion, -log, -nom, -or*) ne konvinkas; ĝi implicas procedon fremdan al la vortfarado en Eo (eltiro de vortinterna sono kaj ĝia remeto vortfine). Kp *-a* 3. – (**4**). Laŭ Stojan (p. 38) la substantivfino *-o* povis esti sugestata al Z de De Ria, Palais de 64 fenêtres (1788), publikigita en Peterburgo. Sed tio estas neebla: *o* en la teksto de De Ria estas signo ne gramatika sed fonetika, redonante F *e* [e']: *do* = F de, *katro* = F quatre, *lango* = F langue, *parlo* = F parle (vd. Drezen p. 59). – Pli interesa estas la fakto, ke Courtonne (Langue internationale néo-latine, 1884) adoptis multajn substantivojn en tiu formo, kiun ni trovas ĉe Z, inkluzive de *-o*: *arbo, avo, disqo, fago, fruqto, fumo, lago, nuqso, qorvo, urso, vulpo* (vd. Monnerot-Dumaine p. 95). ¶ Io: *-o* substantivsigno en sing. (< Eo), *-i* en plur. (pri *-i*, vd. sub *-j*). – Ie havas nedevigan 'neŭtralan finvokalon -e' (Haas 1956, 8), uzatan ĉefe pro belsoneco (*libr/e*) kaj por formi subst. el adj. (*central/e*). La finaĵoj *-o* kaj *-a* indikas viran resp. inan sekson de subst. – Ia: 'La finsonoj de subst. ne havas gramatikan valoron kaj povas esti konsiderataj neesencaj' (Gode & Blair 1951, 10). Se virsignifa subst. finiĝas per *-o*, oni povas formi insignifan per *-a*, kaj inverse.

La L *o*-tipo (supre, 2) devenas de HE *o*-stemoj (subst. k adj.) kun nom. *-os* (mask.) aŭ *-om* (ntr.), ekz. **ekŭos* "ĉevalo", **neŭ/os, -om* "nova", **jugom* "jugo". Respondas al Gr *-os* (mask.) resp. *-on* (ntr.), ekz. *híppos* "ĉevalo", *né/os -on* "juna", *zygón* "jugo" (vd. Atanasov Li k Ni 195), al Sa *-as* (mask.) resp. *-am* (ntr.), ekz. *ácvas* "ĉevalo", *náv/as -am* "nova", *yugám* "jugo" k al slavaj subst. k

adj. kun *-o* (ntr.), ekz. *igo* "jugo", *novo* "nova".

–A (adjektivo).

Historio: Ambaŭ pEoj havas *-a* kiel adjektivsignon (1878: *uniwersala*; 1881-2: *universala, bella, delka* "delikata", *janta* "belega", *kala* "varma" ktp; ank. en ordaj numeraloj: *una*; en posesivoj: *ma* "mia"; en participoj: *vidata* "-ita"). Tiu tradicio do pluvivis en la definitiva lingvoformo. Nur en la reformo de 1894 Z ŝanĝis (devigite, ĉar *-á* tiam signifis imperfekton) al *-e*, kiu rolis duoble, nome por adjektivoj kaj adverboj. [Estas do nature supozi, ke tiu adjektiva *-e* devenas de la adverba. Tamen la multaj adjektivoj en L finiĝantaj per *-e* (ntr.) povis ludi rolon: *acre, breve* "mallonga", *forte, grande;* kp I (mask./fem.) *fedele* "fidela", *grande, verde*; (analoge en H: *fuerte, grande, verde*), F (fem.) *belle, chère* "kara", *grande.*]

Deveno. (**1**) La plej multaj esperantologoj (vd. ekz. Scott, p.74; Collinson Eologio 2/1950, 82; Waringhien LV 55; Yamasaki s.v. *-a*) vidas kiel ĉefan fonton la latin(id)ajn femalajn adjektivformojn finiĝantajn per *-a*, inter kiuj multaj identas kun Eaj formoj (vd. Modrijan 22): L+I *alta, bona* resp. *buona, cara, matura, pura, sana, vera*; L *ebria, humana, stulta* ktp (analogaj femalaj formoj en H kaj P). Tio paralelas al la supozata deveno de *-o* el latin(id)aj substantivoj, vd. supre *-o* (2). – (**2**) Kelkaj krome atentigas pri *-a* kiel femala finaĵo de slavaj predikativaj adjektivoj, ekz. R *ĥoroŝa* "bona", *nova, staraja* "maljuna"; Po *stara* "maljuna", *nowa, wielka* "granda" (pliaj ekzemploj ĉe Atanasov Li k Ni 195 [bulgaraj], Bianchini 10 [slovenaj]). – (**3**) Same kiel pri *-o*, Waringhien (1967, 17) liveras alternativan hipotezon: *-a* enestas en pluraj internaciaj adjektivsufiksoj, ekz. *-able, -al, -an, -ar* (la plej internacia el ĉiuj, *-ique* [-ik], ne povis servi kiel modelo, ĉar la vokalo *i* estis bezonata por la verboj). Kp supre *-o* 3. – (**4**) Kiel nuran koincidon oni devas konsideri la svedan t.n. malfortan (= difinitan) adjektivdeklinacion, ekz. *den varma dagen* "la varma tago", *det svenska språket* "la sveda lingvo" (Collinson Eologio 2/1950, 82; Bianchini 10). ¶ Io *-a* (< Eo). – Ie: la adj. havas nedevigan 'karakterizan vokalon' *-i* (Haas 1956, 9). De Wahl konstatas (Spíritu de Occ. 25) ke '*i* estas kvazaŭ la ekstrakto de la adjektivaj sufiksoj en ĉiuj eŭropaj lingvoj. Kp Gr *-i(c)*, L *-(i)us, -i(s), -i(cus)*, G *-i(g), -i(sch)*, A *-i(c), -y*, F *-i(que)*, R *-ij*'. Ŝajnas, ke Waringhien ĉerpis siajn klarigojn pri la deveno de *-o* kaj *-a* (vd. *-o* 3, *-a* 3) el tiaspeca argumentado. Jespersen (1928, 97) pravigas *-i* (por Novial) per 'multaj derivaĵoj kiel *simpli-fika* = *fika simpli* [igi simpla]..., *modernisa* [igi moderna]'. – Ia: neniu fiksa finaĵo, sed tre multaj adjektivoj finiĝas per *-e*: *alte, belle, grande, longe, parve* "malgranda" ktp.
La L *a*-tipo (supre, 1) devenas de HE *â*-stemoj (fem. subst. k. adj.), ekz. **ekŭâ* "ĉevalino", **gŭenâ* "virino", **neŭâ* "nova" (fem.). Respondas al Gr *-ê* (*gynê'* "virino") aŭ *-a* (*néa* "juna", fem.; *makrá* "longa", fem.); al slava *-a* (Bg ant. *ĵena* "virino"); al Sa *-â* (*ácvâ* "ĉevalino", *návâ* "nova", fem.).

-E (derivita adverbo).

Historio. Sama finaĵo tra la diversaj Eoj (1881-2, 1887, 1894; en la teksto de 1878 ne troviĝas adverbo derivita). En la reformpropono de 1894 *-e* funkcias kiel komuna finaĵo de adverboj kaj adjektivoj.

Deveno. (**1**) Preskaŭ unuanime oni serĉas la devenon en la L finaĵo de derivitaj adverboj funkcianta ĉe la adjektivoj de la l-a kaj 2-a deklinacioj. Ne malofte la L adverbo identas kun la Ea: *avare, certe, clare, honeste, iuste, pie, pure, vere* (Modrijan 25); kp ank. *bene* "bone", *mane*

"matene", *saepe* "ofte"; *latine loqui* "paroli latine" (Waringhien 1967, 17). Modrijan (p. 35) plue atentigas pri la forma simileco de la Ea adverba participo kaj la L ablativo absoluta: *patre disputante filius ridet* "dum la patro diskutas, la filo ridas". Grava estas ankaŭ la apogo de I (H), kiuj formas adverbojn per aldono de *-mente* (I *fortunatamente* "feliĉe", *segretamente* "sekrete", IH *finalmente* ktp). – (**2**) Oni ankaŭ citis (kiel "komplementan devenon") la slavajn adverbojn kun *-e* (Gregor p. 10 karakterizas la *-e* kiel "káj slava káj latina"), ekz. Po *dobrze* "bone", *wczes´nie* "frue" (Wajsblum Eologio 3/1951, 206; bulgaraj ekzemploj ĉe Atanasov Li k Ni 196). – (**3**) Inter aliaj malpli gravaj apogoj Collinson (Eologio 2/1950, 82) citas G *nahe* "proksime", *lange* "long(daŭr)e" kaj Li lokativon finiĝantan per *-e: paŝté* "poŝte". ¶ Io *-e* (< Eo). – Ie *-men* (mallongigo de F *-ment,* HI *-mente*). – Ia *-mente*; sufiĉe granda grupo da adverboj estas neregule formitaj per *-o* (*certo, presto* "rapide", *subito, toto* "tute" ktp), kredeble laŭ responda L modelo (*cito* "rapide", *raro* "malofte", *sero* "malfrue"), kaj iom malpli multnombra grupo montras *-e* (= adj.; ekz. *bastante* "sufiĉe", *forte, tarde* "malfrue".

L *-e* (pli frue *-ed*) estas apofonia formo de *o*-stema ablativo *-od* (> *-o,* vd. sub *-o* 2). Tiu kazo povas esprimi manieron (t.n. "ablativus modi"); orig. signifo do "rapidmaniere" ktp.

-I (infinitivo).

Historio: En la teksto de 1878 troviĝas inf. *konunigare* "kununuigi" (laŭ L *--are,* infinitivfinaĵo de la 1-a konjugacio). Ĉar *-á* tiam estis signo de prezenco, oni povus interpreti la formon kiel speciale prezencan infinitivon, supozanta aliajn vokalojn (ekz. **-ere, *-ire*) por aliaj tempoj (tiel Mattos, p. 22). Sed multe pli probable estas, ke Z ĝeneraligis la latinan (kaj italan) *-are* (kp *-r* ankaŭ en F [kaj H] infinitivoj). En 1881-2 aperas anstataŭe *-i* (ekz. *fakti* "fari", *margidz´i* "edziĝi", *pondi* "respondi", *trovi*). Oni tenu en memoro kion diris Z en 1894: "*r,* kiu estus pli internacia, prezentus malbonsonaĵon" (Eisto 2/1894, 19 = PVZ 3, 139). Ŝajnas ankaŭ logike, ke Z, akceptinte la tri kategorivokalojn *o,a,e,* serĉis analogan signon por la nomformo de la verbo. Kiel konate, *-i* estis konfirmita kiel definitiva infinitivsigno en 1887. En 1894 okazis nova ŝanĝo al *-a* (kredeble restaĵo de la origina *-are;* - *i* tiam estis utiligata kiel signo de pluralaj substantivoj).

Deveno. (**1**) Se oni rigardas L kiel ĉefan fonton de la kategorivokaloj *-o,-a,-e,* estas nature serĉi ankaŭ la originon de *-i* en tiu lingvo. Ni tiam trovas, ke la pasivaj infinitivoj finiĝas per *-i*: *vocari* "esti vokata", *aŭdiri* "esti aŭdata". En la 3-a konjugacio la finaĵo estas nur *-i: dici* "esti dirata", *regi* "esti regata". La deponentaj verboj uzas tiun infinitivon kun aktiva senco: *mori* "morti", *nasci* "naskiĝi", *sequi* "sekvi", *uti* "uzi": jen la fonto de la Ea *-i* laŭ Modrijan p. 27, Gregor p. 12, Yamasaki s.v. *-i*. – (**2**) Pruntvortoj el la latin(id)aj lingvoj ricevas en G la infinitivsufikson *-ieren* [-í:r-] (ekz. *distribuieren, marschieren*), en R *-irovat´* (ekz. *bombardirovat´*), en A (foje) - *ish* (ekz. *finish* "fini", *perish* "perei"), kies origino almenaŭ parte estas serĉenda en la romanaj infinitivoj kun *-ir* (F *fin/ir,* I *-ire*; FH *dorm/ir,* I *-ire*). Waringhien vidas en tiu komplekso la originon de Eo *-i* (vd. LV 44; 1967, 17). (**3**) Oni tamen ne povas neglekti alian fonton, kiun Z havis je dispono: la slavaj infinitivoj kun *-ti* (vd. spec. Kolker 315; ank. Scott, p. 74; Atanasov Li k Ni 196), ekz. R *idti* "iri", *nesti* "porti"; kp SK *ic´i* "iri", *znati* "scii"; Ĉe *jíti* "iri", *vedeti* "scii"; Slovena *piti* "trinki". Kp ev. Li *eiti* "iri", *miegoti* "dormi", *zinoti* "scii" (Collinson

Eologio 2/1950, 83; li tie citas ank. Hu *aludni* "dormi"). ¶ Io: inf. finaĵo *-r*, kiu kombiniĝas kun la tempaj vokaloj *a,i,o*: *amar* "ami", *amir* "esti aminta", *amor* "esti amonta". – IeIa: inf. finaĵo *-r*, aldonata al la verba (prezenca) stemo: *amar, currer, audir.*

Infinitivo estas la substantiva formo de la verbo (*"mi amas promeni" = "mi amas promenadon")*, kaj ĝiaj diversaj aperoj plej ofte devenas de kazformoj. L *-i* estas konsiderata dativa formo de sensufiksa subst. La aktiva inf.finaĵo estis origine *-se* (kp *esse* "esti"), kiu estas lokativa formo de *s*-stema subst. (la pas. *-ri* havas analogan originon). – La slavaj inf. havis en pSl finaĵon *-ti* (konservitan en Ĉe, SK, Slovena; en R mod. plej ofte *-t'*); ĝi estas orig. subst. formita per suf. *-ti* (kp L subst. *itio* "irado").

DEKLINACIO

-N (akuzativo).

Historio: En 1878, la manko de fleksio ĉe la refleksiva pronomo (*konunigare so* "kununuigi sin") implicas, ke ne troviĝis akuzativa finaĵo. En 1881-2, la personaj pronomoj kiel objekto havis la finaĵon *-l* (*mol, tol, rol* "min, cin, lin" ktp); krome Z en unu teksto (n-ro 7) eksperimente uzis tiun finaĵon ankaŭ por substantivoj kaj adjektivoj (ekz. *tal maljunal pial padrol kabropalal* "cian maljunan pian patron kadavropalan"). Tiu finaĵo ne ŝajnas baziĝi sur etnaj lingvoj ("verŝajne elektita el la nura vidpunkto de eŭfonio", Waringhien LV 56). Nur en 1887 aperas *-n*; en 1894 Z proponis forigi la akuzativon (vd. PVZ 3, 136).

Deveno: (**1**) La deveno de *-n* ŝajnas esti duobla, se oni konsideras la kutimajn fontlingvojn: (a) G akuzativo maskla, ekz. *den jungen Knaben* "la junan knabon", *den Menschen* "la homon", *einen Herrn* "(unu) sinjoron" (nom. *der junge Knabe, der Mensch, ein Herr)*; (b) Gr akuzativo mask.-fem.(-ntr.) de la l-a kaj 2-a deklinacioj, ekz. *ton lógon* "la vorton", *tên kórên* "la knabinon" (nom. *ho lógos, hê kórê)* – tiel Waringhien (LV 56; 1967, 18), Gregor (p. 9), Yamasaki s.v. -*n*. Scott (p. 74) kaj Mattos (p. 77) citas nur la grekan. Se oni krome konsideras Gr adjektivformojn, la simileco al Eo ankoraŭ pli frapas: kp *tên hierán bíblon* kun *la sanktan libron.* Cetere en Gr ankaŭ la kombinoj *-oin, -ain* troviĝas kiel finaĵoj (vd. sub *-j*). – (**2**) Oni tamen ne povas ekskludi, ke *-n* estas la rezulto de eŭfoniaj eksperimentoj flanke de Z (kp supre pri *-l*); la kombino *-jl* estante iom peza, *-jn* aperas kiel pli oportuna alternativo. – (**3**) Laŭ Jespersen (1928, 36) kaj Gopsill (p. 75), Z transprenis *-n* el la Pasilingua de Steiner (1885): *ton kingon* "la reĝon" (kontraste kun nom. *to kingo,* vd. Couturat & Leau 282). Nepruvebla hipotezo. – (**4**) [Brosoviĉ (1959, 11) atentigas pri kelkaj forme interesaj ekzemploj de la Li pseŭdokazo ilativo: *galvon* "en la kapon" (nom. *galvá*), *miestan* "en la urbon" (nom. *miêstas*). Kp ankaŭ la Li adverbojn *pirmyn* "antaŭen", *aukŝtyn* "alten", *gilin* "profunden" (Poŝka 1981).] ¶ Io: Se la rekta objekto antaŭas la subjekton, ĝi povas esti markita per *-n* (< Eo): *Lumon la suno donas a la tero.* – IeIa ne havas kazojn.

El HE akuz,. sing. *-m,* kp Sa *vr'kam*, L *lupum* "lupon" (nom. *vr'kas* resp. *lupus*), Gt *qinon* "virinon" (nom. *qino*).

-J (pluralo).

Historio: En 1878 Z uzis *-s* kiel pluralan signon de la difina artikolo kaj la substantivo (kredeble ankaŭ de adjektivoj): *las nacjes.* Per tio li elektis la plej disvastigitan pluralfinaĵon en la fontlingvoj (kp A *boys* "knaboj", F *garcons* s.s. [*-s* neprononcata], G *Jungens* s.s., [H

niños s.s.], L *pueros* "knabojn", Gr *paídes* "infanoj"), kvankam li poste kritikis *s* kiel akran sonon (PVZ 3, 137: "ofte ripetata 's' donas jam per si mem tro akran sonadon al nia lingvo"). En 1881-2, *-s* restis kiel plurala signo de femalaj vortoj (*princaŭs* "princinoj", *amentaŭs* "amantinoj"), sed la plimulto de la substantivoj kaj la adjektivoj, finiĝantaj en singularo per *-o* resp. *-a*, ricevis pluralan *-j* (*maj revoj* "miaj revoj", *kalaj guroj* "varmaj landoj"), kiu finaĵo kiel konate ĝeneraliĝis en 1887. (Eventuale *-s* fariĝis neebla, ĉar ĝi ne asimiliĝas kun la akuzativa finaĵo: Scott, p. 74.) La reformpropono de 1894 montras *-o* por singulara, *-i* por plurala substantivo (*j* ne ekzistis en tiu projekto, vd. PVZ 3, 137); la adjektivo ne havis deklinacion.

Deveno: (**1**) Krom *-s* nur unu iom internacia pluralsigno troviĝas en la fontlingva materialo, nome *-i* (vd. PVZ l.c.: "tia finiĝo ekzistas en diversaj lingvoj [ekzemple latina, itala, slavaj]"). Kp L (nom. de la 2-a dekl.) *pueri* "knaboj"; I *ragazzi* s.s.; R *mal'ĉiki* s.s.; Po *chl'opcy* [-i] s.s., ank. *-i* en ekz. *biskupi* "episkopoj". Aldonite al *-o*, tio donus **-oi*. Estas mia konvinko, ke Waringhien pravas supozante (LV 43; kp 1967, 18), ke nia *-j* estas rezulto de diftongigo de tiu kombino ("li nature mallongigis la *-i* ĝis *-j*"; kp Scott, p. 74: "*i* estas adoptita en la duonvokala formo *-j*". Z substrekas ke la *j* ne estas arbitra (PVZ l.c.). – (**2**) Tiu diftongo feliĉe koincidas kun Gr *-oi*, nom. plur. de la 2-a deklinacio (mask., malofte fem.): *koúroi* "knaboj", *ánthrôpoi* "homoj" (kp fem. *-ai*: *kórai* "knabinoj"); frape similas Gr *hai hieraí bíbloi* al Eo *la sanktaj libroj*. Do ne surprizas, ke pluraj esperantologoj indikis Gr kiel fonton de Eo *-j* (Atanasov Li k Ni 198, Yamasaki s.v. *-j*; kp Gregor p. 9). Pli bone ankoraŭ: por la Eaj kombinoj *-ojn, -ajn* (akuz. plur.) Z povis trovi analogaĵojn en Gr, kie *-oin, -ain* estas dualaj finaĵoj (gen., dat.), ekz. *toin ophthalmoín* "de [al] la okuloj", *oikíain* "de [al] du domoj". ¶ Io: subst. plur. *-i* (vd. supre); adj. sen fleksio. Kp Eo 1894. – Iela: subst. plur. *-s* (post konsonanto: *-es*); adj. sen fleksio.

Gr *-oi*/*-ai* same kiel L *-i* devenas de la nom. plur. de HE pronomoj, ekz. **toi* (mask.), **tai* (fem.) "tiuj".

KONJUGACIO

1. La finitivaj finaĵoj kun *-s*

En la definitiva Eo, la finaĵoj *-as -is -os -us* esprimas tri tempojn (prezenco, preterito, futuro) kaj unu modon (kondicionalo). Krom la kvar cititaj finaĵoj estas konsiderenda ankaŭ *-es* (imperfekto), vd. LZ I, 351: "la imperfekto, kies finiĝo estis '-es', restis en la lingvo ankoraŭ en la komenco de 1887". La vokaloj do funkcias kiel temp-/(mod-)indikiloj; la *-s* povas esti konsiderata kiel signo de finitivaj verboformoj (escepto estas la imperativo, vd. sube 2).

1 a. La temp-/(mod-)indikaj vokaloj

Historio. 1878: prez. *-á* (*está* "estas", *debá* "devas"). Tiu *-a* estas kredeble samorigina kun *a* en la posta finaĵo *-as*. La akcento estis necesa por diferencigo disde la adjektiva *-a*. – Ceteraj tempoj nekonataj.

1881-2: prez. *-é* (laŭ Mattos p. 35 el la 2-a latina konjugacio, ekz. *habet* "(li/ŝi) havas"; la kaŭzo de la ŝanĝo kompare kun 1878 estas nekonata); impf. *-á;* perf. *-u*; fut. *-uj*; kond. *-as* – ĥaosa formaro, kies originoj estas malfacile diveneblaj. Mattos havas diversajn sugestojn (p. 36 s.): impf. el L impf. *amabat* "amis", *legebat* "legis"; perf. el L *fui* ,I *fu* "mi estis"; fut. el F *je donnerai* "mi donos" ktp (kun sonŝanĝoj, ĉar *a* kaj *i* havis aliajn rolojn); kond. el F *aimerais* "[mi,ci] amus"? aŭ el la L 'kondicionalo', t.e. imperfekto kon-

junktiva: *amares* "ci amus" (*e* > *a*, ĉar *e* estas prezenca vokalo)? aŭ identa kun la imperfekta *a* kun aldonita *s* kiel distingilo?

1887: La *-s*, aperinta en la kond. de 1881-2, disvastiĝas al ĉiuj tempoj: prez. *-as*, impf. *-es*, pret. *-is*, fut. *-os*, kond. *-us*.

1894: *-s* estas anstataŭigata per *-n* (kredeble el la 3-a pers.plur., ekz. en F *ils aiment* "ili amas", I *amano* s.s., L *amant* s.s., G *sie lieben* s.s.): prez. *-en* (kp *-é* en 1881-2); pret. *-in*; fut. *-on*; kond. *-un*; (imperativo *-an*).

Deveno: (**1**) Frapas, ke en la definitiva Eo la kvin vokaloj aperas en alfabeta ordo laŭ tiu paradigma skemo, kiu estis normala en la gramatiklibroj de la latina kaj la okcidenteŭropaj lingvoj, nome prezenco, imperfekto, perfekto/preterito, (pluskvamperfekto), futuro, kondicionalo (la lasta ne ekzistas en L). Tio apenaŭ povas esti hazardo.
Historiaj esploroj montris, ke Z tute ne estis la unua lingvokonstruanto kiu uzis la vokalojn *a/i/o* por marki la ĉefajn tempojn (vd. spec. la sinoptikon en Mattos, p. 46). En Faiguet, Langue nouvelle (1765): prez. inf. *-as*, perf. inf. *-is*, fut. inf. *-os*; prez. *-a*, impf. *-é*, perf. *-i*, pluskv. *-o*, fut. *-u* (kp Drezen, p. 49; Bausani 109; Couturat & Leau, 240; Golden 1980, 292). En de Rudelle, Pantos-dimou-glossa (1858): prez. *-a*, pret. *-i*, fut. *-o*; same en Reimann, Langue internationale étymologique (1877). En Courtonne, Langue internationale néo-latine (1884): prez. *-am*, pret. *-em*, fut. *-om*, konjunktivo *-um* (*-m* estas la finaĵo de la 1-a pers. sing.). Evidente "ĉiu [el ili] simple utiligis la vokalan serion" (Mattos, p. 46). Kelkaj interlingvistoj atribuas la Eajn konjugacivokalojn al pruntepreno de iu el tiuj projektoj (ekz. Gopsill, p. 75; kp Jespersen 1928, 107). Ni ne eksplicite scias, ĉu Z konis iun el tiuj antaŭuloj, sed ekzistas certaj indikaĵoj, ke li estis teorie bone preparita ĉe la kreado de sia lingvo. Vd. spec. Golden 1980, 279-299 pri "eblaj planlingvaj fontoj de Eo" kaj Stojan 1953, 38 (ambaŭ opinias, ke Z ne ellaboris Eon tute sendepende de aliaj projektoj). Kion ni certe scias, estas ke Z bone konis Volapük de 1879 (vd. liajn artikolojn "Esperanto kaj Volapük" en Eisto 1-2/1889, 4 k 7/1890). Ankaŭ Vp faras analogan uzon de la vokala serio; oni nur atentu, ke ĝi posedas ankaŭ la germanajn metafoniajn vokalojn *ä (a), ö (o), ü (u)*; krome ĝiaj tempindikaj vokaloj estas prefiksaj: prez. *a-* (nur en pasivo: *palöfob* "mi estas amata", kp *löfob* "mi amas"), impf. *ä-* (*älöfob* "mi amis"), perf. *e-*, pluskv. *i-*, fut. *o-*, fut. ekz. *u-*. Rektan influon de Vp al Eo supozas Berger (Currero international mar-apr 1961) kaj Silfer (PL 7/1983, 7; hezite).

Eĉ se oni flankelasas eventualajn influojn de aliaj projektoj/lingvoj, la alfabetorda teorio restas, laŭ mia opinio, la plej verŝajna klarigo de la Eaj tempindikiloj. Laŭ Waringhien (LV 57), tiu teorio estis lanĉita de Bastien; kp cetere spec. Broadribb en International Language Reporter 56/1970, p. 5. La ideo evidente estis freŝa en la menso de Z, ĉar ĝi estas tute fremda al la versio de 1881-2. Akceptante ĝin, ni devas konscii, ke ĝi implicas "sistemŝanĝon" kompare kun la vortkategoriaj finaĵoj, kiuj ja laŭ komuna opinio baziĝas sur fenomenoj en la fontlingvoj. – (**2**) Kompreneble oni provis trovi en la fontlingvoj verbajn formojn, kiuj povus funkcii kiel apogo por la *a-i-o-u*-serio. Tiel oni citis: por *-a(s)*: L *laudas* "ci laŭdas", *amas* "ci amas" ktp (2-a pers.sing. de la 1-a konj.), (H *tomas* "ci prenas"), Po (sub formo de *sz* [ŝ]): *kochasz* "ci amas"; kp de Beaufront 1925, 209: *a* karakterizas la prezencan infinitivon en LIH (LI *am/are*, H *-ar*), la prezencan indikativon en LIH (L *amas, amat;* I *parla, amano;* H *aman*), la prezencan participon en LFH (L *amant-*, F *aimant*, H *amando*); por *-e(s)*: F *j' aimais* [-mé]

"mi amis", imperfekto de *aimer* "ami" (kp Yamasaki s.v. *--as*); oni povus citi ank. *je trouvai* [-vé], pret. simpla de *trouver* "trovi"; por *-i(s)*: L *veni, vidi, vici* "mi venis, vidis, venkis"; F *je finis* "mi finis", *je vis* "mi vidis", *je mis* "mi metis"; I *fui* "mi estis", *ebbi* "mi (ek)havis", *trovai* "mi trovis"; por *-os*: L *lavabo* "mi lavos", *timebo* "mi timos", *amavero* (fut. ekz.) "mi estos aminta"; I *sarò* "mi estos", *avrò* "mi havos", *troverò* "mi trovos"; ank. He *jiqtol* "li mortigos" kontraste kun *qâtal* "li estas mortiginta" (Waringhien LV 58); por *-us* oni komparis la vokalon de A *should* [ŝud], *would* [ŭud], helpverboj de la kondicionalo.

Tamen en neniu el la cititaj ekzemploj la koncerna vokalo estas tempindika: la L *a* estas stemfina vokalo, kaj en prezenco troviĝas ankaŭ formoj kun *e* (*times* "ci timas") kaj *i* (*audis* "ci aŭdas"); la L *-o* kaj I *-ò* (fut.) estas envere finaĵoj de la 1-a pers.sing. ("mi"), same kiel *-i* en L *vidi* (1-a pers. sing. de perfekto; tamen, ĉar ankaŭ aliaj personoj en tiu tempo enhavas *i*: *vidisti* "ci...", *vidit* "li/ŝi...", *vidimus* "ni...", *vidistis* "vi...", oni povas certagrade diri, ke tiu vokalo dominas la koncernan tempon).

– Vd. spec. Modrijan p. 34, Atanasov Li k Ni 196, Yamasaki s.v. *-as*. (**3**) Interesan hipotezon prezentis Scott (p. 75) kaj Kolker (p. 315): La *-a-* originas en la prezenca participo, kie *-ant* estas tre internacia formo (vd. *-ant* sube). Komparo de L participoj perfektaj kiel *amatus* "amata" kun ekz. *punitus* "punita" donis poste *-i-* kiel pasinttempan vokalon, unue en la Ea participo (*-ita*), de kie ĝi transiris al la finitiva verbo (*-is*).

1 b. La -s kiel signo de finitiva verboformo

La deveno de la elemento *-s* estas necerta. Laŭ Gregor (p. 12) ĝi estas "kompreneble arbitra" kaj elektita ĉar tiu sono ne troviĝas vortfine aliloke en la lingvo. Kolker (p. 315) konstatas ke *-s* estas "uzata en la konjugacio de la plimulto de la hindeŭropaj lingvoj". Estas facile citi fontlingvajn verbformojn finiĝantajn per *-s* en diversaj personoj: 2-a pers. sing.: F *tu aimes* "ci amas", L *legis* "ci legas", Gr *ly´eis* "ci solvas", R (sub formo de *ŝ*) *ĉitaeŝ* "ci legas" (kp G *du bist* "ci estas"); 3-a pers. sing.: A *he loves* "li amas"; 1-a pers. plur.: F *nous sommes* "ni estas", L *legimus* "ni legas"; 2-a pers. plur.: F *vous êtes* "vi estas", L *legitis* "vi legas". Eble tiu vasta gamo impresis Z tiel, ke li decidis ĝeneraligi tiun finkonsonanton.

Eventuala rivalo povus esti *-t*, ofta en la 3-a pers. sing. (F *il finit* "li finas", G *er stellt* "li metas", R *on sidit* "li sidas", L *amat* "[li/ŝi] amas", Gr *estí* "[li/ŝi] estas"), kiun Z tamen klare malaprobis: "ni ne povas tamen akcepti la 't', ĉar ĝi malbonigus la harmonion en nia lingvo" (PVZ 3,139). – Alia kandidato, *-n* (3-a pers. plur.: F *ils parlent* "ili parolas", G *sie stellen* "ili metas", I *amano* "ili amas", L *amant* "ili amas", Gr *stérgousin* "ili amas"), kiun Z akceptis en 1894, estis neebla en 1887 pro la akuzativa *-n*. ¶ (Pri la konjugacio de la aliaj L.I., vd. sube post la ĉapitro pri la imperativo.)

En HE, la finitivaj verbfinaĵoj estis: 1-a pers. sing. *-ô* aŭ *-mi* (**bherô* "mi portas", **esmi* "mi estas"), 2-a pers. sing. *-si* (**bheresi* "ci portas", **essi* "ci estas", kp Gr [Hom.] *essí*), 3-a pers. sing. *-ti* (**bhereti, *esti*, kp Gr *estí*); 1-a pers. plur. *-mes* (**bheromes, *smes*), 2-a pers. plur. *-te* (**bherete, *este*), 3-a pers. plur. *-nti* (**bheronti, *snti*).

2. La imperativo

Historio. 1878: *-ó* (*kadó* "falu"), laŭ Mattos (p. 21) el L fut. imp. (3-a pers. sing.) *esto* "(li/ŝi) estu", *audito* "(li/ŝi) aŭdu", tamen "kun franca prononco". [Responda formo cetere troviĝas ankaŭ en Gr: *éstô* "(li/ŝi) estu", *lyétô* "(li/ŝi) solvu".] – 1881-2: *-ó* (= 1878). La akcentsigno estis nun absolute necesa por dife-

rencigi disde la *-o* substantiva. – 1887: *-u* (vd. sube). – 1894: *-an* kun *-n* laŭ la tempaj formoj; *a* estis la lasta libera vokalo (Waringhien LV 57). La formo estas evidente ne inspirita de la fontlingvoj.

Deveno: (**1**) En la lingvoj certe sciataj de Z troviĝas du formoj, kiuj povas esti modelo por *-u*: (a) Gr mediala-pasiva imperativo (2-a pers. sing.), finiĝanta per *-ou* [u:]; tiu origine pasiva formo ricevas aktivan sencon ĉe la deponentaj verboj: *boúlou* "volu", *ergázou* "laboru" (Scott p. 74; Mattos p. 64). – (b) He *-u*, konata en la esprimo *halelu(ja)* "laŭdu (Dion)" (Waringhien LV 58; Gregor, p. 12)); kp ekz. *ŝim'u* "aŭskultu". Analoga formo en Ar, ekz. *ektebu* "skribu", *ismi'u* "aŭskultu" (Laskin, LInt 10-11/1896, 201). Estas malfacile elekti inter (a) kaj (b); eble oni donu prioritaton al (a), ĉar Gr probable ludis rolon ĉe la kreado de aliaj finaĵoj (vd. *-j, -n*). – (**2**) Laŭ Trunte (Eo 6/1971, 104 s.; ank. Poŝka 1981), oni konsideru devenon de Li konjunktivo de la 3-a persono *-tu: matytu* "(ke) vidu", *sakytu* "(ke) diru", *baustu* "(ke) punu". Malfortigas tiun hipotezon la fakto, ke volitivo (= konjunktivo) estas nur sekundara funkcio de la Ea *u*-formo, dum imperativo estas la primara. – (**3**) Oni ankaŭ konstatis, ke "*u* estas la lasta libera vokalo" (Waringhien LV 57), *a/e/i/o* estante okupitaj kiel kategoriindikaj finaĵoj, kaj ke ĝi estas "surogato por ĉiu alia neoportuna vokalo" (Yamasaki s.v. *-u*). Tamen la okazo de *-u* estas unika, ĉar ĝi kontraste kun la aliaj vokaloj indikas subkategorion (Silfer, PL 7/1983, 7). – (**4**) Tro serĉata estas la mencio de Mattos (p. 64) de L prezenca konjunktivo *legamus* "ni legu". – (**5**) Waringhien (1967, 28) karakterizas *-u* kiel 'formo pli mallonga kaj pli energia' ol la aliaj (tempaj) formoj, do aludas ian sonsimbolismon. ¶ Io: prez. *-as,* pret. *-is,* fut. *-os,* kond. *-us* (< Eo); krome infikso *-ab-* (laŭ de Beaufront 1925,133 el L imperfekto *vocabam* "mi vokis", ankaŭ kvazaŭa radiko de la helpverboj F *avoir* kaj I *avere* "havi"), per kies helpo estas formata pluskv. (*klamabis* "estis vokinta") kaj fut. ekz. (*klamabos* "estos vokinta"). Imperativo *-ez* (< F, ekz. *prenez* "prenu"). Ie: prez. = nura verba stemo: *yo ama* "mi amas", *yo crede, yo fini*; pret. *-t* (el A, ekz. *kept* "tenis", *kissed* [kist] "kisis", kaj G, ekz. *stellte* "metis"): *yo amat* ktp.; ceteraj tempoj per helpverboj: perf. *yo ha amat* (kp A *I have loved,* G *ich habe geliebt*), pluskv. *yo hat amat,* fut. *yo va amar* (< F *va,* ekz. *il va arriver* "li estas venonta"), kond. *yo vell amar* (el L *vellem* "mi volus"). Imperativo = prezenco: *ama!*. Volitivo per *mey* (< A *may*): *il mey venir* "li venu".

Ia: prez. = inf. minus *-r*: *io ama* "mi amas", *io crede, io fini*; pret. *-va* (el I, ekz. *amava* "li/ŝi amis"): *io amava, io credeva, io finiva*; fut. *-ra* (kp F *il finira* "li finos", I *amerà* "li/ŝi amos", H *ganará* "li/ŝi gajnos"): *io amara, io credera, io finira*; kond. *-rea* (kp F *j'aimerais* "mi amus", H *ganaría* "(mi/li/ŝi) gajnus", I *parlerei* "mi parolus"): *io amarea, io crederea, io finirea;* ceteraj tempoj per helpverbo *haber*: perf. *io ha amate,* pluskv. *io habeva amate,* fut. ekz. *io habera amate.* Imperativo = prezenco: *ama!* Volitivo per *que* "ke" kaj prez.: *Que il veni!* "li venu".

3. La participaj sufiksoj

Kontraste kun la finitivaj formoj kaj la imperativo, la etimologio de la participaj finaĵoj estas tute klara: ili konsistas el la respektiva tempa karakterizilo (*a, i,o*) kaj po unu diateza elemento: *-nt* por aktivo, *-t* por pasivo. Tio donas ses diversajn sufiksojn:

-ANT/ (ptc. prez. akt.).

Historio: (1878: Neniu participo konata.) – 1881-2 *-ent/: jubenta* "ordonanta", *kadental* "falantan", *pregenta* "preĝ-

anta", *revionente* "revenante". Etimo: L ptc.prez. kun stemo *-ent*: *hab/ens -entis* "havanta", *fer/ens -entis* "portanta". – 1887: *-ant,* vd. sube. – 1894: *-ente* .

Deveno: La elemento *-nt* estas signo de aktiva participo en la plej multaj branĉoj de la HE lingvofamilio. Sed ankaŭ la kombino *-ant* estas tre ofta, ekz. en F, kie ĝi estas la sola sufikso de prezencaj participoj: *aimant* "amanta", *finissant* "finanta", *prenant* "prenanta". Kp spec. L *-ans -antis* (stemfino *-ant*): *amans* "amanta", *laudans* "laŭdanta"; I *-ante*: *amante, cantante* (káj L káj I havas tamen paralelajn formojn kun stemfino *-ent* en la sama funkcio, kp 1881-2 kaj 1894 supre). Grave estas, ke la romanaj formoj (ank. H: *amante, corriente* "kuranta") disvastiĝis internacie en multaj pruntvortoj, vd. la ps-sf *-ant, -ent.* Kp plue Gr *ly´ont-* "solvanta" (stemformo) kaj ĝermanajn prez.ptc., originte samsufiksajn: G *liebend* [-nt] "amanta", *stellend* [-nt] "metanta", (Sv *kallande* "vokanta"). Fine Brozoviĉ (NBg 1/1959, 11) citas apartenantajn Li formojn: *nẽšanti* "portantino" (*nèšti* "porti"), *mylinti* "amantino" (*mylė́ti* "ami").

Ĉe tia riĉeco de formoj estas malfacile distingi, kiu estas la primara fonto. Gregor (p.12) indikas L kaj F, Kolker (p. 315) L kaj I kiel fontlingvojn por *-ant.* Ŝajnas probable, ke Z unue aplikis L *-ent* (eble kun konsidero al G *-end*), sed poste, ŝanĝante al *-ant,* sin apogis sur L kaj F. Kp supre 1a, Deveno (3). ¶ Io *-ant/* (< Eo). – Ie *-nt,* Ia *-nte,* aldonitaj al la prezenca formo: *ama/nt* resp. *-nte; vide/nt* resp. *-nte*; verboj kun stemfina *-i* montras *-ient(e): audi/ent* resp. *-ente.*

El HE *-(e)nt,* sufikso de aktivaj participoj: **bheront-* "portanta", kp Sa *bharant-*, Gr *phér/ôn -ontos,* L *fer/ens -entis,* Gt *bairands*; **sent-* "estanta", kp Sa *sa(n)t-* "estanta", Gr dial. *éntes* "estantaj", L *prae-sens* "ĉeestanta" (kp *prezenti*). Kp la ps-sf *-ant, -ent.*

-INT/ (ptc. pret. akt.).

Historio: (1878, vd. *-ant/*). – 1881-2: *-ag/: mortaga* "-inta", *dekastage* "malĉastiginte". La sufikso ŝajnas iel ligita kun L *agere* "agi, fari", eble elektita por signi la faktan finitecon de la ago. Laŭ Mattos (p. 36) ĝi estas "deformo de latinaj participoj", ekz. *actus* "farita", *factus* s.s. – 1887: *-int/,* vd. sube. – 1894: nuligita kiel nebezonata (vd. PVZ 3, 140).

Deveno: Kunmetita el *-i-*, signanta pasintecon (vd. 1 a supre) kaj *-nt,* sufikso indikanta aktivan participon (vd. sub *-ant*). Kp Kolker p. 315: "Havante la paron *at-it,* restis plenigi la malplenan ĉelon kaj, analogie al *-ant,* krei la sufikson *-int*". ¶ Io: *-int/* (< Eo). – Ie: mankas; povas ĉe bezono esti esprimata per *hant* (ptc. de *har,* helpverbo por preteritaj tempoj) plus ptc.perf., ekz. *hant videt* "vidinte", kp F *ayant vu.* – Ia: mankas.

-ONT/ (ptc. fut. akt.).

Historio: (1878, vd. *-ant/*). – 1881-2: Ne troviĝas en la tekstoj. – 1887: *-ont/,* vd. sube. – 1894: nuligita kiel nebezonata (vd. PVZ 3, 140).

Deveno: Konsistas el *-o-*, signo de estonteco (vd. 1 a supre) kaj *-nt,* sufikso indikanta aktivan participon (vd. sub *-ant*). Kp Kolker p. 315 (kp *-int/*): "laŭ ia analogio estis plenigitaj la du sekvaj ĉeloj kaj formitaj la futuraj participoj kun la sufiksoj *-ont* kaj *-ot*". Tamen *-ont* koincidas kun la stemfino de Gr aktivaj futuraj participoj (Scott, p. 75), ekz. *ly´sont-* "solvonta", *ópsont-* "vidonta", sed en tiuj formoj la futura morfemo estas efektive *-s-* (kp *ly´ont-* "solvanta"), *-o-* estas stemfina vokalo kaj *-nt* sufikso de aktiva participo. ¶ Io *-ont/* (< Eo). – IeIa: mankas.

-AT/ (ptc. prez. pas.).

Historio: (1878, vd. *-ant/*). – 1881-2 *-it/: esté odita* "estas aŭdata", *estu vidita* "estis vidata". La formo estas evidente

antaŭulo de la preterita pasiva participo de 1887, vd. *-it/* sube. Oni povas kompari multajn L ptc.perf. kun *-it,* el kiuj kelkaj okaze povas signifi "-at", ekz. *debitus* "ŝuldata". – 1887 *-at/,* vd. sube. – 1894: nur unu pasiva participo (*-ate*), ĉefe uzota kiel participo perfekta (vd. sub *-it*).

Deveno: Konsistas el *-a-,* karakterizilo de prezenca tempo (vd. 1 a supre, kp *-ant/*) kaj *-t,* signo de pasiva participo. Tiu signo havas vastan apogon en la fontligvoj, ekz. L *amatus* (fem.: *amata*), *laudatus, finitus, scriptus* "skribita"; A *caught* "kaptita", *sent* "sendita", *baked* [beikt] "bakita"; F *dit* "dirita", *écrit* "skribita", *fait* "farita"; G *geliebt* "amata", *gestellt* "metita", *erzählt* "rakontita"; I *amato* (fem.: *amata*), *occupato, punito, scritto* "skribita"; R *bityj* "batita", *zakrityj* "fermita", *brityj* "razita", *umityj* "lavita" (R ekzemploj laŭ Kolker, p. 315); krome L *-t* en A kaj G fremdvortoj, ekz. A *definite* "decidita", *intricate* "komplikita", G *parat* "preparita, preta". Kp ank Gr (deverbaj adj.) *lytós* "solvita", *baptós* "baptita", *agapêtós* "amata". Rimarku speciale la kontrastantajn parojn R *fabrikant: fabrikat, adresant : adresat,* forme koincidantaj kun Eaj participoj (Kolker l.c.). La *t* havas, kiel la ekzemploj montras, precipe pasinttempan signifon, sed la asociiĝo de *-ant/-as* kun la prezenca tempo difinas ankaŭ la sencon de Eo *-at.* ¶ Io *-at/* (< Eo). – IeIa havas nur unu pasivan participon, vd. sub *-it.*

La latin(id)a kaj ĝerm. *t* el HE *-t,* sufikso formanta deverbajn adjektivojn (nom. *-tós*), ekz. **ste'tós* "staranta" (kp Sa *sthitás,* Gr *statós,* L *status*), **sjutós* "kudrita" (kp Sa *syutás,* L *sutus,* Li *siútas,* Sl ant. *sitŭ*); plue ekz. Sa *bhrtás* "portita", *paktás* "kuirita", Gt *salboths* "ŝmirita", Li *dírbtas* "laborita".

-IT/ (ptc. pret. pas.).

Historio: (1878, vd. *-ant/.*) – 1881-2 *-ass/* : *faktassa* "farita", *kojpassa* "komencita", *pallassa* "parolita". Kredeble farita laŭ unu el la manieroj formi L perf.ptc.: *missus* "sendita", *pressus* "premita" (Mattos, p. 36); *-a-* laŭ *-ag/a* (vd. *-int/*)? Ekzistas en la 'eksperimenta' teksto n-ro 7 unu ekzemplo de *-at/a: blobalbata* "kontraŭbalbutita". – 1887 *-it/,* vd. sube. – 1894 - *ate,* ununura pasiva participo (etimologio, vd. *-at/*).

Deveno: Konsistas el *-i-,* karakterizilo de pasinta tempo (vd. *-is* en 1 a) kaj *-t,* signo de pasiva participo (vd. sub *-at/* supre). La kombino *-it* forme koincidas kun multaj, ĉefe latin(id)aj perfektaj participoj, ekz. L *auditus, finitus, perditus;* I *finito, punito, sentito* "aŭdita"; F *écrit* "skribita", *fait* "farita"; (H *escrito* "skribita"). Kp ank. la R ekzemplojn cititajn sub *-at/.* Semantike, la *it*-participoj en la fontlingvoj normale rilatas al pasinta tempo; en Eo ilia signifo estas difinita laŭ la senco de la du elementoj *i* kaj *t.* ¶ Io: *it/* (< Eo). – Ie *-t* (*amat, videt, audit*). – Ia *-te* (*amate, vidite, audite*).

-OT/ (ptc. fut. pas.).

Historio: (1878, vd. *-ant/.*) – 1881-2: mankas. – 1887 *-ot/,* vd. ĉi-apude. – 1894: nuligita kiel nebezonata.

Deveno: Konsistas el *-o-,* karakterizilo de futuro (vd. *-os* en 1 a) kaj *-t,* signo de pasiva participo (vd. sub *-at/* supre). – Gr posedas participon kun sufikso *-ot/* (Bianchini 50) sed kun preskaŭ mala signifo (ekz. *lelykót-* "solvinta", ptc. perf. akt.). ¶ Io *-ot/* (< Eo). – IeIa: mankas.

KORELATIVOJ

Rim. Vidu ankaŭ la unuopajn korelativajn vortojn sur ilia laŭalfabeta loko en la vortaro; oni trovas tie indikojn pri unuaj aperoj kaj ekvivalentojn en la reformpropono de 1894 kaj en la aliaj L.I.

1. Fontlingvoj

Pluraj el la fontlingvoj posedas seriojn da interrespondaj pronomoj kaj adverboj, kiuj povis inspiri Z al lia korelativa sistemo (kp Mattos, p. 59 s.): A demandaj *where* "kie", *what* "kio", *when* "kiam" rilate al montraj *there* "tie", *that* "tio", *then* "tiam"; F demanda *quel* "kiu, kia" rilate al montra *tel* "tia"; G demandaj *wer* "kiu", *was* "kio", *wessen* "kies", *wann* "kiam", *warum* "kial" rilate al montraj *der* "tiu", *das* "tio", *dessen* "ties", *dann* "tiam", *darum* "tial"; I demandaj *quale* "kiu, kia", *quanto* "kiom" rilate al montraj *tale* "tia", *tanto* "tiom"; Po demandaj *jaki* "kia", *jak* "kiel" rilate al montraj *taki* "tia", *tak* "tiel"; L demandaj *qualis* "kia", *quantum* "kiom", *quot* "kiom da" rilate al montraj *talis* "tia", *tantum* "tiom", *tot* "tiom da" (notu spec. la nedifinan serion kun pref. *ali-*: *aliquis* "iu", *aliquid* "io", *aliquantum* "iom", *aliquot* "iuj", *aliqua* "iel", *aliquo* "ien"). Speciale oni konsideris R (Duc Goninaz, p. 53) kaj Gr (Waringhien 1967, 20, kp Holzhaus p. 233-235) kiel inspirfontojn de Z. En R ni trovas ekz.: *to* "tio", *ĉto* "kio", *ĉto-to* "io", *niĉto* "nenio"; *kto* "kiu", *kto-to* "iu", *nikto* "neniu"; *takoj* "tia", *kakoj* "kia", *kakoj-to* "ia", *nikakoj* "nenia"; *tak* "tiel", *kak* "kiel", *kak-to* "iel", *nikak* "neniel"; *togda* "tiam", *kogda* "kiam", *kogda-to* "iam", *nikogda* "neniam", *vsekogda* "ĉiam"; *stol'ko* "tiom", *skol'ko* "kiom", *neskol'ko* "iom", *niskol'ko* "neniom" (vd. Holzhaus l.c., kie ankaŭ estas listigitaj korelativoj de aliaj slavaj [bulgara. ĉeĥa, serba, slovaka] kaj baltaj [latva, litova] lingvoj plus la finna). En Gr ni trovas ekz.:

DEMANDAJ: *tís* "kiu", *pósos* "kiel granda", *poíos* "kia", *pêlíkos* "kiom aĝa", *poú* "kie", *poí* "kien", *póte* "kiam", *pôs* "kiel";

NEDIFINAJ: la samaj vortoj sen akcento (enklitikaj);

MONTRAJ: *tosós(de)* "tiel granda", *toiós(de)* "tia", *têlikós(de)* "tiel aĝa", *tóte* "tiam", *hoútôs* "tiel";

RILATIVAJ: *hos* "kiu", *hósos* "(tiel granda) kiel", *hoíos* "(tia) kia", *hêlíkos* "(tiel aĝa) kiel", *hoú* "kie", *hoí* "kien", *hóte* "kiam", *hôs* "kiel".

Rilate al la semantiko de la diversaj serioj oni rimarku, ke en AFIL la demandaj kaj rilativaj pronomoj/adverboj havas identan bazon.

2. Historio

La Ea korelativa sistemo ekzistis jam en la versio de 1881-2 (vd. tabelojn en Mattos p. 32, PVZ 5, 152, Cash p. 11; kp LV 42), kredeble tamen kun manklokoj. La jenaj vortoj estas atestitaj: nedifinaj: *kan* "iam", *kom* "iom"; montraj: *fo* "tio", *fu* "tiu", *fa* "tia", *fi* "tie", *fe* "tiel", *fej* "tial", *fan* "tiam"; demandaj/rilativaj: *kvo* "kio", *kvu* "kiu", *kva* "kia", *kve* "kiel", *kvan* "kiam"; kolektivaj: *c'io* "ĉio", *c'iu* "ĉiu", *c'ii* "ĉie", *c'ian* "ĉiam"; negativaj: *fio* "nenio", *fiu* "neniu", *fian* "neniam".

Neniu posesiva formo estas atestita. (Rim.: En la "eksperimenta" teksto n-ro 7 la demandaj/rilativaj vortoj havas la mallongajn formojn *ko, ku, ke* ,vd. PVZ 5, 116 s. kaj LV 27 s. kaj 41.)

La deveno de la formelementoj de tiu sistemo estos pritraktata kune kun tiuj de la definitiva tabelo (1887-90). Ili estas detale komentitaj de Mattos, p. 32-34.

En Un 1887 ne ekzistas korelativa tabelo sed troviĝas korelativaj vortoj en la aldonita vortara folio (mankas *ĉial, ĉiel, ĉies, ĉiom, nenial, neniom, ties*). La unua, kiu tabeligis la vortojn, estis Einstein (N-ro 15 1888, 10); mankas la *es*-serio kaj *ĉial, ĉiel, ĉiom, nenial, neniom* (kiel ankaŭ en Eisto 2/1889, 14). La tabelo aperas kompleta en 1890 (PR, p. 28). Vd. detalojn en Kawasaki, Origino de Korelativa Tabelo, Oomoto sept-dec 1975, 118-120. En 1894, Z proponis nuligi la korelativan sistemon, adoptante ĉiun vorton aparte, bazante sin sur la fontlingvoj (vd. sub la respektiva korelativo en la vortaro). Ankaŭ en 1905 Z metis la korela-

tivan tabelon inter la ŝanĝendaĵojn (LZ I, 19 = PVZ 7, 178; kp Holzhaus, p. 237); en 1906, tamen, li skribas: "Vi scias, ke en 1894 mi mem volis elĵeti ĉiujn arbitre elpensitajn vortojn, sed poste mi konvinkiĝis, ke tio ĉi estas tre granda eraro... certa nombro da tiaj arbitraj vortoj estas absolute necesa" (letero al Javal, LZ I, 274 = PVZ 7, 344 s.). Serĉante la etimojn de la korelativaj vortoj gravas teni en memoro, ke Z l.c. parolas pri "arbitraj vortoj"; li ankaŭ skribis en 1894 pri la samaj: "Ĉe la kreado de tia interrilata tabelo, kiu ekzistas en nenia lingvo, mi kompreneble devis **elpensi** la vortojn" (Eisto 2/1894, 19 = PVZ 3, 141). Do ne estas nepre necese serĉi ekzaktan modelon por ĉiu unuopa vorto; tie ĉi temas pli pri **inspiro** ol pri **imito**.

3. La *i*-elemento

3 a. La i kiel komuna bazo de korelativoj

Ĉiu el la 45 korelativaj vortoj enhavas la vokalon *i*, ĝenerale antaŭiratan de prefikso kaj sekvatan de sufikso; ĝi do funkcias kiel kvazaŭbazo de tiuj vortoj. Tiu -*i*- aperas deveni de la 1881-aj korelativoj, kie ĝi troviĝis en du serioj (*c´i*- "ĉi-" kaj *fi*- "neni-"; la samepoka loka sufikso -*i* estas alia afero). Laŭ Mattos (p. 33) oni por la kolektiva pronomo atendus **c´/o* (etimoj: F *chacun*, I *ciascuno* "ĉiu"), sed apartenanta adverbo **c´/i* "ĉie" kolizius kun *c´i* "ĉi". Z tial aldonis *i* (kredeble inspirita de la I skribo *ci*-), el kio rezultis *c´i/o* "ĉio", *c´i/i* "ĉie" ktp. La saman aldonon li devigite utiligis en *fi*- "neni-" por eviti kolizion kun la *f*-serio (*f/o* "tio" ktp). Verŝajne Z rimarkis la avantaĝon de intermetita vokalo (anstataŭ igi la sufikson senpere sekvi la prefikson); ĝi ekzemple permesis per akcentado emfazi la koncernajn vortojn. En 1887 li tial ĝeneraligis -*i*-. Laŭ Mattos (p. 57) Z vidis en tiu nova -*i*- ankoraŭan rekonilon de pronomoj (kp *mi, oni* ktp) – neprobable, ĉar envorta vokalo apenaŭ povas servi kiel vortkategoria karakterizilo; krome ja temas ne nur pri pronomoj sed ankaŭ pri ne malmultaj adverboj.

La fontlingvoj proponis plurajn formojn, kiuj povis plifortigi la tendencon al enmetado de *i*: F *qui* [ki], I *chi* [ki], L *quis* "kiu"; L *aliquis* "iu", *illíus, istíus* "ties", *cuius* "kies" ktp. Kp spec. Gr *po/í/os* "kia", *to/í/os* "tia", kie la -*i*- ŝajnas ludi rolon similan al tiu en la Eaj korelativoj.

3 b. La i kiel signo de nedifineco

Laŭ mia opinio la *i*-serio (*iu, io, iam* ktp) povas funkcii kiel nedifina ĝuste per la foresto de prefikso ('prefikso nul'). Tio ŝajnas al mi kongrui kun la pritrakto de la korelativaj vortoj en la Za Ekzercaro (§ 30).

Ne mankas, tamen, provoj atribui al *i*- specialan sencon de nedifineco en tiu ĉi serio: (a) *i*- estas prenita el G *irgend ein* "kiu ajn" (Waringhien LV 60, kp 1967, 19; Holzhaus p. 233); tia procedo estas ankoraŭ nepruvita ĉe Z; (b) *i* estas nedifina same kiel -*i* estas la signo de nefinitiveco en la infinitivo (Scott, p. 111). En 1881-2 la nedifinaj korelativaj vortoj havis la prefikson *k*- (*k/an* "iam", *k/om* "iom"). Unuavide mirigas la simileco al la demandaj *kv/o* "kio", *kv/an* "kiam" ktp. Tamen simileco de tiuj du kategorioj troviĝas en pluraj fontlingvoj: (a) L *quis* "kiu" povas en certaj pozicioj signifi "iu", ekz. *si quis...* "se iu..."; kp ank. la kunmeto *aliquis* "iu". (b) Gr havas la saman vortojn por ambaŭ: *tís* (kun akcento) "kiu", *tis* (sen akcento) "iu". (c) G *was* "kio" povas en certaj pozicioj signifi "io": *kannst du was erzählen?* "ĉu vi povas rakonti ion?"; kp A *I'll tell you what* "mi diros ion al vi". Mi tial pensas, ke Z deiris de la samaj vortoj por ambaŭ serioj, prenante *kv*- (L *qu*- [kŭ]) por la demanda, *k*- por la nedifina. Kp Mattos 34.

4. Korelativaj prefiksoj

Tri el la kvar prefiksoj havas vastan in-

ternacian bazon.

Ĉ- (kolektiva).

Kredeble bazita sur I *ciascuno* [ĉa-] "ĉiu", apogata de F *chaque, chacun* [ŝa-] s.s. (Scott, p. 111; Waringhien 1967, 19, LV 60; Duc Goninaz p. 37; Yamasaki s.v. *ĉi-*). Oni povas aldoni A *each* [i:ĉ] "ĉiu" (Waringhien kaj Duc Goninaz l.c., Polczynski 1912), se oni permesas al finsono de vorto fariĝi prefikso. La sugeston pri Po deveno (Holzhaus p. 233: "ĉ povus bone esti el pola wszedzie (ĉiuj)"; same Gregor p. 12) mi ne komprenas: nek la sono ([ŝ]) nek la pozicio en la vorto konformas. ¶ 1881-2 *c´-* [ĉ], vd. 3 a supre.

La FI vortoj estas rezulto de kruciĝo inter L vulg. **quisque-unus* "ĉiu unu" k **cata-unum* "po unu" (kp H *cada* "ĉiu"),; la lasta estas kunm. de Gr prep. *katá* kun distribua senco (kp ps-pf *kata-*) k L *unus* "unu".

K- (demanda kaj rilativa).

La fontlingvoj prezentas multajn vortojn de tiuj kategorioj komenciĝantajn per k-sono, ekz. L *qui* (dmd., ril.)/F *qui* (dmd., ril.)/I *chi* [ki] (dmd.), *che* [ke] (ril.) "kiu"; F *comment* (dmd.) "kiel", *quand* (dmd., ril.) "kiam"; I *come* (dmd., ril.) "kiel", *quanto* (dmd.) "kiom"; Po *kto* (dmd.) "kiu", *który* (dmd., ril.) "kiu", *kiedy* (dmd., ril.) "kiam"; R *kto* (dmd.) "kiu", *kotoryj* (ril.) "kiu", *kak* (dmd.) "kiel", *kogda* (dmd., ril.) "kiam". En tiu materialo estas eble trovi modelojn ankaŭ por la kombino *ki* (LFIPo). ¶ 1881-2 *kv-* (laŭ la prononco [kŭ] de L *qu*); vd. 2 supre.

Vd. *kiu* en la vortaro.

NEN- (negativa).

Pro plena internacieco la komencsono *n-* estis evidenta, kp A *nothing* "neni/o", F *nul* "-u", G *niemals* "-am", I *niente* "-o", Po *nic* "-o", R *nikto* "-u", (H *nada* "-o"), L *nullus* "-u". Sed la kombino **ni-* kaŭzus kolizion kun la persona pronomo *ni (nia!)*, kaj uzo de la simpla negacio estigus neakcepteblan hiaton (trafe Waringhien LV 60: "Zamenhof probable provis uzi la plenan negativan formon *ne* kaj, ĉar tiu kreus serion da tri sinsekvaj vokaloj, almeti post ĝi ripetitan n: *ne + n + i*"). Samloke (en piednoto) Waringhien tamen spekulativas pri "ia miksa formo inter F *non* kaj D [=G] *nein*" ĉar Z parolas pri "la prefikso *nen*" (Ekzercaro § 30, 6): eble Z uzis tiun esprimon nur ĉar *nen* pro sia konsisto (CVC) estas pli 'prefikseca' ol "la litero *k-*", "la litero *t-*" (aliaj esprimoj de Z samloke)? – Alie Mattos (p. 57): Z mallongigis la I femalan formon *nessuna* "neniu" al **nena,* al kiu li donis la bezonatan tabelan formon. (Mattos ankaŭ dum momento konsideris prunton de Vp *nen* "sen", do *neniu* = "sen iu", sed – certe prave – forlasis tiun hipotezon.) – Notindaj koincidoj: Yamasaki (s.v. *neni-*) mencias F *nenni* "ne", F ant. *nen,* proklitika formo de *non* "ne", kaj P *nenhum* [-n'-] "neniu". ¶ 1881-2 *fi-*, neklarigita (atestitaj formoj, vd. 2 supre). Ĝi donas impreson de plivastigo de la montra *f-*, sed tiuj kategorioj havas nenion komunan. Kp. 3 a kaj Mattos, p. 33.

Pri la nea *n-*, vd. *ne* en la vortaro.

T- (montra):

komencsono de montraj pronomoj kaj adverboj en multaj fontlingvoj, ekz. en la vorto por "tia": L *talis,* F *tel,* I *tale,* Po *taki,* R *takoj,* (H *tal*); kp Gr *toiósde.* Aliaj ekzemploj: L *tantum* "tiom", *tum* "tiam"; F *tant,* I(H) *-o* "tiom"; R *tak* "tiel", *to* "tio", *tot* "tiu". Skribe apogas A *this* "tio ĉi", *that* "tio", *then* "tiam", *there* "tie". Dentalo ankaŭ en G *der* "tiu", *dann* "tiam", *dort* "tie". ¶ 1881-2 *f-*, neklarigita (atestitaj formoj, vd. 2 supre). Post detala rezonado Mattos (p. 33) konstatas, ke *f* estis la sola ebla konso-

nanto (*t-* estis neebla pro *to* "ci", *m-p-r-s-v* pro aiaj personaj pronomoj, *b-d-g-h* pro diversaj prepozicioj; fine restis nur *c-f-z*: **c/a *c/o* estus fremda al la latinidoj ([ts] antaŭ *a,o*), *z* "li forlasis pro la malmultaj latinaj vortoj, kiuj komenciĝis per tiu sono"; li devis do adopti *f-* por la montra serio!). – Ĉu estus eble, ke la labiodentalo [f] reprezentas la lispan A sonon [th] en *thing* (kp la provojn prononci tiun sonon ĉe popoloj ne havantaj ĝin en sia fonemaro)?

Vd. *tio* en la vortaro.

5. Korelativaj sufiksoj

Por kelkaj el la sufiksoj la etimologio ŝajnas tute klara *(-a, -es, -o)*; ekzistas ankaŭ dubaj *(-am, -u)* kaj tute necertaj *(-al, -el, -om)* okazoj.

-A (kvalita).

Al la ecaj pronomoj Z donis la adjektivan finaĵon (kp ekz. Waringhien 1967, 19). ¶ 1881-2 *-a*: *f/a* "tia", *k/a* "ia", *kv/a* "kia".

Pri la etimologio de *-a*, vd. sub Kategoriaj rekoniloj.

-AL (kaŭza).

Nekonata etimologio. Almenaŭ du esperantologoj (Waringhien LV 61 kaj Mattos p. 56) rilatigas ĝin al L *quare* "kial" (envere du ablativoj: *qua re* "pro kiu afero?"). Tio klarigus la *a*, sed por la finkonsonanto oni devus supozi volapükecan konsonantŝanĝon *r > l*, pri kies motivo oni povas nur spekulativi ("najbara konsonanto" laŭ Mattos; "ĉar Z ne trovis la finan *r* bonsona" laŭ Waringhien; kp Vp *yel* el A *year*). Waringhien prezentas tute alian etimologion en 1967, 23: *al* estas varianto de *il* kun la karakteriza vokalo de *kaŭzo* (tamen *il* kaj *al* havas nenion komunan, nek sence nek funkcie). Pri *kaŭzo* pensas ankaŭ Murgin (BuE 8-9/1992, 22), kiu identigas *-al* kun la sufikso en L *caus/alis*, FH *-al*, I *-ale*, R *kauzal'nyj* "kaŭza". Pli originala ankoraŭ estas la klarigo de Scott (p. 111): aferezo kaj metatezo de slava *dla* "pro"! ¶ 1881-2 *-ej* (*k/ej* "ial", *f/ej* "tial"), etimologie obskura. Laŭ Mattos (p. 34) eble el A *why* [ŭai] "kial": la rezulto estus **kvaj*, sed la vokalo estis modifita por eviti kolizion kun la pluralo de *kva* "kia".

-AM (tempa), orig. *-an* (Un).

Por *-an* oni povas trovi modelon en F *quand* [kâ], IL *quando*, (H *cuando*) "kiam" (kp 1881-2 *kv/an*), ev. ankaŭ en G *dann* "tiam", *wann* "kiam" (vd. Waringhien 1967, 23; Mattos p. 34). La motivon por la ŝanĝo *-an > -am* Z prezentas jene: "por malegaligi la vortojn 'ian' etc." [t.e. la tempaj korelativoj] "kaj 'ia'n' etc." [t.e. la akuzativajn formojn de nedifinaj korelativoj] (Ald. 5 s. = PVZ 1, 93). La ŝanĝon proponis de Wahl, estonta aŭtoro de Occidental (LV 52, piednoto). Mi opinias, ke por Z temis nur pri anstataŭigo de unu nazalo per alia, sed oni kompreneble povas montri al la jama *jam* (< L *iam*) kaj kelkaj aliaj L tempadverboj (*tum* "tiam", *numquam* "neniam") kiel modeloj. Kp Waringhien 1967 l.c. – Laŭ Murgin (BuE 8-9/1992, 23) *-am* estas prenita el F *temps* [tã] "tempo" ("hibrido de la 'parola' kaj 'skriba'...formo").

-E (loka).

Kp 1881-2 *-i*: *k/i* "kie", *f/i* "tie", *c'i/i* "ĉie". Tiu *-i* baziĝas, laŭ Mattos (p. 34) sur L adverboj kiel *ibi* "tie", *ubi* "kie", *hic* "tie ĉi" (*-c* estas partikulo) kaj lokativoj de subst. kiel *domi* "hejme", *ruri* "en la kamparo" (kp ank. ekz. *Corinthi* "en Korinto"). Adoptante en 1887 la ĝeneralan bazon *-i-* por la korelativoj, Z ne povis konservi la lokan *-i* pro la malagrabla hiato *-ii* en la tuta serio. "Anstataŭ uzi por la lokaj adverboj novan finaĵon... Z atribuis al ili la manieran *-e*, kio devigis lin doni al la tabelaj manieraj

adverboj alian finaĵon" (Waringhien LV 60 s.). Tamen ne mankas apogo por *-e* kun loka signifo, kp spec. R *gde* "kie", *vezde* "ĉie", *nigde* "nenie" (Duc Goninaz, p. 37). Apartenas tie ĉi ankaŭ Po *gdzie, wszedzie* resp. *nigdzie* (Holzhaus p. 233). Oni ankaŭ menciu L lokativformojn kiel *Carthagine* "en Kartago".

La HE lokativo havis finaĵon *-i*, kp ekz. Sa *vârini* "en la akvo", Gr *oíkoi* "hejme", *ekeí* "tie". En L, mallonga *i* vortfine ŝanĝiĝis al *e* (kp Gr *antí* kaj L *ante* sub *antaŭ*).

-EL (maniera).

Necerta etimologio. Oni memoru, ke *-e* estas la ĝenerala karakterizilo de derivitaj adverboj. Por esprimi la plej tipan sencon de adverbo, nome maniero, Z en 1881-2 metis tiun *-e* en la korelativan sistemon: *f/e* "tiel", *kv/e* "kiel". En la sistemo de 1887, tamen, Z limigis ĝian signifon al loka (vd. *-e* supre). Ŝajnas prudente supozi, ke la *e* en *-el* estas identa kun la loka *e*. Z do aldonis *-l*, de kie? Mi hezitas akcepti la devenon de F *quel, tel* (ekz. Scott p. 111, Waringhien LV 61, Mattos p. 56) pro tio, ke tiuj semantike apartenas al aliaj serioj ("kiu, kia", "tia"). Waringhien maskas la diferencon skribante "kiela", "tiela"; Murgin (BuE 11/1992, 11) provas transponti ĝin pere de la F frazo *Quel est votre nom?* "**Kiu** estas via nomo?" kiu ja egalas al "**Kiel** vi nomiĝas?"; kp ank. F *quelque...que* "ki**el** ajn". Nu, mi koncedas ke la derivaĵo F *tellement* "tiamaniere" laŭsence taŭgas por tiu ĉi serio: ĉu tiu sola vorto estus la etimo de *-el*? (Same kiel por *-al,* Waringhien [1967, 23] havas alternativan etimologion por *-el*: varianto de la sufikso *-il* kun la karakteriza vokalo de la vorto *maniero.* Kp sub *-al.)* Ĉion konsiderinte, eble estas plej grave ke *-el* estas paralela al *-al* kaj eventuale povas esti farita laŭ tiu ĉi (kiu siavice estas neklarigita...).

-ES (poseda). Tiu serio estis kreata malfrue; ĝi ne ekzistis (kiom ni scias) en 1881-2. Evidente prenita el G *des(sen)* "ties", *wes(sen)* "kies", *jemandes* "ies", *niemandes* "nenies". Ĉar la formo ekzakte kongruas kun la G pronomfinaĵo estas nenecese memorigi pri alikategoriaj genitivoj en G (*des Mannes* "de la viro") aŭ la A genitivoj ĉe substantivoj kaj pronomoj: *mother's* "de patrino", *somebody's* "ies", *everybody's* "ĉies"; kp *whose* [hu:z] "kies". – Alie Modrijan (p. 24 s.): el L *cuius* "kies" (gen. de *quis* "kiu"), kp ank. *illíus, istíus* "ties" (gen. de *ille* resp. *iste* "tiu"). Tiuj formoj povas esti apogo sed ne rekta fonto. – Senvalora la sugesto de Murgin (BuE 8-9/1992, 11): el F *docteur ès lettres* "doktoro de filologiaj sciencoj" kaj similaj esprimoj.

En HE la gen.sing. havis la finaĵon *s/es/os* ĉe *â*-stemoj kaj konsonantstemoj, kp ekz. Sa *râjñas* "de reĝo", Gr *podós* "de piedo", L *hominis* "de homo", *familias* "de familio", Gt *dagis* "de tago", *this* "ties".

-O (neŭtra).

Identa kun la substantivfinaĵo *-o.* Vd. Waringhien 1967, 19: '...sin prezentis nature la substantivfinaĵo -o por neŭtraj pronomoj destinitaj reprezenti aĵojn'. Notu speciale la respondajn esprimojn en kelkaj fontlingvoj: A *something* "io", propr. "iu aĵo"; *nothing* "nenio"; F *quelque chose* "io", propr. "iu aĵo"; *nulle chose* "nenio"; I *qualche cosa* "io", propr. "iu aĵo"; *che cosa* "kio?", propr. "kiu afero?" Scott (p. 111) interpretas *io* "indefinite thing" ('nedifina aĵo'). – Koincidoj en R (*to* "tio", *ĉto* "kio", *niĉto* "nenio") kaj Po *(tamto* "tio"). Vd plue *-o* sub Kategoriaj rekoniloj. ¶ 1881-2 *-o: f/o* "tio", *kv/o* "kio" (kp L *quod,* neŭtra formo de *qui* "kiu"; F *quoi* "kio"), *c'i/o* "ĉio", *fi/o* "nenio" (Mattos p. 34).

Pri la etimologio de *-o,* vd. supre sub Kategoriaj rekoniloj.

-OM (kvanta).

La deveno de *-om,* troviĝanta jam en

1881-2 (*k/om* "iom") estas nekonata. Pluraj pensis pri F *combien* "kiom da", sed la kre-metodo (elpreno de du literoj en vortinterno por formi sufikson) ne apartenas al la normala procedaro de Z (kp tamen sub suf. *-eg*). Nur se Z traktis la vorton kiel kunmeton: *com/bien* (kio cetere estas ĝusta laŭ vorthistorio), ni povus konsideri tiun etimon proponatan de Polczynski 1912, Scott (p. 111; sekundare), Waringhien 1967, 23 (hezite) kaj Murgin (BuE 8-9/1992, 23). Iom simila estas unu alia propono de Scott (ank. Polczynski): el A *some* "iom"; pli aŭdaca ankoraŭ lia tria: A *how much* "kiom". – Mattos (p. 34) deiras de L *tam – quam* (kiuj verdire signifas pli ĝuste "tiel – kiel" ol "tiom -kiom") kaj supozas ŝanĝon *am* > *om* (ĉar "la formo ...*-am* terure similis al la tempaj adverboj") sub influo de L *tot – quot* "tiom da – kiom da". Eble estus pli akcepteble deiri de L *tantum – quantum* "tiom – kiom" kaj provi ekspliki ŝanĝon *um* > *om* (*um* estis, almenaŭ en 1887, bezonata por alia funkcio). Ekzistas en la ĝenerala vortprovizo multaj ekzemploj de *u* > *o,* sed ĉiuj krom unu *(legomo)* estas variantoj de L *-ulus/-ula/-ulum.* Taŭga formulo por la ŝanĝo povus esti 'franca prononco de la latinaj vortoj' (Waringhien l.c., hezite); *quantum* [kŭâtóm] ekzistas kiel dokta vorto en F.

-U (individuiga).

La etimologio de *-u* (jam uzita en 1881-2: *f/u* "tiu", *kv/u* "kiu", *c´i/u* "ĉiu", *fi/u* "neniu") estas nekonata. Ĉar temas pri personiga diferencigo disde la neŭtra *-o,* oni povus imagi, ke la litero estas prenita el la vorto *individu/o* (tiel Murgin, BuE 8-9/1992, 22). Sed ekzistas pluraj aliaj eblecoj klarigi la sufikson: (a) Z aplikis sian "rezervan vokalon" *u* (pri kiu vd. LV 57), kp Waringhien 1967, 19: *u* estis la sola restanta neokupita vokalo; ĝi krome havis la avantaĝon memorigi pri la persona sufikso *ul.* – (b) Estas rimarkinde, ke pluraj el la romanaj individuaj pronomoj enhavas *u,* ekz. F *aucun* "neniu", *quelqu'un* "iu"; I *nessuno* "neniu", *qualcuno* "iu"; temas pri formoj de la numeralo "unu" (Mattos p. 34 citas krome I *colui* "tiu"). Persone mi emas kredi, ke Z notiis tiujn formojn kaj prenis ilian karakterizan vokalon por la personiga sufikso; eventuale li prenis *u* el la vorto *unu* mem. (c) Scott (p. 111): 'modifo de *-o,* bazita sur A *who'* [hu:] "kiu".

Afiksoj

PREFIKSOJ

BO- (f; Un: *bo/patr-, -frat-*): Fonetika transskribo de F *beau(x)* [bo] kun sama signifo: *beau-père* "bopatro", *beau-fils* "bofilo", *beaux-parents* "bogepatroj" (nur mask. kaj plur.; kp fem. sing. *belle-fille* "bofilino"). Kp Collinson, Eologio 2/1950, 83; Holzhaus p. 206. ¶ Io = *(bofiliulo* "bofilo"); Ie *bel-* (*belpatre* "bopatro"); Ia uzas adj. *affin* "boa" (< L *affinis*): *matre affin* "bopatrino".

Propr. "bel-patro" ktp; 'termino de respekto kaj amo' (Dauzat). – Etimologie identa kun *bela*.

DIS- (f; Un: *dis/ŝir-, -kur-*): Internacia prefikso de L origino. Ekz.: A *dis/pel* "-peli", *-rupt* "-rompi", *-sect* "-sekci"; F *dis/perser* "-peli", *-séminer* "-semi", *-tordre* "-tordi"; I *dis/giungere* "-igi", *-seminare* "-semi", *-solvimento* "-solvo"; (H *disgregar* "-igi", *disecar* "-sekci", *diseminar* "-semi"); kiel ps-pf en G *disponieren* "disponi", *Dissonanz* "disonanco"; Po *dystrybucja* "distribuo", *dysonans*; R *disputirovat'* "disputi", *dissident* "disidento"); L *dis/cedere* "-iri", *-currere* "-kuri", *-secare* "-tranĉi", *-seminare* "-semi", *-trahere* "-tiri". Kp ps-pf *dis-*. ¶ Io *dis-* (*dis/donar, -pozar* "-meti", *-semar*); Ie *dis-* (*dis/dar* "-doni", *-fugir* "-fuĝi", *-jettar* "-ĵeti"); Ia *dis-* (*dis/rumper* "-rompi", *-seminar* "-semi", *-torquer* "-tordi").

L *dis-*, signifanta apartiĝon, foriĝon en ĉiuj direktoj, respondas al Gt pref. *dis-* "dis-", G pref. *zer-* "dis-" (*zerreissen* "disŝiri") el HE **dis*, alternativformo de **dŭis* "en du (direktoj)" (= Gt *twis-*, ekz. *twis-standan* "disiri"; Gr *dis* "dufoje", pref. *di-* "du-" [vd. *dianto*]), evidente par. al **dŭo* "du" (vd. tiun). Gr uzas kiel prefikson plivastigitan formon *dia-*, ekz. *dia/kóptein* "dis/haki", *-rríptein* "-ĵeti", *-témnein* "-tranĉi". – Etimologie identa kun ps-pf *dis-;* vd. ank. ps-pf *dia-*.

EK- (f; Un: *ek/kant-, -kri-*). Ekzistas serio da Gr verboj, en kiu la prefikso *ek-* bone respondas al Eo *ek-*: *ek/boán* "ek/krii", *-brontán* "-tondri", *-dakry'ein* "-plori", *-phlégein* "-bruligi" (Holzhaus p. 207; sed la de li citita *ekgelán* ne signifas "ekridi" sed "ridegi"). Estas nature vidi tiun grupon kiel fonton de la Ea prefikso, kiu estas apogata de simila grupo kun L *ex-*: *ex/aestuare* "ek/koleri", *-ardescere* "-flamiĝi", *-silire* "-salti", kp *exclamare* "ekkrii, kriegi" (Collinson Eologio I,83), sin. al F *(s')écrier* [ek-] "ekkrii" (Waringhien LV 63). La signifoj de Eo *ek-* kaj *el* estas iom parencaj, kp *ekkrii : elkrii*. Inter aliaj verboj cititaj kiel etimoj de *ek-* estas F *éclater* "eksplodi" (Collinson l.c.) kaj la internacia verbo *eksplodi* mem (Scott p. 112, en G formo). ¶ 1882 *ek-* (ekz. *ek/kriu* "-kriis", *-ludu* "-ludis"). ¶ Io havas komencaspektan sufikson *-esk-* (< L *-escere*), ekz. *dormeskar* "ekdormi", *iraceskar* "ekkoleri". Kp

ank. Ia *inflorescer* "ekflori". Esprimo de la momenta aspekto mankas en la aliaj L.I.

Gr *ek* same kiel L *ex* signifas "el" (kp *elkrii : ekkrii* supre), vd. sub tiu. Kp sekv., etimologie identan.

EKS- (f; Un sen ekz.): Internacia prefikso de latin(id)a origino. Ekz.: A *ex-king* "eksreĝo", *ex-minister*, F *ex-colonel, ex-ministre, ex-président*; G *Exkaiser* "eksimperiestro", *Exminister, Expriester* "ekspastro"; I *ex re* "eksreĝo", *ex sacerdote* "ekssacerdoto", *ex ufficiale* "eksoficiro"; Po *eks-minister*, R *eks-prezident*; (H *ex diputado* "eksparlamentano", *ex ministro, ex rey* "eksreĝo"); L postkl. *exconsul* "ekskonsulo". ¶ Io *ex-* (*ex-oficiro, ex-prezidanto*), Ie *ex-* (*ex-oficero, ex-presidente*), Ia *ex-* (*ex-marito* "eksedzo", *ex-ministro*).

L *exconsul* (k.s.) orig. kuntiriĝo de *ex consule* pri persono kiu "el konsulo" evoluis (transiris) al alia stato; kp Hor. *ex humili dives* "riĉa el malalta"; vd. plue *el*. Kp la antaŭan.

FI- : Identa kun la interjekcio *fi*, vd. tiun kaj kp Holzhaus, p. 208. Laŭ Wüster s.v. ĝi estis uzata antaŭ la enkonduko de *-aĉ* kiel samsignifa kun tiu. "Unue ĝi verŝajne estis uzata en kunmetoj de du radikvortoj, sed iom post iom ĝi estis perceptata kiel prefikso" (Gerdman, LaE 8-9, 1957, 78). ¶ La responda vorto ne estas prefikse uzata en la aliaj L.I.

Vd. *fi* en la vortaro.

GE- (f; Un: *ge/patroj, -mastroj*): Aperas bazita sur unu G vorto, nome *Geschwister* "gefratoj" (Scott p. 112; Varankin p. 40; Waringhien 1967, 50). Inter aliaj G vortoj cititaj en tiu ĉi konekso, nur *Geliebten* "geamatoj" (Waringhien LV 64) havas ambaŭseksan sencon (envere nur ŝajne, ĉar *ge-* tie estas prefikso de participo preterita). ¶ Io *ge-* (< Eo): *gefrati, gepatri*. En IeIa mankas ekvivalenta afikso ("gefratoj" estas en Ie *fratres e sestras*, en Ia *fratres e sorores*).

G *Geschwister* orig. "fratinaro" (formita el *Schwester* "fratino"): la prefikso havas kolektivan signifon, kp *Gebrüder* "frataro" (*Bruder* "frato"), *Gebirge* "montaro" (*Berg* "monto"). Ĝi estas prapar. al L *cum* "(kune) kun", vd. tiun.

MAL- (f; Un: *mal/bon-, -estim-*): Bazita sur grupo da romanaj vortoj, plejparte adjektivoj, en kiuj la elemento *mal* (propr. "malbon/a, -e") alprenis la signifon de malo, ekz. F *mal/habile* "mal/lerta", *-heureux* "-feliĉa", *-honnête* "-honesta", *-propre* "-pura", *-sain* "-san(ig)a", *-venu* "-bonvena"; I *mal/aventura* "-feliĉo", *-contento* "-kontenta", *-destro* "-lerta", *-fermo* "-firma", *-sicuro* "-sekura, -certa"; (H *mal/contento* "kontenta", *-decir* "-beni", *-querer* "-ami"). Okaze trovebla ankaŭ en A, ekz. *mal/adroit* "-lerta", *-content* "-kontenta". (Vd. spec. Holzhaus, p. 208, cetere Varankin p. 40 kaj Waringhien LV 63). En L troviĝas kelkaj analogaj esprimoj kun la adv. *male*: *male sanus* "(mense) malsana", *male sobrius* "malsobra". Pri la semantika evoluo "malbone" > "male" kp Gerdman (LaE 11-12/1958, 130): "ĉar la ĉefa vorto plej ofte enhavas en si la ideon de io bona, ĝia kontraŭo aŭ malo esprimas ion malbonan, kaj tiam la signifo de rekta kontraŭeco kaj de malbono kunfandiĝas". – Laŭ Collinson 1950, 83 oni sin demandu, ĉu Z estis influata de R *malo* "malmulte", kiu servas por formi kelkajn mal-vortojn, ekz. *malo/duŝnyj* "mal/kuraĝa", *-imuŝĉij* "-riĉa", *-roslyj* "-alta". ¶ 1878 *mal—* (*ma-ikete* "malamikeco"). – 1881-2 *mal-* (multaj ekzemploj, i.a. *mal/ses'a* "mal/seka", *-juna, -gloro, -kas'u* "-kaŝis", *-fale* "-facile", *-magna* "-granda"). ¶ Io orig. *mal-* (< Eo), poste *des-* (*des/facila, -honoro, -ligar* "malligi", *-pura*); Ie *des-* (*des/aparir* "malaperi", *-bell* "malbela", *-órdine* "malordo"); Ia *dis-* (*dis/contente* "malkontenta", *-facer* "malfari", *-honor* "malhonoro"). La pref. estas etimologie identa kun Eo *dis-*; IoIe adoptis ĝin en ĝia F formo (ekz. *dés/agréable* "mal/agrabla", *-honneur* "-honoro", *-espoir* "malespero").

L *mal/us* "malbon/a", *-e* "-e" povas, se orig. "malmulta", esti par. al la supre citita slava *malo* kaj al A *small* "malgranda", G *schmal* "mallarĝa".

MIS- (4; Karmanov 1926, PV; ne ĉe Z; antaŭe *erar-, fuŝ-*): Prefikso de ĝermana origino, ekz. A *mis/understand* "mis/kompreni", *-hear* "-aŭdi", *--inform* "-informi", G *miss/brauchen* "mis/uzi", *-verstehen* "-kompreni", *Miss/geburt* "mis/naskiĝo", *-griff* "-paŝo"; kp Nd *mis/bruik* "mis/uzo", *-kennen* "-taksi"; Sv *miss/förstå* "mis/kompreni", *-dåd* "-faro". Ĝi estas apogata de samdevena romana prefikso: F *més/alliance* "mis/edziĝo", *-entente* "-akordo", *-user* "-uzi"; I *misinterpretare.* Vd. Holzhaus p. 208; Collinson 1950, 83; Waringhien LV 64; Gerdman LaE 11-12/1958, 130 . ¶ Io *mis-* (*mis/audar, -komprenar, -pronuncar),* Ie *mis-* (*mis/audir, -comprender, -usar*), Ia *mis-* (*mis/interpretar, -usar*).

Ĝerm. prefikso (Gt *missa-,* ekz. *missadeths* "misfaro"), de HE rad. **meit(h)-* "ŝanĝi" (kp L *mutare* "ŝanĝi", Sa *mithá-* "alterna"); probabla semantika evoluo: "ŝanĝiĝanta" > "ŝanĝita" > "devojiĝa, erara". – La F prefikso (duforma: *més-/mé-*) devenas de ĝerm.

PRA- (f; RE: *pra/av(in)-, -nep-, -patr-, -pra-patr-*): Slava prefikso, ekz. R *pra/babka* "pra/avino", *-ded* "-avo", *-mater'* "-patrino", *-otec* "-patro", *-vnuk* "-nepo", *-jazyk* "-lingvo"; Po *pra/dziad* "-avo", *-ojciec* "-patro", *-stary* "praa", *-wnuk* "-nepo" (pliaj ekzemploj el RPo kaj ĈeLi ĉe Holzhaus, p. 209). Certan apogon la prefikso havas de la respondaj L *pro-* (*pro/avus* "pra/avo", *-nepos* "-nepo", *-nurus* "prabofilino, edzino de nepo") kaj Gr *pro-* (*pro/mê'tôr* "pra/patrino", *-pátôr* "-patro"). ¶ Io *pre-* por antaŭaj generacioj (vd. ps-pf *pre-*): *pre-avo, pos-* por postaj generacioj (vd. *post*): *pos-nepoti* "pranepoj"; Ie kiel en Io: *pre-avo, pos-nepotes;* Ia *bis-* (< HI, kp H *bis/abuelo* "pra/avo, *-nieto* "-nepo", I *bis/nonno* "pra/avo", *-nipote* "-nepo")*: bis/avo* "pra/avo", *-nepote* "-nepo".

Slava *pra-* estas apofonia formo de HE **pro* de la bazo **pr-* "antaŭ", vd. *pro* k *frua.* Kp spec. Sa *pránapât-* "pranepo".

RE- (f; RE: *re/tir-, -form-*) 1) 'denove' 2) 'retro': Internacia prefikso de L origino. Ekz.: A *re/act* "re/agi", *-construct* "-konstrui", *-sume* "-preni", *-turn* "-veni", *-write* "-skribi"; F *ré/agir* "re/agi", *-armer* "-armi"; *re/faire* "re/fari", *-tirer* "-tiri", *-venir* "-veni"; G *re/agieren* "-re/agi", *-novieren* "-novigi", *-organisieren* "-organizi"; I *ri/coprire* "re/kovri", *-fare* "-fari", *-leggere* "-legi"; *re/agire* "re/agi", *-spingere* "-puŝi"; Po *re/agowac'* "re/agi", *-formowac'* "-formi", *-organizowac'* "-organizi", *-wizyta* "-vizito"; R *reagirovat'* "re/agi", *-formovat'* "-formi", *-tirovat'sja* "-tiriĝi"; (H *re/accionar* "re/agi", *-hacer* "-fari", *-poner* "-meti"); L *re/ducere* "re/konduki", *-ficere* "-fari", *-portare* "-porti", *-vocare* "-voki". ¶ 1881 *re-* (*revionente* "revenante"). ¶ Io *ri-* (< I),Ie Ia *re-:* Io *rifacar,* Ie *refar,* Ia *refacer* "refari"; en la senco 2 krome *retro-*:Io *retro/irar,* Ie *-ear,* Ia *-ir* "re(tro)iri".

La etimologio de L *re-* estas nekonata, – Kp la identan ps-pf *re-.* – L *retro* "reen" estas formita per la sama sufikso kiel *intro* "enen", *extro* "elen".

SUFIKSOJ

-AĈ/ (1; prop. de Z 1906 [PVZ 7, 402 = LZ I, 316: *ĉevalaĉo*] k 1907 [PVZ 8, 179]): Fonetisma transskribo de la samsignifa I sufikso *-accio* [-áĉo] (mask.)/ *-accia* (fem.), vd. Varankin p. 34, Gerdman LaE 10/1957, 88, Waringhien LV 68 kaj 1967, 54, Holzhaus p. 210. Jespersen (1928, 143) konsideras la sufikson 'elvokiva per sia sono´'. Ekz.: *cavallaccio* "ĉevalaĉo" (*cavallo*), *omaccio* "viraĉo" (*uomo* "viro, homo"), *popolaccio* "popolaĉo" (*popolo*), *ragazzaccio* "knabaĉo" (*ragazzo*); *cartaccia* "paperaĉo" *(carta)*, *donnaccia* "virinaĉo" (*donna*); ank. kiel memstara adj. (Gerdman l.c.): *accio* "aĉa". [Kp H *-acho* [-áĉo] (mask.): *libracho* "li-

braĉo" (*libro*), *populacho* "popolaĉo" (*pópulo*), *terminacho* "vortaĉo, vulgara vorto" (*término* "vorto").] El I: F *populace* "popolaĉo". Holzhaus citas ankaŭ R *kljaĉa* "ĉevalaĉo". ¶ Io *-ach/* [aĉ] (< Eo): *kavalacho* "ĉevalaĉo", *paperacho, ridachar* "ridaĉi". – Ie *-ach/* [aŝ]: *cavallacho* "ĉevalaĉo", *criticachar* "kritikaĉi". – Krome Ie kaj Ia havas pejorativan suf. *-astr/* (el I *-astro*, L *-aster*), uzeblan nur ĉe titoloj de personoj: *medicastro* "kuracistaĉo", *poetastro* (Ie *médico, poete*; Ia *medico, poeta*).

El L adj. suf. *-aceus* "-eca", ekz. *cretaceus* "kreteca" (sem. evoluo: > "nevera, neaŭtentika" > "aĉa"), poste subst.-igita, identa kun la suf. de botanikaj familioj, ekz. *Rosaceae* (> eo *roz/ac/oj*), propr. "rozecaj (plantoj)".

-AD/ (f;Un *ir/ad-, danc/ad-*): Romana (precipe franca: de Beaufront 1898, 68) substantiva sufikso signifanta (daŭran) agon. Ekz. F *-ade*: *bastonnade* "bastonado", *fusill/ade* "pafado" (*-er* "mortpafi"), *galop/ade* "galop/ado" (*-er* "-i"), *promenade* "promen/ado" (*se promener* "-i"). [H *-ada, -ado*: *galop/ada* (*-ar* "-i"), *graniz/ada* "hajl/ado" (*-ar* "-i"), *hel/ada* "frost/o" (*-ar* "-i"), *par/ada* "halt/o" (*-ar* "-i"); *rein/ado* "reg/ado" (*-ar* "-i").] Enpenetris en A (*cannonade* "kanonado", *cruisade* "kroz/ado" de *cruise* "-i", *fusillade* "pafado"), okaze ankaŭ en la aliajn fontlingvojn (G *Blockade, Kannonade, Promenade*; PoR *blokada, kanonada*). I formo *-ata*: *cavalc/ata* "rajd/ado" (*-are* "-i"), *nuot/- ata* "naĝ/ado" (*-are* "-i"), *telefon/ata* "telefon/ado" (*-are* "-i"). Vd. Varankin p. 36, Waringhien LV 67, 1967,31, Gerdman LaE 10/1957,88, Holzhaus p. (206), 211. – Krome Collinson (1950, 84) atentigas pri la R ripetaj verboj finiĝantaj per *-at'*, ekz. *znavat'* "renkontadi" (*znat'sja* "interrilati"). ¶ 1881 *-ad/ (brul/ig/ad/o)*. ¶ Io *-ad/ : dansado, pafado*. – Ie *-ada* (de verboj kun inf. *-ar*), *-ida* (de ceteraj verboj): *promenada, currida* "kurado". – Ia *-ada*: *cavalcada* "rajdado", *currada* "kurado".

El L vulg. *-ata*, orig. subst.-igo de la femala formo de la ptc.perf. de la 1-a konjugacio (stemfina vokalo *a*), kp *-at* sub Konjugacio. Identa kun ps-sf *-ad*.

-AĴ/ (f;Un *mol/aĵ-, frukt/aĵ-*): Fonetisma transskribo de la F sufikso *-age* [aĵ] (= I *-aggio* [áĝo]), kiu enpenetris en A [-iĝ] kaj en certaj vortoj disvastiĝis internacie. F ekz.: *bagage* "pakaĵo" (F ant. *bague* "pako"), *enfantillage* "infanaĵo" (*enfant* "infano"), *hérit/age* "hered/aĵo" (*-er* "-i"), *lainage* "lan/aĵo" (*laine* "-o"), *rembourr/age* "rembur/aĵo" (*-er* "-i"). Kp A *assemblage* "kolekto" (*assemble* "kolekti, kunigi"), *baggage* "pakaĵo" (*bag* "sako"), *heritage* "heredaĵo" (*inherit* "heredi"); I *cartonaggio* "kartonaĵo" (*cartone* "kartono"), *linguaggio* "lingvaĵo" (*lingua* "lingvo"), *tatu/aggio* "tatu/aĵo" (*-are* "-i"). Ekz. el aliaj fontlingvoj: G *Emballage* [-á:ĵe'] "pakmaterialo", Po *bagaz'* [aĵ]/R *bagaĵ*/(H *bagaje* [áĥe']) "pakaĵo". Vd. de Beaufront 1898, 68; Varankin p. 35; Waringhien LV 67, 1967,51; Gerdman LaE 10/1957, 88; Holzhaus p. 211. Pri la multsenceco de F *-age*, vd. Waringhien 1967, 9. – Wajsblum (Eologio I:3, 206) deklaras *-aĵ* analogia al Po *-ez'* [eĵ] kaj R *-ëĵ* [joĵ] "kies signifoj hezitas inter la ago (-ad-) kaj ties rezulto (-aĵ-)". Ĉe Holzhaus l.c. oni trovas i.a. Po *grabiez'* "rabaĵo" (*grabic'* "rabi"), R *ĉertëĵ* "desegnaĵo" (*ĉertit'* "desegni"), *delëĵ* "dividaĵo" (*delit'* "dividi").¶ Io *-aj/* [aĵ]: *belajo, drinkajo* "trinkaĵo", *konstruktajo* "konstruaĵo". – Ie *-age* [-áĵe]: *lanage* "lanaĵo"; normale tamen IeIa *-age* havas aliajn sencojn ('kolekto', 'ago') konforme al la fontlingvoj.

F *-age*/I *-aggio* pere de L mez. *-agium* el L *-aticum* (kp F *voyage*/I *viaggio* "vojaĝo" el L *viaticum* "vojprovizo", der. de *via* "vojo"), en kiu la elemento *-ic-* estas identa kun la adj. suf. *-ic(us)* (vd. ps-sf *-ik*).

-AN/ (f; Un *regn/an-, Varsovi/an-*) 1) 'loĝanto' 2) 'sekvanto, membro, adepto': Internacia sufikso de L origino. Ekz. el diversaj fontlingvoj: A *-(i)an*: 1) *Ameri-*

can "amerik/ano, -a" (*America), European* "eŭrop/ano, -a" (*Europe*); 2) *Christian* "kristan/o, -a" (*Christ*), *Lutheran* "luteran/o, -a"; F *-ain, -ien, --an*: 1) *Américain* "amerikano" (*Amérique*), *Parisien* "parizano" (*Paris*), *paysan* "kamparano" (*pays* "vilaĝo"); 2) *chrétien* "kristano", *mahométan* (*Mahomet*); G *-aner*: 1) *Amerikaner* (*Amerika*), *Insulaner* "insulano"; 2) *Lutheraner, Mohammedaner*; I *-(i)ano*: 1) *americano* "amerik/ano, -a (*America*), *isolano* "insulano" (*isola* "insulo"), *italiano* "ital/o, -a" (*Italia*); 2) *cristiano* (*Cristo*) "kristan/o, -a", *luterano* "Luter/ano, -a"; Po *-(j)anin*: *Amerykanin* "amerikano" (*Ameryka*), *mieszczanin* "urbano" (*miasto* "urbo"), *warszawianin* "varsoviano" (*Warszawa*); 2) *chrzes'cijanin* "kristano", *luteranin* "luterano"; R *-(i)anin*: 1) *Amerikanin* "amerikano" *(Amerika), severjanin* "nordano" (*sever* "nordo"); 2) *ħristianin* "kristano" (*Ĥristos*), *magometanin* (*Magomet* "Mahometo"); L *-(i)anus*: 1) *Africanus* "afrika" (*Africa*), *Romanus* "rom/ano, -a" (*Roma*), *urbanus* "urb/ano, -a" (*urbs* "urbo"); 2) *Caesarianus* "ano de Cezaro" (*Caesar*), *Christianus* "kristan/o, -a" *(Christus)*. [Kp H *americano, suburbano* "antaŭurbano"; *cristiano, luterano*; Gr *Asianós* "aziano" (*Asía*), *khristianós* "kristano" (*Khristós*).] Vd. Holzhaus p. 212 s. kaj por PoR ank. Wajsblum 1951, 206. – La sufikso estas uzata memstare en A: *ana* "kolekto de memorindaj vortoj de iu aŭ anekdotoj pri iu". ¶ 1882 -*an* (*kos'/an/aŭ/s* "korteg/an/in/oj"). ¶ Io *-an/*: *urbano, Kristano, samideano* (pri la genezo de tiu vorto, vd. de Beaufront 1925, 140). – Ie *-ane*: *american/e* (*-o* mask., *-a* fem.), *italiane, Crist(i)ane*; por senco 1 ank. *-ese*: *hispanese (Hispania), irlandese (Irland)*. Adj. *-an* resp. *-esi*. – Ia -*ano* (mask.), *-ana* (fem.): *africano, Christiano*; sin. (senco 1) *-ese: milanese*. Adj. *-an* resp. *-ese*.

L *-an(us)* originas en suf. *-no* aldonita al subst. finiĝanta per *-a* (**Roma/no/s*, kp Gr *Asia/nó/s* supre). – Identa kun la ps-sf *-an*.

-AR/ (f;Un *arb/ar-, ŝtup/ar-*): Se ni kredas de Beaufront (1925, 140), Z demandite deklaris ke li por la sufikso *-ar* estis inspirita de F *formulaire* "formularo", *vocabulaire* "vortaro". Tiuokaze Z ŝanĝis F *aire* [er] al *ar* (kontraste kun *exemplaire* > *ekzempler/o*). Sed tion li certe faris laŭ modelo de L, ĉar tiuj vortoj devenas de L mez. *formularium* (*formula* "formulo") resp. *vocabularium* (*vocabulum* "vorto"); kp ank. *glossarium* "glosaro" (*glossa*), *herbarium* "herbokolekto" (*herba*), *hymnarium* "himnaro" (*hymnus*), *librarium* "libr/aro, -oŝranko" (*liber*), *ossuarium* "ost/aro, -ejo" (*ossa* "ostoj"), *tabularium* "tabelaro, arkivo" (*tabula* "tabelo"). Ofte L *-arium* estas indikita kiel fonto de tiu ĉi sufikso (Bianchini p. 34; Gerdman LaE 8/1947, 85; Collinson 1950, 84; Waringhien 1967, 52) kune kun ĝiaj romanaj ekvivalentoj: F -*aire* (*dictionnaire* "vortaro", *hymnaire*), I -*ario* (*dizionario, erbario, vocabolario*), [H -*ario (diccionario, herbario, vocabulario)*], kp ank. A *-ary* : *dictionary, vocabulary, library* "libraro, biblioteko". Pruntita en G *Herbarium*, Po *herbarium, herbarz*, R *gerbarij* "herbokolekto". Tamen, ĉar L *-arium* pli ofte signifas *-uj* aŭ *-ej* ol *-ar* (*aquarium* "akvujo", *columbarium* "kolombejo", *seminarium* "plantejo", propr. "semejo"), oni serĉis ankaŭ alian fonton. Frapa estas la simileco al la sufikso en R *slovar'* "vortaro" (de *slovo* "vorto"), kiu estas konsiderata de Varankin p. 36, Collinson l.c., Holzhaus p. 213 (citante ank. *bukvar'* "literaro, abocolibro" de *bukva* "litero"), Yamasaki s.v. *-ar*. [Varankin kaj Gerdman atentigas pri la H arbarsufikso *-ar* (*castañar* "kaŝtanarbaro", *pinar* "pinaro").] Resume, la eldiro de Z pri la franca inspiro ŝajnas tro malvasta; la L *-arium* estas aldonenda, kaj la feliĉa koincido de R *slovar'* kun la latin(id)a *vocabularium* (esenca nocio por lingvokonstruanto!) certe ne eskapis lian atenton. ¶ 1878 -*oz/* (*homoze* "homaro"), evidente el L suf.

-osus "plena (de)" (vd. ps-sf *-oz*). – 1881 *-oz/* (*verbozo* "vortaro"); la ŝajne sinonima *-i/* (*verbio* "vortaro") envere respondas al --*uj* ("vortujo"), kp *rudz'io* "rozujo": vd. sub *-uj*. ¶ Io *-ar/*: *homaro, vortaro*. – Mankas ĝenerala kolektiva sufikso en Ie Ia; kp tamen Ie *-árium* (*herbárium, radicárium* "radikaro"), Ia *-ario* (*proverbiario* "proverbaro", *vocabulario* "vortaro"). Por personoj: Ie *-ité* "-ularo" (*parentité* "parencaro", *yunité* "junularo"), var. de la ec-sufikso *-itá*.

L *-arium* orig. subst.-igita neŭtra formo de la adj.suf. *-arius* (ekz. *librarius* "libra"), identa kun la ps-sf *-ar(i)*, kp tiun.

-ĈJ/ (f;Un *Miĉj-* < *Miĥael-*, *Aleĉj-* < *Aleksandr-*): Bazita sur R viraj karesformoj kiel *Alëŝa* (de *Aleksej*), *Griŝa* (de *Grigorij*), *Iljuŝa* (de *Ilija*); vd. Waringhien LV 68, Duc Goninaz en Filologo 11/1978. Ankaŭ la regulo pri mallongigo de la radiko estas inspirita de R. "La kaŭzo de transformo de *ŝ* al *ĉ* estas neklara" (Waringhien l.c., simile Yamasaki s.v.). Tamen ekzistas formoj kun *ĉ* en la t.n. duagradaj karesnomoj (vd. Holzhaus p. 214): *Boreĉka* (de *Borja* de *Boris*), *Peteĉka* (de *Petja* de *Pëtr*). Kp Varankin p. 39, kiu citas Ĉe *Karliĉek* (de *Karel*). – La *j* (apenaŭ aŭdebla en normala konversacio) ŝajnas aldonita por atingi paralelecon kun la femala *-nj*. ¶ 1894 *-et/* (t.e. uzado de la dim. sufikso). ¶ Io *-et/* (dim.): *patr(ul)eto* "paĉjo". – Ie *-illi/* (pli frue *-il'*): *fratrillio* "fraĉjo" (Haas p. 32). – Ia malhavas karesajn sufiksojn.

-EBL/ (f;Un sen ekz., UV *kompren/ebl-*): Bazita sur samsignifa latin(id)a sufikso, disvastiĝinta ankaŭ en la ĝermanaj fontlingvoj, kun samaj konsonantoj sed alia vokalo (*a, i*). Ekzemploj (vd. spec. Holzhaus p. 214 s.): A *-able* [e'bl]/*-ible: acceptable* "akceptebla" (*accept*), *changeable* "ŝanĝebla" (*change*), *readable* "legebla" (*read*); *audible* "aŭdebla", *credible* "kredebla", *visible* "videbla"; F *-able/-ible* [abl, ibl]: *acceptable* (*accepter*), *comparable* "komparebla" (*comparer*), *pardonnable* "pardonebla" (*pardonner*) ; *divisible* "dividebla" (*diviser*), *flexible* "fleksebla", *intelligible* "komprenebla"; G *-abel/-ibel*: *akzeptabel* (*akzeptieren*), *diskutabel* "diskutebla" (*diskutieren*); *disponibel* "disponebla" (*disponieren*); I *-abile/-ibile*: *accettabile* (*accettare*), *mangiabile* "manĝebla" (*mangiare*), *usabile* "uzebla" (*usare*); *credibile* "kredebla" (*credere*), *leggibile* "legebla" (*leggere*); (H *-able/-ible*: *aceptable, evitable* "evitebla"; *movible* "movebla"); L *-abilis* (de verboj kun inf. *-are/-ari*)/*-ibilis* (de aliaj verboj): *imitabilis* "imitebla" (*imitari*), *habitabilis* "loĝebla" (*habitare* "loĝi"), *laudabilis* "laŭdebla" (*laudare*); *audibilis* "aŭdebla" (*audire*), *credibilis* "kredebla" (*credere*), *flexibilis* (*flectere*). Kp ank. AF *possible*, I *possibile*, (H *posible*), L postkl. *possibilis* "ebla", propr. "povebla". – Kiel klarigi Eo *e*? Kelkaj (ekz. Gerdman LaE 11-12/1957) opinias, ke *e* proksimume redonas la A prononcon; sed kp Waringhien LV 66: "la angla sufikso *-able* estas prononcata per tre mallonga *ö* kaj vokaligita *l*...kaj sekve tute ne klarigas la *e* de la esperanta *-ebla*".[La klarigo de Waringhien estas la jena (l.c.): la sufikso *-em* "ŝiavice influis la sufikson *-ebl-*, trudante al ĝi sian komencan vokalon *e* anstataŭ la *a* de la origina franca *-able*"; mi ne komprenas kial!] – Mi emas pensi, ke Z en la elekto inter *a* kaj *i* preferis – neniun, prenante *e* kiel neŭtralan vokalon (*a-[e]-i*), eble ne sen ioma konsidero al A prononco. Kp de Beaufront 1925, 143: "La linguo Angla inspiris (per la fonetismo) la formo *e*bl, meza inter *a*bl kaj *i*bl." ¶ 1881 *-ebl/* (*estebla*). ¶ Io *-ebl/* (< Eo): *kredebla, videbla*. – Ie *-abil* (*-ibil* post perfekta stemo, se tia ekzistas): *curabil* "kuracebla", *visibil* "videbla". – Ia *-abile* (ĉe verboj kun inf. *-ar*), *-ibile* (ĉe la ceteraj verboj): *portabile* "portebla", *legibile* "legebla".

L *-bil-* (pli frue *-bli-*), ekz. *stabilis* "firme staranta", estas paralela al *-bul-* (pli frue *-blo-*), ekz. *stabulum* "stalo"; HE prasufikso **-dhlo-*.

-EC/ (f;Un *bon/ec-, vir/in/ec-*): Fonetisma transskribo de la samsignifa I sufikso -*ezz(a)* [éts(a)], ekz. *bellezza* "beleco" (*bello*), *certezza* "certeco" (*certo*), *dolcezza* "dolĉeco" (*dolce*), *tristezza* "malĝojeco" (*triste*). La sufikso estas ĝenerale romana, kp F *-esse* [es]: *délicatesse* "delikateco" (*délicat*), *jeunesse* "juneco" (*jeune*), *richesse* "riĉeco" *(riche)*, *vitesse* "rapideco" (*vite*); [H *-eza [*étha*]: beleza, certeza, pureza*]. Okazaj pruntoj (el F) en G, ekz. *Noblesse* "nobleco". La responda A sufikso (neparenca) *-ness* povas esti rigardata kiel apogo: *goodness* "boneco" (*good*), *mildness* "mildeco" (*mild*), *tenderness* "tenereco" (*tender*). Malpli grandan similecon prezentas Po *-oc* (*niemoc* "malforteco") kaj R *-ost'* (*radost'* "ĝojeco", *starost'* "maljuneco"), vd. spec. Holzhaus p. 216. ¶ 1878 *-et/*: *malamikete* "malamikeco" (kredeble komenco de I *-ezza*; ĉiuokaze ne, laŭ Albault (Eologio II:2, 91), sub influo de Oc *-eta*. – 1882 *-ed/*: *junedo* "juneco" (probable sama etimo; konsonantŝanĝo por eviti kolizion kun la diminutiva *-ett*). ¶ Io *-es/* (efektive la radiko de *esar* "esti", sed oportune koincidanta kun la prononco de F *-esse*): *blindeso, utileso.* – Ie *-ità* (vd- ps-pf *--tat*): *altità, utilità,* ank. *-ess(e)* :*altesse,, finesse* "fajneco", kaj *-ore* (vd. ps-sf *-or* 2): *altore.* – Ia *-itate: activitate, utilitate*; ank. *-essa*: *allegressa* "gajeco", *puressa,*

El L *-itia* s.s., ekz. *laetitia* "ĝojeco" (*laetus*), *amicitia* "amikeco" *(amicus)*, identa kun la vortfino en *gratia* "gracio" (kp tiun): suf. *-ti*, formanta abstraktajn subst. (vd. sub ps.-sf *-cio*).

-EG/ (f;Un *man/eg-, varm/eg-*): Necerta etimologio. Hipotezoj: (1) Modifo de la R vulgarlingva sufikso *-jaga* (Laskin p. 202, Waringhien LV 65, Holzhaus p. 216, Duc Goninaz p. 35), ekz. *ŝtormjaga* "marŝtormego" (*ŝtorm*), *koljaga* "stangego" (*kol* "stango"), *dvornjaga* "granda korta hundo" (*dvornoj* "korthundo"). La vokalŝanĝo devis okazi "por ke la komenca vokalo estu la sama, kiel en la diminutiva sufikso" (Waringhien l.c.). Oni substrekas, ke *ja* en R estas unulitera. (2) Eltranĉo (kiel lingvistikan terminon mi proponus ENDOKOPO) de la kombino *eg* en Gr *mégas* "granda" (konata en eaj vortoj kiel *mega/fono, -lito*), vd. Varankin p. 34; Gerdman LaE 11-12/1957, 110; Waringhien 1967, 54 kaj LV 65 (liternomo *ô méga* "o granda" = *o ega*!). Tio donas perfektan koincidon, sed la procedo mem estas nepruvebla en la Za materialo (por ev. analogaĵoj, vd. *-er* kaj *-op*). (3) Restas la ebleco konsideri la paralelecon *-eg* : *-et*. Kreinte la evidentan diminutivon, Z ne povis trovi ion similan en la fontlingvoj por la antonimo (la romana *-on* ne taŭgis, ĉar al tiu silabo Z donis alian rolon). Por havi paralelan formon, li konservis la vokalon kaj anstataŭigis la diminutivan *t* per *g*, inspirita ĉu de *grand-*, ĉu de *gigant-*, ĉu de Gr *mégas*. "La litero *g* ŝajnas per si mem esprimi grandecon aŭ plifortigon" (Gerdman l.c., kiu citas la HE radikon **aŭeg-*, manifestiĝanta en L *augere* "pligrandigi"). ¶ 1881-2 pref. *pre-* (*prekalo* "varmego", *prepluvo* "pluvego", *prekara* "karega" (el L adj. pref. *prae-*, ekz. *praedurus* "malmolega"). La uzo de prefikso povas esti inspirita de Vp *le—* (*levamik* "varmega"). ¶ Io *-eg/* (< Eo): *varmega, ridegar.* – Ie (de subst.) †*-ott* [el I *-otto*], (de adj.) *-íssim*: *bellíssim* "belega", *grandíssim* "grandega". – Ia (de adj. kaj adv.) *-issim/*: *altissime* "altega", *bellissimo* "belege" [el L superlativa finaĵo *-issimus*].

EJ/ (f; Un *kuir/ej-, preĝ/ej-*): Inter la rusaj vortoj, kiuj donis al Z la ideon pri afiksa sistemo, estis du kun loka sufikso: *ŝvejcarskaja* "pordistejo" kaj *konditorskaja* "sukeraĵejo" (vd. LZ I, 345). Tamen nur Mattos (p. 84) asertis ke *-ej* devenas de *-skaja*; tiu devenigo postulas aferezon *(sk)*, vokalŝanĝon *(a > e)* kaj apokopon *(a)*. Efektive, ni ĉe tiu ĉi sufikso disponas pri tri akcepteblaj etimoj, tiel ke oni devas konsideri pluroblan originon (kiel ekz. Wa-

ringhien 1967, 52): (1) el G *-ei* [ai, (dial.) ei], vd. Varankin p. 29, Gerdman LaE p. 216, Gregor p. 82. Ekz.: *Abtei* "abatejo" (*Abt* "abato"), *Auskunftei* "informejo" (*Auskunft* "informo"), *Bücherei* "librejo" (*Bücher* "libroj"); spec. post profesiulaj nomoj finiĝantaj per *-er*: *Bäckerei* "panfarejo" (*Bäcker* "panfaristo"), *Druckerei* "presejo" (*Drucker* "presisto"), *Konditorei* "sukeraĵejo" (*Konditor* "sukeraĵisto"), *Schlachterei* "buĉejo" (*Schlachter* "buĉisto"). La redono de G *ei* [ai] per *ej* troviĝas en la radikaro (*hejmo, hejti, mejlo*; kp la diskuton sub *ŝajni*). (2) El Gr *-eíon* [(ant.) -eí-, (mod.) -í-], ekz. *balaneíon* "banejo" (*balaneús* "banisto"), *bibliopôleíon* "librovendejo", (*biblíon* "libro", *pôleín* "vendi"), *koureíon* "frizejo" (*koureús* "barbiro"),(Gr mod.) *kapheneío* "kafejo", *skholeío* "lernejo", *telôneío* "doganejo"; kp ank. la antikvajn nomojn de temploj: *Athêneíon* (*Athê'ne*), *Hêrakleíon* (*Hêraklê´s*), *Mouseíon* (*Moúsa* "muzo"; kp *muzeo*). La Gr sufikso estas de la plej multaj esperantologoj konsiderata kiel (oportuna)koincido, ne kiel fonto. Sed ĝia kompleta kongruo kun la Ea (prononco kaj formo) faras probabla komunan german-grekan fontecon, kiel ĉe la akuzativa *-n*. (3) La semantika kunligo inter *-ej* ('loko por [iu/io]') kaj *-uj* ('loko kun [io]') estas intima. Laŭ de Beaufront (1925, 152), Z demandite deklaris, ke *-ej* estas "quaza modifikuro di *-uj*". Tamen Waringhien (LV 66) kaj Holzhaus (p.227), kiuj pritraktis la rilaton inter *-ej* kaj *-uj*, ambaŭ opinias ke *-ej* estas kreita antaŭ *-uj* (vd. plue sub tiu sufikso). (4) Inter aliaj koincidoj meritas mencion F *-aie* [e] "(plant)ejo", ekz. *chênaie* "kverkejo", *jonchaie* "junkejo" (Collinson Eologio I:2, 85). ¶ 1882 *-ej/* (*vagejo*). ¶ Io *-ey/* [ej] (< Eo): *laboreyo, vendeyo*; (establaĵo) *-eri/*: *bakerio, imprimerio* "presejo". – IeIa (establaĵo) *-eria*: Ie *libr/ería*, Ia *-eria*.

G *-ei* < G mez. *-ie* estas identa kun F *-ie* [i] en ekz. *librairie* "librejo" , I *-i(a)* en ekz. *birreria* "bierejo", *abbadia* "abatejo" (kp ank. A *brewery* [-i] "bierfarejo" ktp) el L *-ia*, ekz. *libraria* "librejo"; lastvice temas pri la L suf. *-ari(us)*, vd. ps-sf *-ar(i)*. – La vortoj kun Gr *-eion* estas orig. subst.-igo de adjektivoj formitaj per suf. *-jo* aldonita al metiistnomoj finiĝantaj per *-eus* (kp *koureús* supre).

-EM/ (f;Un *babil/em-*): Laŭ la plej disvastigita opinio (Varankin p. 42, Gerdman LaE 2/1958, 26, Waringhien LV 66, Gregor 1982, 13) *-em* estas fonetisma transskribo de la radiko en F *aimer* [emé] "ami", "kiu ja laŭsence estas proksima al: esti inklina, esti ema" (Varankin l.c.). Nur unu alian hipotezon mi trovis: laŭ Scott (p. 112) kaj Holzhaus (p. 217) *-em* devenas de la samsignifa G sufikso *-sam*, ekz. *arbeitsam* "laborema" (*arbeiten* "labori"), *gehorsam* "obeema" (*gehorchen* "obei"), *schweigsam* "silentema" (*schweigen* "silenti"). Sed tio postulas du modifojn: aferezo de *s-* kaj vokalŝanĝo *a* > *e*. – Konsiderante la grandan semantikan similecon de *am-* al *-em* (kp *li amas promeni : li emas promeni, gast/am/a : gast/em/a, sam/seks/am/a : sam/seks/em/a*), ŝajnas probable, ke Z deiris de tiu radiko (eble en ĝia LI formo *am-*, kiu prezentis la normalan sufiksstrukturon VC). Vokalŝanĝo estis necesa por diferencigi la INKLINON de la AMO, ĉu laŭ la F prononco, ĉu laŭ la vokalordo *a : e*... (kp ev. *-ar : -er*). ¶ 1881 *-em/*: *pitiema* "kompatema". ¶ Io *-em/* (< Eo): *agema, iracema* "kolerema". – IeIa uzas en certaj okazoj (laŭ modelo de siaj fontlingvoj) *-aci* resp. *-ace*: *mord/aci, -ace* "mordema", *vor/- aci, -ace* "vorema" (el L suf. *-ax, -acis*, ekz. *mordax, vorax*, vd. ps-sf *-ac*).

Vd. ev. *ami*.

-END/ (oficialigita de Akad. 1953; ne ĉe Z; Christaller 1923, Wü ['multe uzata nur post 1920'], PV, GD ktp; antaŭe *kiu estas nepre...-ota, kiu devas esti ...-ata*): Sufikso de la L gerundivo (de 2-a, 3-a kaj 4-a konjugacioj; kp *-and(us)* en 1-a

kjg.), kredeble ekuzita sub influo de Ido. Ekzemploj: L *agendus* "farenda" (*agere* "fari, agi"), *audiendus* "aŭdenda" (*audire* "aŭdi"), *legendus* "legenda" (*legere* "legi"; kp *legendo*), *scribendus* "skribenda" (*scribere*), *Carthago est delenda* "Kartago estas detruenda" (*delere* "detrui"). Okazaj aperoj en modernaj fontlingvoj, plej ofte subst.-igitaj: A *multiplicand,* G *Dividend* (mat.). – Tio ĉi estas fakte la dua adopto en Eon de la L gerundivo, ĉar la sufikso *-ind* havas la saman fonton (kp tiun). ¶ Io *-end/*: *facenda* "farenda", *lektenda* "legenda"; Ie *-(e)nd: dividend, leend* "legenda". – En Ia nur en izolitaj subst., ekz. *multiplicando, *confirmando* "konfirmoto".

La gerundivo estas italika specialaĵo (kp Oska *-anna* "-andus") sen eksteritaliaj ekvivalentoj. – Etimologie identa kun suf. *-ind.*

-ER/ (f;Un *sabl/er-*): Necerta etimologio. Oni serĉis etimon laŭ tri vojoj: (1) Citado de izolitaj vortoj en la fontlingvoj, kiuj, prezentante – prefere en la vortfino – sufiĉan similecon al *-er,* povis semantike esti rilatigitaj al ĝi: (a) G (dial.) *Hölzerl* "lignero, peco de ligno" de *Holz* "ligno" (Varankin p. 36). Tamen tiu vorto ŝajnas envere esti diminutivo, kiel aperas el la bavaraj ekzemploj ĉe Holzhaus p. 218, ekz. *Fingerl* "fingreto". Z cetere ne emis atenti dialektajn formojn en sia kreado. (b) La stemo *pulver-* de L *pulvis* "polvo, sablo" (> Eo *polvo, pulvo, pulvoro*); ĝi povus esti analizata "pulv/er-" (Gerdman LaE 2/1958, 26). Notu, ke la unualibra ekzemplo estas *sablero.* (c) Endokopo (eltranĉo) el G *Körnchen* "grajneto" (*Sandkörnchen* "sablero"): *ör* > *er* (Scott p. 112). (d) F *-aire* [er] en *légionnaire* "unu el legio, legiano", *exemplaire* "unu peco, ekzemplero" (Laskin p. 202; kp LV 65). (2) Endokopo (eltranĉo) el Gr *méros* "parto" (sed ne: "ero, elemento"); por tiuj, kiuj devenigas *-eg* el Gr *mégas,* tiu ĉi solvo prezentas ekzaktan analogion (menciita ĉe Waringhien 1967,52, Gerdman l.c., Holzhaus p. 218). (3) Ĉar *-er* estas kvazaŭ antonimo de *-ar,* eblas supozi, ke ili formas paron same kiel *-ig/-iĝ* kaj eventuale *-eg/-et.* Por *-ar* Z havis modelojn en la fontlingvoj. Waringhien komentas (LV 65): "Sed por la mala ideo, li ne disponis tian rimedon: li do probable limigis sin je la ŝango de la vokalo, kaj kreis nian *-er-* per simpla modulado de la sono". Waringhien (LV 65) ŝajnas kredi ke Z estis inspirita de F *-aire*; mi prefere kredas, ke li sekvis la vokalserion: *a(r)...e(r).* ¶ Io *-un/*: *grelun* "hajlero", *sablun* "sablero" (identa kun la numeralo *un* "unu", do propr. "unuo de..."). – Ie *-un*: *sandun* "sablero". – Mankas en Ia.

-ESTR/ (f;Un *ŝip/estr-*): Kredeble kreita el I *maestro* "ma(j)stro" per aferezo (ĝenerala opinio, vd. ekz. Waringhien LV 68, Gerdman LaE 2/1958, 26): *maestro di cappella* = Eo *kapel/estr/o.* [Mattos p. 84 devenigas ĝin de Eo *mastro* kun vokalŝanĝo "pro la homonimeco kun la internacia *astro*".] Similaj formoj en aliaj fontlingvoj, ekz. F *bourgmestre,* G *Bürgermeister,* (H *burgomaestro*) "urbestro", A *quartermaster* "provizestro (mil.)". Kiel Laskin (p. 202) atentigas, la plena formo ne estus oportuna por la kunmetitaj vortoj, kp *regiment/estr/o* kaj **regiment/mestr/o.* I *navalestro* "boatisto, pramisto" (Varankin p. 39 skribas "ŝipestro") ŝajnas enhavi sufiksigitan formon de nia substantivo (verŝajne tamen temas pri nura adjektivkaraktera derivaĵo de *navale* "ŝipa"). ¶ 1882 *-estr/* (*imperestro* "imperiestro"). ¶ Io *-estr/* (< Eo): *hotelestro, policestro.* – Mankas en IeIa.

Vd. *ma(j)stro.*

-ET/ (f;Un *mur/et-, rid/et-*): Romana diminutiva sufikso, kiu enpenetris ankaŭ en A. La sufikso formas substantivojn (kaj, en malpli alta grado, adjektivojn). Ekzemploj: F *-et(te): jardinet* "ĝardeneto" (*jardin*); *chambrette* "ĉambreto" (*chambre*),

maisonnette "dometo" (*maison* "domo"), *tablette* "tableto" (*table*); *blondinet* "blondeta" (*blond*), *maigrelet* "magreta" (*maigre*): I *-ett/*: *libretto* "libreto" (*libro*), *operetta* "opereto" (*opera*), *pezzetto* "peceto" (*pezzo*), *sacchetto* [sak-] "saketo" (*sacco*); [H *-et/*: *palacete* "palaceto"]; A *-(l)et*: *booklet* "libreto" (*book*), *coronet* "kroneto", *rivulet* "rivereto", *tablet* "tabuleto". La sufikso aperas (en F formo) en certaj fremdvortoj de aliaj fontlingvoj: G *Rosette, Novellette, Statuette*, PoR *rozetka, statuetka.* ¶ 1882 *-ett/*: *civetto* "regneto", *feletto* "kateto", *pu/ett/aŭ* "knab/et/ino", *urbetto* k.a.). ¶ Io *-et/* (< Eo): *dometo, varmeta, ridetar.* – Ie *-ett/*: *rulette* "ruleto", *pluviettar* "pluveti". – Ia *-ett/*: *hachetta* "hakileto", *bellette* "beleta", *dormettar* "dormeti".

El L vulg. *-ittus* (mask.), *-itta* (fem.), kp *Attittus, Iulitta* (personaj nomoj en epigrafoj), de nekonata origino. – Identa kun ps-sf *-et.*

-ID/ (f;Un *bov/id-, Izrael/id-*): Malnovgreka sufikso, uzita preskaŭ ekskluzive ĉe personaj nomoj kaj indikanta ies posteulon aŭ genton: *Hêraklídês* "filo de Herakl o (*Hêraklê´s*)", *Nestorídês* "filo de Nestoro (*Néstôr*)", *koiranídês* "reĝido" (*koíranos* "reĝo, reganto"); *Danaídes* "filinoj de Danao (*Danaós*)". Uzita samforme en L: *Pyrrhidae* (plur.) "idoj de Pirro", *Romulidae* (plur.) "idoj de Romulo". En L sc. pri bestfamilioj (kvazaŭ gentoj!), ekz. *Felidae* (plur.) de *feles* "kato". Okaze uzata en modernaj fontlingvoj kun la antikva senco: F *Napoléonide* "Napoleonido". [La hipotezo de Scott p. 112, ke la etimo de *-id* estas A (ktp) *Israel*ITE (kun ŝanĝo *t* > *d* pro la participsufikso *-it*) nepre dependas de nescio pri la Gr sufikso. Kp ps-sf *-it* 2.] ¶ Io *-id/* (< Eo): *Izraelido, Semidi* "semidoj"; por bestidoj *-yun* ("jun-"): *bovyuno.* – Ie havas por bestidoj suf. *-ell/* (*leonello*; el L dim. *-ellus*, ekz. *agnellus* "ŝafideto"); cetere mankas responda sufikso en IeIa.

Gr *-ídês* estas formita kiel maskla formo de la fem. *-ís -ídos* (ekz. *Priamís* "filino de Priamo"), orig. adj. ("la Priama").

-IG/ (f;Un *pur/ig-, brul/ig-*): Ĉiuj etimologoj ŝajnas samopinii pri tio, ke G estas la fonto de *-ig*. Sed ankaŭ la L ekzemploj estas tiel trafaj (kaj certe konataj al Z), ke oni devas kalkuli kun duobla deveno (tiel jam Laskin p. 202). G ekzemploj: *reinigen* "purigi" (*rein*), *kündigen* "konigi" (*kund* "konata"). *sättigen* "satigi" (*satt*), *befriedigen* "kontentigi", *befestigen* "fortikigi" (*fest* "firma, fortika"); kun *ig* en la adjektiva radiko: *heiligen* "sanktigi" (*heilig*), *nötigen* "devigi" (*nötig* "necesa"); plue *ent/schuld/ig/en* "sen/kulp/- ig/i", *ein/mund/ig/en* "en/buŝ/ig/i". Kp Nd *verzadigen* "satigi". – L ekzemploj: *mitigare* "mildigi" (*mitis*; kp I *mitig/are*, A *-ate*), *fatigare* "lacigi" (**fatis* "laco"; kp F *fatiguer*), *purgare* (L arĥ. *purigare*) "purigi", *fumigare* "fumigi", t.e. "fumaĵi" (*fumus*; kp A *fumigate*), *variegare* "multkolorigi" (*varius*), *castigare* "puni", propr. "purigi" (*castus* "ĉasta, pura"); ank. *ab/ig/ere* "forigi, forpeli".- Alia ebla L apogo estas,laŭ Collinson (Eologio I, 86), la verboj kun fino *-ficare* ("fari"), ekz. *magnificare* "grandigi". – Vd. spec. Gerdman LaE 6-7-8/1958, 82, Waringhien LV 64 s., Holzhaus p. 219. ¶ 1878 *-ig/*: *konunigare* "kununuigi". – 1881-2 *-ig/*: *brul-/ig/ad/o, sciig/o, -i, plenigu, perigó* "pereigu", *timige* k.a. ¶ Io *-ig/* ("modifikuro di *-ag*" de Beaufront 1925, 154, sed envere transprenita el Eo): *fortigar, richigar* "riĉigi", *dormigar.* – IeIa ĉe adj. ofte malhavas afikson (IeIa *siccar* "sekigi", Ia *cecar* "blindigi"): parte uzeblaj sufiksoj estas *-isar* (IeIa *modernisar, realisar;* vd. ps-sf *-iz*), en Ia ank. *-ificar* (*grassificar* "grasigi"; el L *-ficare* "fari"). Ie uzas ank. pref. *a-* (*acurtar* "mallongigi"; identa kun *a* "al"). Ĝenerala kaŭzativa sufikso ne ekzistas.

La G verboj formitaj per *-igen* orig. enhavas la adj. sufikso *-ig* (vd. *nötigen* supre); poste *-ig* estis perceptata kiel verba sufikso. G adj. *-ig* identas kun L *-icus*, Gr *-ikós*

(vd. ps-sf *-ik*). – L *-ig-* estas (almenaŭ parte) apofonia formo de *ag(ere)* "fari" (kp *-fic-* el *facere* "fari"), vd. *agi.*

-IĜ/ (f;Un *pal/iĝ-, sid/iĝ-*): Tiu ĉi sufikso formas paron kun *-ig* (vd. ekz. la pritrakton en Eisto 4/1890). Laŭ ĝenerala opinio *-ig* havas fontlingva(j)n etimo(j)n (vd. supre), sed "por la ideo 'fariĝi' ne ekzistis taŭga sufikso, kaj Zamenhof, por krei ĝin, ŝanĝis la velaron *g* en gingivalon *ĝ*" (Waringhien LV 65). Gerdman (LaE 6-7-8/1958, 82) memorigas pri la pEaj verbaj paroj (vd. LVZ I, 352), el kiuj restas *pesi* (tr.) *: pezi* (itr.). Oni povas kredi ke la ŝanĝo okazis per nura cirkumfleksigo (*g* > *ĝ*). Certe oni tenu en memoro ke en pEo *ĝ* estis esprimata per du literoj: *dz´*. Sed tio ne malhelpas, ĉar [dĵ] kiel ĉiuj afrikatoj povas esti perceptata kiel unu fonemo. Kp analogajn sufiksparojn, diferencajn nur per unu sono: *-ar : -er, -eg : -et.* – Se tiu klarigo pri la origino de *-ig* estas ĝusta, la ekzisto de kelkaj respondaj I verboj kun sufikso *-eggiare* [eĝáre] (vd. ekz. Waringhien l.c., Holzhaus p. 220) estas nura koincido: *biancheggiare* "blankiĝi", *verdeggiare* "verdiĝi, verdadi". (Analoge P *-ejar,* ekz. *verdejar.*) – Nekredebla la alternativa supozo de Varankin (p. 46) ke la fonto de *-iĝ* estas Po *mosniec* "fortiĝi" (*mocny* "forta"). ¶ 1881 *-idz'/*: *vidiz'á* "vidiĝadis", *faktidz'é* "fariĝas", *kelidz'o* "kolektiĝo", *margidz'i* "edziĝi" k.a. – 1894 *-isk* (kp Io; el L verboj kiel *obdormiscere* "endormiĝi"). ¶ Io orig. *-ij/* (< Eo): *rujijar* "ruĝiĝi", *chanjijar* "ŝanĝiĝi"; poste *-esk* (identa kun la komenca sufikso *-esk/ar,* vd. sub *ek-*): *paleskar* "paliĝi", *amikeskar* "amikiĝi". – Ie †*-ij*: *rubijar* "ruĝiĝi"; nuntempe en Ie mankas responda sufikso. – Ia (malofte) *-escer* (*rubescer* "ruĝiĝi"; kp sub *ek-*).

-IL/ (f;Un *tond/il-, paf/il-*): Oni serĉis la etimon de *-il* en ĉiuj tri grandaj lingvofamilioj (kaj krome en Vp), kio montras ke la enhavata *l* estas elemento de granda disvastigiteco en instrumentnomoj: (a) Latin(id)a: L *utensile* "(labor)ilo" (> A *utensil,* F *outil,* G *Utensilien* [plur.]); *pistillum* "pistilo"; *sedile* "seĝo" (se interpretata 'sid/il/o'; efektive la vorto signifas 'sidejo', kp *ovile* "ŝafejo", *cubile* "kuŝejo"). – Laŭ Varankin (p.35) *-il* havas H devenon: *buril* "gravurilo", *cepillo* "rabotilo", *cuchillo* "tranĉilo", *martillo* "martelo", *tornillo* "ŝraŭbo". (Tamen tiuj vortoj estas plejparte diminutivoj; krome H ne estas inter la fontlingvoj de Eo.) – Waringhien (LV 68) citas F *fermail* [-áj] "fermilo (de koliero)", *gouvernail* "direktilo" (*gouverner* "direkti, stiri"). (b) Ĝermana: Frapa estas la simileco de Eo *ŝlos/- ilo* al G *Schlüss/el (schliessen* "ŝlosi") kaj de *flug/ilo* al G *Flügel (fliegen* "flugi"), kp *Deckel* "kovrilo" (*decken* "kovri"), *Nadel* "kudrilo" (*nähen* "kudri"), *Raspel* "raspilo" (*raspen*). Tiu *-el* estis origine *-il* (Collinson Eologio I,86). En A aperas kelkfoje la sama sufikso: *chisel* "ĉizilo", *shovel* "ŝovelilo", kun varianto *-le: needle* "kudrilo", *pestle* "pistilo". Kp en la vortaro *nadlo, ŝovelo.* – Al G *-el* respondas Ji *-l,* kp spec. *shlisl* "ŝlosilo", *fligl* "flugilo". (c) Slava: R *kadilo* "incensilo" (*kadit* "incenso"), *kormilo* "direktilo, stirilo" (*korma* "poŭpo"), *kropilo* "aspergilo" (*kropit'* "aspergi"), *molotilo* "draŝilo" (*molotit* "draŝi"), *pravilo* "direktilo, regulo", *ŝilo* "aleno", propr. "kudrilo" (*ŝit'* "kudri"). Pli vastan uzon havas la vortfino *-ilo* en la instrumentnomoj de Bg, vd. Murgin 1992a, 15 s. (Kiel konstatas Duc Goninaz 1974,37, la slava sufikso estas envere *-lo,* dum la antaŭa *i* apartenas al la vortradiko.) – Por la sekcioj (a)-(c) kp la ekzemplarojn en Golden 1979,6 kaj Holzhaus p. 220 s. – (d) Golden (l.c.,7) devenigas *-il* de la Vpa instrumentsufikso *-iel (toviel* "levilo", *vamiel* "varmigilo"), modifita por konformi al la Ea sufiksstrukturo VC. – **Prijuĝo:** Ŝajnas al mi evidente, ke Z havis antaŭ si G *Schlüssel* kaj *Flügel,* kiam li estis kreonta la instrumentnomojn de *ŝlos-* kaj *flug-*. Tamen li ne elektis la for-

mon *-el* (kiu krome povus havi certan apogon en A), evidente pro la prepozicio *el.* De kie li prenis la *i*? Apenaŭ el G ant., kvankam tio ŝajnas esti diskutita antaŭ cent jaroj (káj Laskin 1896 káj de Beaufront 1898 citas G ant. formojn: *sluzzil, flugil, hevil* "levilo", *driscil* "draŝilo", *zugil* "kondukilo"). Kredeble li ĉerpis la vokalon el R, kies formoj ekzakte (pli bone ol la Vpaj!) koincidis kun la Ea substantivmodelo. Oni ankaŭ ne subtaksu la influpovon de la internacia latindevena *utensile* (en 1925, de Beaufront devenigis la Idan sufikson *-il* de tiu vorto). ¶ 1881-2 *-il/: penc'ilo* "kombilo", *tintilo.* ¶ Io *-il/* (< Eo): *brosilo, pektilo* "kombilo", *razilo.* – Ia *-oria*: *balanciatoria* "balancilo" (kp F *balancoire*), *hachatoria* "hak-tranĉilo" (kp F *hachoir*). – Mankas en Ie.

El HE instrumentsufiksoj **-(i)lo-, *-(u)lo-, *-(e)la* (> pĜ *-ila,* ekz. **slutilaz* "ŝlosilo", kp Nd *sleutel*), trovebla ekz. en L *cingulum* "zono" (de *cingere* "ĉirkaŭzoni"), *sella (< *sedla)* "seĝo, 'sidilo'". Tiuj sufiksoj ŝajnas esti mallongaj variantoj de la plej ofta HE il-sufikso **-dhlo-*; kp Po *czerpadl'o,* Bg ant. *črŭpalo* "ĉerpilo".

-IN (f;Un *patr/in-, fianĉ/in-*): Ĝermana (precipe G) femala sufikso, kiu estas apogata de sporadaj similaj formaĵoj en la ceteraj fontlingvoj. Ekzemploj el G: *Artistin* "artistino" (*Artist*), *Königin* "reĝino" (*König* "reĝo"), *Lehrerin* "instruistino" (*Lehrer), Löwin* "leonino" (*Löwe*). [Kp Nd. *leeuwin* "leonino" (*leeuw*); Sv *lärarinna* "instruistino" *(lärare)*, *lejoninna* "leonino" *(lejon)*.] Certaj unuopaj femalaj vortoj atingis vastan internaciecon, ekz. "carino": A *czarina,* F *tsarine/czarine,* I(H) *zarina*; "heroino": L *hero/ina,* A *-ine, (*H *-ína*), F *héroïne,* G *Heroin(e),* I *eroina,* R *geroinja* (< Gr *hêrôínê*); "reĝino": LI *regina,* F *reine,* (H *reina*). Kp ank. LI(H) *gallina* "kokino" (L *gallus,* I[H] *gallo* "koko"). Internaciaj estas ankaŭ pluraj virinnomoj formitaj el viraj nomoj, ekz. *Albertin/a, -e, Carolin/a, -e, Christin/a, -e, Georgin/a,-e, Paulin/a,-e*; (L) *Agrippina* (de *Agrippa* mask.). Slavaj variantoj: Po *bogini* "diino" (*bog*), *gaz'dzina* "kamparanino" (*gazda* [reg.] "kamparano"), *prorokini* "profetino" (*prorok*), *sedzina* "juĝistedzino" (*sedzia* "juĝisto"); R *boginja* "diino" (*bog*), *grafinja* "grafino" (*graf*), *monaĥinja* "monaĥino" (*monaĥ*). Vd. Wajsblum Eologio I,206 kaj Holzhaus p. 221 s. – Laŭ Jespersen (1928, 36) la sufikso estas prenita el Universalglot de Pirro (ekz. *rexin* "reĝino") – nenecesa hipotezo, kiam oni konsideras la riĉan materialon troveblan en la Zaj fontlingvoj. Neniu tamen – laŭ mia scio – ŝajnas esti serĉinta la originon en L *femina* "virino" kun ties adj. *femininus.* En Io oni pravigis la sufiksparon *-ul* : *-in* per la L vortoj *masculus* ("masklo") kaj *femina.* ¶ 1881-2 *-aŭ* (*amentaŭ* "amantino", *filaŭ* "filino", *kos'anaŭ* "korteganino", *princaŭ, puettaŭ* "knabetino" kun varianto *-in/* (*princino, filino*): vd. Cash 1992, 6. Tiu "kurioza finaĵo" (Waringhien LV 61) ŝajnas esti klarigebla dumaniere: (a) kreita laŭ G *Frau* '"virino", kiun Z (ankaŭ) utiligis por la radiko *fraŭlin-*; kp ev. G *Sau* "porkino", A *cow* [kaŭ] "bovino". (b) laŭ Mattos (p. 31) bazita sur la femala finaĵo *-a* de LI(H), responda al la *-o* de la masklaj vortoj, kun diftongiga aldono (necesa, ĉar alie ĝi kolizius kun la adjektiva *-a; ŭ* estis la sole ebla duonvokalo ĉe *a,* ĉar *aj* havis gramatikan funkcion): kp supre sub *-o* en la sekcio Kategoriaj indikiloj. La finaĵo estis negardebla, ĉar ĝi kontraŭas la principon pri ĝeneralaj kategorivokaloj kaj kaŭzas problemojn ĉe la akuzativo (en 1881-2 *-l*): vd. Günkel 1996, 185. ¶ Io *-in/* (< Eo, sed kp supre): *homino, profesorino, rejino.* – Ie *-a* (se la vira formo finiĝas per *-o* aŭ *-or*): *amíca, cassera* "kasistino", *sutora* "kudristino"; *-essa* (ĉe rangtitoloj kaj bestinoj): *comtessa* "grafino" (*comte*), *tigressa* (*tigre*). – Ia *-a* (se la vira formo finiĝas per *-o*):

amica; *-rice* (se la vira formo finiĝas per *-or*): *cantatrice* "kantistino" (*cantator*); *-essa* (ĉe rangtitoloj kaj bestinoj): *prestressa* "pastrino" (*prestre*), *tigressa*. [Suf. *-essa* el F *-esse*, ekz. *comtesse* "grafino" ; I *-essa*, ekz. *contessa* s.s.; H *-esa*, ekz. *condesa* s.s. – Suf. *-rice* el FI *-rice*, ekz. *actrice* (F), *attrice* (I) "aktorino", kp L *victrix* "venkantino".]

Ĝerm. *-in* el pĜ **-inî, *-injô*, bazita sur HE *n*-stemo + femala suf. *-î* (vd. ekz. *ŝi*), kp Sa *râjñî* "reĝino" (*râjan-* "reĝo").

-IND/ (f; Un sen ekz., UV *laŭd/ind-*): Modifita formo de la L gerundivo, kiu – krom la primara senco "kiu devas esti ...ata" – povis havi la sencon "kiu meritas esti ...ata" (*liber legendus* "leginda libro", *mulier amanda* "aminda virino"); pri la proksimaj rilatoj de tiuj du sencoj, vd. PIV s.v. *-ind/*. La L gerundivsufiksoj estas: 1-a kjg. *-and(us)*, 2-a kaj 3-a kjg. *-end(us)*, 4-a kjg. *-iend(us)*. Estas nature supozi, ke la Ea *-i-* estas prenita el la lastnomita formo: *audiendus* > *aŭdinda* (Waringhien LV 69 iom mise nomas la formon "speco de kunmikso inter la verb-adjektivo de la tria kaj tiu de la kvara konjugacio"). Alia ideo estas, ke la *i* estas influita de la adjektivo L *dign/us*, F *-e*, (H *-o*) "inda" (tiel Scott p. 112, Yamasaki s.v.). ¶ Io *-ind/* (< Eo): *aminda, kredinda*. Mankas en IeIa, kp Ie *amabil* (Ia *-e*) "aminda", Ie *credibil* Ia *-e*) "kredinda", propr. "amebla" resp. "kredebla".

Vd. la etimologie identan *-end/*.

-ING/ (f; Un *kandel/ing-*, *plum/ing-*): Necerta etimologio. Waringhien (1967, 52) deklaras ĝin 'probable pruntita el D[=G] Ring : ringo, transformita en sufikson per apokopo de la komenclitero'. Gerdman (LaE 6-7-8/1958, 82) metas kiel fonton G *Fingerling* "fingringo, t.e. la ĉapeto, kiun oni uzas kudrante por ŝirmi la fingropinton kontraŭ la pinta kudrilo". Anstataŭ analizi *Finger* + suf. *-ling*, Z disdividis *Fingerl* "fingreto" + -suf. *-ing*; la elekto eventuale estis apogata de *Ring*. Evidente sub influo de la hipotezo de Gerdman, Waringhien en LV (p. 68) ŝanĝis sian antaŭan opinion: "el la finaĵo de vortoj kiel [G] *Daumling* ["polekingo"], *Fingerling* li [=Z] detranĉis parton de la germana sufikso *-ling* por fari sian laŭmodelan sufikson *-ing-* kun proksimume sama signifo en: *fingringo* (la germana signifas propre: *fingrujo*)". [Por kompleteco mi mencias la originalan proponon de Scott, p. 112: *-ing* eltirita el G *E*ING*ang* "enirejo" = 'kion io eniras', kaj tiun de Laskin, p. 202: el Gr *sy'rinx/sy'*RING*os* "tubo; aksingo de rado".] – **Prijuĝo:** Ŝajnas al mi, ke oni en tiu ĉi demando devas konsideri la semantikon: *Ring* ne havas la funkcion de 'ingo', sed *Fingerling* ekzakte respondas al la senco de Eo *fingr/ing/o*. Ĉu la formo de la sufikso estas rezulto de (mis)analizo, ĉu ne, mi pensas ke oni en tiu vorto trovas kontentigan etimon. ¶ Io *-ier/*: *kandeliero, plumiero*. – IeIa *-iero*: *candeliero* (ambaŭ), *cigarriero* (Ie) "cigaringo" [ĉiuj el F *-ier* (*chandelier*) kaj I *-iere* (*candeliere*)].

G *-ling* estas diminutiva sufikso, kie *l* orig. estis parto de la radiko; *-ing* el pĜ **-inga-* el HE **-enko-*, signanta apartenecon.

-ISM/ (2; RE *magnetism-* k.a.): Plene internacia sufikso de greka deveno. Formoj: A *-ism* (*socialism*); F *-isme* (*socialisme*), G *-ismus* (*Sozialismus*), I(H) *-ismo* (*socialismo*), Po *-izm* (*socjalizm*), R *-izm* (*socializm*); L *-ismus* (L klas. *barbarismus*, L mez. *paganismus*, L med. *rheumatismus*). Ekzemploj el Gr: *barbarismós, hellênismós, khristianismós*; *baptismós* "bapto". – La sufikso estas uzebla memstare en A: *ism* "ismo".¶ Io *ism/*, Ie *-isme*, Ia *-ismo*.

Gr *-ismós* estas orig. suf. por formi agsubstantivojn de verboj kun suf. *-iz*, ekz. *baptismós* "bapto" de *bapt/iz/ein* "bapti", *hellênismós* de *hellênízein* "paroli/vivi helene". Ĝi estas analizebla */iz/mo-*: por *-iz*, kp tiun ps-sf; por *-mo*, kp *ritmo, spasmo*. – Suf. *-ism* estas identa kun ps-sf *-ism* kaj paralela al

la ps-sf *-asm,* kp tiujn. Kp sekv.

-IST/ (f;Un *bot/ist-, mar/ist-*): Plene internacia sufikso de greka deveno, ĝenerale aldonita al substantivaj radikoj. Krom la du sencoj 'ismano' (*socialisto*) kaj 'artpraktikanto' (*artisto*), Z vaste utiligis la sencon 'profesiulo' (*dentisto*), farante *-ist* la ununura Ea sufikso kun tiu signifo kaj aplikante ĝin ankaŭ post verbkategoriaj radikoj (*kantisto, kudristino*). Formoj: A *-ist (artist, dentist, socialist)*, F *-iste (artiste, dentiste, socialiste)*, G *-ist (Artist, Dentist, Sozialist)*, I(H) *-ista (artista, dentista, socialista)*, Po *-ysta/-ista (artysta, dentysta, socjalista)*, R *-ist (artist, dantist, socialist)*; L *-ista (baptista, evangelista, grammatista* [signifoj kiel en Gr]). Ekzemploj el Gr: *baptistê´s* "baptanto", *euangelistê´s* "evangeliisto", *grammatistê´s* "elementinstruisto", *logistê´s* "kalkulisto". ¶ 1882 *-ist/: s'uisto* "porkisto". – 1906b *-st,* se la radiko finiĝas per *-i.* ¶ Io *-ist/* (kiel en Eo): *artisto, fotografisto, kantisto, socialisto.* – IeIa *-ista* (semantiko laŭ la fontlingvoj; ne post verbradikoj); por profesiaj titoloj ank. Ie Ia *-or* (Ie *instructor* "instruisto", IeIa *cantator* "kantisto") kaj *-er/* (IeIa *cassero* "kasisto") [vd. ps-sf *-or* 1 resp. *-ar(i)*].

Gr *-istê´s* estas orig. suf. por formi agantnomojn de verboj kun suf. *-iz* (kp tiun ps-sf), ekz. *baptistê´s* "baptanto" de *bapt/íz/ein* "bapti", *logistê´s* "kalkukisto" de *log/íz/esthai* "kalkuli" (vd. sub *logiko*). – Identa kun ps-sf *-ist,* vd. tiun. Kp la antaŭan.

-NJ/ (f;Un *Ma/nj- < Mari-, Emi/nj- < Emili-*): Bazita sur R virinaj karesformoj kiel *Anja* (de *Anna*), *Manja* (de *Marija*), *Sonja* (de *Sofija*), *Tanja* (de *Tat'jana*); kp *mamen'ka* "panjo" (de *mama*). Vd. Holzhaus p. 224, Varankin p. 39, Duc Goninaz 1974, 35 kaj 1978, 1. La fonto do estas analoga al tiu de la vira karessufikso *-ĉj.* ¶ 1894 *-et* (t.e. uzo de la dim. sufikso). ¶ Io *-et/* (dim.): *matreto* "panjo". – Ie *-innia* (pli frue *-in'*): *matrinnia* "panjo" (Haas p. 32). – Ia malhavas karesajn sufiksojn.

-OBL/ (f;Un *du/obl-*): Iamaniere tiu sufikso estas ligita kun AF *double* [A da'bl, F dubl] "duobla" (kp NdSv *dubbel*): la konsonantoj estas tuj rekoneblaj (kp ank. A *treble* "triobla"), dum oni povas heziti pri la vokalo. Laŭ Holzhaus (p. 224) temas pri miksformo kun vokalo prenita el G *doppelt* s.s. Laŭ Waringhien (1967. 26) *-obl* estas pruntita el H *doble* s.s. (apenaŭ kredeble, ĉar Z ne utiligis H en sia kreado). Pli simple estas supozi, ke la *o* devenas de la AF grafismo. Formo **-ubl* estus malOportuna post la numeralo *du*; laŭ mia opinio Z tial prenis la alian eron en la F digrafo (kp cetere F *ou* > Eo *o* en *kovi, trovi*). Povas esti, ke influis la deziro de Z, ke ĉiuj tri numeralsufiksoj komenciĝu per *o-* (tiu koincido ne povas esti hazarda). – Gregor (p. 13) listigas *-obl* inter L-devenaj sufiksoj, sed nek la vokalo nek la konsonantkombino kongruas kun L *duplus/duplex* "duobla", *triplus/triplex* "triobla", *quadruplus/quadruplex* "kvarobla" ktp (ank. en F *quadruple,* kp F *cent/uple,* I[H] *-uplo,* L *-uplus* "centobla"). Kp Mattos (p. 40), kiu konstatas la nenaturecon de ev. formoj kiel **duipla, *duupla.* ¶ 1881 *-obl/: unobla, duobla, triobla.* ¶ Io *-opl/: duopla, triopla.* – Ie *-plic: duplic, triplic.* – Ia *-(u)ple: duple, triple.*

AF *double* el L *duplus,* propr. "dufaldita", kunm. de *duo* "du" kaj senvokala fomo de HE rad. **pel-* "faldi" (HE praformo **dŭeiplo-,* kp spec. Gr *diploús* "duobla"). Kp sub *simpla.*

-ON/ (f;Un *kvar/on-*): Necerta etimologio. La plej multaj devenigas la sufikson de la lasta silabo en AF *fraction* (I *frazione*) "frakcio" (vd. Scott p. 88, Gerdman LaE 6-7-8/1958, 83, Waringhien LV 66); do ne temus pri prunto de vera sufikso sed apokopo de la vorto esprimanta la funkcion de la sufikso. Nur unu alternativan konjekton mi trovis: laŭ Mattos (p.40) el la L distribuaj numeraloj, ekz. *octoni, deceni* (tamen ili signifas "okope",

"dekope" ktp, kaj nur en unu okazo troviĝas *-on-*, nome ĉe la numeralo *octo* "8" [*octoni*]; la sufikso aliloke estas *-(e)ni)*. – Ĉu do nenie en la fontlingvoj troviĝas vorto finiĝanta per *-on* kun la senco "ono"? Tamen jes: F *quarteron* signifas "kvarono de cent(o)" (kp I †*quarterone* "kvarono de mezuro"). Estas tute eble, ke Z atentis tiun vorton kaj prenis ĝin kiel deirpunkton por *kvaron-*. ¶ 1881 *-on/*: *(unuono), duono, triono.* ¶ Io *-im/* (kp L *decima,* F *dixième,* I *decimo* "dekono"): *duima* "duona", *quarimo* "kvarono". – Ie *demí* "duono" (< F *demi*), cetere per ordaj numeraloj: *quaresim* "kvarono". – Ia *medietate* "duono" (el L *medietas,* I *metà*), cetere per ordaj numeraloj: *quarte parte, quarto* "kvarono".

-OP/ (f;Un *du/op-*): Necerta etimologio. Hipotezoj: (a) *-op* estas inversigo de la prepozicio *po* (Gerdman LaE 6-7-8/1958, 83): kontraŭ la individueco de *po* ('al ĉiu aparte') staras la kolektiveco de *op* ('ĉiuj kune'). Frapa apogo por tiu opinio estas la citaĵo el PV s.v. *po,* prezentita de Holzhaus (p. 225): "Ili marŝis po kvar en ĉiu vico, ili marŝis kvarope en vicoj". Vd. ank. Waringhien LV 67, Wajsblum Eologio I, 206. (b) *-op* estas prenita el la Li numerala sufikso *--ópas,* ekz. *dvejópas* (de *du*"du"), *trejópas* (de *trys* "tri"), *ketveriópas* (de *keturi* "kvar"): Brozoviĉ 1959, Waringhien LV 450 (postnoto), Trunte 1971, Poŝka 1971 kaj 1981. Tamen "la signifo de la sufikso *-ópas* estas pli vasta ol tiu de la esperanta *-op*: *dvejópas* egalvaloras ne nur al 'duopa', sed ankaŭ al 'duobla, duspeca'" (Waringhien l.c.). La ebleco mem de Li etimoj en Eo estas pridubata, vd. sub *tuj.* (c) *-op* estas rezulto de endokopo (por la termino, vd. sub *-eg*) el iu fontlingva substantivo kun signifo de kolektivo, ekz. G *dOPpelt* "duobla" (L askin p. 201), L *cOPula* "kunligo" (Scott p. 88), H *trOPa* "trupo" (Waringhien 1946), Eo *grUPo* (Mattos p. 55; *u* > *o* laŭ la formo de 1881, vd. ĉi-poste).

– **Prijuĝo:** En pEo 1881 la koncernaj vortoj havis la finon *-oe*: *unoe, duoe, trioe.* Ĉar ambaŭ vokaloj havis gramatikan karakteron (*o* subst., *e* adv.), ŝajnas, ke la origina senco estis " (en la maniero de =)kiel duo/trio" ktp. En 1887 la *o* restis sed bezonis kompletigon per konsonanto por konformiĝi al la tiam reganta sufiksmodelo VC. La elektita konsonanto estas *p,* kies devenon estas neeble fiksi: ĝi povas esti *po* aŭ eventuale iu el la kolektivsignifaj substantivoj cititaj. – En la reformpropono de 1894 la sufikso estas nuligita.

-UJ/ (f;Un *cigar/uj-, pom/uj-, Turk/uj-*) 1) 'entenilo' 2) 'arbo, planto' 3) 'lando': Necerta etimologio, ofte diskutita. **Historio** (vd. precipe Albault 1991a, 7-21): En 1881-2, ni trovas du vortojn kun la sufikso *-i-*, antaŭulo de *-uj*: *rudz'io* "rozujo" kaj *verbio,* kiu estas ĝenerale tradukata "vortaro" sed egale bone povas esti interpretata "vortujo, ujo por vortoj". Do pEa *-i-* certe havis la sencojn 1 kaj 2. Ni ne scias eksplicite, ke Z en tiu tempo uzis ĝin ankaŭ por la senco 3, sed tio estas probabla, ĉar li estis konscia pri la internacieco de tiu sufikso kun tiu senco. En 1887, kiam *-i* fariĝis neebla pro kolizio kun la infinitivmarko *-i* kaj la korelativa bazo *-i-*, aperas *-uj* kun ĉiuj tri sencoj (vd. la ekzemplojn de Un!). En la reformpropono de 1894 Z reiris al la sufikso *-i* (trisenca), ĉar la tiam proponata gramatika strukturo forigis la riskon de kolizioj. Fine, en 1906-7 Z reduktis la uzadon de *-uj* al la senco 1, dum li proponis *-i* por la senco 3 kaj enkondukis novan sufikson *-jer* por la senco 2 (vd. PVZ 8,179): *rozjero* "rozujo" (el F *-ier,* ekz. *pommier* "pomujo", *rosier* "rozujo"). – **Deveno:** La solvendaj problemoj estas: (a) de kie Z prenis la trisencan *-i*? (b) Kiel okazis la evoluo *-i* > *-uj*? Kiom koncernas (a), estas plej facile klarigi la sencon 3 de *-i,* kiu estas la plej internacia sufikso en landnomoj (vd. Holzhaus

p. 226 s. kaj Albault v.c. multloke). Ankaŭ rilate la sencon 2 ni povas sekvi Albault (v.c., 13): F *-ier* estas prononcata [ié], kio donas **-ie* en pEo 1878 (*-e* substantiva finaĵo); en 1881, *-e* cedis lokon al *-o*: *rudz'io,* kp F *philosophie* > Eo *filozofio.* La senco 1 povas esti enkondukita analogie al F *-ier,* kiu ankaŭ signifas "ujo" (*sucrier* "sukerujo"). – Kiom koncernas (b), tiu evoluo estas skizita (iom diversmaniere) de Albault (v.c., 16-18), Gerdman laŭ Nylén (LaE 6-7-8/1958, 83), Waringhien LV 66, Holzhaus (p. 227) kaj Ludovikito (PVZ, kromkajero 1, 181). Estis necese anstataŭigi la *-i* de 1881 per alia sufikso. En landnomoj Z krom la vokalo *i* disponis pri la konsonanto *j* en la R kaj Po formoj *-ija* (R *Rossija* "Rusujo", *Turcija* "Turkujo" ktp; Po *Francja, Grecja* ktp); certe li ankaŭ konsciis, ke *-ia* en I landnomoj praktike estas prononcata [ija]; fine li havis la saman konsonanton en G *Türkei* [-áj]. Ĝi tamen bezonis akompanon de vokalo por konformiĝi al la aktuala sufiksmodelo VC. La kombinon *-ij* li evidente malakceptis ("malbonsona" laŭ Waringhien kaj Holzhaus; ĉu envere ĉar tro fremda al la okcidenteŭropaj fontlingvoj?). El la ceteraj kombinoj, *aj/oj* estis okupitaj por la pluralo de adjektivoj kaj substantivoj kaj *ej* estis sufikso. Restis *-uj,* ankoraŭ unu utiligo de la 'rezerva vokalo' de Z (vd. Waringhien LV 66). Tiu pensoĉeno do destinas la sencon 3 kiel la primaran de *-uj.* Z tamen "etendis ĝin al objektoj entenantaj ion kaj por plantoj" (Gregor 1982, 23; kp Collinson Eologio I:2,87); efektive tio estis ja nura transpreno de la sencoj de *-i* en 1881. (Tiu procedo ŝajnas postuli, ke la sufikso *-ej* jam ekzistis; tamen laŭ de Beaufront [1925, 152], Z demandite deklaris, ke *ej* estas "quaza modifikuro di *uj*". Nu, la tuta afiksa sistemo estis probable transformata samtempe; se tiel, tiu eldiro nur povis substreki la semantikan ligon inter la du sufiksoj.) – Aliaj serĉis en la fontlingvoj modelojn por *-uj.* Plej frapa estas la simileco al F *étui* "ujo, skatolo", kiu povus esti analizata 'et/uj/o' (Waringhien) aŭ 'uj/et/o' (Gerdman); kp Albault v.c., 19. En I ekzistas kelkaj ujnomoj finiĝantaj per *-oio* [ójo] (vd. Waringhien LV 66), ekz. *serbatoio* "rezervujo": modifo de la vokalo estus necesa ankaŭ tie. La saman sonkombinon rezultigas la klarigo de Albault (p. 20): la landa *-uj* povus deveni de gentonomoj en pluralo, ekz. **poloj-o, *hungaroj-o* (li pensas pri la fakto, ke G *Polen, Ungarn* estis origine pluraloj de la gentonomoj *Pole, Ungar*). ¶ Io *-uy/* [uj] (< Eo,'mallongigo de *etuyo*': de Beaufront 1925, 167), nur en senco 1: *inkuyo, sigaruyo*; *-ier/* (senco 2): *pomiero, roziero*; *-ia* (senco 3): *Anglia, Turkia.* – Ie *-iere* (senco 1): *incriere* "inkujo"; *-iero* (senco 2): *pomiero*; *-ia* (senco 3): *Anglia, Turcia.* – Ie *-iera* (senco 1): *sucriera*; *-iero* (senco 2): *rosiero*; *-ia* (senco 3): *Anglia, Turchia.* [Ĉiuj IeIa sufik4soj por sencoj 1 kaj 2 estas variantoj de F *-ier,* citita supre.]

Pri *-i,* vd. ps-sf *-i.* – F *étui* de F ant. *estuier* "enfermi".

-UL/ (f;Un *bel/ul-*): Necerta etimologio. En letero al Couturat 1905-09-17 Z skribis: "La sufikso 'ul' sub tre diversaj formoj estas uzata precipe en la lingvoj slavaj; ĝia neekzistado en aliaj lingvoj devigas havi multajn novajn vortojn". Ĉar en R ekzistas grupo da (pejorativaj) substantivoj kun sufikso *-ulja,*tiu povus esti la fonto de *-ul*: *grjaznulja* "malpurulo" (*grjaznyj* "malpura"), *sonjulja* "dormemulo" (kp *sonja* s.s.), *krivulja* "burleskulo" (ekzemploj laŭ Varankin p. 37, ripetitaj ĉe Holzhaus p. 229). Pli similaj ankoraŭ estas la derivaĵoj cititaj de Laskin (p. 203): *borodula* "barbulo" (*boroda), gorodula* "babilulo" *(gorodit'* "babilaĉi"), *rogula* "kornulo" (*rog* "korno"). – Tamen la eldiro de Z povas esti interpretata tiasence, ke li ricevis la IDEON de la sufik-

so per la slavaj lingvoj, ne necese ke li ĉerpis la FORMON el tia. Oni plej ofte serĉis la fonton en certaj L vortoj finiĝantaj per *-ulus* (kp Waringhien LV 69, Holzhaus p. 228, Collinson Eologio I;2,87), ĉefe adjektivaj sed facile substantivigeblaj: *bibulus* "drinkem/a, -ulo" (*bibere* "trinki"), *credulus* "kredema" (*credere*), *garrulus* "babilem/a, -ulo" (*garrire* "babili"), *tremulus* "tremanta" (*tremere*; kp *tremolo*). Ĉu ĝi estas prenita el R, ĉu el L, Z vastigis la semantikon de la sufikso kaj donis al ĝi la specialan rolon funkcii por substantivigo/personigo de adjektivoj: *blind/ul/o, virg/ul/in/o* ktp. Gerdman (LaE 6-7-8/1958, 83) atentis pri tiu aspekto, proponante (laŭ ideo de Varankin) kiel etimon L *ullus* "iu": 'iu bela' = 'bel/ul/o'. – Golden (1980, 1-5) kredis esti trovinta alian fonton, nome la Vpa personsufikso *-el* (*tidel* "instruisto") kaj ĝiaj frataj sufiksoj *-al* (por eminentuloj: *dünal* "ministro") kaj *-äl* (indikanta mensan trajton: *menäl* "humaneco"): el tiuj, nur *-el* povas iel esti komparata kun *-ul* (*yunel* "junulo"); tamen ĝia ĉefa funkcio estas formado de agantnomoj, kaj ĉar la vokalo estas malsama, la tuto restas nepruvebla. Kp Mattos p. 85: "La semantiko de la Volapukaj /el/ kaj /al/ estas komplete distinkta de tiu de la morfemo /ul/, kaj restas nur la parta sonsimileco, kiu estas tro magra bazo por konfirmi la deprunton." La propra hipotezo de Mattos estas ke *-ul* rezultas el duobla modifo de pEo *-or* (vd. sube): *o* > *u* ("sola libera vokalo"), *r* > *l* ("najbara konsonanto"). – [La mencio de Collinson (1950, 87) pri la Rm difina artikolo *-ul* – certe ekster la atingoradiuso de Z -, ekz. *voinicul* "kuraĝulo", *bogatul* "riĉulo", estas misa, ĉar laŭ Golden (1980,2) tiuj vortoj estas subst.-igeblaj sen la artikolo.] ¶ 1881-2 *-or/*: *blenoro* "abomenulo", *frindoro* "fremdulo", *maljunoro* "maljunulo", *stuttoro* "instruulo" (kredeble el la L agantnoma sufikso *-or*: PVZ 5, 153; vd. ps-sf *-or* 1). Mattos (p. 84 s.) certe pravas supozante, ke tiu sufikso fariĝis neebla, ĉar ĝi estigus misanalizojn de vortoj kun la internaciaj pseŭdosufiksoj *-or* kaj *-ator* (vd. *-or* 1 kaj 2 en la listo de ps-suf.). ¶ En Io, *-ul* estas vira sufikso (mll. de *maskulo* "masklo": *fratulo* "frato", *kavalulo* "virĉevalo") kaj adj. estas subst.-igataj sen sufikso (*blindo* "blindulo", *grando*; kp pri tio Z en letero al Couturat [LZ 1, 186]). Ie havas suf. *-on*, 'persono karakterizata de la radiko': *dormon* "dormemulo", *grison* "grizulo". En IeIa, adj. estas personigataj per la finaĵoj *-o* (mask.) kaj *-a* (fem.): *avaro, bella*.

-UM/ (f;Un sen ekz., RE *am/ind/um-, brul/um-, buŝ/um-, kol/um-, kruc/um-, mal/varm/um-*): Necerta etimologio. La nedifinita signifo de la sufikso malfaciligas serĉadon de etimo. Du hipotezoj estas prezentitaj: (a) *-um* estas la G prepozicio *um* "ĉirkaŭ" (Varankin p. 34). Tio kongruas perfekte por la objektnomoj *kol/um/o* "ĉirkaŭkolo", *man/um/o* "ĉirkaŭmano", *buŝ/um/o* "ĉirkaŭbuŝo" (Holzhaus p. 229), sed nebone por la verboj formitaj per *-um*: *akv/um/i, buton/um/i, okul/um/i* ktp. (b) *-um* estas la L neŭtra finaĵo de la 2-a deklinacio. Waringhien (LV 69) citas tiajn formojn enpenetrintajn en la modernajn lingvojn: F *album, radium*; G *Podium, Referendum, Spektrum*. En ili *-um* "povas esti sentata kiel sufikso kun nedifinebla senco". Iom pli precize, sed same nekonvinke, Gerdman (LaE 6-7-8/1958, 83):"La nomoj de kelkaj kemiaj elementoj, ekz. *helium* el la greka vorto *helios* suno, kaj *radium* el la latina *radius* radio, ja estas kreitaj el la respektivaj radikvortoj pro certa rilato al ĉi tiuj, same nedifinita kiel la rilato inter la um-vortoj kaj iliaj radikvortoj". – Ĉu Z tutsimple opiniis, ke NEŬTRA finaĵo taŭgus kiel NEŬTRALA (> 'nedifinita') sufikso? – Estas ankaŭ imageble, ke Z prenis L *-um* ne kiel signon de neŭtro sed pro ĝia ĉeesto en vasta gamo de

vortkategorioj: subst. (*donum*), adj. (*bonum*), numeralo (*quartum*), pron. (*nostrum*), verbo (*spectatum* "por spekti"), adv. (*circum* "ĉirkaŭe"), konj. (*dum*), itj. (*eccum* "jen li") – vere ĉiofara (kaj tial nedifinita)vortfino! ¶ Io *-um/* (< Eo): *kolumo, foliumar.* Tiurola sufikso mankas en IeIa.

PSEŬDOPREFIKSOJ

La listo registras la pseŭdoprefiksojn menciitajn kiel tiaj en la vortaro, kune kun variantoj kaj etimoj.

AB- (***ab***- antaŭ vok. kaj kons., ***a***- foje antaŭ kons., ***abs***- antaŭ *c, t: abomeni, abrupta, alineo, absceso, abstrakta*): L prep. "(for) de" kun sama signifo kiel prefikso (*abituriento, ablativo*), ank. "mis-" (*aborti*); eble intensiga en *absurda.*

Identa kun Gr *apo-* "de, for" (vd. tiun ps-pf), Sa *ápa* "for", G *ab-* "for", A *of* "de", el HE **apo* "(for) de".

A(D)- (***ad***- en L-devenaj vortoj antaŭ vok. kaj *j, m, v;* ***a***- en L-devenaj vortoj antaŭ aliaj kons. kaj en romanaj vortoj: *adapti, adjektivo, admiri, advokato; aboni, afekti, agrafi, akuzi, alarmo, amuzi, anonci, aparato, aresti, asigni, atendi,* kp *agaci*): L prep. *ad* "al" plus F *à*/I[H] *a* "al" kun pluraj signifoj kiel prefikso: (a) "al" (*advento, afikso, akcepti, atribui* k.m.a.); (b) "apud" (vd. *adjutanto, administri, apozicio, asesoro, atesti*); (c) "aldone, krome" (vd. *adicio, akiri*); (d) "igi" (uzata por fari kaŭzajn verbojn, spec. en la romanaj lingvoj): *afranki, akceli, amortizi, aprobi, aresti, asekuri;* kp komencan aspekton en *akuŝi.* Ĉe kelkaj kunmetoj, Eo preferus alian prep. ol "al", ekz. *admiri, akcizo, atingi.* ¶ Vd. *al.*

A(N)- (***a***- antaŭ kons., ***an***- antaŭ vok.: *atomo, anonima*): Gr pref. kun signifo "ne-, sen-".

Identa kun Sa *an-,* L *in-* (vd. ps-pf *in-* 2), AG *un-* s.s., el HE **n(e)* "ne" (vd. tiun).

ANA- : Gr prep./adv. kaj pref. kun signifoj "supren; reen, inverse" (*ana/gramo, -kronismo, -pesto*); "dis-" (*ana/lizi, -tomio*); "laŭ" (*analoga*).

Par. al Sa *ánu* "laŭ"; Gt *ana* "al, sur, kontraŭ", G *an* "ĉe", A *on* "sur"; HE praformo **an(o)* "supre(n)".

ANTI-: Gr prep. "kontraŭ, vid-al-vide al; anstataŭ", kiel pref. "kontraŭ-": *anti/patio, -tezo;* ev. loka senco en *antipodo.*

Identa kun L *ante* "antaŭ", vd. tiun.

APO-: Gr prep. "(for) de" kun simila senco kiel pref.: *apo/geo, -stolo, -strofo:* signifas formeton/forkaŝon en *apo/krifa, -teko,* elĵeton en *apopleksio,* apartigon en *apoteozo;* necerta rolo en *apologo.*

Par. al L *ab* "de", vd. tiun ps-pf.

ARKI- : Gr pref. signifanta "ĉef-, unua": *arki/pelago, -tekto* (vd. tiujn vortojn).

Kunmeta formo de Gr *árkhein* "regi, esti la unua" (kp. sub *arkaika*).

CIRKUM- (L *circum-,* F var. *circon-,* vd. ***cirkon****stanco*): L adv. kaj pref. kun signifo "ĉirkaŭ(e)": *cirkumflekso* (vd. sub tiu vorto).

Orig. kaza formo de L *circus* "rondo" (vd. *cirko*).

DE- (I var. ***di***- en *di/fekto, -letanto, -stili*): L prep. " (malsupren/for) de, el", kun pluraj signifoj kiel prefikso: (a) "(for) de": *de/cidi, -dukti, -fendi, -klinacio, -liri, -poni, -puti, -rivi, -zerto,* kp ank. *debeto, deĵori, delikata;* (b) "el": *de/legi, -segni;* (c) "malsupren": *de/generi, -gradi, -kadenco, distili,* kp *detrui;* (d) "sen-, mis-" (*deficito, difekto*); (e) "el-" (='plene', intensiga senco): *de/bato, -diĉi, -finitiva, -klami, -klari, -kreto, -mandi, -monstracio, -nunci, -stini, -termini, di/letanto, -fini*); necerta rolo en *deziri.*

Identa kun la prep. *de,* vd. tiun.

DIA- : Gr prep. kaj adv. *diá* "tra; dise(n)" kun similaj signifoj kiel pref. : "tra-" (*dia/beto, -fana, -gonalo, -metro, -pazono*), "tra-" = 'plene, el-' (*diagnozo*) , krome "trans" (*dia/demo, -fragmo*), "dise, duflanke" (*dia/-*

lekto, -logo); necerta rolo en *diakono.*

Par. al pref. *dis-*, vd. tiun.

DIS- (***di-*** antaŭ voĉaj kons. kaj *f,s*: *di/boĉi, -ferenco, -gesti, -luvo, -mensio, -rekti, -stanco, -stingi, -strikto, -versa, -vidi*: **de-** en vortoj perataj de F var. *dé-*: *de/ĉifri, -geli, -kolti, -partemento, -peŝo, -serto, -talo, -vizo)*: L pref. kun signifoj "dis-, for-" (*dis/konto, -kreta, -kuti, -poni, -puti, distri, distribui; di/boĉi, -ferenco, -gesti, -luvo, -mensio, -rekti, -stanco, -stingi, -strikto, -versa, -vidi; de/partemento, -talo, -vizo),* foje kun nuanco "sen-, mal-" (*de/ĉifri, -geli, -kolti, -peŝo, -serto).*

Identa kun pref. *dis-*, vd. tiun.

[**DIS- 2** (ne markita en la vortaro): Gr pref. *dys-* "mis-, malbon-": *dis/enterio, -pepsio.*]

EK- (***e-*** en *eklezio*): Gr prep. "el" kun sama signifo kiel pref. (*eklezio, ek/lipso, -logo*), foje kun nuanco "ekster" (*ek/stazo, -zemo*).

Par. al L *ex* "el", vd. tiun kaj la sekvan.

E(K)S- (***eks-*** aperas antaŭ káj vok. káj kons.; antaŭ kons., spec. voĉaj, ank. ***e-***: *e/dikto, -duki, -fekto, -leganta, -lekti, -lizio, -lokventa, -mancipi, -merito, -minenta, -mocio, -mulsio, -rudicio, -rupcio, -stingi, -tendi, -vent/o, -uala, -videnta, -viti. -volui*; ***es-*** laŭ I en *es/cepto, -plori, -primi*; R-influita antaŭvokala ***ekz-*** en *ekz/akta, -ameno, -ekuti, -emplo, -erci, ekzili, ekzisti*): L prep. *ex* "el, de", plej ofte kun sama signifo kiel pref. (vd. ekz. *edikto, eks/kluziva, -kurso, -porti, -trakto, elekti, elizio, escepti, etendi*), foje kun senco "el-, fin-" (*efekto, efiki, ekzakta, ekzekuti, emerito*); responda al Eo *ek-* en *ekzisti.*

Vd. *el.*

EN- 1 (***e-*** antaŭ *l*: *elipso*; ***em-*** antaŭ voĉa kons. kaj *f*: *em/blemo, -brio, -fazo, -pirio*): Gr prep. *en* "en" kun analoga senco kiel pref. ("en-, enen"): *elipso, em/blemo, -brio, -pirio, en/ciklopedio, -ergio, -tomologo, -tuziasmo*; neklara rolo en *emfazo.*

Par. al ps-pf *in-* 1. Vd. *en.*

EN- 2 (***em-*** antaŭ *b*: *em/baraso, -busko)*: F prep. *en* "en", prefikse uzata kun analoga senco ("en-, enen"): *em/baraso, -busko, enketi, enui*; *envii.*

Identa kun ps-pf *in-* 1. Vd. *en.*

EPI- (***ep-*** antaŭ vokalo: *epizodo, epoko*; ***ef-*** en *efemera*): Gr prep. *epí* "sur, ĉe, apud, al, en, post, dum" (preskaŭ same multsignifa kiel Eo *je*); pluraj el tiuj signifoj estas rekoneblaj en la prefiksa uzo: "sur-" (*epi/grafo, -gramo, -lepsio, -teto*), "en-" (*episkopo*), "al-" (*epi/demio, -fanio),* "apud-" (*epizodo*), "post-" (*epilogo*), "dum, je" *(efemera).*

Vd. sub *epidemio.*

EŬ- (***ev-*** antaŭ vok.: *evangelio*): Gr adv. "bone" en prefiksa uzo: *eŭkaristio, evangelio.*

Vd. sub *evangelio.*

[**HIPER-** (ne markita en la vortaro): Gr prep. *hypér* "super".

Vd. *hipertrofio.*]

HIPO- : Gr prep. *hypó* "sub" kun sama senco kiel pref.: *hipo/teko, -tezo*; necerta rolo en *hipokrita.*

Par. al L *sub* "sub", vd. s.t.v.

IN- 1 (***im-*** antaŭ *p*: *im/perativo , – perio, -peto, -pliki, -poni, -porti, -posto, -presario, -pulso*; ***i-*** antaŭ *l*: *ilumini, ilustri, iluzio*): L prep. *in* "en, ĉe, sur, al, kontraŭ", kiel pref. indikanta jen troviĝon en/sur io, jen movon al io, en/sur ion, kontraŭ ion: (a) plej ofte "en", vd. ekz. *im/pliki, -porti, -preso, in/flui, -gredienco, -jekti, -okuli, -sekto, -sidi, -spekti, -spiri, -vadi*; (b) "al, sur": *ilumini, ilustri, imper/ativo, -io, im/peto, -porti, -posto, -pulso, -dekso, -diki, -klina, -kvizicio, -signo, -sisti, -stanco, -stituto, -strui, -tenco, -undi, -venti*; (c) uzata kiel komenca pref. en *in/aŭguri, -censo, -citi, -flamo*; (d) "kontraŭ": *iluzio, inversa.* Necerta rolo en *impresario, inviti.*

Par. al ps-pf *en-* 1. Vd. *en.*

IN- 2 (***im-*** antaŭ *p*: *im/perfekta, -pertinenta, -provizi*; ***i-*** en *ignori, imuna*): L pref. "ne-", kp krom la ĵus cititaj *in/diferenta, -digni, -dividuo, -erta, -fano, -finitivo, -kognito, -valido.* En *imuna* kun nuanco "sen-".

Identa kun la ps-pf *a(n)-*. Vd, *ne.*

INTER- (*inte-* antaŭ *l: inte/lekto, -ligenta;* F var. ***entre-***, vd. *entrepreni*): L prep. "inter" kun sama signifo kiel pref.: *inter/jekcio, -miti, -pelacio, -punkcio, -vjuo;* proks. "en la mezo, aktuala" en *interesi;* kredeble "el inter" en *intelekto, inteligenta;* neklara dua elemento en *interpreti.*

Vd. *inter.*

KATA- (***kat-*** antaŭ vok.: *kat/edro* kun *-edralo, -egorio, -eĥisto* kaj *-eĥizi, -olika*): Gr prep. *katá* "malsupren en, en, sur, ĉe; laŭ, kontraŭ" kun diversaj signifoj kiel pref., ofte malfacile difineblaj: "malsupren-" (*kata/rakto, -ro, -strofo, katedro*), "sur" (*kataplasmo*), "kontraŭ-, re-" (*kateĥ/isto, -izi*), "po, laŭ" (*katolika*); intensiga senco en *katalepsio, kategorio;* kredeble perfektiva senco en *katalogo.* En *kata/falko, -kombo* la dua elemento estas necerta.

El HE **kmta* (kp Ir *cêt-* "kun, laŭ"), par. al **kom* "kun" (vd. tiun).

KON- (tiel antaŭ la plej multaj kons., ekz. *kon/certo, -damni, -fesi, -greso, -jekti, -kludi, -spiri, -tribui, -vinki;* ***ko-*** antaŭ vok. kaj *l/r, m: ko/eficiento, -incidi, -lego, -lekti, -lizio, -mandi, -merco, -muna, -rekta, -respondi;* ***kom-*** antaŭ labialo kaj *f: kom/bini, -forto, -pari* ktp): L pref. *con-*, responda al la prep. *cum* "kun". Du ĉefaj sencoj en Eo: (a) "kun-", t.e. "kune kun" aŭ "maldis-", ekz. *ko/incidi, -lekti, -lizio, kom/bini, -panio, -pari, -poni, -posti, -poto, komuna, kon/centri, -diĉo, -fuzi, -greso, -kuri, -senti, -sonanto, -takto* (entute ĉ. 60 vortoj); (b) intensiga senco en ekz. *komandi, komenci, komisio, kon/damni, -duki, -fekcio, -firmi, -kludi, -sekri, -servi, -stanta, -valo, -veksa, -vinki* (entute ĉ. 40 vortoj). (c) Kelkfoje la pref. uzatis por formi faktitivajn (ig-)verbojn: *komforto, konfiski,* ev. *kompleta.* La pref. troviĝas ankaŭ en la etimologia fono de *kaŝi, konto, kosti, kostumo/kutimo, kovri,* vd. tiujn.

Identa kun la prep. *kun,* vd. tiun.

KONTRA- (***kontr-*** antaŭ vok.: *kontralto;* ***kont-*** en *kontroli*): L prep. *contra* "kontraŭ" kun sama signifo kiel pref.: *kontra/bando, -punkto, -sto;* "vid-al-vide, apud" en *kontroli;* speciala senco en la muzikaj terminoj *kontrabaso, kontralto* (vd. tiujn).

Identa kun la prep. *kontraŭ,* vd. tiun.

META- (***met-*** antaŭ vok.: *met/empsikozo, -eoro, -odo*): Gr prep. *metá* "inter, kun, ĉe, post" kun diversaj sencoj kiel pref.; en Eo estas rimarkeblaj (a) "post-": *metafiziko, metodo,* (b) "trans-" (signifanta ŝanĝiĝon de stato): *meta/foro, -morfozo, -empsikozo; meteoro.*

Sambaza kun Gr *mésos* "meza" (vd. tiun) kaj par. al G *mit* "kun".

OB- (***o-*** antaŭ *f, k, p: o/fendi, -feri, -ferto, -kazo, -kupi, -kulta, -poni, -portuna, -pozicio;* ***ok-*** antaŭ *c: okcidento*): L prep. *ob* "kontraŭ, direkte al; pro", kiel pref. plej ofte "kontraŭ-" en la diversaj sencoj de tiu vorto: "malhelpe antaŭ" (*ob/jekto, -stina, -staklo, -strukco, o/kulta, -poni, -pozicio*), "kolizie kun" (*obtuza, ofendi*), "direkte al" (*oblato, o/feri, -ferto, -kazo, -portuna*), "vid-al-vide al" (*obei, observi*). La pref. ŝajnas havi perfektivan rolon en *okcidento, okupi.* En *obligacio* la pref. indikas devoligon (kredeble "kontraŭ" en la senco "interŝanĝe de", vd. PIV s.v. 4).

Par. al Gr *epí*, vd. sub *epidemio* kaj la ps-pf *epi-.*

PAR- : F prep. *par* "per", elemento de la vortoj *par/kere, -tero* (vd. tiujn); kiel pref. ofte intensiga: *par/doni, -fumo.*

El L prep. *per* s.s., vd. *per* kaj la ps-pf *per-.*

PARA- (***par-*** antaŭ vok.: *par/alela, -entezo, -odio*): Gr prep. *pará* "apud, preter" kun similaj signifoj kiel pref.: "apud-" (*para/bolo, -digmo, -frazo, -grafo, paralela, parazito, parentezo*), "preter-" (*paradokso*), "flanke" (*paralizi*); kp (kun sem. evoluo "flanke" > "mis-") *parodio.*

Vd. sub *por.*

PER-: L prep. *per* "tra, dum, per, pro", kiel pref. "tra-" (*per/mesi, -spektivo*), "tra-" = "el-, fin-" (*perfekta*), "for-" (*perdi, perei*); krome uzata kiel intensiga pref. (*per/cepto, -sekuti, -sisti*). La vorto *perfida* baziĝas sur prepozicia esprimo.

Identa kun la prep. *per,* vd. tiun.

PERI- : Gr prep. *perí* "ĉirkaŭ" kun sama signifo kiel pref.: *peri/metro, -odo, -stilo, -toneo.*

Vd. sub *por.* Probable identa kun Ea prep. *pri,* kp tiun.

PRE-: L pref. *prae-* (> A *pre-,* F *pré-,* G *prä-*) "antaŭ-" (ekz. *pre/fekto, -feri, -ludo, -pozicio, -rogativo*) kun nuancoj "antaŭe" (*pre/cipa, -ciza, -fikso, -pari, -teksto, -zidi*), "antaŭen" (*pretendi*), "antaŭ = en la ĉeesto de" (*pre/diki, -lego, -zenti*).

Vd. sub *por.*

PRO- 1: L prep. *pro* "antaŭ, por, anstataŭ, laŭ, pro", kiel pref. plej ofte "antaŭ, -e, -en" (*pro/cedi, -ceso, -cesio, -dukti, -fani, -fesio, -filo, -greso, -jekcio, -jekto, -krasti, -leto, -meni, -mesi, -pagando, -poni, -pozicio, -tekti, -vizi;* kp"el-, antaŭen-" en *pro/fesio, -klami, -montoro, -nonci, -spekto, -testi, -voki*). Necerta rolo en *pro/funda, -speri.* La vortoj *pro/cento, -porcio* baziĝas sur prepoziciaj esprimoj.

Identa kun la sekva. Vd. sub laEa prep. *pro.*

PRO- 2: Gr prep. *pro* "antaŭ", uzata kiel pref. kun sama signifo: *pro/feto, -gnozo, -gramo, -logo.*

Identa kun *pro-* 1. Vd. sub la Ea prep. *pro.*

RE- (***r-*** antaŭ alia prefikso en *remburi, remparo, rendevuo, renkonti, renversi;* ***ra-*** en *ra/bati, -fini, -konti, -porti:* ***red-*** en *redakti;* I varianto ***ri-*** en *ri/beli, -cevi, -fuĝi, -fuzi, -gardi, -kolti, -lati, -marki, -medo, -pari, -peti, -pozi, -proĉi, -sorto, -veli, -verenco, -voluo*): L pref. *re-* kun diversaj signifoj: (a) "re-, retro-": *raporti, re/akcio, -dukti, -ferenco, -flekti, -futi, -lativa, -spekto, -torto, -volucio;* (b) "re-, denove, ankoraŭfoje" (ripeta senco): *rakonti,re/kordo, -kruto, -nesanco, -pertuaro, -putacio, ri/beli, -peti, -proĉi, -sorto, -voluo;* (c) "re-" (reiro al pli frua stato): *re/formacio, -storacio, ripari;* (d) intensiga signifo: *re/cenzi, -citativo, -klamo, -komendi, -liefo, remburi, remparo, renkonti, renversi, re/vizio, -vuo, ri/gardi, -marki, -verenco;* (e) "kontraŭ" (opozicio): *rezisti, rifuzi;* (f) "en kontraŭa direkto", t.e. nuligo de la verba ago: *re/velacio, -zigni, riveli;* (g) "ankoraŭ" (restaĵo): *rekremento, resti, rezervo;* (h) reciproka signifo: *re/kompenci, -spondi* (vd. ankaŭ *reciproka*); (i) "ĝuste" (ĝusta plenumo de la verba ago): *redakti, ri/cevi, -kolti.* La ekzakta signifo ĉe la diversaj bazoj estas ofte malfacile determinebla; komplikas la aferon la prefikskombinoj (*ra- = re + ad (ab), rem-/ren- = re* + F *en;* kp ps-pf *en-* 2).

Vd. ank. *registri, religio, rento, rendevuo, revi.* Identa kun la Ea pref. *re-,* vd. tiun.

SE-: L pref. signifanta "dis-, el-" (*sekreta*), "sen-" (*sekura*). Vd. ank. *sobra, solvi..* Orig. "por si mem, aparte", de la HE refl. radiko **s(u)e-* (vd. *si*).

SIN- (***si-*** antaŭ *l, m, s: si/labo, -logismo, -metrio, -stemo;* ***sim-*** antaŭ *b/p, f: sim/bolo, -fonio, -patio, -ptomo*): Gr prep. *syn* "kun(e kun)" kun similaj sencoj kiel pref.: "kun(e)", ekz. *silabo, silogismo, sim/bolo, -fonio, -patio, sin/agogo, -edrio, -odo, -optika, -takso, -tezo, sistemo,* kun nuancoj "apud-" (*simetrio*), "maldis-" (*sinkopo*), "sam-" (*sinonimo*), "koincide" (*simptomo*).

Gr *syn,* pli frue *xyn,* ne havas ekstergrekajn parencojn.

SUB- (***su-*** antaŭ *f, g, p, s: su/feri, -fiĉa, -fikso, -gestio, -plemento, -pozi, -spekti;* ***suk-*** antaŭ *c: sukcesi:* L prep. *sub* "sub, proksime de, tuj antaŭ/post", kiel prefikso kun multaj diversaj signifoj: (a) "sub-": *sub/jekto, -junktivo, -stanco, su/feri, -pozi;* (b) "kaŝe, mallaŭte" (kp la nuancon en Eo *subaŭskulti*): *subita, sufloro;* (c) "tuj post": *sufkso, sukcesi;* (d) "de malsupre supren": *subvencio, sugestio, suspekti;* (e) "anstataŭ" ('por preni ies lokon, por kompletigi'): *su/fiĉa, -plemento;* (f) "for de": *subtrahi.* Vd. ank. *skui, sopiri.* Necerta rolo en *subtila.* La radiko *sublim(ato)* baziĝas sur prepozicia esprimo.

Identa kun la Ea prep. *sub,* vd. tiun.

SUPER- (F var. ***sur-***: *sur/faco, -prizo*): L prep. *super* "super" (resp. F prep. *sur* "sur") kun sama signifo kiel pref.: *superlativo;*

surfaco. Semantike necerta estas *superstiĉo,* semantike speciala *surprizo.*

Identaj kun la Eaj prep. *super, sur.* vd. tiujn.

TELE- : Gr adv. *têle* "(de) malproksime", uzata prefikse jam en Gr ant., ekz. *têlemákhos* "batalanta de malproksime", *têleskópos* "vidata de malproksime", en modernlingvaj teknikaj terminoj kun esence sama signifo: *tele/fono, -grafo, -gramo, -skopo.*

Par. al Gr *pálai* "iam, antaŭ longe" (vd. *paleografo*) kaj al *télos* "fino, celo".

TRANS- (***tra-*** antaŭ *d: tra/dicio, -duki*): L prep. *trans* "tra(ns)" kun samaj signifoj kiel pref.: "trans-" (*tra/dicio, -duki, trans/epto, -itiva*), "tra-" (*transito*). Ev. intensiga pref. en *trankvila.*

Identa kun la Eaj prep. *trans, tra,* vd. tiujn.

PSEŬDOSUFIKSOJ

La listo enhavas ĉiujn pseŭdosufiksojn (kun variantoj) menciitajn en la vortaro, iliajn diversajn signifojn kaj iliajn formojn en la fontlingvoj kaj en la aliaj L.I. Rimarku, ke tie ĉi estas pritraktataj la vortfino *-aŭ* kaj la landnoma sufikso *-i* (vd. *-i* 3).

-ABL/, vd. ***-bl/.***

-AC/: L-devena adj. suf. (L *-ax -acis;* A *-acious,* FI*-ace,* [H *-az*]) signifanta inklinon: *aŭdaca* propr. "kuraĝema", *sagaca.* ¶ Io *-ac/a,* Ie *-aci,* Ia *-ace.* ¶ Orig. indikanta personan karakterizaĵon, kp la paralelan Gr *-ax* en *kólax -akos* "flatulo".

-AD/: Romana subst.-sufikso (AFG *-ade,* I *-ata,* PoR *-ada*) signifanta (a) agon, spec. daŭran (*blokado*), (b) produkton kiel rezulto de ago (*limonado, marmelado, ŝarado),* (c) serion de identaj aĵoj (*arkado, balustrado, barikado*), (d) "-aĵo" ĝenerale (*ambasado, balado, fasado*). ¶ Io *-ado,* Ie *-ade,* Ia *-ada.* ¶ Etim. identa kun la Eo-suf. *-ad/,* vd. tiun.

-AĜ/: Romana subst.-sufikso (AFG *-age,* I *-aggio,* Po *-az',* R *-aĵ*) signifanta (a) rezulton de ago (*bandaĝo, domaĝo, fromaĝo, vojaĝo*), (b) aron (*vilaĝo*), (c) lokon *(etaĝo;* kp *pasaĝ-* en *pasaĝero),* (d) econ (*kuraĝo*) ktp. ¶ Io *-aj/o,* IeIa *-age.*

Etim. identa kun la Eo-suf. *-aĵ/,* vd. tiun. Por la fonetika evoluo kp ank. *aĝo.*

-AL/: L-devena adj.-suf., la plej ofta en la internacia vortmaterialo (L *-alis;* A *-al,* F *-al, -el,* G *-al, -ell,* I *-ale,* Po *-al'ny,* R *-al'nyj*), en Eo normale kun signifnuanco proksima al (sed ne identa kun) tiu de la baza substantivo: kp *evento : eventuala, formo : formala, horizonto : horizontala, kondiĉo : kondicionala, krimo : kriminala, moro : morala, normo : normala, ofico : oficiala, universo : universala.* Aldoniĝas preskaŭ ekskluzive al L substantivstemoj. Ofte substantivigita: *animalo, finalo, hospitalo, katedralo, materialo, pedalo, portalo.* Varianto: ***-ar*** (kiam la subst.-stemo enhavas *l*): *familiara, populara, singularo, vulgara.* ¶ Io *-al/a* (ĝenerala adj.-sufikso), IeIa *-al.*

Orig. formo *-li,* aldonita al *a*-stemoj (L *norma : norma/li/s*), kp la ps-sf *-il,* orig. el *i*-stemoj. Devenas de HE adj.-sufikso kun *-l,* kp Gr *megálo-,* Gt *mykils* "granda".

-AN/: L-devena adj.-sufikso signifanta apartenecon *(humana* de *homo),* en Eo preskaŭ ekskluzive reprezentata per substantivigoj: *dekano, fontano, hortulano, kalkano, kapitano, porcelano, puritano, romano, veterano* k.a. Varianto: ***-ane*** (L *-aneus*): *Mediteraneo, spontanea.*

Identa kun la Eo-suf. *-an,* vd. tiun.

-ANC/: L-devena suf., formanta abstraktajn subst. de verboj kun inf. *-are* (L *-antia;* AF *-ance,* G *-anz,* I *-anza,* Po *-ans,* R *-ancija*): *asonanco, cirkonstanco, distanco, renesanco, substanco* ktp. Konkretigo en *ambulanco, kvitanco.* Kp. ank. *ŝanco.* ¶ Io *-anc/o,* Ie *-antie,* Ia *-antia.*

Propr. "-ant-eco", formita per suf. *-i-* el la stemo de part.prez. *-ant* (vd. sekv.). Kp la analogan *-enc.*

-ANT/: L suf. de la ptc. prez. de verboj

kun inf. *-are* (L *-ans -antis*; AFG *-ant*, I *-ante*, PoR *-ant*). Foje adjektiva (*aroganta, konstanta, kontanta*), pli ofte subst.-igita (*adjutanto, brilianto, konsonanto, leŭtenanto, intendanto*). ¶ Io *-ant/*, Ie *-ant*, Ia *-ante*.

Kp la Ean ptc.prez. *-ant/*. Vd. ank. la analogan *-ent*.

-ARD/: Romana subst.-suf. (AF *-ard*, I *-ardo*), orig. ofte pejorativa (*bastardo*), ank. pli ĝenerale "io -eca" (*kokardo, miliardo, mustardo*), Uzita por diversaj armiloj (*bombardi, petardo, ponardo*). ¶ Io *-ard/o*, Ie *-ard*, Ia *-ardo*.

El ĝerm. *hart* "malmola" (vd. *hardi*), ofta en nomoj, ekz. *Leonard* 'malmola kiel leono'. En *bilardo* eble io restas el la orig. senco ('malmola globeto').

-AR(I)/: L-devena adj.-suf. (L *-arius*; A *-ary*, F *-aire*, G *-ar, -är*, I *-ario*, Po *-arz*). La maskla formo (*-arius*) estis subst.-igata por signifi personojn (*komisaro, notario, proletario, veterinaro, vikario*) aŭ bestojn (*dromedaro, kanario*), ank. monatojn (*februaro, januaro*) , la femala por signifi ejojn (*kancelario*). *Komentario* devenas de maskla formo, *honorario* kaj *kalendaro* de neŭtra (kp sekv.). En kelkaj vortoj la adjektiva karaktero persistas: *ordinara, vegetara*. – (Kp sub *salajro*.) ¶ Subst. Io *-ari/o*, IeIa *-ario*; adj. Io *-ar/a*, IeIa *-ari*.

-ARI/: L subst.-suf. signifanta kolekton (L *-arium*; AFGPo *-arium*, I *-ario*, R *-arij*): *akvario, rozario, seminario*. (Kp sub *salajro*.) ¶ Io *-ari/o*, Ie *-árium*, Ia *-ario*.

Orig. subst.-igo de la neŭtra formo de suf. *-arius* (vd. la antaŭan).

-ASM/: Gr suf. formanta abstraktajn subst. el verboj kun inf. *-ázein* (Gr *-asmós*; AG *-asm*, F *-asme*, I *-asmo*, PoR *-azm*): *entuziasmo, marasmo, pleonasmo, sarkasmo, spasmo*. ¶ Io *-asm/o*, Ie *-asme*, Ia *-asmo*.

Orig. kunfando de du sufiksoj: *-az* (verba) k *-mo* (subst.-a); vd. la paralelan Eo-suf. *-ism*.

-AT/ **1**: L suf. de ptc.perf. de verboj kun inf. *-are* (L *-atus*; A *-ate*, FG *-at*, I *-ato*), malofte adjektiva (*privata*), preskaŭ ĉiam subst.-igita (personoj: *advokato, laŭreato, legato*; aĵoj: *dato, kantato, konglomerato, kvadrato, mandato, predikato*). El la participo evoluis tipo de (subst.-igebla) adj. signifanta "kun, provizita per": *diplomato, granato, kandidato, muskato*. Kemia termino: *sublimato*. La vortoj *aparato, traktato* strikte ne baziĝas sur la participo sed sur deverba substantivo samforma, kp la sekv. ¶ Io *-at/o*, IeIa *-ato*.

La elementoj konsistigantaj la suf. *-at* estas la samaj kiuj formas la participan Eo-suf. *-at*, vd. tiun.

-AT/ **2**: L subst.-suf., bazita sur la supina radiko de verboj kun inf. *-are* (L *-atus*; A *-ate*, FGPoR *-at*, I[H] *-ato*), signifanta oficon/dignon kaj ties distrikto: *dukato, protektorato, sindikato*. ¶ Io *-at/o*, Ie *-atu*, Ia *-ato*.

Bazita sur la sama stemo kiel la antaŭa, vd. tiun.

-AŬ: [(1) Femala sufikso de pEo 1881-2, vd. supre sub suf. *-in*.] (2) Vortfino en 17 plursilabaj radikvortoj, nome la adverboj *almenaŭ, ankaŭ, ankoraŭ, apenaŭ, baldaŭ, hieraŭ, hodiaŭ, morgaŭ, preskaŭ*, la prepozicioj *anstataŭ, antaŭ, ĉirkaŭ, kontraŭ, malgraŭ*, la subjunkcio *kvazaŭ*, la pronomo *ambaŭ*, la interjekcio *adiaŭ*. Tiu vortfino aperas en 1887; la respondaj vortoj en pEo 1881-2, se atestitaj, estas ĉiuj unusilabaj kaj ne havas specialan vortfinon: almenaŭ = *pas´*, ambaŭ = *baj*, ankaŭ = *os*, ankoraŭ = *es*, antaŭ = *vi*, apenaŭ = *kau*, hieraŭ = *jur*, kontraŭ = *blo*, kvazaŭ = *vel*. Z nomis *-aŭ* "neŭtrala, sed difinita finiĝo" (LZ I, 348). Ne estis eble konstati kun certeco, kial Z donis ĝuste al tiuj diverskategoriaj vortoj komunan specialan finon, nek de kie li prenis ĝin. Vd. pri tio speciale Mattos p. 42, 83; Trunte 1971; Poŝka 1971 k 1981; Günkel 1996; Pabst 1997 (kun bibliografio). La diferenco inter *antaŭ* (< L *ante*) kaj *post* (< L *post*) ŝajnas indiki, ke la celo de Z estis eviti kolizion inter la finvokaloj, kiujn prezentis liaj elektitaj

fontvortoj (ekz. L *ante*), kaj la kategorivokaloj de aliaj Eo-vortoj (*a* adj., *e* adv., *i* inf., *o* subst.); se la elektita fontvorto malhavis tian vokalon (ekz. L *post*), li prenis la vorton neŝanĝita. Estis por li grave marki, ke tiuj ĉi vortoj estas primitivaj kaj ne derivitaj; tio donis eblecon al pluformado pere de la kategorivokaloj (*antaŭ/o, -a, -i, -e* ktp). La fontvorto *ante* estis evidente neebla en sia neŝangita formo, ĉar 1) ĝi koincidis kun la sufikso de la part.prez., kaj 2) ĝi havis la kategorisignon de derivita adverbo. Li modifis ĝin al *antaŭ*; kiel okazis tiu modifo? (a) Du esperantologoj, Mattos (l.c. 83 s.) kaj Günkel (l.c. 187) hipotezas, ke la modifo trapasis la stadion *eŭ*: laŭ Mattos, al la formo *ante* aldoniĝis la unu-nura libera vokalo *u* en sia duonvokala formo; sed la diftongo *eŭ* "ne ekzistis en la tiama lingvo", ĝi tial estis transformita al *aŭ*. Laŭ Günkel, ĉiuj kvin vokaloj estis okupitaj kaj la diftongoj *eŭ, oŭ* neakcepteblaj pro malofteco; restis teorie *-aŭ, -ej, -uj*, el kiuj *-uj* (**antuj*) tro similus al *tuj*, kaj plursilabaj vortoj finiĝantaj per *-j* ne troviĝas en Eo (kp *plej, kaj*). Li vidas la originon de la ŝanĝo *eŭ* > *aŭ* en du aliaj jam ekzistantaj vortoj: *naŭ* (pEo *nau*) kaj *ĵaŭdo* (F *jeudi*); vd. tiujn vortojn en Aldonendoj al la vortaro. Analoga ŝanĝo videble okazis en F *adieu* > **adieŭ* > *adiaŭ*. – Se ni akceptas la hipotezon pri interstadia *-eŭ* estas facile klarigi la modifojn de la fontvortoj L *hodie* > *hodiaŭ* (kiu preskaŭ certe pro semantikaj kialoj kuntrenis *hieraŭ* kaj *morgaŭ*), I *anche* > *ankaŭ*, F *presque* > *preskaŭ*, eĉ F *malgré* > *malgraŭ*. Ankoraŭ pli facila estas la modifo de fontvortoj kun adjektivsimila finvokalo: I *appena* > *apenaŭ*, I *ancora* > *ankoraŭ*, L *circa* > *ĉirkaŭ*. Disvastiĝis la procedo al aliaj ĝenaj vokaloj: I *almeno* > *almenaŭ*, I *quasi* > *kvazaŭ*. Eŭfoniaj kialoj kredeble kontribuis; kiel Günkel atentigas (l.c. 188), nura apokopo ne estus kontentiga solvo: **ĉirk, *kontr, *kvaz, *malgr*. Ĉe la G-devenaj *anstataŭ* kaj *baldaŭ* la fontvortoj ne enhavas finvokalon (*anstatt, bald*); tie devas temi pri analoga apliko de la finsilabo. Strange unika estas *ambaŭ* (kie ja ekzistas en la fontvorto vokalo evitinda: L *ambo*) pro sia vortkategorio (inter pronomo kaj numeralo, kp la sinonimon *ĉiuj du*) kaj nemarkita pluraleco (kial ne *amba/j*? ĉu pro tio, ke singulara radikformo **amba* estus absurda?). Laŭ tiuj hipotezoj, do, *-aŭ* havas sian originon en kvazaŭ organa transformo de fontlingva *-e (-a)*. (b) Ekzistas alia hipotezo pri ĝia origino, prezentita de Trunte kaj Poŝka l.c.: *-aŭ* estas prenita el Li adverboj finiĝantaj per *-aû* (sufikso de komparativo), parte kun samaj signifoj kiel la Eaj *aŭ*-vortoj: *pirmiaû* "antaŭ", *paskiaû* "poste", *greiĉiaû* "baldaŭ", *bendriau* "ĉirkaŭ", *daugiaû* "pli multaj". Tio povus sendube esti la inspirfonto de Z – se ni povas kredi, ke li sciis sufiĉe da litova lingvo por povi utiligi ties materialon (vd. sub *tuj*). (c) Waringhien (1967, 24) indikas G *laut* > Eo *laŭ* kiel deirpunkton por ĉiuj *aŭ*-vortoj. Oni eble pli ĝuste direktu sian atenton al pEo *kau* "apenaŭ" < G *kaum*, kie la diftongo jam ekzistis kaj pluvivas en la nova versio de 1887. (d) Kp fine Gregor 1982, 10: "*-aŭ* ŝajnas esti artefaritaĵo, kiu devis harmoniigi radikojn prenitajn el diversaj fontoj". – (e) Ne ŝajnas al mi eble aserti rektan kunligon inter la *-aŭ 1* de 1881-2 kaj *-aŭ 2* de 1887, kvankam Günkel (l.c. 188) inter la fontoj de *-aŭ* mencias "revivigo de la Praesperanta inec-indikilo *-aŭ*, kiun miaopinie Zamenhof ŝatis". Simile Waringhien LV 61, noto: "*-aŭ* estis la kurioza finaĵo de la virinaj nomoj en 1881;

kiam Zamenhof rezignis ĝin por tia funkcio, li eble estis tiel kutiminta al ĝia sono, ke li volis uzi ĝin por alia rolo, kaj decidis signi per ĝi la adverbojn-prepoziciojn". (f) Restas konstati, ke en siaj re-

formproponoj Z rezignis la vortfinon -*aŭ*: 1894 *adiu, almenu, ambi, anku, ankoru, apenu, cirku, hieru, hodiu, kontru, kvasu, malgru, presku* (por *anstataŭ, baldaŭ, morgaŭ* estis elektitaj aliaj vortoj); 1906a *amboy, ĉir* "ĉirkaŭ"; 1906b *amboy*; 1907 *hodiu*. Ĝenerale, Z proponis en 1906 (PVZ 7, 248): "Ĉiuj vortoj kiuj finiĝas per 'aŭ' povas esti uzataj ankaŭ sen tiu finiĝo, anstataŭigante ĝin simple per la finiĝo de la responda parto de parolo: (ekzemple, paralele kun la vortoj 'almenaŭ, adiaŭa' oni povas ankaŭ diri 'almen'e, adi'a' k.t.p.). Káj antaŭ káj post tiuj datoj, la anstataŭigo de -*aŭ* per -*e* estis multfoje proponata (ekz. de Grosjean-Maupin 1910).

-BL/ (**-*bil*** en *aŭto-, loko/mobilo*): L suf. -*bil(is)*, signifanta "kiu povas esti ...-ata": *probabla*, -*mobil*- "movebla"; ŝajne aktiva en *agrabla, kapabla*. ¶ Identa kun la Ea suf. -*ebl/*, vd. tiun.

-CI/O: Internacia sufikso por agonomoj de L deveno: -*io* (gen. -*ionis*), aldonata al la supina radiko, kiu finiĝas per *t* aŭ *s* (*x*, se *k* antaŭas): *navigat-io, vis-io, flexio*. La kombino -*tio* estis en tarda L epoko prononcata [tsio] (> Eo -*cio*). Modernlingvaj formoj: AFG -*tion*/-*sion* (-*xion*), I -*zione*/-*sione*, Po -*cja*/-*zja*, R -*cija*/-*zija*, (H -*ción*/-*sión*). Esperantaj formoj: (a) **-*ci/o*** (< L -*tio*), plej ofta (pli ol 70 vortoj); (b) **-*si/o*** (< L -*sio, -xio*), ekz. *misio, pensio; fleksio*; (c) **-*zi/o*** (< L -*sio* kun antaŭa vokalo), ekz. *iluzio, kolizio, vizio*; (d) **-*ti/o*** (< L -*tio* kun antaŭa *s*) en *sugestio*; krome specialaj Eaj variantoj: (e) **-*c/o***: *donaco, kapitulaco, kuraco, obstrukco, sekco*; (f) **-*ĉ/o*** en *kondiĉo* (ofte skribita *condicio* en L), *superstiĉo*; (g) **-*z/o*** anst. -*zio* en *okazo*. En tre malmultaj okazoj la suf. estas aldonita al nura verbradiko, aperanta kiel (h) **-*i/o*** en Eo: *komunio, opinio, religio*. La plena L vortostemo estas konservita en (j) **-*ion/o***: *komisiono* (por diferencigi disde *komisio*). Romana varianto (k) en *kanzono, sezono*. – Krom la origina senco de abstrakta agonomo (*evolucio* = *evoluo, funkcio, inaŭguracio* = *inaŭguro, navigacio* = *navigado*), la suf. ofte signifas konkretan rezulton de ago (*deklaracio, institucio, konfekcio, porcio, subvencio*) aŭ rezultan staton (*reputacio, profesio, situacio*). Aliajn sencnuancojn reprezentas *administracio* (personaro, organizo), *redakcio* (personaro, ejo), *erudicio* (kvalito), *emocio* (animstato). Kp Butler: 'Ĝi povas signifi -*o*, -*ado*, -*aĵo*, -*ejo*, -*ilo*' (kiel en eo *legitimacio* = *legitimilo*) ' -*antaro*, -*istaro*, -*itaro*' (BEsp 533/1951, 63). Pri la konkurenco inter vortoj kun kaj sen tiu sufikso kaj pri la uzado de la sufikso kiel diferencigilo, vd. Butler l.c. kaj la respektivajn vortojn en la vortaro. ¶ Io -*cion/o*, -*sion/o* (-*xion/- o*) -*zion/o*, ank. -*c/o*; Iela -*tion/-sion(-xion)*.

L -*(t)io* -*(t)ionis* estas kombino de du sufiksoj: -*on* aldonita al -*ti*, sufikso formanta abstraktajn subst. el verboj, ekz. *ves/ti/s* "vestado", *mor/ti/s* (nom. *mors*) "morto". Kp Sa *gáti*- "irado", Gr *básis* s.s. (kun konsonantŝanĝo *t* > *s*); tial Eo -*ci(o)* estas prapar. al Eo -*z* en *bazo* (kp ps-sf -*z*).

-ENC/: L-devena suf. formanta abstraktajn subst. de verboj kun inf. -*ere*, -*ire* (L -*entia* [L mez. ank. -*encia*]; AF -*ence*, G -*enz*, I -*enza*, Po -*encja*, R -*encija*, [H -*encia*]), ekz. *dekadenco, diferenco, konkurenco, tendenco*. Unuopa ago en *aŭdienco, riverenco*. Konkretigo en *esenco, licenco*. Titolo en *ekscelenco, eminenco*. En la vorto *ingredienco* la suf. staras anstataŭ -*ent*. ¶ Io -*enc/o*, Ie -*entie*, Ia -*entia*.

Propr. "ant-eco", formita per suf. -*i* el la stemo de L ptc.prez. -*(i)ens* -*(i)entis* (vd. sekv.). Kp la analogan -*anc*.

-END/: Suf. de la gerundivo de L verboj kun inf. -*ere/-ire*. Nur en unu vorto: *legendo* (subst.-igo).

Identa kun la Ea suf. -*end*, vd. tiun.

-ENT/: L suf. de la ptc.prez. de verboj kun inf. -*ere*, -*ire* (L -*(i)ens* -*(i)entis*; AFGPoR -*ent*, I[H] -*ente*): *regent/o* do propr. "reg/ant/o", *student/o* "stud/ant/o". Foje konservanta la adjektivan karakteron

(*elokventa, eminenta, impertinenta, indiferenta, kompetenta, solventa*), ofte substantivkategoria pro subkomprenata subst. (*abituriento* [sk. 'lernanto'], *kontinento* [sk. 'tero'], *okcidento/oriento* [sk. 'suno']), *patento* [sk. 'letero'], *tangento* [sk. 'linio']). Speciala okazo estas *kliento* (la koncerna verbo mankas). ¶ Io *-ent/*, Ie *-ent*, Ia *-ente.*

La elemento *-nt* estas identa kun tiu en la Ea ptc.prez. *-ant/*, kp tiun.

-ERI/: Romana sufikso (A *-ery*, FG *-erie*, IPo *-eria*, R *-erija*, [H *-ería*]) signifanta agadon (*baterio, loterio*), ekipitecon, spec. militistan (*artilerio, kavalerio*) kaj iufoje konduton (*galanterio*). ¶ Io *-eri/o*, Ie *-eríe*, Ia *-eria.*

Kombino de du sufiksoj: *--er*, identa kun la Ea ps-sf *-i(e)r*, signifanta personon (vd tiun; kp *kavaliro : kavalerio*!) kaj *-i*, formanta abstraktajn subst. (vd. ps-sf *-i 1*); orig. signifo do "la agado de (certa) persono".

-ESK/: Romana adjektivsufikso (AF *-esque*, G *-esk*, I[H] *-esco*, Po *-eskowy*, R *-eskovyj*) kun signifo "-eca": *burleska, groteska.* Subst.-igo: *arabesko.* – **Rim.** Identa kun la neoficiala eo-sufikso *-esk/* (PG, GD, PIV) okaze uzata kun la senco "-eca, -simila, -maniera": *japan/esk/a.* ¶ Io *-esk/*, IeIa *-esc* .

El L *-iscus*, signifanta apartenecon (ekz. *mariscus* "vireca" de *mas* "viro, masklo"), identa kun A *-ish*, G *-isch* ktp el HE **-isko/*; kp Gr *anthrôpískos* dim. de *ánthrôpos* "homo".

-ET/: Romana diminutivsufikso (F *-et/-ette*, I *-etto*, [H *-ete*]; G *-ett*, Po *-eta*, R *-etka*). La diminutiva signifo estas foje sentebla, ofte nur historia (vd. ekz. *baleto, bileto, budĝeto, etiketo, faceto, kabineto, kastanjeto, klarneto, marioneto, pargeto, raketo, tualeto*; kun nuanco "io eta sur io alia": *braceleto, epoleto*). En kelkaj okazoj la signifo ŝajnas esti "(aparten)aĵo" (vd. ekz. *korseto, korveto, kotleto, soneto*). Speciala muzika uzo en *dueto, septeto, terceto* (la kialo de la sufiksuzo tie ĉi estas neklara; ĉu orig. pri mallongaj epizodaj operkantoj duvoĉaj?). ¶ Io *-et/o*, Ie *-ette*, Ia *-etto.*

Identa lun la Ea suf. *-et/*, vd. tiun.

-I/ **1**: Gr suf. (Gr *-ía*, L *-ia*; A *-y*, FG *-ie*, IPo *-ia*, R *-ija*, [H *-ía*]) , formanta abstraktajn substantivojn kun signifo "-ado", "agadtereno", "stato", entute ĉ. 100 radikoj. Elstaras la jenaj kategorioj: (a) nomoj de sciencaj disciplinoj kaj artoj, formitaj el la koncerna personnomo (ekz. *arkeologio, filologio* ktp, *geografio, kartografio* ktp, *astronomio, ekonomio* ktp, *anatomio, kirurgio*...); (b) nomoj de statoj, ofte medicinaj terminoj (ekz. *disenterio, empirio, hidrofobio; anomalio, harmonio, simetrio*); (c) nomoj de regadsistemoj (ekz. *demokratio, monarkio, oligarĥio, teokratio*); (d) agonomoj de Gr verboj (ekz. *alegorio, antologio, fantazio, krestomatio, manio, simfonio*). En kelkaj okazoj la Gr suf. estas *-eía*, sed la diferenco ne estas rimarkebla en la modernaj formoj (*antipatio, enciklopedio, energio, epifanio, farmacio, ironio, litanio, magio, simpatio, terapio*). Kelkaj radikoj kun tiu ĉi abstrakta sufikso estas de negreka origino (vd. *garantio, kolonio, kompanio*). ¶ Io *-i/o*, Ie *-ie*, Ia *-ia.*

Orig. adjektivoj formitaj per la adjektivsuf. *-i* kaj kun subkomprenata subst., ekz. *anatomía (tékhnê)* "dissekca (arto)"; pri tiu suf. vd. *-i 3* kaj *-i 4*, kun kiuj ĝi lastvice estas identa.

-I/ **2**: L suf. *-ium* (AFGI *-ium*) signifanta kemiajn elementojn aŭ kombinojn (*aluminio, kalio, kolodio, natrio, opio*). [En eo aperas foje la varianto *-ium/o*, ekz. *helium/o, radium/o.*] ¶ Io *-i/o*, IeIa *-ium.*

Ofta vortfino en la 2a L deklinacio (genro neŭtra); *radium* do proks. "io radianta".

-I/ **3**, sufikso por landnomoj (prop. Z 1906 [vd. LZ I, 316 = PVZ 7, 402: *Anglio*]; nerekomendo de Akad. 1909; malkonsilo de Akad. 1920; nuligo de la malkonsilo per opiniesprimo de Akad. 1973, vd. OA 8, p. 14): vd. detalojn en la monografio Albault 1991a. – Registrita en vortaroj: Grosjean-Maupin 1910, Fulcher

& Long 1921, Wü, PV, GD, PIV): Internacia landnoma sufikso de L deveno (L *-ia*: *Italia, Britannia, Gallia* "Gaŭlujo"; A *-ia/-y* [i]: *Bulgaria, Russia; Italy, Germany*; F *-ie*: *Italie, Russie, Albanie*; G *-ien*: *Italien, Bulgarien*; I *-ia: Italia, Francia, Russia*; Po *-ia/-ja*: *Belgia, Dania, Japonia; Francja, Szkocja* "Skotlando"; R *-ija: Italija, Francija, Rossija*; [H *-ia*: *Italia, Francia, Rusia*]), troviĝanta en la oficialaj vortoj *Alĝerio, Bolivio, Liberio, Polinezio, Sirio, Tunizio (*kp ank. *Libio*) kaj ĉiam pli uzata ankaŭ en kombino kun gentonomoj kiel anstataŭaĵo de *-uj* (aŭ *-land*). Analoge ekz. *patr/i/o* (= *patr/uj/o, patr/o/land/o*), *utopio*. Kelkaj leksikografoj (ekz. Meazzini 1922; kp PIV) identigas la landnoman L-devenan (pseŭdo)sufikson kun la abstrakta ps-sf *-i* 1 de Gr deveno; tiel ankaŭ Albault (v.c. 98), citante Z en Ekz § 32, 3 "diplomatiiston oni povas ankaŭ nomi diplomato". Tiu identigo estas ĝusta laŭ HE etimologio sed malprava el la vidpunkto de Ea etimologio, ĉar *-i* 1 kaj *-i* 3 estas prenitaj el malsamaj fontlingvoj kaj malsamkarakteraj vortogrupoj. ¶ IoIeIa *-ia*.

L landnoma *-ia* estas orig. femala formo de adjektivo (sk. *terra* "lando": *patria terra* "patra lando"), kreita per la suf. *-i* (kp mask. *regius*/fem. *regia* "reĝa") devenanta de HE adj.-suf. *-jo-* (kp Gr *phílios* "amika" de *phílos* "amiko"). Kp ps-sf *-i* 1, *-i* 4.

-I/ 4: L adjektivsufikso, subst.-igite formanta nomojn de plantgenroj, derivitaj de personaj nomoj: *dalio, gardenio, hortensio, kamelio*. ¶ Io *-i/o*, IeIa *-ia*.

Femala formo de L adj. (sk. *planta* fem.) formita per la suf. *-i*: vd. ps-sf *-i* 3, kun kiu ĝi estas identa.

-ID/: L-devena adj.suf. (L *-idus*; A *-id*, F *-ide*, I[H] *-ido*), formanta adj. el statindikaj verboj kun inf. *-ere*, ekz. *humida* (el *humere* "esti malseka"), *acida* (el *acere* "esti akra"); vd. ank. *avida, rapida, rigida, valida*. Sen origina verbo: *solida*. Subst.-igo en *invalido, likvido*. ¶ Io *-id/a*, Ie *-id*, Ia *-ide*.

La suf. havas plurajn eblajn fontojn; ev. ĝi estas kombino de HE sufiksoj *-do-* kaj *-dho-* (la *-i-* ne orig. apartenas al la sufikso; ĝi povas esti modifita formo de la verbstema *-e*).

-I(E)R/ (*-ier* en *bankiero, kanceliero, kuriero; -ir* en *barbiro, kavaliro, oficiro, pioniro; -er* en *kelnero, makleri, pasaĝero, revolvero, portero*): L-devena subst.-sufikso kun konsiderinda formvario en la modernaj fontlingvoj (A *-er/-ier*, F *-[i]er*, G *-ier/-er*, I *-iere*, Po *-ier/-er(z)*, R *-ir/-er*, [H *-ero*]), formanta personsignifajn vortojn el subst. (*bankiero, barbiro, kavaliro*) aŭ agantnomojn el verboj (*kuriero*). Ankaŭ pri objektoj: *revolvero*. ¶ Io *-(i)er/o*, IeIa *-ero*.

El L *-arius* (ekz. *bibliothecarius, secretarius, cancellarius* "skribisto") kaj do identa kun la ps-sf *-ar(i)/*.

-IK/: Gr-L adj.-suf., internacia en la nomoj de sciencoj kaj artoj (A *-ic[s]*, F *-ique[s]*, G *-ik*, I[H] *-ica*, Po *-yka*, R *-ika*): *aritmetiko, botaniko, elektroniko, gramatiko, logiko, matematiko, tekniko* k.m.a. (ĉ. 35 el 65 vortoj kun tiu ĉi suf.). Tiuj nomoj estas normale bazitaj sur Gr materialo (Gr adj. *-ikê´* [fem.]; oni subkomprenas *tékhnê* "arto"). Alia vortgrupo konservis sian adjektivan karakteron (L *-icus*; A *-ic[al]*, F *-ique*, G *-isch*, I[H] *-ico*, Po *-yczny*, R *-iĉeskij*): *aŭtentika, fanatika, gotika, katolika, klasika, romantika, unika* ktp. Tiu grupo baziĝas grandparte sur L materialo aŭ pasis al modernaj lingvoj tra L. Klare adjektivaj estas ankaŭ *Afriko* (sk. "lando"), *angeliko* (sk. "planto"), *Atlantiko* (sk. "maro"), *lunatiko* (sk. "persono"), *persiko* (sk. "frukto"). – **Rim.** Identa kun la neoficiala eo-sufikso *-ik* (Wü,PG,GD, PIV), kiu formas nomojn de arto aŭ tekniko el la nomoj de la respektiva isto: *ĵurnalist/ik/o, poet/ik/o*. ¶ (Sciencoj, artoj:) Io *-ik/o*, IeIa *-ica*. (Adj.:) Io *-(ik)/a*, IeIa *-ic*.

La suf. estas hejma káj en L (*-icus*, ekz. *unicus* "unika) káj en Gr (*-ikós*, ekz. *physikós*

"natura"), sed multaj L adj. kun *-icus* estas pruntitaj el Gr. La suf. devenas de HE adj. -suf. *--iko-* (kp Sa *-ikā́/,* Li *-ikas*).

-IL/: L adj.-suf. kun internacia disvastigiteco en kelkaj adjektivoj (L *-ilis;* A *-il[e],* F[H] *-il,* I *-ile*), formitaj el subst. (*civila, humila*) aŭ verboj (*facila, utila*). ¶ Io *-il/a,* IeIa *-il.*

-IN/1: L adj.-suf. (*-inus*), esprimanta apartenecon (ekz. L *divinus* "dia", *masculinus* "maskla"), ofte al bestonomoj (*vakcino*) aŭ al loknomoj (*muslino*). En Eo ĝi estas trovebla en subst.-igoj; kp ank. *albino, doktrino, gilotino, skarlatino; marin-* estas eĉ verbigita. ¶ Io *-in/,* IeIa *-in.*

El HE adj.-suf. *-ino-,* kp Sa *navína-* "nova", Gr *erythrínos* "ruĝulo" (nomo de fiŝo). – Identa kun ps-sf *-in 2.*

-IN/ 2: Internacia kemia sufikso (L *-inum/-ina;* A *-in[e]* F *-ine,* GR *-in,* I[H]*-ina,* Po *-yna/-ina*), signifanta kemian kombinon: *anilino, benzino, glicerino, kinino, margarino, morfino, naftalino, nikotino, stearino, striknino, tanino, vazelino.* ¶ Io *-in/o,* Ie *-ine,* Ia *-ina.*

Orig. subst.-igo de la L adj.-suf. *-inus;* vd. ps-sf *-in* 1, kun kiu tiu ĉi estas identa.

-ISM/: Internacia sufikso de Gr deveno (pri formoj, vd. Eo-suf. *-ism*). Kiel ps-sf., ĝi ĉefe signifas politikajn, religiajn aŭ filozofiajn doktrinojn (ĉ. 20 vortoj). Aliaj sencokategorioj estas fenomenoj biologiaj kaj medicinaj (*atavismo, organismo, paroksismo, reŭmatismo*) aŭ lingvaj (*arkaismo, idiotismo, neologismo, solecismo*). En *aforismo* kaj *ostracismo* ĝi alproksimiĝas al la origina rolo en Gr (agonomo). ¶ Pri formoj en IoIeIa, vd. suf. *-ism,* same pri la deveno de la sufikso.

-IST/: Internacia sufikso de Gr deveno (pri formoj, vd. Eo-suf. *-ist*). Kiel ps-sf ĝi troviĝas en malgranda nombro da vortoj (ĉ. 15), el kiuj preskaŭ ĉiuj signifas "ismanoj". En du vortoj (*juristo, solisto*) ĝi konformas al la rolo de la Eo-sufikso *-ist* (profesiulo). Vd, tiun pri formoj en IoIeIa kaj pri la deveno de la sufikso.

-IT/ 1: Internacia sufikso Gr-devena (Gr *-ítis,* L *-itis;* AG[H] *-itis,* FI *-ite,* PoR *-it*), uzata en la medicina terminologio por signifi inflamon: *artrito, bronkito, (difterito).* ¶ Io *-it/o,* Ie *--ite,* Ia *-itis.*

En Gr kun pli ĝenerala signifo "malsano"; orig. femala adj.-formo, ekz. *arthrítis* "artika" (sk. *nósos* "malsano"); responda maskla formo adjektiva kaj substantiva finiĝas per *-tês* (vd. sekv.).

-IT/ 2: Internacia personsignifa sufikso Gr-devena (Gr *-ítês,* L *-ita;* A F *-ite,* IPo [H] *-ita,* R *-it*), ofte aldonata al personnomoj ("ano de...") aŭ loknomoj ("loĝanto de..."): *ermito, jezuito, kosmopolito.* ¶ Io *-it/o,* Ie *-ite,* Ia *-ita.*

Gr *-tês* estas ĝenerala sufikso (maskla) de aganto (ekz. *poiêtê´s* "faranto; poeto"); la responda femala formo estas *-tis* (vd. sub ps-sf *-it* 1; kp plue sub ps-sf *-or* 1). La antaŭa *i* originas en substantivaj *i*-stemoj, ekz. *pólis* "urbo" : *polítês* "urbano" (kp sub *politiko*).

-IT/ 3: Internacia substantivsufikso Gr-devena (Gr *-ítês/-ítis,* L *-ites;* AFI *-ite,* GR *-it,* Po *--it/-yt,* [H *-ita*]), signifanta i.a. mineralojn (*grafito, granito, malakito, pirito*) k.s. (ekz. *stal/agmito, -aktito*), ank. la eksplodaĵon *dinamito* (orig. komerca marko). ¶ Io *-it/o,* IeIa *-ite.*

La du cititaj Gr formoj estas maskla resp. femala adj.-formo (sk. "ŝtono"), vd. ps-sf *-it* 2.

-IV/: Internacia adj.-sufikso L-devena (L *-ivus;* A *-ive,* F *-if,* G *iv,* I[H] *-ivo,* Po *-ywny,* R *-ivnyj*), aldonata al la supina radiko de L verboj (finiĝanta per *t* aŭ *s*), egala al "-anta, -pova" (vd. ekz. *aktiva, efektiva, kolektiva, konservativa, kursiva, negativa, pasiva* k.a.). Multaj gramatikaj terminoj subst.-igitaj, kie la adjektiva rolo estas facile subkomprenata: *akuzativo* (akuzativa kazo), *imperativo* (imperativa modo), *substantivo* (substantiva nomo), *superlativo* (superlativa grado) k.a. La senco estas aktiva (escepto: *fiktiva*). En *masiva, subjektiva* la sufikso signas nur

apartenecon. – **Rim.** Identa kun la neoficiala eo-sufikso *-iv* (Wü, PG, GD, PIV) kun la senco "-pova, -kapabla", ekz. *el/vok/iv/a, pag/iv/a, produkt/iv/a.* ¶ Io *-iv/a,* Ie *-iv,* Ia *-ive.*

La orig. formo de la suf. estis *-vu-*, kp L *laevus* = Gr *lai(ŭ)ós* "maldekstra" (< HE *-ŭo/*). Pro vortoj kiel *clivus* "deklivo", *rivus* "rivereto" estiĝis pro misanalizo nova suf. *-iv(u)-* .

-IZ/: Internacia verbsufikso Gr-devena (Gr *-ízein,* L *-izare;* A *-ise/-ize,* F *-iser,* G *-isieren,* I *-izzare,* Po *-izowac',* R *-iz(ir)ovat',* [H *-isar*]) kun faktitiva senco "igi": *amortizi, centralizi, civilizi, mobilizi, organizi;* ank. "apliki certan metodon": *kaŭterizi.* **Rim.** Identa kun la neoficiala eo-sufikso *-iz* (Wü,PG,GD,PIV) kun la sencoj "provizi/garni per" (*sal/iz/i, kupr/iz/i, makadam/iz/i*) aŭ "igi" (*hipnot/iz/i,* sin.: *hipnot/ig/i*). ¶ Io *-iz/ar,* IeIa *-isar.*

Gr *-íz(ein)* (kun tiel intransitiva kiel transitiva senco: "agi kiel [iu]; fari [iun ia]") devenas de *-idj-*, kombino de *d*-stemo kun la desubstantiva verboforma sufikso *-j-* (tipo: *elpíd-* espero", *elpízein* "esperi"). La apartenanta deverba substantivo estas reprezentata de (ps-)suf. *-ism.*

-M(AT)/(***-mat*** en *klimato* kaj kiam alia sufikso sekvas: *matematiko, numismatiko, reŭmatismo;* ***-m*** en ceteraj okazoj): Internacia sufikso Gr-devena (Gr *-ma -matos,* L *-ma -matis,* en la modernaj lingvoj ĝenerale reduktita al *-ma/-me* aŭ *-m,* kp tamen Po [okaze] *-mat*), formanta deverbajn subst. signifantajn agon aŭ ties rezulton. Laŭ la vokalo kiu antaŭas la sufikson en la Gr fontverbo, ĝi aperas kiel *-am/ (panoramo, programo)*, *-em/ (problemo, sistemo). -om/ (fantomo, simptomo);* ekzemploj kun antaŭa konsonanto: *astmo, dogmo, prismo, spermo.* ¶ Io *-m/o,* IeIa *-ma (-mat/* en la apartenantaj adj.: *dramatic*).

Gr *-ma(t)* el *-mn(t)*: la suf. estas identa kun L *-mentum,* vd. sekv.

-MENT/: Internacia sufikso L-devena (L *-mentum;* AFGPoR *-ment,* I[H] *-mento*), formanta deverbajn substantivojn signifantajn (a) konkretan rezulton de ago (*ekskremento, fragmento, fundamento, komplemento, testamento),* (b) la agon mem (*eksperimento, momento),* (c) instrumenton, ilon (*instrumento*!, *medikamento, monumento, parlamento).* ¶ Io *-ment/o,* Ie *-ment,* Ia *-mento.*

L *-mentum* estas analizebla *-men/to/m* kaj respondas ekzakte al Gr *-mat(o)-*, vd. la antaŭan. L posedas ankaŭ pli mallongan formon *-men* (= Gr *-ma*) kun analoga signifo, kp *nomen* "nomo", *semen* "semo". El HE *-men/-mn,* sufikso formanta agonomojn, kp ank. Sa *bharîman-* "portado", G *Same* "semo". Al tiu aldoniĝis en L *-to* (> *-tu*), kredeble identa kun la *t* de la deverbaj adjektivoj kaj la pasiva participo.

-ON/: Romana sufikso substantiva (A *-on, -oon,* F PoR *-on,* I *-one,* [H *-ón*]) kun aŭgmentativa valoro, kiu en multaj vortoj klare sentiĝas (*balkono, balono, frontono, kaldrono, kanono, kartono, medaliono, miliono, perono, salono*). Personsignifa en *fripono, patrono.* – Ekzistas homonima F sufikso kun mala (diminutiva) valoro, videbla en *krajono* kaj – kune kun *et* – en *felietono.* ¶ Io *-on/,* IeIa *-on.*

El L *-onus* (mask.), *-ona* (fem.) kiel en *patronus, matrona,* propr. "patrego", "patrinego"; ank. en *Naso -onis* "(grand)nazulo" (moknomo), *edo -onis* "manĝegulo". Kp Gr *gástrôn* "manĝegulo" el *gastê´r* "stomako" (HE personkarakteriza suf. *-on*).

-OR / **1**: Internacia L- (kaj Gr-)devena personsufikso (L *-or;* AGPoR[H] *-or,* F *-eur,* I *-ore*), aldonite al la L supina radiko (finiĝanta per *-t* aŭ *-s*) formanta agantnomojn (masklajn aŭ komungenrajn). Malmultaj estas nelatinaj: *retoro* (Gr), *Ekvadoro, matadoro* (H), *sufloro, ŝoforo, tajloro* (F). – Praktike ĝi fariĝis suf. por signifi profesiulojn (do "istojn", ne "antojn"): *aktoro, asesoro, diktatoro, direktoro, doktoro, inspektoro, konduktoro, kuratoro, oratoro, profesoro, rektoro* k.a. Foje pri aĵoj: *ekvatoro, motoro, radiatoro, sektoro.* **Rim.**

Unu el la kombinoj stemo+sufikso, nome ***-atoro***, funkcias kiel neoficiala eo-sufikso aŭ pseŭdosufikso por aparatoj (ekz. *trans/form/ator/o, generator/o*). Vd. PIV s.v. ¶ Io *-or/,* IeIa *-or.*

El HE agantnoma suf. *-ter/-tor,* kp Sa *dâtár,* Gr *dotêr,* L *dator* "donanto".

-OR / 2 (var. ***-ur*** en *teruro*): Internacia L-devena sufikso (L *-or,* A *-our/-or,* F *-eur,* G *-or/-eur,* I *-ore,* [H *-or*]) formanta deverbajn abstraktajn subst. indikantajn staton/kvaliton (vd. ekz. *amoro, doloro, furoro, koloro* , *valoro*); konkretigita en *likvoro, vaporo.* ¶ Io *-or/,* Ie *-ore,* Ia *-or.*

L *-or* el *-os* (ekz. *honor,* arkaike *honos*), tipo responda al Gr subst. kun fino *-ôs,* ekz. *hé-ôs* "tagiĝo".

-OR/ 3: Internacia L-devena sufikso (L *-orius;* A *-ory,* F *-oire,* G *-orisch,* I[H] *-orio,* Po *-oryczny*), formanta adjektivojn, kiuj semantike proksimiĝas al ptc.prez. (kp *-iv*): *akcesora* "akompana", *provizora,* eo *sensora* "senta". Kp ank. *putoro.* ¶ Io *-or/ a,* IeIa *-ori.*

Formita per la adj.-sufikso *-i* (vd. *-i/* 3) aldonita al la L agantnomo *-or* (vd. *-or/* 1), ekz. *dictatorius* adj. de *dictator.* Kp la etim. identan ps-sf *-ori.*

-ORI/(var. ***-or*** en *kontoro, koridoro*): Internacia L-devena sufikso (L *-orium;* A *-ory,* F *-oire,* GPo *-orium,* I[H] *-orio,* R *-orija*) kun senco "-ejo": *aŭditorio, konservatorio, konsistorio, laboratorio, observatorio, purgatorio; kontoro* kaj *koridoro* respegulas romanajn formojn. ¶ Io *-ori/o,* Ie *-oria,* Ia *-orio.*

Orig. neŭtra formo de la L adj. *-orius,* vd. *-or/* 3. Semantika evoluo: *auditor* "aŭskultanto" > *auditorium* "io, en kiu estas aŭskultantoj" = "aŭskultejo".

-OZ/: Latin(id)a sufikso (L *-osus;* A *-ous,* F *-eux,* G *-ös,* I[H] *-oso*), formanta adjektivojn kun senco "-plena, -abunda, -hava": *furioza, grandioza, kurioza, nervoza, serioza;* subst.-igita en *virtuozo.* Aperas kun faka signifo en *celulozo, glikozo* (kem.), *mimozo* (bot.), *tuberkulozo* (med.). – **Rim.** Kelkatempe uzata kiel neoficiala eo-sufikso (PG,GD,PIV) kun sama senco: *por/- oz/a, ŝton/oz/a* ("s ub la influo de Ido", PIV; vd. tie pri la diversaj fakaj signifoj.) ¶ Io *-oz/a,* Ie *-osi,* Ia *-ose.*

Etimologio necerta; pli antikva formo *-onsus.*

-T(AT)/(***-t*** en *civito, kvalito, majesto, societo, volupto*: ***-tat*** en *admiralitato, fakultato, universitato*): Internacia L-devena sufikso (L *-tas -tatis;* F *-té,* G *-tät,* I *-tà,* PoR *-tet,* [H *-tad*]), formanta abstraktajn substantivojn el adjektivoj ("-eco") kiel en *kvalito, volupto.* La malmultaj ekzemploj en la Ea radikaro havas plejparte sekundarajn (ĉefe konkretajn) signifojn, ekz. loko/ - institucio *(admiralitato, fakultato, universitato),* homkolektivo (*societo*), titolo *(majesto).* ¶ Io *-tato,* Ie *-tá,* Ia *-tate.*

L *-tas -tatis* estas identa kun la samsignifa Gr suf. *-tês -têtos (*kp L *novitas* "noveco" k Gr *neótês* "juneco") kaj Sa *-tât-* (*sarvátât-* "tuteco"). Eble plivastigo de pli mallonga formo *-ta,* ekz. en L *iuventa* "juneco". Paralela estas *-tut-* en L *vir/tus -tutis* "vireco", vd. *virto.*

-TUD/: Malofta L-devena sufikso (L -*tudo -tudinis;* AF *-tude,* I *-tudine,* [H *-tud*]), sinonima al L *-tat-* "-eco" (vd. la antaŭan), Nur en du fakvortoj: *latitudo, longitudo.* ¶ Io *-tud/o,* IeIa *-tude.*

El HE *-tu/,* sufikso formanta abstraktajn subst. el verboj (kp L *cantus* "kanto", Gr *grapty´s* "skrapado"), kombinita kun la L susbtantivtipo finiĝanta per *-do -dinis* (ekz. *or/do -dinis* "ordo").

-UR/: Internacia sufikso L-devena (L - *ura;* AF *-ure,* G *-ur,* IPoR[H] *-ura*), formanta agsubstantivojn (ofte signifanta agrezulton aŭ agadon), normale aldonita al la supina radiko de la L verboj (finiĝanta per *-t,-s;* esceptoj: *broŝuro, figuro, proceduro).* Foje aldonita al oficista titolo por nomi la oficon (ekz. *cenzuro*). Du el la apartenantaj vortoj estas verbkategoriaj: *gravuri, veturi.* Sencekzemploj: (a) agado: *kulturo, proceduro;* (b) arto: *arkitekturo, literaturo;* (c) agrezulto: *bro-*

ŝuro, figuro, garnituro, karikaturo, naturo, tinkturo; (d) abstraktaĵoj: *kvadraturo, temperaturo, uzuro.* ¶ Io *-ur/o,* IeIa *-ura.*

Kombino de la L suf. *-tu* (vd. ps-sf *-tud/*) kun alia suf. enhavanta *r* (ekz. tiu trovebla en L *sacr-* "sankta" [vd. *sakramento*]).

-Z/: Internacia sufikso Gr-devena (GrL *-sis*; A [H] *-sis,* FG *-se,*,I *-si,* PoR *-za*; la Ea formo sin apogas sur la prononco de F GIPoR), formanta abstraktajn deverbajn subst. aldonite al Gr verbbazoj: *dozo, fazo, frazo, krizo, paŭzo, tezo.* Ofte uzata en faklingvaj terminoj, precipe med. (*diagnozo, ftizo, pirozo*) kaj rel. (*apoteozo, ekstazo, metempsikozo*). La plej multaj bazoj finiĝas per vokalo, kio faras la voĉan *z* natura; troviĝas unu ekzemplo kun *s* pro antaŭa konsonanto: *sintakso.* – **Rim.** Unu el la kombinoj kun antaŭa vokalo, nome *oz,* evoluigis internacie la sencon "malsano" (med., bot.), vd. PIV sub *-oz.* ¶ Io *-z/,* Ie *-se,* Ia *-sis/-se.*

Gr *-si(s)* el *-ti(s)* (kp *-ti-* en la apartenantaj adj., ekz. *krísis* : *kritikós*) el HE agonoma suf. *-ti/* (vd. sub la ps-sf *-cio*).

Aldonendoj

La nombroj montras volumon kaj paĝon. La signo + signifas "aldonu".

1,17 **ABDIKI**: POST IL *-dicare* + Mnemonike apogas G *abdanken* s.s.
ABELO: POST *orelo* + *pastelo*, ev. *kulero*.
ABOMENI: POST *kanabeno* + *kapuceno*; POST *rubeno* + *sateno*.
1,18 **ABONI**: POST *moki* + *penti*; POST *plendi* + *promeni, rifuĝi, ripozi*.
ABSCESO: POST H *-ceso* + G *Abszess* [apsts-].
1,19 **AĈETI**: POST *kraĉi* + *kruĉo*; POST *marĉandi* + *meĉo*. Cherpillod (1990, 16) donas la regulon: F *ch* > Eo *ĉ* kiam la koncerna vorto ne estas retrovebla samforme en lingvoj; > *ŝ* kiam la vorto estas retrovebla en aliaj lingvoj kun la sono [ŝ].
ADIAŬ: Eo *adiaŭ* ev. < **adieŭ* el F *adieu* (Günkel 1996, 186), vd. ps-sf *-aŭ* supre.
ADMONI: POST Ps-pf *a(d)-* + ¶ 1881 *test-* (< L *testari*). Kp *monstro* k spec. *monumento*.
1,20 POST *monere* "admoni". + Prapar. estas G *mahnen* s.s.
ADVERBO: ĈEFINE + Kp spec. *proverbo*.
AEROPLANO: G *Aeroplan*†.
AFEKTI: G *affektieren*†; + G *affektiert* "-(it)a".

1,21 **AGI** : POST ekmovi [ion] + "konduki [ion]",
1,22 **AGONIO**: ĈEFINE + Kp *protagonisto*.
AĜO: AL LA EKZEMPLOJ + *forĝi, indiĝeno, inĝeniero, loĝi, marĝeno, paĝo, pasaĝero, rifuĝi, saĝa, venĝi*.
AĜIO: POST G *Agio* + [a:´ĝo, a: ´ĵjo].
AJLO: POST *serajlo* + *tajl/i, -oro*; POST *bataliono* + Vd. Régulo Perez en Eologio I, 67 s.
1,23 **(AJN)**: Günkel (perletere) tamen memorigas, ke la esprimo G *irgend ein* estas analizenda tiel: *irgend* = "ajn", *ein* = "iu". – POST 1906b + 1907.
AKCELI: POST *okcidento* + *sukceno, vakcino*.
1,25 **AKRA**: ANTAŬ *oksigeno* + *oksido*; POST *oksikoko* + *okzalo*.
AKROBATO: POST I *-a* + G *Akrobat*.
1,26 **AKVO**: POST *skvamo* + *trankvila*.
AKVILEGIO: ĈEFINE + Kp spec. *frugilego*.
1,27 **ALDO**: POST *cigaredo* + *kaskedo*.
1,28 **ALGEBRO**: POST *admiralo* + *ogivo*.
ALĜERIO: POST Jü + kp *Alĝerujo* Adresaro 1896.
ALĤEMIO: G *Alchimie* + *Alchemie*.
ALIA: POST *paralela* + *paralelogramo*.

1,29 **ALTA**: POST < F + *haut.*
ALTARO: POST L *altare* + ¶ 1882 *altar-.*
1,30 **(ALUNO)**: laŭ FPo + G.
AMI: ANTAŬ R *amur* + G *amourös* "ama". – POST (vd. *Amoro*) + ¶ 1881 *am-.*
AMARA: ĈEFINE + Kp *merizo.*
AMATORO: POST Po *-or* + G *Amateur.*
AMBOSO: POST *afusto* + , *refuti.*
AMBROZIO: POST dieca" + (de *ámbrotos* "senmorta").
1,31 **AMBULANCO**: ĈEFINE + Samfamilia: *somnambulo.*
AMFORO: G *Amphor/a, -e.*
AMFIBIO: ĈEFINE + Kp spec. *mikrobo.*
1,34 **ANGLO**: POST "angligi" + k la internacia termino *anglicist* "anglisto").
1,34 **ANGULO**: POST Sa *áncati* "kurbigas" + (kp *palankeno*).
1,35 **ANONCI**: POST *denunci* + *nuncio.*
ANSERO: ANTAŬ Almenaŭ + Samtipa estas *tubero.*
ANTAŬ: POST **antee* + Vd. nun Günkel 1996, 187 s. (**ante* estis neebla pro la jama finaĵo de la prezenca participo *-ant*); simile Mattos 1987, 83. Kp la artikolon pri la ps-sf *-aŭ* en la sekcio Pseŭdosufiksoj.
1,36 **(ANTAŬ)**: ANTAŬ 1906b + 1906a *vor* (1), *pre* (2; < L *prae*). – POST *davan* (2) + < F *devant,* I *davanti*); 1907 *anter* (2). - ĈEFINE + Kp ank. *remparo.*
ANTICIPI: ĈEFINE + Kp spec. *emancipi.*
ANTIPATIO: ĈEFINE + Kp spec. *simpatio.*
ANTOLOGIO: POST *krizantemo* + *lekanto.*
1,37 **APARTAMENTO**: POST I *-amento* + G *Appartement.*
APARTENI: ĈEFINE + Kp spec. *impertinenta.*
APELACIO: ĈEFINE + Kp spec. *interpelacio.*
APERTURO: ĈEFINE + Kp ank. *kovri.*
1,38 **APOSTOLO**: ĈEFINE + (HE rad. **stel-*, vd. *loko.*)
1,39 **(APOTEOZO)**: ĈEFINE + Por *-oz,* vd. *metamorfozo* k la ps-sf *-z.*
APRO: POST *akcipitro* + *kankro.*
ARBO: POST *ĉamo* + *nepo.*
1,40 **ARDI**: ĈEFINE + Kp *potaso.*
ARGUMENTO: POST Ps-sf *-ment* + ¶ pEo *pruf-* "argumenti", vd. LZ I, 352.
1,41 **ARKAIKA**: ANTAŬ *arkaismo* + *anarĥio*; POST *monarko* + *oligarĥ/o, -io.*
1,42 **ARNIKO**: POST AFIPo *arnica* + G *Arnika.*
1,43 **ARTIKOLO**: POST *lupolo* + *medolo*; POST *pediko* + *testiko, (lavando, libelo)*; POST *fablo* + *kuniklo*; POST *miraklo* + *obstaklo, poplo.*
ARTRITO: POST I *artrit/e* + G *Arthritis.*
1,44 **ASPIDO**: POST I *-ide* + R *aspid.*
1,45 **ASTRONOMO**: POST *gastronomio* + *metronomo.*
ATEISMO: ĈEFINE + Kp spec. *te/ismo, -isto.*
1,46 **ATESTI**: ANTAŬ *testamento* + *kon-, pro/testi*; POST *testamento* + *testiko.*
ATINGI: POST Ps-sf *a(d)-* + ¶ 1881 *tab-* (< F *attraper:* PVZ 5, 148).
1,47 **AŬ**: ANTAŬ 1894 *u* + 1882 *aŭ.*
AŬREOLO: ANTAŬ R *oreol* + G *Aureole.* – ĈEFINE + Kp *oriolo,* etimologie identan.
AŬSKULTI: POST PVZ 5, 183) + ; kp pEo *aŭt-* LZ I, 352.
AŬSTRALIO: POST (8; + Adresaro 1890.
1,49 **AVANTAĜO**: POST cetere laŭ F. + ¶ 1881 *vand-* (sama etimo kun aferezo kaj apokopo).
AVENUO: POST (H *avenida*). + Analogaj formoj laŭ F: *menuo, moruo, revuo.*

AVIZO: POST voĉigi intervokalan *s* + (vd. *pizo*).

1,50 **(AZENO)**: POST *ónos* s.s. + (kp *onobriko*).

AZIO: POST G *Asien* + [-z-]. - POST (8; + Adresaro 1889.

1,51 **BABILI**: POST *barbaro* + *paviano*.

BALANCI: ANTAŬ 1894 + 1881 *vug-* (< G *wiegen*: PVZ 5, 150).

1,52 **BALISTIKO**: POST *paroli* + *parabolo*.

1,53 **BANDITO**: ĈEFINE + Samfamilia: *kontrabando*.

1,54 **BARBARO**: POST *balbuti* + *rabarbo*.

1,55 **BASO**: POST *bareliefo* + *kontrabaso*. Kp ank. *rabato*.

1,56 **BATALIONO**: POST *talio* + *tilio*.

1,57 (**BEDAŬRI**): POST *bedur-)* + – La radiko havas pli vastan semantikan kampon ol G *bedauern* (influo de R *ĵalet'*, vd. Duc Goninaz 1974, 39).

BELA: POST *beletristiko* + k pref. *bo-*.

BENI: POST I *benedire* + G *benedeient*†.

BENDO: POST *banto* + *rubando*.

1,59 **BIFSTEKO**: ANTAŬ Jü + LEsp 12/1898.

1,60 **BIRMO**: ANTAŬ Wü + Eisto 3/1894. [La indiko "ne ĉe Z" estas evidente erara.]

1,61 **BLINDA**: POST malfacile asimileblaj) + ¶ 1882 *lind-* (sama etimo kun aferezo).

BLUZO: POST G *Bluse* + [-z-].

BOAO: POST *firma/o* + *lama/o* Jü.

1,62 **(BOATO)**: POST *koakso* + Kp *rodo*.

1,63 **BOTELO**: POST (H *botella*) + Kp G (fam.) *Buttel* s.s.

1,64 **BOVLO**: POST A *bowl* + [-oŭ-].

1,67 **BRUI**: POST murmurego") + ¶ 1882 *bru-*.

1,68 **BUDUARO**: ANTAŬ *trotuaro* + *repertuaro*.

1,69 **BULJONO**: POST G..[bujô:´ +[buljô´, buljóN].

1,69 **BULVARDO**: POST Jü + ; kp *bulvaro* LEsp supl 11/1900.

1,71 **CEDI**: ANTAŬ *necesa?* + *koncedi*.

CELO: ANTAŬ Io *skopo* + Vp *zeil*.

1,72 **CENTRALO**: POST FH(I) *central(e)* "centra" + (kp *central/a* Eisto 5/1890).

CENZURO: ĈEFINE + Samfamilia: *recenzi*.

1,73 **CERBO**: POST A *cerebral* + G *zerebral* [ts-].

CERTA: POST "certigatesto". + ¶ 1881 *pil-* (sen etimologio en PVZ 5, 144).

CIFERO: POST Po *cyfra* + A *cipher* i.a."cifero".

1,74 **CIGAREDO**: POST *bufedo* + *kaskedo*.

CIKLO: POST *ciklopo* + *kaleŝo*.

1,75 **CIRKO**: ĈEFINE POST *ĉirkaŭ* + *serĉi*.

1,76 **CITI**: POST (kiel atestanton) + (> "mencii kiel atestanton" > "citi")...

1,78 **ĈAGRENI**: ANTAŬ 1894 + 1882 *terg/- i* "-iĝi" (< R *terzanie* ["turmento"]: PVZ 5, 148).

1,79 **ĈAPO**: POST *ĉapelo* + *kapelo*; POST *kapoto* + *kapuceno*.

ĈAPITRO: ĈEFINE + Kp spec. *kapitulaco*.

ĈARO: POST *kariero* + *kariolo*.

ĈARMO: ANTAŬ 1894 + 1882 *s'arm-*.

1,80 **ĈARPIO**: ĈEFINE + Kp spec. *karpeno*.

ĈASTA: ĈEFINE + Samfamilia: *kasto*.

1,81 **(ĈERIZO)**: ĈEFINE + Etimologie identa estas *kirŝo*. Kp ank. *merizo*.

ĈI: POST 1906b *s'-* (ekz. *s'tu* "tiu ĉi") + 1907 *zu* "tiu ĉi", *zo* "tio ĉi", *ze* "tie ĉi".

1,83 **ĈU**: Vd. ank. Murgin 1992.

1,84 **DA**: ANTAŬ Mankas en 1894 + 1881 *de* ("kvardek mil dukatoj de destoj [= ŝuldoj]").

DAMO(J): ĈEFINE + Kp I *donna* "virino" (vd. *beladono*).

DANO: ANTAŬ N-ro 33 1890 + Eis-

to 2/1889.
1,85 **DE**: POST 1906b ank. *ab* (POST pasivo; < L) + 1907 *par* (POST pasivo; < F).
1,86 **DECI**: POST F *décent* + G *dezent* [-ts-]. – POST *ortodoksa* + *paradokso.*
DECEMBRO: POST L *(mensis) December.* + Pri la radikfino *-br,* vd. *novembro.*
DECIGRAMO: POST (2;Wü): + A.
DEDIĈI: POST (vd. *abdiki* + , *predik/i, -ato.*
1,87 **DEFICITO**: POST F *déficit* + G *Defizit* [-ts-].
1,87 **DEK**: ĈEFINE POST Vd. ank. sub *cent* + k *kvaranteno, pentekosto.*
1,88 **DEKORACIO**: POST *dekor/o* PIV +; *dekor-* tolerata formo laŭ Akad. 1967.
1,89 **DELIKATA**: ĈEFINE + ; vd. ank. *logi.*
1,90 **(DEMOKRAT/O,-IO)**: POST *pluto/krato* + *teokrato;* POST *geodezio* + *kondemni.*
1,91 **DES**: ANTAŬ Vd. plue sub *ju.* + Se la deirpunkto do estas G *dest-,* oni povas kompari la apokopon de -*t* en *for* (< G *fort*), *laŭ* (< G *laut*) [laŭ C.Günkel, perletere].
DETERMINI: POST Po *-owac'* + G *-ieren* (fil., mat.).
1,92 **DETRUI**: POST Ps-pf *de-* + ¶ 1882 *nant-* (< F *anéantir.* PVZ 5, 142).
DIO: POST pli frua radikformo) + ¶ 1881 *de-* (homonima kun *de* "de").
DIAFANA: POST F *-e* + G *diaphan.*
1,93 **DIAFRAGMO**: La artikolo pritraktas la anatomian sencon; aldonu la fotografian (Ve, Wü; AFIH formoj identaj kun tiuj de la anatomia termino).
DIAGNOZO: POST I *-osi* [-z-] + G *Diagnose* [-z-].
DIAGONALO: ĈEFINE + Kp *poligono.*
DIAMANTO: POST Po *-ment* + G *Diamant.*
1,94 **DIETO**: POST G *Diät* + Kolizias kun eo *Diet/o* GD,PIV "parlamento" (A *diet,* F *diète,* I *dieta*).
1,96 **DIPLOMATO**: POST N-ro 15 1888 + *diplomati/isto* Ekz.
DIRI: POST *dicáti* "montras" + *dicâ* "direkto" (kp *sindikato*); POST *paradigmo* + *poliso;* POST *dediĉi* + *indekso;* POST *edikto* + *verdikto;* ĈEFINE + Kp *venĝi.*
1,97 **DISKRETA**: POST *dekreto* + *ekskremento, rekremento.*
DISPEPSIO: ĈEFINE + Kp spec. *pepsino.*
1,98 **DISTINGI**: ANTAŬ Ps-pf *di-* + Kp sub *lingvo.*
DISTRI: ANTAŬ Ps-pf *dis-* + La signifo PIV 3 ("disigi") sub influo de R *rassejat'* "dissemi; (refl.) distriĝi", vd. Duc Goninaz 1974, 39.
1,99 **DIVERSA**: POST F *divers* + G *divers.*
1,99 **DO**: ANTAŬ 1894 + 1881 *gu* (sen etimologio en PVZ 5, 136). – (Mi informiĝis, ke G *doch* ankaŭ povas funkcii kiel insista vorto post imperativo, ekz. *hör doch!* "aŭskultu do!". Estas eble ke Z komparis tiun sencon de *doch* kun tiu analoga de F *donc,* ekz. *va donc!* "iru do!". Se tiel, Eo *do* povas reprezenti la identan parton de la du vortoj.)
1,100 **DOLORO**: ĈEFINE + Samfamilia: *kondolenco.*
DOMO: POST Jespersen 1928, 36 + k Gopsill 1990, 75).
DOMAĜO: ĈEFINE + Kp spec. *kondemni.*
DONI: POST *donaco* + *pardoni.*
1,101 (**DONACO**): POST *kurac/i* + Kp *kapitulaco, minaci.* – En 1882 Z uzis alian fonton: *s'enk-* (< G *schenken*).
DORSO: POST Kp A + G.
DOZO: POST G *Dosis* + (plur.: *Dosen* [-z-].
DRAMO: POST Ps-sf *-m(at).* + ¶ 1881 *dram-.*
1,102 **DRAŜI**: POST *forgesi* + *kesto;* post Gr

tríbein "(dis)froti, draŝi" + R *teret'* "froti, skrapi", Li *trinti* "froti"; ĈEFINE + Kp la sekvan k *termito, tritiko,* ev. *torni, turni.*
DRATO: ĈEFINE + , lastvice identa kun HE rad. **ter-,* vd. *draŝi, turni.*
DROMEDARO: POST I(H) *-edario* + G *Dromedar.*
1,103 **DUBI**: POST (kp *dubius* "duba") + Kp ank. G *dubi/os, -ös* "dub(ind)a".
2,10 INTER *fam.* KAJ *fiz.* + *fem.* femala genro, ingenro
2,15 **EDENO**: ANTAŬ Be + LEsp supl. 11/1900.
2,17 **(EDZO)**: ĈEFINE + Vd. nun Golden, Faktoj kaj falsaĵoj pri la deveno de 'edzo' (La Gazeto 35/1991, 25-27, kun listo de priaj artikoloj).
2,19 (**EKSKLUZIVA**): POST *konkludi* + *kluzo, ŝlosi.*
2,20 **EKSTRA**: POST (vd. tiun) + ; por *-ter* kp sub *neŭtra.*
EKSTRAKTO: POST vd. ank. *trakti* + *subtrahi.*
2,21 **EKZEMO**: POST Ps-pf *ek-* + ; ps-sf *-m(at).*
2,23 **ELEKTRA**: POST *identa* + [*malica*], *modera.*
2,24 **EMANCIPI**: ĈEFINE + Kp spec. *anticipi; participo, principo.*
EMBRIO: POST *ganglio* + *petromizo.*
2,25 **EMPIRIO**: ĈEFINE + Kp *pirato.*
ENERGIO: ĈEFINE + Kp spec. *kirurg(i)o,* ank. *organo, orgio.*
2,28 **ERINACO**: ĈEFINE + ; por I *riccio,* kp *kaprico.*
2,31 **ESTI**: POST Gr *estí* "(li/ŝi) estas" + (inf. *eínai < *es-nai),* kp *paleontologio;* POST *interesi* + *kvintesenco, prezenti.*
2,32 **EŜAFODO**: POST apogo de R + Por F *au,* vd. sub *saŭco.*
ETAPO: ĈEFINE + Kp *ŝtupo.*
ETENDI: ANTAŬ eo *hipotenuzo* + *tenio;* POST *tono* + kun *monotona, peritoneo.*
2,33 **EVANGELIO**: POST *idilio* + Ps-pf *eŭ-.*
2,35 **FACO**: POST Kp spec. sekv. + k *surfaco.*
2,36 **FAJFI**: POST Gold 1980, 315 s. + k Kiselman 1992; kp sub *ŝajni.*
FAJLI: POST vd. *fajfi* + kaj kp sub *ŝajni.*
FAJRO: POST Vp *fil* + (vd. Golden Li k Ni 406).
2,37 **FALI**: ANTAŬ ¶ Io *falar* + Vp *falön* (vd. Golden Li k Ni 406).
FALDI: ANTAŬ *im(pliki)* + *a(pliki);* POST *kom/-pliki* + *pliko;* POST listo de sufiksoj + kaj *plekti.*
2,38 **FANATIKA**: ĈEFINE + Kp spec. *profani.*
2,39 **FARI**: ANTAŬ ¶ 1881 + – Rimarku la prepozician uzon de la radiko: *far* "de (ĉe pasiva verboformo)", bazita sur *far' de,* mallongigo (laŭ la modelo de *dank' al*) de *fare de,* proponita de Grosjean-Maupin en 1926. Vd. PAG p. 203. – POST *infekti* + *imperfekto;* POST *konfiti* + *manufakturo;* ĈEFINE + Vd. ank. *perdi, rendevuo, sacerdoto* kaj la vortojn kun fina elemento *-f(ik)* sub *edifi.*
FARINGO: POST vd. sube + Kp *laringo.*
2,41 **FEĈO**: POST *feliĉa* + *plaĉi,* ev. *peĉo.*
FELO: ĈEFINE + Kp ev. *mufo.*
2,42 **FELIETONO**: ANTAŬ Be + LInt 2/1896.
FELTO: ĈEFINE + Kp ev. sub *pilko.*
FENIKSO: POST majusklo.) + Kp *sfinkso.*
2,44 **FIANĈO**: POST nekonata kialo + (kp spec. *serĉ-*).
FIDI: ĈEFINE + Kp *pedelo.*
FIKSI: POST *fini* + *krucifikso.*
2,45 **FILIKO**: POST *korniko* + *radiko.*
FILOZOFO: POST intervokalan *s*-sonon + (kp *parazito,* kie la sono komencas la duan elementon kiel

ĉi tie)...
2,46 **(FINI)**: ĈEFINE + *parafino.* Kp ank. *rafini.*
FISKO: ĈEFINE + Kp spec. *konfiski.*
2,47 **FLANKO**: ANTAŬ Io = + Vp *flan* (vd. Golden Li k Ni 407).
FLARI: POST F *aigle* + ev. ank. *vinagro.*
FLEKSI: ANTAŬ Samfamiliaj vortoj + Necerta etimologio; POST *fleksio* + *reflekti.*
2,49 **FLUIDA**: POST "fluidaĵo" + Ps-sf -*id.*
2,50 **FOJNO**: POST *soifo* + Kp F *ai* > Eo *aj* en *semajno.*
FOKUSO: POST *konuso* + *lotuso.*
FONO: ĈEFINE + Kp spec. *plafono.*
FONDI: POST *musk-.* + Kp *fond/o* "bazo" Eisto 4/1890.
2,51 **FORGESI**: POST G *vergessen* [f-] + Ji *fargesen.* ANTAŬ IoIe + Vp *fögetän* (vd. Golden Li k Ni 407).
FORMO: POST *informi* + *konforma.*
2,52 **FORTA**: POST A *force* "-o" + ¶ 1882 *fort-.*
FORTIKA: POST Neniu evidenta modelo en la fontlingvoj + (La treege malofta L *forticulus,* citita de Szerdahelyi 1987, 135, signifas "iom kuraĝa").
2,55 **FRATO**: POST PIV s.v. *asimili* + kaj kp *rast-.*
2,56 **FRAZO**: ĈEFINE + *parafrazo.*
FRITI: ANTAŬ Be + LEsp 12/1898.
2,57 **FTIZO**: ĈEFINE + Kp ev. *soifo.*
2,58 **FUĜI**: ĈEFINE + Kp nepre *rifuĝi*!
FUMO: ĈEFINE + , ank. *tifo.*
FUNKCIO: POST Be + , kp *funkcion/as* Eisto 5/1890.
2,60 **GALO**: ĈEFINE + kaj *kloro.*
2,61 **(GALANTERIO)**: ĈEFINE + Kp *regali.*
2,62 **GARBO**: POST G *Garbe* + (H *garba*); POST Nd *garf.* + Albault 1961, 89 citas ank. Oc *garbo.*
GARDI: POST *panoramo* + *teorio.*
2,64 **GENIO**: POST R *genij* [g-]. + ¶ 1881 *g'eni-.*
2,65 **GENUO**: POST *diagonalo* + *poligono.*
2,68 **GLIMO**: POST *ledo* + *papavo, (pulvo), ŝimi.*
GLOBO: POST "gajlo" (kp tiun) + , *glomus* "(faden)bulo" (kp *konglomerato*). POST G *Klumpen* "bulo" + (kp sub *klubo*).
2,69 **GRACIO**: ĈEFINE + *malgraŭ.*
2,70 **GRAFOLOGIO**: ANTAŬ Jü + Eisto 11/1893, FK.
GRAMO: POST *mono-* + *paralelo-,...*
2,71 **GRATI**: ĈEFINE + Kp *krabo.*
2,72 **(GREGO)**: ĈEFINE + Samfamilia: *kongregacio.*
GREKO: ĈEFINE + Kp *verdigro.*
GRIFELO: POST *kitelo* + *sigelo.*
GRIMPI: POST LZ I, 100 + Eble laŭ modelo de *rampi,* ankaŭ tiu kun ekskluzive F etimo.
2,73 **GRIPO**: POST Be + ; kp *"influenco"* Eisto 4/1890.
2,75 **GVATEMALO**: POST kp *gvardio* + kaj spec. *Para-, Uru/gvajo.*
GVINEO: ANTAŬ FK + Eisto 8/1892.
2,80 **HARDI**: POST "esti forta, regi" + *kraty's* "malmola"; POST *demokratio* + *kratago.*
2,82 **HEBREO**: Vd. Broadribb en Esperanto 10/1994, 173: transskribo neekzakta, etimologio necerta. Mi bedaŭras, ke la He litero *'ayin* estas nekontentige transskribita; tio dependas de manko de kruda spirito je mia komputoro. La fonto, kiun mi kopiis, estas "The Oxford Dictionary of English Etymology" [1966],p. 434.
HEJMO: AN TAŬ *mejlo* + *kejlo*; POST *mejlo*). + Pri la alternativoj *aj/-ej,* vd. ankaŭ sub *ŝajni.*
HEJTI: ANTAŬ ¶ 1894 + Pri la alternativoj *aj/ej,* vd.ankaŭ sub *ŝajni.*
HEKSAMETRO: ĈEFINE + Kp spec. *pentametro.*

2,83 **HELIKO**: ĈEFINE + Kp sekv.
2,84 **HERNIO**: ĈEFINE + Kp *kordo.*
HEROO: POST G *Heroe* + *Heros.*
2,86 **HIEROGLIFO**: POST Be + ;*-a* LEsp supl. 11/1900.
2,87 **HIRUNDO**: POST kp *hirudo).* + Notu ke **hirundin-* estis neebla pro la sufikso *-in.*
2,88 **HOBOJO**: POST A *oboe* + (Yamasaki: "malnova literumo *hautboy*").
HODIAŬ: ĈEFINE + Kp *meridiano.*
HOMO: POST *ordo* + *bufo, plantago, pulmo, salmo, sapo* kaj ĉiuj vortoj kun ps-sf *-cio*; iom analoge ĉe *palto, piano, rokoko.*
2,89 POST (tiel ankaŭ A *man* + k F *homme).*
HONTO: POST (< A *shame* + G *Scham*).
2,91 **HUNDO**: ĈEFINE + Kp *kanajlo, kanario.*
2,93 **ĤEMIO**: POST *kemi/o* + 8 [tolerata de Akad 1967]
2,96 **ILI**: POST ¶ 1881 *po* (sen etimologio:...) + Günkel 1996, 190 sugestas, ke *p* devenas de *pluralo.*
2,97 **ILUSTRI**: POST Jü + , kp *ilustraci/o* Eisto 2/1894.
2,101 **(INFANO)**: POST *phánai* "diri" + (kp *profeto*).
2,102 **INICIATI**: POST *intens/a* + ; kp tamen *iniciator-* Eisto 5/1890.
2,103 **INKVIZICIO**: ĈEFINE + Esence sametimologia estas *enketo.*
2,104 **INSTIGI**: ĈEFINE + Kp *stango.*
2,106 **INTERJEKCIO**: ĈEFINE + Kp spec. *projekcio.*
INTERNA: POST *interior* "interna" + (pri *-ter,* vd. *neŭtra*).
2,107 **INTERVJUO**: ĈEFINE + Kp spec. *revuo.*
2,108 **(IRI)**: POST *iniciati* + *perei.*
2,110 **(JARO)**: ANTAŬ ¶ 1881 + La elekton de *jar-* influis eble Vp *yel* (Golden Li k Ni 406).
JESUO: ANTAŬ Be + LEsp 8-9/1898.
2,112 **JUNGI**: ĈEFINE + *subjunkcio.*

2,113 **ĴAŬDO**: ANTAŬ ¶ 1894 + Laŭ Günkel (1996, 186), Z volis eviti la malofta diftongon *aŭ* en vorto tiel ordinara; tial li preferis *ĵaŭdo* antaŭ **ĵeŭdo,* la evidenta transskribo de F *jeudi.* Vd. ank. ps-sf *-aŭ.*
ĴETI: POST *objekto* + *projekcio.*
3,13 SUPRE + *Goldschmidt 1923*: Bildtabuloj por la instruado de Esperanto. 3-a eld. Leipzig.
3,15 **KADENCO**: POST *akcidento* + *paraŝuto.*
3,16 **KADUKA**: POST *laktuko* + *sambuko.*
KAJ: POST 1894 *e* + 1907 *et.*
KAJO: POST 2 ferv. (Ve) + antaŭe *bord/marŝ/ej/o* LEsp 25/1900.
3,18 **KALKO**: ANTAŬ *ŝoseo* + *siliko.*
3,20 **KANALO**: ANTAŬ Be + Espisto 4/1890.
3,21 **KANKRO**: POST Zoologia/astronomia termino + (Eisto 2/1892 ank. med.)...
3,23 **(KAPITALO)**: ĈEFINE + Kp la alternativan eksplikon de Cassel (1931):' La vorto kapitalo... devenas de la latina vorto caput, kapo, kaj rememorigas pri la malnova valortaksado per bovoj, kiuj estis nombrataj je kapoj' (informo de B. Sandelin).
KAPORO: ANTAŬ ¶ Io + Kp ev. *pulvoro.*
3,24 **KAPTI**: POST *akcepti* + *anticipi, emancipi*; POST *participo* + *precipa*; POST *princo* + *principo.*
3,25 **KARCERO**: POST *kanceliero* + *ŝanceli.*
3,28 **KASTANJETO**: POST *sinjoro* + *vinjeto.*
3,32 **KE**: ĈEFINE + Kp *preskaŭ.*
3,33 **KERO**: ĈEFINE + Kp spec. *parkere.*
KERUBO: POST insekson + (kp *serafo*).
3,34 **KIAM**: POST *kiam* Ald + RE.
3,38 **KNABO**: POST puino + [tiu formo tamen ne ekzistas; kp 1882 *pu/-*

ett/aŭ "knabetino"].

3,41 **KOLEKTI**: POST Kp spec. sekv. + k *rikolti.*

3,43 **KOMO**; POST *kóptein* "haki, bati" + (kp *sinkopo*).

KOMEDIO: POST *tragedio* + *tragikomedio.*

3,45 **KOMPANIO**: POST 2) kunesto + (kp krome sub *roto*).

KOMPENSI: ĈEFINE + Kp spec. *rekompenci.*

3,46 **KOMPLIKI**: POST *impliki* + *pliko.*

KOMPONI: POST (1; + Eisto 3/1889; POST Jü + , kp ank. *komponzici/o* "komponaĵo" Eisto 3/1889.

3,48 **KONCEPTO**: POST *escepto* + *percepto.*

3,50 **KONFLIKTO**: ANTAŬ Be + Eisto 4/1890.

3,52 **KONKLUDI**: ĈEFINE + Kp *ŝlosi.*

3,53 **KONSERVI**: POST Ps-pf *kon-* + ¶ 1882 *s'erv-* (sama etimo: PVZ 5, 147).

3,54 **KONSISTI**: POST *ekzisti* + *insisti, persisti.*

KONSTRUI: POST Un + , kp *konstrukci/o* "-o" Eisto 5/1890.

3,55 **KONTO**; ĈEFINE + , ank. *rakonti.*

3,56 **KONTRAŬ**: ĈEFINE + Samfamilia: *renkonti.*

3,57 **KONTUZI**: ĈEFINE + Kp ank. *tipo,* ev. *tusi.*

KONVERSACIO: POST N-ro 20 1889 + *konvers/i* tolerata de Akad. 1967.

KONVINKI: POST Ps-pf *kon-* + ¶ pEo *svaz-*, kp *svas-* "peni konvinki" (ambaŭ el *suas-*, sup. rad. de L *persuadere* "konvinki"), vd. LZ I, 352.

3,58 **KORO**: POST vd. *ĥoro* + ¶ 1881 *kord-*; POST *kuraĝo* + *parkere.*

3,59 **KORKO**: ĈEFINE + Kp *ŝirmi.*

KORNO: POST *karato* + , *rinocero.*

3,60 **KORPO**: POST *temp/us -oris* + , kp ank. *sterko.*

3,61 **KOTLETO**: ANTAŬ Jü + LEsp 12/1898.

3,62 **KOTONO**: ĈEFINE + Kp *tuniko.*

3,63 **KRAMPO**: POST G *krumm* "kurba" + , G ant. *kramph* "kurbigita"; POST *kroĉi* + ,ev. ank. *rampi.*

3,65 **KRESKI**: POST Kp spec. *konkreta* + *rekruto.*

3,69 **KSILOFONO**:

3,70 **KUIRI**: POST *dispepsio* + *pepsino.*

3,72 **KUN**: ĈEFINE + , pref. *ge-* k ps-pf *kata-*.

3,73 **KURBA**: Kial *-b* kaj ne *-v*? Vd. nun Golden en en Esperanto 1/1997, 8: Z evitis **kurv-* pro tabuaj kialoj; li ne volis radikon identan kun tiu de Po *kurwa* "prostituitino".

3,76 **(KVARANTENO)**: ĈEFINE + *pentekosto.*

3,77 **KVIN**: ANTAŬ IoIe + ¶ 1881 *kvin;* ĈEFINE + Kp ank. *punĉo.*

3,78 **LABORATORIO**· ANTAŬ PV + Eisto 5-6/1894.

3,80 **LAKTUKO**: POST Jü + , kp *latug/o* LEsp 12/1898. POST *kaduka* + *sambuko.*

3,81 **(LANDO)**: POST *Islando* + *Nederlando.*

LAPISO: POST *iris/o* + *sifilis/o.*

3,82 **LATERO**: ANTAŬ Jü + 4. POST L stemo + (samtipa: *ulcero*).

LAŬ: POST liston de pseŭdosufiksoj + Kun *laŭ* < *laut* kp *aŭ* < *aut* kaj pEo *kaŭ* "apenaŭ" < *kaum.*

3,83 **LAŬTA**: ĈEFINE + Kp sub *sklavo.*

3,84 **LEGI**: POST 1894: *lekt-* + ¶ 1881 *leg-*; POST *negliĝo* + *prelego.*

LEGIO: ANTAŬ *opini/o* + *komuni/o.*

3,85 **LEĜO**: ĈEFINE + *privilegio.*

3,87 **LEVI**: ĈEFINE + ; krome *(ba)reliefo.*

3,90 **LINGVO**: POST (*persvadi*) + kaj *dv* < *du* en *vidvo.*

3,92 **LOGIKO**: POST *logogrifo* + *silogismo.*

3,94 **LUDI**: POST PVZ 5, 124). + Laŭ Cash 1992 ekzistis en 1882 semantika diferenco inter *bavi* (infane) kaj *ludi* (muzike).

3,98 **MAKARONIO**: POST Be + , kp *makaron/o* Eisto 8/1894.
3,99 **MAKSIMO**: ANTAŬ Jü + LInt 1/1900.
MALGRAŬ: ANTAŬ ¶ Io + ¶ 1894 *malgru.*
3,100 **MANDATO**: ĈEFINE POST *mendi* + *rekomendi.*
3,102 **MAPO**: ANTAŬ PV + Goldschmidt 1923.
3,103 **MARKO**: ĈEFINE + Kp ank. *marŝi.*
3,104 **MAROKO**: ANTAŬ EdE + LEsp 8-9/1898.
3,105 **MASTRO**: POST eo *magistr/o* Jü + ; krome ĝi certe ludis rolon ĉe la kreo de la suf. *-estr.*
3,107 **MEDITERANE/O**: ANTAŬ GD + LEsp 1898; POST *Meza maro* + ; kp *Maro Interlanda* Eisto 3/1894.
3,108 **MEĤANIKO,-K-**: ANTAŬ 8 + tolerata de Akad. 1967.
MEĤANISMO,-K-: POST *-ĥ-* Jü, *-k-* Ve + formoj egalrajtaj laŭ Akad. 1967.
MEJLO: POST *hejti* el G *heizen* + kp sub *ŝajni.*
3,111 **MERKATO**: ANTAŬ PV + Backman 1921.
3,112 **METI**: ĈEFINE + *promesi.*
3,113 **METRO**: POST *mili-* + *penta-*, *peri-*...
3,115 **MIGRI**: ĈEFINE + Kp *prunti* kaj la pref. *mis-*.
3,116 **MILIARDO**: ANTAŬ Jü + Eisto 2/1892.
3,117 **MINACI**: Kp spec. *promeni.*
MINIATURO: POST Be + ; *-a* LEsp supl. 11/1900.
3,120 **MOBILIZI**: ANTAŬ Jü + LEsp supl. 5/1899.
3,121 **MOLUSKO**: ANTAŬ Jü + Eisto 3, 1894.
3,122 **MONDO**: POST *ondo* + *polvo*; POST *rompi* + *tombo*; ĈEFINE + L *mundus* kredeble el Et *munth* "ornamaĵo".
4,8 POST *Is* islanda + *Ji* jida
4,15 **NADLO**: ĈEFINE + , vd. ank. *ŝnuro.*
NAIVA: ANTAŬ F + A *naïve*
4,17 **NASKI**: ANTAŬ ¶ + Kp Günkel (perletere): *naski* estas transitiva laŭ A *bear*, G *gebären.*
NATURO: POST Ps-sf *-ur.* + 1881 *natur-*.
NAŬ: POST Günkel (1992, perletere) + , vd. nun LiF 162/1996, 186).
4,18 **NAVO**: Alternativa semantika klarigo ĉe Pfeiffer s.v. *Schiff*: la signifo '(preĝeja) navo' originas en konfuzo de la Gr vortoj *naós* "templo" kaj *naus* "ŝipo".
NAZO: POST G *Nase* + [-z-]; DO (l. 5) laŭ AG prononco.
4,19 **(NEDERLANDO)**: POST G *(die) Niederlande* (plur.)+ ,kp F *néerlandais* "-a".
NEGRO: POST R *negr.* + ¶ 1881 *negr-*.
NEK: POST A *neither...nor* + kp ank. la duan elementon en G *weder... noch.*
4,20 **NEPO**: POST *nepotismo* + ¶ 1882 *nep-*.
4,24 **(NOKTUO)**: POST F *huette* + *hulotte.*
NOMO: POST L *nom/en -inis* + Kp Ji *nomen.* – POST precipe FI + ,kp ev. *semo.*
NORDO: POST G *Nord* + *Norden.*
4,27 **NUR**: POST G *nur* + Ji *nor.*
4,28 **OBJEKTO**: POST 2) gram. (PV) + ; ank. 3) 'objêto' LEsp 27/1900.
4,29 **OBLIKVA**: ĈEFINE + Kp *sublimato.*
4.30 **OCEANO**: POST APo *ocean* + [Po - ts]; POST G *Ozean* + [-ts-].
4,30 **OFERI**: POST *metaforo* + *semaforo.*
OFICO: POST I *ufficio* + (ĉiuj "ofic/-o, -ejo").
4,31 **OK**: ANTAŬ A *eight* + F *huit.*
OKAZO: POST L *occas/io -ionis* + Kp G *okkasionell* "-a".
4,33 **OKZALO**: POST RE + , kp *oksal-* L Esp 12/1898.
OLEO: POST Kp sekv. + k *vazelino.*

4,34 **ONDO**: POST *inundi* + *sondi.*

4,36 (**OPOZICIO**): POST G *Opposition* + [-z-]; DO l. 4 laŭ prononco de FGI PoR.

ORATORO: POST L *orator* + Kp G *oratorisch* "-a".

4,37 **ORDONI**: POST R *order* "-o" + Ev. mnemonika apogo de G *anordnen* "-i".

4,38 **ORKESTRO**: POST G *Orchester* [-k- + aŭ -c-].

4,39 **ORTO**: POST Kp A + FG.

4,44 (**PALISO**)l. 3: +) POST "-aro".

PALPI l. 6: +) POST "(serĉ)palpi".

4,45 **PAPO**: POS ĉefe sur L + ¶ 1881 *papp-.*

4,46 **PAPIRUSO**: POST PoR *-us* + G *Papyrus.*

4,47 **PARADIZO**: POST malfortan apogon en la fontlingvoj + (kp tamen G plur. *Paradiese* [-z-])...

PARADOKSO: POST G *Paradox* + *Paradoxon.*

PARAFO: POST F *-e* + G *Paraphe.*

4,48 **PARDONI**: ĈEFINE + k G *vergeben* "pardoni" de *geben* "doni".

4,49 **PAROĤO**: POST A...*parochial* + [-k-].

PAROLI l. 2 +) POST "-o, vorto".

4,51 **PASKO**: l. 3: +) POST [-skŭ-]; POST A *paschal* + F *pascal.*

4,53 **PATRO**: POST *frato.* + ¶ 1881 *padr-,* 1882 *patr-.*

4,54 **PAVO**: POST (*cock* "koko"). + Kp Ji *pave.*

4,57 **PENDI, DEPENDI**: ANTAŬ ¶ + Kp semantike G *ab/hängen* "de/pendi".

4,59 **PERCEPTO**; ANTAŬ I *percezione* + G *Perzeption.*

4,60 **PERFIDA**: POST I *-o* + G *perfid.*

4,60 **PERISTILO**: ĈEFINE + Kp *stoika.*

4,63 **PETROLO**: ĈEFINE + *salpetro.*

4,64 **PIEDO**: POST *pioniro* + *trapezo.*

4,66 **PINGLO**: POST *spina* "dorno" + (vd. *spino*).

4,68 **PISTAKO**: POST kiel en la fontlingvoj. + Kp la plurrilate similan *spinaco.*

4,70 **PLATANO**: POST A *plane* + G *Platane.*

4,72 **PLENA**: POST (kp *kompleta*) + , *supplere* "kompletigi" (kp *suplemento*).

4,73 **PLEZURO**: POST F *plaisir...* + G *Pläsier* [-zi:´r].

4,74 **PLUGI**: POST R *plug* "-ilo". + Kp Nd *ploegen* [-u-] "-i", *ploeg* [-u-] "-ilo".

4,76 **POEZIO**: POST G *Poesie* + [-z-].

4,77 **POLISO**: POST F *police* [-ís] + G *Police* [-í:se'].

POLURI: POST LR *politura* "-o" + G *Politur* s.s.

4,80 **PORKO**: POST L *sus* + , kp A *swine,* G *Schwein.*

4,81 **POSTULI**: POST [H *-ado*] + G *Postulat.*

4,82 **POŜTO**: POST 1967,46) + Interesa estas la Ji formo *potsht.*

POZICIO: POST G *Position* + [-z-]; DO Eo *-z-* laŭ la prononco de FG IPoR.

4,83 **PREDIKI**: POST RE + , kp *serm/o* (< A *sermon*) "-o" N-ro 15 1888; l. 2 +) POST "-anto".

4,84 **PREPARI**: POST G *präparieren* + (kem., farm.).

4,86 **PRESKAŬ**: ANTAŬ ¶ Io *preske* + ¶ 1894 *presku.*

4,87 **PREZIDI**: + [-z-] POST G *präsidieren, Präsident* + [-z-].

4,88 **PRIVILEGIO**: G *Privileg, -ium*†.

4,88 **PRO**: POST *pri* (antaŭlasta linio) + , ank. pref. *pra-.*

4,90 **PROFUNDA**: POST L *profundus.* + Kp G *profund* (fig.) "-a, ĝisfunda".

4,92 **PROMENI**: POST F...(refl.) + G *promenieren.*

4,92 **PROPAGANDO**: POST RE + , kp *propag/ad/i* Eisto 5/1890.

4,93 **PROPRA**: POST radiksilabo. + Kp *sobra.*

PROTAGONISTO: POST IPo(H) *-a* + G *Protagonist.*

PROTEKTORATO: POST (H *-ado*) + G *Protektorat.*

4,95 **PROVIZORA**: POST G *-orisch* + [-z-]; DO Rilate Eo *-z-* (FGIPo).

4,95 **PROZELITO**: POST G *Proselyt* + [-z-]; DO ...voĉigita kun apogo de FGIPoR.

4,96 **PRUVI**: POST LZ I, 352. + Kp *prov-* "sperti" (samloke).

4,97 **PULĈINELO** POST (H *-chinelo* [-ĉ-]) + G *Pulcinella* [-ĉ-].

4,98 **PUMIKO**: ĈEFINE + Kp sub *ŝaŭmi.*

4,101 **RABI**: ĈEFINE POST *rapida* + *uzurpi.*

4,102 **RABIO**: POST (H *rabia* 1,2) + Kp G *rabiat* "-a, furioza".

RADIO: POST 1881 *raj-* (1) + , vd. LZ I, 35: "oportunigita radio" (Z).

4,105 **RASO**: POST GR + kaj F prononco [ras].

RAŬKA: POST (H *ronco*) + Kp G *rauh* "kruda; (pri voĉo) raŭka".

4,108 **REGISTRO**: POST F *régistre* + G *Register.*

REGNO: ĈEFINE + Kp pĜ **rikja-* "regno": G *Reich,* Sv *rike,* Gt *reiki.*

REĜO: ĈEFINE + Etimologie identa estas *riĉa*; kp ank. *regno, rojalisto.*

4,109 **REKOMENDI**: POST RE + , kp *rekomand-* Eisto 4/1890.

4,112 **RESPONDI**: POST I *rispondere* (1, 2,3) + G *korrespondieren* (2). – POST Ps-pf *re-*. + ¶ 1882 *pond-* (kp, kun simila aferezo, *mand-* "demandi". – ĈEFINE POST *korespondi* + *spondeo.*

4,114 **REZEDO**: G *Reseda* [-z-]; DO apogata de FGIPoR.

REZERVI: G *reservieren* [-z-]; DO kun apogo de AFGPoR.

REZIGNI: POST F *résigner* [-z-] + G *resignieren* [-z-].

REZIGNACIO: G *Resignation* [-z-].

REZULTI, REZULTATO: G *resultieren* [-z-], *Resultat* [-z-].

4,116 **RIGARDI**: ANTAŬ ¶ 1881 + Kp *aspekto.*

4,118 **RISMO**: ANTAŬ Jü + LEsp 23/1899.

4,119 **RIVERO**: POST (< G *Strom* + [ŝtr-] "-ego").

4,120 **ROMBO**: POST F *rhombe* (1†) + G *Rhombus*

4,121 **RONDO**: POST 1882 *rond-* + (2).

ROSMARO: POST "mara ĉevalo" + laŭ F *cheval marin,* I *cavallo marino.*

4,122 **ROZO**: G *Rose* [-z-]; DO prononce AFGIPoR.

4,123 **RUBUSO**: POST G *Brombeere* + ; kp *crusbere* sub *ribo.*

4,123 **RUMANO**: ANTAŬ PR + Eisto 2/ 1889.

Korektendoj vol 1 - 4

Mi neglektis bagatelajn erarojn, speciale tipografiajn (ekz. mankanta ligstreketo), kiuj kredeble ne malfaciligas la uzadon.

La signo > signifas "anstataŭigu per"; l. signifas "linio"; minussigno antaŭ lininumero signifas "de malsupre".

1,19 **ADICIO**: Kvankam la donita etimologio restas ebla, oni nun preferas originan sencon "al-meti" de HE rad. **dhê-* (vd. sub *fari*; kp *kredi, perdi*).

1,22 **AGRAFO** l. 1: F *agraffe* > F *agrafe.*

1,25 **AKSELO** l. – 2: FORIGU 2.

1,26 **AKUŜI** l. – 2: F "al" > F *à* "al".

1,28 **ALĤEMIO** l. 2-3 G *Alchimie* [-c'-] > [-c-].

ALKO l. 2: G *Elch* [-k] > [-c].

1,32 **AMUZI** l. 2 G *amüsieren*: FORIGU †.

ANALIZI l. 1: A *ana/lyze* > A *ana/lyse* (Us *-lyze*).

1,33 **ANARĤIO** l. lasta: vd. *arĥitekto* > vd. *arkaika.*

ANEKDOTO l. 4: *anekdotá* > *anékdota.*

ANĈOVO l. 2 G *Anschovis* > *An(s)chovis.*

1,34 **ANGULO** l. lasta: "fiŝhoko" > "fiŝkaptilo".

1,38 **APOGEO** l. 4: Gr *apógaion* > Gr *apógeion.*

1,39 **APOZICIO** l. lasta: vd. *pozicio* > vd. *pozitiva.*

1,40 **ARESTI** l. 2-3: G *arretieren* (kp *Arrestat* > G *arretieren*† (kp *Arrestant.*

1,41 **ARKAIKA** l. 3: [-c'-] > [-c-]; analoge ĉe **ARKAISMO.**

ARKEOLOGO l. 4: G *Archäolog* [-c'-] > G *Archäologe* [-c-].

ARKIPELAGO l. 4: [-c'-] > [-c-]; analoge ĉe **ARKITEKTO.**

1,42 **ARKIVO** l. 3: [-c'-] > [-c-].

1,44 **ASOCIO** l. 7: 1983 > 1893.

1,45 **ASTROLOGO** l. 2: G *Astrolog* > G *Astrologe.*

1,46 **ATLANTIKO** l. 1: EG > Jü.

ATLASO l. 4 – 6: Moderna...Po *satyna* > Sinonimo en la senco 1: *sateno,* vd. tiun..

1,54 **BARBIRO** l. 2: [ír] > [í:r].

1,60 **BIRMO** l. 1: FORIGU ne ĉe Z.

1,66 **BROGI** l. 7: ,krome > kaj; FORIGU Z.

1,67 **BUBO** l. 2: eksluzive > ekskluzive.

1,68 **BULO** l. 15: *ba- loti* > *baloti.*

1,69 **BULGARO** l. 1: La E-isto 1890 > Eisto 3/1889.

1,74 **CIKLO** l. 7: Sa *cakra-* > Sa *ĉakrá-.*

1,76 **CITI** l. 5, 6: *movigi* > *movi.*

1,79 **ĈARNIRO**: Forigu la interspacon inter 1894 kaj *carnier-.*

1,81 **ĈIAL** l. 1: ER > PR.

1,83 **ĈU** l. – 1,2: (vd. la sekcion pri

korelativaj vortoj) > (vd. tiun).

1,86 **DEĈIFRI** l. 2: FORIGU † POST G *-chiffrieren.*

1,87 **DEDUKTI** l. 2: FORIGU † POST G *de/duzieren.*

DEGENERI l. 2: FORIGU † POST G *-ieren.*

1,90 **DEMONO**: G *Démon* > G *Dämon.*

1,91 **DESPOTO** l. – 2,3: Gr *pósis* "mastro" > Gr *pósis* "edzo".

1,92 **DEZERTO** l. – 2: 1981 > 1981a.

1,100 **DOLARO** l. 4: G *Thaler* > G *Thaler*† (nun: *Taler*).

1,101 **DRAKMO** l. 6: AFGR > AFR.

2,15 **EDIFI** l. – 2: *mistifiki* (Z) > *mistifiki* (OA 8).

2,22 **EKZILO** l. lasta: (vd. *soleo)* > (vd. *sojlo*).

EL l. – 2: ps-pf *ek-* k *eks-* > ps-pf *e(k)s-*.

2,24 **(ELIPSO)** l. 8: plano > ebeno.

2,27 **EPOKO** l. – 1,2: kp spec. *paroĥo* > ev. ank. *paroĥo.*

2,33 **EŬROPO** l. 1: f > f '.

2,39 **FARI** l. 14: *defekto* > *difekto.*

2,43 **FERDEKO** l. lasta: vd. ank. *por* > vd. ank. *pro.*

2,49 **FLUGI** l. lasta: *pluvi* > *pluvo.*

2,53 **FOTOGRAFI** l. – 3: *telegrafi* > *telegrafo.*

2,55 **FRATO** l. – 2: (vd. *matrono*) > (vd. *mamo*).

FRAŬLO l. lasta: *por* > *pro.*

2,65 **GEOLOGO** l. 5: IP > Po; l. 8: *arĥeologo* > *arkeologo*; l. lasta: *arĥeolog/o, io* > *arkeolog/o, -io.*

2,68 **GLOBO** l. 4: *glo-bus/o* > *globus/o.*

2,74 **GUDRO** l. 4-5: *arbo, ĉamo, falko* > *piŝto, sturgo.*

2,75 **GVARDIO** l. 2: [gj-] > [gŭ-].

2,76 **ĜEMELO** l. 4: "ĝemeloj" > "Ĝemeloj".

2,84 **HEROO** l. lasta: FORIGU k *servi.*

2,85 **HIERARĤIO** l. 3: G *Hierarchie* [-k-] > [-c-].

2,89 **HORIZONTALA** > **HORIZONTAL/A.**

2,91 **HUNDO** l. – 3: *kuon* > **kuon.*

2,95 **IAM** l. – 2: 1887 > 1888.

2,96 **IEL** l. 3-4: Ia *de alicun maniera* > *in qualque modo.*

3,5 l. – 7: *thing* > *the.*
l. – 6: *the* > *thing.*

3,7 l. 12: (1964) > (1934).

3,13 l. – 5: 8109 > 109.

3,29 **KATAPLASMO** l. – 2: muldi > modli.

3,33 **KERUBO** l. 7: mallonga > Mallonga.

3,45 **KOMPENSI** l. lasta: (vd. tiun) > (vd. sub *pendi*).

3,48 **KONCIZA** l. – 2,3: (kun necerta etimologio) > (vd. *decidi*); l. – 1,2: FORIGU Samfamilia ... *preciza..*

3,49 **KONDIĈO** l. 3-4: Unika...radikfino: > Nekutima traktado de la radikfino (vd. la ps-sf *-cio*):.

KONDUKI l. – 2: *produkto* > *produkti.*

3,51 **KONJAKO** l. 3: H *con'ac* > H *coñac.*

3,53 **KONSEKRI** l. lasta: *sakro* > *sakramento.*

3,64 **KREDI** l. 10: unua > dua; l. 11: dua > unua.

3,65 **KRIBRI** l. 5: *sekreta* > *sekreto.*

3,67: Elfalis la lasta linio de la dekstra kolumno; ĝi tekstu:
-certoj sin varmigi sur glataj ŝtonoj. – En la.

3,79 **(LACA)** l. 6: La ŝanĝo estas unika > La ŝanĝo estas nekutima (ĝi troviĝas cetere nur en *senco*)...

3,80 **LANO** l. – 2: *vila* > *vilo.*

3,82 **LASTA** l. 7: Lin > Li.

3,108 **MEĤANISMO** l. 5: *meĥanismo* > sub *meĥaniko.*

MEKSIKO l. 6: 1992, 20-62 > 1992, 60-62.

3,113 **METEOROLOGO** l. 4: G *Meteorolog* > G *Meteorologe.*

METRO l. – 2: *si/-metrio* > *si/metrio.*

3,118 **MIOPA** l. 7-8: (vd. *optiko*) > (vd. sub *okulo*).

3,121 **MONARĤO** l. 4: [-k] > [-c].

4,17 **NATURO**: La lasta alineo estas en malĝusta formato.

4,18 **NE** l. – 3: *-in* 1 > *-in* 2.

4,44 **PALISANDRO**: el fontlingva *-ss-* > FI *-ss-*.

PANEO l. 6: *Luppe* > *Lupe.*

4,47 **PARALELOGRAMO** l. 3: *Parallelogram* > *Parallelogramm.*

4,50 **PAROLI** l. – 9: Ĉ > Ĉirkaŭ; l. – 8: IoIeIa *parlar* > Io *parolar,* IeIa *parlar.*

4,52 **PASTRO**: METU G *Pastor* POST R *-or.*

4,53 **PATRO** l. 9: fp > kp.

4,57 **PENDI** l. lasta: *spezi* > *spezo.*

4,61 **PERLAMOTO** l. 1 *Perlmutter* > *Peerlmutt(er)*. – l. 9 (konsiderebla > laŭ la mallonga G formo aŭ.

4,62 **PESI** l. 19 vortojn > vortoj.

4,81 **PORTRETO** l. – 3: *ekstrakto* > *trakti.*

4,82 **POTASO** l. 2-3 *Potta-sche* > *Pottasche* .

POVI l. 7: divesaj > diversaj.

4,85 **(PREMI)** l. 3-4: G *drücken* "premi; presi" > G *Druck* "premo; preso"

PREMIO l. 2: *Prämium* > *Prämie.*

4,87 **PREZIDI** l. 7-8 Malforta > Sufiĉa; l. 9 (F kaj PoR agantnomo) > (FG kaj PoR agantnomo): l. 9-12 FORIGU ĝi estas....1987, 115.

4,105 **RASPI** l. 5: G *Raspe* > G *Raspel.*

4,106 **REDAKCIO** l. 13: FORIGU † POST G *Redakteur.*

4,116 **RIGARDI** l. 5: 1881 *vit-* > pEo *vit-* laŭ LZ I, 352; kp 1881 *vitt-.*

4,121 **RONDO** l. 2-3: G *Runde* (1) > G *Rund* (1), *Runde* (2); l. 4: FORIGU *Kreis* "cirklo, rondo, societo".

Rimarko. La apero de novaj grandaj Ia-vortaroj, el kiuj mi disponis pri tiuj de Ruhrig (G-Ia), Cleij (Ia-Nd) kaj Castellina (I-Ia) ebligis plenigi multajn el la indikitaj manklokoj en la Ia vortmaterialo. Sen pretendi kompletecon, mi opinias utila tie ĉi doni la vortojn trovitajn post la ellaborado de la unuaj volumoj (mi uzas la mallongigojn Ru, Cj kaj Ca por la respektivaj vortaroj).

AKARO var. *acaro* Ru;
AKCIPITRO *astur* Ru, var. *astor* Ca;
ALCIONO *martin-piscator* Cj;
ALUNO *alume* Cj;
ANAGALO *anagallis* Cj;
ANĈOVO *anchova* Cj, *anchoa* Ca;
ARNIKO *arnica* Cj;
ASPIDO *aspide* Cj;
ATRIPLO *atriplex* Cj;
BARDO *bardo* Cj;
BASKO *cauda* Ca;
BAZILISKO *basilisco* Cj;
BEDO ald. *areola, platte-banda* Ru;
BROKANTI *mercar con antiqualias* 'komerci per malnovaj aĵoj' Ru;
DATURO *datura* Cj;
DEKOLTI kp *decoltage* Ca, *décolleté* Cj "-aĵo";
DITIRAMBO *dithyrambo* Cj;
DORLOTI *vitiar* Ru (IED);
DRAGONO *dragon* Cj;
DRINKI *biber multo* 'trinki multe' Ru;
EPIGRAFO var. *epigrapho* Cj;
FRAJO ald. *freca, frega* Ru, *fregola* Cj;
FRANGOLO *frangula* Cj;
GAJLO *nuce de galla* Ru;
GARBO ald. *garba* Cj;
GURDO ald. *organetto* Cj;
HETMANO *hetman* Cj;
HISKIAMO *hyoscyamo* Ru;
ĴAKETO (1) *jaquetta* Ru;
KALEŜO var. *caleche* Cj;
KAMLOTO *camelot* Cj;
KARASO *carassio vulgar* Cj;
KARPENOald. *carpino* Cj;
MERLANGO *merlano* Cj;
PUNCA *ponceau* Cj.

Glosaro pri kelkaj lingvistikaj terminoj uzitaj (por fonetikaj kaj gramatikaj terminoj ĝenerale, vd. PIV.)

aferezo (PIV): forigo de vortkomenca litero aŭ silabo.
afrikato (PIV): kombino de plozivo kaj frikativo havantaj la saman artikulacian punkton.
agantnomo: substantivo signifanta faranton de verba ago.
agonomo: substantivo signifanta verban agon.
antonimo (PIV): mal-vorto, vorto rekte kontraŭsignifa al alia.
aoristo (PIV): verbtempo en Gr esprimanta (precipe) pasintan agon sen konsidero pri daŭro aŭ nedaŭro.
apofonio: vokalalterno en grupo da parencaj (precipe verbaj) vortformoj, lastvice dependa de fenomenoj en la hindeŭropa pralingvo. En Gr/L la ĉefa alterno estas tiu de *e* kaj *o* (kp ekz. por Gr *skep[tik-]* kaj *[tele]skop-*,por L *teg-* kaj *tog-*); alia alterno estas *a : o* (vd. sub *sinagogo*). En ĝermanaj lingvoj la vokalalterno estas speciale rimarkebla en la neregulaj verboj (ekz. G *fliegen,* impf. *flug*; *treffen,* impf. *traf*: vd. sub *draŝi, flugi, ŝlosi, ŝovi, trafi, varbi*).
apokopo (PIV): forigo de silabo(j) en fino de vorto.
aŭgmentativo: eg-vorto, vorto derivita per afikso indikanta nocion de grandeco. Malo: *diminutivo.*
bazo: signifoporta kerno de vorto. – RIM. Por HE elemento ne verbkaraktera mi ofte'uzis la esprimon "HE bazo" (kontraste kun *radiko*): vd. ekz. *alno.*
cerebralo: sono produktata metante la langon kontraŭ la ostan palaton post la alveoloj.
deponento: verbo montranta pasivajn formojn kun aktiva senco.
diatezo: verba voĉo (nome aktivo, medialo, pasivo).
digrafo (PIV *digramo*): grupo de du literoj uzataj por reprezenti unu solan fonemon.
duobligo: ripeto de (parto de) la radiko komence de vorto. Ekz. L *cucurri,* perf. de *currere.*
elipso (PIV): forigo de unu aŭ kelkaj vortoj ne nepre necesaj por la kompreno. Vd. ekz. sub *avizo.*
endokopo (neologismo, el Gr *éndon* "interne" kaj *kopê´* "hako"): elpreno de silabo el la interno de vorto por alia uzo, ekz. kiel afikso aŭ kategoria rekonilo. Vd. ekz. *-eg.*
enklitiko (PIV): vorto senakcenta, prononcata kvazaŭ parto de la antaŭa vorto. Malo: *proklitiko.*
epentezo (PIV): enmeto vortinterne de litero aŭ silabo sen etimologia pravigo. Vd. *liuto.*
esperantismo (en tiu ĉi verko): lingva apartaĵo de Eo imitita de alia L.I.
etimo (PIV): vorto de kiu alia vorto devenas.
faktitiva verbo: ig-verbo. Sin.: *kaŭzativa verbo.*
fonetismo (PIV): sona konsisto de vorto.
grafismo (PIV): skriblitera konsisto de vorto.
haplologio: ellaso de unu el du identaj silaboj sekvantaj unu la alian. Vd. *mineralogio.*
hiato (PIV): senpera sinsekvo de vokaloj ne formantaj diftongon.
hiper/grekismo (-germanismo ktp): trokorekta formo kredata esti pli ĝusta ol la formo kiun ĝi anstataŭas.
ilativo: kazo indikanta enpenetron en ion.
intensa verbo: verbo derivita de alia verbo por marki intensecon de la ago. Vd. ekz. *agiti, dikti.*
infikso (PIV): afikso metita interne de radiko. Vd. ekz. sub *venki.*
italikaj lingvoj: la lingvoj de antikvepoka Italujo, precipe Latina, Oska, Umbra.
internaciismo: internacia vorto aŭ esprimo.
kalkeo: tradukita pruntvorto. Sin.: *paŭs-*

(aĵ)o.

kaŭza verbo: ig-verbo, verbo esprimanta ke la subjekto igas fari la agon anstataŭ fari ĝin mem. Sin.: *faktitiva verbo.*

komenca verbo: ek-verbo, verbo indikanta komenciĝantan agon.

konsonantismo: konsonantaro de iu vorto.

likvido (PIV): komuna nomo de l- kaj r-sonoj.

lokativo: kazo indikanta lokon ("en...", "sur..." ktp).

malasimilo (PIV): modifo de parolsono, kiu tro similas al alia apuda sono.

malindiga: vd. *pejorativa.*

medialo (PIV): verba voĉo/diatezo esprimanta ke la verba ago koncernas nur la agantan subjekton.

metafonio: vokalŝanĝo en ĝermanaj lingvoj (malantaŭa vokalo > antaŭa vokalo) pro asimilo al ekzistinta sekvanta vokalo (ekz. G *a > ä, o > ö, u > ü*).

metatezo (PIV): ŝanĝo de la sonordo interne de vorto (PIVa ekzemplo: *formaĵo/fromaĝo*). Kp *krokodilo.*

oblikva (pp kazoj): ne-nominativa.

palatalizo: ŝanĝo de nepalatala al palatala sono, ekz. *k > ĉ.*

parazita: *p. sono/litero* estas enmetita por plifaciligi la prononcon de konsonantgrupo. Ekz. F *-b-* en *semblable* "simila".

paus(aĵ)o (PIV): tradukita pruntvorto. Vd. ekz. sub *akcento.* Sin.: *kalkeo,*

pejorativa: *p. afikso* (ekz. *-aĉ*) esprimas malindigon.

perfektiva: *p. aspekto* rigardas la verban agon de la vidpunkto de fino/plenumo/rezulto.

plivastigo (de radiko): aldono de unu-du fonemoj al la radiko, ne ŝanĝantaj ties signifon.

popola etimologio: transformo de fremdvorto tiel ke ĝi similas al vorto en la propra lingvo kun simila aŭ parenca signifo. Vd. ekz. sub *arbalesto.*

proklitiko (PIV): vorto/partikulo dependa de la sekva akcentata vorto kaj prononcata kune kun ĝi kiel fonetika unuaĵo. Ekz.: *la.*

pro(s)teza vokalo: vokalo aldonita komence de vorto, en kelkaj romanaj lingvoj por plifaciligi la prononcon (ekz. F *espérer* "esperi"), en Gr antaŭ vortkomenca *r-* pro nekonata kialo (ekz. Gr *erythrós* "ruĝa").

radiko (PIV): 1) ĉefelemento de Ea vorto ("nia U.V. enhavas tri mil radikojn"; 2) la laste analizebla elemento de la parolo. Rim. Al HE radikoj oni kutime atribuas verban karakteron (kp *bazo*).

radikalo (PIV): vd. *stemo.*

retrograda (pp derivado): inversa derivado, farata per forpreno de afikso (ekz. *fraŭlo* estas derivita de *fraŭlino*).

silabiga (pp la sonoj [l,r,m,n]): povanta formi silabon.

sinkopo (PIV): mallongigo de vorto pro malapero de interna vokalo.

stemo (A *stem,* G *Stamm*; PIV *stamo, radikalo*): kio restas el vortformo, kiam la fleksiaj finaĵoj estas forprenitaj.

supin/o (PIV), **-a radikalo**: unu el la tri stemoj/radikaloj de la L verbo (la du aliaj estas la *prezenca,* videbla i.a. en la infinitivo, kaj la *perfekta,* neuzata en vortformado), formita per la sufiksoj *t/it/s* kaj estanta deirpunkto por la formado de la participo perfekta kaj certaj sufiksderivaĵoj (vd. ps-sf *-cio, -iv-* *-or 1, -or(i), -ur*).

teleskopa: *t. vorto* estas formita kombinante partojn de du aŭ pluraj vortoj (ekz. Eo *selakto* el L *serum lactis*).

tjurkaj lingvoj apartenas al la lingvofamilio por kiu Tu estas la plej grava reprezentanto.

vokalismo: la vokalaro de iu vorto.

Postparolo

Kiam la unua volumo de EVE aperis en 1989, mi esprimis la esperon, ke estu preta la vortaro je la centdekjara jubileo de la lingvo. Iamaniere tiu mia tasko fakte estis plenumita, ĉar la kvina volumo nun prezentata ekzistis en manuskripta formo jam en 1997. Bedaŭrinde cirkonstancoj ekster mia kontrolo kaŭzis nenormale longan gravedecon kaj tardan naskiĝon.

Multo okazis dum la okdekaj kaj naŭdekaj jaroj sur la kampo de esperanta etimologio. Unue estu menciita la "Etimologia vortareto pragmata de Esperanto" de S. Yamasaki (1991), kiu ja ĝenerale limigas sin al citado de anglaj vortformoj sed havas la grandan meriton ampleksi ankaŭ la neoficialajn vortojn. Plue: G. Mattos esploris "La deveno de Esperanto" (1987); A. Cherpillod analizis "La Zamenhofa radikfarado" (1990) kaj prezentis la etimologion de "Mil ekzotaj vortoj" (1992); A. Albault aperigis "Multlingva glosaro pri landnomoj" (1991); B. Golden daŭrigis publikigadon de artikoloj pri etimologioj kaj radikaj kaj afiksaj. Kaj – ne lastrange! – la mankanta parto de la "Enciklopedia vortaro esperanta-germana" de E. Wüster estis eldonata en mikrofilma formo (1995), tiel ke ĝi estis al mi disponebla por la kvina volumo.

Mi dankas tiujn, kiuj kun intereso sekvis la ellaboradon. Unu esperantologo, C.J. Günkel, faris al si la penon trakribri la volumojn 1-4 kaj proponi aron da aldonendoj kaj korektendoj. Tio estis utila antaŭ ĉio por la germana vortmaterialo. Dank' al donaco mi povis refreŝigi germandevenajn etimologiojn per la nova "Etymologisches Wörterbuch des Deutschen" de W. Pfeifer (1993). Por la franca kaj itala, la novaj vortaroj de J. Le Puil & J.-P. Danvy (F-Eo, 1992) respektive C. Minnaja (I-Eo, 1996) faris bonajn servojn.

Videble etimologio denove estas enfokusigita en la esperantologio (kvankam ankoraŭ mankas etimologia sekcio en la Akademio). Ĉu mia verko instigos kaj helpos tiutemajn esplorojn, tio povos esti prijuĝata nur post relative longa tempo de uzado. Tamen estas eble ne tro aŭdace aserti, ke utilas havi facile alireblan kolekton de ĝisnunaj klarigproponoj kaj hipotezoj. Mi esperas, ke tiun servon EVE alportos al la esperantistaro.

Göteborg, printempe 2001.

Ebbe Vilborg

ETIMOLOGIA VORTARO DE ESPERANTO
VOLUMO 5: S – Z

ISBN 91 85288 23 3